

Interlingvistikaj Studoj

Komunikado kaj esperanto

Redaktis

Ilona Koutny



Komunikado kaj esperanto



Universitato Adam Mickiewicz – Uniwersytet im. Adama Mickiewicza
Interlingvistikaj Studoj – Studia Interlingwistyki

Komunikado kaj esperanto

Redaktis
Ilona Koutny



Poznań 2023

INTERLINGVISTIKAJ STUDIOJ 3

Redaktanto de la serio – Redaktor serii: Ilona Koutny

Reviziantoj – Recenzenci: Nicolau Dols, Michael Farris,
Sabine Fiedler, Michele Gazzola, Ilona Koutny

Bildo sur la titolpaĝo – Obraz na okładce: Katalin Kováts
Plano de titolpaĝo – Projekt okładki: Ilona Koutny

© Teksto – Tekst: Aŭtoroj – Autorzy

© Bildo sur la titolpaĝo – Obraz na okładce: Katalin Kováts

© Enpaĝigo – Edycja: Wydawnictwo Rys

Wydanie I
Poznań 2023

ISBN 978-83-67287-90-6

DOI 10.48226/978-83-67287-90-6

Wydanie:



Wydawnictwo Rys
Dąbrówka, ul. Kolejowa 41
62-070 Dąbrówka
tel. 600 44 55 80
e-mail: tomasz.paluszynski@wydawnictworys.com
www.wydawnictworys.com

Enhavtabelo

Antaŭparolo.....	7
Ilona KOUTNY Enkonduko al komunikado	9
Komunikado el diversaj aspektoj	
Humphrey TONKIN Lingvo kaj socio.....	27
Vicente MANZANO-ARRONDO Psikologio de komunikado.....	45
Bengt-Arne WICKSTRÖM Lingvo kaj ekonomiko	60
Marc BAVANT Specifeco de reta komunikado kaj ĝentileco en ĝi.....	103
Milan KOLKA Reta komunikado	115
Arya BHASKARA FERDUZI Memeo kaj esperanta komunikado	126
Rafał DARASZ Signolingvoj en la kunteksto de loka kaj internacia komunikado	133
Maurizio GIACOMETTO Komunik-sistemoj ĉe katoj: kiel katoj komunikiĝas kaj kial ili miaŭas?	142
Internacia komunikado	
Humphrey TONKIN Komunikaj rajtoj	153
Humphrey TONKIN Inkludo kaj ekskludo en la lingvopolitiko	173
Detlev BLANKE Esperanto, la esperanta lingvokomunumo kaj lingvopolitiko	200
Fabio FORTES La kontribuo de Esperanto al la debato pri komunikado en multlingva mond-ordo...	220
Michael FARRIS La internacia angla: demandoj pri egaleco kaj normoj.....	231

Interkultura komunikado

Ilona KOUTNY

Interkultura komunikado kaj Esperanto.....247

GONG Xiaofeng

Komparoj en la parola kaj korpolingva komunikado inter ĉinoj kaj eŭropanoj ... 261

Ilona KOUTNY

Ĝentileco en internacia kunteksto per la uzo de Esperanto273

Antaŭparolo

Komunikado – interŝanĝo de informoj – iĝis baza afero en la 20-a jarcento kiun la tekniko pli kaj pli subtenas. Homoj komunikas parole, skribe kaj ankaŭ bilde; persone, telefone aŭ rete, sed ankaŭ per sia konduto kaj aspekto. Komunikado povas okazi unudirekte kiu ĉefe karakterizas la amaskomunikadon aŭ plurdirekte. La internacia kaj interkultura komunikado iĝis ĉiutaga realeco pro la tutmondiĝo, tiel povas okazi konfliktoj pro la kulturaj kaj lingvaj malsamecoj. Ilona KOUTNY provizas trarigardon en sia enkonduko al la temo.

La unua parto de la libro **Komunikado el diversaj aspektoj** prezentas malsamajn alirojn al la tereno. Humphrey TONKIN (GB/Usono) donas larĝan bildon pri esploro de lingvoj kaj fokusiĝas al iliaj socia, ekonomia, politika flankoj en komunikado, tuŝas la rilatajn problemon de registroj, identeco kaj lingvoplanado. Vincente MANZANO-ARRONDO (Hispanio) analizas la neraciajn, emociajn influojn al komunikado, montras ke homoj adaptiĝas al grupa pensmaniero, proponas tiel pli bone kompreni la sukceson kaj malsukceson de la disvastigado de Esperanto. Bengt-Arne WICKSTRÖM (Svedio/Aŭstrio) detale analizas la ekonomian flankon de lingva komunikado kelkfoje menciante ankaŭ la kazon de Esperanto.

La reto transprenis grandan parton de komunikado, pro tio necesas esplori ĝiajn rolon, formojn kaj ankaŭ la ŝanĝiĝintan ĝentilecon en tiu ĉi medio. Pri tio temas la kontribuoj de Marc BAVANT (Francio) kaj Milan Kolka KOLKA (Ĉeĥio). La memoj estas nova fenomeno en la reta komunikado, kiuj aperas ĉefe en junulara reta komunikado – tion skizos Arya FERDUZI (Indonezio).

Signolingvo aŭ gestolingvo helpas la komunikadon de surduloj kaj malbone aŭdantoj. Pri ties historio raportas Rafał DARASZ (Pollando), mencias la internacian signolingvon kaj Esperanton. Evoluintaj bestoj havas nelingvan komunikadan sistemon, per kiu ili povas rilati ankaŭ al homoj, al tio apartenas la komunikado de katoj kiun priskribas Mauricio GIACOMETTO (IT/GB).

La dua parto **Internacia komunikado** entenas 5 studojn. Humphrey TONKIN analizas la rajtojn komuniki en historia kaj politika kunteksto, prezentas favorajn rezoluciojn al Esperanto. Lia sekva artikolo traktas la problemon de inkludo kaj ekskludo en lingvopolitiko surbaze de Afriko, Eŭropa Unio kaj la Unuiĝintaj Nacioj. La studo de Detlev BLANKE (Germanio) prezentas la rolon de Esperanto en internacia komunikado, la lingvopolitikon de Esperantio kiu signifas – laŭ lia vortumo – publikan klopodadon disvastigi kaj akceptigi la lingvon Esperanto, utiligi ĝin, influadi ĝian statuson. Fabio FORTES (Brazilo) diskutas la kontribuon de Esperanto al la debato pri komunikado en multlingva mond-ordo. Fine Michael FARRIS (Usono/Pollando) analizas la rolon de la angla lingvo en la nuntempa mondo kaj problemojn de la internaciiginta angla.

La tria parto **Interkultura komunikado** komenciĝas per la studo de Ilona KOUTNY (HU/PL) pri la esenco de la tereno, ecoj de interkultura kompetento kaj kial Esperanto povas bone plenumi la rolon de interkultura komunikilo. GONG Xiaofeng (Ĉinio) komparas la ĉinajn kutimojn de komunikado kun la eŭropaj kaj atentigas pri eblaj problemoj en interkultura komunikado. La lasta studo de Ilona KOUTNY traktas la lingvan ĝentilecon en internacia kunteksto surbaze de enketo en Esperantio, konkludante ke membroj de la memelektita lingvokomunumo uzas pli neformalan komunikadon.

Komunikado kaj Esperanto estas la tria volumo de la universitataj lernolibroj de la Interlingvistikaj Studoj kiu ĉerpas el la 25-jaraj spertoj por doni superrigardon pri komunikado kaj ĝia rilato al Esperanto. La kontribuantoj estas instruistoj kaj studentoj de la Studoj: 13 el 11 landoj certigas la internacian aliron al la problemoj.

La prilaboron de la temoj helpas la *Demandoj kaj diskuttemoj* fine de la studoj. La legantoj estas bonvenaj kompletigi la materialon, sendi siajn rimarkojn. La verko celas ne nur la studentojn de la postdiplomaj kaj la novaj magistrasaj studoj pri interlingvistiko de AMU, sed ĉiujn kiuj interesiĝas pri la baza temo de nia epoko, komunikado kaj la rolo de Esperanto en tio.

La *Interlingvistikaj Studoj* de Adam-Mickiewicz-Universitato (AMU) ekde 1998 ofertas internacian postdiploman studprogramon kiu – laŭ la vasta senco de interlingvistiko – envolas historion de planlingvoj, internacian kaj interkulturan komunikadon, bazajn nociojn de lingvistiko kaj koncentriĝas al la plej sukcesa planlingvo/interlingvo, Esperanto, al ĝiaj lingvistikaj, kulturaj kaj historiaj aspektoj.

En la studjaro 2022/23 startis magistrasaj studoj por internacia studentaro kombine la suprajn terenojn (en Esperanto) kun informmastrumado (en la angla).

La unua libro en la serio *Interlingvistikaj Studoj* estis **Interlingvistiko** de Věra Barandovská-Frank (2020) kiu traktis planlingvojn kaj lingvoplanadon. La dua prezentis la **Esperantan kulturon** superrigarde kaj iujn terenojn pli detale (2022). Tiuj ĉi libroj estas nemalhaveblaj en universitata instruado de esperantologio kaj interlingvistiko, ja ne ekzistas ankoraŭ simila serio de lernolibroj, krome ili povos altiri la atenton de ĉiuj kiuj interesiĝas iom pli profunde pri la koncernaj temoj.

Poznano, aŭgusto 2023.

Ilona Koutny
Redaktoro
Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj

Enkonduko al komunikado

Resumo

Komunikado ĉeestas en nia ĉiutaga vivo, ĝi iĝis jam mondskala pro la tutmondiĝo kaj la teknika evoluo. La superrigarda enkonduka studo skize prezentas modelojn kaj formojn de komunikado, montras la nelingvan komunikadon kun ĝia kultura dependeco. Ĝi taksas la rolon de reto por la komunikado de esperantistoj, tuŝas la socipsikologiajn problemojn de amaskomunikado. Fine troviĝas diferencigo inter la terenoj de internacia kaj interkultura komunikado.

1. Enkonduko

Komunikado (‘igi komuna’ laŭ la etimologio) iĝis baza afero en la 20-a jarcento kiun la tekniko pli kaj pli subtenas. Homoj komunikas parole, skribe kaj bilde; persone, per telefono aŭ reto, sed ankaŭ per sia konduto kaj aspekto. Tiel ne eblas ne komuniki, ja eĉ se iu forlasas la socion, tio komunikas lian/ŝian opinion pri la socio; se iu retiriĝas en la angulon de la salono, ne volante paroli kun la aliaj, tio montras lian/ŝian sintenon al la societo. Komunikado estas grava en personaj rilatoj kaj ankaŭ en sociaj kaj profesiaj, tiel ni transdonas niajn spertojn al aliaj kaj planas kunlaboron. Eblas diri ke la homa socio estas organizata sur komunikada bazo.

Ni vidu pli proksime, kio estas komunikado! Ekzistas pluraj difinoj, el kiuj ni akceptu ke **komunikado** estas socia interago realiĝanta pere de simboloj kaj mesaĝistoj (Gerbner 1966), do temas pri transdono kaj akcepto de mesaĝoj. La procezo okazas perhelpe de signoj, tiel ankaŭ semiotiko okupiĝas pri tio. En tiu kadro eblas distingi la sekvajn signojn:

ikonoj – simileco kun tio kion reprezentas la signo, ekz. mapo kaj regiono, bildoj kaj homoj;

signaloj – rekta rilato inter la reprezentanto kaj la objekto: ekz. fumo por fajro, simptomoj por malsano;

simboloj – konvencia signifo kiel blazono kaj flago por lando, blanka kolombo por paco kaj la lingvaj signoj (kiujn ni unuavice celas nun).


Komunikado havas diversajn flankojn. Nuntempe la **teknika flanko** (telekomunikado, interreto) estas tre disvolviĝinta kaj ebligas grandskalan komunikadon en la mondo. Esencan rolon tamen la **kultura flanko** ludas: kiajn signojn la sendanto sendas kaj kiel la ricevanto tion interpretas. Temas pri relativeco, t.e. la mesaĝoj kaj agoj interpreteblas ĝuste nur en iu konkreta kulturo. Pli detale pri komunikado en Griffin 2012.

Dum la historio la homaro travivis plurajn **revoluciojn en komunikado**:

- apero de parolo – en la homiĝa procezo;
- apero de skribo – antaŭ pluraj jarmiloj kiu faciligis heredigi la sciojn, nur privilegiitoj uzis ĝin;
- apero de presado (Guttenberg-galaksio) – en la 15-a jc., dank’al kiu libroj kaj gazetoj atingis pli multajn homojn (kiuj povis legi);
- telefono, radio kaj televido – en la 20-a jc. ebligas amasan informadon;
- poŝtelefonoj kaj interreto – fine de la 20-a jc. kaj 21-a jc., elemento de la tutteriĝo, kunportis interaktivan kaj demokratian komunikadon, sed internacie restas la problemo de kultura kaj lingva diverseco.

2. Klasikaj modeloj de komunikado


Ekzistas multaj teorioj kaj modeloj de komunikado, nur iuj elektitaj estos menciataj por komprenigi la elementojn de komunikado kun iliaj funkcioj. La plej bazaj faktoroj en komunikado estas: la **sendanto** (kiu kreas kaj eligas la mesaĝon), la **mesaĝo** mem kaj la **ricevanto** (kiu ricevas/kaptas la mesaĝon). Parolante pri lingvaj mesaĝoj, menciindas unue kiel funkcias la lingvaj signoj: Karl Bühler (1934) prezentis en triangulo kion ili ligas (kune kun iliaj funkcioj).



Figuro 1: la lingva signo laŭ Bühler

2.1. Komunika modelo de Shannon-Weaver (1949)

Ĝi estis ellaborita por montri la teknikan funkciadon kie la homo kreas la mesaĝon, teknikaĵo elsendas ĝin (kodigo de la mesaĝo), en la alia flanko teknikaĵo ricevas la mesaĝon (malkodigo de la mesaĝo), sed la homo estas la adresato.



Figuro 2: la modelo de Shannon–Weaver

Eblas ankaŭ socia interpreto de tiu ĉi modelo: fonto kaj sendanto povas diferenci, same ricevanto kaj adresato. Pensu pri la aktoro (sendanto) kiu prezentas la verkon de iu aŭtoro (fonto), kaj tiel interpretas ĝin. Ricevanto ne ĉiam egalas al adresato, vidu la kazon de instruisto kiu plendas ke iuj ne aperis dum la leciono. La ricevantoj estas la ĉeestantaj studentoj, sed la adresatoj estas tiuj kiuj ne ĉeestas.

Aperas ankaŭ *bruo* fizika (ekz. preterpasas aŭto, ekpluvas) kaj lingva (ambigueco), tiel informperdo dum la praktika plusendado de mesaĝoj. Pro tio *redundo* (plurobla informo) estas natura parto de komunikaĵo.

2.2. La modelo de Jakobson pri lingva komunikado (1960)

La modelo de Jakobson konsideriĝas kiel klasika kiu komplekse reprezentas la homan komunikadon kun siaj funkcioj. La sendanto ion esprimas kaj transdonas (esprimivo), kion la mesaĝo entenas en iu formo (poezia funkcio). Aliflanke iras alvoko aŭ konigo al la ricevanto tra iu kanalo kiu certigas kontakton (*fatika*: kontaktotena funkcio). La kodo havas gravan rolon kiu plej ofte estas la lingvo en la efektiva transigo de informoj. La komunikado rilatas/referencas al iu kunteksto.

kunteksto (referenco)

sendanto (esprimivo) — **mesaĝo** (poezia f.) — **ricevanto** (alvoko, konigo)

kanalo, kontakto (*fatika*: kontaktotena f.)

kodo (lingvo)

Figuro 3: la modelo de Jakobson

Necesas rimarki, ke sendanto kaj ricevanto povas alterni dum interparolo, tiam temas pri ne unu-, sed dudirekta komunikado, kaj pli konvenas paroli pri **(inter) komunikantoj**. La *retroago* (feedback) de la ricevanto estas grava por la sendanto.

2.3. La S-P-E-A-K-I-N-G modelo de Hymes (1974)

Hymes konstatis pli kompleksan sistemon de komunikadaj faktoroj okupiĝante pri la etnografio de parolado. Laŭ tiu modelo la lingva interago havas 16 faktorojn/komponentojn (kiuj estas gravaj ankaŭ por lingva kompetento). Tiuj estas:


- S** (situation, setting): situacio (priskribo de scenoj praktike laŭ loko kaj tempo, psikologie kaj kulture);
- P** (participants): partoprenantoj (adresanto, sendanto, ricevanto, adresato);
- E** (ends, puposes): celoj;
- A** (act sequence): formo kaj vicordo de eventoj;
- K** (key): elementoj karakterizaj por la maniero, etoso (parolmaniero, gestoj...);
- I** (instrumentalities): parolstilo;
- N** (norms): sociaj normoj de interparolo;
- G** (genre): ĝenro.

Hymes ankaŭ observas ke povas ekesti problemoj dum la komunikado kies funkciadon li signas per MAR:

- M** (mistake): eraro uzante malsamajn implicitajn regulojn kaj atendojn;
- A** (awareness): rekono de la alia maniero paroli;
- R** (repair): interparolantoj ŝanĝas iujn elementojn de la parolo por plibonigi la interkompreniĝon, forigi la eraron.

2.4. Informadika modelo de Winograd (1982)

Winograd jam konsideras la novan realecon, nome ke eblas komuniki ankaŭ kun komputiloj. Tio nuntempe jam estas ĉiutaga realeco, artefarita intelekto eniris en praktikan fazon kaj eblas kun ĝi interparoli. Kion ĝi devas scii? Laŭ Winograd komunikado estas informinterŝanĝo inter du inteligentaj proceziloj (unu povas esti komputilo).



Figuro 3: la modelo de Winograd

Por kompreni la komunikaĵojn ne sufiĉas koni la lingvon (kodon de la mesaĝo), sed necesas ankaŭ kono de la mondo kaj de la situacio. Ni imagu, ke iu ofertas al ni

“bondanon”, ni devas scii, ĉu ĝi estas manĝebla, por provi manĝi ĝin. Se tio okazas dum komuna manĝo, tio estas evidenta. Se ni vidas paperpecon sur la pordo de iu instruisto kun la frazo: *Ni renkontiĝos post unu horo*, nur tiam ni atendas, se ni scias kiu lasis la mesaĝon kaj kiam ni devintus renkontiĝi. Tiujn naturajn konojn ankaŭ la artefarita intelekto (kiel ChatGPT) devas havi aŭ ŝajnigi ke ĝi konas. Do necesas stori multajn informojn pri la mondo kiuj por homoj estas evidentaj pro sia vivsperto, kaj havi algoritmojn kiuj kapablas dedukti la aktualan signifon de la diritaĵo el grandega amaso de informoj, tekstoj.

La modelojn de komunikado eblas grupigi en *linearaj* (tiu de Jakobson), *interaktivaj* (dudirektaj, kie partneroj kunlaboras) kaj *transagaj* (kiam la komunikado pli komplikiĝas dum la progreso de la evento). La helika modelo de Dance kombinas la linearan kun la interativa prezentante la komunikadon en la formo de helika ŝelo.

Komunikado estas grava en ĝenerala homa interago, sed ankaŭ speciale en komerco por atingi bonan rezulton. Tie la sendanto devas esti fidinda kaj aŭtentika por esti akceptata.

3. Klasifikoj de komunikado

Eblas esplori kaj klasifiki diversajn aspektojn de komunikado laŭ diversaj kriterioj.

3.1. Niveletoj de komunikado

- Inter bestoj
- Enpersona: febro, ŝvitado (biologia komunikado)
- Interpersona (unudirekta, dudirekta)
- Grupa (unudirekta, plurdirekta)
- Interorganiza
- Amaskomunikado (plej ofte unudirekta, iam eblas reago telefone, rete)
- Internacia kaj interkultura (lingva problemoj)

Tiuj terenoj estos iom prezentataj nun kaj en kelkaj studoj en tiu ĉi libro. La fokuso estos la interhoma komunikado interpersona kaj en internacia nivelo.

En la nivelo de organismoj, ĉeloj okazas biologia komunikado: surbaze de heredo kiu estas kodita en DNA de la vivuloj; ankaŭ la metabolismo kaj la nerva sistemo funkcias per biologia, kemia komunikado.

Kanaloj de komunikado

Parola, skriba, bilda (ekz. trafiktabuloj), elektronika (reta), se temas pri la interhoma komunikado. Interne de la vivuloj funkcias ankaŭ kemia komunikado.

Laŭ enhavo: sinesprimo/emocioj, informado, alvoko, konvinko, diskutado, amuzado, socia kontakto.

3.2. Besta komunikado

La besta komunikado okazas per movo, voĉo, koloro (kameleono), eligo de odoroj (flara komunikado ĉe hundoj). Plej ofte tio estas **instinkta**, ĉar genetike fiksitaĵoj regas ĝin. Ekzemple la abeloj montras la lokon de poleno per danco. La nuptodanco ĉe birdoj aŭ la migrado de birdoj estas karakterizaj por la donita specio, same la atentigo pri danĝero, ekz. marmotoj fajfas. Hundoj bojas se koleras, virhundoj eligas odorojn por signi sian teritorion. La vizaĝesprimo (dentomontro, rigardo), movo de vosto ĉe hundoj kaj katoj havas siajn signifojn (vd prezenton pri katoj en tiu ĉi libro). Formikoj uzas feromonojn por krei odoropadojn al manĝaĵo same kiel por alarmado, ktp.

Pli altnivelaj bestoj kiel hundoj, katoj, ĉevaloj kaj ĉefe simioj kapablas **lerni** kaj **intence** komuniki. Pri la komunikado de simioj ekzistas multaj eksperimentoj. Hundoj kapablas trovi homojn, narkotikaĵojn, gvidi blindulojn post trejnado. La plejmulto de bestoj vivas en la nuntempo, ili kutime ne povas transdoni siajn travivaĵojn, sed ĉe la pli altnivelaj bestoj eblas observi ke ili rememoras, eĉ ili havas emociojn similajn al tiuj de homoj (ekz. ĉe hundoj). Ĉe kelkaj bestoj eblas observi kunvivon en socioj (ekz. abeloj, vulpoj). Etologio okupiĝas pri la besta konduto kaj komunikado. Iusence ankaŭ plantoj kapablas komuniki, ekz. arboj en la arbaro per siaj radikoj.

Kompare kun la plej multo de la besta, la **homa komunikado** okazas en socio, kie la lingvo elformiĝis kaj interpreteblas. La homa komunikado povas esti **refleksa** (doloro, rido, ploro), sed ofte estas **intenca**, laŭcela kaj lingva kiu ebligas komunikadon pri pasinteco kaj estonteco, krome paroli pri abstraktaj aferoj.

4. Kanaloj de homa komunikado

Komunikado ĉe homoj karakteriziĝas per la lingva flanko skriba aŭ parola, sed ankaŭ la eksterlingva flanko estas grava, kion nia voĉo kaj korpo esprimas. Laŭ Mehrabian (en Hochel & Róka 2008) 55% de la informoj venas el metakomunikado kaj 38% el la paralingva flanko kaj nur 7 el la lingva. Tion multaj diskutas. Tio validas ĉefe por la esprimo de sentoj kaj sinteno al la informoj, sed por transigo de informoj certe necesas la lingvo. Pensu pri situacio kiam iu deklaras ke ĉio en ordo kun li/ŝi, sed la vizaĝesprimo tion ne subtenas. En tiu kazo homoj kredas al la vizaĝesprimo, ne al la lingva deklaro. Dum universitataj prelegoj aŭ precizaj teknikaj instrukcioj tamen la lingvaj informoj gravas. En la sekvaj ni trarigardos la komunikkanalojn

4.1. Lingva komunikado

Lingvo servas por esprimi pensojn kaj sentojn, transdoni informojn kaj alvoki aliajn por agado. Ĝi funkcias en lingvokomunumo kiu havas siajn normojn por konduto kaj ankaŭ por ties lingvaj formoj. Lingvo estas ligita kun kulturo kaj ĉiu

kulturero speguliĝas en la lingvo, pro tio malfacilas traduki el unu lingvo al alia, ne ĉiuj elementoj transmetebblas al iu alia lingvo, sufiĉas pensi pri realaĵoj de la donita kulturo kaj pri la frazeologiaĵoj.

Pere de la lingvo pensoj vortigeblas en **diversaj stiloj** kiuj estas ligitaj al diversaj situacioj kaj komunikantoj. Alie iu rakontas pri sia malsano al sia amiko kaj al kuracisto, aŭ alie iu klarigas la funkciadon de iu maŝino al infano kaj en la fabriko por laboristoj. Sed multe pli estas komunikata ol lingve esprimata – kiel montros la sekvaj flankoj de komunikado.

4.2. Paralingva komunikado

Voĉaj elementoj kiuj aldoniĝas senpere al la lingva komunikaĵo nomiĝas paralingvaj. Al tio apartenas intonacio, rapideco, ritmo, voĉalteco (t.n. supersegmentaj elementoj), kaj ankaŭ rido, ploro, tusetoj, balbuto, ...hm..., ekkrioj kaj silento. Ĉio tio povas malkaŝi nian animstaton: ekscitiĝon per pli granda voĉalteco, rapideco; pripensadon per hm..., silento; konfuziĝon per balbuto, hm...; profundan malĝojon per ploro, tusetoj, balbuto; ĝojon aŭ ironian aliron al la diritaĵo per rido kaj intonacio (La origine laŭda frazo: *Bone vi faris tion!* povas iĝi mallaŭdo per la intonacio); surprizon per ekkrio kaj silento ktp. La manko de parolo, t.e. silento povas aperi antaŭ grava diraĵo por alvoki atenton, sed ankaŭ kaze de surprizo kaj timo, eĉ kiel signo de rifuzo. En aliaj kulturoj, ekz. aziaj, silento estas signo de atento kaj respekto.


4.3. Metakomunikado

Metakomunikado aŭ korpa lingvaĵo akompanas la komunikan procezon, la konkretan paroladon. Al tio apartenas vizaĝesprimo (mieno), gestoj kaj korpoteno. Detalan prezenton pri diferencoj internaciskale vd ĉe Axtell 1997, ekzemplojn Pease 1996, Jarzabek 1994 kaj aliaj. Ĉi tie nur kelkaj ekzemploj estos menciataj.

4.3.1. Vizaĝesprimo (mieno)

Komunikante persone ni vidas la vizaĝon de la alia persono kaj tio influas nin. Vizaĝesprimo kiel tuto povas sugesti ion kaj speciale la esprimo de okuloj kaj buŝo. **Vizaĝo** esprimas sentojn senvole, kiel ruĝiĝo la honton, oscedo la enuon, buŝo la ĝojon aŭ malĝojon, grimacante aŭ paŭtante la malkontenton, malŝaton. La tipan formon de la buŝo eluzas la figuretoj en la reta komunikado.

Laŭ la eksperimentoj de Ekman (2003) ekzistas 6 bazaj esprimoj de sento kiujn oni same rekonas en diversaj kulturoj: ĝojo, kolero, malĝojo, timo, naŭzo kaj surprizo.




Figuro 4: Vizaĝesprimoj; la bazaj vizaĝesprimoj laŭ Ekman 2003

Rigardo esprimas i.a. ĝojon, malĝojon, timon, interesiĝon laŭ la diraĵo «*De l'koro spegulo estas la okulo*», konata en Eŭropo. Tamen la kutimo rigardi en la okulojn de la interparolanto estas kulturdependa. Ĉe azianoj tio ne estas deca, signifas malrespekton, eĉ impertinentecon, ĉe kelkaj afrikaj popoloj aŭ la amerikaj indianoj oni devas eviti la okulkontakton pro respekto al pli maljuna homo.

En multaj esprimoj kaj proverboj aperas la okulo, ankaŭ en Esperanto:

ĵeti okulon al io, okul(um)i, doni/fari signon per la okulo, direkti siajn okulojn al iu, paroli okulo al okulo, ŝuti polvon en ies okulojn (trompi iun), malfermi la okulojn al iu (forigi la iluziojn, montri la realaĵon), Postuli okulon pro okulo, denton pro dento (venĝo).
Kiu tro alten rigardon direktas tiu tre baldau okulojn difektas (troambicui-
lo malsukcesos).
For de l'okuloj, for de la koro ktp.



Figuro 5: Rigardo

La tuta **kapo** partoprenas en la komunikado: kapskuo kutime signifas neadon kaj kapklinado jesadon, sed ĉe la bulgaroj ĝuste inverse.

4.3.2. Gestoj

Estas konate ke sudaj popoloj pli gestas ol nordaj. Kelkaj gestoj estas ĝeneralaj, kontribuas al la intenseco de la komunikado, aliaj havas konkretan signifon, eĉ anstataŭas parolon. Pensu pri mansvingado por voki ies atenton aŭ adiaui iun! V signo por venko tre internaciigis. Alvoko povas okazi per klinmovado de montrofinstro aŭ de la tuta manplato, sed foje la fingroj kurbigatas supren, foje malsupren (ĉe ĉinoj).



Figuro 6: Kutimaj gestoj

4.3.3. Korpoteno

La **rekta korpo, spino** kun levita kapo esprimas fierecon, en iuj situacioj orgojlon; la kurbita korpo kun mallevita kapo la inverson, t.e humilan sintenon, sed ankaŭ senesperon, malĝojon. La kliniĝo estas parto de la saluto/riverenco en multaj aziaj landoj, ju pli profunda, despli respektama.

Levi la ŝultrojn povas signifi nescion, neinteresiĝon.

La krucigitaj **brakoj** kun konvena mieno esprimas superecon, sed tiu pozicio povas esti signo de fermiteco.

4.4. Eksterlingva komunikado

Al la eksterlingva komunikado kalkuliĝas tiuj elementoj kiuj ne la unuopajn komunikaĵojn akompanas, sed karakterizas la tutan komunikadan procezon kaj la komunikanton: **distanco inter la parolantoj** (tio dependas ankaŭ de la rilato inter la komunikantoj, vd la 4 kategoriojn ĉe Hall 1969), vestaĵoj kaj ekstera aspekto de la

parolanto, lia/ŝia ĉirkaŭaĵo kiel ĉambro, ankaŭ precizeco. Laŭ stereotipoj germanoj estas konataj pro sia precizeco, grandaj malfruoj signifas malrespekton de la alia. En multaj sudaj landoj la tempo ne estas io strikta.

Laŭ la **traktado de tempo**, *monokronika* kaj *polikronika* aliroj distingeblas. La monokronikajn komunumojn/kulturojn karakterizas la organiza rolo de la tempo (en Usono kaj Eŭropo, vd Hall & Hall 1990), por la polikronikaj komunumoj/kulturoj ne la tempo, sed la eventoj gravas, ili ne havas precizajn tempolimojn kaj sinsekvojn, eblas fari plurajn aferojn samtempe (indianaj kaj iuj afrikaj kulturoj).

4.5. Rolo de nelingva komunikado

La nelingvaj elementoj de komunikado parte estas universalaj, koditaj en nia subkonscio, parte estas kulturdependaj kiujn ni lernas dum la ensociiga procezo. Norduloj malmulte gestadas, dume suduloj ofte, la distanco inter norduloj estas pli granda ol inter suduloj (Hall 1969), alie jesas bulgaroj ol mez-eŭropanoj. Certaj internaciigo rimarkeblas, dum la lastaj jaroj pluraj elementoj disvastiĝas kun la usona kulturo: ekz. la uzo de OK., levita dikfingro, V signo por venko. La nelingvan komunikadon eblas konsciiĝi kaj manipuli, tio apartenas al la metio de aktoroj.

En interkultura komunikado necesas atenti pri la gestoj, ĉar io pozitiva aŭ neŭtrala povas esti ofenda en alia kulturo. Elementoj de nelingva komunikado povas:

- plifortigi la lingvan komunikaĵon (ekz. kapskuo por pliforte nei);
- kompletigi aŭ modifi ĝin (aldona rideto esprimante la pozitivan aliron al la diritaĵo, montro de direkto per mano dum la klarigo ktp.);
- kontraŭi (lingva esprimo de ĝojo kun malgaja vizaĝo aŭ tremanta voĉo);
- anstataŭi: kapjeso la vortan jeson, aplaŭdo la plaĉon, suprentiro de ŝultroj la nescion ktp. Pantomimo baziĝas sur la nelingva esprimo de la tuta komunikaĵo.

Kulturoj kun forta kunteksto: necesas multaj fonaj scioj por adekvate interpreti la lingvajn informojn. Aziaj kulturoj plejparte apartenas al tiu kategorio.

Kulturoj kun malforta kunteksto: la komunikaĵo esprimiĝas pli eksplicite. Tia formo estas pli komprenebla en internacia nivelo. Usona kaj granda parto de eŭropaj kulturoj estas tiaj.

5. Kulturo, lingvo kaj komunikado

Kulturo havas influon al la lingvo kaj al la komunikado lingva kaj nelingva. Pri la kulture ŝarĝitaj lingvaj elementoj eblas legi en la libro *Esperanta kulturo* (Koutny 2022, vd studojn de Sabine Fiedler, Aleksandro Melnikov kaj Ilona Koutny). Ni komunikas per vortoj, esprimoj kaj pretaj frazoj. Kiel:

Vortoj: krokodilo, kabei, mojosa;

Esprimoj: Esperanto – edzperanto, kongresa edzino, eterna komencanto ktp.;

Proverboj, flugilhavaj vortoj: Ne ŝovu nazon en fremdan vazon! Per flugiloj de l'facila vento...

Kulturaj simboloj en komunikado pli kolorigas kaj bildigas nian diraĵon. Bestoj ofte estas uzataj por tiu ĉi celo, ekz. leono kiel la simbolo de kuraĝo kaj leporo por malkuraĝo, heliko simbolas la malrapidecon, strigo la saĝecon kaj azeno aŭ ancero la malsaĝecon. Abelo kaj formiko estas konsiderataj laboremaj kaj bradipo mallaborema, ŝafido obeema.

En internacia kunteksto tamen necesas limigi la uzon de tiuj simboloj, ĉar ili povas ne havi la saman signifon en ĉiuj kulturoj: ekz. porko en Eŭropo simbolas la malpurecon, malordon, obscenecon, sed en Koreio la bonstaton.

6. Amaskomunikado

Kaze de amaskomunikado la informo iras el **centra fonto** al multaj aliaj ricevantoj, al amaso. Do, ĝi estas kutime unudirekta, nuntempe kelkfoje kun ebla reago (telefonalkvokoj al radia programo, opinioj pri artikoloj en la reto). La sendanto aŭ la fonto kiu regas la sendanton havas potencon situacion (registaro aŭ alia organizo), povas certagrade direktadi la amason en la tereno de politiko, kulturo (modoj, kutimoj, vivmaniero), normoj kaj valoroj, ankaŭ en lingvouzo.

La kanaloj de amaskomunikado estas: **gazetaro, radio, televido kaj la interreto**. La gazetaro kaj libroj estas **skriba** kanalo. La presado jam de 1450 ebligis eldonon, sed la unua gazeto aperis nur ekde 1605. La radio estas **aŭda** kanalo ekde la komenco de la 20-a jc. Televido (ekde la 1930-aj jaroj) kaj filmoj (1895: la unua filmo far la fratoj Lumière) estas **aŭdvida** kanalo. Eblus aldoni la nur **bildan** komunikadon per bildkartoj, afiŝoj kaj magazinoj.

La amaskomunikiloj **celas**: informi, eduki, amuzi, formi opinion. Aperas en ili novaĵoj, raportoj, intervjuoj, diskutoj kaj fikcio. Okazas ankaŭ manipulado kaze de politika influo kaj komercaj reklamoj. Analizo pri la Esperantaj amaskomunikiloj troviĝas en la libro *Esperanta kulturo* (2022), pri la reto vi povas legi en tiu ĉi libro. Prezento de amaskomunikado en Goban-Klas 1999.

7. Interreta komunikado

La TTT: TutTera Teksaĵo (el la angla WWW: World Wide Web) ekde la lasta dekada de la 20-a jarcento konkeris la mondon. Ĝi ebligas ligi diversajn mondopartojn sen iu centro, publikigi dokumentojn, artaĵojn kaj pejzaĝojn cetere alireblajn

malfacile, ankaŭ publikigi sen permeso kaj kontrolo tekstojn, informojn, fotojn kaj certigas retroveblecon en diversaj tempoj. Ĝi estas interaktiva, demokratia, sed tamen manipulado kaj trompo eblas. Tiel la reto estas trezorejo kaj rubujo samtempe. Krome ĝi jam gvidas al troa komunikado, eĉ dependeco. Jen ebloj de la reto kiujn uzas ankaŭ esperantistoj.

7.1. Retpoŝto – ebligas rapidan komunikadon inter konatoj, amikoj kaj ankaŭ oficiale. Ĝi malfermis novan vojon por esperantistoj, ja ebligas la rapidan internacian komunikadon, kiu estas la baza funkciomaniero de Esperanto. Retmesaĝoj/retleteroĵ trakuras la mondon ene de sekundoj kaj ebligas preskaŭ tujan interagon. Aperis tamen ankaŭ spamoĵ (trudmesaĝoj, rubletero).

Dissendolistoj – plej ofte temas pri diskutlistoj (ekzistas plurcent en Esperanto), sed ekzistas ankaŭ nur bultenaj listoj (kiel la gazetaraj komunikoj de UEA, novaĵoj de la Libroservo). Ili funkcias en diversaj retpoŝtiloj, ekz. Gmail, Yahoo, Ms Outlook, Mozilla, Hotmail.

7.2. Tujmesaĝiloj – necesas uzi la saman sistemon por komuniki, ekz. Skype, Zoom, Ms Teams, Telegram, Viber, WhatsApp, Google Hangouts. Tiel eblas interparolo voĉe aŭ ankaŭ vide, se la homoj samtempe estas ĉe la komputilo.

Per tiuj sistemoj eblas ankaŭ **retkunsidoj**, prelegoj, eĉ konferencoj (tiel okazis la 5a Interlingvistika Simpozio de la Interlingvistikaj Studoj de AMU, kaj ankaŭ UK kaj ILEI-kongreso dum la pandemia periodo).

7.3. Retejoj, TTT-ejoj, retpaĝaroj – ekzistas jam multe ankaŭ por Esperantio. Multaj asocioj kaj individuoj havas sian ĉefpaĝon/hejmpaĝon. Per hipertekstaj dosieroj eblas retumi en la mondo. Iuj kreas **blogojn** kie ili raportas pri siaj travivaĵoj, pensoj, esploroj.

7.4. Sociaj retejoj – kiel Facebook, Twitter, Instagram, Amikumu, LinkedIn, Wechat. Ili donas forumon al individuoj kaj asocioj por montri siajn fotojn, informi pri siaj programoj al granda publiko kaj havi (mal)ŝatojn kaj ankaŭ pli konkretajn reagojn. Eblas ankaŭ babili (Messenger).

7.5. Retradioj (podkastoĵ) – kie la prezentita programo estas reaŭskultebla kaj tiel pli bone servas la esperantistojn tutmonde (Pietrzak skribas pri tio en Koutny 2022). La informoj unuavice rilatas al Esperanto-eventoj, krome ili informas ankaŭ pri la lando (pola retradio, ĉina radio internacia).

7.6. Youtube – ebligas stori filmojn, registraĵojn pri diversaj eventoj, intervjuojn ktp. UEA kaj ILEI havas sian kanalon kie aperas ĉefe prelegoj, ankaŭ la Interlingvistikaj Studoj de AMU konservis kelkajn prelegojn de sia interlingvistika simpozio (2020) en sia youtube-kanalo.

8. Socipsikologiaj aspektoj de komunikado

La **personaj spertoj kaj scioj** de la komunikantoj influas la transdonon kaj la interpreton de la komunikaĵo. Ankaŭ la **sociaj normoj** determinas la formon de komunikaĵo, sugestas iun konduton. Nun nur pri du aferoj ni atentigas:

- antaŭsupozoj (dependas de la komunikanto, situacio kaj kulturo),
- antaŭjuĝoj (stereotipoj, povas esti pri iu nacio, agado ktp.).

Komunikado estas **socia kunlaboro** inter la partneroj kie devus validi la maksimumoj de Grice (pri kvanto, kvalito, koncizeco, formo de mesaĝo kaj krome ĝentileco) por atingi komunan celon (kunlaboron, komunan organizadon de io). La uzatajn formojn influas la socia pozicio kaj funkcio de la interparolantoj, aparteno al la sama grupo, sed ankaŭ la aĝo, sekso, intimeco de la interrilato.

Sed povas esti **problemoj**: ne ĉiam okazas kunlaboro. La parolanto – rezulte de la komunikado – povas plifortigi la propran personecon, eĉ regi la alian. La sendanto povas eĉ manipuli, misgvidi la alia(j)n por atingi iun celon (pensu ankaŭ pri reklamoj), mensogi kaj intence ofendi la alia(j)n.

Miskomprenoj povas aperi neintence, pro lingvaj kaj kulturaj diferencoj, tiel la komunikado ne sukcesas. Necesas pli eksplicita komunikado, malfermiteco por la alieco, toleremo en internacia kunteksto.

Homoj ne volonte akceptas tion kion ne konas, ili havas antaŭjuĝojn kontraŭ Esperanto pro sia artefariteco. Pri la psikologia reago al komunikado en Esperanto vd Piron 1994, 1998.

Publika parolo (politika parolado, prediko, prezento de iu temo/produkto, festparolado) povas havi celon informi, konvinki, varbi por iu celo, manipuli la publikon, sed ankaŭ elformi bildon pri si. Aŭtentikeco de la parolanto gravas por atingi la celon.

9. Internacia komunikado kaj interkultura komunikado

Estas diferenco inter internacia kaj interkultura komunikado malgraŭ ĝia interplektiĝo (vd ankaŭ Hochel & Róka 2008). La unua estas oficiala komunikado inter nacioj, landoj, organizaĵoj, entreprenoj dum negocoj kaj konferencoj kaj la dua fokusiĝas al la interpersona komunikado. La internacia komunikado envolas problemojn de kostoj, egalrajteco, oficiala lingvo, la interkultura komunikado koncentriĝas al la komunikado inter individuoj, al la kulturaj diferencoj kaj kiel superi la malsamerecojn. En tiu ĉi libro troviĝas du apartaj partoj pri tiuj temoj.

Internacia kaj interkultura komunikado ekzistas de la malnovaj tempoj pro komercado kaj konkeroj, loke, sed nun pro la tutmondiĝo atingis mondan nivelon. Pro tio la problemoj estas en fokuso de esploroj. La grandaj lingvoj kiel la ĉina, araba, portugala, hispana, franca, angla kaj iam la greka kaj latina plenumis rolon de internacia

komunikilo pro la potenco kaj konkeroj de la koncernaj landoj. Ankaŭ la nuntempa vasta disvastiĝo de la angla kiel lingvafrankao dankeblas al la politika kaj ekonomia potenco de Usono kun Granda Britio kiu kunportas ankaŭ ilian kulturen kaj sciencon regadon. Phillipson (2003) parolas pri *lingva imperialismo kaj hegemonio*.

Faktoroj de la internacia komunikado

Kostoj: interpretado, tradukado kaj la eldonado de materialoj en diversaj lingvoj kostas multe, pro tio la multlingveco kiu certigus egalrajtan komunikadon, praktike ne realiĝas en Eŭropa Unio kaj mondaj organizaĵoj. Unuiĝintaj Nacioj havas 6 oficialajn lingvojn (angla, franca, hispana, rusa, ĉina kaj araba). Por montri la grandecon de la laboro: la tradukservo de la Eŭropa komisiono tradukis 2 597 000 paĝojn en 2022 (https://commission.europa.eu/system/files/2023-06/DGT_AAR_2022_en.pdf).

Justeco: konsidero de lingvaj rajtoj de ĉiuj partoprenantoj. La ebleco uzi ĉies gepatran lingvon gvidus al egalrajta komunikado. Sed praktike la parolantoj de malpli uzataj lingvoj ne havas tiun eblecon.

En fremda lingvo la kompreno kaj esprimovo estas pli malgranda, tiel ekz. enmigranta parolanto povas malpli partopreni en la socia vivo, kontribui al decidoj kiuj rilatas al li (Gazzola 2014).

Efikeco: miskomprenoj okazas pro la komplikeco de la lingvoj en diversaj terenoj: prononco (Piron citas la ekzemplon de konfuzo inter similaj vortoj kun tute malsama signifo: *my government thinks/sinks*), frazstrukturo, frazeologio, vortsignifaro (konkreta kaj figura sencoj), malfacilas kompreni ŝercojn, kromsignifon/elvokivon. Ankaŭ la lingva konduto estas alia.

Detlev Blanke (2017) resumas la eblajn **modelojn por la Eŭropa Unio:**

- **Multlingveco** – donas egalajn rajtojn, sed multekosta
- **Kelklingveco** (ĉefe 3-lingveco estis proponita) – donas avantaĝon al iuj lingvoj
- **Unulingveco:** unu komuna lingvo por ĉiuj – angla, latina aŭ Esperanto – montras diversajn problemojn.

Pri la rolo de Esperanto en Eŭropa lingvopolitiko vd Fettes 1991, Erasmus 1998, Tonkin 2004 kaj ankaŭ la studon de Blanke en tiu ĉi libro. Pri la rolo de la angla kiel internacia lingvo vd Fiedler 2010, 2011 kaj la kontribuon de Farris ĉi tie. Komparon vd en Gobbo & Marácz 2021.

El la ekonomia analizo de Grin (2005) pri la diversaj modeloj evidentiĝas ke el la uzo de Esperanto kiel sola komuna lingvo la plejmulto de la membro-ŝtatoj de EU profitus. Tamen la nuna etoso por Esperanto ne estas pozitiva, tiel praktike ne akceptebla.

Pri interkultura komunikado ekzistas multaj studoj, kun la uzo de Esperanto vd Koutny 1998, 2005 kaj la studojn en tiu ĉi libro.

Bibliografio

- Axtell, R.E. 1997: *Gestures: The Do's and Taboos of Body Language Around the World*. Wiley
- Blanke, Detlev 2017: Komunikado en Eŭropo – kelkaj lingvo-politikaj aspektoj. En: *JKI* 12: <https://pressto.amu.edu.pl/index.php/jki/issue/view/1340>
- Ekman, Paul 2003: *Emotions revealed*. New York: Henry Hold and Company
- Erasmus, Hans 1998: Esperanto in Europe: Two Proposals. In: Fettes, M. & Bolduc, Suzanne (red.) 1998: *Al lingva demokratio / Towards Linguistic Democracy*. Rotterdam: UEA
- Fettes, Mark 1991: *Al unu lingvo por Eŭropo? La estonteco de la eŭropa Babelo*. Rotterdam: UEA E-Dok. 27.
- Fiedler, Sabine 2010: The English-as-a-ligua-franca approach. En: *LPLP* 2010/3: 201-221.
— 2011: English as a lingua franca – a native-culture-free code? Language of communication vs. language of identification. En: *Apples – Journal of Applied Languages Studies* vol. 5: 79-97.
- Gazzola, Michele 2014: Lingva justeco: kiel taksu ĝin? La ekzemplo de Eŭropa Unio. IKU 2014 <http://www.unige.ch/fti/elf/files/9614/5865/9202/elfwp14.pdf>
- Grin, François 2005: Fremdlingvo-instruado kiel publika politiko. Trad. el la franca. http://lingvo.org/grin/raporto_grin_eo.pdf vd mallonga versio
- Goban-Klas, Tomasz 1999: Media i komunikowanie masowe. Teorie i analizy prasy, radia, telewizji i Internetu. Warszawa & Kraków: Wydawnictwo Nakowe PWN
- Gobbo, Federico & Marác László 2021: Two Linguas Francas? Social Inclusion through English and Esperanto, In: *Social Inclusion* 9/1: 75-84. <https://www.cogitatiopress.com/socialinclusion/article/view/3662/3662>
- Griffin, Em 2012⁴: *A first Look at Communication theory*. New York: McGraw-Hill.
- Hall, Edward T. 1969: *The Hidden Dimension* ‘Kaŝitaj dimensioj’ – trad. en diversaj lingvoj
- Hall, E.T. & Hall, M. R. 1990: *Understanding cultural differences: Germans, French, and Americans*. Boston, MA: Intercultural Press
- Hochel, Sandra & Róka Jolán (red.) 2008: *Intercultural and International Communication for our Global Community*. Budapest: Századvég. Hungara traduko: Róka & Hochel, 2008
- Jarząbek 1994: Gestykulacja i mimika. Słownik. ‘Gestoj kaj mienoj. Vortaro’. Śląsk: Katowice
- Koutny Ilona 1998: *Interkultura komunikado*. En: IKU-prelegoj, Montpellier en la retej de la IS
— 2005: Interkultura komunikado en Eŭropo: la angla kaj esperanto kiel alternativaj komunikiloj. En: *Symposium on Communication Across Cultural Boundaries*. Ed. Ch. Kiselman. Dobrichovice: Kava-Pech. 115-132. en la retej de la IS
— (red.) 2022: *Esperanta kulturo*. Poznan: Rys
- Pease, Allen 1996: *Korpoparolo* (origine angle: *Body Language*)
- Phillipson, Robert 2003: *English-only Europe?: Challenging Language Policy*. e-traduko I. Ertl: *Nur-angla Eŭropo*. Resumo angla: https://uea.org/vikio/Summary_Of_English-Only_Europe
- Piron, Claude 1994: *Le défi des langues: du gâchis au bon sens*. Paris: L’Harmattan Esperanta resumo 1998: La lingva defio: <http://claudepiron.free.fr/livres/lingvadefio.htm>
— 1998: Psikologiaj aspektoj de la monda lingvoproblemo kaj de Esperanto. <http://claudepiron.free.fr/articlesenesperanto/aspektoj.htm>
videoprezento angle: https://www.youtube.com/watch?v=_YHALnLV9XU, polaj subskriboj france: <http://www.youtube.com/dannirlsne> (alklaki sur la cifero interparenteza post «Videos»)

Tonkin, Humphey 2004: Esperanto: Lingvo preta por la internacia vivo. <http://www.esperocom.cn/old/epch/z-uk-2004/04z-05f/04z-uk-05-1.htm>
Winograd, Terry 1982: Language As A Cognitive Process, Volume 1, Syntax. Addison-Wesley.

Demandoj kaj diskuttemoj

- 1) Kiel eblus difini komunikadon?
- 2) Kiujn tipojn de signoj vi konas?
- 3) Kion ligas la lingva signo?
- 4) Menciuj revoluciajn ŝanĝojn en komunikado!
- 5) Priskribu iujn komunikajn modelojn!
- 6) En kio diferencas la besta kaj homa komunikadoj?
- 7) Prezentu la komunikadon de iu besto (hundo, kato, birdo, abelo, simio)!
- 8) Kiu estas la nelingvaj kanaloj en komunikado?
- 9) Kolektu esprimojn kun la okulo kaj interpretu ilin!
- 10) Diskutu kaj prezentu kiel esprimi sentojn (amon kaj malamon, surprizon, gajecon kaj malgajecon, koleron, indiferecon kaj interesiĝon, enuon, malkontenton, atentigon, miron, timon, naŭzon, ktp)!
- 11) Prezentu kiel kondutas kaj aspektas oficisto, pastro, soldato, bankestro!
- 12) Kiu besto estas la simbolo de kuraĝo – malkuraĝo, rapideco – malrapideco, saĝeco – malsaĝeco, forto – malforto, laboremo – mallaboremo ktp. en via kulturo?
- 13) Diskutu kiel diskonigi Esperanton en amaskomunikiloj!
- 14) Kiun rolon havas la reto por Esperanto?
- 15) Faru intervjuon kun iu konata persono pri Esperanto!
- 16) Ĉu la tradiciaj amaskomunikiloj perdas sian rolon pro la reto? Ĉu la libro havas futuron?
- 17) Prezentu iun esperantistan diskutliston / retejon / Facebook-grupon!
- 18) Analizu la reagojn de homoj kontraŭ Esperanto!
- 19) Kiel prezenti Esperanton al la ekstero?
- 20) Kiun rolon povus reale havi Esperanto en la Eŭropo / en la mondo?

KOUTNY Ilona doktoriĝis pri lingvistiko en la Budapeŝta Eötvös-Universitato (HU), kie ŝi instruis dum jardeko ĉe la Esperanto-fako. Habilitiĝis ĉe la Adam Mickiewicz Universitato en Poznano (AMU, PL), kie nun ŝi gvidas la Hungaran Katedron kaj ankaŭ la internaciajn postdiplomajn Interlingvistikajn Studojn, en 2022 lanĉis la magistrajn studojn pri interlingvistiko. Membro de la Akademio de Esperanto (1998-2016), profesoro de AIS. Esplorteroj: internacia kaj interkultura komunikado, lingvo kaj kulturo, esperanta gramatiko kaj leksikografio.
ikoutny@amu.edu.pl; <http://interl.amu.edu.pl/interlingvistiko/Ilona.html>

KOMUNIKADO EL DIVERSAJ ASPEKTOJ

Lingvo kaj socio

Resumo

Lingvoj estas esenca faktoro en homa socia, politika kaj ekonomia konduto, sed oni ofte trosimpligas aŭ malatentas ilian rolon. Tio fontas parte el nekompleta kompreno de la naturo de lingvoj mem. Psikolingvistoj kaj neŭrolingvistoj studas la fenomenon de lingvado kiel econ de la individuo; sed lingvoj estas en la praktiko kolektivaj fenomenoj de socia interago kaj komunikado – ekde lingva konduto, tra lingva vario kaj registroj de lingouzado, ĝis la tereno de makrosocilingvistiko, kie eblas ekzameni la politikajn kaj ekonomiajn dimensiojn de lingvoj, kaj ilian uzadon por fortigi aŭ malfortigi difinitajn sociajn grupojn. Eĉ difini kio estas aparta lingvo estas malfacile – do nomi lingvojn, nombri ilin, nombri iliajn parolantojn kaj uzantojn. Oni povas influ la evoluon de lingvoj per korpusa interveno kaj per socia kaj politika interveno – kaj precipe ĉi-lastata povas fortigi kaj malfortigi la socian kaj politikan influon kaj fortecon de la koncernaj lingvoj kaj ties parolantoj. En la hodiaŭa mondo, pli kaj pli da homoj komprenas, ke unu lingvo ne sufiĉas por plene vivi sian vivon – kompreno al kiu la esperantistoj jam delonge venis.

1. Enkonduko

Kiam ni parolas pri packonservado en Suda Sudano, aŭ pafĉeso inter Armenio kaj Azerbajĝano; kiam ni konsideras diplomatan intervenon en Kosovo, aŭ restarigon de paco inter Ĉinio kaj Barato; kiam ni frontas problemon de rifuĝintoj en Turkio aŭ Sirio, aŭ sendas postkatastrofan helpon al Haitio, decido pri la lingvoj kiujn ni uzos, per kiuj ni kolektos aŭ disvastigos informojn, kaj kiuj inkluzivos aŭ ekskluzivos partoprenantojn, estas esenca dimensio, kvankam ofte neglektata. La formulado de publika politiko estas nekompleta se mankas scio (aŭ konscio) pri la rolo de lingvoj kiel faktoro en homa socia, politika kaj ekonomia konduto – same kiel la studado de lingvoj estas nekompleta sen kompreno de ilia socia situo.

Ambaŭ flankoj de la ekvacio socio/lingvo estas en la hodiaŭa mondo ofte mankaj: tro ofte, politikistoj kaj profesiaj politikfarantoj decidas agadon surbaze de komplika ekonomia kaj socia analizo, kiu ignoras la dimension de lingvoj. Kaj lernantoj de lingvoj supozas, ke, mastrinte la subjunktivon en iu lingvo, ili sekve plene scias kiel apliki tiun lingvon en sociaj situacioj. Specialistoj pri evoluigo, same kiel la popoloj kiujn ili celas helpi, tro ofte parolas *preter* si anstataŭ *inter* si.

Lingvoj ne ekzistas en vakuo, nek ili estas nuraj kodoj. Fremdlingvaj instruistoj emas instrui normajn formojn de difinita lingvo, kiuj estas ofte fremdaj al la praktikaj

uzantoj de la koncerna lingvo kaj sekve neadekvataj por la lerninto kiam tiu komencas uzi la lingvon en la praktiko. Iasence mankas al la instruistoj alternativoj: ili estas praktike devigataj instrui la prestiĝajn formojn, ĉar ili celas, ke iliaj studentoj maksimume sukcesu en la elita medio de tiu socio. Sed tia emfazo je normoj eble malfaciligos al la studentoj percepti la diversecon de lingva sinesprimo kaj la funkciojn de lingvo en ties diversaj medioj. Lingvoj troviĝas ne en lernolibroj kaj gramatikoj, sed en la mensoj kaj sur la lipoj de vivantaj homoj; kaj ili konstante ŝanĝiĝas responde al la premoj de la koncerna socio. Verkantoj de lernolibroj selekte kaj foje antaŭjuĝe elektas tiujn lingvajn elementojn, kiujn ili opinias gravaj. La rezulto ne estas ia fotografajo de tiu lingvo, sed foje draste simpligita bildo.

2. La multflankeco de lingvoj

2.1. Lingvo kiel abstrakta nocio de individua kompetento

El kio, do, konsistas lingvo, kaj kiel lingvoj ekestas? Unu el la plej grandaj problemoj (kaj plezuroj...) pri la esplorado de lingvoj estas ilia multnivela karaktero. Oni povas analizi lingvon laŭ plej diversaj manieroj: kiel individuan kompetenton, en reala dialogo (“diskurso”) inter grupoj de individuoj, kiel formalan sistemon de signoj, kiel kulturalan sistemon, k.s. La elekto de metodo dependas de la demandoj, kiujn oni volas fari; ĝi ankaŭ limigas la respondojn, kiujn oni ricevos. Tradicie, la ĝenerala lingvistiko emas rigardi lingvon kiel formalan sistemon kaj (ekzemple sub influo de Noam Chomsky [2010] aŭ Steven Pinker [1995]) interpreti la lingvon laŭ abstrakta nocio de individua kompetento. Tia aliro igas nin koncepti la lingvon kvazaŭ ĝi komenciĝas en la individuo, en la fizika evoluo de la cerbo kaj ĝia kapablo prilabori lingvaĵojn, kio siavice ligiĝas al la neŭraj sistemoj subtenaj al parolo kaj aŭdo. Jen ni eniras la terenon de la psikolingvisto, kiu interesiĝas pri la rilato inter psikologio kaj lingvo, interalie la mekanismo, kiu permesas al ni akiri lingvan kapablon; kaj de la neŭrosciencisto, kiu interesiĝas pri la internaj funkcioj de la cerbo. Ni eniras ankaŭ la teritorion de tiuj filozofoj, kiuj interesiĝas pri la kapablo de la homa cerbo koncepti kaj manipuli ideojn peratajn de lingvoj, do pri la procedoj de rezonado.

2.2. Lingvo kiel formo de socia interago

Sed tiuj ĉi aliroj, kvankam riĉaj kaj laŭ sia maniero kompletaj, estas nur unu maniero de lingva analizado. Tiu maniero ne respondas la demandojn, kiujn studentoj de la ekstera socio aŭ de homa interago emas demandi. La internaj funkcioj de la homa cerbo povas eventuale *klarigi* konduton, sed ili ne mezuras ĝiajn efikojn. Sekve, la demando “El kio konsistas lingvo?” restas esence nerespondita. Por trovi respondon al tiu demando ni devas analizi ankaŭ la ĉirkaŭaĵon de la homo – unuavice la percep-

ton de lingvoj (denove teritorio unuavice de psikolingvoj kaj neŭrosciencistoj), sed duavice la kondiĉojn, kiuj postulas la uzon de lingvo, do la ĉirkaŭaĵon de la homo kaj la homajn interrilatojn.

Individuoj interagas kun aliaj individuoj kaj kreas sistemojn por interkomuniki. Ili praktikas specifajn parol-agojn kaj apartajn specojn de vortaj interŝanĝoj. La lingvo permesas al ili esprimi sian propran personecon kaj ensorbi informojn pri la personecoj kaj agoj de aliaj. Parolantoj ne dependigas sin sole de la reguloj de lingvo kiel formala sistemo, sed ankaŭ aplikas siajn jam akiritajn observojn de la socia kunteksto, de la individuo al kiu ili direktas sin, kaj de la temo mem. Eĉ se ni akceptas, ke, laŭ iu maniero, la homoj estas jam “dratumitaj” por lingvi (kiel asertas Pinker kaj Chomsky), la homoj ankaŭ egale klare posedas konsternan kapablon percepti informerojn en la konduto de aliaj kaj reagi al ili. Sen tiuj sociaj kaj ekologiaj dimensioj, la lingvo ja ne povus ludi utilan rolon en la komunikado. Sekve, pluraj branĉoj de la lingvaj sciencoj ekestis, kiuj rigardas lingvon kiel socian interagon (ekz. Trudgill 2000, Romaine 2000) kaj kiel ilon por apliki potencon kaj akumuli socian kapitalon (Bourdieu 1982). Kiel fundamenta aspekto de homa konduto, la lingvo influas preskaŭ ĉiun specon de homa interago, inkluzive politikan kaj ekonomian interagon.

Kompleta enkonduko al lingvo kaj lingvado ne ekzistas en Esperanto (anglalingvanoj trovas la enciklopedion de Crystal [2010] utila). Ne plu tute ĝisdataj estas la studoj de Collinson (el 1927, lastatempe reeldonita) kaj Wells (1978). Wells traktas tre klare la lingvistikon de Esperanto: vidu ankaŭ Wennergren 2010 kaj 2016. La ligoj inter la Esperanta lingvo kaj la Esperanto-socio estas malpli multe studataj ankoraŭ (vidu tamen la studojn de Fiedler pri frazeologio [ekzemple Fiedler 2008] kaj la eseojn en Kiselman 2018 kaj Blanke & Lins 2010). La demando lingvo/socio ja prezentas fekundan kampon por esperantistaj esplorantoj...

3. La lingvistiko de komunikado

Fakuloj kutimas nomi la lingvistikon de komunikado inter individuoj, do je mikra (kontrasta al makra) nivelo, *pragmatiko*. Esploristoj studas kiel homoj interagas, kiu regas konversaciojn, kiel funkcias laŭvica intervenado, kiu interrompas kiun. Analizo de la enhavo kaj konsekvencoj de tiaj interŝanĝoj nomiĝas *diskursa analizo*. Tiaj studoj montras, ke ekzistas multaj regulecoj en lingvouzo, kiujn oni ne povas kapti je la nivelo de la formala sistemo, sed kiuj tamen konsistigas la “komunikan kompetenton” de flua parolanto (Hymes 1972). Tia parolanto scias ne nur diri aferojn, sed pro kio diri ilin – kiujn vortojn kaj formojn elekti en kiu situacio, kiujn eviti, kiel variigi tiujn formojn laŭ la respondoj ricevataj, kiel kaj kiam cedi la parolon al aliaj kaj kiam ne. Per manipulo de lingvaĵoj kaj de konduto, grupoj povas enpreni aŭ forpuŝi aliajn, kaj homoj, kiuj lerte uzas lingvon kaj generas fidon inter la partoprenantoj, povas domini interagojn.

Evidente, tiaj esploroj rapide kondukas al kulturaj kaj sociologiaj demandoj, do al la ĉirkaŭaĵo en kiu difinitaj interagoj okazas. La “regulecoj” povas esti rigardataj kiel

lertoj akiritaj de parolantoj por funkcii efike en difinitaj grupoj, retoj aŭ situoj, kaj kiel markiloj por ebligi aliajn personojn percepti kaj prilabori ilin. Ju pli la nivelo de analizo transiras de specifaj interŝanĝoj al tiuj pli vastaj sociaj matricoj, des pli ĝi eniras la terenon de *socilingvistiko* kaj rilataj temoj, kiel ekzemple *antropologia lingvistiko*.

En sia populara enciklopedio pri lingvoj, David Crystal (2010) difinas lingvon jene: “la sistema, laŭkonvencia uzo de sonoj, signoj aŭ skribitaj simboloj en homa socio por komunikado kaj sinesprimado.” Emfazante la fakton, ke la lingvo estas socie determinata kaj ĝian uzon regas sociaj konvencioj, Crystal movas la koncepton “lingvo” el la individua lingva mekanismo al la studado de socia interago, farante el ĝi gravan elementon en kompreno de homa konduto – do rekonante ĝin kiel socian institucion.

4. Socilingvistiko

4.1. Lingvo kaj idento

La uzorepantuaro de unuopa homo ene de unuopa lingvo estas indikata de abundaj markiloj, inter ili geografia lokiĝo (la uzo de lingvo ofte, eĉ kutime, varias de unu regiono de la teritorio de tiu lingvo al alia), etneco, genro, nivelo de eduko, profesio, klaso, socia situo, k.s. Tiuj diversaj specialigitaj kodoj aŭ kondutoj ene de unuopa lingvo estas kutime priskribataj kiel *dialektoj*, aŭ, se oni volas distingi inter iliaj bazoj (geografio, profesio, sekso, eĉ la individua homo, ktp.) kiel *lektoj*. El tio oni do formas terminojn kiel *sociolekto* (la lingvaj formoj kaj kutimoj uzataj en difinita socio aŭ subsocio) kaj *idiolekto* (la lingvaj formoj kaj kutimaj propraj al difinita individuo).

Ofte la koncerna lingvo estas nur unu lingvo inter pluraj, kiujn la koncerna homo konas, aŭ eble ne la unua – kio siavice manifestiĝas en la lingvouzo. Kiel nia ĉefa maniero de komunikado, la lingvo estas forte ligita al nia senco de la propra idento kaj al la manieroj laŭ kiuj aliaj personoj perceptas tiun identon (Joseph 2004, Edwards 2009). Multaj studoj montris, ke ni juĝas aliajn laŭ la maniero de ilia parolado, antaŭdecidante, ofte antaŭjuĝe, pri iliaj kapabloj, ilia inteligenteco, kaj ilia laboremo. La lingvo estas unu maniero laŭ kiu la homoj fasonas sian identon; ili tion faras ankaŭ surbaze de la ideologiaj kunteksto de tiu lingvo. Ekzemple, se individuo kultivas (aŭ relative forigas) sian regionan parolmanieron, li/ŝi eble tion faras por signali difinitan politikan aŭ klasan sintenon.

4.2. Registroj

Do ĉiu “lingvo” (laŭ la normala difino de tiu vorto) konsistas el abunda kaj interplektita aro da “sublingvoj.” Tiuj “sublingvoj” siavice estas komunaĵoj da konduto. Pluraj tiuj “sublingvoj” estas difinitaj laŭ geografio kaj laŭ etnoj (tiuj, kiujn oni normale nomas dialektoj), aliaj laŭ socia situo (vira/virina, profesia, riĉa/malriĉa k.s.). Fakte,

ni ĉiuj regas plurajn strategiojn kaj taktikojn de lingvouzo por apliki al diversaj sociaj situacioj. Tiujn oni kutime nomas “registroj” (ni parolas al malsamaj grupoj de homoj malsame: studento, kiu parolas al sia profesoro utiligas unu kodon, studento kiu parolas al alia studento uzas alian kodon; ni uzas malsaman kodon en niaj interagoj kun la kasisto en supervendejo aŭ niaj interagoj kun familianoj, aŭ registaraj funkciuloj, aŭ ĉe telefono); iuj estas produktoj de la medio – presita teksto, neformala skribita teksto, formala parolado, neformala parolado. En multaj lingvoj ekzistas klara distingo inter tio, kio estas norma en la skribita lingvo, kaj tio, kio estas norma en parola lingvo. La kresko de reta komunikado kondukis al novaj variantoj en la lingvouzo.

Sekve oni povas konstati, ke “lingvo” estas pli ol unudimensia afero: ĝi estas fasko de lingvaj kondutoj, ĉiu kun sia loko, ĉiu kun sia uzo. Kaj eĉ la plej ordinara homo kapablas elludi kaj manipuli tiujn diversajn kondutojn laŭ ege komplika maniero. Iuj eĉ diras, ke lingvoj estas formoj de socia konduto, kaj ke la limoj de lingvoj estas ege flekseblaj kaj foje malklaraj.

4.3. La ekzemplo de la angla lingvo

Ni uzu la ekzemplon, kiun mi plej bone konas, nome la ekzemplon de la angla lingvo. Kio estas tiu angla lingvo? Ĉu la lingvo de Londono aŭ de Novjorko, de Sidnejo aŭ Dublino, de Najrobio aŭ Nov-Delhio, aŭ eĉ de Bruselo aŭ Pekino – ĉar ankaŭ nedenaskaj parolantoj de la angla lingvo tamen parolas sian formon de la angla. Kaj la lingvo de kiuj homoj en tiuj diversaj lokoj? De Boris Johnson? De Eminem? De Joni Mitchell? De J. K. Rowling? Ĉu ekzistas io, kion oni povas nomi “bona” angla kaj io kion oni povas nomi “malbona”? Kaj kie finiĝas la angla lingvo kaj komenciĝas io alia? Ĉu ekzemple la anglebazitaj kreoloj de la Karibaj Insuloj estas formoj de la angla aŭ io komplete aparta? Kaj kio pri ekzemple Tok Pisin, la anglebazita kreolo de Novgvineo? Estus erare supozi, ke lingvoj kiel unuopaj fenomenoj ne ekzistas, sed la limoj inter la lingvoj estas multe malpli klaraj ol ili foje aspektas. Certe la formoj, kiujn oni trovas en gramatikaj studoj aŭ en normaj vortaroj, ne reprezentas la plenan diversecon de difinita lingvo en ties socia situo.

La socilingvistiko studas ĉiujn tiujn variaĵojn, kune kun ilia rolo en sinidentigo kaj en la percepto de identeco fare de aliaj. La demando, kiu fundamentas tiun aliron, ne estas “ĝusteco” sed “diverseco”.

5. Makrosocilingvistiko

5.1. Inkluzivo kaj ekskluzivo

La lingva konduto de homoj en malgrandaj grupoj respeguliĝas en la pli larĝa interago de tutaj komunumoj, do la makra nivelo paralelas la mikran nivelon, precipe en la rilatoj inter la lingvoj. Ekzemple, oni povas uzi difinitan lingvon por enpreni grupon, do ilin inkluzivi: kiam parolanto de minoritata lingvo lernas la oficialan lingvon de la registaro en la lernejo, tiu estas parto de procezo por integri tiun individuon en la imagitan komunumon de la nacio. Sed oni ankaŭ uzas ĝin por elpuŝi aŭ ekskluzivi: lernado de la oficiala lingvo eventuale malfortigas la minoritatan kulturon kaj puŝas ĝin al margeno kie ne plu necesas politike okupiĝi pri ĝi. Do, la koncerna minoritato tiel forte celas la ekonomiajn kaj klerigajn avantaĝojn de integriĝo, ke la lokaj apartaĵoj malaperas. Tamen foje la majoritato intence marĝenigas la minoritaton: klerigo en minoritata lingvo povas konsistigi specifan politikon de ekskluzivo – kiel okazis en Sudafriko en la epoko de rasapartigo. Ekzamenado de tiu procezo de inkluzivo kaj ekskluzivo (inkludo kaj ekskludo) povas ebligi al ni observi la distribuon kaj aplikon de politika aŭ ekonomia potenco en difinita komunumo.

5.2. Politikaj kaj ekonomiaj dimensioj

Niaj ĵurnalistoj tro ofte analizas balotadon en dulingva aŭ multlingva lando sen demandi, en kiu lingvo aŭ lingva variaĵo difinita partio komunikas kun la balotantoj. Tamen, en landoj kiel Bolivio aŭ Filipinoj aŭ Niĝerio, tiu ĉi variablo povas esti decida. Ĝin determinas politikaj kalkuloj ne nur simple komunikaj, sed kulturaj, ekonomiaj, historiaj.... Nur lastatempe niaj ekonomikistoj komencis ekzameni la ekonomikon de lingva diverseco per modelado de la kostoj kaj avantaĝoj de scio de pli ol unu lingvo aŭ kombinaĵo de lingvoj en difinita teritorio – kaj tiu aliro restas relative neglektata de politikologoj. Ekonomikistoj ĉiam pli ofte rekonas, ke scio de lingvoj povas esti grava konsidero en la labormerkato, en la translokiĝa kapablo de laboristoj, kaj sekve kiel elemento en la komuna kapitalo.

5.3. Prestiĝo kaj malestimo

Sed ne nur temas pri la efektiva uzo de lingvo, sed ankaŭ pri la prestiĝaj aŭ malprestiĝaj asociaĵoj de tiu lingvo. Grava faktoro en la balota venko de la Demokrata Partio en Usono en la jaro 2012 estis la publika bildo de la t.n. latina minoritato: la Respublikana Partio emis vidi en tiu minoritato minacon kontraŭ la unueco de la popolo, interalie pro ĝia uzo de la hispana lingvo; la Demokrata Partio estis pli akceptema al la diverseco, interalie la lingva diverseco. Sekve, la membroj de tiu minoritato super-

peze voĉdonis por la Demokratanoj. Sed ne nur temis pri tio, ĉu la koncernaj homoj efektive parolas hispane aŭ efektive ne parolas la anglan, sed pri la publika bildo de la hispana. (Tiu situacio ŝanĝiĝis en la balotado de 2020: la hispana intertempe fariĝis pli akceptata kiel minoritata lingvo, interalie ĉar la nombro de enmigrintoj draste falis kaj sekve tiu lingvo ŝajnas al anglalingvanoj malpli minaca). Kiam, antaŭ pluraj jaroj, la vicĉefministro de Ukrainio deziris en parlamenta sesio diri ion, kion li opiniis grava, li uzis la rusan, ne la ukrainan, argumentante, ke temas pri grava afero (la implicado: la rusa estas por gravaj aferoj, la ukraina por negravaj); apenaŭ necesas aldoni, ke la rezulto estis politika erupcio. Ankoraŭ hodiaŭ, oni ofte aŭdas eŭropanojn aludi al afrikaj “dialektoj”, kvazaŭ eŭropanoj parolas verajn lingvojn, afrikanoj nur dialektojn.

Tra la tuta mondo, ŝajne, la angla lingvo ĝuas aparte altan prestiĝon, parte pro la percepto, ke ĝi reprezentas vojon al materia sukceso, sed ankaŭ pro siaj kulturaj produktoj – populara muziko, filmoj, televidaj programoj, sociaj komunikiloj. Rezulte, ĝi daŭre rikoltas novajn adeptojn, novajn lernantojn. Ni aldonu, ke eĉ tiuj, kiuj ne konas tiun lingvon, volas doni la impreson, ke ili scipovas aŭ almenaŭ amas la lingvon: tiel ekestas abundaj t-ĉemizoj kun plene sensencaj anglalingvaj skribaĵoj kiel markiloj de la identeco de la portantoj.

Iuj nomas tiun procedon lingva kaj kultura imperiismo. Aliaj sugestas, ke pasis jam la periodo de koloniismo kaj imperiismo, tiel ke nun la angla fariĝas pli kaj pli rekonata kiel neŭtrala komunikilo. Parolantoj de Esperanto kutime argumentas, ke nur neŭtrala lingvo, ne identigita kun difinitaj landoj aŭ politikoj, povas senpartie roli en monda komunikado.

Resume, do, lingvoj estas en si mem simboloj – de aparteneco, de identeco, de prestiĝo, de prestiĝomanko.

5.4. Etneco

Grava esprimo de etna identeco estas la lingvo kiun oni uzas aŭ en difinitaj situacioj selektas. Etneco estas ligita al lingva lojaleco: la utiligo kaj konservado de lingvo eĉ spite ekonomiajn kaj aliajn konsekvencojn. La lingvo ja estas inter la ĉefaj perantoj de kulturo, kiel ajn oni difinas tiun malfacilan terminon. Se “kulturo” difiniĝas kiel aro da komunaj kondutoj kaj kutimoj, ili en si mem formas specon de metalingvo. Ofte, difinita kulturo havas sian propran lingvon, sed foje ĝi dividas ĝin kun aliaj. En tia kazo, la anoj de la koncerna kulturo ofte laboras por igi la lingvon la sia, per emfazo de loke konataj vortoj aŭ esprimoj kaj diferencoj de la ĝenerala normo.

Se en la iama Jugoslavio serboj kaj kroatoj parolis tion kion oni nomis la serbokroata, nun ili identigas sin kun du apartaj lingvoj: la serba unuflanke, la kroata aliflanke. Ĉu la serbokroata estis artefarita unuecigo de du apartaj lingvoj aŭ la serba kaj kroata konsistigas artefaritan apartigon de unu lingvo, estas demando egale politika kiel lingvistika. Similajn dividojn oni vidas inter la urdua de Pakistano kaj la hindia de Barato, aŭ inter la skribsistemo de la granda Ĉinio kaj tiu de Tajvano. Kiam Noah

Webster kompilis sian grandan vortaron (1828) en la nove fondita kaj sendependa Usono (li nomis ĝin “La Amerika Vortaro de la Angla Lingvo”), li enkondukis elementojn, kiuj diferencigis tiun “amerikan” lingvon disde la angla. Tiel, ŝanĝo de la politika realeco rezultigis ŝanĝojn en la lingvo kaj la deziron alimaniere identiĝi. Same oni povus argumenti, ke esence la dana, norvega kaj sveda konsistigas unu lingvon kun tri grandaj dialektoj, aŭ ke la rumana kaj moldova estas unu lingvo, aŭ la makedona kaj bulgara. Sed la politikaj cirkonstancoj diktas alimaniere. La etikado de lingvoj estas fenomeno politika – kaj eĉ la difino de “lingvo” estas tia.

5.5. Lingvo kiel ŝlosilo al aliaj fakoj

El ĉio ĉi ni povas konkludi, ke per studado de lingvaj fenomenoj eblas ekzameni politikon kaj ekonomikon tra nova lenso. Ĝi eble igos nin reinterpreti la historion. En alia ĉapitro ĉi-volume, mi donis la historian ekzemplon de okcidenta Eŭropo. Invento de presado kaj la kresko de leg- kaj skribkapablo kreis lokajn kaj regionajn merkatojn kiuj ebligis aperon de normaj naciaj lingvoj en la dekkvina kaj deksesa jarcentoj – kaj tio siavice forte emfazis la kreskon de institucioj en la diversaj landoj, kaj diversiĝon de politikaj kaj religiaj praktikoj. Resume: la diversiĝo de lingvoj siavice ebligis la evoluigon de lokaj presaj ekonomioj, lokaj kredaj ekonomioj, kaj sekve lokaj politikaj fokusopunktoj. La rezulto estis forta reduktado de la aŭtoritato de la centra transnacia eklezia potenco, kun, cetere, ties latina lingvo, kaj la ekapero de sendependaj kredaj komunumoj.

Ni hodiaŭ vidas similan fenomenon ĉe la reto. Oni eble supozus, ke dominus ĉe la reto la angla lingvo, kaj certgrade tio ja okazas, kiel ni jam notis; tamen, la procenta uzo fare de denaskaj parolantoj de la angla lingvo kaj eĉ uzantoj de la angla entute, falas proporcie al aliaj lingvoj: se uzo de la angla kreskas, uzo de aliaj lingvoj kreskas eĉ pli. Kaj la reto helpas malgrandajn lingvojn, ĉar ĝi faciligas iliajn kontaktojn, forigas la problemon de distribuo de presitaj tekstoj kaj ties kostojn, kaj ebligas al uzantoj de tiuj lingvoj facilan kaj senkostan komunikadon. Esperanto estas bona ekzemplo: la ĝeneraliĝo de la reto disponigas al uzantoj de Esperanto senpagajn tekstojn, abundajn ekzemplojn de parola lingvo, retajn revuojn, retajn vortarojn kaj enciklopediojn, kaj amason da aliaj faciligoj. Rezultis neta kresko de la nombro de regulaj kaj kompetentaj uzantoj (verŝajne pli granda kresko ol la anoj de la tradicia movado emas agnoski: Wandel 2015). Kaj apenaŭ necesas emfazi, ke perreta lernado de la lingvo fariĝis multe pli ofta metodo de lernado ol ĉiuj aliaj.

Ni povus trovi abundajn aliajn ekzemplojn, sed la baza punkto estas klara: homaj institucioj estas forte ligitaj al demandoj pri lingva kapablo, lingva elekto, lingva prestiĝo, kaj lingvouzo.

6. Distingi inter lingvoj

El kio konsistas lingvo? Ni eble nun havas pli klaran ideon – sed restas neklaraĵoj.

6.1. La nomoj de lingvoj

Ekzemple, kiel lingvo ricevas rekonon kaj nomon? Kiel oni scias, ke oni parolas la svedan kaj ne la anglan, aŭ la joruban, aŭ la vjetnaman? La respondo al tiu demando montriĝas pli komplika ol oni supozus. En partoj de kampara okcidenta Afriko, difinita vilaĝo eble uzas formon de lingvo, kiu similas tiun de apuda vilaĝo, sed ne tute, kvankam ĝi estas plene komprenebla de la vilaĝanoj de tiu apuda vilaĝo. Ĉe tria vilaĝo, apud tiu dua, denove aperas esence la sama lingvo, sed kun variaĵoj. Kaj tiel plu ... laŭ longa vico de vilaĝoj, ĝis oni atingas punkton kie la lingvo tiel ŝanĝiĝis, ke ĝi estas tute ne komprenebla de la vilaĝanoj de la unua vilaĝo. Ekzistas do klaraj diferencoj; sed ne ekzistas maniero dividi tiun t.n. dialektan kontinuum en pecojn kaj nomi tiujn pecojn apartaj lingvoj. Kaj tiuj kontinuo daŭras spite la aldonon de pliaj lingvaj tavoloj: instrulingvo en lernejoj, oficiala lingvo de la registaro, k.s. Ankoraŭ en Eŭropo ekzistas tia dialekta kontinuo (pli malforta ol ĝi iam estis, sed ankoraŭ paŭsebla), kiu etendiĝas de Portugalio ĝis norda Francio en unu direkto kaj ĝis suda Italio en alia. Alia dialekta kontinuo etendiĝas de Aŭstrio kaj norda Italio ĝis Nederlando kaj Danlando. Supermetitaj sur tiujn dialektajn kontinuumojn estas modernaj, normigitaj lingvoj kiel la franca, la itala aŭ la germana, kiuj ekestis ĉefe kun la ekesto de skribitaj tekstoj (kiuj cirkulas trans grandaj distancoj) kaj kun la ekesto de naciaj ŝtatoj, kun ties centrigitaj administracioj, klerigaj sistemoj, armeoj, ktp.

Tiuj kontinuo daŭre ekzistas ĉar multaj homoj parolas pli ol unu lingvan formon, aŭ pli ol unu lingvon. Eĉ se iuj homoj parolas lingvojn de pli vasta komunikado, ordinaraj homoj ofte uzas lokajn lingvajn formojn. Kaj ni memoru, cetere, ke multaj homoj, eĉ plimulto de homoj en la mondo, parolas pli ol unu lingvon.

6.2. Kiom da lingvoj?

Ni parenteze aldonu, ke kalkuli la nombron de lingvoj en la mondo estas vana okupo. Plej aŭtoritata tia listo estas tiu de Ethnologue.com, sed ties kompilantoj bone konscias, ke dividoj inter unu lingvo kaj alia estas ofte iom arbitraj, aŭ konvencijaj. Nomi lingvon facilas se temas pri grandaj normigitaj lingvoj, sed ĝi fariĝas pli kaj pli malfacila ĉe pli malgrandaj kaj malpli esplorataj lingvoj. Same malfacilas kalkuli kiom da homoj parolas difinitan lingvon. Se la difino de “lingvo” malfacilas, same malfacilas la difino de “paroli” kaj de “parolanto”. Ĉu nur denaskaj parolantoj? Se ne, kiom bone mi devas paroli (aŭ uzi) la polan por esti nomata parolanto (aŭ uzanto) de la pola? Kiom da verboj koni, kiom da gramatikaĵoj mastri? Fakte, aparta tereno

de la socilingvistiko estas la statistikado de nombroj de parolantoj kaj la evoluigo de metodoj por tion entute fari – laŭ maniero minimume kredebla. Por kalkuli, oni kutime uzas statistikojn pri klerigo aŭ geografia distribuo k.s. – statistikojn kiuj jam en la komenco estas malprecizaj, kaj ĉiuokaze mezuras ion alian ol lingvouzon. Por Esperanto eĉ tiuj minimumaj statistikoj plejparte mankas.

6.3. Lingva normigo

Same kiel en la deknaŭa jarcento por fari siajn horarojn fervojaj kompanioj devis krei sistemon de norma tempo, malgraŭ tio, ke en difinita momento la suno estas en alia pozicio en Londono ol en Bristol, aŭ en Peterburgo ol en Moskvo, tiel ĉiu nacia ŝtato do adoptis normigitan formon de unu lingvo, aŭ foje pli ol unu lingvo, por plenumo de siaj oficialaj laboroj. Tiu normigita formo de difinita lingvo en difinita ŝtato ne ekestis magie, sed rezultis el favorado de certaj formoj, aŭ eĉ certaj lingvoj, prefere ol aliaj dialektoj kaj lingvoj, kaj la fortikigo de tiu selekto per tiaj institucioj kiaj lernejoj kaj ĵurnaloj: normaj lingvoj estas esprimoj kaj konsekvencoj de institucia potenco kaj elita prefero. Tiel, normaj lingvoj, kiuj donas potencon kaj prestiĝon al siaj parolantoj, aperis el la abunda vepro de dialektoj. Famas la esprimo: lingvo estas dialekto kun armeo.

6.4. Influi la evoluon de lingvoj

Certagrade, tiu apero de normaj lingvoj estis rezulto de lingva politiko kaj lingva planado. Difinitaj politikoj (leĝoj pri la lingvo de instruo en lernejoj; leĝoj pri la lingvo aŭ lingvoj de la armeo; decidoj de redakcioj de ĵurnaloj pri la lingvaĵoj, kiujn ili uzos; starigo de lingvaj normoj por registaraj funkciuloj; leĝoj pri la lingvoj de kortumoj, parlamentoj, ktp.) celis produkti difinitajn rezultojn. Tiuj politikoj estis do la produktoj de pli-malpli konscia *planado*, kaj ili kondukis siavice al plia planado kaj pliaj politikoj.

Kiam en la dua duono de la pasinta jarcento sendependiĝis la kolonioj de la iamaj grandaj imperioj, ĉefe la franca kaj la brita, la rezultaj novaj landoj, esence arbitraj mikspotoj de etnoj kaj rasoj (la heredaĵo de la imperiaj disdividoj), devis rapide decidi, en kiu lingvo mastrumi siajn aferojn, kiujn lingvojn uzi en lernejoj kaj kortumoj, kaj tiel plu. Ĉiam tiuj decidoj tendencis favori unu grupon koste al alia, aŭ pludaŭrigi la potencon de la antaŭaj imperiaj mastroj. Ofte, la elektitaj lingvoj ne estis pretaj por tiuj esence novaj celoj: ili ne estis normigitaj, aŭ mankis al ili adekvata vortprovizo, aŭ ili ne estis sufiĉe disvastigitaj. Neeviteble, tiuj landoj estis devigataj turni sin al eŭropanoj por havigi al si helpon kaj konsilojn por enkonduki novajn lingvajn politikojn kaj starigi la substrukturejn por realigi ilin. El tiu febra aktivado ekestis la studkampoj de lingvopolitiko kaj lingvoplanado, kune kun nova interesiĝo pri lingvo kaj edukado, do pri la kampo de tielnomata aplika lingvistiko. Oni povas eĉ aserti, ke tiu agado firmigis, eĉ certagrade estigis, la kampon de socilingvistiko, aŭ tion, kion oni

foje nomis la sociologio de lingvoj. (Pri lingvoplanado kaj lingvopolitiko vidu mian ĉapitron en Tonkin 2006, kaj ankaŭ Cooper 1989, Johnson 2013, Kaplan & Baldauf 1997, Spolsky 2004 kaj Ricento 2006.)

Unu el la konsekvencoj de tiu interesiĝo pri la evoluigo de lingvoj estis la konstato, ke la relativa statuso de difinitaj lingvoj influas la statuson de ties parolantoj, kaj inverse. Tra la pasinta trideko da jaroj kreskis la interesiĝo pri lingvoj kaj homaj rajtoj – temo kiu ricevis relative malmultan atenton kiam oni formulis la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj en la jaro 1948. Ene de unuopa ŝtato oni povas esence forŝlosi civitanojn el civita partopreno per neagnosko de ilia lingvo – kaj inkluzivi ilin per agnosko. La lingvo, kiun homo parolas, povas esti bazo de antaŭjuĝoj kontraŭ tiu homo. Maljusta diskriminacio pro lingvoj estas tro ofta fenomeno, kaj estas ofte ligata al aliaj formoj de diskriminacio, ekzemple raso. La rilato inter justeco kaj lingvo estas hodiaŭ pli multe studata ol antaŭe, kaj ĝi formas bazon por efika lingvoplanado. Cetere, diskriminacio rilate al lingvoj okazas ankaŭ je internacia nivelo, ekzemple en la administrado de internaciaj organizoj. (Pri lingvo kaj justeco vidu ekzemple May 2001, Kymlicka & Patten 2003, Kraus & Grin 2018, Reagan 2019; pri internaciaj organizoj vidu la artikolon de Fernand de Varennes en Spolsky 2012.)

7. Lingvoplanado

7.1. Korpusa planado

Por plani ion, oni devas ankaŭ kompreni ĝin; kaj rezulte floris en la postkolonia epoko la tereno de antropologia lingvistiko, kun la celo elmapi ĝis tiam nestuditajn lingvojn. Oni devis ankaŭ krei skribistemojn por lingvoj, kiuj antaŭe ne havis ilin. En multaj okazoj necesis evoluigi tutajn terminarojn, kaj foje normigi gramatikajn formojn. Tio ja ne okazis en vakuo: jam delonge okazis similaj iniciatoj lingvaj, ekzemple la evoluigo de la hungara lingvo en la fino de la dekoka kaj komenco de la deknaŭa jarcento, la evoluigo de la finna en la deknaŭa, kaj, komence de la dudeka jarcento, la transformo de la komercista malaja lingvo en la modernan Bahasa Indonesia, la indonezian lingvon. La novhebrea oni devis sisteme plivastigi en la jaroj antaŭ kaj post la sendependiĝo de Israelo – fakte jam de ĝia ekuzo en la tiama Palestino komence de la dudeka jarcento. Tiu manipulo de la lingvo mem nomiĝas *korpusa planado*. Ĝi estas malfacile realigebla ĉar ĝi dependas de la kunlaboro de multaj uzantoj de la koncerna lingvo.

7.2. Statusa planado

Decido utiligi difinitan lingvon en la kortumoj aŭ en la parlamento aŭ kiel instruan lingvon en lernejoj eble postulos la evoluigon de terminologio, sed plejparte ĝi estas planado de la statuso de la lingvo, do *statusa planado*, kiu manipulas la kondiĉojn

laŭ kiuj difinita lingvo estas uzata. Tiu planado povas altigi la relativan gravecon de difinita lingvo aŭ malaltigi aliajn. Oni povas inkluzivi minoritatojn per utiligo de iliaj lingvoj ekzemple en oficialaj komunikoj aŭ instrukcioj pri balotado – aŭ ekskluzivi certajn minoritatojn kaj inkluzivi aliajn. Oni povas starigi tradukajn aŭ interpretajn servojn – aŭ specife ne fari tion, aŭ fari tion por certaj lingvoj kaj ne por aliaj. Evidente, tia statusa planado de lingvoj povas favori difinitajn politikajn partiojn kaj malfavori aliajn. Per formulado de censaj demandoj pri parolataj lingvoj, oni povas malaperigi iujn lingvojn kaj aperigi aliajn.

7.3. Akira kaj prestiĝa planado

Se oni decidas uzi difinitan lingvon en la lernejoj, kaj se la infanoj devas mem lerni tiun lingvon ĉar ĝi ne estas ilia denaska lingvo – aŭ minimume lerni formon de la denaska lingvo kiu estas nova por ili, tiu procedo nomiĝas *akira planado*. Aldoniĝis ankaŭ la koncepto de *prestiĝa planado* – nerektaj klopodoj levi la prestiĝon de iu lingvo por igi ĝin akceptebla al la publiko. Se ekzemple oni povas lerni la francan lingvon en brita lernejo sed ne (ni diru) la urduan, tiu estas samtempe akira planado (oni planas kiujn lingvojn lernigi) kaj prestiĝa planado (oni favoras la francan kaj ne la urduan).

7.4. Lingva mastrumado

En la pasinta jardeko kreskis la kompreno, ke tiaj planado kaj politiko povas aplikiĝi ne nur al ŝtatoj sed ankaŭ al aliaj institucioj (Spolsky 2004). Fakte, la grandaj espero, kiuj karakterizis la ekeston de la formala scienco de lingvoplanado en la 1950aj kaj 1960aj jaroj kondukis al certa seniluziigo. Estas malfacile ŝanĝi la lingvan konduton de la homoj: eĉ se tio certgrade eblas en formalaj situacioj, kiel en lernejoj aŭ ŝtataj burokratioj, ĝi estas multe pli malfacila se temas pri la ĉiutaga, neformala uzo; kaj estas malfacile tiel enradikigi la novajn normojn, ke ili plene asimiliĝu kaj fariĝu kvazaŭ aŭtomataj. Tamen, je pli malgranda skalo la sukcesoj pligrandas. Entreprenejoj havas siajn lingvajn politikojn; hospitaloj planas la interplektiĝon de la lingva kapablo de la pacientoj kun la lingvouzo de la stabanoj, ekzemple per provizo de interpretaj servoj; eklezioj havas siajn lingvajn politikojn; eĉ dulingvaj familioj mastrumas sian lingvouzon preferante unu lingvon super alia en difinitaj cirkonstancoj. Temas entute pri *lingva mastrumado* (Spolsky 2009; Kimura & Fairbrother 2020).

7.5. Lingva konkurenco

Ni vidas, ke en tiuj ĉi ekzemploj, la lingva ekspertizo estas ofte aplikata al lingvaj diferencoj. Socilingvistoj aparte interesiĝas pri la interfrotiĝoj de lingvoj, ilia konku-

renco por okupi difinitan spacon en la sociaj intertraktoj. La diversaj lingvoj de la mondo konsistigas vastan lingvosistemon, en kiu malgrandaj lingvoj orbitas ĉirkaŭ grandaj, kaj la grandaj ĉirkaŭ la ankoraŭ pli grandaj (de Swaan 2001; vidu ankaŭ lian artikolon en Coupland 2013). Ili batalas por okupi spacon. Foje, ekaperas tutaj lingvoj por transponti la lingvajn diferencojn. Tiel estis en la apero de nekompletaj funkciaj *piĝinaj lingvoj* en la epoko de sklaveco, kiuj siavice fariĝis kompletaj *kreolaj lingvoj* kiam naskiĝis infanoj, kiuj parolis (kaj sekve vastigis) tiujn lingvojn (Rickford & McWhorter 1997, Todd 1990). Socilingvistoj studas la fenomenon de lingva disvastiĝo kaj la faktorojn, precipe sociajn kaj ekonomiajn, kiuj produktas ĝin. Same ili studas la ŝrumpadon de lingvoj kaj la manierojn interveni por ĝin malhelpi. Tiu fluso kaj malfluso de lingvoj en difinitaj regionoj aŭ medioj nomiĝas *lingvoŝoviĝo*. Fakuloj pri tiu fenomeno esploras la faktorojn, kiuj igas difinitan lingvon fortiĝi aŭ malfortiĝi, kaj ekzistas pluraj studoj pri la lingva politiko je tutmonda skalo (Maurais & Morris 2001, 2003, ekzemple).

8. Lingva ŝoviĝo

Antaŭ kelkaj jaroj, artikolo pri la nederlanda lingvo (Van Oostendorp 2012) atentigis, ke kvankam la nederlandanoj, kun sama entuziasmo kiel antaŭe, lernas aliajn lingvojn, iam la lingvoj de la najbaroj – germana, franca, angla – ĝuis relativan egalecon en la lernejoj kaj aliloke. Nuntempe, tamen, pli kaj pli ŝrumpas la scio de la franca kaj la germana favore al scio de la angla: Nederlando fariĝis lando de socia dulingvismo, dum antaŭe ĝi estis lando de socia plurlingvismo. Dum regis plureco inter la fremdaj lingvoj konataj de nederlandanoj, la risko, ke tiuj lingvoj iel trudos sin en la ĉiutagan utiligon de la nederlanda, estas minimuma. Sed se unusola lingvo fariĝas la fremda lingvo elektita de ĉiu klera homo, ĝi povas komenci forronĝi la orlojn, la limojn, de tiu lingvo, tiel ke certaj sferoj, antaŭe la tereno de la nederlanda, fariĝas anglalingvaj. La situacio de supera edukado estas bona ekzemplo: pli kaj pli ofte la lingvo de instruado en magistrakursoj en nederlandaj universitatoj estas la angla (same en aliaj landoj, la rolo de la angla en supera edukado pligrandiĝas: vidu ekzemple Hultgren 2014). La nederlandanoj konsumas ĉiam pli da tekstoj anglalingvaj, pli da kulturaj produktoj anglalingvaj, k.s.

La nederlanda lingvo ne estas endanĝerigata – sed la procezoj, kiujn oni observas tie, okazas multe pli severe ĉe malgrandaj minoritataj lingvoj, kies parolantoj forlasas ilin por trovi ekonomian sukceson en aliaj mondopartoj, aŭ kies lojalaj uzantoj ne povas transdoni tiujn lingvojn al siaj infanoj ĉar mankas subteno en la lernejoj. Multaj homoj argumentas, ke se la uzantoj de lingvo ne plu volas uzi ĝin, oni perdas malmulton per ĝia morto; aliaj asertas, ke la malapero de lingvo konsistigas malaperon de sciosistemo kaj, ofte, de tuta kulturo (Nettle & Romaine 2000, Hagège 2000, Harrison 2007). La moderna migrado, la amasmedioj kaj similaj faktoroj metas en danĝeron la plimulton de la lingvoj de la mondo, kiuj, sen aparta nia interveno, mortos antaŭ la fino de la

jarcento. Tiu interveno estas alia faceto de tiu mastrumado, kiun mi menciis pli supre: oni povas *kultivi* lingvon: fortigi ĝiajn kulturajn instituciojn, subvencii ĝian uzon en la komerco, favori ĝin en certaj intertraktoj. Kvankam foje la kontraŭaj faktoroj estas tro fortaj, ekzistas multaj ekzemploj de malgrandaj lingvoj, kiuj komencas reenradikiĝi en la socion per tia “inversigo de lingva ŝoviĝo” (Fishman 1991).

Indus aldoni, ke se la malgrandaj lingvoj estas tre malgrandaj, la grandaj lingvoj estas tre grandaj. Ĉirkaŭ sepdek procentoj de la monda loĝantaro parolas unu el dekunu lingvoj. La norma ĉina, la hindia kaj urdua (kun malsamaj skribsistemoj kaj signifaj diferencoj, sed kutime klasigitaj inter lingvistoj kiel unu lingvo), la hispana kaj la angla havas la plej grandajn nombrojn de parolantoj, sed taksoj de la nombro de denaskaj parolantoj konsiderinde varias, kaj taksoj pri parolantoj de tiuj lingvoj kiel duaj lingvoj varias enorme.

9. Esperanto

En la ĉi-supra diskuto ni ne rekte konsideris Esperanton, ĉefe ĉar tiu temo estas alirebla laŭ aliaj vojoj. Sed ni neglektus nian respondecon se ni nenion dirus pri la ligo inter lingvo kaj socio unuflanke kaj Esperanto aliflanke. La temon mi mem aliris en mia jam menciita studo (Tonkin 2006) de aktualaj problemoj en la Esperanto-movado.

Eĉ mezuri la aktualajn dimensiojn de la nuntempa Esperanto-movado estas malfacile. Ni jam notis la nefidindon de censaj kaj similaj mezuroj de la nombro de parolantoj de difinita lingvo. Se temas pri Esperanto, la problemo estas eĉ pli granda – unue ĉar Esperanto kutime ne estas la unua lingvo de siaj parolantoj, kaj due ĉar Esperanto ne havas geografian centron, ne aperas en naciaj censoj, kaj malofte instruiĝas en klasĉambroj. Artikolo de Wandel (2015) en speciala numero pri Esperanto de la revuo *Interdisciplinary Description of Complex Systems* aliras tiun demandon, sed per metodo (nombrado de retaj uzantoj) malferma al kritikado.

Ne estas tre surprize, ke la lingva flanko de Esperanto plej multe studata estas la lingvistika flanko (vidu ekzemple Jansen 2013, 2015a, 2015b, Pereltsvaig 2017, Koutny 2018, kaj la ideojn de Dasgupta 2011), sed ja ekzistas pluraj studoj pri psikolingvistika kaj socilingvistika aspektoj – kvankam aparte manka estas la sistema studado de parola lingvouzo neformala (tamen vidu Dankova 2009, Fiedler 2002, 2008, 2018), la influo de etnaj lingvoj je esprimado en Esperanto (Krägeloh 2009), k.s. Pri la konsisto kaj opinioj de la esperantistoj aperis kelkaj studoj – plej laste tiu de Fians (2020). La abundaj verkoj de Blanke (vidu i.a. Lewoc 2008, Blanke 2018, Brosch & Fiedler 2011 kaj ties bibliografion) traktas Esperanton en la kunteksto de interlingvistiko kaj lingvoplanado, kaj ankaŭ tuŝas demandojn de lingvo kaj politiko.

10. Konkludo: socia plurlingvismo

Por fini tiun ĉi rapidan trarigardon de la implicoj de la rilatoj inter lingvo kaj socio necesas ree emfazi, ke unuopaj lingvoj ne ekzistas en izolo – nek makre nek mikre. Multaj landoj montras konsiderindan *socian* plurlingvismon: situacion en kiu pluraj lingvogrupoj kunekzistas, kutime sur propra teritorio sed foje plene miksitaj sur sama teritorio. Sed en tiuj socioj kutime ekzistas certa nivelo, ĉu alta ĉu malalta, de *individua* plurlingvismo: homoj, kiuj parolas du aŭ plurajn el tiuj lingvoj (pri multlingvismo, vidu Edwards 1995). Verdire, kiel ni notis, la plimulto de la homa enloĝantaro parolas pli ol unu lingvon, kaj grandega proporcio havas almenaŭ minimuman kapablon en pli ol unu lingvo.

La simpla bildo de konkurenco inter lingvoj do fariĝas pli nuancita, ĉar la homoj fakte havas repertuaron de lingvoj, kiujn ili uzas jen por unu funkcio, jen por alia. Abundas la homoj en okcidenta Afriko, kiuj havas sufiĉan scion de la haŭsa lingvo, lingvo de unu popolo sed ankaŭ komerca lingvo, por trakti per ĝi en la loka vendo-placo – malgraŭ tio, ke ili parolas alian lingvon en la hejmo. Same, multaj homoj havas minimuman scion de la franca aŭ la angla por trakti kun la instancoj, malgraŭ tio, ke ilia unua lingvo estas io tute alia. En certaj okazoj, homoj uzas kvar aŭ kvin lingvojn por diversaj celoj. En tia kunteksto malfacilas decidi, kiu lingvo estas la denaska lingvo de tia homo. Fakte la nocio, ke ĉiu homo havas sian “patrinan” aŭ “gepatran” lingvon estas lingva mito, aŭ minimume trosimpligo, restaĵo de la epoko kiam oni kredis, ke infano lernas lingvon pere de suĉo de la patrina lakto. Fortigis ĝin la moderna fenomeno de normigitaj ŝtataj lingvoj.

En la hodiaŭa mondo, pli kaj pli da homoj ekkomprenas, ke unu lingvo ne sufiĉas por plene vivi sian vivon: necesas pli ol unu. En tiu senco, ili venas al la konstato, al kiu jam delonge venis la esperantistoj: lingvolernado vastigas la horizontojn. Sed pli ol tio: per mastrado de lingvoj oni povas ĝui la kulturojn de aliaj, eltrovi novajn manierojn percepti la mondon, kaj ... gajni pli da mono.

Bibliografio

- Blanke, Detlev 2018: *International Planned Languages*. New York: Mondial.
- Blanke, Detlev & Ulrich Lins, red. 2010: *La arto labori kune*. Rotterdam: UEA.
- Bourdieu, Pierre 1982: *Ce que parler veut dire: L'économie des échanges linguistiques*. Paris: Fayard. [Angla traduko 1991: *Language and Symbolic Power*. Cambridge, MA: Harvard University Press]
- Brosch, Cyril & Fiedler, Sabine 2011: *Florilegium interlinguisticum: Festschrift für Detlev Blanke zum 70. Geburtstag*. Frankfurt: Peter Lang.
- Chomsky, Noam 2010: *Lingvo kaj menso*, trad. Edmund Grimley Evans. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio
- Collinson, William E. 2019: *La homa lingvo / Human Language*. Rotterdam: UEA.

- Cooper, Robert L. 1989: *Language Planning and Social Change*. Cambridge: Cambridge University Press.
- Coulmas, Florian, red. 1997: *The Handbook of Sociolinguistics*. Oxford: Blackwell.
- Coupland, Nikolas, red. 2013: *The Handbook of Language and Globalization*. Chichester, Anglo: Wiley-Blackwell.
- Crystal, David 1987: *The Cambridge Encyclopedia of Language*. Cambridge & New York: Cambridge University Press.
- Dankova, Natalia 2009: Temporality in spoken Esperanto. *Esperantologio* 4: 43-60.
- Dasgupta, Probal 2011: *Loĝi en homaj lingvoj*. New York: Mondial.
- de Swaan, Abram 2001: *Words of the World: The Global Language System*. Cambridge: Polity Press.
- Edwards, John 1995: *Multilingualism*. London: Penguin.
- 2009: *Language and Identity*. Cambridge: Cambridge University Press.
- Fians, Guilherme 2020: Mind the age gap: Communication technologies and intergenerational language transmission among Esperanto speakers in France. *Language Problems and Language Planning* 44/1: 87-108.
- Fiedler, Sabine 2002: *Esperanta frazeologio*. Rotterdam: UEA.
- 2008: Esperanta frazeologio. En: Joanna Lewoc (red.) *Interkomunikaj variacioj*. Göttingen: Leins Verlag. 53-73.
- 2018: Esperanto el frazeologia vidpunkto. En: Christer Kiselman (red.) *Aliroj al Esperanto*. Dobřichovice: KAVA-PECH. 79-101.
- Fishman, Joshua A. 1991: *Reversing Language Shift*. Clevedon: Multilingual Matters.
- Gazzola, Michele 2010: Lingva diverseco kaj la internaciigo de la universitatoj en Eŭropo. En: Detlev Blanke & Ulrich Lins, red. *La arto labori kune*. Rotterdam: UEA. 156-161.
- Hagège, Claude 2000: *Halte à la mort des langues*. Paris: Odile Jacob.
- Harrison, K. David 2007: *When Languages Die*. Oxford: Oxford University Press.
- Hultgren, Anna Kristina & Frans Gregersen & Jacob Thøgersen (red.) 2014: *English in Nordic Universities: Ideologies and Practices*. Amsterdam: John Benjamins.
- Hymes, Dell H. 1972: On communicative competence. En: J. B. Pride & J. Holmes (red.): *Sociolinguistics: Selected Readings*. Harmondsworth: Penguin. 269–293.
- Jansen, Wim 2015a: Grammar: A Complex Structure. A Linguistic Description of Esperanto in Functional Discourse Grammar. *Interdisciplinary Description of Complex Systems*. 13/2:275-287.
- 2015b: Kelkaj aspektoj de Esperanto laŭ Funkcia Diskurs-Gramatiko. *Esperantologio* 7:17-40.
- Johnson, David Cassels 2013: *Language Policy*. New York: Palgrave Macmillan.
- Joseph, John E. 2004: *Language and Identity: National, Ethnic, Religious*. Basingstoke & New York: Palgrave Macmillan.
- Kaplan, Robert B. & Richard B. Baldauf, Jr. 1997: *Language Planning: From Practice to Theory*. Clevedon: Multilingual Matters.
- Kimura, Goro Christoph & Lisa Fairbrother 2020: *A Language Management Approach to Language Problems*. Amsterdam: Benjamins.
- Kiselman, Christer (red.) 2018: *Aliroj al Esperanto*. Dobřichovice: KAVA-PECH.
- Koutny, Ilona 2018: Tipologia karakterizo de Esperanto kiel natura lingvo. En: Christer Kiselman (red.): *Aliroj al Esperanto*. Dobřichovice: KAVA-PECH. 129-146.

- Kraus, Peter & François Grin, red. 2018: *The Politics of Multilingualism*. Amsterdam: Benjamins.
- Kymlicka, Will & Alan Patton (red.) 2003: *Language Rights and Political Theory*. Oxford: Oxford University Press.
- Lewoc, Joanna (red.) 2008: *Interkomunikaj variacioj*. Göttingen: Leins.
- Maurais, Jacques & Michael Morris (red.) 2001: *Géostratégies des langues*. Québec: Les publications de Québec.
- Maurais, Jacques & Michael Morris (red.) 2003: *Languages in a Globalising World*. Cambridge: Cambridge University Press. [Traduko de Maurais & Morris 2001]
- May, Stephen. 2001: *Language and Minority Rights*. Harlow: Longman.
- McEntee-Atalianis, L.J. 2019: *Identity in Applied Linguistics Research*. London: Bloomsbury Academic
- Nettle, Daniel & Suzanne Romaine (red.) 2000: *Vanishing Voices: The Extinction of the World's Languages*. Oxford: Oxford University Press
- Pereltsvaig, Asya 2017: Esperanto linguistics: State of the art. *Language Problems and Language Planning*. 41/2: 168-191.
- Pinker, Steven 1995: *The Language Instinct: How the Mind Creates Language*. New York: Morrow.
- Reagan, Timothy 2019: *Linguistic Legitimacy and Social Justice*. New York: Palgrave Macmillan.
- Ricento, Thomas 2006: *An Introduction to Language Policy, Theory and Method*. Oxford: Blackwell.
- Rickford, John R. & John McWhorter 1997: Language contact and language generation: Pidgins and creoles. En Florian Coulmas (red.): *The Handbook of Sociolinguistics*. Oxford & Malden, MA: Blackwell. 238-256.
- Romaine, Suzanne 2000: *Language and Society*. Dua eldono. Oxford & New York: Oxford University Press.
- Spolsky, Bernard 2004: *Language Policy*. Cambridge: Cambridge University Press.
- 2009: *Language Management*. Cambridge: Cambridge University Press.
- (red.) 2012: *The Cambridge Handbook of Language Policy*. Cambridge: Cambridge University Press.
- Todd, Loreto 1990: *Pidgin and Creole Languages*. Dua eldono. London: Routledge & Kegan Paul.
- Tonkin, Humphrey 2006: *Lingvo kaj popolo: Aktualaj problemoj de la Esperanto-movado*. Rotterdam: UEA.
- Trudgill, Peter 2000: *Sociolinguistics: An Introduction*. Kvara eldono. London: Penguin.
- Van Oostendorp, Marc 2012: Bilingualism versus multilingualism in the Netherlands. *Language Problems and Language Planning* 36/3: 252-272.
- Wandel, Amri 2015: How many people speak Esperanto? Esperanto on the Web. *Interdisciplinary Description of Complex Systems*. 13/2: 318-321.
- Wells, John C. 1978: *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Wennergren, Bertilo 2010: *Detala gramatiko de Esperanto*. Partizánske, Slovakio: Espero.
- 2016: *Plena manlibro pri Esperanta gramatiko*. Tria eldono. Emeryville CA: Esperanto-USA.

Demandoj kaj diskuttemoj

- 1) Oni povas konsideri lingvon abstrakta sistemo aŭ formo de socia interago. Kiel tiuj nocioj diferencas?
- 2) Kio estas pragmatiko?
- 3) Kiel lingvo funkcias kiel markilo de identeco? Ĉu vi povas fari liston de tiuj funkcioj?
- 4) Kiel lingvoj rolas en la sfero de politiko kaj ekonomiko?
- 5) Ni menciis kelkajn ekzemplojn de lingva prestiĝo kaj malprestiĝo. Ĉu vi povas doni pliajn ekzemplojn de la samaj fenomenoj?
- 6) Kial Noah Webster klopodis fari diferencojn inter la “angla” kaj “amerika” lingvoj?
- 7) Kian efikon havis Interreto rilate al lingvoj?
- 8) Kial ofte malfacilas nomi kaj distingi lingvojn?
- 9) Kio estas lingva normigo kaj kial ĝi okazas?
- 10) Nomu la diversajn specojn de lingvoplanado.
- 11) Kio estas lingva ŝoviĝo kaj kial ĝi okazas?

Humphrey TONKIN estas emerita brita/usona profesoro pri humanaj studoj kaj emerita prezidanto de la Universitato de Hartford, Usono. Li estis prezidanto de UEA, ESF kaj CED. Lastatempaj verkoj inkluzivas redaktitan kolekton de la poemoj de Esperanto-poeto Clarence Bicknell (2023), esperantigon de la verko de Shakespeare *Koriolano* (2023), esperantigon de poemserio de Esther Schor (*Sepo por Sarra*, 2022) kaj redaktitan kolekton de eseoj, *Language and Sustainable Development* (kun Lisa McEntee-Atalians, 2023).

Psikologio de komunikado

Resumo

Komunikado estas homa konduto kaj pro tio, eblas kompreni ĝin pere de la scio pri la homa konduto. En ĉi tiu ĉapitro la kerna mesaĝo estas substreki la gravecon de la neraciaj eroj en la realaj komunikadoj. Tiuj neraciaj eroj havas plurajn devenojn, la plej ĉefrola el ĉiuj estas la emocioj. Oni priskribos la ĉefajn principojn pri la emocia enhavo de la homa komunikado, tio estas: (1) plejofte la homoj ne havas celojn, kiam ili partoprenas en komunikado; ili agas kaj reagas senplane kaj efektivas senkonsciajn survojajn decidojn; (2) homoj lernas komuniki samtempe kiam ili lernas la mondon kaj sian gepatran lingvon; ĉio el tio venas en malsimpla pakaĵo, kiun oni emas reprodukti dum la tuta vivo; (3) la komunikado okazas pro sociaj malsimplaj kialoj aŭ pro la kunekzisto de retoj de cirkonstancoj, pri kio homoj malfacile konscias; (4) malgraŭ la fakto, ke ni lernis pli alte valorigi la racian argumentadon, ege malofte ni praktikas ĝin, sed pro tia lernado, ni emas senti kaj malprave defendi, ke nia maniero komuniki estas tia; (5) la realaj komunikadoj baziĝas sur asertoj, kiujn mi nomas ŝajnaj konkludoj; ili ŝajnas esti, sed ne estas konkludoj, ĉar male al la veraj konkludoj, tiuj asertoj ekzistas antaŭ la argumentoj kiuj ŝajne subtenas ilin; (6) la homa komunikado, same kiel la homa pensmaniero, plenas je biasoj, kiujn ni malfacile akceptas kiel tiajn; pro tio niaj diskutoj malfacile atingas komunan vidpunkton, ĉar partoprenantoj emas resti ĉe sia konkreta biaso; (7) pluraj nuntempaj esploroj pri komunikado en sciencoj de la homa konduto temas pri la sociaj retoj; tie oni abunde trovas konkretaĵojn de la antaŭaj asertoj; ni mencias du: la malamemaj diskursoj kaj la malveraj novaĵoj; kaj (8) homoj ĉefe pensas kaj komunikas grupe aŭ laŭ la grupa pensmaniero, serĉante koincidon kun la vidpunkto de la referenca grupo. Ĉiuj el tiuj asertoj utilas ankaŭ kaj por kompreni la sukceson kaj malsukceson de la disvastigado de Esperanto, kaj por pripensi, kiel plani pli sukcesajn klopodojn.

1. Kion vi jam scias

Komunikado estas ne nur ĉiutaga sperto sed ankaŭ malfacile klarigebla scikampo, ĉar ĝi tuŝas tiom da disciplinoj, ke ofte fakuloj pri komunikado samtempe piediras sur la surfaco de malsamaj areoj de la scienco: antropologio, sociologio, politikaj sciencoj, merkatico, ĵurnalismo, publika administrado, internaciaj rilatoj, lingvistiko ktp. Ene de tiu granda aro ĉeestas ankaŭ la psikologio. Psikologio traktas la komprenon de la homa konduto. Malgraŭ la fakto, ke oni povas paroli pri komunikado inter partikloj aŭ formikoj, ĉi tie oni situigas en la kampo de komunikado inter homoj, tio estas homa konduto. Do logike jam estas multaj publikigaĵoj pri psikologio de la komunikado, kiujn vi povos legi laŭ via deziro, ebloj kaj tempo. Ĉi tie oni ne rediros tion, kion oni

jam rediradas en tipaj tekstoj pri komunikado ekde la psikologia vidpunkto. Ĉi tie vi havas origine Esperantan tekston, pritraktante psikajn detalojn de la ago komuniki, kiujn vi malfacile trovos aliloke.

Antaŭ ol legi ĉi tiun tekston, vi jam lernis aŭ aŭskultis multajn aferojn rilate al la komunikado. Certe vi scias pri tiu ofta strukturo, ĉiam rakontita, laŭ kiu la komunikado estas sperto, kiu okazas inter sendanto kaj ricevanto, pere de iu kanalo, kiu transportas mesaĝon ene de kunteksto. Eble vi jam scias, ke la ago komuniki havas celon kaj teknikon; kaj pro tio oni povas konkludi pri komunikefiko. Eble vi jam scias, ke la komunikado estas ne nur lingva.

Estas bona afero, ke vi scias tion kaj tiom. Ĉi tie oni eniros en la mondon de la komunikado pere de la aserto, ke ĝi estas *agado inter homoj*. Kaj ni, la homoj, estas realaj estaĵoj, ne tiom raciaj, nek saĝaj, nek celemaj, nek konsciaj... kiel vi legis aŭ aŭskultis rilate al la ago komuniki.

Pro la deziro klarigi pri tia aserto, ĉi tiu teksto aranĝiĝas pere de principoj, kies celo estas klare montri la kernan rilaton inter la vasta dimensio de la komunikado kaj la vasta dimensio de la homa konduto. La celo estas, ke vi komprenu, ke ni ne estas maŝinoj, nek raciaj ambicie celemaj homoj, kiuj havas klaran celon dum la spertoj komuniki. La celo estas, ke vi havu rektan kontakton kun la kernaj eroj de la homa konduto, kiuj eble faciligos kompreni, kial kaj kiel homoj psike komunikas.

2. La komunikado ĉefe temas pri emocia sperto

Homoj estas emociaj bestoj, kiuj kelkfoje racie kondutas. Eĉ kiam ni racie kondutas, la racio ne puras; ĝi laboras por niaj emocioj. Oni lernas, ke la komunikado havas celon. Sed la psikologio montras, ke la homoj ege malofte kondutas laŭ celoj.

La homa konduto okazas pro **biologiaj kialoj**. Ofte la homoj surpriziĝas, timas, ĝojĝas, forkuras, alproksimiĝas, rapidigas la ritmon de la korbato, ruĝiĝas aŭ blankiĝas, krias, ridas, subite silentas, kapturnas, ekscitiĝas, maltrankviliĝas kaj longe tiel plu, kaj ĉio el tio okazas nekonscie, sed rekte alvenante de la korpo pro la aktivado de kompleksaj interrilatoj de korperoj.

Ana estas junulino, kiu piediras surstrate, renkontas dolĉaĵojn, haltas, rigardas tra ĝia montro-fenestro, produktas salivon kaj laŭte diras „*Ho! Mi nun manĝus ĉion!*” Ŝi ne havas celon. Ŝi ne konscie diras ion al iu. Ŝi nur lasas sian korpon sinesprimi tiel, ke la rezulto iĝas lingva. Pako eniras en sian domon. Estas nokto. Li loĝas sola. Ĵus enirinte li aŭdas suspektindan bruon kaj mallaŭte ekkrietas „*Ĉu estas iu ĉi tie?*”. Li ne celas komuniki. Imagu, ke iu respondas „*Jes, estas mi. Mi estas ŝtelisto, kiu eniris pensante, ke ĉi tie mi trovos ion valoran, sed vi tro frue revenis kaj mi ne havis tempon ŝteli ion. Bonvole atendu iomete ekstere. Mi baldaŭ finos la taskon*”. Aŭ povus esti ĉi tiu alia „*Mi estas la fantomo de la subtero! Ĉi tiu domo estas konstruita sur mia tombejo kaj mi koleras pro tio. Tamen mi komprenas, ke vi ne respondecas pri tio. Ĉu ni ludu pilkon?*” Kiam Pako demandis, la lasta okazaĵo, kiun li atendas, estas ke

iu respondas lian demandon. Kiam li demandis, vere li ne estis demandanta, li estis lasanta sian korpon lingve sinesprimi.

Ĉar la komunikado estas homa konduto, la komunikado plejmulte estas neracia. Unu el la flankoj de la neracieco estis ĵus menciita: la vasta kondutaro, kies origino estas biologia. Tamen la ĉefa speco de homa konduto ne estas tia, sed emocia. La homa konduto ĉefe havas **emociajn kialojn**.

Karina diris, ke mi ne revenu hejmen. Kial ŝi diris tion... dubante? Ŝia voĉo estis iom stranga. Ĉu temas pri ia danĝero? Mi lastatempe sentas, ke Karina tro envias mian bonŝancon, kaj ŝi perdis sian laboron. Ĉu la vera intenco estas diri, ke mi ne revenu, ĉar eble mi fiaskigos ŝian planon?



Ĉu ni komunikas nur en la nuna parola momento?

En kelkaj situacioj, homoj komunikas celante konkretan ion. Temas pri konscia planita konduto, kiu esperas atingi konkretan rezulton. Ekzemple: Kormi deziras vendi biciklon al Marta. La celo de Kormi estas vendi. Pro tio ŝi prezentas la informon pri la biciklo tiel, ke ŝi esperas allogi Marta-on pere de precizaj vortoj en preciza diskurso. Marta estas profesorino, kiu publikigas sciencajn artikolojn kaj instruas en universitata klasĉambro. En ambaŭ kondutoj de Marta estas klaraj celoj komuniki pere de precizaj konscie planitaj metodoj.

Tia situacio, tio estas racia komunikado, estas ege malofta. Ni ne nur estas necele-maj, sed eĉ kiam ni celas ion, plejparto de nia konduto estas nekonscie emocia. Kormi ankaŭ komunikos neparole; ekzemple pere de sia mieno, vestaĵo, brakomovo ktp. Por kompreni kiel kaj kial Marta tion tiel publikigas kaj tion tiel instruas, oni plejparte devas atenti pri la emocia flanko de la Marta-konduto. Ekzemple, ŝi sentas alloga la instruadon, ŝi havis malbonajn spertojn survoje publikigi, ŝi havas premon de la institucio, ŝi ne kapablas fari ion, kion ŝi konsideros malaltnivela... Ŝia lernado ekde la naskiĝo, ŝia socia ĉirkaŭaĵo, ŝia nuntempa amikaro ktp. influas plejeble nekonscie ŝiajn agojn komuniki. Kelkajn el tiuj detaloj Kormi kaj Marta kontrolas konscie eĉ antaŭplanite. Sed la plejmulto situas ekster ilia racio. Kial? Ĉar ni, homoj, survoje por sukcese vivi aŭ travivi, uzas la konscion nur por malgranda peco el la realo, kiu nepre bezonas konscion. Konscio estas kiel mono: oni bone decidu, kiel uzi ĝin, ĉar ĝi estas limigita kaj havas rapidan elĉerpiĝon.

Pensu ekzemple pri la ago piediri. Oni ne diras al si mem „*Atentu, via dekstra piedo estas antaŭe, do vi ne refoje movu ĝin, sed la maldekstran. Jes, bone. Nun atentu, ke la brakoj kaj la trunko estu tiaj, ke vi ne falu surgrunden; tenu la korpan ekvilibron. Atentu! sur la trotuaro estas kelkaj aliaj piedirantoj, kiujn vi povas neintence trafi eĉ bati. Pensu ankaŭ pri la ekzisto de tiuj arboj, tiom proksimaj al la vojo!*” Ne, ni ne faras tion. Ni eĉ ege ofte ne estas ĉi tie nek nun. Niaj mensoj kutime flugas inter pensaĵoj, revoj, nesolvitaj aferoj... Dum ni pensas, korpo moviĝas ŝajne sendepende. Tio estas gravega flanko de nia ekzisto: ni povas liberigi la konscion de nebezonataĵoj. Se vi akceptas tion, akceptu ankaŭ, ke la komunikado ne estas escepto, sed natura normala homa konduto. Alivorte: plurfoje ni komuniĝas samspece kiel ni piediras, glutas ion aŭ stariĝas: plejeble tia konduto troviĝas ekster la konscio, racio, celemo aŭ planado.

Kiam oni eniras en lifton kaj diras „*Bonan tagon*”, oni ne celas komuniki ion pere de simila aserto kiel „*mi deziras al vi, nekonata homo, ke hodiaŭ estu tago tia, ke fine, kiam alvenos la nokto, vi sentos ke la ĵus finita tago estis inda*”. Ne. Oni ne salutas pro tio. Oni salutas ĉefe pro kutimo, tio estas, ĉar ia nekonscia ilo el la cerbo emigas onin saluti, kiam oni renkontas alian homon en fermita spaco, kie ambaŭ devas esti kune dum pli ol unu sekundo. Tio estas kulture klare influita. En multaj lokoj, homoj emas ne rigardi la okulojn de la aliaj. Sed en kelkaj landoj (ekzemple, Hispanujo), plejofte homoj ne povas toleri eniri en komunan spacon kaj resti silentaj. Oni devas diri ion. Kaj diri ion ne estas celo, sed emo nerezistebla.

Plurfoje homoj parole kaj korpe reagis tiel, ke la konsekvenco estas nedezirata laŭ ili mem. Se ili pensintus, celintus aŭ planintus, certe ili reagintus alimaniere. Sed ili ne pensis, nur reagis. Tio okazas, ekzemple, kiam oni estas kolera kaj montras sian koleron eĉ lingve. Poste, ĉefe se oni estas iom inteligenta, pentos.

Eble pere de tiuj argumentoj kaj ekzemploj, vi sukcese forigos el via menso la miton "la komunikado estas racia konduto". Estas pluraj sciencaj publikigaĵoj pri la graveco de la emocioj en la komunikado pere de nia maniero ĉeesti en la mondo. Sed malfacile oni trovos iun en Esperanto. Pere de la hispana, la teksto de Estrada (2021) estas rekomendinda. Li priskribas, kiel la emocioj estis forigitaj de la konscia diskurso pri la homeco almenaŭ ekde Aristotelo, malgraŭ la fakto ke la komunikado plenas je emocioj, sentoj kaj deziroj.

3. La komunikado estas psiko-socie realigata

Akceptinte, ke la komunikado estas ĉefe neracia, oni povas kompreni, kiel la komunikado realiĝas en natura etoso, tio estas socie. Homoj lernas de la socio, kondutas en socio kaj komunikas en socio. Malgraŭ la fakto, ke kutime oni studas, ke la homa komunikado havas celojn, ke la homoj atingas konkludojn pere de argumentoj kaj ke oni scias sendepende de la scio de la aliaj, la realo estas iom malsimila. En ĉi tiu sekcio la celo estas pripensi la kutiman manieron argumenti kaj kiel homoj kunsentas, kunasertas aŭ kunkonkludas.

3.1. La mallogiko

Laŭ la teorio, la argumentado okazas kiam oni havas kelkajn informojn kiel dekomencan materialon. Tiun materialon oni analizas per ia racia metodo. La rezulto de la analizado aŭ apliko de la metodo nomiĝas konkludo. Ekzemple:


Dekomenca informo: *Kuti estas bovino*

Metodo: *neniu bovino kapablas flugi. Ni scias ke Kuti estas bovino, do*

Konkludo: *Kuti ne kapablas flugi.*

Se oni analizas la realan konduton de la realaj homoj, tia maniero argumenti ege malofte okazas. La realo plejparte temas pri la mala vojo, kiun oni povas nomi *mallogiko*. Mallonge klarigita la mallogiko konsistas el tri paŝoj: (1) havi dekomencan aserton, (2) serĉi ian argumenton pere de kiu, oni povas teni la aserton, (3) prezenti ĝin kvazaŭ tiu aserto reale estas konkludo, kiun oni povas nomi *ŝajna konkludo*, *ŜK*.

Oni lernas pakajon de *ŜK* same kiel la gepatran lingvon. Infanoj eklernas sian lingvon per frazoj aŭ pli malsimplaj strukturoj, ne per vortoj. La plurvortaj unuoj venas kune kun mienoj de ĉirkaŭantoj aŭ okazaĵoj. Tiuj malsimplaj unuoj eniras en la kapon unue. Poste oni konscias (ĉefe danke al la edukistemo), ke la lingvo povas esti dividita ĝis la fonemoj kaj literoj aŭ ideogramoj. Same okazas pri nia maniero interpreti la mondon: ekde la naskiĝo oni lernas interpreti la propran ekziston, la ĉirkaŭaĵon kaj la okazaĵojn kiel pakajon de *ŜK*. Oni ne lernas la mondon per argumentado, sed pere de socia enspiro. Oni lernas ne nur la lingvon, ke la aĵoj falas de supre suben aŭ ke enmeti manon en fajron damaĝas onin, sed ankaŭ kiel interpreti preskaŭ ĉion. Kiam oni asertas, ke virinoj devas resti hejme, ke migrantoj estas krimuloj, ke krimuloj ne fariĝas, sed naskiĝas, ke ĉiuj atingas rezultojn en la vivo laŭ sia merito kaj tiel plu, oni tion lernas samtempe kun la cetero el la scioj pri la mondo. Kaj tia ampleksa lernado okazas sen preciza instruo, nek klarigoj, sed nekonscie prenita de la ĉirkaŭa maniero interpreti. Poste aŭ kelkfoje venas momentoj, kiam oni sentas la premon argumenti, tio estas klarigi la fundamentojn de siaj interpretaĵoj. Tiam oni serĉas argumentojn, diskursojn, verajn aŭ inventitajn okazaĵojn... kiuj utilu kiel argumentoj. Do oni ne konkludas, ĉar la konkludoj ekzistis antaŭ la klarigo.



Malsamaj manieroj argumenti laŭ la rekta logiko kaj la homa kutimo

Estas pluraj manieroj konkretigi la mallogikon. Mi mencias la ekzemplojn de la finigaserto, la biaso de la okazo kaj la biaso de konfirmo. Ĉiuj el ili temas ĉefe pri manieroj rezisti ŝanĝi la propran manieron pensi pri iu temo, kaj ĉiuj gravas dum la homa komunikado, kiam homoj diskutas, ne koincidas aŭ eĉ kune fortigas la komunan manieron pensi.

Ofte pluraj homoj partoprenas en babilado pere de frazoj, kiujn ili prezentas kiel argumenton, kiu estas gramatike ĝusta, sed ne havas kvaliton de argumento. Temas pri asertoj, kiuj ne akceptas diskuton kaj montras la deziron fini la diskuton aŭ babiladon pri la ĝisnuna temo. Pro tio oni nomu tian frazon *aserto de finigo aŭ finigaserto*. Ekzemple: *Tio okazas la tutan vivon de Dio, Ĉiuj scias tion, Mi scias tion danke al longa sperto, Mi tion asertas pro fundamentaj kialoj, Nur stultuloj povas aserti la malon, Demandu kaj ĉie vi trovos ĉi tiun veraĵon, Tio estas tiom klara!* kaj simile. Neniu el tiuj frazoj donas informon. Neniu el ili vere argumentas aŭ klarigas pri la ŜK. Ĉiuj el ili montras, ke la asertanto ne havas verajn argumentojn, sed klopodas preni ian esprimon, kiu estu sukcesa ŝajnigante logikon. La nekonscia celo povas esti "ni jam finu paroli pri tiu temo akceptante, ke mi pravas, ĉar ne akcepti tion estas stultaĵo". Danke al tio, oni povas kompreni, ke pluraj partoj el babiladoj temas pri interŝanĝo de esprimoj, kiuj izolite diras nenion. Tamen ĉiuj el la finigasertoj kune utilas por la rezulto savi la memestimon de la babilantoj, montrante al alia kaj ĉefe al si mem, iom da ŝajna praveco (pri lingva ĝentileco vd artikolon de Koutny en tiu ĉi libro).

Alia konkreta maniero teni ŜK-on estas la **biaso de la okazo**. Por la celo montri la veron de la ŜK, oni prenas ian okazaĵon, kiu povas esti vero aŭ povas esti la klopodo de alia homo, kiun oni aŭskultis aŭ legis. La okazo estas prezentita kiel nediskutebla pruvo. Ekzemple, por montri ke estas vero ke la ciganoj estas nefindidaj homoj, oni povas aserti "*Estas iu amiko mia, kiu iris al tiu kvartalo kaj tie renkontis ciganon, kiu havis ian problemon. Mia amiko klopodis helpi lin, kaj tiam la cigano ŝtelis lian horloĝon kaj forkuris. Kiel mi diris, tia etno estas danĝera kaj nefidinda*". Oni povas vere sperti la okazaĵon aŭ, pli ofte, rediri ion, kion oni aŭdis ie, eĉ iom troigante la ricevitan informon.

Laste, alia konkretaĵo estas la **biaso de la konfirmo**, kiu iel temas pri afero pli vasta ol la antaŭa. Temas pri atenti pri ĉiu informo, aŭdaĵo aŭ okazaĵo, kiu kongruas kun la ŜK, sed ne akcepti, nei, ne parkerigi aŭ ne mencias la informojn, kiuj estas nekongruaj kun la ŜK. Ekzemple: ĉiam kiam migrantoj aperas en amaskomunikiloj pro ia malbona konduto, oni prenas tiun informon kiel indan realon; sed kiam la sama speco de konduto venas de lokanoj aŭ kiam migrantoj bone kondutas, oni ne uzas, ne mencias aŭ ne fidas.

Jen propono de ekzerco: partoprenu en babiladoj, aŭskultu parolantojn, legu ĵurnalojn, spektu televidon... dum iom da tempo precize rimarkante la ĵus menciitajn kondutojn. Vi tiel komprenos la gravecon de ĉi tiuj manieroj konduti dum la agoj de homa komunikado.

Se vi deziras scii pli pri biasoj kaj la emocia enhavo, kerna koncepto estas la esprimo *motivita rezonado*, kies ĉefa scienca publikigaĵo estas Kunda (1990). Biasaj

pensmanieroj, finigasertoj kaj ĝenerale mallogikaĵoj produktas la kutiman rezulton rezoni pere de emocioj, tiel ke oni restas ĉe la sama opinio, samtempe diskutas, denuncas, mokas aŭ malvalorigas la aliajn.

3.2. Komunikado en sociaj retoj

Pluraj esploroj pri komunikado (vidu pli sube) temas pri tia maniero ŝajne argumenti. Mi mencias du el ili, kiuj lastatempe multe gravas. Ambaŭ temas pri la homa konduto pere de la komunikado en la nomitaj sociaj retoj.

Malamemaj diskursoj

Multe da homoj sentas sin en danĝero, sentas malsekurecon sen ia racia kialo. Ili ne loĝas en milita tereno, en klara danĝero morti aŭ esti vunditaj. Temas pri maniero senti, kiu rilatas al ia lernita psika manko, kiel kutime estas manko de memestimo, memstareco, kapablo aŭ kuraĝo. Tia manko estas lernita dum la infaneco, ĉar la familia etoso kaj proksima homa grupo nerekte instruadis tiel, ke la grupo sinreproduktas pere de la novaj infanoj.

Kiam homoj ne havas ene de si ion bezonatan, serĉas ĝin ekstere. Homoj, kiuj ne estas ene sekuraj, serĉas sekurecon en la sociaj strukturoj, gvidantoj, institucioj, tradicioj ktp. Homoj, kiuj ne havas sufiĉe da memestimo, serĉas en la socia ĉirkaŭaĵo laŭdojn kaj aliajn esprimojn pri sia validi aŭ indeco. Temas pri la plejmulto el la homaro, ne pri escepto. Malalta sento de valoro kaj sento de malsekureco kutime kunas. La rezulto estas klara bezono de ununura norma mondo, tio estas socia ĉirkaŭaĵo, kiu daŭre restos funkcia tute same kiel nun. Ĉar tio praktike ne eblas, tia kutima homo sinsekve sentas minacon kaj bezonas rimarki, ke li aŭ ŝi estas ankaŭ norma homo, normala, parto el granda grupo, kies kvanto donas iom da sento de sekureco kaj valideco.

Gravas rimarki, ke tia homo neniam sentos sin respondeca pri pluraj okazaĵoj. La nekonscia argumento estas ĉi tiu: „*ĉar mia mondo devas resti sama kaj mi kongrue kondutas laŭ tia devigo, se io malbone okazas, mi neniel povas esti parto el la kialo; do se io malbone okazas, tio estas pro la malbona konduto de iu kulpulo, kiu logike ne estas membro de la norma grupo*”. Rezulte, ĉia homo, kiu ne estas membro de la norma grupo, reprezentas klaran minacon, ĉar li aŭ ŝi alportas la semon de damaĝo al la ununura norma akceptebla mondo.

Tia maniero kutime senti kaj interpreti venas kun pakaĵo de lingvaj esprimoj. Do la komunikado de tiu grupo plenas je ŜK-j, finigasertoj kaj vasta frazeologio, kies referenco estas la normo.

Danke al sociaj retoj, tiuj homoj kuniĝas sekvante, ripetante, dissendante kaj protektante konkretan opinion, kiu montras malamon al iu el nenormitaj grupoj. Tiel publike aperas konkreta *diskurso de malamo*. Psikologie, sociologie, eduke, lingvistike, antropologie, politike... oni studas, kiel tiuj grupoj stariĝas, kreskas kaj fine atingas realajn konsekvencojn en la socio. Kutime la diskursoj de malamo temas pri rifuzo

de migrantoj, samseksemuloj aŭ politikaj opcioj sufiĉe malproksimaj al la komuna sinteno en la grupo. La diskursoj de malamo estas klarega ekzemplo de mallogiko. Tie oni abunde kunhavigas malverajn aŭ biasajn statistikojn, trompojn, neokazaĵojn, ŝajnajn argumentojn (sen ena logiko) kaj finigasertojn. Oni ne serĉas la veron, sed ion ajn, kion akceptos la norma grupo kiel argumenton aŭ pruvon pri la nediskutebla fakto, ke la grupo pravos.

Laŭ nuntempaj esploroj, la diskursoj pri malamo kreskas kaj atingas pli altan procenton de la ĉiutaga komunikado. Ekzemple, Calderón, Blanco-Herrero kaj Valdez (2020) analizas la diskurson de malamo al fremdulo pere de Twitter en Hispanujo; aŭ Tank kaj Esteves (2020) studas la popol-flatadon far la brazila politiko pere de la elektronikaj komunikadoj.

Malveraj novaĵoj

Malvera novaĵo baziĝas sur neveraj okazaĵoj, troigitaj informoj aŭ manipolitaj novaĵoj celante influi la publikan opinion aŭ krei kaj konservi politikajn kredojn. La sciencaj esploroj montras, ke la malveraj novaĵoj ekzistas delonge, tamen sociaj retoj kaj la rapideco de la amaskomunikiloj gravigis ilian rolon en la nuntempa socio.

Ili havas kernan rolon fortigi konkretajn pensmanierojn rilate al sociaj aferoj, homaj grupoj aŭ klarigoj pri la funkciado de la mondo. Temas pri kreskema nuntempa emo en sociaj retoj, kiu pli kaj pli maltrankviligas multajn instituciojn, kiuj rimarkas la grandan influon, kiun ili havas rilate ekzemple al la sano, la socia etoso aŭ la voĉdonoj.

Estas pluraj teorioj, kiuj klopodas klarigi, kiel la malveraj novaĵoj estas nuntempe tiom oftaj kaj sukcesaj pere de la homa komunikado. La ĉefa bazo jam estas klarigita pli supre: nia rezonado estas ĉefe emocia; ĝi laboras por la fortigo de la scioj, kiujn ni akceptis plejmulte dum la infaneco kaj juneco, kaj por la elteno de nia sekureco pri kiel funkcias la mondo. Al tiu ĝenerala kialo, oni aldonu aliajn pli konkretajn. Kutime temas pri samtempa funkciado de pluraj kondutoj. Unu el ili estas la emo ne tro elspezi energion en medio, kie estas granda kvanto da informeroj. Kutime la retpaĝoj prezentas grandan kvantojn da informeroj per la formo de bildoj, videoj, fenestroj kiuj malfermiĝas, okulfrapaj koloroj ktp. Menso serĉas ne tro koncentriĝi kaj surface preni ion el la tuto. Alia konduto rilatas al la rapida sento de kongruenco: se la novaĵo kongruas kun la onia pensmaniero, oni senatente akceptos ĝin. Tria kutima klarigo temas pri biasa menskonduto. Estas granda aro da biasoj, kiuj ludas ian rolon en la afero. Ekzemple: se la novaĵo havas kutiman ŝajnon de novaĵo (montras statistikon, estas subskribita de iu, enhavas konkretajn numerojn ktp), oni rapide akceptas ĝin kiel novaĵon. Kaj laste, gravas senti, ke la novaĵo estas akceptita de la referenca grupo aŭ de multaj homoj. Se kelkaj detaloj faciligas senti, ke jam ĉiuj aŭ multaj scias tion, do oni emas ankaŭ akcepti ĝian verecon. Pri tia forto de la socia pensmaniero temas la sekvanta sekcio.

La konsilo, se vi deziras scii pli, estas serĉi interrete laŭ via lingvo. Certe vi trovos kelkajn dokumentojn, kiuj pli fone pritraktas ĉi tiun temon. Hispane troviĝas bona propono: la mallonga artikolo de Sanz kaj Carro de Francisco (2019).

3.3. Grupa pensmaniero: amaskomunikiloj

Vi eble plurfoje trovis la esprimon "la homo estas socia besto". Ne nur komunikado estas sociaĵo, ĝi realiĝas pere de emocioj kaj emociaj argumentadoj, kiuj ekzistas pro la socia influo. Estas ĵus menciita, en la antaŭa sekcio, ke unu el la kialoj pro kiuj homoj akceptas malveran novaĵon, estas ke ĝi jam estas akceptita de pluraj aliaj homoj. Ekde la fama eksperimento de Asch (1956), kie la partoprenantoj emis kalkuli la longecon de linioj laŭ la kunhavitaj respondoj de la aliaj ĉeestantoj, en psikologio estas multe da esploroj, kiuj montras, ke eĉ la rezulto de la percepto dependas de la perceptoj de la aliaj. En marketiko, unu el la plej fortaj sukcesiloj estas aldoni ian informon aŭ aserton, laŭ kiu la plejmulto jam aĉetis la varon. En voĉdonado, la politikaj partioj klopodas montri, ke ili atingos la favoron de granda kvanto da voĉdonantoj. Por ni, la homoj, la maniero pensi, senti, opinii aŭ agi kiel aliaj samsocioj, gravas.

Laŭlibre la amaskomunikilo estas medio, pere de kiu homoj atingas informon pri la nuntempo. Ili agas kiel perantoj inter realo kaj scivolemaj homoj. Laŭ la praktika ĉiutageco la amaskomunikiloj estas ne tiom simplaj. Ili estas entreprenoj, kiuj devas montri bonajn rezultojn je la fino de la jaro, kiuj serĉas enkasigon pere de klientoj (ĉu spektantoj, ĉu reklamantoj, ĉu akciuloj) kaj kiuj produktas novaĵojn laŭ konkreta ideologio. Tia malsimpleco kunlaboras kun la emociaj emoj de la spektantoj. Rezulte, oni povas rimarki plurajn fenomenojn rilate al la maniero komuniki inter la amaskomunikiloj kaj la homoj, kiuj spektas ilin. Malgraŭ la abundo de fenomenoj, jen selekto de nur kvar el ili, kiuj montras la gravecon de tiu prikomunika tavolo. Aldonita estapo unu publikigaĵo, kiun vi eble povas tralegi por la celo pli bone kompreni la fenomenon.

1. La *biaso de la amaskomunikilo* (Knight, 2006) respondas kaj al la ideologio de la posedantoj de la media entrepreno kaj al la ideologio de la tavolo el la publiko, kiun la komunikilo celas kontakti kaj fideligi. Al tio oni aldonu la ideologian aliron de la reklamistoj, kiuj pli kaj pli gravas por kompreni la enhavon de ĉiu amaskomunikilo, ĉar ili mone ebligas ĝian ekziston. Rezulte, oni rajtas aserti „*diru al mi kiun amaskomunikilon vi spektas kaj mi diros al vi per kiu ideologio vi interpretas la mondon*”. Ni memoru la enhavon de la unua sekcio: homoj ne serĉas informon survoje atingi puran konkludon; homoj serĉas argumentojn, pere de kiuj ili povas daŭre resti en la sama ŜK.
2. La *spiralo de la silento* (Mutz, 1989). La kreado de opinioj kelkfoje sekvas la modelon de fabrika produktado: oni planas la opinion kaj uzas mediojn realigi kaj sukcesigi ĝin. Sed plurfoje videblaj eĉ elstaraj opinioj aperas per procezoj malpli unudirektaj. La spiralo de la silento estas bona ekzemplo pri tio. Imagu ke ekzistas du opinioj pri la sama temo iam kaj ie. Sen tro da graveco pri la kvanto da homoj, kiuj tenas la opinion O1, tra la amaskomunikilo la publiko ekscias unue pri la opinio O2. Tiel, la subtenantoj de O1 eksentas sin mem minoritato kaj pro tio ili emas ne videbligi sian opinion. Dume la subtenantoj de O2 kuraĝas sinesprimi. Fine la videbleco ĉefe estas por O2, kiu allogas individuojn sen dekomenca opinio. Do la

emo ne komuniki la propran vidpunkton, kiam oni konkludas (eble neĝuste), ke la ĝenerala opinio estas alia, nutras la sekvajn nekomunikadojn.

3. La *agenda agordo* (McCombs kaj Shaw, 1993) temas pri la forta influo sur la menso de la publiko rilate al la vicordigo de la okazaĵoj kaj komunaj temoj laŭ ilia graveco. Simple priskribita: Ju pli ofta estas novaĵo en amaskomunikiloj des pli grava estas taksita por la publiko. Mi mem, kun alia kolego (Hassan Fazeli Khalili) dum unujara kurso pri statistiko en psikologio esploris la homan konduton, nome kiel la timo de la popolo pri la krimuleco altiĝis kaj malaltiĝis dum unu jaro. Ni rimarkis, ke la timo pri krimuleco ne dependis de la kvanto da krimoj, laŭ oficiala statistiko, sed de la ofteco pri apero de krimoj en televido.
4. La *fenestro al la mondo* estas la esprimo elektita por klarigi, kiel la publiko gravigas la informon, kiu aperas en amaskomunikiloj, ĉefe en televido. La televido — kaj lastatempe ankaŭ sociaj retoj — reprezentas fenestron, kies malfermiĝo ebligas al la malfermanto malkovri kaj scii pri la mondo. Tia rolo estas tiom forta, ke la datumoj montras, ke la publiko ofte pli fidus tiun fenestron ol siajn rektajn ĉiutagajn spertojn (Lamuedra, 2012).

Se ni lasas tiujn fenomenojn kunagi, la rezulto bone klarigas pri la homa emo pli gravigi la diskursojn ol la realon (Manzano-Arrondo, 2017). Alivorte: la enhavo de la komunikoj konstruas bildon pri la realo, kiu estas pli potenĉava ol la realo mem. En la sekvanta sekcio ni pli utiligos tian aserton pri la graveco de komunikenhavo.

4. Psika komunikado pri Esperanto

4.1. Esperanto ne ekzistas

Claude Piron estis belga/svisa esperantisto, psikologo kaj tradukisto, kiu ne nur amasigis spertojn pri la reagoj de neesperantistoj rilate al la ekzisto de Esperanto, sed ankaŭ pripensis kaj skribis pri tio. Same kiel multaj aliaj esperantistoj, Piron ofte spertis, ke homoj, kiuj ne scias ion konkretan pri Esperanto, reagas kvazaŭ ili fikus pri la temo, asertante neveraĵojn kiel ĉi tiujn (Piron, 1988: 123): „*neniu iam ajn verkis romanon rekte en Esperanto*”, „*Esperanto estas lingvo, kiun neniu parolas*”, „*ne ekzistas infanoj, kies gepatra lingvo ĝi estas*”, ktp.

Piron, same kiel multaj esperantistoj, estis ĉiam ŝokita pro tiuj asertoj, kiujn li spertis nur rilate al Esperanto. En la sama teksto, li mem skribis:

Se, por disponi komparan, referencan reagon, la esploranto proponas al sia kunparolanto sammaniere esprimi sin pri la bulgara aŭ la indonezia, li ricevas tute alian respondon. Unuminute la demandito klarigas per perfekte neŭtrala tono ĉion, kion li povas pri tiuj eldiri, nome, ĝenerale, ke koncerne ilin li scias nenion (p.122).

Piron priskribas la aferon ĉi tiel: la asertoj povas temi pri faktoj aŭ pri sugestoj. Demanditoj taksas la indonezian fakta, dum Esperanto estas sugesto. Faktojn, homoj akceptas. Pri sugestoj, homoj opinias. Sed demandito scias nenion pri Esperanto; do kion opinii? Malgraŭ Piron ne asertas la jenan respondon, aldonindas, ke la plej facila reago de homo kiu scias nenion pri la temo, sed sentas emon opinii, estas opinii tiel, ke li aŭ ŝi sinprezentu kohera: mi scias nenion pri tio, ĉar tio estas malindaĵo: ĝi ne ekzistas; se ĝi ekzistus, estus negrava; se ĝi estus grava, temus pri bagatelaĵo.

La svisa psikologo priskribas reagojn, kiuj temas pri neado (Esperanto ne ekzistas), projekcioj (de la propra fantazio kaj timoj) kaj raciecigo (per kiu la parolanto klopodas ŝajni lerta). Kial tio okazas? Piron respondas per kelkaj ebloj:

1. *Minaco*. Se Esperanto estas pli ol nenio, oni povas senti minacon, ĉar universala lingvo povas influi la situacion, kiun oni spertas ekde la infaneco. Pli supre estas klarigita, ke la plejmulto el la homoj sentas sin malsekuraj, malgraŭ la fakto ke ili klopodas montri la malon al si mem kaj al la aliaj. La malsekureco postulas stabilecon en la cirkaŭaĵo. Nova lingvo, kiu sinprezantas kiel universala, estas minaco al la lingva sekureco.
2. *Sankteco*. La lingvon oni povas senti kiel sanktan estaĵon. Inveni lingvon estas moko, neserioza konduto, kiu meritas esti neata.
3. *Diversaj timoj*. Timema (tio estas kutima) homo ne ŝatas riski pri gravaj aferoj. Agnoski la realon kaj valoron de Esperanto estas risko pri pluraj flankoj: opinii ne same kiel la plejmulto; havi tro rektan horizontalan kontakton kun la aliaj uloj; okupiĝi pri lingvo tiom facila, ke oni povas ŝajni infaneca, nekapabla aŭ allogita nur de simplaj defioj; paroli tiom klare, ke mankas al oni rimedoj maltravidebliĝi; aŭ nekonscie detruiri la propran kulturon kaj altnivelan lingvon pere de invento, kiu ŝajnas malaperigi ĉiujn personecojn pere de homogena identeco.

Ĉiukaze, Piron substrekas la kernon de la pensmaniero perata de la komunikado: ĝi estas ĉefe emocia. Vi povas konkludi, ke la tuta enhavo de ĉi tiu ĉapitro reliefigas la samon. Kaj vi pravas. Tamen, malgraŭ ĉi tia klopodo, estas atendinda, ke multaj legantoj, samtempe facile akceptas la ĉefrolecon de la emocioj en la komunikado, daŭre emos uzi argumentojn kaj raciajn ilojn survoje konvinki aliajn pri la taŭgeco de Esperanto.

4.2. Emocia komunikado pri Esperanto

Mi estas aktivulo delonge. Nur post jardekoj de socia luktado en pluraj movadoj, mi decidis lerni Esperanton. Antaŭ tia decido mi daŭre partoprenis en kunvenoj kun aliaj aktivuloj pere de, laŭ mi, grava centra aserto: *esti prava utilas preskaŭ por nenio*. Lasu min iom klarigi pri tia sperto.

En movado de sciencistoj kontraŭ la klimata ŝanĝiĝo en la komenco de ĉi tiu jarcento, mi daŭre spertis la saman sintenon: „Ni scias la veron. Ni sinsekve esploras, kolektas datumojn, analizas ilin ekde diversaj pluraj vidpunktoj, metodoj kaj disciplinoj; kaj la rezulto ĉiam samas. Ni sendube pravas. Ni havas argumentojn, aliron al la statistikoj kaj al la datumbankoj de la mondo. Pere de science fundamentitaj argumentoj, ni asertas laŭte, klare kaj senlace, ke ni iras al la detruo de la medio. Kial homoj ne aŭskultas nin? Kial post tiom da klopodoj, esploroj, anoncoj, denuncoj, avertoj... la homaro daŭre altigas la detruemon?” En la jaro 2006, mi havis la oportunon prelegi al la grupo en oficiala kunveno. La titolo klopodis esti mensfrapa: „Ni nur pravas. Do ni havas neniun forton”

Mi same spertadis en diversaj movadoj. Nur en kelkaj grupoj pri defendo de la virinaj rajtoj, mi renkontis sintenojn pli malsimplaj, danke al kiuj la aktivuloj pensis pri la emocioj kaj sekvis la plej gravan principon de la sukcesa komunikado: kiam oni konstruas la mesaĝon, oni ĉefe pensu pri la reala reago de la ricevonto. Tiu aserto ŝajnas nebezona. Sed la ĉiutageco montras, ke eĉ en grupo de homoj kun altnivela edukado kaj prestiĝo, la kerno de la komunikado ripozas sur la argumentoj raciaj. Mi okupiĝis pri tio plurfoje, ekzemple en Manzano-Arrondo (2020).

Jen propono de facila ekzerco: elektu iun sukcesan politikan partion; prenu iun ajn tekston el ĝia retpaĝo, kiu temas pri io ajn planita por la ebla legonta popolo; kaj serĉu en ĝi rimedojn, kiujn vi taksas pensitaj por la konvinko de legontoj. Dividu la rimedojn en du grupoj: rilataj al faktoj kaj racio; kaj tiuj aliaj kiuj rilatas al la emocioj. Vi rimarkos, ke la dua grupo certe havas pli da eroj ol la unua; eĉ ofte la unua estas malplena. Faru similan ekzercon kun televida aŭ jutuba reklamo. Faru similan ankaŭ rilate al aro da mesaĝoj en Twitter aŭ alia socia reto, kie vi partoprenas en babiladoj. Se vi havus eblon etike fari la jenan taskon, sonregistru spontanee babiladon inter homoj. Kaj poste aŭskultu la sonregistraĵon farante la saman taskon. Ĉiam vi atingos similan rezulton. Do, se la sukcesaj komunikadoj baziĝas sur emocioj, kial la esperantistoj emas konviki aliajn aŭ defendi sian lingvon pere de raciaj argumentoj?

La maniero kiel sukcesas la angla lingvo estas bona ekzemplo, tamen kun maletikaj flankoj. Do, ĝi utilas ne por esti imitita (se ni deziras esti etikaj homoj), sed ja por rimarki la ekziston de sukcesa komunikado. La eroj de tiu diskurso konsistas el sekvaj (Manzano-Arrondo, 2017):

1. Lerne la anglan aŭ malaperu.
2. Vi estas la nura homo, kiu ankoraŭ ne posedas tiun lingvon.
3. Uzu viajn personajn rimedojn por solvi tion.
4. Ne suferu: la angla malfermos por vi nekredablajn pordojn.
5. Kiu etika problemo? La afero estas neŭtrala!

Ĉiuj el ili estas mensogoj. Neniu el ili estas apogitaj de datumoj, ne havas realan fundamenton. Oni ne bezonas esti sciencisto por facile atingi la konkludon, ke temas pri malvera diskurso. Ekzemple: se la angla estas ĉie kaj estas vero, ke ne gravas kien

vi iras, tie vi povos paroli angle kun la loĝantoj... kial ĉie sukcesas la reklamoj pri kursoj, kiuj male al la ceteraj sukcese atingos ke vi finfine lernos la anglan? Ambaŭ realoj ne povas ekzisti en la sama mondo. Mi ne okupiĝos pri la monro de la mensogoj en la diskurso. Tio ne estas la celo de ĉi tiu teksto. Gravus rimarki, ke ĉiuj eroj el la kvinopa konvinkilo altnivele trafas la emocian menson. Rimarku la forton de la malpozitivaj eroj: neniu deziras senti sin izola aŭ ekskludita; la plej malbona sento estas konkludi, ke ĉiuj atingis ion krom oni. Rimarku la forton de la pozitivaj eroj: tiu lingvo alportos vin al nekredibla sukcesa vivo.

La trafeco de la diskurso ripozas ne nur sur mensogoj, sed ankaŭ sur longa vojo de eraroj kaj sukcesoj pri komunikado. Fine, ĝi montriĝas elstare, reproduktita de amaskomunikiloj, surstrataj paroladoj, sociaj retoj, libroj eĉ sciencaj artikoloj. Tia ĉieco havas sian propran forton, kiel ni jam menciis pri supre.

Do kia estu la etika sukcesa emocia komunikado pri Esperanto?

Tia celo situas en la plej malfacila angulo. Esperantujo ne videbliĝas en amaskomunikilo, nek havas la apogon de la Ŝtato, kiu ĝin elektus kiel oficialan, do ĝi ankaŭ ne estas devige instruata en la eduksistemo, nek havas armeon... Esperantujo ne invadis aliajn landojn lingve subpremante loĝantojn. Konklude, la forto de Esperanto ne situas en la samaj kialoj, kiuj sukcesigis la nuntempe plej disvastigitajn lingvojn en la mondo.

Ekde tiu malfacila, pli malaltnivela pozicio esperantistoj klopodas eĉ pli mallerte konvinki, enmetante la forton de la diskurso en la raciajn kialojn, ĉefe ke Esperanto estas facila lingvo.

Sendube la forto devas esti en la emocia flanko. Nur ĝi povas iel sukcesigi la disvastigon de la diskurso. Sed kiuj emocioj? Bedaŭrinde mi ne scias. Pro tio mi substrekas la duan kolumnon: la esploron.

Esperantujo havas parolantojn en ĉiuj landoj, kutime en komfortaj sociaj situacioj. Esperantistoj kutime estas emociaj defendantoj de la lingvo, kiuj sentas allogon de la esperantaĵoj. Malfacile oni povas trovi en la mondo lingvon tiom taŭga por realigi esplorojn, komparante rezultojn, kiuj alvenas de malsamaj lokoj kaj bone realigitaj per malmultekostaj rimedoj bazitaj sur la volonteco. Do konstrui sukcesan diskurson, kiu siavice kaj male al la kutimo estu etika, nur okazos danke al la kunlaboremo ĉirkaŭ planitaj esploroj.

En mia universitato mi provis kelkajn reklamojn. Tiu, kiu donis pli altan sukceson, baziĝis sur la teksto: „Esperanto, la lingvo de la homoj, kiuj ankoraŭ sentas sin liberaj”. Rimarku, ke la mesaĝo estas emocia, ĝi trafas la pozitivan valoron de la libereco en mia grupo. Kiam mi mencias Esperanton en sociaj retoj, kies membroj estas universitatoj, la partoprenoj pli sukcesaj ĉiam havas la saman eron: substrekas la malekvilibron en la scienca konkurado publikigi. Rimarku, ke la mesaĝo estas emocia: homoj ne ŝatas senti sin maljuste traktitaj; la konkurado devas esti justa. Kiam instruistoj de baza lernejo scivolemas pri Esperanto, okazas ĉar ili aŭdas la babiladon inter mia filino 8-jaraĝa kaj mi. Ili admiras mian filinon. Pere de tiu admiro, venas la emo scii pli pri tiu nekonata lingvo. Kiam kolegoj pri filologio ekhavis deziron scii pri Esperanto, okazis ĉar ili partoprenis en oficiala universitata agado, kiu temis pri

lingvoj en Afriko. Ili estis allogitaj de la afrikaj lingvoj. Pro tio ili venis. Kaj alveninte, ili trovis ke la lingvo uzata por la komunikado kun ses afrikaj landoj estis Esperanto. Mi ne reklamis pri la lingvo. Estis emocia frapo. Lingvo inda ne elspezas energion sinvendante. Kolegoj spertis la naturecon de la komunikado, sen esti avertitaj.

Tiuj estas kelkaj konkretaĵoj, kiuj funkciis en mia cirkaŭaĵo. Tio ne garantias, ke ili funkcios en la via, nek ke ili estas la plej sukcesaj. Surtute mankas esplorado. Ni bezonas kolekti eblojn pri diskursoj bazitaj sur emociaj eroj, kaj plani kaj realigi esplorojn, kiuj taksu la utilecon de tiuj eroj en diversaj situacioj.

Bibliografio

- Asch, Solomon E. 1956: Studies of independence and conformity: A minority of one against a unanimous majority. En: *Psychological Monographs: General and Applied*, 70/9: 1.
- Calderón, Carlos & Blanco-Herrero, David & Valdez, María Belén 2020: Rechazo y discurso de odio en Twitter: análisis de contenido de los tuits sobre migrantes y refugiados en español. En: *REIS*, 172: 21–40.
- Estrada, Luis Jaime 2021: Lo indecible del discurso: emoción, afecto y deseo. En: *Revista Mexicana de Comunicación*, 148: 1–8.
- Knight, Kathleen 2006: *Transformations of the concept of ideology in the twentieth century*. En: *American Political Science Review* 100/4: 619–626.
- Kunda, Ziva 1990: The Case for Motivated Reasoning. En: *Psychological Bulletin*, 108/3: 480–498.
- Lamuedra, Maria 2012: Percepción de la realidad mediática y deontología periodística: hacia un periodismo participativo acorde con una Democracia Deliberativa. En: *Observatorio Journal* 6/1: 183–209.
- Manzano-Arrondo, Vicente 2017: Emociaj kialoj por uzi Esperanton. En: *Tra la mondo*, 3: 64.
- 2017: Lingva subpremanta diskurso kaj nuntempa universitato. En: *Język. Komunikacja. Informacja* 'Language Communication Information' 12: 121–135.
- 2020: *Sinalligo al modelo*. Jutuba video <https://www.youtube.com/watch?v=FI4WjDRsDs>
- McCombs, Maxwell E. & Shaw, Donald L. 1993: The Evolution of Agenda-Setting Research: Twenty-Five Years in the Marketplace of Ideas. En: *Journal of Communication* 43/2: 58–67.
- Mutz, Diana C. 1989: The influence of perceptions of media influence: third person effects and the public expression of opinions. En: *International Journal of Public Opinion Research* 1/1: 3–23.
- Piron, Claude. 1988: Psikologiaj reagoj al Esperanto. En: *Eseoj kaj paroladoj de Claude Piron*, <http://www.elperno.cn/elibro/CLAUDE%20PIRON.pdf>: 123–133.
- Sanz, Rubén & Carro de Francisco, Cristina 2019: Susceptibilidad cognitiva a las falsas informaciones. En: *Historia y comunicación social*, 24/2: 521–531.
- Tank, Karem & Esteves, Rodrigo 2020: Discurso de ódio em mídias sociais como estratégia de persuasão popular. En: *Trabalhos em Linguística Aplicada*, 59/2: 1216–1238.

Demandoj kaj diskuttemoj

Vi jam trovis en la antaŭaj alineoj plurajn demandojn kaj proponojn por pripensado kaj diskuto; kelkaj el ili laŭliteraj, kelkaj nerektaj:

- 1) Analizu konkretajn diskursojn, tekstojn aŭ lingvajn produktadojn, kies celo estas konviki, kaj trovu en ili emociajn kaj raciajn argumentojn.
- 2) Demandu vin mem kial vi lernis Esperanton kaj rimarku, kiel via elkora respondo temas pri emocioj aŭ racioj.
- 3) En la sekvanta ebleco sperti spontanegan komunikadon inter homoj, klopodu esti konscia pri la rolo de la komunikadrimedoj. Kiujn rimedojn vi trovas? Kiu estas iliaj roloj? Kial, vi pensas, ke la partoprenintoj uzas ilin? Je kiu nivelo la komunikado havis celojn? Ĉu la celoj, kiujn vi trovas, estis vere ĉeestaj aŭ vi *bezonas* senti, ke partoprenantoj havis celojn? Kiel vi povas klarigi pri la reagoj de la komunikantoj?
- 4) Kiam vi kuŝos hodiaŭ, antaŭ ol endormiĝi faru la sekvan ekzercon: elektu momentojn, kiam vi estis aktiva en komunikado; kaj analizu vian partoprenon. Ĉu vi komprenas viajn agojn kaj reagojn? Ĉu vi povas priskribi ilin laŭ la enhavo de ĉi tiu ĉapitro?

Vicente MANZANO-ARRONDO, kromnome Viko, estas doktoro pri psikologio, edukado kaj ekonomiko, kaj diplomito de la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj de AMU. Li instruas kiel esplori la homan konduton en la fakultato pri psikologio en la Universitato de Seviljo, Hispanujo. Lia fako estas la lingva subpremado kaj la disvastigo de la kapablo science esplori.

Lingvo kaj ekonomiko

Mi vidas en ĉiu homo nur homon, kaj mi taksas ĉiun homon nur laŭ lia persona valoro kaj agoj. Ĉian ofendadon aŭ premadon de homo pro tio, ke li apartenas al alia gento, alia lingvo, alia religio aŭ alia socia klaso ol mi, mi rigardas kiel barbarecon. L.L. ZAMENHOF (1913)

Resumo

En tiu ĉi ĉapitro ni montras, kiel simplaj normalaj ekonomikaj analiziloj, kiel postulo kaj oferto aŭ kosto-utilo-analizo kaj kosto-efiko-analizo uzeblas por ekspliki multajn socilingvistikajn fenomenojn. Uzante la bazan modelon de oferto kaj postulo ni diskutas la distribuon de lingvoj en la mondo, la tutmondiĝon kaj lingvomorton, la lingvon kiel homan kaj socian kapitalon kaj ĝian influon sur migrado, internacia komerco kaj la labormerkato. Kosto-ulilo- kaj kosto-efiko-analizo strukturigas nian analizon de lingvo- politiko en teorio kaj praktiko. Fine ni analizas la distribuajn efektojn de lingvopolitiko.

1. Enkonduko

Ekonomika analizo eliras de individua konduto kaj temas pri individuaj preferoj kaj decidoj. Kolektivo nur gravas kiel aro da individuoj, kaj kolektivaj interesoj estas kunmeto de individuaj preferoj. Homoj faras elektojn inter alternativoj. Samtempe oni alfrontas limojn; se oni iun vesperon kaj volas iri en la operejon kaj manĝi en bona restoracio, sed ne havas la tempon (aŭ monon) por ambaŭ, oni devas elekti inter la du. Tiu simpla observo ankaŭ aplikiĝas al multaj kampoj rilate lingvojn. Se vi volas lerni kroman lingvon, vi eble ne havas la tempon ferii kun viaj amikoj, aŭ se la urbestro en via urbo decidas enkonduki stratŝildojn en esperanto, oni ne povas konstrui naĝbasenon en la urba parko. Oni povas diri, ke la kostoj de iu projekto estas la ne-realigo de alia projekto. La ekonomikistoj parolas pri «alternativaj» kostoj aŭ ŝancokostoj.

Tio aplikiĝas kaj al normalaj individuoj kaj al la decidofarantoj de la publika sektoro. Ili ankaŭ devas konsideri alternativojn; oni ne povas realigi ĉiujn bonaĵojn, se la buĝeto estas limigita. Oni ofte devas elekti, ĉu inter malsamaj kampoj de aktivado, ekzemple inter dulingvaj stratŝildoj kaj malsanulejaj litoj aŭ inter eduka sistemo en minoritata lingvo kaj F16-avidilo, ĉu inter aktivadoj sur la sama kampo, ekzemple inter dulingvaj stratŝildoj kaj dulingvaj oficialaj publikigaĵoj.

Ni do troviĝas en duflanka situacio. Je la unua flanko de la dilemo ni deziras havi ion aŭ atingi celon; je la alia flanko ni frontas kostojn. La interago inter tiuj du flankoj povas rezulti en ekvilibro, kiam vi havas tiom multe da la dezirata bono, ke vi taksas kroman kvanton de ĝi malpli alta ol la aldonajn kostojn. Tiujn du flankojn oni povas ilustru per du kurboj, postulo¹ kaj oferto. Pere de la simpla modelo de postulo kaj oferto eblas montri kaj ekspliki aron da interesaj fenomenoj. Ni en tiu ĉi ĉapitro kelkfoje uzos tiun modelon.

Ĝenerale du aspektoj gravas por bona decido: efikeco kaj distribuo. Efikeco signifas ke oni komparu utilon de iu decido kun ĝiaj kostoj kaj trovas, ke la gajno (utilo) superas la kostojn. Distribuo temas pri tio, kiu profitas kaj kiu perdas pro iu decido. Ni ilustru tion pere de simpla ekzemplo. Kunekzistas tri etnoj en urbo kun sume 100 000 enloĝantoj: la plimulto, kiu parolas esperanton, kun 60 % de la enloĝantoj, volapuka malplimulto kun 30% kaj la idistoj kun 10%. La stratŝildoj jam ekzistas en la plimulta lingvo (esperanto). Tamen ili ne ekzistas en la du aliaj. La kostoj de la aldonado en alia lingvo estu la samaj sendepende da la lingvo, ni diru unu miliono da eŭroj. La valoron de stratŝildoj en sia lingvo nur povas taksu la parolanto. Diru, ke la averaĝa homo taksas tion valoron al 50 eŭroj. La volapukistoj do kune taksas la valoron de volapukaj stratŝildoj je 1 500 000 eŭroj kaj la idistoj kune por idaj stratŝildoj nur pretas pagi 500 000 eŭrojn. Efikeco do postulas, ke oni enkonduku stratŝildojn en volapuko, sed ne en ido, ĉar por la volapukistoj la taksita valoro superas la kostojn, sed por la idistoj la taksita valoro ne sufiĉas. Se la stratŝildoj estas pagitaj per ĝenerala impostado, al kiu ĉiu partoprenas, la impostoj plialtiĝos je po 10 eŭroj persone. Ĉiu plimultano kaj ĉiu idisto havos perdon de 10 eŭroj, kaj ĉiu volapukisto gajnon je la valoro de 40 eŭroj. Do distribue la efika decido ne bonas, ĉar la volapukistoj gajnas kaj la idistoj kaj esperantistoj perdas. Oni tamen povus diri, ke la esperantistoj estas en privilegia situacio, ĉar jam ekzistas stratŝildoj en esperanto, kio por ĉiu de ili valoras 50 eŭrojn, sed la idistoj estas veraj perdantoj. Ni povas plibonigi la situacion distribue metante stratŝildojn ankaŭ en ido. Tio, kiel ni jam vidis, estus neefika solvo, sed kaj la volapukistoj kaj la idistoj estus gajnintaj valoron de 30 eŭroj kaj la esperantistoj perdus 20 eŭroj de sia privilegio, kiu por ili ja valoras 50 eŭrojn. Tiu solvo do estas distribue perfekta, sed ne efika, ĉar la forigo de la idaj stratŝildoj portus gajnon por por la tuta socio je la sumo $1\,000\,000 - 500\,000 = 500\,000$ eŭroj realigitaj kiel gajno de 10 eŭroj por ĉiu esperantisto kaj volapukisto (sume 900 000 eŭroj) kaj perdo de 40 eŭroj por ĉiu idisto (sume 400 000 eŭroj).

Nia eta ekzemplo temas pri la situacio de registaro, kiu devas elekti inter distribua egaleco kaj efikeco. Parolante pri lingvopolitiko ni revenos al tiu dilemo kun simi-

¹ Gravus koni la diferencon inter bezono kaj postulo. Bezono estas kion vi devas havi por travivi; do, kelkajn manĝaĵojn, protekton kontraŭ la vetero vintre ktp. Postulo estas kion vi deziras kaj povas konsumi se viaj rimedoj sufiĉas. Ekzemple, se vi havas sufiĉe da mono aŭ por luksa loĝejo aŭ por luksa aŭto kaj laŭ viaj preferoj vi elektas unu de ili, tio estas via postulo. Oni povus diri, ke bezono estas absoluta kaj objektiva; kontraŭe postulo relativa kaj subjektiva, depende de viaj preferoj kaj riĉeco.

laĵ ekzemploj. Tamen la neceso pesi unu flankon de decido kontraŭ alia flanko ni trovas ankaŭ aliloke. En tiu ĉi ĉapitro ni preparolos aron da situacioj rilate lingvon aŭ lingvouzon, kie individuaj kaj sociaj fenomenoj fontas en tiuspecaj decidoj. Ni komencos per la individuo. Poste ni analizos lingvopolitikon kaj fine ni rigardos kelkajn distribuajn problemojn.

Parto I. Priskriba (pozitiva) analizo de individua konduto

En tiu ĉi parto ni klopodos analizi la sekvojn de individuaj decidoj. Ni koncentriĝos sur du ĉefaj temoj: la longdaŭra uzo aŭ ne-uzo de lingvoj kio rezultas pro libervolaj individuaj decidoj kaj pro la sekvoj de sociaj interrilatoj de homoj kun malsimilaj lingvaj repertuaroj.

2. Lingvouzo kaj individua konduto

Komence ni analizos individuajn decidojn rilate lingvouzon. La baza ideo estas, ke individuoj farante elektojn elektas la por ili mem plej bonan vojon. Ke tio ne necese estas la plej bona elekto por la kolektivo, estas alia afero, kiun ni ankaŭ preparolos. Ni unue traktos la sekvojn por lingvouzo kaj la konekzisto de pluraj lingvoj kaj kiel tio dependas de la normala libervola konduto de la individuoj. Ni metos la fokuson sur du funkciojn de lingvo: komunikilo kaj peranto de identeco kaj kulturo.

2.1. Lingvo kiel komunikilo

Unue ni traktos la komunikan valoron de lingvo kaj analizos kion tiu signifas por individua kaj socia lingvouzo. Ni montras, ke oni povas ekspliki la ĝeneralan malsimilan distribuon de lingvoj en la diversaj mondopartoj. Ni ankaŭ povas ekspliki tendencon al socia unulingveco en multaj partoj de la mondo.

2.1.1. Spaca distribuo de lingvoj en la mondo


La komunika valoro de lingvo dependas de tio kun kiom da aliaj homoj vi povas komuniki en la lingvo sed kompreneble ankaŭ la tipo de homoj gravas. Do, oni povus konkludi, ke ju pli granda la nombro da parolantoj des pli granda la utilo de la lingvo. Tamen vi devas kontakti la parolantojn por komuniki kun ili, kaj ju pli foraj ili estas des pli malfacile estas trovi ilin; oni povas diri des pli grandaj estas la kostoj de la interparolado. Por individuo indas esti en komunumo kiu estas tiom granda ke

la valoro de la komunikado kun la plej fora individuo superas la kostojn trovi tiun personon. Nu, verŝajne la valoro de plia interkomunikanto iom malkreskas, se la nombro de interparolantoj jam estas sufiĉe granda; do, la aldona valoro aspektas iel kiel en diagramo 2.1a. La nombro da interparolantoj estas n kaj la valoro de plia interparolanto estas p en la diagramo.

Samtempe, ni havas la kostojn por atingi la plej foran interparolanton. Se por ĉiu nova homo oni devas vojaĝi aŭ serĉii iom pli, la kostoj por trovi kroman homon por interparoli iom kreskos. Tiuj kostoj do aspektas kiel en diagramo 2.1b. La nombro da interparolantoj estas denove n kaj la kromaj kostoj pro la aldonado de nova interparolanto estas k .

Ni kombinis la du diagramojn en ilustraĵo 2.2. Se la nombro da homoj malsuperas n^* , la valoro de nova interparolanto superas la kostojn kontakti ŝin aŭ lin. Se la nombro da parolantoj de la lingvo superas n^* , kostas tro kontakti la plej forajn individuojn, kio do ne okazas. Ni povas diri, ke n^* estas la optimuma grandeco de la lingvokomunumo. Tipa homo ne bezonas pli grandan komunumon. Se en ĉiu komunumo la lingvo evoluas sendepende de aliaj komunumoj, ni fine havos aron da lingvokomunumoj en la proksimuma grandeco n^* . Se la tuta enloĝantaro de la mondo estas N kaj la komunumoj averaĝe grandas je n^* , entute en la mondo ekzistos N/n^* lingvokomunumoj kaj lingvoj.


Interesa demando estas de kio dependas tiuj kurboj krom de la grandeco de la interparolantaro. La valoro de interparolado de aliaj homoj kreskas, se la socio kompleksiga. En socio konsistanta el kolektantoj kaj ĉasistoj, oni bezonas malpli da homoj por interrilato ol en kompleksa moderna industria socio. Do, pro moderniĝo la kurbo de utilo moviĝas supren kaj la optimuma grandeco dekstren al pli alta valoro. Vidu ilustraĵon 2.3a.




Ilustraĵo 2.1. Postulo kaj oferto de interparolantoj

Simile estas se la komunikaj kostoj malpliĝas, ekzemple pro la invento de la interreto. La kostokurbo malplialtiĝas kaj la optimuma grandeco de lingva komunumo fariĝas pli granda. Ni montras tion en ilustraĵo 2.3b. La esperantistaro loĝas dise en la tuta mondo. Por la averaĝa esperantisto la invento de la interreto malplialtigis la komunikajn kostojn multe pli ol por la averaĝa parolanto de la hungara ekzemple. Oni do devas atendi, ke la enkonduko de la reto sekvigas pli grandan viglecon de esperanto en la mondo kaj pro tio kreskon en la nombro de uzantoj.

Rigardante la densecon de lingvoj en la tuta mondo, oni trovas, ke tiu estas la plej granda en neindustriaj landoj. La denseco en Eŭropo, Aŭstralio kaj Nordameriko estas la plej malgranda kaj la plej grandan ni trovas en Papua Nova Gvineo kaj Vanuatio, sed ankaŭ en subsahara Afriko, Sudazio kaj aliaj tropikaj lokoj ni trovas altan densecon da lingvoj. Tiuj faktoj bone kongruas kun la modelo; la landoj kun alta denseco ĝis antaŭ 100 jaroj estis agrokulturaj landoj aŭ kolektado kaj ĉasado estis gravaj por la ekonomio de la socioj. La modelo do povas – almenaŭ parte – ekspliki la mortadon de multaj lingvoj pro la tutmondiĝo. Ni substrekas, ke tiu konkludo neniel dependas de deziroj aŭ konsciaj agoj de iu ajn. Estas simpla sekvo de libervolaj agoj de individuoj kaj natura ekonomia evoluo al pli kompleksaj kaj interdependantaj socioj.



Ilustraĵo 2.2. Ekvilibro



Ilustraĵo 2.3. Ŝanĝoj en postulo kaj oferto

2.1.2. Individua kalkulo kaj la malapero de lingvoj

Ni do povas atendi, ke pro la tutmondiĝo de la moderna socio pli kaj pli malgrandaj lingvoj marĝeniĝas kaj kelkaj malmultaj grandaj lingvoj pligraviĝas. Estas grave kompreni, ke tiu procezo dependas de tute libervolaj individuaj decidoj. Imagu landon kun du lingvoj A kaj B . La homo aŭ unulingve regas unu de la du lingvoj aŭ dulingve ambaŭ. Ni do havas tri tipojn de homoj, A , B kaj dulingvuloj C . Se vi eniras la landon de ekstere vi devas decidi, kiu(j)n lingvo(j)n lerni. Lernokostoj de unu lingvo estu e_u kaj de ambaŭ e_d . Generale estas pli facile lerni kroman lingvon post kiam vi konas unu, do e_d pli malgrandas ol la duobla de e_u . Unuflanke ni do havas la kostojn de lernado de unu aŭ du de la lingvoj. Aliflanke vi havas la utilon de lingvouzo. Se la proporcioj de la lingvoparolantoj estas p_A , p_B kaj p_C , kiuj kompreneble sumas al unu, la utilo de la lernado de lingvo A estas, ke vi povas paroli al la A - kaj C -homoj, de lernado de lingvo B , ke vi povas paroli al la B - kaj C -homoj kaj de lernado de ambaŭ lingvoj, ke vi povas paroli kun ĉiuj. Nu, se la proporcio de A -parolantoj superas tiun de B -parolantoj, vi neniam decidus lerni nur B . Se vi lernas A je kostoj e_u , vi povas kontakti kun pli da homoj ol se vi lernas B kun la samaj kostoj, Vi do aŭ lernos nur A aŭ vi lernos ambaŭ lingvojn. Post kelkaj generacioj neniuj estus unulingva en B . Sed nun ĉiuj parolas A kiel unulingvulo aŭ dulingvulo. La kostoj fariĝi dulingvulo pli altas ol la kostoj lerni nur A . Do, finfine neniuj plu lernos B kaj la socio fariĝas unulingva en A .

Tiu ĉi priskribo kompreneble estas multe tro simpla, sed bone priskribas la fundamentan procezon malantaŭ lingvoŝanĝo. En pli realisma modelo ni devas konsideri kelkajn kromajn faktorojn. Unue, la lernokostoj dependas de la familio. Se vi naskiĝas en A -parolanta familio, vi pli facile lernas A ol B . En dulingva familio tamen la kostoj

de lernado de A aŭ B estas la samaj kaj infano devenanta de dulingva familio ne havas instigon fariĝi unulingvulo en B se B estas pli malgranda lingvo ol A kaj la procezo kontinuas, nur iom pli malrapide. Alia grava faktoro, kiu plirapidigas la procezon estas la eduka politiko de la registaro. Se en la lernejo ĉiu B -lingvulo devas lerni A , la B -parolantoj pli rapide fariĝas dulingvuloj, kaj la procezo pli rapide povas evolui. Do, se la lingvo nur servas por komunikado, finfine unulingva socio rezultas pro la tute raciaj decidoj de individuoj.

Tiel oni tre facile povas ekspliki la kreskon de la uzo de la angla lingvo en EU kaj en la mondo ĝenerale. La franca kaj la angla estis antaŭ kelkaj jaroj pli malpli same gravaj en la administracio en Bruselo, sed la angla kun la akcepto de novaj membroŝtatoj fariĝis iom pli grava kaj la supre priskribita procezo komenciĝis kaj hodiaŭ la angla, malgraŭ la ekziston de Britio, senkomparabe estas la plej grava lingvo en la administracio de EU. Por ŝanĝi tion konscie farita lingvopolitiko necesas.


2.2. Emocia valoro kaj pluekzisto de multlingveco

Tamen, la lingvo ne nur servas kiel komunikilo. Ĝi estas unu de la plej gravaj portantoj de identeco kaj kulturo. Elektante lingvojn por lerni, la individuo do ankaŭ konsideras la emocian valoron de la lernotaj lingvoj kaj donas al tiu aspekto valoron krom la valoro kiel komunikilo. Depende de la relativa forto de tiu identeca valoro kompare al la komunika valoro multlingveco en la socio eblas. Simpla modelo tion montras. La modelo havas tri tipojn de individuoj: A , unulingvuloj en lingvo A , B , unulingvuloj en lingvo B , kiu estas malplimulto, kaj C , dulingvuloj. La homoj hazarde renkontiĝas kaj formas familiojn. Se ne gravas, kiu en la familio estas viro kaj kiu virino, ses tipoj de familioj eblas: AA , AB , AC , BB , BC kaj CC . En la familioj oni produktas infanojn; la tipon de la infanoj decidas gepatroj (kaj edukada sistemo). Tio signifas, ke la tipo dependas de la akira planado (lingvopolitiko) kaj de la relativa valoro de la lingvo kiel identecoportanto kaj komunikilo en la preferoj de la gepatroj. Tiu relativa valoro siaflanke povus dependi de la relativa statuso de la lingvoj en socio, ankaŭ lingvopolitika variabla.

Certe la vivon kaj vigecon de esperanto hodiaŭ ni ne povus ekspliki ĉefe pro ĝia komunika valoro – la procezoj en sekcio 2.1.2. verŝajne antaŭ longe mortigus ĝin. La fakto, ke ĝi vivas, verŝajne ĉefe dependas de ĝia emocia valoro por la parolantoj. Se la averaĝa parolanto ne estus tiom konvinkita pri la alta kultura kaj socia valoro de esperanto, ĝia frekvenco de transdono al pli junaj generacioj pere de la nunaj parolantoj verŝajne ne estus sufiĉe alta, kaj ĝi enirus la tombejon de formortintaj lingvoj dum mallonga tempo. Multaj minoritataj lingvoj hodiaŭ troviĝas en tia batalo kaj nur tiuj kun sufiĉe alta prestiĝo inter siaj parolantoj havos ŝancon travivi. Ilustraĵo 2.5a korespondas al tiu situacio; la lingvo travivas inter dulingvanoj.

Montriĝas, ke la minoritata lingvo B nur povas travivi longdaŭre en C - kaj B -individuoj, se sufiĉe da infanoj eliĝantaj de familioj de tipo AC havas la tipon C .

La perdo de B -parolantoj en BB -, BC - kaj CC -familioj devas esti kompensata de gajno en AC -familioj. Lingvopolitiko, kiu celas la pluekziston de la minoritata lingvo, do devas klopodi influi la decidojn de AC -familioj. Ni rigardu kelkajn ekzemplojn. La proporcio de A -homoj estas p_A , de B -homoj p_B kaj de C -homoj p_C . Koloniata lingvo A alvenas en koloniata lando kaj konkurencas kun la indiĝena lingvo B , kelkaj homoj fariĝas dulingvaj (C).




Ilustraĵo 2.4. Formortanta minoritato, A-ekvilibro

En ilustraĵo 2.4 B havas malaltan statuson kaj en AC -familioj la infanoj ĝenerale fariĝas A -tipoj, la dulingvuloj iom post iom malkreskas kaj finfine ĉiuj fariĝas A -parolantoj. Ni vidas tri staĝojn de evoluo. Unue la koloniataj homoj estas unulingvuloj en B , sed kelkaj fariĝas dulingvuloj. Tiu tendenco daŭras iom da tempo ĝis la plejmulto estas dulingva. Tiam kelkaj fariĝas unulingvuloj en A kaj iom poste ne plu ekzistas unulingvuloj en B . Finfine la dulingvuloj ankaŭ malaperas kaj nur unulingvuloj en A plu ekzistas. Dulingveco estas nur periodo en la historio. Komparu kun la situacio de la indiĝenaj lingvoj en Usono.

Ilustraĵo 2.5a montras situacion, en kiu la indiĝena lingvo havas pli altan statuson kaj pli ol duono de la infanoj de AC -familioj fariĝas dulingvuloj. La unuaj du staĝoj estas la samaj kiel en la unua ekzemplo. La unulingvuloj en B malaperas kaj fariĝas dulingvuloj. Tamen la tria staĝo ne okazas. En longdaŭra ekvilibro ekzistos dulingvuloj krom unulingvuloj en A . La situacio iom similas al la situacio en Kimrio aŭ la eŭskaj landoj en Hispanio. Fine, en ilustraĵo 2.5b, la indiĝena lingvo havas tre altan statuson kaj granda plimulto de la infanoj eliĝintaj de AC -familio estas dulingvuloj. Nun nur la unua staĝo realiĝos kaj dulingvuloj aperas, sed unulingvuloj en B plu ekzistos. Eble la situacio en Barato aŭ Tunizio similas.

2.3. Retaj eksterajoj

Lingvouzo apartenas al tipo de bonoj, kiuj kreas tipon de eksterajo nomitan reta eksterajo. Ekstera efekto, aŭ eksterajo, estas utilo aŭ malutilo kreita por aliuloj, kiam individuo konsumas bonon. Plej konataj estas mediaj eksterajoj: se mi veturas per aŭtomobilo, tiu havas valoron por mi, sed mi ankaŭ pro la eligo de malsanigaj gasoj kaŭzas problemojn por aliaj homoj, tio estas negativa eksterajo de mia ago. Simile, kiam mi lernas lingvon, mi kaŭzas pozitivan eksterajon: Mi devas uzi rimedojn por lerni lingvon kaj komparas tiujn kostojn kun la utilo por mi de la lingvokono por decidi pri la lernado. La utilo estas, ke mi povas komuniki kun pli da homoj kaj legi pli da libroj ktp. Sed ankaŭ aro da aliaj homoj povas komuniki kun mi, se mi lernas ilian lingvon; mia lernado kreas utilon por ili, se ili volas paroli kun mi. En mia decido mi konsideras mian utilon kaj miajn kostojn kaj decidas; la utilon de aliuloj, kiun mi ankaŭ kreas, ne eniras miajn konsiderojn, do estas pozitiva eksterajo.



Ilustraĵo 2.5. Travivanta minoritato


De tiu analizo ni povas fari kelkajn konkludojn. Ĉar mia lingvolernado kreas tiajn valorojn, estus senchava kompensi min pro tio. Do estas en la intereso de socio subteni mian lernadon de lingvo parolata en la socio, kaj tiu intereso estas pli forta por granda lingvo ol malgranda, ĉar se mi lernas grandan lingvon, pli da homoj povas interparoli kun mi. Se ni lernas la francan, diru, havas sencon por la franca registaro subteni tiun lernadon. Tamen en dulingva lando, nur konsiderante komunikadon, estas senchava subteni la malplimulton en la lernado de la plej granda lingvo kaj ne subteni la lernadon de la minoritata lingvo. Se registaro nur interesiĝas pri komunikado inter la civitanoj, do estas senchava politiko subteni la lernadon de la plej granda lingvo en la socio. Kompreneble, se fiero pri la minoritata kulturo grandas, la konkludo povas esti alia.

La reta eksterajo ankaŭ provizas argumentojn por subteno de dulingveco en minoritataj lingvoj. Unue, imagu ke du komunumoj estas tute disaj sen dulingvuloj. Se iu homo libervole forlasas unu komunumon kaj iras al la alia, la situacio de tiu homo

pliboniĝas, ĉar li faris la decidon libervole. Por la komunumo, kiun li forlasas, li kaŭzas perdon, ĉar oni havas unu personon malpli, kun kiu oni povas interkomuniki. Por la alia komunumo estas gajno, ĉar ili ricevas novan interparolanton. Nete ni havas la efekton, kiun ni ĵus priparolis. Indas kolekti ĉiujn homojn en unu granda komunumo. Nun, imagu situacion en kiu la anoj de la minoritato ĉiuj estas dulingvaj. La homo, kiu forlasas la minoritatan komunumon kaŭzas perdojn en la minoritata komunumo, ĉar oni tie havas unu personon malpli por la komunikado en la minoritata lingvo. La plimulta komunumo spertas nenium ŝanĝon, ĉar la nombro da eblaj interparolantoj ne ŝanĝiĝis. Do, la homo forlasinte la malplimultan komunumon tie kaŭzis kostojn kaj nenie alie kaŭzis gajnon. Senchava politiko do estas doni instigojn al la homo por resti en la minoritata komunumo. Subteni la anojn de la minoritato, tiel ke estas pli alloga aparteni al ĝi, do estas bona politiko.

3. Lingva ĉirkaŭaĵo kiel socia kapitalo kaj lingva repertuaro kiel homa kapitalo

Ekonomikistoj parolas pri fizika kapitalo, homa kapitalo kaj socia kapitalo. Fizika kapitalo estas maŝinoj, konstruaĵoj kaj similaj aferoj; ĝi ne rekte rilatas al lingvo. Homa kapitalo, aŭ humankapitalo, konsistas el la ecoj, kiujn la homo posedas, kiuj faras lin pli utila aŭ valora en socio. En la labormerkato tiaj ecoj rezultas en pli granda salajro, en pli interesa laboro aŭ simile. Lingvokonoj estas grava tia humankapitalo, kiu multfacete respeguliĝas en salajro, verŝajno de senlaboreco ktp. Socia kapitalo temas pri kohereco de la socio, kiel bone ĝi funkcias sen konfliktoj aŭ interbataloj. Ankaŭ rilate socikapitalon lingvo povas ludi gravan rolon, unuigantan aŭ disigantan.



Ilustraĵo 3.1. Migrado

3.1. Sociaj konfliktoj

Kelkaj registaroj timas doni tro da rajtoj al lingvaj minoritatoj. Oni pensas ke pro tio sendependemovadoj povus fariĝi fortaj. Tamen ekzistas evidenteco je la malo. Vastaj rajtoj por malplimulto kreskigas la socikapitalon. Tia kapitalo malpliigas la riskon de eblaj konfliktoj, ĉar oni pli forte sentas sin parto de la nacia komunumo. Diskriminacio kaj foresto de minoritataj rajtoj aliflanke instigas disigon. Oni do trovis, ke socikapitalo en la formo de rajtoj por malplimulto malplialtigas la riskon de konfliktoj en socio.

3.2. Migrado

Se homo konsideras elmigri de sia lando al alia lando, unu faktoro, kiu influas lian decidon pri la cellando, estas la tie parolata(j) lingvo(j) kaj lia propra lingvopertuaro, ĉar la kostoj de la migrado fariĝas pli malgrandaj, se vi jam konas la lingvon de la cellando. Ni montras tion en ilustraĵo 3.1. La falanta kurbo montras la gajnon en la cellando kompare al la hejmlando depende de la nombro da migrantoj. La unuaj homoj, kiuj konsideras elmigri, estas tiuj, kiuj gajnos plej multe pro la migrado; povas esti la plej junaj, la plej bone edukitaj ktp. Ilin sekvas homoj, kiuj gajnos iom malpli. Do, je pli malgranda estas la minimume atendota gajno (p), des pli homoj konsideras elmigri. La kreskanta kurbo priskribas la sentatajn kostojn de migrado. Por kelkaj homoj, ekzemple la pli junaj sen familioj, estas relative facile adaptiĝi al nova kulturo (ekzemple al anglaj manĝaĵoj); por aliaj la kostoj (k) fariĝas pli grandaj. Do, se nur malmultaj elmigros, estas tiuj kun sentataj malaltaj kostoj. Kiam pli kaj pli da homoj decidas elmigri la lastaj elmigrantoj eble sentas pli altajn kostojn. La kurbo kreskas laŭ la nombro da migrantoj. En ekvilibro la lasta migranto komparante gajnon pro migrado kun ties kostoj trovas, ke la diferenco estas minimuma; plia ebla migranto trovas la kostojn pli grandaj ol la atendota gajno kaj decidas ne elmigri. Ni do havas ekvilibron, kie kruciĝas la kurboj, kaj la nombro da migrantoj egalas al n . Nun unu grava kosto estas lerni la lingvon de la nova lando. Tiuj kostoj estas altaj en bildo 3.1a, kiu ilustras migradon en lando, kie oni ne konas la lingvon. Aliflanke, por migrado en landon, kie oni jam konas la lingvon, tiu kostoj ne ekzistas kaj la tutaj kostoj estas pli malaltaj kiel en bildo 3.1b. En la ilustraĵo ni vidas, ke pli da homoj elmigros al lando, kies lingvon oni jam konas.

El tio sekvas, ke la tendenco en eŭropaj landoj al instruado de la angla kiel unua kaj ofte sola lingvo en preskaŭ ĉiuj lernejoj kondukas al koncentriĝo de migrado al landoj, kie oni povas facile interkompreniĝi en la angla. Britio estas tia lando, do estas realisma atendo, ke multaj homoj elmigros al Britio. Unu kialo por la voĉdono favore al la eliro de Britio de EU fakte estis, ke multaj homoj en Britio opiniis, ke oni ricevas tro da enmigrantoj de kelkaj EU-landoj. Oni povas diri, ke la politiko subtenante la

anglan kiel unuan fremdlingvon en la lernejoj en preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj, kontribuis al la forigo de Britio de la Eŭropa Unio.

3.3. Labormerkato

Oni simile povas observi en kelkaj landoj, ke la lingvo kiel portanto de identeco kaj kulturo gravas por la malplimultanoj. Kaj en Kimrio kaj en Katalunio oni observis la pozitivan influon de la komuna minoritata lingvo en la labormerkato. Montriĝas, ke la senlaboreco en Kimrio estas pli malalta por parolantoj de la kimra ol por parolantoj nur de la angla, kaj montriĝas la samo rilate la katalunan kaj hispanan en Katalunio. En ambaŭ regionoj preskaŭ ĉiuj anoj de la malplimultoj regas la pli grandan lingvon je tre alta nivelo. La komunika valoro do ne povas esti la grava eksplikilo. La eksplikon de la observo oni pli bone serĉu en la rolo de la lingvo kiel peranto de identeco kaj komuneco, do kiel socia kapitalo en la minoritata komunumo.

3.4. Komerco

En analizo de komercaj fluoj modelo inspirita de astronomio uzeblas. Oni parolas pri gravitado. La forto de la komerca fluo inter landoj aŭ regionoj estas eksplikita pere de variabloj, kiel distanco inter la regionoj kaj multaj kromaj. Unu de ili estas komuna kulturo kaj komuna lingvo. En multaj studoj de la tuta mondo koncerne la influon de lingvo sur komercaj kutimoj montriĝas, ke komuna lingvo averaĝe kreskigas la valoron de la komerco inter landoj je 44%. Tio verŝajne ne estas ĉefe pro komunika interkompreniĝo, sed pro senco de proksimeco al la partneroj en la komerco. Denove ni povas konkludi, ke la identeca valoro de lingvo gravegas.

3.5. Salajroj

Ekvilibro en la labormerkato dependas de postulo kaj oferto, kiel en ĉiu merkato. En ekvilibro determiniĝas la prezo, kiu klarigas la merkaton. En la kazo de labormerkato tiu prezo estas la salajro. Ekzistas multege da studoj pri la influo de lingvokonoj al la salajro. Ĉi tie ni nur prezentas kelkajn tipajn rezultojn. Chiswick kaj Miller (1992) studis la salajran diferencon en kelkaj landoj inter homoj kun bona kaj malbona scio de la ĉefa lingvo de la lando, vidu tabelon 3.1a.


Por enmigrintoj do tre gravas koni la lingvon de la cellando. Lingvokono estas parto de la humankapitalo de individuo, kiu forte influas la enspezojn de la homo, kaj pro tio kompreneble grave influas la sukceson en la nova lando. Ankaŭ la kono de fremdaj lingvoj povas influi la salajron. Gravas kaj la oferto kaj la postulo. Se la postulo grandas kaj la oferto malgrandas, la salajro fariĝas alta kaj inverse, se la postulo malgrandas

kaj la oferto grandas, ni povas atendi pli malgrandan salajron, vidu ilustraĵon 3.2. En bildo 3.2a relative malmultaj homoj (n^*) povas oferti iun lingvokonon, kiun relative multaj dungantoj postulas; ĉe la ekvilibro la salajro (w^*), kiun ili devas pagi, estas relative alta. Inverse, in bildo 3.2b multe da homoj ofertas certajn lingvokonojn, sed malmultaj enterprenistoj postulas ĝin, kaj la salajro malaltas.

Tabelo 3.1. Salajraj premioj en la labormerkato pro bonaj lingvokonoj

(a) Premio pro bona regado de la ĉefa lingvo de lando, Chiswick kaj Miller, 1992			(b) Premio pro bona regado de la fremdaj lingvoj en Pollando, Liwiński, 2019		
<i>lando</i>		<i>plialtiĝo de salajro pro bona lingvoregado (%)</i>	<i>lingvo</i>		<i>plialtiĝo de salajro pro bona lingvoregado (%)</i>
Germanio		6,3	hispana		32
Aŭstralio	(1981)	5	franca		22
	(1986)	8	itala		15
Izraelo		11	germana		12
Kanado		12	angla		11
Usono		17	rusa		0

Liwiński (2019) analizis la influon de la kono de fremdaj lingvoj sur la salajroj en Pollando kaj trovis la rezultojn prezentitaj en tabelo 3.1b, kiuj ni povas ekspliki pere de la simpla analizo en ilustraĵo 3.2. Ĝis antaŭ tridek jaroj multe da poloj lernis la rusan en la lernejo. Krome la rusa estas parenca lingvo al la pola, do relative facila lingvo por poloj. Oni povas diri, ke la oferto estas relative granda. Samtempe la postulo verŝajne malaltiĝis dum la lastaj tridek jaroj. Ni estas en la situacio de ilustraĵo 3.2b. Samtempe la postulo de la romanĉaj lingvoj verŝajne plialtiĝis lastatempe, sed la instruado en la lernejoj ne sekvis, kaj ni troviĝas en ilustraĵo 3.2a. Por la angla certe la postulo forte pligrandiĝis, sed samtempe en la lernejoj la angla gajnis multege pro la eduka politiko, kaj sekve konoj de la angla ne tro plialtigis la salajron.



Ilustraĵo 3.2. Determinado de salajroj en la labormerkato

Tabelo 3.2. Salajraj premioj en la labormerkato pro bonaj lingvokonoj en kelkaj ŝtatoj de la Eŭropa Unio, Ginsburgh kaj Prieto-Rodriguez (2011)

Ŝtato	Lingvo kun plej alta premio	Lingvo kun dua plej alta premio	Lingvo kun tria plej alta premio
Francio	gremana	angla	–
Greklando	franca	angla	–
Italio	germana	franca	angla
Portugaliao	hispana	franca	angla
Hispanio	franca	angla	–
Danlando	angla	germana	–

La lernejo ludas tre gravan rolon por la oferto de lingvokonoj. En la kazo de la angla la eduksistemo en tuta Eŭropo adoptis politikon, kiu fortigas la anglan en la lernejoj; hodiaŭ en preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj la angla estas la unua fremda lingvo en la lernejoj. Pro tio ni ne povas atendi tre grandajn premiojn en la labormerkato pro konoj de la angla kompare al aliaj lingvoj. La postulo certe plialtiĝas sed la oferto ankaŭ. Interesa demando estas, kio onte okazos rilate aliajn lingvojn. Ĉu la postulo de la ĉina, ekzemple, kreskos? Se tio okazos, ni povas komence atendi relative grandan premion pro konoj de tiu lingvo ĝis la lernejoj adaptiĝas kaj komencas instrui ĝin grandskale, kiu povas daŭri unu generacion.

La samajn konkludojn ni povas fari surbaze de analizo de Ginsburgh kaj Prieto-Rodriguez (2011) de premioj pro fremdlingvaj konoj en la Eŭropa Unio. Krom en Danlando la plej altaj premioj ne estas pagataj por konoj de la angla. Vidu tabelon 3.2.

Por konkludi, kreskantan bezonon por konoj de iu lingvo en la merkato sekvas premioj por tiuj, kiuj posedas tian lingvokonon, tiuj premioj donas instigojn al homoj por lerni la lingvon kaj al politikistoj por enkonduki la lingvon en la lernejon. Tiel kreskas ankaŭ la oferto kaj la premio malaltiĝas. Kiom longe daŭras la tempo kun grandaj premioj dependas de tio kiom rapide ŝanĝiĝas la postulo kaj kiom rapide reagas la politika sistemo.

Parto II: Lingvopolitiko

En tiu ĉi parto ni koncentriĝos sur la rolo de la publikaj aŭtoritatoj klopodante influi lingvouzon aŭ bonfarton de parolantoj de certaj lingvoj.

4. Enkonduko al lingvopolitiko

Ni jam vidis, ke spontanea interago inter individuoj ne necese kondukas al dezirata socia strukturo en la okuloj de la individuoj mem. Povas esti individue racie forlasi minoritatan lingvon por granda mondlingvo, eĉ se ĉiu individuo preferus vigan dulingvan socion. Do, kio estas kolektive racia, ne necese estas individue racia. Tia problemon ni trovas, se eksterajoj kreiĝas kiel sekvoj de individua konduto; vidu ekzemple Wickström, Gazzola kaj Templin (2018a) por eta ekzemplo. Alia ekzemplo: se mi konstruas kaj pendigas stratŝildojn en mia lingvo, vidi tiujn ŝildojn donas al mi plezuron (utilon), kaj en mia individua kalkulo mi komparas tiun utilon kun la kostoj provizi la ŝildojn. Tamen, la ŝildoj ankaŭ donas utilon al aliaj samlingvuloj, kies utilo ne eniras mian kalkulon. Parton de la valoro de la ŝildoj por la aliaj homoj ili povus pagi al mi kaj malgraŭ tio resti gajnantoj. Se ili pagus ion, mi konstruus pliajn ŝildojn kaj pendigus ilin. Do, pro la pozitiva eksterajo, kiun mi kreas, ni normale ne pendigas la optimuman kvanton da stratŝildoj; la kvanton, kiun ni havus, se ĉiu pagus, kiom ili valoras al li aŭ ŝi, alivorte la socian utilon. Oni diras, ke la aliaj homoj estas ne-pagantaj profitemuloj. Ĝenerale, *laissez-faire* ofte rezultas en ne-efikaj situacioj en la merkato kaj sociaj utilo kaj kostoj ne egalas.

Efikeco stariĝas, se en iu ajn socia situacio ne eblas trovi alian asignon de la rimedoj de la socio, kiun ĉiuj preferus al la origina situacio. Pareto-plibonigo – nomita laŭ itala ekonomikisto kaj sociologo Wilfried Pareto (1848-1923) – do estas re-asigno de sociaj aŭ individuaj rimedoj, tiel ke ĉiu sentas sin en pli bona situacio. En la malgranda ekzemplo kun la stratŝildoj tiu pense facile eblas. Efikecon ni atingas, kiam Pareto-plibonigo ne plu eblas. Lingvopolitiko, kiel aliaj politikoj, konsistas el multaj

malsamaj agoj, ni diru politikeroj. Tipa politikero en la lingvopolitiko estas la provizo de multlingvaj stratŝildoj. Ĉiu publika projekto povas esti taksita laŭ la kriterio, ĉu ĝi kondukas al Paretoplibonigo aŭ ne. Tio do estas unu kialo por lingvopolitiko: plia efikeco.

Praktika ilo por taksi politikon estas kosto-utilo-analizo. Oni simple komparas la kostojn de politikero kun ĝia taksita valoro pere de la profitantoj de la ero. Substituan-te Pareto-plibonigon per kosto-utilo-analizo, oni parolas pri *ebla* Pareto-plibonigo. Ni faru simplan ekzemplon: Aida havas bonan restoracion kun etiopaj manĝaĵoj kaj Boriso belan rusan trinkejon. Ili ambaŭ volas pendigi dulingvan ŝildon ĉe la pordo de la urbo, kiu direktas la turistojn al la restoracio kaj trinkejo. La ŝildo kostas 1000 eŭrojn; Aida pretas pagi 400 kaj Boriso 700. Se Aida pagus 350 kaj Boriso 650, ni havus Pareto-plibonigon, ambaŭ sentus sin en pli bona situacio. Boriso tamen estas avara homo kaj iras al la urba konsilantaro kun la peto, ke ĝi pendigu la ŝildon kaj ke la kosto de ĝi estu pagata pere de impostoj sur la gastronomia sektoro, tio estas, sur Aida kaj Boriso. La konsilantaro tuj realigas, ke kosto-utilo-analizo montras, ke temas pri inda projekto kaj pozitive decidus. Nun la impostoj por Aida kaj Boriso plialtiĝas je 500 eŭroj. Do en la fino Aida perdas 100 eŭrojn (sia taksado minus la imposto) kaj Boriso gajnas 200 eŭrojn (sia taksado minus la imposto). La neta gajno de la socio estas 100 eŭroj, sed la projekto nur estus Pareto-plibonigo, se Boriso pagus minimume 100 eŭrojn al Aida, ĝi do estas ebla Pareto-plibonigo.

Aldone al efikeco oni do ankaŭ devas konsideri distribuan sekvojn de la lingvopolitiko. Ĉu – en la ekzempleto – efikeco indas malgraŭ la malbonan redistribuon (-100,+200)? Distribuaj konsideroj estiĝas ankaŭ en aliaj kazoj. Imagu privatan edukadsistemon en socio kun granda plimulto kaj malgranda lingva minoritato. La kostoj de la edukado konsistas el fiksaĵoj kaj variaj kostoj kaj estas la samaj en ambaŭ lingvoj. La variaj kostoj estas polernanto la samaj. Se la lernejoj estas pagataj de la gepatroj, ĉiu individuo do averaĝe pagas la samon en ambaŭ grupoj, sed la popersonaj fiksaĵoj estas pli altaj en la minoritataj lernejoj ol en la plimultaj, ĉar ili estas dividitaj inter malpli da homoj en la minoritata sistemo. Ĉu estas akceptebla, ke minoritatoj pagas pli por lernejoj por siaj infanoj ol plimultanoj? Se ne la ŝtato devas aktiviĝi kaj per la lingvopolitiko subteni la minoritatajn lernejojn.

Ni konstatas, ke ekzistas minimume du gravaj kialoj por lingvopolitiko: atingi efikecon kaj malhelpi maljustan distribuadon.

5. Lingvopolitiko surbaze de kosto-utilo-analizo

Kiel jam dirite, ekonomika analizo de politiko ofte baziĝas sur kosto-utilo-analizo². La lingvopolitikisto do devas kompari la efikon kaj ties valoron en siaj okuloj kun la

² Alternative oni uzas kosto-efiko-analizon. La diferenco estas, ke en kosto-utilo-analizo oni taksas valoron de la politiko, sed en kosto-efiko-analizo la dezirata rezulto de la politiko ne

kostoj de la provizo de la ero. Indas pripensi la difinon de politikero. Tiu estas la plej malgranda parto de la politiko, kiun indas analizi kiel unuo. Parolante pri lingvopolitiko, tipaj kampoj povas esti la rajto uzi sian propran lingvon en specifaj sociaj situacioj. Ekzemploj estas: en tribunaloj, dum komunikado kun la loka registaro, studante en lernejo, trovi informojn surstrate, legi la leĝojn de la ŝtato ktp. Politikero do povas esti provizado de tradukistoj por la tribunaloj kaj la ofico de la lokaj aŭtoritatoj, provizado de lernejoj en minoritata lingvo, pendigo de multlingvaj stratŝildoj, publikado de leĝoj en minoritata lingvo ktp. Ofte indas arigi multajn erojn en kategorio. Oficialigo de lingvo en regiono do povus signifi, ke la regionaj aŭtoritatoj subtenas lernejojn, pendigas stratŝildojn kaj permesas komunikadon kun la aŭtoritatoj en la minoritata lingvo. Tiaj kategorioj ofte nomatas nacia lingvo, ŝtata lingvo, laborlingvo, ĉiu kun malsimila aro de politikeroj.

5.1. Utilo de politikero

La efiko de lingvopolitiko simple specifikas la rezultojn. Ofte la celo povas esti iu dezirata efiko, ekzemple pligrandigi la nombron de parolantoj de minoritata lingvo. Ofte oni donas valoron al la efiko, ekzemple unu plia parolanto valoras 25 eŭrojn; tiu ebligas komparon inter efiko kaj kostoj, sed ofte oni ne taksas la efikon, oni nur klopodas fari la plej bonan ene de buĝeto.

Se oni taksas la efikon de politikero, oni povas fari kosto-utilo-analizon. Teorie en kostoutilano oni volas scii la valoron de politikero por la profitantoj de la politiko. Ekonomikistoj parolas pri la pagpreteco de homoj. La socia utilo do estas la sumo de la individuaj pagpretecoj. Se la averaĝa pagpreteco de minoritataj estas b kaj la nombro da ili estas n , oni povas diri, ke la socia valoro de la politikero estas bn . Praktike ofte tre malfacilas taksi la pagpretecojn, kaj la politikisto devas ĝin diveni. La politikisto, tamen, povas lasi siajn preferojn eniri la taksadon kaj taksi la valoron de certa politikero tro alte aŭ tro malalte depende de siaj personaj preferoj. Lin povas ekzemple influi, ĉu la profitantoj estas novaj enmigrintoj aŭ indiĝenaj individuoj, ĉu la profitantoj estas antaŭaj okupintoj aŭ koloniistoj, ĉu nacio estas «konstruiganta» kaj multaj pli.

5.2. Kostoj de politikero

Se la taksado de la utila flanko ofte estas iom arbitra, la kostflanko estas multe pli objektiva. Ni havas kaj administrajn kostojn kaj efektivigajn kostojn. La administraj kostoj tipe dependas de la nombro da reguloj (leĝoj) kaj la nombro da administraj unuoj inkluzivitaj en la decido pri la politikero. La efektivigaj kostoj estas pli multifacetaj; ni

estas taksata en mona valoro sed en alia kvanto, ekzemple nombro da lernejoj studlokoj en minoritata lingvo aŭ nombro da parolantoj de iu lingvo.

devas rigardi kaj ilian grandecon kaj ilian strukturon, ĉar la politikeroj provizas bonojn kun malsimilaj ecoj. Almenaŭ du dimensioj gravas: la nombro da profitantoj kaj la areo de la administra unuo, kie efektiviĝas la politikeroj. Ni havas kvar polusajn tipojn de bonoj kaj pro tiu devas konsideri kvar malsamajn kostostruk- turojn, vidu tabelon 5.1.


Tabelo 5.1. Tipoj de bonoj realiĝantaj pro efektivigo de politikeroj

Por la kostoj		
la areo de la teritorio	la nombro da profitantoj	
	gravas	ne gravas
gravas	rivaleca kaj spaceca	ne-rivaleca kaj spaceca
ne gravas	rivaleca kaj ne-spaceca	ne-rivaleca kaj ne-spaceca

Se la kostoj dependas kaj de la nombro da profitantoj kaj de la grandeco de teritorio, kie loĝas la malplimulto, ni diras, ke la bono estas kaj rivaleca kaj spaceca. Ekzemplo povas esti sociaj servoj, dulingvaj ambulantoj sanservoj. Kiam kostoj dependas ne de la nombro da profitantoj, sed de la grandeco de teritorio, ni parolas pri ne-rivaleca spaceca bono, bona ekzemple estas dulingvaj stratŝildo. Por kostoj, kiuj dependas ne de la grandeco de la teritorio, sed de la nombro da profitantoj, kiuj uzas ĝin, la bonoj estas rivalecaj kaj ne-spacecaj. Tipaj ekzemploj povas esti la rajto ricevi respondon al retmesaĝoj en via lingvo de la aŭtoritatoj aŭ dulingva telefoncentro de la registaro. Fine, se la kostoj dependas nek de la nombro da profitantoj nek de la grandeco de la teritorio, la bono estas ne-rivaleca kaj ne-spaceca. Leĝotekstoj en minoritata lingvo kaj multaj simbolaj rajtoj kiel la landonomo en minoritata lingvo sur monbiletoj aŭ oficiala nomo de naciaj institucioj en minoritata lingvo apartenas al tiu kategorio.

5.3. Efikecfronto

Ni do povas skribi la kostojn de politikero kiel funkcio de n , la nombro de profitantoj, kaj a , la areo de la teritorio de efektivigo, $k(n, a)$. Tamen estas pli oportuna ŝanĝi la variablojn al n kaj $\delta := n/a$, la loĝa denseco de la malplimulto. Ni do havas novan kostfunkcion $c(n, \delta) = k(n, n/\delta)$. Dividante per la nombro da profitantoj, ni alvenas al la personrilate averaĝaj kostoj de politikero: $ac(n, \delta) := c(n, \delta)/n$. Se ne estas fiksjaj kostoj kaj la variablaj kostoj estas proporciaj al n , $ac(n, \delta)$ estas konstanta. Se ekzistas fiksjaj kostoj, la popersonaj fiksjaj kostoj malkreskas, kiam n kreskas kaj $ac(n, \delta)$ malkreskas. Ĝenerale oni povas konkludi, ke se $k(n, a)$ estas tiel nomata konkava funkcio (kio estas tre realisma supozo), $ac(n, \delta)$ malkreskas en la du variabloj n kaj δ . La politikisto devas kompari la averaĝajn kostojn al la de li taksita popersona pagpreteco por scii, ĉu la popersonaj kostoj superas aŭ malsuperas la popersonan utilon de la politikero. La politikero indas, se la entuta utilo superas la entutajn kostojn: $bn > c(n, a)$ aŭ $b > ac(n, \delta)$. Ni facile povas montri tion en diagramo, vidu ilustraĵon 5.1.




(a) *Tipaj efikecfrontoj, kiam gravas la kostoj rilate kaj la nombron da kaj la densecon de minoritatoj*

(b) *Tipaj efikecfrontoj, kiam gravas la kostoj rilate la nombron da minoritatoj*


Ilustraĵo 5.1. Efikecfrontoj

En la diagramo la literoj A, B, C kaj C reprezentas kvar komunumojn. En komunumo A loĝas n^A minoritatoj kaj la nombro da minoritatoj areo, la denseco, estas δ^A . Por la aliaj kvar estas simile. La kombinoj de numera grandeco kaj denseco de la minoritato, por kiu la politikero apenaŭ indas korespondas al la tri kurboj. En la

kurbo tra C la taksado de la pagpreteco fare de la analizanto estas relative alta, do la politikero havas grandan valoron por la profitantoj. En tiu okazo la politikero indas en ĉiuj komunumoj, ĉar la popersonaj averaĝaj kostoj malkreskas, kiam oni iras en la nord-okcidentan direkton en la diagramo. Se la pagpreteco estas iom pli malalta la kurbo tra A kaj C estas la kritika kurbo; en ĉiuj komunumoj sud-okcidente de la kurbo, en nia kazo komunumo C , la politikero ne indas kaj en ĉiuj komunumoj sur la kurbo aŭ nord-oriente de ĝi la politikero indas. Fine, se la taksita valoro de la politikero estas relative malalta nur en B la politikero indas. Tiu diagramo donas al ni bonan ilon por analizi politikerojn. Oni povas montri, ke la efikecfronto havas la ĝeneralan formon en la bildo, Ĝi estas malkreskanta kurbo, kiu estas konvekso en la direkto al la origino. La kurboj do povas aspekti ankaŭ kiel en bildo 5.1b.



(a) *Neniu ŝanĝo en la rajtoj por minoritato en komunumo C pro enmigrado de plimultanoj*



(b) *Plifortiĝo de la rajtoj por minoritato en komunumo C pro enmigrado de plimultanoj kaj minoritatoj*

Ilustraĵo 5.2. Efectoj pro enmigrado

5.4. Demografiaj ŝanĝoj

Oni povas uzi tiun modelon por fari kelkajn klarajn konkludojn. Oni povas facile kompari komunumojn C kaj B , ĉar B troviĝas nordoriente de C . Tio signifas, ke se indas enkonduki iun politikeron en komunumo C , do ĉe altaj popersonaj kostoj, certe ankaŭ indas enkonduki ĝin en komunumo B kie la popersonaj kostoj estas plej maltaj. Ke ni ne povas fari tian konkludon koncerne A kaj C aŭ B kaj C evidentas, se ni rigardas bildon 5.1b. Kun la koststrukturo malantaŭ tiu bildo la popersonaj kostoj en A pli altas ol en komunumo C kontraŭe al la koststrukturo en bildo 5.1a. En bildo 5.1a la nombro de kostoj ne estas tiom gravaj kompare al la nombro de kostoj kiel en bildo 5.1b. La nombro da profitantoj malkreskas pliigante la popersonajn

kostojn, kiam ni komparas komunumon A al C , la denseco kreskas malpliigante la popersonajn kostojn. Kun la kostostrukturo de bildo 5.1a la sumo de la popersonaj kostoj malplialtiĝas kaj kun la kostostrukturo en bildo 5.1b la sumo plialtiĝas.

Ni povas demandi pri la influo de enmigrintoj en komunumo C , diru. Se la enmigrintoj ĉiuj apartenas al la plimulto, nenio ŝanĝiĝas; la nombro de la malplimultanoj restas la sama kaj ankaŭ ilia loĝdenseco, vidu ilustraĵon 5.2a. Ni konkludas, ke ne gravas por lingvopolitiko, ĉu la malplimultanoj estas proporcie malgranda minoritato en urbo aŭ proporcie pli granda minoritato en kampara regiono, se iliaj nombro kaj denseco estas la samaj. Nu, se la enmigrintoj konsistas el kaj plimultanoj kaj minoritatoj, kaj la nombro de minoritatoj kaj ilia denseco kreskas. C moviĝas en la nordorientan direkton en bildo 5.2b kaj nun pli indas enkonduki politikerojn ol antaŭe. La rajtoj de la minoritato fortiĝas.


Se minoritatoj formigras al alia komunumo – granda urbo, ekzemple – kompreneble la lasta efekto iros en la malan direkton, kaj la kialo por lingvorajtoj fariĝas pli malforta en la forlasata komunumo.

5.5. Ŝanĝoj en federacia strukturo

Oni povas kunigi malsimilajn regionojn, aŭ oni povas disigi regionojn. tiaj ŝanĝoj en la administraj regionoj ankaŭ influas minoritatojn. Unue, diru, ke ni kunigas regionon sen minoritato kun regiono kun minoritato. La nombro da minoritatoj pro tio ne ŝanĝiĝas en la nova pli granda regiono kompare la malnovan regionon kun minoritato. La areo de la nova regiono tamen pli grandas ol la malnova, do la denseco malkreskas. Bildo 5.3a ilustras tion. Estas klare, ke pro tio la situacio de la malplimulto malpliboniĝas. Politikero, kiu antaŭe estis efika, nun ne necese efikas, ĉar la popersonaj kostoj estas pli altaj; la komunumo C moviĝis suden en la diagramo.

Kunigante du regionojn kun la sama denseco de minoritatoj, ne ŝanĝas la densecon de la minoritato en la nova pli granda regiono. La nombro da minoritatoj tamen kreskas en la nova regiono, vidu bildon 5.3b. La situacio de la minoritato pliboniĝas. Nun indas enkonduki lingvorajtojn en situacioj, kiam antaŭe ne estis oportuna, ĉar popersonaj kostoj plimalaltiĝis; komunumo C moviĝis orienten en la diagramo.

Kompreneble disigoj povas havi la inversajn efektojn. Se en iu komunumo la minoritato estas koncentrita en parto de la komunumo, disigo de la komunumo, tiel ke en unu parto loĝas la tuta malplimulto kaj en la alia parto nur plimultanoj, la nombro da malplimultanoj en la unua parto samas al la nombro da ili en la malnova komunumo, sed en la nova komunumo ilia denseco kreskas. Do, se en la malnova komunumo ne indis doni rajtojn al la minoritato, en la nove eble estas alie, ĉar tie la popersonaj kostoj malkreskis; la unua nova komunumo estas pli norde en la diagramo. En sekcio 8.2. ni analizos tian ekzemplon de la reala mondo.


(a) *Kunigo de regiono sen minoritatoj kun regiono kun minoritatoj*(b) *Kunigo de du regionoj kun minoritatoj*

Ilustraĵo 5.3. Ŝanĝoj en la federacia strukturo

6. Optimuma politiko laŭ tipo de politikero

Kiel ni jam vidis, la kostostrukturoj povas tre vari de unu politikero al alia. En ilustraĵo 6.1 ni montras tion per du politikeroj, unu, kies popersonaj kostoj ne tro dependas de la nombro da profitantoj sed forte de la denseco de la komunumo (relative spaca ero), kaj unu, kies popersonaj kostoj preskaŭ ne dependas de la areo de la komunumo (ne tro spaca ero). La unua povas esti enkonduko de stratŝildoj en la malplimulta lingvo kaj la alia la rajto ricevi respondon en la propra lingvo de la aŭtoritatoj al oficialaj retmesaĝoj. Por meze taksitaj pagpretecoj ni vidas, ke la stratŝildojn indas enkonduki nur en komunumo *A* kaj *B* kaj la rajton ricevi multlingvajn respondojn nur en *B* kaj *C*.

Tio signifas, ke malsimilaj politikeroj malsimile efikas kaj de tio sekvas, ke ni bezonas malsimilajn regulojn por gvidi la decidojn pri malsimilaj politikeroj. Do, la reguloj por enkonduki rajton ricevi respondon al retmesaĝoj en la propra lingvo devas dependi de la nombro da eblaj profitantoj kaj tute ne de la areo de la teritorio. Kaj la reguloj por stratŝildoj devas dependi ĉefe de la denseco de la loĝado, ĉar se la denseco estas konstanta kaj la nombro da profitantoj kreskas, ankaŭ la areo devas kreski proporcie ($\delta = n/a$) kaj la popersonaj kostoj estas la samaj. Se n estas konstanta kaj δ kreskas, la areo devas malkreski, kaj oni bezonas malpli da stratŝildoj kaj malpli da stratŝildoj popersono (ĉar n estas konstanta). Ĝenerale oni povas diri, ke reguloj devas dependi kaj de n kaj de δ aŭ ĉefe de unu de ili. La ofta regulo uzante proporciojn (procentojn) de minoritatoj rilate la tutan loĝantaron, ne taŭgas, vidu sekcion 8.1..



Ilustraĵo 6.1. Malsimilaj koststrukturoj


7. Optimuma politiko laŭ tipo de malplimulto

Ni povas renversi la analizon en sekcio 6. kaj demandi, ĉu ĉiu politiko indas en ĉiuj cirkonstancoj? Imagu, ke la politikistoj volas vigligi minoritatan lingvon kaj pro tio bezonas bonan lingvopolitikeron. Ni jam vidis en sekcio 2.2., ke gravas influo la gepatrojn por ke ili transdonu la lingvon al la infanoj en la hejmo kaj lernejoj. Pro tio ankaŭ gravas havi lernejan sistemon en la minoritata lingvo. La demando do estas, kiel funkcias la politikeroj. Se la politikero estas publikigado de oficialaj dokumentoj en la lingvo, tio certe donas plian statuson al la lingvo kaj la gepatroj fieras kaj uzas la lingvon kun la infanojn. Tamen ankaŭ stratŝildoj en la lingvo altigas la statuson kun la sama bona rezulto. Rigardante la du bonojn «stratŝildoj» kaj «oficialaj dokumentoj», ni tuj observas, ke stratŝildoj estas ne-rivaleca (ĉiu homo vidante stratŝildon povas profiti de ĝi sen afekti la eblojn de alia homo ankaŭ profiti) kaj spaceca (nur homoj vivantaj proksime al la ŝildo profitas) bono, kaj oficialaj dokumentoj estas kaj ne-rivaleca kaj ne-spaceca bono. De tio, ni povas konkludi, ke se la minoritato estas koncentrita, uzo de la buĝeto por stratŝildoj trafas pli da homoj ol se la minoritato disa loĝas. Por la oficialaj dokumentoj ne gravas ĉu la minoritato estas koncentrita aŭ disa. Do, en la divido de la buĝeto inter la du tipoj de politikeroj, oni donu relative pli grandan parton al stratŝildoj, se la minoritato estas koncentrita kaj relative pli al oficialaj dokumentoj, se ĝi estas disa.

Ĝenerale, ne-rivaleca kaj ne-spaceca bono kaŭzas la samajn kostojn por ĉiuj tipoj de minoritatoj; spaceca kaj ne-rivaleca bono kaŭzas malaltajn kostojn por koncentrita minoritato sed pli altajn kostojn por disaj minoritatoj; ne-spaceca kaj rivaleca bono

kaŭzas malaltajn kostojn por malgrandaj minoritatoj sed pli altajn kostojn por grandaj minoritatoj kaj spaceca kaj rivaleca bono kaŭzas malaltajn kostojn por malgrandaj koncentritaj minoritatoj sed pli altajn kostojn por grandaj disaj minoritatoj. De tio ni devas konkludi, ke la lingvopolitiko devas esti malsama por malsamaj malplimultoj se la buĝeto estas limigita.

En Wickström (2021) tio estas ilustrita en malgranda ekzemplo. Ekzistas kvar politikeroj: ne-spaceca kaj ne-rivaleca x , ne-spaceca kaj rivaleca y , spaceca kaj ne-rivaleca z kaj spaceca kaj rivaleca w . La buĝeto de la politikisto estas $B = x + ny + az + w(n + \varepsilon a)$, tio estas la kostoj por x estas konstantaj; la popersonaj kostoj por y kaj poareaj kostoj por z ambaŭ estas konstantaj, la elspezoj dependas de la nombro da minoritatoj kaj la areo de ilia loĝado. La popersona kosto de w estas la sama kiel de la aliaj politikeroj, sed la poarea kosto estas ε . La influo pere de la gepatroj sur la nombro da infanoj edukataj en la minoritata lingvo estas $f(x, y, z, w) = x + \beta y + \gamma z + \delta w$. Tio signifas, ke, se x kreskas per unu unuo, tiom multaj infanoj pli estas edukitaj en la minoritata lingvo kiel, se y kreskas per β unuoj, z per γ unuoj aŭ w per δ unuoj.



Ilustraĵo 7.1. Optimuma politiko por malsimilaj minoritatoj

La optimuman politikon ni trovas en ilustraĵo 7.1. La optimuma politiko dependas de la valoroj de la variabloj a , la areo; kaj de n , la nombro de minoritatoj. La ĉefa diferenco inter la du bildoj estas, ke en la maldekstra w ne estas tiom grava por la gepatroj kaj havas malgrandan influon (δ estas malgranda). Ni vidas, ke por malgranda disa minoritato (n malgranda kaj a granda) la elekto de politikero devas esti y , la ne-spaceca kaj rivaleca bono, ekzemple la rajto ricevi respondon al retmesaĝoj en la preferata lingvo; oni atingas ĉiujn de la disaj anoj sen kroma kosto kaj la nombro estas malalta, do la kostoj por respondi ne tro altaj. Male, por granda koncentrita minoritato z , la spaceca

kaj ne-rivaleca bono, devas esti elektita, ekzemple dulingvaj stratŝildoj. La kostoj ne estas tro grandaj, ĉar la areo estas malgranda kaj oni atingas ĉiujn sen devi pagi pli.

Ni povas ĝenerale konkludi, ke lingvopolitiko devas esti malsimila por malsimilaj malplimultoj depende de iliaj loĝadostrukturo kaj nombro. Ankaŭ gravas, ke la limoj de administraj unuoj por lingvopolitiko devas alĝustigi al loĝstrukturo de minoritatoj, kion ni jam vidis en sekcio 5.5.. Al tio ni ankaŭ revenos en sekcio 8.2. Tiu ekzemplo kaj la analizo antaŭe kondukas al la sama grava konkludo: pli da fleksebleco povas atingi pli bonan socion kun malpli da kostoj. Simbolaj rajtoj ofte kostas malmulton, sed donas multan kontenton al multaj homoj.

8. Ne-optimuma politiko

Politiko bazita sur kostoj kaj utilo neniam kondukas al procenta regulo, krom en la kaze, ke preferoj por diskriminacio de la anoj de la plimulto estas konsiderataj. Tamen, multaj landoj uzas procentan regulon por doni oficialan statuson al minoritata lingvo. Kelkaj ekzemploj de la postulataj procentoj por doni rajtojn al malplimultoj en diversaj landoj estas: Slovakio (15%), Rumanio (20%), Estonio (50%). Finnlando havas kombinon de senchava regulo kun kritika grandeco de 3000 minoritatoj kaj procenta regulo kun kritika valoro de 8%. Ankaŭ la landlimoj de administraj unuoj povas esti uzataj por realigi ne-efikan politikon.

Tabelo 8.1. Du komunumoj en Transilvanio, Rumanio, propra kalkulado surbaze de la censo de 2011 (Institutul national de statistică, 2011)

<i>judet</i>	areo <i>a</i>	loĝantaro		hungarparolantaro		
		<i>N</i>	Δ	<i>n</i>	π	δ
Cluj-Napoca/Kolozsvár	6674	691106	103,6	102966	14,9	15,43
Sălaj/Szilágy	3864	224384	58,1	50928	22,7	13,18


8.1. Procenta regulo

Ni komparas du komunumoj en Rumanio, Cluj-Napoca/Kolozsvár kaj Sălaj/Szilágy. La unua havas la plej grandan hungar-parolantan enloĝantaron en Rumanio sen oficiala statuso pro la 20%-a regulo. En la dua la pli malgranda hungarparolantaro ĝuas oficialan statuson. La relevantaj datumoj troviĝas en tabelo 8.1.


En ilustraĵo 8.1 la du komunumoj estas komparitaj. Ni tuj vidas, ke Cluj-Napoca/Kolozsvár superas Sălaj/Szilágy en ambaŭ relevantaj dimensioj, la grandeco n kaj la denseco δ de la malplimulto. Se oni donas rajtojn al la minoritato en Sălaj/Szilágy, oni ankaŭ donu rajtojn al Cluj-Napoca/Kolozsvár, se oni volas fari koheran politikon. Ĉar Cluj-Napoca/Kolozsvár estas urba komunumo kun granda denseco Δ de la tuta loĝantaro kaj granda loĝantaro N , oni bezonas multe pli alta denseco δ de la minoritato por atingi la 20% necesaj por oficiala statuso ol en la pli malgranda komunumo Sălaj/Szilágy, kiu estas kampara kun malalta denseco de la tuta loĝantaro. La rilato inter δ , Δ kaj π estas $\pi = n/N = (n/a)/(N/a) = \delta/\Delta$. Se la kritika procento estas π^k , la kritika valoro de δ fariĝas $\delta^k = \pi^k \Delta$. Ni vidas, ke en urba komunumo kun ĝia granda valoro de Δ kaj la bezonata denseco kaj la bezonata grandeco de la minoritato por atingi la kritikan procenton estas pli altaj ol en la kampara komunumo. La kritikaj valoroj de n kaj δ estas markitaj en la ilustraĵo.

8.2. Federacia strukturo

Por konduki optimuman lingvopolitikon en federacie strukturita lando, oni devas ankaŭ konsideri la limojn de la federaciaj unuoj. Ni rememoru, ke necesas kaj granda nombro da minoritatoj kaj alta spaca denseco de iliaj loĝlokoj por enkonduki lingvorajtoj. Se la teritorio fariĝas tro granda, la nombro da minoritatoj eble kreskas, sed ilia denseco povas malkreski, se la ili estas koncentritaj al certa aero. Se la teritorio fariĝas tro malgranda, la denseco altas, sed la nombro da minoritatoj ne necese. Povas esti sufiĉe tikla problemo trovi optimuman federacian strukturon.



Ilustraĵo 8.1. Du komunumoj en Transilvanio, Rumanio



Ilustraĵo 8.2. Du eblaj federaciaj strukturoj


En multaj kazoj, tamen, oni povas facile trovi plibonigon. En ilustraĵo 8.2 ni montras fikcian landon de 10 milionoj da enloĝantoj konsistanta el plimulto da 9,5 milionoj kaj el minoritato da 500 000 homoj. Ni diru, ke la anoj de la malplimulto loĝas koncentrite en unu regiono en la sudo, kie ili estas duono de la enloĝantaro. Du regionaj strukturoj estas proponitaj en la ilustraĵo. En la ne-optimuma strukturo en bildo 8.2a la minoritato havas inter 50 000 kaj 120 000 anoj en ses komunumoj kun inter 1,12 kaj 1,93 milionoj da enloĝantoj. En neniu regiono ĝi superas 7%. kun la federacia strukturo en bildo 8.2b la minoritato koncentriĝas en unu unuo en la sudo, kie ĝi havas 45% de la enloĝantaro. Sendepende de la regulo uzata por pravigi minoritatajn rajtojn multe pli da minoritanoj ricevos rajtojn en la strukturo de bildo 8.2b ol en tiu de bildo 8.2a.

Por ilustrati tiun fenomenon ni rigardu ekzemplon de Slovakio. Nitriansky kraj / Nyitrai kerület Nitro kaj Banskobystrický kraj / Besztercebányai kerület Banakobistrico estas du slovakaj regionoj kun grandaj hungarparolantaj malplimulto, vidu tabelon 8.2. El la tabelo kaj ilustraĵo 8.3 evidentas, ke la hungarparolantoj koncentriĝas en la sudo de la regionoj. La regiono (*kraj/kerület*) Nitro estas dividita en sep komunumoj *okresy/járás*. En la sudaj kvar la proporcio hungarparolantoj estas 41,3%, sed en la tri nordaj nur 4,1%. Simile, en Banakobistrico la kvar sudaj komunumoj havas minoritaton de 31,9% kaj la naŭ nordajn de nur 0,4%. Laŭ la slovakaj regulo, kiu postulas minimume 15%-an proporciojn por doni rajtojn, la hungara havas oficialan statuson en Nitro, sed ne en Banakobistrico. La 183535 hungarparolantoj en Nitro do havas rajtojn, sed la 79839 en Banakobistrico ne. Ni povas imagi ŝanĝon en la limoj, kreante novan centran regionon de la tri nordaj komunumoj de Nitro kaj la naŭ nordaj komunumoj de Banakobistrico kaj kreante novan sudan regionon de la kvar sudaj komunumoj de Nitro kaj de la kvar sudaj komunumoj de Banakobistrico. Anstataŭ la du malnovaj regionoj ni nun havas du novajn kun pli malpli la sama areo kaj nombro da enloĝantoj; vidu tabelon 8.2 kaj ilustraĵon 8.4. Aplikante la slovakajn 15%-regulon, ni vidas, ke la nombro da hungarparolantoj kun rajtoj kreskis je 37%, de 183535 ĝis 250559, kaj la nombro da hungarparolantoj sen rajtoj malpliĝis je 70% de 79830 ĝis 24096.


Sen dubo plibonigo de la minoritata situacio. Senchava elekto de federacia teritoria administra disdivido de ŝtato povas redukti kostojn kaj plialtigi kontenton.

Tabelo 8.2. Alternativa aranĝo de du komunumoj en suda Slovakio, propraj kalkuloj surbaze de la censo 2011 (Štatistický úrad Slovenskej republiky, 2011)

<i>kraj/kerület</i>	nombro da <i>okresy/járás</i>	areo <i>a</i>	loĝantaro <i>N</i>	hungarparolantaro		
				<i>n</i>	π	δ
Nitriansky/Nyitrai	7	6344	689867	183535	26,6	28,93
Sudo	4	4354	417065	172245	41,3	39,56
Nordo	3	1990	272802	11290	4,1	5,67
Banskobystrický/Besztercebányai	13	9454	660563	79830	12,1	8,44
Sudo	4	3876	245712	78314	31,9	20,21
Nordo	9	5578	414851	1516	0,4	0,27
Nova sudo	8	8230	662777	250559	37,8	30,45
Nova centro	12	7568	687653	12806	1,9	1,69



Ilustraĵo 8.3. Du komunumoj en suda Slovakio



Ilustraĵo 8.4. Alternativa aranĝo de du komunumoj en suda Slovakio

Parto III: Distribuaj efektoj de lingvopolitiko

Parolante pri justeco ni unue devas difini, kio estas justeco. La plej grava demando estas, ĉu ni baziĝu sur la preferoj kaj sentoj de individuoj aŭ, ĉu ni serĉu «objektivan» difinon de ekstere. Ekstera objektivo povas esti dogmo de iu religia organizo aŭ parto de la preferoj de individuo; oni simple decida, kiuj preferoj legitimas kaj kiuj ne. Parolante pri lingva justeco oni ankaŭ devas decidi, kiuj lingvoj kaj lingvogrupoj apartenas al la socio. En mondo kun migrado la lingvogrupoj en iu ajn socio daŭre ŝanĝiĝas; oni parolas pri novaj kaj malnovaj malplimulto. Ĉi tie ni ne analizos la eblajn difinojn de justeco. Sufiĉu mallonga kategoriigo, kiu povas servi kiel komparnormo por la diskuto de kelkaj empiriaj ekzemploj de la lingvopolitiko de la Eŭropa Unio.

9. Normoj por justaj lingvorajtoj

La ĉefa demando estas, kiomgrade la preferoj de la koncernatoj gravu. Ofte uzata klasifiko difinas tri klasojn kun tri subklasoj de unu klaso de minoritataj rajtoj:

1. toleremo
2. normo kaj koncesio
3. promociaj rajtoj
 - (a) situacidependaj rajtoj
 - (b) travivorajtoj
 - (c) individua justeco

Toleremo signifas, ke oni ne malpermesu aŭ malhelpu la uzon de iu lingvo en la privata sfero. Normo kaj koncesio difinas normlingvon, kaj akceptas la uzon de alia lingvo nur en situacioj, en kiuj homo ne scipovas uzi la normlingvon, ekzemple en jura

proceso. La promociaj rajtoj signifas, ke la ŝtato aktive subtenas la uzon de iuj lingvoj, sendepende de tiu, ĉu la koncernaj individuoj regas aliajn lingvojn aŭ ne. Ni povas diri, ke situacidependaj kaj travivaj rajtoj estas kolektivaj rajtoj, kaj ke individua justeco estas individua rajto. La situacidependo celas protekti ekzistantajn komunumojn de malapero aŭ absorbo en la plimulta kulturo per garantio de sufiĉaj sociaj institucioj por normala socia vivo, kiom longe la komunumo ekzistas. La travivorajto adicie volas garantii la pluan vivon de minoritata komunumo, eĉ se la minoritato estas bone integrita en la plimulta socio.

La individua justeco estas pli en la spirito de bonfarta ekonomiko. Tio koncernas la eblecon de individuo antaŭenigi sian lingvon en socio laŭ siaj preferoj. Do, la individue estas centre, ne la kolektivo, kaj la individuo mem decidas, kio gravas, ne la registaro. Tamen, oni ne havas la saman ŝancon antaŭenigi sian lingvon, kiel ano de la plimulto pro la konduto de la plimultanoj.

Ni antaŭe parolis pri eksterajtoj. Pro tio la registaron havas devon interferi, tial ke la preferoj de la individuoj apartenantaj al la minoritato estu sufiĉe konsiderataj.

En la realigo de lingvopolitiko oni povas rigardi egalecon kiel kroman utilon kaj malegalecon kiel kromajn kostojn, kiuj aldoniĝas al la aliaj utilo kaj kostoj, kiujn ni jam analizis en sekcio 5.. Redistributado favore al la malplimulto sen rajtoj do kreskas la diferencon inter utilo kaj kostoj, kaj laŭ la kosto-utilo-analizo indas doni pli da rajtoj al la minoritato malgraŭ tio, ke eble ne estas efike laŭ la simpla analizo. La grado de redistributado, kiun realiĝos, dependos de la taksado de la kostoj de malegaleco. En la politiko ekzistas interŝanĝo de certa grado inter efikeco kaj egaleco. Ankaŭ la dinamikaj aspektoj povas gravi. Se lingvopolitikon hodiaŭ sekvas pli vigla minoritata komunumo en la futuro, ankaŭ la argumento por plia subteno de la minoritato fariĝas pli forta onte. Pro tio la lingvopolitiko hodiaŭ povas porti pozitivan eksterajton.

10. Lingvopolitiko de la Eŭropa Unio

Ni rigardas la lingvopolitikon de la Eŭropa Unio kiel ekzemplon. Ni koncentriĝos al du studoj en la literaturo. Rigardante la ciferojn, vi tuj notos, ke ili ne ĉiam kongruas. Tio estas normala problemoj, kiam oni uzas empiriajn datumojn. Ili enhavas ĉefe du tipojn de eraroj: statistika eraro, ĉar oni uzas enketojn, kiuj baziĝas sur frakcio de la tuta loĝantaro. Ankaŭ la precizeco de la respondoj ne necese estas perfekta, ĉar la pridemanditaj homoj eble ne volas diri la veron. Tiun lastan problemon ni ankaŭ trovas en censodatumoj, kiuj inkluzivas la tutan loĝantaron. Dulingvanoj, ekzemple, ofte devas elekti nur unu lingvon kiel denaskan kaj eble elektas tiun kun la plej alta statuso. Oni do estu singarda laborante kun datumoj de la reala mondo. En niaj ekzemploj ĉi tie, tamen, tiuj malprecizaĵoj ne tro gravas por la ĝenerala bildo. Niaj konkludoj do validas malgraŭ la statistikaj kaj observaj problemoj.

10.1. Faktoj

Fariĝante ano de la Eŭropa Unio, ĉiu lando rajtas proponi unu lingvon kiel oficialan. De la 28 membroŝtatoj antaŭ la brita ekŝigo nur kvar elektis ne kunporti lingvon: Aŭstrio, Belgio, Cipro kaj Luxemburgio. La Eŭropa Unio do havas 24 oficialajn lingvojn: angla, bulgara, ĉeĥa, dana, irlanda, estona, finna, franca, germana, greka, hispana, hungara, itala, kroata, latva, litova, malta, nederlanda, pola, portugala, rumana, sveda, slovaka kaj slovena. En la membroŝtatoj, tamen, multaj aliaj lingvoj estas parolataj, vidu tabelon 10.1, kiu baziĝas sur datumoj de antaŭ la membriĝo de Kroatio. En la kolumno de statuso «1» signifas, ke la lingvo havas oficialan statuson kaj «0», ke ĝi ne estas oficiala. Videblas ke ekzistas naŭ lingvoj kun pli granda parolantaro ol la plej malgranda oficiala lingvo. Kvar el ili estas tradiciaj aŭtoĥtonaj aŭ indiĝenaj lingvoj. Ĉu tio estas justa politiko?

Se ni akceptas kiel deirpunkton, ke ĉiu homo havu la saman rajton, certe ne estas justa situacio. Eĉ se ni akceptas la neceson fari kompromisojn pro kostkialoj, ne estas justa laŭ iu ajn filozofie bazigita kriterio. Oni povus argumenti, ke la ne-indiĝenaj etnoj ne havu la saman rajton kiel indiĝenaj kaj pro tio ne konsideri ilin, tamen tiu argumento ne uzeblas por la parolantoj de la kataluna, galega, eŭska kaj kimra. Koncerne la aliajn ne-oficialajn lingvojn, la interesa demando estas, kiam fariĝas minoritato ano de la «klubo», ĉu en la dua, ĉu en la tria generacio? Ĉu indas trakti turklingvan infanon naskiĝintan en Bruselo malsame ol germanparolantan infanon naskiĝinta samloke? La germana estas oficiala lingvo kaj de Belgio kaj de la Eŭropa Unio. La turka ne, sed en Belgio loĝas pli da denaskaj turklingvanoj ol denaskaj germanlingvanoj. La infanoj mem ne decidis pri la denaska lingvo.

Tabelo 10.1. Ĉefaj lingvoj laŭ denaskaj parolantoj en EU27, 2012, Eurostat (2012)

lingvo	statuso	denaskuloj		lingvo	statuso	denaskuloj	
		%	×10 ⁶			%	×10 ⁶
germana	1	15,7	78,5	finna	1	1,1	5,4
angla	1	12,9	64,5	slovaka	1	1,0	5,2
itala	1	12,5	62,6	kataluna	0	0,86	4,3
franca	1	12,1	60,4	litova	1	0,70	3,5
pola	1	8,2	40,8	turka	0	0,58	2,9
hispana	1	8,1	40,3	araba	0	0,51	2,55
rumana	1	4,6	23,0	galega	0	0,49	2,45
nederlanda	1	4,4	21,9	slovena	1	0,47	2,35
hungara	1	2,6	12,7	latva	1	0,31	1,55
ĉeĥa	1	2,3	11,4	eŭska	0	0,27	1,35
greka	1	2,3	11,2	estona	1	0,26	1,30
portugala	1	2,2	11,1	urdua+hindia	0	0,19	0,95
sveda	1	1,8	9,2	ĉina	0	0,10	0,50
bulgara	1	1,6	7,9	malta	1	0,09	0,45
dana	1	1,2	5,8	kimra	0	0,08	0,40
rusa	0	1,1	5,6	irlanda	1	0,07	0,35

Kompreneble la leĝoj de la Eŭropa Unio sekvas kolektivajn juran logikon, laŭ kiu ĉiu membroŝtato havu la samajn rajtojn kiel ĉiu alia membroŝtato. La malgranda Malto havas en multaj aferoj la samajn rajtojn kiel la multe pli granda Germanio. Civitano de Malto do estas multe pli grava en multaj EU-aferoj ol civitano de Germanio. Ekzistas tre bonaj kialoj por tiu strukturo, sed ĝi en multaj aferoj kondukas al absurdaj situacioj. Elekte de oficialaj lingvoj povas esti tia situacio.

Pro praktikaj kialoj ne eblas uzi ĉiujn 24 oficialajn lingvojn en ĉiu situacio. La oficialaj lingvoj estas difinitaj en la kontraktoj kaj uzeblas en la komunikado eksteren. La civitanoj de la Eŭropa Unio principe rajtas komuniki kun la institucioj kaj ricevi informojn en ĉiu oficiala lingvo. En aliaj internaj situacioj oni parolas pri laborlingvoj de specifaj EU-institucioj. Laborlingvo ne estas difinita en kontraktoj, sed ekzistas en la praktiko kaj uzeblas en komunikado ene de la institucioj. La praktiko estas tre klara: la Konsilio de ministroj uzas ĉiujn oficialajn lingvojn, sed la Eŭropa Komisiono nur la anglan, francan kaj – tre malofte – la germanan. En specialigitaj institucioj estas simile: la Buroo de patentoj uzas la anglan, francan kaj germanan, la EU-tribunalon

la francan kaj la Eŭropa centra banko nur la anglan. La parlamento uzas en plenaj kunsidoj ĉiujn oficialajn lingvojn. En komitatkunsidoj, tamen, la komitato mem elektas la laborlingvojn, normale unu, du aŭ tri de la lingvoj angla, franca kaj germana.

Se oni devas fari kompromison, la elekto de la plej grandaj lingvoj kiel laborlingvo estas senchava laŭ la efikeckriterio. Oni perdas egalecon, sed ankaŭ la kostoj malkreskas. Ne temas nur de senperaj kostoj, kiel tradukistoj, sed ankaŭ de nerektaj kostoj kiel longedaŭraj negocoj; sen la interpretado oni povas pli rapide kaj efike labori. Alia grava aspekto estas la memselektado. Franclingvano iras al komitato, kiu uzas la francan kaj germanlingvano al komitato, kiu uzas la germanan; tiel oni povas havi pli efikan laboron same kun homoj, kun kiuj oni povas senpere komuniki. Ni do ricevas efikan ekvilibron kun kelkaj komitatoj uzantaj la anglan, kelkaj la francan kaj kelkaj la germanan. La kondiĉo por la ekzisto de tia ekvilibro estas, ke ekzistas sufiĉe da kompetentuloj por ĉiu lingvo. Kiel ekzemplon imagu, ke ni havas 50 parlamentanojn por 10 komitatoj de 5 membroj. 10 individuoj regas la anglan kaj la francan, 5 la anglan kaj la germanan, 5 la germanan kaj la francan, 5 nur la germanan, 10 nur la francan kaj 15 nur la anglan. Tiu signifas, ke ni havu minimume unu komitaton en la germana, minimume du komitatojn en la franca kaj minimume 3 komitatojn en la angla. Ni ankaŭ povus havi du dulingvajn komitatojn en la angla kaj franca aŭ po unu komitato en la angla kaj germana kaj en la germana kaj franca. Se ni volas eviti la minimuman nombron ni povas starigi dek unulingvajn komitatojn distribuitajn lingve kiel: $(g, f, a) = (3, 3, 4), (2, 3, 5)$ aŭ $(2, 4, 4)$.

Tabelo 10.2. Ekskludokvotoj en EU24 laŭ oficialigo, Gazzola (2014) surbaze de Eŭrostat-enketo de 2007

oficialigo	E_p	E_r
ĉiuj 22 lingvoj	0,00	0,02
angla, franca, germana, hispana, itala, pola	0,12	0,25
angla	0,49	0,81

10.2. Distribuaj konsideroj

Por diskuti la distribuajn efektojn kaj kostojn de la lingvopolitiko de EU, ni prezentos kelkajn rezultojn de studoj de Gazzola (2014) kaj Fidrmuc kaj Ginsburgh (2007). La difino de justeco malantaŭ tiuj studoj estas kiun ni nomis normo kaj koncesio. Oni demandas, ĉu la civitanoj de la Eŭropa Unio *povas* komuniki kun la administrado de la EU aŭ ne. Oni ne konsideras la postulan flankon, ĉu oni *volas* komuniki kun Bruselo. Gazzola difinas du tipojn de ekskludokvotoj, la kvoto de plena ekskludo E_p , kiu estas la

proporcio da homoj en iu grupo, kiuj tute ne komprenas iun ajn de la oficialaj lingvoj, kaj la kvoto de relativa ekskludo E_r , kiu estas la proporcio da homoj en iu grupo, kiuj ne havas tre bonajn konojn de iu ajn de la oficialaj lingvoj. Li konsideras malsimilajn arojn de oficialaj lingvoj de EU. Ĉi tie ni rigardos la oficialigon de ĉiuj 22 lingvoj (pro manko de datumoj mankas la malta kaj irlanda lingvoj), la oficialigon de la ses plej grandaj lingvoj (germana, angla, itala, franca, pola kaj hispana) kaj la oficialigon de nur la angla. En tabelo 10.2 prezentiĝas la rezultoj surbaze de ĉiuj EUanoj krom irlandanoj, luksemburganoj, maltanoj kaj nederlandanoj, kiuj ne partoprenis en la enketo, el kiu venas la datumoj.

Tabelo 10.3. Ekskludokvotoj en EU24 laŭ oficialigo kaj eduka nivelo, Gazzola (2014)

oficialigo	E	eduka nivelo laŭ INKE-1997					averaĝe
		I	II	III	IV	V /VI	
angla, franca, germana, hispana, itala, pola	E_r	0,31	0,26	0,26	0,26	0,17	0,25
	E_p	0,22	0,17	0,13	0,10	0,03	0,12
angla	E_r	1,00	0,92	0,80	0,80	0,65	0,81
	E_p	0,93	0,71	0,49	0,33	0,19	0,49

Tabelo 10.4. Ekskludokvotoj en EU24 laŭ oficialigo kaj aĝo, Gazzola (2014)

oficialigo	E	aĝo				averaĝe
		55-64	45-54	35-44	25-34	
angla, franca, germana, hispana, itala, pola	E_r	0,25	0,24	0,23	0,26	0,25
	E_p	0,16	0,13	0,11	0,10	0,12
angla	E_r	0,82	0,82	0,79	0,79	0,81
	E_p	0,63	0,54	0,43	0,35	0,49

Ni vidas en la tabelo, ke en nur-angla EU pli ol 80 % de la eŭropaj civitanoj ne povas sur alta lingvonivelo senpere komuniki kun Bruselo, kaj por kompreni oficialajn tekstojn oni vere bezonas tian altan lingvokonon. Sed eĉ kaze de malalta lingvokono duono de la civitanoj estas ekskluditaj. Eĉ kun ses oficialaj lingvoj kvarono de la eŭropanoj ne havas la konon legi lingve altnivelajn tekstojn. En nur-angla reĝimo 15 landoj havas relativan ekskludokvoton de pli ol 90%: Bulgario, Ĉeĥio, Kroatio, Estonio, Francio, Grekio, Italio, Latvio, Litovio, Pollando, Portugalio, Rumanio, Slovakio, Hispanio kaj Hungario. Tiu reduktiĝas al 13 landoj en reĝimo kun tri oficialaj lingvoj (germana,

angla, franca): Bulgario, Ĉeĥio, Estonio, Grekio, Italio, Latvio, Litovio, Pollando, Portugalio, Rumanio, Slovakio, Hispanio, Hungario. Francio kaj Kroatio forlasus la grupon. Enkondukante la italan, polan kaj hispanan forprenus Italion, Pollandon, Grekion, Litovion, Hispanion kaj Portugalion de la grupo de pli ol 90 %-a ekskludo, lasante sep landojn kun ekskludokvoto de 90% aŭ pli. Ni povas konkludi, ke relative granda maljusteco inter lingvogrupoj ekeksistis se la nuna situacio ŝanĝiĝus.

Ni ankaŭ devas konscii, ke la prezentitaj rezultoj inkluzivas Brition kaj preskaŭ ĉiu brito regas la anglan je alta nivelo. Do, post la ekziĝo de Britio malaperas pli ol 60 milionoj da anglalingvanoj de la datumoj. Pro tio la postekziĝaj ekskludokvotoj estas pli altaj ol en la tabeloj ĉi tie.

Estas interese rigardi, ĉu aĝo aŭ edukado multe gravas por la ekskludokvotoj. En tabelo 10.3 la ekskludokvotoj laŭ eduka nivelo en la sistemo INKE (Internacia norma klasifikado de edukado) de Unesko en la versio de 1997 prezentiĝas. Kiel oni povas atendi, la ekskludokvotoj malkreskas kun pli alta eduknivelo en ambaŭ reĝimoj kaj surbaze de ambaŭ indikatoj. Tamen la plej granda ŝanĝo okazas kiam oni atingas la plej altan eduknivelon. Oni povas diri, ke ŝanĝo de la nuna politiko implikis redistribuadon al elito kun la plej alta edukado. Aliflanke, oni devas ankaŭ demandi, ĉu la postulo de komunikado kun Bruselo ankaŭ dependas de la eduka nivelo. La ekskludokvotoj laŭ aĝo prezentiĝas en tabelo 10.4. Ni vidas, ke la plena ekskludokvoto estas pli malgranda por la junuloj ol por la pli aĝaj homoj. Tiu certe respeguligas la kreskon de la instruado de fremdaj lingvoj (ĉefe de la angla) en eŭropaj lernejoj. La regado de fremdaj lingvoj je alta nivelo tamen apenaŭ varias laŭ la aĝgrupoj. La lernado ŝajne ne igas la lernantojn atingi altan lingvonivelon en la lernitaj lingvoj. Kaj por legi oficialajn dokumentojn tia kono ofte gravas. Do, ŝanĝo de la nuna politiko ne havus tro grandajn distribuajn efektojn tra la aĝgrupoj.

Tabelo 10.5. Popersonaj kostoj jare de la parolantoj de ĉiuj oficialaj lingvoj en EU25, Fidrmuc kaj Ginsburgh (2007)

lingvo	parolantoj $\times 10^6$	popersonaj kostoj EUR	mempago indas?
germana	90,1	0,6	jes
franca	64,5	0,9	jes
angla	62,3	0,9	jes
itala	57,6	1,0	jes
pola	38,6	1,4	jes
hispana	39,4	1,4	jes
nederlanda	21,9	2,5	ne
greka	11,3	4,9	ne
portugala	10,8	5,1	ne
ĉeĥa	10,3	5,3	ne
hungara	10,1	5,4	ne
sveda	8,9	6,2	ne
slovaka	5,4	10,2	ne
dana	5,3	10,4	ne
finna	5,1	10,8	ne
litova	3,6	15,3	ne
latva	2,4	22,9	ne
slovena	2,0	27,5	ne
estona	1,4	39,3	ne
malta	0,4	137,5	ne

10.3. Kostoj

Ni jam notis, ke kosto-utilo-analizo povus helpi decidi, ĉu politikero indas aŭ ne. La rektaj kostoj de la nuna politiko de la Eŭropa Unio facile kalkuleblas. Studis la kostojn inter aliaj Fidrmuc kaj Ginsburgh (2007). Ili trovis ke la tradukservoj en Bruselo en ĉiu lingvo kostas po 55 000 000 eŭroj jare. Tio signifas, ke la lingvopolitiko popersone averaĝe kostas EUR 2,30 jare. Tiu sumo venas de la buĝeto de EU. Kompreneble, se ni analizas la problemon por ĉiu lingvo, ni devas konsideri, kiom da parolantoj la variaj lingvoj havas. Tion ni prezentas en tabelo 10.5. La oficialigo de la germana kostas nur po 60 cendoj jare kaj persone. Fakte por la ses plej grandaj lingvoj la poparolantaj kostoj malsuperas la averaĝan koston de EUR 2,30. Do, reformo, laŭ kiu lingvoservo fariĝu interna afero de ĉiu membrolando, kaj tiel ĉiu lingvogrupo mem

organizu kaj pagu la kostojn de tradukado ktp., havus la subtenon de tiuj ses grandaj lingvogrupoj, ĉar ili ŝparus la averaĝan koston, kiun oni nun pagas, kaj pagus malpli por la mem organizata servo.

Tabelo 10.6. Ekskludokvotoj en EU25 kun la angla, franca kaj germana kiel oficialaj lingvoj kaj la jaraj kostoj laŭ profitanta persono de oficialigo de kroma lingvo aldona al la angla, franca kaj germana, Fidmuc kaj Ginsburgh (2007)

lingvo	parolantoj ×10 ⁶	ekskludatoj ×10 ⁶	kostoj laŭ profitanta persono de oficialigo EUR
germana	90,1	0	–
franca	64,5	0	–
angla	62,3	0	–
itala	57,6	27,1	2,0
pola	38,6	25,5	2,2
hispana	39,4	22,1	2,5
hungara	10,1	7,5	7,3
portugala	10,8	6,3	8,8
greka	11,3	5,7	9,7
ĉeĥa	10,3	5,5	10,0
slovaka	5,4	3,8	14,3
nederlanda	21,9	3,3	16,9
litova	3,6	2,5	21,7
finna	5,1	1,8	30,0
latva	2,4	1,6	34,2
sveda	8,9	1,6	34,3
estona	1,4	0,9	63,7
dana	5,3	0,9	64,9
slovena	2,0	0,5	102,2
malta	0,4	0,07	831,3

Ni povas demandi, ĉu la nuna lingvopolitiko estas efika. La tabelo provizas la kostojn de ĉiu lingvo. Efikeco signifus, ke la averaĝa pagpreteco popersonoj kaj jare en ĉiu lingvogrupo egalu aŭ superu la kostojn. Tio kompreneble estas empiria demando. Ni devas scii la pagpretecojn (Ginsburgh 2007) de la homoj por la oficialigo de iliaj lingvoj. Kun la escepto de Malto, la kostoj tamen estas tre modestaj. Kompare al normalaj salajroj la popersonaj kostoj por la malta estas malpli ol 1%, por la dana malpli ol 0,2% kaj por la itala malpli ol 0,04% de normala salajro.

Aliflanke oni povas diri, ke la nuna politiko estas redistribuado de la grandaj lingvogrupoj al la malgrandaj, do montras solidarecon inter la membroŝtatoj. Reformo al mempago pere de la membroŝtatoj igas la kostojn eksplicitaj, kaj ĉiu membroŝtato povas decidi, ĉu indas oficialigi sian ĉefan lingvon. Tiu estus kosto-utilo-kalkulado sur la nivelo de la membroŝtatoj, kaj la decidoj pri oficialigo fariĝas efikaj decidoj. Se kelkaj landoj decidus rezigni pri la oficialigo de siaj ĉefaj lingvoj, la nuna situacio ne estus efika. Ni povas diri, ke la nuna situacio estas kompromiso de efikeco por egaleco.

Se nur la komunika valoro gravas, ni povas koncentriĝi sur la homoj, kiuj ne regas aliajn oficialajn lingvojn. En tabelo 10.6 la esploristoj demandis, kiom kostas la aldono de iu lingvo dividita per la nombro da homoj, kiuj ne regas unu aŭ kelkajn de la lingvoj angla, germana aŭ franca. La nivelo de regado ĉi tie kuŝas ie inter la du niveloj de Gazzola. Ĉar iuj denaskaj parolantoj de aliaj lingvoj ol tiuj tri regas unu de ili sufiĉe bone, ne ĉiuj sentas sin bezoni la oficialigon de la propra denaska lingvo por komunikaj celoj. La popersonaj kostoj do estas pli altaj. Krom por la slovena kaj la malta la kostoj, tamen, estas relative malaltaj. Por la malta la jaraj kostoj estas pli malpli 5% de normala salajro. Por la dana nur 1‰, kaj por la itala 0,07‰ de normala salajro.

La datumoj montras, ke reformo al mempago nun malkaŝas ankaŭ eventualan kompromison enŝtate inter la regantoj de la angla, franca aŭ germana kaj la lingve ekskludataj. La registaro devus decidi, ĉu la popersonaj kostoj en tabelo 10.5 indas pagi, kiam profitas de tiu pago nur – en kelkaj landoj – relative malgranda proporcio de la loĝantaro. La nuna situacio montras internacian solidarecon reduktante la kostojn de lingvorajtoj al popersone EUR 2,30 jare por ĉiuj civitanoj de la Eŭropa Unio. Reformo al mempago forprenus tiun solidarecon, kaj ĉiu membroŝtato devus popersone kaj jare pagi la sumojn en tabelo 10.5. Por la membroŝtatoj tiam estiĝas nove konsidero. Oni devas decidi, ĉu indas enlanda solidareco kaj redistribuo de la homoj, kiuj regas unun de la tri grandaj lingvoj al tiuj, kiuj estus ekskludataj, kompreneble supozante, ke lingvo nur gravas kiel komunikilo.

10.4. Kiom kostas lingvoreĝimo?

Estas facile kompreni, ke la anglalingvaj ŝtatoj tre profitas de la preskaŭ ununura uzo de la angla lingvo en EU-institucioj kaj de la granda proporcio de interŝtataj rilatoj realigataj pere de la angla. Grin (2005) faris unuan paŝon por taksi tiun avantaĝon kaj alvenas al miliarda sumo da eŭroj. Li ĉefe laksas la lernokostojn de fremdaj lingvoj en la variaj landoj, kiuj en anglalingvaj landoj pro la internacia uzo de la angla estas tre malgrandaj kompare al aliaj landoj. Li komparas la situacion, en kiu la angla estas la lingvo de internacia komuniado kun situacio, en kiu esperanto ricevas tiun rolon. Pro la relativa facileco lerni esperanton kompare al aliaj fremdlingvoj, kiel la anglan, germanan aŭ francan, la lernokostoj en la esperantokazo estas pli malaltaj, kaj li povas konkludi, ke la enkonduko de esperanto en eŭropaj lernejoj povas ŝpari al la membroŝtatoj de la Eŭropa Unio miliardojn da eŭroj, se ĝi ricevas la rolon de la

angla hodiaŭ. Krome la situacio fariĝus multe pli justa pro la pli egaleca distribuoj de la komunikokostoj; la ne-anglalingvaj landoj gajnus kaj la anglalingvaj landoj perdis.

Ĉar Grin nur konsideras unu aspekton de la problemoj, la sumoj, kiujn li trovas, estas tre malprecizaj, pri kiu li konscias kaj kion li mencias. Komprenibile oni povas fari ekonomikan analizon de la avantaĝoj de Britio kaj aliaj anglalingvaj landoj pro la tutmonda uzo de la angla lingvo. En tia analizo oni devas konsideri la implikojn sur la ekonomioj de la landoj. Se ekzemple la eksporta sektoro de Britio senpere profitas pro la tutmondiĝo de la angla, ĉar la postulo en tiu sektoro pligrandiĝas kaj sekve la prezoj de la produktataj bonoj kreskas, pro tio ankaŭ la postulo de laboro (kaj kapitalo) kreskas, plialtigante la salajrojn en la eksporta sektoro.

Tamen en alia sektoro, ekzemple la servindustrio, la postulo eble ne tro dependas de la lingvo. Tie do la prezoj unue ne ŝanĝiĝas pro la senpera efiko de la tutmondiĝo. Tamen pro la relativa ŝanĝo de prezoj inter la du sektoroj la enlanda postulo de bonoj de tiu sektoro kreskas relative la postulon de bonoj el la eksporta industrio. Tio, en dua paŝo, pro la plialtigita postulo efikas sur la salajroj en la servosektoro, kiuj kreskas kaj pro la reduktita postulo en la eksporta industrio, tie reduktiĝas la salajroj.

Ni do havas du efektojn sur la salajroj, unu senperan, kiu kreskigas la salajrojn, pro la kreskanta postulo de eksterlando kaj unu nerektan, kiu malkreskigas la salajron, pro la ŝanĝo de postulo enlande de la eksporta industrio al la servindustrio.

La relativa grandeco de tiuj du efektoj dependas de la produktadteĥnologio de la du industrioj, ĉefe de la relativa graveco de la faktoroj de produktado (laboro kaj kapitalo) kaj de la relativa grandeco de la du sektoroj. Estas tre facile montri ke la efiko povas iri en ambaŭ direktoj, vidu Harberger (1962). Do povas esti ke la britaj (kaj usonaj) laboristoj nete perdas pro la tutmondiĝo de la angla lingvo pro pli malgrandaj salajroj, kaj la kapitalistoj, kiuj ne necese troviĝas en la lando, profitas. Sed ankaŭ la malo eblas. Nur empiriaj studoj povas doni klarecon.

11. Por scii pli

Ĉi tie aldoniĝas kelkaj literatureroj, kiuj etendas la diskutojn en la teksto. Ĝenerala bibliografio pri lingvoekonomiko oni trovas en Gazzola, Grin kaj Wickström (2016) kaj diskuto pri lingvopolitiko el ekonomia vidpunkto en Wickström kaj Gazzola (2024). Pri la formortado de lingvoj pro tutmondiĝo vi trovas pli detalan analizon en Nettle (1999) kaj ĝeneralan diskuton de tiaj modeloj en Templin kaj Wickström (2024).

La labormerkato en Kimrio studis Drinkwater kaj O'Leary (1997) kaj en Katalunio Rendon (2007). Analizo de la influo de lingvo sur komerco en 81 landoj estas priskribita en Egger kaj Lassmann (2012). Por studoj de la labormerkato vidu Dustmann (1994).

Motivado por la bezono de la lingvopolitiko, diskutata en Parto II, vi trovas en Wickström, Gazzola kaj Templin (2018a), kiuj en tre facila kadro diskutas la limojn de la libera merkato kiel provizanto de lingvorilataj bonoj. Facila diskuto de la kostos-

trukturoj troviĝas en Wickström, Gazzola kaj Templin (2018b). Por la procenta regulo vidu ankaŭ Wickström (2019). Por ĝenerala kritiko de ne-optimuma lingvopolitiko vidu Wickström (2020), kie ni montras pere de ekzemploj de Slovakio kaj Rumanio, kiel la uzu de la procenta regulo kaj la determino de landlimoj povas konduki al ne-optimumaj rezultoj.

Bibliografio

- Chiswick, Barry R. kaj Paul W. Miller 1992: Language in the immigrant labor market. En: *Immigration, language and ethnicity, Canada and the United States*. Eldonis Barry R. Chiswick. Washington DC: American Enterprise Institute (AEI) Press: 229–296. [Re-presita en: Barry R. Chiswick kaj Paul W. Miller, eldonistoj. *The economics of language: International analyses*. New York: Routledge, 2007.]
- Drinkwater, Stephen J. kaj Nigel C. O’Leary 1997: Unemployment in Wales: Does language matter? En: *Regional Studies* 31: 583–591.
- Dustmann, Christian 1994: Speaking fluency, writing fluency and earnings of migrants. En: *Journal of Population Economics* 7: 133–156.
- Egger, Peter H. kaj Andrea Lassmann 2012: The language effect in international trade: A meta-analysis. En: *Economics Letters* 116.2: 221–224.
- Eurostat 2012: *Languageknowledge.eu*. URL: <http://languageknowledge.eu/countries/eu27> (vizitita 2021-03-14).
- Fidrmuc, Jan kaj Victor A. Ginsburgh 2007: Languages in the European Union: The quest for equality and its cost. En: *European Economic Review* 51: 1351–1369.
- Gazzola, Michele 2014: *Language policy and linguistic justice in the European Union: The socio-economic effects of multilingualism*. Technical report 15. Genève: Université de Genève, Observatoire économie langues formation.
- Gazzola, Michele, François Grin kaj Bengt-Arne Wickström 2016: A concise bibliography of language economics. En: *The economics of language policy*. Eldonis Michele Gazzola kaj Bengt-Arne Wickström. Cambridge: MIT Press. Ĉapitro 2: 53–92.
- Ginsburgh, Victor A. kaj Juan Prieto-Rodriguez 2011: Returns to foreign languages of native workers in the EU. En: *Industrial and Labor Relations Review* 64.3: 599–618.
- Grin, François 2005: *L’enseignement des langues étrangères comme politique publique*. Paris: Haut Conseil de l’évaluation de l’école. [Tradukita kiel: François Grin. *L’insegnamento delle lingue straniere come politica pubblica*. Roma: “Esperanto” Radikala Asocio, 2009.]
- Harberger, Arnold C. 1962: The incidence of the corporation income tax. En: *Journal of Political Economy* 70.3: 215–240.
- Institutul national de statistică 2011: *Recensământul populației și al locuințelor. Volumul II: Populația stabilă (rezidentă) – structura etnică și confesională*. Technical report. București: Institutul national de statistică.
- Liwiński, Jacek 2019: The wage premium from foreign language skills. En: *Empirica* 46.4: 691–711.
- Nettle, Daniel 1999: *Linguistic diversity*. Oxford: Oxford University Press.
- Rendon, Silvio 2007: The Catalan premium: Language and employment in Catalonia. En: *Journal of Population Economics* 20: 669–686.

- Štatistický úrad Slovenskej republiky 2011: *Sčítanie obyvateľov, domov a bytov 2011*. Bratislava: Štatistický úrad Slovenskej republiky.
- Templin, Torsten kaj Bengt-Arne Wickström 2024: Language competition models. En: *The Routledge handbook of language policy and planning*. Eldonis Michele Gazzola, François Grin, Linda Cardinal kaj Kathleen Heugh. Abingdon: Routledge. Ĉapitro 3: 66–86.
- Wickström, Bengt-Arne 2019: The percentage rule for minority-language rights: Inadequate or discriminatory. En: *Język, Komunikacja, Informacja* 14: 72–84.
- 2020: On the political economy of minority rights. Three ways to manipulate a minority: Goals, rules, and border poles. En: *European Journal of Political Economy* 64: 101894 (16 sidor).
- 2021: Dynamics, costs and the survival of minorities: Optimal language policies for increasing the vitality of minority languages. En: *Minorités linguistiques et société / Linguistic Minorities and Society* 17: 221–239.
- Wickström, Bengt-Arne kaj Michele Gazzola 2024: The economics of language policy and planning. En: *The Routledge handbook of language policy and planning*. Eldonis Michele Gazzola, François Grin, Linda Cardinal & Kathleen Heugh. Abingdon: Routledge. Ĉapitro 10: 158–171.
- Wickström, Bengt-Arne, Michele Gazzola kaj Torsten Templin 2018a: Can the ‘free market’ manage language diversity? En: *The MIME vademecum: Mobility and inclusion in multilingual Europe*. Eldonis François Grin, Manuel Célio Conceição, Peter A. Kraus, László Marác, Žaneta Ozoliņa, Nike K. Pokorn kaj Anthony Pym. Geneva: MIME Project. Ĉapitro 3: 34–35.
- 2018b: Do costs matter in language policy? En: *The MIME vademecum: Mobility and inclusion in multilingual Europe*. Eldonis François Grin, Manuel Célio Conceição, Peter A. Kraus, László Marác, Žaneta Ozoliņa, Nike K. Pokorn kaj Anthony Pym. Geneva: MIME Project. Ĉapitro 11: 50–51.
- Zamenhof, Ludwik L. 1913: Deklaracio pri homaranismo. En: *Homaro*. Volumo 1. Madrid: Julio Mangada Rosenörn: 4–12.

Demandoj kaj diskuttemoj

- 1) Ekonomika teorio implikas, ke homoj investas en homan kapitalon, ekzemple lernante lingvojn, se por tio la salajro kreskas. Tiu procezo finiĝas, kiam la instigo malaperas, kaj ekvilibro kun ekvilibra salajro estiĝas. Kiujn premiojn vi atendas por konoj de la rusa relative al konoj de la itala en ekvilibro en Slovakio? En Hispanio? En Ĉinio?
- 2) Komparu la uzon de la eŭska lingvo en Francio kaj Hispanio dum la lastaj 30 jaroj. Ekspliku la malsimilaĵojn.
- 3) En lando *X* loĝas granda minoritato parolante lingvon *Y*. La registaro diskutas la lingvorajtojn de la *Y*-lingvanoj. Ĉu oni forte asimilu ilin kaj malpermesu lernejojn en *Y* aŭ ĉu oni forte subtenu la minoritatan kulturon kaj lernejojn en *Y*? Donu argumentojn por ambaŭ flankoj. Ĉu viaj argumentoj dependas de la tipo de minoritato: izolata sen samlingvanoj ie ajn, *Y* estas ĉefa lingvo de najbara lando?

- 4) Kiuj de la sekvaj aferoj laŭ vi apartenas al la individua merkata sfero kaj kiuj al la kolektiva publika sfero: interreta radioprogramo en minoritata lingvo; stratŝildoj en minoritata lingvo; tradukado de la ĉefaj leĝoj en minoritatan lingvon; lingvoinstruado de la malnovgreka por homoj, kiuj ŝatas legi Platonon en la originala lingvo; infanvartejoj en minoritata lingvo; provizo de lernejoj studplanoj kaj studmaterialoj en minoritata lingvo; lernejoj en minoritata lingvo; germana lingvokurso por eksterlandaj vizitantoj al la festivalo de Salzburgo; germana lingvokurso por novaj eksterlandaj profesoroj de la universitato de Munkeno? Ekspliku la kialojn en ĉiu kazo.
- 5) (a) Kiun tipon de kostoj kaŭzas la sekvaj politikeroj: telefona vokocentro en minoritata lingvo, kie oni povas informiĝi pri la impostoŝuldoj; hejma flegado en via preferata lingvo; eldono de ĉiuj leĝotekstoj de la lando en minoritata lingvo?
(b) Iu lando havas du minoritatojn de simila grandeco, unu loĝas tre koncentrite en unu urbo, la alia estas pli malpli egale distribuita tra la tuta lando. Se vi havas fiksitan buĝeton por la lingvopolitiko, po la sama sumo por ambaŭ minoritato, kiel vi dividus ĉiun de la du buĝetoj sur la tri politikeroj.
- 6) En Germanio loĝas pli malpli 60 000 soraboj, kiuj ĝuas certajn oficiale agnoskitajn rajtojn por sia lingvo kaj kulturo. En Germanio ankaŭ loĝas pli malpli 1,5 milionoj da etnaj turkoj kun germana civitaneco kaj la sama nombro sen germana civitaneco. Ne ekzistas oficiale agnoskitaj rajtoj por ili (kelkaj oficialaj informoj, tamen, ekzistas en la turka). Ĉu tio estas justa?
- 7) Komparu la lingvopolitikon de la Eŭropa Unio kun tiu de Barato. Ĉu estas similaĵoj, ĉu malsimilaĵoj? Ĉu justeco gravas?
- 8) Al kiu kategorio de lingva justeco apartenas la sekvaj fenomenoj: rajto komuniki kun la registaro en via preferata lingvo; malpermeso paroli vian denaskan lingvon en la ĉirkaŭaĵo de via lernejo; la rajton havi tradukiston en tribunalo, se vi ne bone komprenas la ĉeflingvon de via lando; dekreto, ke ĉiuj publikaj ŝildoj havu tekston en la ĉefa lingvo de la lando en pli grandaj literoj ol teksto en eventuala alia lingvo sur la ŝildo; devo eduki viajn infanojn en lernejo uzanta la ĉefan lingvon de la lando; provizo de lernejoj kaj teatroj en historia minoritata lingvo sendepende de la grandeco de la minoritato; provizo de lernejoj kaj teatroj en historia minoritata lingvo se ĝia grandeco superas certan nombron da parolantoj?
- 9) En la diskuto pri la distribua flanko de la lingvopolitiko de EU ni koncentriĝis sur la «oferta» flanko, en kiu lingvo vi rajtas komuniki. Diskuti, kiel aspektas la postula flanko depende de nacieco, edukado aŭ enspezoj. Al kiu plej valoras la rajto senpere komuniki kun Bruselo?
- 10) Serĉu oficialan juran EU-dokumenton de la kolekto *EUR-Lex* en fremda lingvo, kiun vi regas por ĉiutagaj aferoj kiel peti kaj doni informojn kiel trovi adreson en urbo aŭ per kiu vi povas mendi en restoracio aŭ diskuti viajn planojn por la somero, kaj faru resumon en via denaska lingvo. Poste komparu vian resumon kun la oficiala teksto en via gepatra lingvo (se ĝi estas EU-lingvo). Ĉu vi ĉion bone komprenis? Refaru la samon en fremda lingvo, kiun vi tre bone regas.

- 11) Kiom vi pretas pagi por la oficialigo de via lingvo en la Eŭropa Unio? Ĉu tio estas ĉefe determinita per la emocia valoro kaj la statuso, kiun donas la oficialigo, aŭ nur per la komunika valoro de la lingvo, kiu por vi faciligas la legadon de dokumentoj kaj la kontaktojn kun Bruselo?
- 12) Kompletigu tabelon 10.5 por la neoficialaj lingvoj en tabelo 10.1.

Bengt-Arne WICKSTRÖM (1948 –) estas ekonomikisto. Naskiĝinte en Svedio en 1948 li studis kaj doktoriĝis en Usono. Post la doktoriĝo li instruis universitatnivele en Usono kaj Norvegio, kie li fariĝis katedra profesoro ĉe la universitato de Bergen. Poste li ricevis katedrojn en Linz, Aŭstrio, kaj ĉe Humboldt-universitato en Berlino, de kiu li emeritiĝis en 2013. Ekde 2013 li estas gastprofesoro ĉe Andrassy-universitato en Budapeŝto, Hungario. Li ankaŭ instruis ĉe universitatoj en Francio, Kubo, Italio, Ĉinio kaj Rumanio. Liaj esplorkomunikaĵoj temas ĉefe pri la rolo kaj funkcio de la publika sektoro iom fokusante sur justeco kaj distribuo. Dum la lastaj dek jaroj li aplikis tion al lingvopolitiko.

bengt-arne.wickstroem@andrassyuni.hu.

Specifeco de reta komunikado kaj ĝentileco en ĝi

Resumo

La titolo mem de la eseo ŝajnas esti kunmetaĵo de enigmoj: kio estas ĝentileco, kio estas komunikado, kio pli precize estas reta komunikado kaj kial ĝi havus malsaman karakteron rilate ĝentilecon, ol havas la nereta? Ni ĉi-sube provos laŭvice elvolvi la koncernajn fadenojn kun aparta fokuso al la historia disvolviĝo de la aferoj.

1. Komunikado?

Ni komencu de „komunikado”, kiu eble ne metas tro komplikajn problemojn, se resti ĉe la surfaco de la aferoj. Ja eblas skize diri, ke temas pri la ago de persono transdonanta pensojn al alia(j) persono(j), sendepende de la uzata kanalo, sed en tia maniero, ke ĉiuokaze la celatoj povu interpreti (ĝuste aŭ mise) la transdonatajn pensojn surbaze de komuna kodo.

Ŝajnas, ke pro nia ĉefa atento al ĝentileco ni ĉi-esee povas limigi nin al komunikado *lingva*. Certe eblas uzi nelingvajn signojn pro ĝentilecaj kialoj (ekz. ridetoj, tusetoj, grimacoj, humilaj rigardoj...), kaj takso de ies ĝentileco ofte baziĝas, almenaŭ senkonscie, sur arbitra interpreto de la nelingva komunikado de tiu persono. Tamen se ni interesiĝus pri la ĝentileco de nelingva komunikado, des pli se reta, ni komencus tuŝi kampon, en kiu racieco estas duaorda infinitezimo, pri kio malfacilus diri ion sencohavan.

2. Ĝentileco?

Ĝentileco estas afero multe pli komplika por kompreni, ol komunikado. De *Vortaro de Esperanto* (Kabe) ĝis nova *Plena Ilustrita Vortaro* ne multe evoluis la difinoj, provantaj komprenigi, kia estu ago aŭ persono ĝentila. Ĉiam temas pri obeado al iuj misteraj reguloj pri „konveneco” aŭ „socia deco”, alidire observado de „la bonaj manieroj”... Ne multe pli instrua estas konsultado de franclingvaj vortaroj, kiuj aldone ludas per la multaj sinonimoj (*politesse, bienséance, urbanité, civilité, correction, savoir-vivre, convenances, usages, bonnes manières...*) por lerte produkti cirklaajn difinojn.

Malantaŭ tiu ĉi nebulo tamen restas la intuicia kompreno, ke en difinita socio ekzistas iaj kondutreguloj, eble ne identaj por ĉiuj, sed almenaŭ devigaj por ĉiuj. La fina celo, se oni povas ĝin kompreni, ŝajnas esti, ke ĉar la konduto de unu povas vekti malkontenton de alia, devas ekzisti korpuso (kolekto) da kondutreguloj por certigi, ke se oni laŭ ĝi kondutas, la alia ne havos moralan rajton malkontenti.

Parolante pri kondutreguloj povus unuavide aspekti, ke ĝentileco estas nenio alia, ol respekto de iu subaro de la jura korpuso. Tute ne. Ne estas la celo de ĉi tiu eseo profundigi en la analizon de la diferencoj inter jenaj du korpusoj da kondutreguloj, sed indas substreki, ke la reguloj de ĝentileco, kvankam ili estas sentitaj kiel formalaj, fakte nenie estas plene kaj sendispute eksplicitaj, do ke ĉiu individuo posedas sian subjektivan regularon, kiun li aplikas al si kaj al la aliaj laŭ sia bontrovo. Tre malsamaj estas ankaŭ la manieroj „puni” malobservadon de la regulo: se juro tre pedante priskribas la punojn, kaj zorgas pri proporcieco inter la puno kaj la delikto, ĝentileco nur lasas ŝvebi la minacon, ke al malĝentilulo la „viktimo”, aŭ eĉ la tuta grupo rajtas apliki reciprokajn malĝentilaĵojn, neprecizigante ilian gradon, kio fojfoje kondukas al ekstermezuraj punoj, kiel psikologia molestado aŭ socia ekskludo.

Sekve ĝentileco, kvankam ĝi estas evidenta faktoro de socia stabileco pro la impreso de reciproka sindevigo, tamen pro sia arĥaikeco kaj neracieco, povas aplikigi nur al la plej sensignifaj elementoj de homa interago, sed restas facile misuzebla por fortikigi la arbitron de potenculoj.

Metinte sur la tablon tiujn gravajn dubojn, ni tamen supozu, ke ekzistas iu korpuso da kondutreguloj, al kiu obeas ĉiuj ĝentiluloj de difinita homgrupo. Necesas ja precizigi „de difinita homgrupo”, ĉar neniu atendas, ke la korpuso estu universala. Ĝi evidente varias laŭ la lando, la socia tavolo, la reganta ideologio, la epoko...

Cetere, ĉar ni metas al ni la demandon paroli pri ĝentileco en komunikado, necesas reliefigi, ke la reguloj kutime koncernas apartan situacion, kaj ke malsama takso de la situacio fare de la ĉeestantoj povas konduki al malagrablajoj. Ekzemple kiam viro eniras lifton, en kiu jam staras nekonata virino, la virino povas senti ĝenon pro timo pri seksa agreso, do preferas bildigi al si situacion de komunikado, kaj komencas alparoli la nekonaton per banalaĵoj, kio povas igi lin, siavice, senti sin agresata de malĝentilulino, kiu ne kapablas respekti lian trankvilon en situacio de – laŭ li – tute hazarda kunesto.

Konsiderante la kulturalan relativecon de ĝentileco, oni povas suspekti, ke des malpli en Esperantujo ekzistas firmaj ĝentilecaj reguloj. Fakte, en multaj situacioj, povas sufiĉi la hilelisma principo: „kio al vi ne estas agrabla, ja tion ne faru al homo alia”. Sed pli verŝajnas, ke en internaciaj E-aranĝoj la homoj aplikas al si mem la proprajn kondutregulojn, do agas kun alikulturanoj, kiel ili agas kun respektataj samkulturanoj, kaj pli volonte, ol kun samkulturanoj, „malŝaltas” la ĝentilecan interpretadon de la konduto de aliaj homoj.

3. Reta komunikado?

Ekde la fino de la antaŭa jarcento la Interreto (mallonge: la reto) fariĝis pli kaj pli populara komunikilo. Indas do esplori, kiamaniere tiu teĥniko povis impulsi tiel profundan socian ŝanĝon, kaj kiamaniere la perreta komunikado diferencas de la senpera aŭ de la ali-perila: kiuj estas do ĝiaj specifaĵoj?

La reto estas universala perilo de tuja komunikado

Proksima komunikado: tuja kaj senperila

Se ekestas bezono pri *tuja* komunikado inter homoj proksimaj unuj al la aliaj, ili povas tion fari sen ajna teĥnika perilo, nur per uzo de la naturaj sentumoj kaj de la kapablo, kiun posedas ĉiu homo, vortigi siajn ideojn kaj kompreni la ideojn de aliaj pere de la lingvo.

Komunikado eksterlingva, kiel sciante, uzas ĉiujn sentumojn (Koutny 1998), sed la lingvo mem disponas pri kelkaj naturaj (neteĥnikaj) periloj, postulantaj specifajn kapablojn de la produktanto kaj de la ricevanto. La plej baza el tiaj periloj estas la voĉo, produktata de la parolorganoj kaj postulanta aŭdkapablon de la ricevanto. Oni ofte citas la kuriozan ekzemplon de *silbo Gomer*, t.e. la kutimo, iam uzata en Kanariaj Insuloj, fajfi la vortojn¹, kiam la granda distanco inter ambaŭ komunikantoj malhelpis uzadon de voĉo. Aldone, la lingvaj unuoj oni povas direkti ne nur al la aŭdkapablo, sed ankaŭ al la vid- kaj tuŝ-kapabloj, ofte per desegnaĵo aŭ ĉizaĵo sur ia surfaco (skribo²), aŭ per nura gestado (signolingvoj³).

Distanca komunikado: bezono je teĥnika perilo kaj perdo de tujeco

Kiam la spaca aŭ tempa distanco inter la komunikantoj igas neeble la senperan uzon de sentumoj, oni devas uzi teĥnikan perilon. De historia vidpunkto, uzo de teĥnika perilo neprigis perdon de tujeco en komunikado. Tiu aserto estas evidenta, se temas pri tempa distanco (ekz., se iu deziras komuniki ion al foraj posteuloj), sed por spaca distanco necesas iom pravigi ĝin.

Efektive, de longe ekzistas rimedoj de **telekomunikado** (distanca komunikado) per vide aŭ aŭde tuj percepteblaj signaloj (ekz. la fumsignaloj de romianoj kaj nordamerikaj indiĝenoj, la afrika tamtamo ks). Same la aera telegrafo de inĝ. Chappe ebligis jam en la epoko de Franca Revolucio transdoni mesaĝon de unu angulo de la lando al

¹ Fakte, nur ties vokalojn.

² Pro tio, ke skribo plejofte uzas materian portilon (paperon, sablon, ŝtonon...), diskutebblas, ĉu ni pravus prezenti ĝin kiel specon de lingva tuja komunikado „sen teĥnika perilo”. Estas konate, ke Ĉinoj el diversaj dialektoj foje komunikas desegnante per fingro ideogramojn sur la manplato. Fakte skribo estas same uzebla en tuja kiel en netuja komunikado, kio igas ĝin limokazo. La samon eblas diri pri brajlo, skribo por blinduloj, kvankam ĝi preskaŭ ĉiam estas uzata kun materia portilo.

³ Signolingvojn, kiel tiuj de surdmutuloj aŭ nordamerikaj indiĝenoj, oni povas konsideri kiel skribojn kun nemateria portilo. Ili ofte direktiĝas al la vid-kapablo, sed ekzistas ankaŭ tuŝ-signolingvoj, per kiuj surd-blinduloj komunikas inter si (Schwartz 2004).

alia en la daŭro de kelkdek minutoj. Ankaŭ kuriero, rajdanta ĉevalon aŭ motorciklon, ebligis relative rapidan transdonon de mesaĝoj, sed en ĉiuj ĉi okazoj ne temas pri tuja komunikado, ĉar la relativa malrapideco de la perilo igis ĝin maltaŭga por peri veran konversacion. Eĉ poste, kiam estis elpensitaj telegrafioj pli rapidaj, ĉar bazitaj sur elektro, la fakto mem, ke necesis uzi la servojn de profesia peranto por komuniki, igis la tujecon de komunikado neplena (se ne paroli pri ĝia konfidenceco, kio estas alia studkampo).

Telefono: tehniko perata, kaj tamen tuja

Kiel turnopunkton eblas konsideri la aperon de telefonio. Ja telefono transportas la voĉon pli rapide ol son-ondoj mem, kaj la profesia peranto servas nur por mastrumi la konekton, iĝante tute travidebla dum la komunikada procezo. Ĉi tiun kapablon peri tujan ambaŭdirektan komunikadon longe restis unikaĵo de telefonio. Efektive, la aliaj popularaj komunikiloj de la dudeka jarcento plejparte celis plirapidigi la poŝtan sistemon: poŝta telegrafio, telekso kaj fakso ebligis tre rapide transporti skriban mesaĝon de unu loko al alia, sed pro la deviga peranto, la skriba formo aŭ la kostoj ili ne kreis situacion de tuja komunikado. De alia flanko radiofonio kaj televido ja ebligis tujan komunikadon, sed nur unudirektan.

Ekesto de la Interreto

La Interreto aperis en Usono en la jaroj 1960-1970-aj. Unue ĝi servis al universitataj kaj registaraj instancoj por interŝanĝi poŝton kaj komputilajn dosierojn. Sufiĉe frue, kun apero de komputilaj retoj, ekestis ankaŭ ebloj pri tuja skriba komunikado inter la uzantoj de konektitaj komputiloj (*tujmesaĝado*). Tio unue koncernis malgrandan nombron da privilegiuloj, sed baldaŭ disvastiĝis al larĝa publiko, kiel ekz. en Francujo kun la sukceso de „minitelo”⁴.

Vera eksplodo de la Interreto sekvis ĝian disponigon al la vasta publiko en la jaroj 1990-aj. Al la originaj servoj (poŝto, dosiersendado) aldoniĝis servoj de diskutgrupoj (unue per speciala sistemo *Usenet*), Tut-Tera Teksaĵo (TTT), t.e. hiperteksta sistemo, uzebla ankaŭ kiel universala fasado por ĉiuj aliaj servoj, kaj laste servoj de tuja mesaĝado (*Skype, Whatsapp, Telegram* ks), ebligantaj tujan komunikadon skriban, parolan kaj eĉ vidan. Dum la dek lastaj jaroj tre disvolviĝis novaj babilejaj servoj (*Twitter, Facebook, Instagram...*), kiuj uzas specifajn programojn, plumpe nomitajn „aplikojoj” aŭ eĉ „apoj”, aŭ estas alireblaj pere de TTT kaj ne nur anstataŭis la malnovajn babilejajn servojn, sed alportis al la reto tute novan klientaron.

Aldone, se temas pri unudirekta komunikado, rimarkindas, ke TTT kaj specialaj plurmediaj legiloj ebligas aŭdi radion kaj spekti televidajn programojn.

⁴ La vorto *Minitel* montras kaj la terminalon (senpage provizita komputileto kun ekrano, klavaro kaj modemo, konektebla al la telefona reto), kaj la komunikosistemon. Per minitelo eblis konsulti informojn liveratajn de iuj serviloj (simile al la nuna TTT), krei leterkeston ĉe iu servilo kaj tie legi kaj sendi retpoŝtaĵojn, sed ankaŭ dialogi skribe kun homoj samtempe konektitaj al la sama servilo. La konektoj estis pagataj laŭ ilia daŭro kaj la pago estis dividata inter la retprovizanto kaj la servoprovizanto. Ŝlosila por la sukceso de tiu sistemo evidentiĝis la vasta gamo da sekse orientitaj servoj.

Indas rimarki, ke la Interreto ne restis izolita kaj disponas pri rimedoj por interagi kun la „malnova” telefonsistemo. Danke al specialaj kluzoj eblas ekz. telefoni per *Skype*, do rete, al persono havanta nur tradician telefonaparaton; eblas ricevi retroŝte faksajojn direktitajn al speciala telefonnumero, aŭ voĉajn mesaĝojn lasitajn de iu korespondanto ĉe virtuala telefona registriilo; eblas ankaŭ peti de iuj serviloj, ke ili faksu elektronikan dokumenton al difinita telefonnumero, aŭ sendu tujmesaĝon al difinita poŝtelefono ktp. En la komenco tiuj iom neordinaraj servoj estis kutime liverataj nek de la retroprovizanto, nek de la telefonprovizanto. Sed kelkaj jaroj poste, ĉiuj retroprovizantoj komencis disponigi al siaj klientoj specialan terminalon (anglalingve *box „skatolo”*), ebligantan konekti al la reto telefonaparaton kaj televidilon⁵.

La reto kiel universala perilo de tuja komunikado

Konklude, ni vidis, ke ĉiuj antaŭaj rimedoj de telekomunikado estas nun realigeblaj de la Interreto, kondiĉe nur, ke oni disponu pri taŭga ekipaĵo (komputilo, saĝtelefono, „skatolo”...) provizita per taŭga programaro. Leteron oni antaŭe devis sendi per poŝta kompanio, fakso aŭ telekso; oni nun povas plej oportune uzi retroŝton, aŭ retan faksan servon, se la ricevonto ne havas retaliron. Telefonan konversacion oni antaŭe povis havi nur pere de la telefonsistemo; nun abundas la manieroj babilu voĉe sur la reto, eĉ per uzo de preskaŭ tradiciaj telefon-aparatoj. Al tiu eblo aldoniĝas la eblo ankaŭ vidi la korespondanton, kiu eblo jam ekzistis en malnovaj sistemoj de *videotelefonio*, tamen neniam vere populariĝintaj. Kaj fine ni memoru pri tujmesaĝado, kiu apenaŭ ekzistis antaŭ la reto⁶.

Entute la reto aperas kiel kanalo, tra kiu povas flui ĉiuj naturaj periloj de komunikado: voĉo, skriboj de ajnaj skribsistemoj, inkluzive de brajlo kaj gestolingvoj, bildoj ktp⁷. Tra ĝi aŭ kunlabore kun ĝi povas flui eĉ la signaloj de la malnovaj teĥnikaj periloj, kio pravigas ĝian famon de universala perilo de signaloj.

Aldone al tiu universaleco, alia specifa eco de la reto estas, ke pro la rapidega transigo de informoj per ĝi preskaŭ ĉiuj el la supre cititaj servoj ebligas tujan komunikadon. Eĉ retroŝto fakte, kvankam ĝi ne estis kreita tiucele, ebligas tablotenisecajn interŝanĝojn tre similajn al tujmesaĝado. Estas klare, kial oni ne povas tablotenisece komuniki per tradicia „helika” poŝto, sed kial oni malofte faris tion per teleksaĵoj aŭ faksajoj? Jen venas la ekonomiaj konsideroj.

⁵ Tio signifas, ke la retroprovizanto mem provizas kluzon kun la tradicia telefona reto. Danke al tiu ĉi sistemo la kliento ne bezonas ŝalti sian komputilon kaj lanĉi specialan programon kiel *Skype* por telefoni rete. Li havas normalan telefonaparaton kaj telefonnumeron vokeblan de ie ajn en la mondo. Tiamaniere la retroprovizanto fariĝas telefonprovizanto. Ĝi fariĝas ankaŭ provizanto de televidaj programoj. Kompense la kablotelevidaj kompanioj akiris la rajton iĝi ret- kaj telefon-provizantoj...

⁶ Verdire, krom la jam menciitaj tujmesaĝado per minitelo kaj komputilaj retoj, ekzistis dum pluraj jaroj sistemo de radi-onda tujmesaĝado (en la angla *radio paging*), kiun eblas konsideri praulo de la modernaj poŝtelefonaj mesaĝetoj (SMS). Tujmesaĝado tamen akiris vastan popularecon, almenaŭ en Eŭropo, nur post ĝia integrado en Interreto kaj poŝtelefono.

⁷ Kun taŭgaj ekipaĵoj povus flui eĉ aliaj sentumoj (tuŝo, flaro).

La reto estas „senpaga”

Fakte iuj ne hezitis „tujmesaĝi” per faksaĵoj kaj teleksaĵoj (kaj eĉ telegramoj!), kiam la dezirata tujeco povis mezuriĝi en minutoj. Sed ankoraŭ en la jaroj 1990-aj la kostoj de tiaj servoj (uzkostoj, abonkostoj) kaj de la necesaj terminaloj estis altaj.

Kiam iuj klarviduloj profetis, ke telekomunikado povas iĝi motoro de ekonomia revolucio, evidentiĝis, ke la tiama ekonomia modelo de la kampo tute ne taŭgis, kaj ke necesis ĝin funde ŝanĝi por allogi plej vastan publikon, kvankam tiu deziris nenion pli ol telefonion, kiu jam bonkvalite kaj ne tro koste plenumis ĉiujn ĝiajn telekomunikajn bezonojn.

Ni ne detaligos ĉiujn rimedojn, per kiuj oni persvadis la publikon, ke telefonio estas skandale multekosta, aŭ per kiuj oni detruis kaj dispecigis la telefonkompaniojn. La rezulto estas, ke apud la tradiciaj telefonkompanioj, kiuj nature fariĝis la unuaj retprovizantoj, aperis svarmo da novaj retprovizantoj, kiuj provizas la bazan interretan servon kontraŭ freneze malalta abonprezo, sen aldona uzokosto, kaj ofte inkluzivas en ĝi telefonion kaj televidon. Ne mirinde, ke la kliento, kvankam li ion pagas, kaj krom la bazan servon ricevas nenion senpage, havas la impreson, ke la reto estas senpage⁸. Kaj tio konsistigas ĝian trian specifecon.

La reto estas interkultureca

Falo de la kostoj por telekomuniki faligis ankaŭ la ŝtatajn limojn koncerne komunikadon. Tion ĉi oni plej bone perceptas ene de la Esperanta komunumo, sed ne nur. Ne mankas ordinaraj homoj de unu nacio, kiuj legas kaj komprenas TTT-paĝojn, skribitajn de alinaciano, fojfoje pere de malbonkvalita aŭtomata traduksistemo, se ili la koncerne lingvon ne scipovas. Kelkaj eĉ uzas tujmesaĝajn programojn por babili, interŝanĝi pli-malpli ellaboritajn ideojn, eĉ teleseksumi (kio ne postulas altajn lingvokonojn).

Laŭ ni eblas eĉ diri, ke la reto estas aktiva vehiklo de iu desupre trudata interkultureco laŭ la usona maniero. Lige kun ĉi tia interkultureco necesas akcepti etiketajn kondutregulojn, komunumajn disdividojn, specifajn subkulturojn por ĉiu ajn ekzistanta ŝatokupo, religio, „vivstilo” ktp. Oni ankaŭ konsciu, ke en evolulandoj la plej fruaj uzantoj de la reto apartenis al la plej supraj sociaj tavoloj. Ĉefe kun ili, kiuj jam sorbis la influon de tutmondigo, oni nun povas komuniki internacie, sed regas la impresoj, ke oni tamen povas atingi ĉiujn kulturojn.

Kvankam la nuna vojo de reta interkultureco povas ne plaĉi al Esperantistoj, necesas agnoski, ke temas pri grava specifeco de reta komunikado, ĉar ĝi verŝajne provizas al ordinaraj homoj unikan eblecon dividi internacian sperton, kian ili supozeble ne atingus eĉ per eksterlanda vojaĝo.

Telekomunikado anstataŭ komunikado

Pro la supre menciitaj specifecoj (universaleco teĥnika, tujeco, senpageco kaj interkultureco) la reto iĝis pli kaj pli oportuna por peri ĉiujn kaj ĉiajn komunikojn.

⁸ Aldonindas, ke la diversaj ofertoj de ret-, telefon- kaj televid-provizado estas malfacile kompareblaj, kaj konfuzovekaj por laiko.

Inverse, la perilo influas la manieron mem komuniki kaj ties kampovastecon. Ĉar multe pli facilas komuniki, ol antaŭe, oni nun malpli zorgas pri la enhavo de tio, kion oni komunikas⁹. Telekomunikado alprenis ludecan karakteron, kaj iagrade transprenis la rolon de socia unuigilo, kiun antaŭe havis nur la neperata komunikado. Sekve de tio la neperata komunikado perdas parton de sia rolo kaj la rektaj interhomaj kontaktoj obeas al multe pli simpla skemo, kiun oni antaŭ unu jarcento perceptus kiel indiferentecon.

Estas konstatebla ĝenerala strebo al virtualigo de ĉiuj interhomaj rilatoj. En diversaj cirkonstancoj de la ĉiutaga vivo (aĉetado de libroj, fervojbiletoj, bankaj operacioj, administraciaj klopodoj ks), ni jam kutimas ne plu interagi kun homoj, sed nur kun serviloj. Nun sentiĝas deziro virtualigi eĉ la amikecajn kaj soci-apartenajn rilatojn: oni konas amikojn nur tra iliaj retaj fot-albumoj, taglibroj kaj virtualaj babiladoj.

Kialojn por tio oni povas serĉi plurloke. Facile kompreneblas, ke multaj homoj preferas komuniki kun nekonatoj distance, el la hejma kokono, ol riski malagrablan renkonton en la strato, kies eblecon grandigas la ĝenerala malriĉigo de iuj sociaj tavoloj. La ĵusa kronvira krizo de 2019-2021 montriĝis mirakla preteksto por virtualigi kiel eble plej multajn sociajn interagojn. Aldone, ne estas paranoje pensi, ke la ŝtatoj kaj potencaj komercaj firmaoj bonvenigas, ke ĉi tiu perilo kun facile kontrolebla enhavo, absoluta manko de anonimeco kaj malvera aŭreolo de anarĥiismo igas informkolektadon infana ludo.

Sed ĉi tiun evoluon kreas ne nur la reto. Samdirekte influas alia grava telekomunika teĥniko: poŝtelefono.

Poŝtelefono kiel plivastigo de la retaj servoj

Fakte la eksplodo de poŝtelefono datiĝas de apenaŭ dek jaroj post la eksplodo de la reto. La teĥniko delonge ekzistis, sed restis konfidenca kaj multekosta. Necesis ankaŭ granda teĥnika progreso por redukti la volumenon de la terminalo.

Kompare kun la reto, poŝtelefono kontentigas nur unu plian bezonon, nome „nomademon” (emo telekomuniki el plej diversaj lokoj). Pro la ĉelradia teĥniko¹⁰ la posedantoj de poŝtelefono povas esti vokataj, kie ajn ili troviĝas, kaj inverse vokadi, de kie ajn. Ili sentas sin „liberaj”. Ĉar tiu avantaĝo estas tamen tre magra, kaj ĉar la kostoj de tia teĥniko restas tre altaj, necesis elvolvi komplikajn merkatajn strategiojn por logi la publikon al tiu revo.

⁹ Ni parolas ĉi tie pri la enhava riĉeco de la koncerna telekomunikataĵo. Ju pli intense homoj telekomunikas, des pli da senenhavaj informoj ili averaĝe komunikas. Tio observeblas ekz. en retaj diskutgrupoj. Al kelkaj tio aspektas bedaŭrinda fenomeno, sed estas normala sekvo de translokado de la „komunika bruoj” de la sfero de neperata komunikado al la sfero de telekomunikado, aŭ devige lingva transdono de nelingva komunikado.

Ĉi-riate eblas mencii ankaŭ, ke multaj personoj plendas, ke praktikado de tujmesaĝado (aparte poŝtelefona) instigas junulojn al malĝusta lingvo-uzo pro uzo de fonetikaj mallongigoj, kaj tro-uzo de „mienoj” anstataŭ ĝusta interpunkcio. Ni tamen ne konsideras tion kiel aparte menciindan specifecon de reta komunikado: temas pri pli ĝenerala strebo al troa koncizigo, kiu tuŝas ne nur la lingvon, sed ankaŭ la penson, kaj pro kio estas kulpiginda ne nur la reta „tujeco”. Povus esti tamen interese pli funde studi uzon de la mienoj kiel specon de skriba, sed eksterlingva, komunikado.

¹⁰ Teĥniko de radia elsendo, en kiu la tereno estas dividita en koneksajn ĉelojn ekipitajn per po unu emi-siilo.

Ni detaligos nek la psiĥologian flankon de la afero, nek la transformiĝon de la telefonaparato en poŝkomputilon (saĝtelefono), sed fokusigos la atenton al la enkonduko en poŝtelefonion de servoj, kiuj jam montriĝis ŝatataj en la reto, nome tujmesaĝado, videotelefonio kaj hiperteksta navigado. Dum longa tempo la koncernaj servoj ne povis same bone funkcii en poŝtelefonio (i.a. pro malalta kapacito de raditelefonia teĥniko, pro ekrana malgrandeco ks) kiel en la reto, sed ili jam montriĝis utilaj en difinitaj cirkonstancoj aŭ por difinitaj uzantoj.

Inverse, ankaŭ la „tradicia” retumado akiris iom da „sendrateco” danke al teĥnikoj de la perradia retaliro laŭ la ISO-normo 802.11 (WiFi). Iĝis eble transporti la porteblan komputilon de unu ĉambro de la hejmo al alia, ne perdante retkonekton; eblis uzi la propran komputilon por legi la retroŝton en multaj lokoj de granda urbo (kafejoj, flughavenoj, stacidomoj), kaj ĉio ĉi donis ankoraŭ pli da allogo al retumado.

Resume, eblas diri, ke poŝtelefonio aspektas kiel iom kripligita versio de la Interreto, sed kun la avantaĝo de tre oportuna terminalo. Ĝi dividas kun ĝi unu gravan specifecon, ne nur la tujecon de kelkaj telekomunikaj servoj (telefonio kaj tujmesaĝado, ĉefe), sed ĉiujn el la aliaj specifecoj supre menciitaj. Kaj restas unu afero, per kiu poŝtelefonio kaj Interreto tre similas: ilia partopreno en la sama ekonomia revolucio.

Kunfandiĝo de komerco kaj komunikado

Ŝajnas do, kvazaŭ la reganta devizo estus „komuniki estas telekomuniki”, kaj paralele telekomuniki iĝis unu el la plej bazaj komercaj operacioj, kompreneble pagenda (kun granda gamo da tarifoj kaj uzkvalitoj), sed ĉiam sendolore pro ĝia ludeca aspekto, eblecoj akiri senpagan krediton, kaj ĉiamaniera stimulado al la kliento, ke li elspezu pli por akiri novajn servojn ktp.

La reto ebligas aliron al multaj komercaj servoj, jam ekzistantaj en la reala mondo, kaj stimulis ekfloron de pluraj komercaj branĉoj tute specifaj al ĝi: ni jam menciis retprovizadon en si mem, kaj provizadon de telekomunikaj kluzoj kun la telefonsistemo, sed interreta reklamado iĝis ankoraŭ pli grava, kaj kontribuas kiel tre potenca motoro de la tuta ekonomia kampo.

Iom post iom la homoj alkutimiĝas do al tio, ke ĉia komunikado estu pagenda, kaj ke la telekomunikaj servoj inkluzivu reklamon. Aldone al tio ekzistas merkato por vendi kaj aĉeti retadresojn aŭ poŝtelefonnumerojn, cele al dissendado de pura reklamo (*spamo*). Tiun ĉi tendencon apogas disvastigo per televido, radio kaj porjunulaj ĵurnaloj de konduataj „receptoj”, kiuj prezentas ĉiun interhoman komunikadon kiel provon vendi specifan varon, nome... sin.

Konkludo

Ni vidis, ke reta komunikado

- fariĝas anstataŭanto de ĉiuj antaŭaj komunikmanieroj, i.a. ĉar la reto funkcias kiel universala perilo de signaloj, kaj ĉar ŝrumpas la emo al vid-al-vida komunikado, kvazaŭ laŭ devizo „komuniki estas telekomuniki”;
- ebligas tujan komunikadon (kaj ankaŭ maltujan);

- aspektas senpaga, sed paradokse partoprenas en ĝenerala strebo komercigi ĉiujn homajn kontaktojn;
- estas relative interkultureca pro la faciligita aliro al alilandaj korespondantoj per eĉ malbona kono de iu fremda lingvo aŭ Esperanto.

4. Ĝentileco de komunikado?

Kion havas ĝentileco por fari kun komunikado? Nu, komunikado estas unu el la eblaj interagoj interpersonaj, kaj tiuj interagoj neeviteble efektiviĝas kadre de iu socio aŭ kulturo – aŭ eventuale de pluraj, se temas pri internacia komunikado. Por tiaj interagoj, kiel por ĉiuj aliaj, povas validi iuj kondutreguloj de nia hipoteza ĝentileca korpuso.

En situacio de lingva komunikado la celo de ĝentileco estas eble pli facile klarigebla, ol en aliaj situacioj. Ja kiam homoj preterpasas unuj la aliajn estas al ili sufiĉe facile eviti korpan kontakton, sed en situacio de lingva komunikado la intelekta kontakto estas nepra. Ankaŭ nepra estas uzo de iu lingva kodo, kiu povas nur neperfekte respieguli la transdonendajn pensojn kaj riskas vekti miskomprenojn eĉ la aŭskultanto. En tia situacio ĝentileco servas do unuflanke por sendanĝerigi la supozatan ofendan potencon de la parolo, kaj aliflanke por montri, ke la ricevinto de la komuniko favore taksas la senditan mesaĝon, do nerekte ankaŭ la sendinton.

Kiel dirite la aplikendaj ĝentilecaj reguloj dependas de la situacio, kaj la situacio „komunikado” kovras plurajn subsituaciojn, kiuj do havas gravan rolon en la afero. Laŭ la kutimaj sociaj normoj la alprenenda konduto varias depende de tio,

- ĉu la komunikado okazas ekz. per vid-al-vida konversacio, per telefono, per letero (eventuale registrita) ktp;
- ĉu ĝi okazas inter nekonatoj aŭ konatoj, sociaj egaluloj aŭ malegaluloj, kun celo de reciproka intelekta interŝanĝo, kun celo komerca, instrua, profesia, aminduma ktp;
- ĉu ĝi okazas unudirekte aŭ ambaŭdirekte inter du personoj, aŭ de unu al pluraj samtempe;
- ĉu la komunikado celas informi, demandi, peti, respondi al peto, permesi, malpermesi, ordoni, influi, montri sian valoron... aŭ eĉ polemiki, agresi aŭ insult!

Evidente eĉ la plej pedanta *Gvidlibro pri ĝentileco* ne povus provizi detalajn regulojn por ĉiuj tiaj subsituacioj. En ĉiuj tiaj interŝanĝoj restas tamen, ke ili kutime disvolviĝas laŭ tri fazoj:

- unue la interkomunikantoj starigas la kontakton, plej ofte laŭ iniciato de unu el ili, eĉ kio ĝentileco aperas en respekto de la rajto kapti ies atenton kaj en la maniero tion fari, ekzemple per salutado;
- due ili esprimas sian penson, eventuale laŭ iu vico, se temas pri ambaŭflanka komunikado, eĉ kio ĝentileco esprimiĝas per elekto de vortoj, komprenebleco de la esprimoj, respekto de ĉies parolvico ktp;

- trie ili „malŝaltas” la kontakton, ĉe kio ĝentileco denove ampleksas la rajton kaj manieron tion fari, la esprimon de diversaj bondeziroj kaj esperoj, ligitaj al la ĵusa komuniko aŭ al eventualaj estontaj komunikoj, kaj ĉio ĉi disvolviĝas en fazo, kiun oni povas resume nomi adiaŭado.
- Ni nun provos kompari la komunikadon retan kun la nereta.

5. Ĝentileco de reta komunikado

Kiel universala perilo, la reto ebligas diversajn rimedojn de komunikado. Se oni telefonas (resp. faksas) rete, estas probable, ke oni aplikos la samajn ĝentilecajn regulojn, kvazaŭ oni por tio uzus la telefonan reton (resp. paperan poŝton). Ni do povas limigi nian analizon al la komunikmanieroj pli specifaj de la reto nome tujmesaĝado kaj retroŝtado. Tujmesaĝado, cetere komuna ankaŭ en poŝtelefonio, povas ampleksi ankaŭ videotelefonian dimension, ankaŭ kiun ni rajtas ne preni en kalkulon, ĉar ĝi malmulte distingiĝas de tradicia telefonado vidpunkte de ĝentileco, krom ke la salutado povas okazi skribe, kiel enkonduko al la posta voĉa dialogo.

Kian influon al ĝentileco povas havi la ĉi-supre menciitaj karakterizaĵoj? Ni vidas du gravajn punktojn. Unue la relativa interkultureco agas en reta komunikado same, kiel ĝi agas en la supre menciita situacio de komunikado en E-a medio. La homoj ne certas, ke ili dividas kun siaj partneroj la samajn ĝentilecajn regulojn, do emas apliki siajn al si kaj supozu, ke la partneroj faras same. Kompreneble, al kelkaj tio aspektas netolerebla ĝeno, do estiĝis provoj starigi ian „retan etiketon”, kies respekto ĉefe servas kiel „socia” distingilo por iu usonigita reta elito.

Due la karakterizaĵo de tujeco portas kun si alian karakterizaĵon: rapideco. Eble tio estas spuro de la telegrafaj kutimoj: oni uzis telegrafon por kiel eble plej mallongigi la tempintervalon inter sendo de la mesaĝo kaj ĝia ricevo. Pro la povorta prezo la komunikantoj provis esti tre koncizaj en sia esprimado kaj facilanime forlasis ĝentilecajn formulojn, ĉi-okaze konsideratajn kiel tro kostan balaston. Tiu ideo, ke pervorte esprimita ĝentileco estas ellasebla balasto en specifaj kondiĉoj nuntempe transportiĝis al la reta komunikado. Ja kvankam ĉi-lastas estas „senpaga”, onia tempo estas tiel valora, ke malindus ĝin malŝpari por ĝentilaĵoj, sentitaj kiel mucidaj aligeneraciaj devigoj.

Kaj tiu ĉi lasta frazo vekas plurajn ĉi-postajn profundigojn.

- Kvankam la retkomunikantoj emas ŝpari la tempon dediĉitan al ĝentilaĵoj, ili tamen ne emas ŝpari ĝin por esprimoj de emocioj, aŭ de ŝablonaj pensoj sen alia celo, ol difini sian pozicion en la mikrosocio de la komunikantoj.
- Tia senenhava komunikado estas des pli konstatebla en tujmesaĝado kadre de retbabilejo. Male retroŝtado, kvankam ĝi ebligas tujajn interŝanĝojn, kutime ne estas uzata ĉi-cele, kio igas malpli interesa esprimon de rapide ŝanĝiĝantaj emocioj.
- En retbabilejoj, elmontri negativajn emociojn kaj batali per vortoj fojfoje fariĝas celo en si mem. Agresemo, insulto kaj malĝentileco estas ĉi-celaj iloj, kies uzon favoras la impreso de anonimeco, kreata de la distanco inter la batalantoj.

- Komuna maniero ŝpari tempon estas uzo de konvenciaj mallongigoj. Kelkaj povas havi ĝentilecan valoron, kiel ekz. la iam popularan ret-etiketecan „imho” (*in my humble opinion, laŭ mia humila opinio*) aŭ ĝiaj naciaj variaĵoj. Sed pli uzataj estas la t.n. mienoj, kiel :), kies signifo estas ŝajne fiksa, se kredi la ret-etiketajn pedantojn, sed la vera uzo multe malpli. Krom por transdoni ŝablonajn animstatojn, ili ankaŭ servas por mildigi la eventualan ofendecon de esprimita opinio, aŭ por aldoni postguston de memironio en esprimo de kolero aŭ malkonsento.
- La retkomunikantoj ofte zorgas montri sin pli modernaj, junstilaj, novgeneraciaj, kio ligiĝas kun ilia fiero majstri la por tia komunikado necesan ilaron, kiu kapablo distingas ilin de la, ĉefe maljunaj, komputilaj analfabetoj.
- Alia maniero ŝpari tempon estas neglekti la lingvan korektecon: ĉu indas zorgi pri la ortografia, gramatika, stila korekteco, se la enhavo restas ĉiuokaze komprenebla, aŭ se ĝia kompreno estas tute senutila (kiel okazas, ekzemple, kiam iu sentas sin devigita respondi, sed havas neniun enhavon por komuniki)? Ni mencias tion, ĉar por multaj la lingva korekteco restas grava ĝentileca kriterio, almenaŭ en okazo de unudirekta komunikado, kiam ne eblas demandi la sendinton per klarigoj pri nekomprenita parto.
- Tamen ekzistas tradiciemuloj, kiuj preferas skribi retleteron laŭ la konvencioj de la perpapera korespondado, precipe kiam temas pri formala situacio (rilato komerca, profesia, administra...).
- Eĉ en tia formala situacio povas havi sencon limigi la enhavon de la komuniko al la seka enhavo, kaj ne zorgi pri lingva korekteco kaj aliaj ĝentilaĵoj. Ekzemple, kiam oni sendas retmesaĝon al kolego, kiun en la sama tago oni jam havis okazon vid-al-vide saluti – ja estas ofte pli oportune sendi retmesaĝon, ol kuri al ties oficejo kaj lin eventuale interrompi –, ne havus grandan signifon priŝuti lin per salutoj kaj certigoj pri ĉiama amikeco en ĉiu aparta retaĵo. Kelkaj tamen sentas mankon de tio kaj uzas la aŭtomatan subskrib-kapablon provizitan de la retpoŝtilo por enŝovi ian ĝentilan adiaŭon: ili per tio formale respektas ĝentilecon, sed, ĉar la subskribo estas ofte rekonebla kiel aŭtomata, samtempe montras, ke ne pretas malŝpari la valoran tempon por tia formalajaĵo.
- Ni fine aldonu, ke en iuj medioj, i.a. profesiaj, povas aspekti nepra la uzo de telegramstila komunikado, alie la sendinto povus esti konsiderata mallaboremulo, preferanta babiladon al vera agado...

6. Konkludo

Ni espereble montris en tiu ĉi eseo, ke la demando estas kompleksa, i.a. pro malfacilo starigi la nocion „ĝentileco” sur racian grundon. Tri provizoraj konkludoj estas tamen fareblaj: unue, ke la reto fojfoje servas kiel perilo de tradicia komunikado (reta telefonado, reta faksado), ĉe kiu la komunikrimedo ne havas influon al la etiketo; due, ke la reto akriĝas ĝeneralan impreson de interkultura komunikado, do de necerteco

pri la ĝustaj kondutreguloj, pro kio sufiĉe konsciaj homoj emas apliki la proprajn regulojn al si, kaj „malŝalti” interpretadon de aliula konduto, dume aliaj, male, favoras malican interpretadon de aliula esprimo por meti la dialogon en la kadron de ekscita vortbatalo, kiu ebligas konsciajn deviojn disde la ĝentilecaj normoj; kaj trie, ke oni povas observi emon al ĝenerala simpligo de la etiketo pro tempoŝparemo kaj ŝajnigo de moderneco.

Bibliografio

Koutny, Ilona 1998: Interkultura komunikado. En: *IKU-prelegoj*. Montpellier.

Schwartz, Sandrine 2004: *Eléments pour une analyse de la langue des signes tactile pratiquée par les personnes sourdes-aveugles*. Paris. 89 p. http://ciel8.free.fr/SPIP-v1-7-2/IMG/pdf/DEA_Sandrine_Schwartz_LS_Tactile.pdf

Demandoj kaj diskuttemoj

- 1) Kiujn eblecojn kunportis la telekomunikado?
- 2) Kio karakterizas la retan komunikadon?
- 3) Kion signifas *retiketo*, t.e. ret-etiketo?
- 4) Priskribu agreseman konduton en la reto!
- 5) Ĉu reta komunikado de esperantistoj diferencas de tiu de ne-esperantistoj?

Marc BAVANT estas emerita inĝeniero, laborinta en la kampo de komunik-retoj, franco. Post fino de la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj en AMU, Poznano, li doktoriĝis pri ĝenerala lingvoscienco en la Universitato de Amsterdamo (UvA). Li okupiĝis ankaŭ pri matematika terminologio, leksikologio, kaj mallonge kontribuis al la programo de IS. Post doktoriĝo li plu studis lingvojn, nome la elaman kaj kelkajn kaŭkaziajn. Membro de la Akademio de Esperanto.
<https://uva.academia.edu/MarcBavant>

Reta komunikado

Resumo

Reta komunikado disvastiĝis en la 90aj jaroj de la 20a jarcento. La artikolo priskribas kelkajn rimedojn de reta komunikado ĝenerale. Priskribitaj estas retpaĝaro, reta poŝto, tuj-mesaĝiloj, sociaj retoj kaj retkunvenaj sistemoj. Oni ne povis ignori novajn komunikilojn en Esperantujo. La teksto diskutas, kiel la elektronika komunikado estas uzata en esperantista medio. Kiel ekzemplo estas montrita la uzo de elektronikaj informkanaloj per la Esperantista klubo Brno, kies membro la aŭtoro estas.

1. Enkonduko

Esperantista klubo Brno estas la plej malnova esperantista klubo en la iama Aŭstrio. Ĝi estis fondita en la jaro 1901. Dum sia tuta historio ĝi devis iel komuniki kun siaj membroj kaj homoj ekster Esperantujo. La komunikado okazadis per bultenoj, invitiloj dissendataj per poŝto kaj per murafiŝoj.

Ekde la naŭdekaj jaroj de la 20-a jarcento disvastiĝas interreto. Ekde komenco de la 21-a jarcento ĝi komenciĝis esti uzata ne nur en entreprenoj kaj universitatoj, sed eĉ en hejmoj. Ŝanĝiĝis rimedoj, kiel homoj serĉas informojn, tial devis ankaŭ ŝanĝiĝi stilo de komunikado de nia klubo. Tiu ĉi artikolo priskribas rimedojn de reta komunikado en Esperantujo kaj precipe, kiel ili estas uzataj en nia klubo.

2. Retpaĝaro

2.1. Kio estas retpaĝaro

Retpaĝaro estis origine kolekto de hipertekstaj dokumentoj. La vorto “hiperteksto” signifas, ke tio ne estas nur kolektaĵo de tekstoj kun bildetoj, sed la paĝoj povas esti ligitaj unu al la alia. Komence ekzistis du sistemoj por hiperteksto – Gopher kaj WWW. Ambaŭ sistemoj estis lanĉitaj en 1991.

Sistemo Gopher [goŭfer] funkciis precipe nur kun tekstoj. Informoj estis hierarkie aranĝitaj en strukturo de menuoj, el kiuj uzanto povis elekti, kion li volas legi. Eroj de la menuoj povis esti tekstoj kaj ligiloj al alia gopher-serviloj. Alia enhavo (bildetoj) ne povis esti montrita rekte, nur elŝutita kaj montrita per alia aplikaĵo. Mi trovis nur unu mencion pri uzo de gopher en esperantujo [GOPHER].

Sistemo WWW (el angla World Wide Web – tutmonda teksaĵo) [WWW], esperante TTT (Tut-Tera Teksaĵo). La kerno de la sistemo estas servilo, kiu liveras dokumentojn en HTML formato. Uzantoj devas uzi specialan programon, retumilon, kiu montras la enhavon. HTML estas komputila lingvo kun markoj, laŭ kiuj la enhavo estas montrata. Kelkaj markoj estas uzataj por ligi al aliaj dokumentoj. Ligiloj estas uzataj por du aferoj. La unuaj estas tekstoj aŭ aliaj elementoj. Alklakante la ligilon la uzanto transiros al alia retpaĝo. La aliaj ligiloj estas internaj kaj informas la retumilon, kiujn aliajn fontojn (bildetojn, stilojn, skriptaĵon) la retumilo devas ŝargi por montri ĝuste la retpaĝon.

Unuaj retpaĝaroj estis nur statikaj. La servilo nur sendadis dokumentojn, kiujn la retumilo postulis. Baldaŭ aperis la unuaj dinamikaj paĝoj. En HTML aperis markoj por formularoj. Retumilo sendis enhavon de formularo al servilo. Se la postulata “paĝo”, al kiu direktis la formularo, estas skripto, la servilo lanĉis tiun programon kaj sendis datenojn el la formularo en ĝian ĉefenigujon. Tion, kion la skripto skribis en ĉefeligujon, sendis la servilo al retumilo. Tiu ĉi protokolo por interŝanĝo de datenoj inter servilo kaj skripto estis nomata CGI. Malavantaĝoj de CGI estis malrapideco (la servilo devas startigi la programon kaj preni ĝian rezulton) kaj komplika programado (la programo devis unue dekodi enigon kaj preni el ĝi formularajn datenojn).

Problemoj kun CGI estis solvitaj, kiam aperis la unuaj specialaj programlingvoj, kiuj estis muntitaj rekte en la servilon. Unu el ili estas lingvo PHP, kiu aperis en la jaro 1994 kiel privata projekto. En decembro 1998 estis lanĉita versio 3, per kiu komenciĝis la tempo de vasta uzado de skriptoj en servila parto de retaj aplikaĵoj.

Ekde la jaro 1995 ankaŭ aperas skriptoj en retumiloj. La unua programlingvo por retumiloj estis Javascript, kiu aperis en la retumilo Netscape. Poste Javascript (kun nomo Jscript) estis aldonita al Internet Explorer. Microsoft klopodis enkonduki sian lingvon, VBS, kiu estis bazita sur Visual Basic. Ĝi estis realigita nur en Internet Explorer. Nuntempe la sola lingvo, en kiu eblas skribi skriptojn por retumilo, restas Javascript. Malavantaĝojn de Javascript klopodas mildigi diversaj lingvoj (ekz. TypeScript), sed ili estas tradukitaj en JavaScript-on.

Komence Javascript servis nur por amuzo kaj por kontrolo de formularoj antaŭ forsendo. Nuntempe multaj retpaĝaroj estas aplikaĵoj, kiuj funkcias precipe en retumilo. Tial retaj aplikaĵoj pli similas al la komputilaj. Ili ankaŭ povas esti pli rapidaj, ĉar la retumilo ne bezonas post ĉiu sendo de formularo atendi por ĉiuj dosieroj bezonataj por montri la paĝon kaj la servilo ne bezonas krei denove kodon de la tuta paĝo, sendas nur datenojn. Tio tute ŝanĝis uzon de retpaĝaroj. Ili plu servas ne nur kiel informiloj, sed ili fariĝis veraj aplikaĵoj.

2.2. Redaktado de retpaĝaroj

La unuaj retpaĝaroj estis kreataj skribante HTML kodon en iu programo por redakti tekstajn dokumentojn. La dosieroj estis transportitaj per FTP protokolo al servilo. Tio postulis, ke kreantoj de retpaĝaroj bone konu HTML. Malfacile estis ankaŭ krei navigilon en la retpaĝaro, ĉar oni devis kopii kodon de navigilo al ĉiuj paĝoj. Parte tio estis solvita per kadroj. La ĉefa paĝo estis dividita en kadrojn. En ĉiu kadro estis montrita unu html dosiero. Kutime unu el tiuj kadroj servis kiel navigilo.

Baldaŭ aperis specialaj redaktiloj de paĝaro. Uzanto desegnis tutan retpaĝaron en unu programo kaj li ne bezonis koni HTML. Laboro estis simila al verkado en tekstoprilaborilo (kiel Word). Poste la programo generis HTML dosierojn kaj la uzanto alŝutis ĝin per ftp al la servilo. Ekzemplo de tia programo estas Front Page, kiu siatempe estis parto de Microsoft Office. Ekzistis ankaŭ senpaga varianto Front Page Express.

Ankaŭ tekstoprilaboriloj (Word, LibreOffice Writer) ebligas elporti dokumenton en HTML formato. Ĉar tiuj programoj precipe laboras kun paĝoj, kiuj havas fiksajn mezuraĵojn de folio, kaj uzanto povas uzi kaj rektan formaton kaj stilojn, la elportita HTML dosiero klopodas transformi “paperan” dokumenton en formon por ekrano. Rezulto estas, ke tiel verkitaj HTML dosieroj pro rekta formato estas pli grandaj ol estas necese kaj la aspekto povas esti diversa.

Komence de nova jarcento redaktado de retpaĝaroj multe ŝanĝiĝis. Aperis la unuaj enhavmastrumaj sistemoj. Retpaĝaro estas reta aplikaĵo, kie la enhavo estas konservita ne en HTML dosieroj, sed en datumbazo. La aplikaĵo aranĝas komponentojn sur la paĝo, aldonas navigilojn kaj formatitan enhavon. Administranto de la retejo rekte verkas enhavon en reta aplikaĵo. Ne plu li bezonas alŝuti enhavon en servilon per FTP. Li zorgas nur pri la enhavo, ne zorgas pri teknikaĵoj. Redaktaj sistemoj ebligas tute disigi enhavon kaj aspekton. Por ŝanĝi aspekton de la retejo oni devas “nur” ŝanĝi ŝablonon.

Ekzistas diversaj enhavmastrumaj sistemoj. Kelkaj el ili estas universalaj kaj malfermitkodaj. Tiujn sistemojn oni povas uzi senpage. La ĉefaj estis verkitaj en PHP. La plej popularaj estas Wordpress, Drupal kaj Joomla. Kelkaj retejgastigantoj ofertas eĉ aŭtomatan instaladon de enhavmastrumaj sistemoj.

2.3. Retpaĝaroj por prezenti Esperanto-eventojn

Esperantujo estas aro de izolitaj esperanto-rondetoj kaj izolitaj homoj. Kutime homoj povas uzi la lingvon nur dum esperantistaj aranĝoj, lokaj kaj internaciaj. Kelkaj el ili bonŝance loĝas en urboj, kie regule renkontadas esperantistoj. Esperantistoj tial devas serĉi informojn pri Esperanto-aranĝoj kaj elekti, kiun ili partoprenos. Ekzistas kelkaj retejoj, kiuj klopodas helpi tiun serĉadon. Retpaĝaroj, kiuj informas pri esperanto-aranĝoj, ankaŭ apartenas al retaj komunikiloj. Mi mencias nur kelkajn ekzemplojn.

Eventoj.hu inter la jaroj 1996 kaj 2020 servis kiel informilo pri grandaj Esperanto-aranĝoj. Ĝin fondis Szilvási László. Kunlaboris Ország-Krysz Axel, Mészáros István kaj Keményfi Imre. Ĝi estis permanente prizorgata kalendaro. Ekzistis formularo por anonci aranĝon. Sed tio nur sendis mesaĝon al la administrantoj, kiuj permanente enretigis la eventon. Ankaŭ ŝanĝojn povis fari nur la administrantoj. Ne eblis enretigi invitilojn por lokaj aranĝoj. Mankis iu ajn filtrilo. Malgraŭ tiuj problemoj ĝi danke al la tuta teamo siatempe estis grava informilo pri grandaj esperanto-eventoj.

Eventaservo.org estis lanĉita en la jaro 2017 per Fernando Ŝajani. En la jaro 2019 li donis la sistemon al UEA. En la jaro 2018 komencis la sistemon administri ankaŭ Yves Nevelsteen. Danke al li informo pri la sistemo disvastiĝis inter esperantistoj. Li mem serĉis informojn pri programoj (lokaj kaj internaciaj) en retejo, li metadis unuajn renkontiĝojn en Eventan servon kaj kontaktis klubestrojn.

La enhavo estas prizorgata per organizantoj de aranĝoj mem. Administrantoj nur kontrolas, ĉu la sistemo funkcias kaj prizorgas, ke organizantoj uzu ĝin “ĝuste”. Eblas enretigi kaj grandajn internaciajn esperantajn eventojn kaj renkontiĝojn en lokaj kluboj. Pro pandemio la sistemo estis iomete plibonigita. Ekzemple, eblas indiki retajn aranĝojn. Aranĝojn oni povas filtri laŭ lando, dato, tipo. Se evento estis registrata, eblas aldoni ligilon al video. Nia klubo komencis uzi Eventan servon en aŭtuno 2019. Danke al la programportalo eventaservo.org venadis kaj plu venas eksterlandanoj al niaj retaj renkontiĝoj.

Esperanto.cz estas oficiala retpaĝaro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Ĝi informas pri la lingvo, organizo kaj eventoj. La retejo estas prizorgata per administrantoj. Eventoj povas esti enretigitaj nur permanente. Dum pandemio la Esperantista klubo Brno estis la sola klubo en Ĉeĥio, kiu plu regule renkontiĝadis, ne en la klubejo, sed rete per Skajpo. Mi ricevis atingrajtojn por enmeti niajn aranĝojn en kalendaron ĉe esperanto.cz. Bedaŭrinde la retejo de ĈEA venigis al niaj retaj renkontiĝoj ĉeĥajn esperantistojn nur la unuan fojon. Poste ĉiam revenadis la samaj, novajn ni ne atingis, kvankam ĉiu nia reta programo estis anoncita en retejo de la asocio.

3. Retpoŝto

Retpoŝto (angle e-mail) estas alia reta servo en interreto. Ĝi servas por reta liverado de mesaĝoj inter sendanto kaj ricevanto. Komenco de retpoŝto estas jam en la jaro 1971. Ekde 1985 la protokolo SMTP estis normo por retpoŝto. La protokolo estas teksta kaj neĉifrita. Eblas ĉifri komunikadon inter kliento kaj servilo. La mesaĝoj povas esti survoje legataj en serviloj, tra kiuj la mesaĝoj trairas. Informoj pri sendanto kaj ricevanto ankaŭ estas en teksta formo, tial eblas sendi mesaĝon kun falsaj informoj pri sendanto aŭ ricevanto.

Protekti enhavon eblas per ĉifrado. Sed tio postulas, ke ricevanto uzu bitan atestilon kaj ke sendanto havu lian publikan ŝlosilon, per kiu li ĉifros la enhavon. Ankaŭ eblas ciferece subskribi la mesaĝon por certigi, ke la mesaĝo estis vere sendita per la sen-

danto, kiu estas menciita en la mesaĝo, kaj ke ĝi ne estis survoje ŝanĝita. Bedaŭrinde, nek ĉifrado nek cifereca subskribo estas vaste uzataj. Parte pro tio, ke por ordinaraj homoj tio ne gravas, parte pro tio, ke cifera subskribo estas pagenda.

Ĉar la protokolo estas teksta, eblas sendi nur tekston. Ne eblas rekte meti en la mesaĝon dosieron. La enhavo de dosiero devis esti enkodita kiel teksto. Tial mesaĝoj enhavantaj kunsendaĵojn estas pli grandaj (eĉ duoble) ol la originalaj dosieroj. Retpoŝtaj serviloj rifuzas mesaĝojn, kiuj estas tre grandaj (pli ol kelkaj MB). Sendi grandan dosieron, ekzemple filmon aŭ prezentaĵon kun multe da bildoj per retpoŝto ne eblas. Oni rekomendas meti la dosieron en iun lokon kaj sendi ligilon. Ekzistas eĉ kelkaj servoj, kiuj tion ebligas. Kompreneble vi devas kredi al la peranto, ke la servo estas sekura.

Komence retpoŝto estis uzata nur per sciencistoj, kiuj kredis unu la alian. Neniu imagis, ke poste ĝi estos uzata tiel amase. Tial la sistemo estas tia, kia ĝi estas. Nuntempe retpoŝto estas multe misuzata por sendadi ne atenditajn, kaj ofte dubindajn, komercajn proponojn, por trompadi kaj disvastigi malican programaron. Ricevantoj devas esti tre zorgemaj, kiam ili malfermas mesaĝojn, precipe de nekonatuloj. En poŝtkeston estas liverata tiom multe da trudaĵoj, ke ĉiu retpoŝta kliento devas havi adaptan filtrilon, kiu kaŝas trudaĵojn. Kelkfoje okazas, ke la filtrilo ne distingas trudaĵon, aŭ male ĝi indikas decan retmesaĝon, precipe en la angla lingvo, kiel trudaĵon.

Ĉar nuntempe la retpoŝtservilo rifuzas retpoŝtaĵon kun falsa adreso de sendanto, estas nun malfacile sendi trudaĵojn rekte. Tial trompisto klopodas ataki uzantokontojn de ordinaraj homoj kaj uzas iliajn retpoŝtojn por disendado de trompaĵoj. Krom tio, ke atakanto kaŭzos, ke retadreso de la sendanto estos blokita de administrantoj, la atakanto ankaŭ povas legi personajn informojn en ilia retpoŝto. Ricevinte atingon al retpoŝto la atakanto povas akiri aliron al ĉiuj aliaj servoj, kiujn la homo uzas, ĉar li simple povas peti “novajn enirdatenojn”. Malgraŭ vasta misuzado la retpoŝto restas grava servo por interŝanĝi informojn. Ĝi ne estas taŭga por konversacioj, por tio pli taŭgas tujmesaĝiloj. Retpoŝto estas multe uzata en Esperantujo por diversaj kialoj. Same kiel en neesperantista vivo.

4. Tujmesaĝiloj

Tujmesaĝilo estas reta aplikaĵo uzata por rekta teksta komunikado. Precipe por tuj sendi mallongan mesaĝon. Tial ili estas uzataj por konversacioj. Tujmesaĝiloj povas esti memstaraj, nuntempe ili estas parto de sociaj retoj kaj retkunvenaj sistemoj.

ICQ tujmesaĝilo uzata precipe en la 90-aj jaro de la 20-a jarcento kaj komence de la 21-a jarcento.

Messenger Tujmesaĝilo en socia reto Facebook. Oni povas uzi ĝin memstare en poŝtelefono.

WhatsApp [WHATSAPP] Tujmesaĝilo kaj videotelefona aplikaĵo uzata precipe en poŝtelefonoj. La aplikaĵo ne postulas registradon, ĝi estas ligita kun telefona numero.

Ekzistas ankaŭ versio por komputiloj. Ĝi devas esti ligita al poŝtelefono per QR-kodo. Aplikaĵo estas fermita, kreita en la jaro 2009, ekde 2014 ĝi apartenas al Facebook.

Telegram [TELEGRAMO] Malfermitkoda tujmesaĝilo kun fermitkoda servilo kaj por komputiloj kaj por poŝtelefonoj. Origine en la angla lingvo kun nomo Telegram, neoficiale tradukita en Esperanton. En Esperantujo ĝi estas uzata precipe de junuloj. Parte de komunikiloj de eventoj organizataj de E@I (ekzemple KAEST 2020). Por esperantistoj estis kreita retpaĝaro [TELEGRAMOORG] kun informoj pri uzo de esperantigita aplikaĵo, listo de esperantlingvaj grupoj, kanaloj kaj robotoj.

Amikumu [AMIKUMU1] Poŝtelefona aplikaĵo por trovi homojn, kiuj komunikas en fremdaj lingvoj kaj volas komuniki. Origine kreis ĝin Chuck Smith kaj Richard Delamore en la jaro 2017. Komence ĝi estis uzata nur por serĉi najbarjan esperantistojn, baldaŭ ĝi povis esti uzata por trovi parolantojn de diversaj lingvoj, precipe poliglotojn [AMIKUMU2].

5. Sociaj retoj

Sociaj retoj [SOCIAJ] estas retaj sistemoj, kie homoj povas skribi siajn opiniojn kaj anoncojn, meti bildetojn aŭ videojn kaj konigi ilin al siaj amikoj. Ĝi ankaŭ servas por serĉi novajn homojn, kun kiuj la uzantoj havas ion komunan. La enhavon administras uzantoj. La sistemo proponas al uzantoj artikolojn, kiujn ĝi konsideras por ili interesa. La sistemoj vivas el reklamo. Tial ili pli ofte proponas afiŝojn, kie la uzanto pagis reklamon. Sociaj retoj povas ankaŭ sekvi agadon de la uzanto en interreto (ĉar multaj retpaĝaroj uzas kuketojn de sociaj retoj) por pli bone koni interesojn de la uzanto. Ekzistaj multaj sociaj retoj. Jen kelkaj:

Facebook – universala socia reto. Nuntempe uzata precipe per mezaĝaj kaj pliaĝaj homoj [FACEBOOK].

Twitter – socia reto por malgrandaj informoj. Uzata ankaŭ por oficialaj gazetaraj anoncoj.

Instagram – socia reto por fotoj

TikTok – videoj

LinkedIn – profesia socia reto. Uzata por prezenti sian profesion lertecon kaj por serĉi dungitojn.

VKontakte – rusa socia reto simila al Facebook.

Sociaj retoj estas uzataj ne nur per ordinaraj homoj, sed ankaŭ per firmaoj por krei grupon de siaj favorantoj. Sociaj retoj (sed ne nur ili) ankaŭ povas esti facile uzataj por disvastigado de falsaj novaĵoj. Tio estas pli danĝera nun, kiam ni havas tri tipojn de informoj pli pandemio: oficialaj informoj de registaro kaj kontraŭepidemidaj instancoj, informoj de fakuloj, kiuj la epidemion vidas iom alie kaj ankaŭ multaj falsaj novaĵoj.

Tamen sociaj retoj estas medio, kiu estas grava por disvastigi informojn kaj estas uzata por reklamo. Ekzistas eĉ kursoj, kie oni povas lerni, kiel kompreni, kiuj estas niaj klientoj, kaj kiel celi la reklamon.

6. Retkunvenaj sistemoj

Retkunvenaj sistemoj estas aplikaĵoj por rekta komunikado de homoj per reto. Ĝi estas precipe voĉa, eblas ankaŭ vidi unu la alian per retkamerao. Parto de la sistemo estas ankaŭ babilejo (angle chat). Kelkaj sistemoj ankaŭ ebligas aliajn funkciojn. Konigi ekranon, registri kunvenon, konigi komunan blankan tabulon, kunhavigi dosierojn, kunhavigi kalendaron, rekte elsendi renkontiĝojn al la reto. Kelkaj retkunvenaj sistemoj servas ankaŭ kiel sociaj retoj. Ni priskribu kelkajn el tiuj sistemoj.

Skype [SKYPE1] estas senpaga aplikaĵo de Microsoft por videotelefonado, videorenkontiĝoj kaj babilado. La aplikaĵo estis evoluigata per entreprenistoj Niklas Zennström kaj Janus Friis en la jaro 2003. En 2005 la sistemon aĉetis eBay kaj ekde 2010 ĝin posedas Microsoft [SKYPE2]. Aplikaĵo estas senpaga. Oni devas pagi, nur se per Skajpo oni volas voki telefonan reton. Ĉiuj partoprenantoj dum sesio havas samajn rajtojn. Tio povas esti problemo, precipe en pli grandaj grupoj. Ekzemple iu ajn povas registri la renkontiĝon aŭ haltigi registradon, ĉiuj povas konigi siajn ekranojn.

Microsoft Teams [TEAMS] estas parto de Microsoft 365. Ĝi estas granda sistemo, kiu estas taŭga por entreprenoj kaj lernejoj. En nia universitato ĝi estis dum pandemio multe uzata por laborkunvenoj. Lecionoj kaj prelegoj por malgrandaj grupoj okazadis ankaŭ rete per Teams. Avantaĝo de tiu ĉi sistemo estas, ke organizanto de la renkontiĝo povas agordi rajtojn de partoprenantoj. Se la kunveno estas bone agordita, ne povas okazi, ke partoprenanto hazarde aŭ intense mutigos la parolanton.

Zoom [ZOOM] estas retkunvena sistemo de Zoom Video Communications, Inc. Ĝi ebligas komuniki grupe vizaĝe-al-vizaĝe, babili kaj konigi ekranon. Administranto de renkontiĝo povas agordi rajtojn al la partoprenantoj. Ekzemple, ĉu ili povas uzi babilejon, kiu povas registri la kunvenon kaj kiu povas konigi ekranon. Por mallongaj aranĝoj (ĝis 40 minutoj kaj ĝis 100 partoprenantoj) ĝi estas senpaga. Licenco pro unu jaro kostas ekde 140 EUR. En Esperantujo ĝi estas uzata ekzemple per Londona, Anterpena kaj Glivice-a esperanto-klubo kaj por interlingvistikaj studoj en AMU.

Discord [DISCORD] estas precipe por retludantoj. Ĝi ebligas aranĝi uzantojn en grupoj, kiuj povas komuniki inter si mem. Ne eblas krei “aranĝon” kaj sendi ligilon, kio eblas en sistemoj menciitaj supre.

Jitsi [JITSI] estas malfermitkoda retkunvena sistemo. Ĝia uzo estas senpaga. Oni povas uzi servon meet.jit.si aŭ krei propran servilon. La tuta komunikado estas ĉifrata. Jitsi estas uzata de kelkaj esperantistaj grupoj, ekzemple la Praga esperantista klubo. Jitsi estas ankaŭ parto de Retevent.

Google Meet [MEET] estas simpla retkunvena sistemo, kiu funkcias en retumilo. La renkontiĝoj povas daŭri ĝis 1 horo. Dum reta instruado ĝi estis uzata en baza lernejo, kie lernas mia filo kaj en interesrondeto.

BigBlueButton [BIGBLUE] estas malfermitkoda sistemo por virtualaj klasĉambroj. Ĝi iomete similas al Microsoft Teams. Funkcias kiel retkunvena sistemo. Estas

du babilejoj – privata kaj komuna. Instruisto povas konigi sian ekranon kaj tiel montri ekzemple pdf dosierojn. Sistemo ankaŭ enhavas du “tabulojn”: blankan, kie oni povas desegni ion ajn, kaj “komunaj notoj”, kiu estas por tekstaj informoj. Ankaŭ eblas kunhavigi dokumentojn. La sistemo funkcias rete en retumilo, gestudentoj ne bezonas ion ajn instali. La sistemo postulas bonan servilon. Por uzi ĝin, oni bezonas propran servilon, kien oni instalos la sistemon.

Retevent [RETEVENT] estas retkunvena sistemo, kiun kreis en la jaro 2020 organizaĵo E@I (Edukado ĉe Interreto) por retaj esperanto-aranĝoj. Ĝi ne estas memstara sistemo. Ĉefe ĝi estas “disvojejo”, kie partoprenantoj povas vidi, kion kaj kiam okazas. Se iu programo okazadas nun, la uzanto rekte transiros al “ĉambro”, kie la programo estas. La programoj povas esti prelegoj. Tiuj estas elsendataj rete. Ĝi estas unudirekta kanalo. Nur prelegantoj parolas kaj nur ili estas videblaj. Partoprenantoj povas skribi demandojn en demandaro. Tiu ĉi parto estas uzata ankaŭ por koncertoj. Prelegoj povas esti registrataj kaj tiel en la sistemo spekteblaj ankaŭ poste. Dua tipo de programo estas videobabilejo. La diskutoj okazadas per Jitsi, kiu estas iel ligita kun Retevent (homoj, kiuj ne estas partoprenantoj, ne povas partopreni tiujn jitsi renkontiĝojn. Retevent estis ankaŭ uzata por instruado dum Someraj Esperanto-Studadoj (SES) en 2020 kaj 2021. Por tio estis elektita sistemo BigBlueButton. En Retevent eblas samtempe okazigi diversajn programojn simile al ordinara ĉeesta aranĝo. Klasĉambroj estas malfermitaj nur por studentoj, ne eblas, ke iu “hazarde” enirus fremdan klasĉambron. Krom SES-oj Retevent estis uzata por junulara kongreso en la jaro 2020, Virtuala kongreso 2020, Interlingvistika Simpozio 2020, Retoso 2021 kaj aliaj.

7. Aliaj niaj komunikiloj

Nia klubo ne uzas aliajn dudirektajn komunikilojn (kiel tujmesaĝiloj), tial tio tie ne estas priskribata. Alia unudirekta komunikilo estas video. Video povas pli bone kapti atenton ol longa teksto. En nia klubo dum longaj jaroj okazis multaj interesaj prelegoj, kiujn aŭskultis nur kelkaj homoj. Dum lastaj jaroj nur kvin. Kelkaj, sed ne ĉiuj, prelegintoj verkis artikolojn, kiuj konserviĝis en nia retejo. Kelkaj prelegoj estas por ĉiam perditaj, restis el ili nur rimarko, ke la prelego iam okazis.

Por konservi venontajn prelegojn ni ekde septembro 2020 komencis registri ilin. Oni povas spekti ilin en nia Jutuba kanalo ĉe <https://www.youtube.com/@esperantobrna>. La prelegojn en Jutubo spektas averaĝe 40 homoj. Komparu kun nur 5, kiuj aŭskultis la prelegon en klubejo.

8. Reta komunikado kadre de la Esperantista klubo Brno

Kiel ekzemplon ni ĉi tie priskribas retan komunikadon de unu esperantista klubo. Elektita estis la Esperantista klubo Brno, kies membro estas la aŭtoro.

Komence de la nuna jarcento interreto komencis esti atingebla hejme, ne nur en firmaoj kaj lernejoj. Miroslav Malovec el nia klubo tuj komprenis, ke retpaĝaro estos bonega medio por informi pri kluba agado kaj por konservi nian heredaĵon.

La retpaĝaro uzis neniun enhavmastruman sistemon. Ĝi estis kolekto de individuaj paĝoj verkitaj komence per Microsoft Word, kaj poste per OpenOffice Writer. La klubo ne havis propran retan domajnon, la paĝaro estis kiel subdosiero en reta nomo de homo, kiu eĉ ne estis nia membro. Montriĝis, ke tio estas problemo.

En la jaro 2015 ni decidis, ke nia klubo aĉetos retan nomon [esperantobrnno.cz](http://www.esperantobrnno.cz). Ni komencis konstrui novan retpaĝaron, kiu funkcias en enhavmastrumsistemo Joomla. Sed subite la laboro devis ĉesi. La malnova retpaĝaro estis tiel abunda, ke ne eblis ĉion migrigi en Joomla-n. Tial ankoraŭ ekzistas du retpaĝaroj: la nova ĉe <http://www.esperantobrnno.cz> kaj malnova ĉe <https://www.esperantobrnno.cz/malnova>.

Esperantista klubo Brno longe ne uzadis retroŝton por informi klubanoj pri programo. Se klubestro aŭ alia klubano trovis ion interesan, li sendis mesaĝon al aro de retadreso. Tio havis malavantaĝojn. Ĉiu havas alian liston. Kelkfoje okazis, ke iu en la listo mankis, aŭ tie estis ies amiko, kiu ne estis klubano. Havante novan retan nomon ni tuj kreis retroŝtajn adresajn alinomojn por listoj de membroj kaj amikoj. Ni ankaŭ komencis sendadi invitilojn al nia programo per retroŝto. Komence ni sendadis informojn pri programo neregule, unu foje en monato. Ekde printempo 2018 ni sendas invitilojn al venonta programo regule ĉiusemajne.

Ni komencis uzi Fejsbukon (Facebook) printempe en la jaro 2014. Ni kreis paĝon <https://www.facebook.com/esperantobrnno>. Komence ni havis neniun sperton kun tiu ĉi medio. Ni uzas Fejsbukon por informi, kion ni faris kaj kiaj estas niaj venontaj okazaĵoj. Ni ankaŭ fojfoje konigas aliajn Esperanto-aranĝojn kaj informojn el Esperantujo. Nuntempe nian paĝon “abonas” 281 homoj el diversaj landoj. La plimulto (71) el Ĉeĥio. La plej abunda grupo estas viroj pli aĝaj ol 60 jaroj. Junuloj estas malmultaj. Nian fejsbukan paĝon ŝatas 261 homoj.

Kvankam ni havas sufiĉe grandan “favorantaron”, tio dum kvin jaroj liveris en nian klubon neniun homon. Neniu nova venis en nian klubon, eĉ dum pandemio, kiam niaj renkontiĝoj okazadis rete, neniun partoprenanton ni ricevis danke al Fejsbuko. Eĉ se iu markis nian okazaĵon, ke li “ŝatas” ĝin, li ne partoprenis.

En marto 2020 pro pandemio ĉesis niaj renkontiĝoj en klubejo. Dum printempo ni ne aranĝis anstataŭajn retajn kunvenojn. Ekde oktobro 2020 ni komencis renkontadi rete. Ni uzas Skajpon, ĉar ĝi estas kaj senpaga kaj niaj maljunaj klubanoj la programon jam konis. En niaj retaj kunvenoj partoprenis ne nur klubanoj, sed ankaŭ aliaj ĉeĥaj kaj eĉ eksterlandaj esperantistoj. En programo en klubejo ĉeestis kutime kvin homoj, en niaj retaj renkontiĝoj partoprenis ĉirkaŭ dek homoj, iam eĉ dudek. Kiel menciite supre, tiuj novaj homoj precipe venis danke al Eventa servo.

Antaŭ ok jaroj nia klubo preskaŭ ne havis retajn informilojn. Nur programon en retejo, kiu estis planita por jarkvarono. La programo estis nur disdonata al klubanoj papere. Nun nia klubo anoncas sian programon en diversaj retejoj kaj ĉiusemajne dissendas invitilojn al klubanoj kaj favorantoj.

Malgraŭ tio la komunikado ne estas efika, ĉar ni preskaŭ ne akiris novajn esperantistojn. Diskonigado de nia programo per diversaj kanaloj (nia retejo, Facebook, Eventa servo, Esperanto.cz, invitiloj per retpoŝto) postulas multe da tempo. Ni bezonas trovi rimedojn, kiel ni povas kapti intereson de novaj homoj kaj per neperforta “varmigado” venigi ilin al Esperanto. Ankaŭ necesas iel aŭtomatigi disvastigadon de invitiloj.

Bibliografio

- GOPHEREO: Ederveen D., Esperanto kaj Gopher, 1993
- AMIKUMU1: Amikumu – Lingve konektiĝu apude, <https://amikumu.com/eo/>
- AMIKUMU2: Amikumu (aplikaĵo), [https://eo.wikipedia.org/wiki/Amikumu_\(aplika%C4%B5o\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Amikumu_(aplika%C4%B5o))
- BIGBLUE: BigBlueButton, <https://bigbluebutton.org/teachers/features/>
- DISCORD: Discord, <https://discord.com/> [citcit 2021-10-31]
- FACEBOOK: Facebook, <https://eo.wikipedia.org/wiki/Facebook>
- MEET: Google Meet, 2011, <https://meet.google.com/> [cit2021-10-31]
- GOPHER: Gopher (protocol), [https://en.wikipedia.org/wiki/Gopher_\(protocol\)](https://en.wikipedia.org/wiki/Gopher_(protocol))
- JITSI: Jitsi, <https://jitsi.org/>
- TEAMS: Microsoft Teams. Poŝte ŝatite, chatite, volite aŭ kunlaborite en unu lokoj, <https://www.microsoft.com/cs-cz/microsoft-teams/group-chat-software> [citcit 2021-10-31]
- RETEVENT: Retevent, <https://retevent.com/> [cit2021-10-31]
- SKYPE2: Skype, <https://cs.wikipedia.org/wiki/Skype>
- SKYPE1: Skype | Komunikacia ilo por senpaga vokado aŭ chat, <https://www.skype.com/cs> [citcit 2021-10-31]
- SOCIAJ: Sociala reto, https://cs.wikipedia.org/wiki/Sociální_síť [cit2021-10-31]
- TELEGRAMO: Telegramo, [https://eo.wikipedia.org/wiki/Telegram_\(aplikaĵo\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Telegram_(aplikaĵo))
- TELEGRAMOORG: Telegramo.org, <https://telegramo.org/>
- WHATSAPP: WhatsApp, <https://eo.wikipedia.org/wiki/WhatsApp>
- WWW: World Wide Web, https://en.wikipedia.org/wiki/World_Wide_Web [citCit 2021-10-30]
- ZOOM: Zoom, <https://zoom.us/>
- Retpaĝoj neindikitaj kontrolitaj: 2022-07-20.

Demandoj kaj diskuttemoj

- 1) Kiel evoluis la reta komunikado?
- 2) Ĉu Esperantujo sukcesis uzi retan komunikadon?
- 3) Kiujn retajn komunikilojn vi uzas? Ĉu vi uzas ilin ankaŭ por Esperanto?
- 4) Kiel oni povas plibonigi la komunikadon de esperantistoj?
- 5) Kiel oni povas plibonigi informadon pri Esperanto?

Milan KOLKA naskiĝis en 1975, ĉeĥo. Profesie programisto de retpaĝaraj aplikaĵoj, doktoriĝis en 2004. Esperantistiĝis en 2009 aŭtodidakte, en 2013 li kuraĝiĝis veni en esperanto-klubon en Brno, en 2015 li partoprenis Someran Esperanto-Studadon en Martin, Slovakio. Tie li unuan fojon renkontis esperantistojn el fremdaj landoj. La aranĝo donis al li fortan impreson, ke per Esperanto oni vere povas kompreni unu la alian sen hezito. Ekde tiam li estas kaptita en Esperantujo. En la Esperantista klubo Brno li zorgas pri organizado de ĝia programo, ekde 2021 kiel ĝia prezidanto.
milan@milankolka.cz
<https://www.esperantobrna.cz>

Memeo kaj esperanta komunikado

Resumo

Nuntempe, oni povas komuniki iel ajn rete. La ebleco de komuniki kun la tuta mondo estas nun pli facila ol 100 jarojn antaŭe danke al interreto. Per ĝi, oni ne komunikas nur parole kaj skribe, sed aliaj manieroj ankaŭ eblas. Unu el ili estas *memeo*. Memeo estas bildo kiun oni uzas por moki aŭ ŝerci pri io. La juna generacio vere ŝatas uzi memeon en sia komunikado. Kaj la maljunuloj ne vere komprenas ĝin. Ĉi tiu eseo diskutos la subkulturon de memeoj kaj ĝian efikon en Esperanta komunikado.


1. Kio estas memeo?

Simple klarigata, memeo por kulturo estas kiel geno por biologio: informaro kiu ade duobliĝas kaj evoluas laŭ la medio, sed ĉiam tenas la ĉefan principon (Reime 2015: 1). Per ĉi tiu klarigo, oni povas diri ke memeo ŝanĝiĝas tra la eraoj, sed la ĉefa ideo estas sama. En alia flanko, interreta memeo estas aro de kulturo, tipa ŝerco, kiu gajnas influon per reta dissendo (Börszei 2013: 3). Ĉi tiel, oni scias ke la ĉefa celo de memeo estas ŝerca.

Unua teknologia eksperimentaĵo kiu eble pioniris pri memeo estis la retejo «Bert Is Evil» (Bert estas fia). La retejo montris fotojn de Bert (karaktero de infana programo «Sesame Street») kiel fiulon. Aperis tie modifitaj fotoj de Bert murdante la prezidanton Kennedy, Bert kun Adolf Hitler, ktp. Ĉiuj estis modifitaj fotoj por pruvi ke Bert estas fia. Ĉi tiu ŝerca retejo estis kreita en 1997.



Ekzemplo de foto en retejo «Bert Is Evil»



Originala versio de «Zero Wing» Belong

Alia fenomeno kiu eble estas la unua memeo estis «All Your Base Are Belong To US» (Ĉiuj viaj bazoj estas apartenas al Usono) kiu komenciĝis en la unua jardeko de 2000. Tiu frazo ja kunhavas gramatikan eraron, ĉar ĝi estis malbone tradukita al la angla en la videoludo de «Zero Wing». La frazo devus esti tradukita al: ĉiuj viaj bazoj apartenas al ni (belong to us). Sed, ĉar en la videoludo, ĉiuj literoj estis majuskklaj, oni miskomprenis ĝin: apartenas al Usono (belong to US). Tiu memeo jam havas ĉiujn elementojn de memeo: foto, vortoj, ŝerca celo. Kaj la karakteroj ke ĝi fajfas pri gramatiko, ke ĝi miskomprenigas informon (de «ni» al «Usono»), kaj ke ĝi estas kopiebla jam estas la karakteroj de nuntempaj memeoj (Castaño 2013).



Memeoj de “All Your Base Are Belong To US”

Ĉar memeo principe estas bildo, oni rare povas uzi ĝin en parola komunikado. Preskaŭ ĉiuj komunikadoj uzantaj memeon okazas skribe kaj rete.

2. Memeo kaj Esperantujo

Pro la gajnata populareco en la interreto de ambaŭ Esperanto kaj memeo, la ekzisto de memeoj en Esperanto estas certa. Sed, kiel ekster Esperantujo, la uzantoj de memeoj estas plejparte junuloj, ĉar ĝi estas sufiĉe nova kulturo.



Ekzemplo de Esperanta konversacio kun Esperanta memeo

El tiu memeo, oni povas vidi ke ĝi uzas la fenomenon en Esperantujo por komuniki la ŝercan celon. Tie, la sendanto volas diri ke, praktike, la parolantoj de TEJO precipe ne estas plu junaj. Alia ekzemplo:

MI : KANTAS "LA ESPERO" MALLAŬTE
ĈAR MI NE VERE MEMORAS LA LIRIKON

MI EN LA FINO DE LA KANTO:



Mi kiam parolanto de iu "natura" lingvo
diris ke sia lingvo estas la plej bona:



Aliaj memeoj en Esperanto

Du ekzemploj supre estas memeoj liberaj. Memeoj liberaj estas memeoj kiuj uzas liberan foton/bildon kiu vere taŭgas esprimi la celon. Memeoj liberaj ne sekvas aŭ baziĝas sur iu ŝablono, kiel “all your base are belong to US”. Jen ekzemplo de memeo en Esperanto kiu baziĝas sur ŝablono:

UEA eksplikas la kialon de la vendo de CO: **Esperantistoj:**



Memeo en Esperanto kiu baziĝas sur ŝablono

Oni vidu la anglan ŝablonon de la memeo:

ME:

MOM:



“Me explaining to my mom” ŝablono

La ŝablono nomiĝas “Me explaining to my mom” (mi eksplikas al mia panjo). La ŝablono temas pri iu kiu eksplikas al la panjo, sed la panjo ne sukcesas kompreni. Pri la lasta memeo en Esperanto, nun oni povas vidi ke tiu memeo esprimas la situacion kiam UEA decidis vendi la CO-n (Centran Oficejon) kaj eksplikis la kialon al la membroj, sed Esperantistoj ĝenerale ne sukcesis kompreni. El tiu memeo, ankaŭ oni povas vidi ke la kreanto havas la celon por komenti pri la politika okazaĵo en Esperantujo. Ĉar memeoj ankaŭ estas uzataj tiel ekster Esperantujo.

Oni vidu alian ekzemplon de ŝablona memeo:


Sciencisto: mia inventaĵo povas krei materiojn en ĉiuj fizikaj statoj: gaso, likvaĵo, kaj solido.

Mia pugtruo:



Alia memeo en Esperanto kiu baziĝas sur ŝablono

When you put water in the freezer and it freezes to ice, then you bring it out and it melts back to water.



Oni vidu la anglan ŝablonon de la memeo: “You know, I’m something of a scientist myself” ŝablono

La ŝablono nomiĝas “You know, I’m something of a scientist myself” (Vi ja scias, iamaniere ankaŭ mi estas sciencisto). La ŝablono temas pri iu kiu sentas ke li/ŝi estas sciencisto, farante banalan aferon. Tiu ĉi memeo en Esperanto uzas la pugtruon, kiu farante banalan aferon, sentas ke ankaŭ ĝi estas sciencisto.



La uzado de memeo en Esperantujo estas plejparte privata, sed ekzistas kelkaj kanaloj en diversaj platformoj kiuj disdonas memeojn. La paĝo Malkongreso en Fejsbuko (<https://www.facebook.com/Malkongreso>) preskaŭ ĉiutage afiŝas novan memeon. TEJO havas sian propran grupon por memeoj rilataj al IJK.

Grupo de memeo pri IJK

El tiuj ekzemploj eblas diri ke memeoj ja havas influon en la Esperanta komunikado. Koncerne la uzadon, la plejparto nur rigardas la memeojn kaj plusendas ilin, nur kelkaj interesigas krei memeojn. La celo estas preskaŭ ĉiam ŝerca, sed kelkfoje, oni uzis memeon por politika celo.

3. Konkludo

Memeo estas tutmonda fenomeno kiu influas ankaŭ Esperantujon. Oni nun ne povas nei ĝian ekziston en la nuntempa komunikado. Kvankam ĝi ne tiom efikas en komunikado, oni trovas ke memeo povus esti alternativo en reta komunikado, precipe se oni volus ŝerci.

Memeo, kvankam ĝi estas tutmonda fenomeno, ĝia celo estas sufiĉe limigita. Memeo nun ne estas uzata por banala kaj ĉiutaga komunikado, krom por ŝerci. Aldone, ankaŭ oni devus eksplori ĉu memeoj taŭgas por alia celo aŭ maniero de komuniki.

Bibliografio

- Blackmore, Susan 1999: *The Meme Machine* 'La memea maŝino'. Novjorko: Oxford University Press.
- Börzsei, Linda 2013: *Makes a Meme Instead: A Concise History of Internet Memes* 'Anstataŭe Faras Memeon: Konciza Historio de Interretaj Memeoj+'. Utrecht: New Media Studies Magazine, Utrecht University.
- Castaño, D., C.M. 2013: *Defining and characterizing the concept of Internet Meme* 'Difini kaj Karakterizi la Koncepton de Interreta Memeo'. Kopenhago: Revista CES Psicología, 6(2),82-104.
- Handayani, Fitri, et al. 2016: *The Use of Meme as a Representation of Public Opinion in Social Media: a Case Study of Meme about Bekasi in Path and Twitter* 'La Uzado de Memeo kiel Repräsentado de Publika Opinio en Socia Reto: Kazostudo de Memeo pri Bekasi en Path kaj Tvitero'. Jakarta: Bina Nusantara University.
- Reime, Thov 2015: *Memes as Visual Tools for Precise Message Conveying A Potential in the Future of Online Communication Development* 'Memeoj kiel Vida Ilo por Akurata Mesaĝo Transdonanta Potencialon en la Estonteco de Reta Komunikada Evoluo'. Trondheim: Norwegian University of Science and Technology.

Demandoj kaj diskuttemoj

- 1) Kio estas memeo?
- 2) Kiuj temoj estas kutimaj en memeoj?
- 3) Serĉu memeojn en Esperantio!

Arya BHASKARA FERDUZI, indonezia esperantisto (naskiĝis en 1993), diplomigis pri lingvoinstruado, interesiĝas pri lingvistiko. Nun partoprenas en la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj (2021-24).

ferduzi@outlook.com

Signolingvoj en la kunteksto de loka kaj internacia komunikado

Resumo

Surduloj uzas komunikadon per signoj jam ekde multaj jarcentoj, tamen la pliparto de modernaj signolingvoj komencis aperi nur antaŭ du-tri jarcentoj, kiam surduloj kolektiĝis por krei pli grandajn komunumojn. Signolingvoj povis ekesti dank' al la medio kreita de lernejinstitucioj por surdaj infanoj fonditaj en Francio, kaj poste en aliaj lokoj en Eŭropo kaj Nordameriko. Dum multaj jaroj tamen estis malpermesite uzi signolingvojn en surdullernejoj, ĉar tiamaj specialistoj opiniis, ke instruado per signoj malhelpas al la infanoj akiri parolan lingvon kaj sciojn pri la mondo. Sed malgraŭ tiu situacio la lingvoj de surduloj ne malaperis, eĉ inverse, ili daŭre disvolviĝis kiel ceteraj naturaj lingvoj. Nur en la 60-aj jaroj de la 20-a jarcento oni komencis science esplori signolingvojn. Ekde tiu tempo signolingvistiko iĝis rapide disvolviĝanta kampo de lingvistiko, kadre de kiu oni jam esploris pli ol cent diversajn signolingvojn en la tuta mondo. Multaj nespecialistoj miras pri la diverseco de signolingvoj, argumentante, ke unu komuna kaj tutmonda signolingvo povus solvi la komunikadproblemojn de la surdulaj komunumoj, kiuj jam „multe suferas pro sia handikapeco”. Tamen la lokaj signolingvoj estas parto de la riĉa kultura heredaĵo de surdulaj komunumoj. Parto de la studo estas dediĉita al la problemoj de la internacia komunikado inter surduloj.

Enkonduko

Signolingvoj estas ampleksaj vid-gestaj komunikadsistemoj, kiuj ĉefe estas uzataj de surduloj. Ne estas klare difinebla iu specifa dato, kiam la homaro komencis uzi signojn pro komunikadaj celoj. Ni scias, ke komunikado per signoj estis jam konata en antikvaj Egiptujo kaj Grekujo. Ankaŭ majoj kaj aztekoj uzadis signojn por diversaj celoj (Eriksson 1998; Sacks 2012). Tiuj signoj ludis multnombrajn rolojn en socio. Ĉe aŭstraliaj indiĝenoj signoj funkciis kiel parto de ceremonioj, ĉe nordamerikaj indiĝenoj ili servis al intertriba komunikado, finfine signosistemoj estis kaj estas uzataj ĉe surdaj personoj. En Mezepoko signoj estis populara komunikadmetodo en monaĥejoj. Oni supozas, ke el monaĥaj spertoj en tiu kampo poste rezultis sukcesaj provoj klerigi surdulojn (Jarzabek 1999; Czajkowska-Kisil 2014).

Tre malofte okazas, ke surdaj infanoj akiras signolingvon simile al aŭdantaj infanoj, kiuj nature akiras unuan parolan lingvon, aŭdante ĝin de flue parolantaj familianoj. Laŭ diversaj statistikaj datumoj, ĉirkaŭ 2-10 % da surdaj infanoj naskiĝas en surdaj familioj (Mitchell & Karchmer 2004). Pro tio grava elemento en la procezo de evoluado de signolingvoj estis *hejmaj signoj*, kiuj estis uzataj de surdaj infanoj vivantaj en

izoliteco por komunikado kun familianoj nescipovantaj uzi signolingvon. Tiuj signoj poste iĝis elementoj, kiuj parte influis la evoluon de diversaj signolingvoj.

Nur kiam signolingvoj estas uzataj en ĉiutaga komunikado, ili povas disvolviĝi. Tio ne eblis dum pluraj jaroj de homara historio, ĉar surdeco karakteriziĝas per sporadeco (krom raraj genetikaj anomalioj) kaj surdaj homoj loĝis en izoliteco. En esceptaj situacioj, en lokoj, kie okazis kazoj de heredita surdeco je sufiĉe granda parto de loĝantaro, ekestadis ankaŭ komunaj signolingvoj, dank' al kiuj ĉiuj membroj de iu loka komunumo povis interkompreniĝi sen uzante parolan lingvon.

Malgraŭ tio, ke surduloj ne povas akiri parolajn lingvojn per la buŝ-aŭda kanalo, parto de ili havas aliron al ĝi pere de la skriba formo, se ili ricevis bonan klerigon. Tiam ofte okazas interlingvaj influoj inter lingvoj de diversaj modalecoj. En multaj landoj (ekz. en Germanio, Japanio, Pollando ktp.) aŭdantaj instruistoj disvolvis permanente koditajn komuniksystemojn, kiuj estas artefaritaj systemoj uzantaj la vortvicon kaj esprimojn pruntitajn de la parola lingvo de la aŭdanta medio. La rezulto de la intensa lingvokontakto en diversaj kleriginstitucioj por surdaj infanoj kaj en la ĉiutaga vivo estas ekzistado de lingva kontinuaĵo kun permanente koditaj komuniksystemoj unuflanke kaj signolingvoj kun gramatikaj systemoj malsamaj al tiuj de la parolaj lingvoj.

1. Konciza historio de signolingvoj

Gravan rolon en la disvolviĝo de la ĉiutaga komunikado pere de signolingvoj ludis ekleziuloj. La unua instruisto de surduloj estis hispana benediktano Pedro Ponce de León vivanta en la 16-a jarcento. Li individue klerigis nobelajn infanojn, uzante fingran alfabeton, kiun li probable mem kreis. Bedaŭrinde li ne lasis iujn notojn koncernantajn siajn instrumentojn. En 1620 lia posteulo, Juan Pablo Bonet, verkis la libron *Reducción de las letras y arte para enseñar a hablar a los mudos* 'Redukto de la literoj kaj arto instrui la mutulojn paroli', kie li rekomendis uzi unumanan fingran alfabeton por instrui infanojn. Li ankaŭ rimarkis, ke oni uzu la saman komunikometodon dum la instruado kaj en la familio. Tamen pli ampleksaj priskriboj uzi signojn krom fingra alfabeto en la procezo de la instruado ne ekzistis ĉe hispanaj ekleziuloj kaj pedagogoj de la 16-a kaj 17-a jarcentoj.



Fig. 1. La unua paĝo de la libro „Reducción de las letras y arte para enseñar a hablar a los mudos”. Fonto: https://es.wikipedia.org/wiki/Archivo:Arte_para_enseñar_a_hablar_a_los_mudos.jpg, publika domajno.

La dua eŭropa lando, kie oni okupiĝis pri la edukado de surduloj, estis Anglujo kun William Holder kaj John Wallis. Holder kreis dumanan fingran alfabeton kaj prilaboris la metodon de liplegado. Wallis okupiĝis pri uzado de naturaj signoj kun siaj lernantoj, poste li instruis skribadon kaj liplegadon. Ankaŭ tie ne estis priskribita pli ampleksa signolingvo uzata de surduloj.

Pli ampleksaj sistemoj de signoj disvolviĝis, kiam estis kreitaj la unuaj lernejoj por surdaj infanoj, precipe tiuj kun internulejoj, kie signolingvoj povis esti transdonitaj al novaj generacioj. La unua tiutipa lernejo estis fondita en Parizo iniciate de pastro Charles-Michel de l'Épée (la hodiaŭa Institut National de Jeunes Sourds ‘Nacia Instituto de Junaj Surduloj’). Tie la signoj estis kreitaj de surdaj lernantoj aŭ surdaj instruistoj. De l'Épée mem opiniis, ke signado estas natura komunikmaniero de surduloj, kaj traktis paroladon kiel flankan kapablon laŭ la perspektivo de evoluo de surdaj personoj. Tamen laŭ li la strukturo de la franca (aŭ pli precize – malnova franca) signolingvo estas tro malproksima de la strukturo de la franca parola lingvo kaj povus laŭ lernadon de ĝustaj gramatikaj formoj de la franca parola lingvo. Pro tio li kreis serion de “laŭmetodaj signoj”, kiuj celis alproksimigi la signolingvon al la strukturo de la sparola lingvo, por ke la surdaj lernantoj povu majstri la francan parolan lingvon.

Kontraŭe al la franca metodo de instruado per signoj, en Germanio disvolviĝis *oralisma metodo*, kies celo estis unuavice instrui parolon kaj parolan lingvon (Mc-

Burney 2012). Unu el la apogantoj de la sistemo estis Samuel Heinicke. En la 18-a kaj 19-a jarcentoj tiuj du metodoj (persigna kaj perparola) disvastiĝis en ceteraj eŭropaj landoj. En 1779 en Vieno la unua lernejo por surdaj infanoj en Aŭstrio, kie estis aplikata sistemo miksanta ambaŭ alirojn al la surdklerigo (Dotter kaj Okorn 2014). Similaj metodoj estis poste uzataj en Britio.

Poste en 18-a kaj 19-a jarcentoj ekestis novaj lernejoj por surduloj en aliaj eŭropaj landoj, egz. en Svedio, Anglio, Germanio, Nederlando kaj Rusio. En 1817 fondiĝis ankaŭ la unua daŭra klerigejo por surdaj infanoj en Usono, Connecticut Asylum for the Education and Instruction of Deaf and Dumb Persons, iniciate de Laurent Clerc, estinta lernanto kaj instruisto de la pariza lernejo por surduloj, kaj Thomas Hopkins Gallaudet, usona ministro de klerigo. Tiel en Usonon venis la ideo uzi signolingvon en instruado de surdaj infanoj.

En 1880 okazis evento, kiu forte influis la postan disvolviĝon de la klerigmetodoj por surdaj infanoj. En Milano estis organizata Internacia Kongreso pri la Klerigo de Surduloj, en kiu partoprenis ĉefe instruistoj el Italio kaj Francio. Nur unu el la partoprenantoj estis surda – James Denison el Usono (Van Cleve & Crouch 1989). Dum la kongreso estis akceptita rezolucio pri la enkonduko de la pure oralisma metodo kaj de la malakcepto de signolingvoj en la instruado de surdaj infanoj. El 164 partoprenantoj nur 6 voĉdonis kontraŭ la decido. Pro la akcepto de la rezolucio surdaj instruistoj perdis siajn postenojn kaj en lernejoj estis enkondukita malpermeso uzi signolingvon eĉ en privata komunikado inter lernantoj. Post la kongreso signolingvoj iĝis konsiderataj kiel senvaloraj primitivaj lingvoj kaj tiu ĉi aliro al ili restis tre populara dum la 20-a jarcento.

En 1960 estis eldonita la unua scienca verko pri signolingvo – Sign Language Structure: An Outline of the Visual Communication Systems of the American Deaf ‘Strukturo de signolingvo: skizo de la sistemoj de vida komunikado de la usonaj surduloj’ – kies aŭtoro estis William Stokoe, profesoro de la angla lingvo en la Kolegio de Gallaudet en Vaŝingtono. Li rimarkis, ke la komunikadsistemo uzata de liaj studentoj karakteriziĝas per trajtoj, kiujn posedas ankaŭ parolaj lingvoj. La plej grava parto de la verko estis prova fonema analizo de la usona signolingvo, grava paŝo ĉar estis la unua analizo, kiu uzis metodon kaj modelon (fonemaron) de la lingvistika analizo de parolaj lingvoj. Poste Stokoe ankoraŭ elpensis sian notacisistemon por la usona signolingvo. Antaŭe oni pensis, ke signolingvo estas iusenca pantonomo kaj Stokoe rimarkis, ke en ili ekzistas sistemaj kaj ripetiĝantaj elementoj, kiujn li taksis lingvaj elementoj (manformoj, lokoj kaj movoj). La unuaj lingvistikaj analizoj estis faritaj surbaze de la usona signolingvo, kiu ĝis nun estas ofte lernata signolingvo en la internacia komunumo de surduloj. Pri tio povas atesti parte la fakto, ke la signo ILY (ang. I Love You ‘mi amas vin’), kiu unue estis uzata en la usona signolingvo, nun populariĝis en la internacia komunumo kiel signo de pozitivaj emocioj kaj de surdula fiero. En postaj jaroj pli kaj pli da esploristoj interesiĝis pri la fenomeno de signolingvoj kaj komencis mem konduki esplorojn de diversaj signolingvoj en la tuta mondo. Signolingvistiko estas nun rapide disvolviĝanta branĉo de lingvistiko.




Fig. 2. ILY-signo. Fonto: <https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/9/93/I%2BL%2BY%3DILYsign.png>. Licenco: CC BY-SA 3.0.

2. Signolingvoj en loka kunteksto – komencoj de la pola signolingvo

En Pollandon (pli precize: en polajn landojn, ĉar pola ŝtato tiam ne ekzistis) la ideoj de instruado per signoj venis nur komence de la 19-a jarcento. Pastro Jakub Falkowski entreprenis provon instrui surdajn infanojn en Szczuczyn. Liaj streboj ne restis nerimarkitaj de tiama kleriga estraro. Tial li estis delegita al Parizo, Dresdono kaj Vieno por ricevi informojn kaj konojn pri funkciado de tieaj lernejoj por surduloj, por ke li povu mem fondi similan lernejon en Varsovio. Tion li sukcesis en la jaro 1817. La lernejo funkcias ĝis hodiaŭ ĉe placo Trzech Krzyży. Similaj lernejoj ekestis poste en Lvivo (tiama Aŭstrio-Hungario) kaj Poznano (tiama Prusio).



Fig. 3. Instytut Głuchoniemych – lernejo por surdaj infanoj en Varsovio. https://pl.wikipedia.org/wiki/Instytut_Głuchoniemych_w_Warszawie#/media/Plik:MZ208_DSC0938.JPG. Licenco: CC BY 3.0.

Supozeble Falkowski estis aŭtoro de iu parto de signoj en la pola signolingvo. Li probable ankaŭ pruntis iujn signojn el la franca signolingvo. En la varsovia lernejo laboris nemalmultaj surdaj instruistoj, ekz. Józef Pełczyński (prizorganta helpisto),

Józef Murawski (instruisto de manlaboroj) aŭ Bartłomiej Murawski (instruisto de ŝufarado). En 1830 publikiĝis *Rys historyczny usilowań w uczeniu głuchoniemych i zakładów na ten cel przeznaczonych* ‘Historia skizo de streboj instrui surdmutulojn kaj de institucioj tiucele fonditaj’ verkita de Aleksandra Wolfgang, kiu analizis francajn materialojn koncernantajn la edukadon de surdaj infanoj.

Menciindas, ke ne ĉiuj laboristoj de la varsovia lernejo estis por la uzado de la signolingvo en la edukprocezo de surduloj. Instruistoj ne estis ankaŭ konsciaj pri tio, ke la pola signolingvo kaj la pola parola lingvo estas apartaj lingvoj kun malsamaj gramatikoj. Jam ekde kiam la lernejo ekfunkciis, aperis opinioj kontraŭantaj la uzadon de signoj en la procezo de instruado. En 1820 Jan Sistrzyński verkis libron *Teorya i mechanizm mowy* ‘La teorio kaj meĥanismo de la paroloj’. Li kreis sistemon de buŝ-manaj signoj, kiuj celis helpi al surdaj infanoj rekoni sonojn de la parola lingvo. Fruaj verkaĵoj priskribantaj la polan signolingvon enhavas nur perspektivon de aŭdantaj instruistoj, kiuj komparas tiun ĉi sistemon al la pola parola lingvo. Mankas priskriboj laŭ la perspektivo de surdaj personoj.

En la sekvaj jaroj oni rimarkis inklinton al enkonduko de la oralisma metodo. Tiun ĉi situacion ŝanĝis provizore pastroj Jan Papłoński kaj Teofil Jagodziński, kiuj poris la uzadon de la signolingvo en la instruado. Abiturientoj, kiuj frekventis la lernejon dum la tempo, kiam Papłoński kaj Jagodziński (Czajkowska-Kisil 2014: 30) estis direktoroj de la lernejo, montradis altan klernivelon kaj tre bonajn konojn de la pola parola lingvo, krome ili aktive ĉeestis la vivon de la surdula komunumo. Dum tiu tempo estis verkita *Słownik mimiczny dla głuchoniemych i osób z nimi styczność mających* ‘Vortaro mimika por surdmutuloj kaj personoj kun ili kontakton havantaj’ enhavanta mallongan priskribon de la gramatiko de la pola signolingvo kaj de signomaniero de ĉirkaŭ 10 000 signoj. La vortaron verkis Teofil Jagodziński kune kun Józef Hollak (ankaŭ pastro).

3. Signolingvoj en internacia kunteksto – International Sign

Internaciaj kontaktoj inter surduloj de diversaj landoj ne estas nova fenomeno. Ekzistas fontoj, kiuj atestas pri internaciaj renkontiĝoj de surduloj jam en la 19-a jarcento, ekz. parizaj bankedoj por *surdmutuloj*:

Surdmutaj eksterlandanoj, en siaj tostoj, neniam maltrafis okazon emfazi la universalan naturon de signoj, asertante, ke “ili facile venkas super ĉiuj ceteraj limigitaj lingvoj de la parolanta homaro, enpakitaj en pli-malpli limigitan teritorion. Nia lingvo ampleksas ĉiujn naciojn, la tutan terglobon.” (Mottez 1993: 36)

Tia maniero de komunikado povas esti konsiderata kiel piĝino. Uzante signopiĝinon, surduloj ofte aplikas strategiojn de ikoneco kaj vid-spaca gramatiko. Ni ne scias tamen, ĉu dum tiuj bankedoj estis uzata la franca signolingvo aŭ la franc-bazita signopiĝino. Ĝis nun la pliparto de esploroj koncernantaj piĝinojn estas kondukita de la vidpunkto de parolaj lingvoj. Nuntempe en multaj internaciaj kunteksto estas uzata *International Sign* (IS) – komunikadmaniero ekestinta pro la lingvokontaktoj. Ĝi ĝenerale ne estas

konsiderata kiel sistemo kun plena lingva statuso (Adam 2012). Kvankam oni ofte komparas ĝin al Esperanto, tamen tiuj komparoj ne estas plene trafaj, ĉar Esperanto ekestis kiel lingvo kun difinitaj gramatikaj reguloj kaj vortprovizo. En la kazo de IS oni povas paroli pri malgranda grupo de difinitaj vortoj sen difinitaj gramatikaj reguloj. En la 70-aj jaroj de la 20-a jarcento Tutmonda Federacio de Surduloj eldonis libron *Gestuno: International Sign Language of the Deaf* ‘Gestuno: Internacia signolingvo de surduloj’ kun sia propono de internaciaj signoj, sed tiu provo ne estis plene sukcesa (Murray 2009). Por pli traktado de internaciaj signolingvoj vd Farris 2020.

IS estas piĝino en la senco, ke ĝi ne havas denaskajn uzantojn, tamen ĝia sociolingvistika kaj gramatika strukturo igas ĝin pli kompleksa ol kutime esplorataj piĝinoj. La rezultoj de la esploroj indikas, ke en IS estas uzata la SVO-vortordo, kvin tipoj de negacio kaj verbaj agordoj tipaj por aliaj signolingvoj (Supalla & Webb 1995). Tamen menciindas, ke la pliparto de esploroj ligitaj al IS estis kondukitaj en la kunteksto de la nordamerikaj kaj eŭropaj surduloj. Se temas pri la vortprovizo de IS, ekzistas nur malgranda grupo de signoj, kiuj estas kutime uzataj en IS, sed ĝenerale partoprenantoj de la komunikadsituacio interkonsentas pri la uzo de specifaj signoj, kiujn ili ĉiuj komprenos dum la konversacio. Ofte por reprezenti unu koncepton, estas uzata serio de kelkaj signoj kaj gestoj. Dum internaciaj eventoj kaj en internaciaj institucioj (ekz. en Eŭropa Parlamento) aperas IS-interpretado.



Fig. 4. Signolingva interpretado. Fonto: <https://knowledge-centre-interpretation.education.ec.europa.eu/en/news/don't-forget-sign-language-interpreters-making-conferences-and-meetings-more-accessible>.

4. Konkludo

Signolingvoj estas lingvoj kun riĉa kaj kompleksa historio. Dum multaj jaroj ili estis konsiderataj kiel senvaloraj kaj malegalaj al la parolaj lingvoj. Sendube, esplorado de signolingvoj riĉigis nian komprenon de la homa menso kaj ĝian lingvokapablon. Signolingvistiko pruvis esti fruktodona studfako, kies rezultoj klarigas kelkajn el la

plej malfacilaj kaj signifaj demandoj en lingvistiko kaj proksimaj fakoj. Oni bezonas nur trarigardi la bibliografion de verkoj pri signolingvoj por ekkompreni kiom larĝa kaj varia fariĝis la disciplino de signolingvistiko.

Ankaŭ la politikaj kaj historiaj aspektoj de lingvouzo kaj ilia influo ne povas esti apartigitaj de esploroj pri signolingvoj. En kontakto kun parolaj lingvoj, la malfavorado de komunikado per signoj kaj la opinio, ke signolingvo ne taŭgas por iuj situacioj estas la rektaj rezultoj de socilingvistika situacio, en kiu signolingvoj estis ignorataj kaj malplivalorigataj, kaj en kiu la aŭdantaj instruistoj en la lernejoj por surduloj tradicie okupiĝis pri instruado kaj uzo de parolataj lingvoj. Nur se signolingvoj fariĝos pli alte taksataj, formale kaj plene rekonitaj, kaj uzataj en ampleksa gamo de kuntekstoj de komunikado, ŝanĝiĝos la rezultoj de lingvokontakto en la surda komunumo.

Bibliografio

- Adam, Robert 2012: Language contact and borrowing. En: *Sign Language*. Roland Pfau & Markus Steinbach & Bencie Woll (red.): 841–61. DE GRUYTER.
- Czajkowska-Kisil, Małgorzata 2014: Głusi, ich język i kultura – zarys problematyki. En: *Lingwistyka przestrzeni i ruchu: komunikacja migowa a metody korpusowe*. Paweł Rutkowski & Sylwia Łozińska (red.): Warszawa: Wydział Polonistyki Uniwersytetu Warszawskiego.
- Dotter, Franz & Ingeborg Okorn 2014: Austria's Hidden Conflict: Hearing Culture Versus Deaf Culture. En: *Many Ways to Be Deaf: International Variation in Deaf Communities*. Leila Monaghan & Constanze Schmalin & Karen Nakamura & Graham H. Turner (red.): Washington, D.C.: Gallaudet University Press.
- Eriksson, Per 1998: *The History of Deaf People: A Source Book*. Örebro: Daufu.
- Farris, Michael 2020: The Search for an International Sign Language. En: Koutny I. & Stria, I. & Farris, M. (red.) 2020: *The Role of Languages in International Communication / Rolo de lingvoj en internacia komunikado / Rola języków w komunikacji międzykulturowej*. Poznań: Rys.
- Jarząbek, Krystyna 1999. *Rehabilitacja języka gestów: na przykładzie porozumiewania się zakonników i mniszek*. 1-a eldono. Prace naukowe Uniwersytetu Śląskiego w Katowicach, nr 1818. Katowice: Wydawn. Uniwersytetu Śląskiego.
- Klima, Edward & Ursula Bellugi 1981: *The Signs of Language*. Cambridge, MA: Harvard University Press.
- McBurney, Susan 2012: 38. History of sign languages and sign language linguistics. En: *Sign Language*. Roland Pfau & Markus Steinbach & Bencie Woll (red.): 909–48. DE GRUYTER.
- Mitchell, Ross E. & Michael A. Karchmer 2004: Chasing the Mythical Ten Percent: Parental Hearing Status of Deaf and Hard of Hearing Students in the United States. *Sign Language Studies*, nr 4(2): 138–63.
- Mottez, Bernard 1993: The Deaf Mute Banquets and the Birth of the Deaf Movement. En: *Looking back: a reader on the history of deaf communities and their sign languages*, Renate Fischer & Harlan L. Lane (red.): 143–56.
- International studies on sign language and communication of the deaf*, v. 20. Hamburg: Washington, D.C.: Signum Press; Distributor for the U.S., Gallaudet University Press.

- Murray, Joseph 2009: Sign Languages. En: *The Palgrave Dictionary of Transnational History. Volume I*. Akira Iriye & Pierre-Yves Saunier (red.): 947–48. Basingstoke New York: Palgrave Macmillan.
- Padden, Carol A. & Tom Humphries 1988: *Deaf in America*. Cambridge, MA: Harvard University Press.
- Sacks, Oliver W. 2012: *Seeing Voices: A Journey into the World of the Deaf*. London: Picador.
- Stokoe, William C. 1960: Sign Language Structure: An Outline of the Visual Communication System of the American Deaf. *Studies in Linguistics, Occasional Papers*, Vol. 8, Buffalo, NY: University of Buffalo.
- Supalla, Ted & Rebecca Webb 1995: The Grammar of International Sign: A New Look at Pidgin Languages. En: *Language, Gesture, and Space*. Karen Emmorey & Judy S. Reilly (red.): Psychology Press.
- Van Cleve, John V. & Barry A. Crouch 1989: *A place of their own: creating the deaf community in America*. Washington, D.C: Gallaudet University Press.

Demandoj kaj diskuttemoj

- 1) Ĉu signolingvoj estas samvaloraj lingvoj kiel parolaj lingvoj? Argumentu vian opinion!
- 2) Kiuaspekte malsimilas la akirsituacio de signolingvoj kaj parolaj lingvoj de infanoj?
- 3) Priskribu etapojn de la disvolviĝo de modernaj signolingvoj kaj surdedukado en Eŭropo ĝis la 19-a jarcento.
- 4) Kiu estas konsiderata patro de la moderna signolingvistiko?
- 5) Kiam estis fondita la unua lernejo por surduloj en Varsovio? Kiel nomiĝis la institucio?
- 6) Nomu diferencojn inter la situacioj de *International Sign* kaj Esperanto kiel lingvoj celitaj por internacia komunikado.

Rafał DARASZ estas doktoriĝanto pri signolingvistiko en la Varsovia Universitato (VU), en Pollando (esploras la gramatikon de la pola signolingvo). Li magistriĝis pri sinologio kaj filologio de la pola signolingvo, estas nun magistra studento pri balta filologio en VU kaj partoprenanto de postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj en AMU, Poznano. Dum la periodo 2021-2023 li estis prezidanto de Pola Esperanto-Junularo.

Komunik-sistemoj ĉe katoj: kiel katoj komunikiĝas kaj kial ili miaŭas?

Resumo

Katoj uzas plurajn komunik-sistemojn en siaj interrilatoj kun aliaj katoj, bestoj de aliaj specioj kaj kun homoj. Inter ili estas sistemoj, kiuj uzas la tutan korpon aŭ partojn de la korpo (vosto, oreloj, kruroj ktp.), la sensojn kaj la voĉan komunikadon. Male al tio, kion oni povus pensi, la voĉa komunikado ne estas la plej ofta aŭ la plej grava kata komunik-sistemo. La diversajn komunik-sistemojn de voĉa komunikado oni povas grupigi en tri kategoriojn. Inter ili troviĝas tiu de la sonoj produktitaj per unue malfermita buŝo, kiu poste fermiĝas. Miaŭado estas sub-parto de tiu kategorio, kiu havas nur marĝenan rolon en naturo.

La nuna kontribuo analizas kiel katoj komunikiĝas per miaŭado kun homoj. Kial katoj entute komunikiĝas kun homoj, kial ili elektis miaŭadon kiel ĉefan komunik-sistemon kaj kial tiu marĝena rolo de miaŭado en naturo fariĝis tiel grava por la dorlot-katoj.

Enkonduko

La celo de tiu ĉi laboraĵo estas doni superrigardon pri la komunik-sistemoj de katoj kaj precipe pri la metodoj, kiujn katoj adoptis por komuniki kun homoj. Tial la esploro koncentriĝas sur la *voĉa* komunik-sistemo: kial ĝi transformiĝis de *perifera* sistemo en kata komunikado kun samspeculoj kaj aliaj bestoj al *kerna* sistemo en kata komunikado kun membroj de la homa specio. Ni esploros ankaŭ la hipotezon, ĉu fakte ekzistas *diversaj* voĉsistemoj (precipe diversaj miaŭadoj), kiujn katoj uzas en sia komunikado kun homoj, aŭ ĉu tiu ideo pri diversaj miaŭadoj ekzistas nur en la homa menso. Ni vidos kion malkovris, aŭ ne, sciencistoj en tiu kampo de la kata-homa-kata komunikado. La hipotezo estas ke, katoj evoluigis miaŭadon precipe por homoj kaj ke ili uzas malsamajn miaŭadojn por pli bone komuniki specifajn bezonojn al homoj. Al malsamaj bezonoj, korespondas malsamaj miaŭoj.

1. Kiel katoj komunikas

Kiel multaj aliaj bestoj, katoj uzas diversajn komunik-sistemojn por komuniki specifajn informojn. Inter ili estas:

- la pozicio de la korpo aŭ uzo de partoj de la korpo
- la flara komunikado

- la tuŝado *kaj*
- la voĉa komunikado.

1.1. Korpa (vida) komunikado

Katoj uzas sian tutan korpon en specifa pozicio, membrojn aŭ aliajn partojn de la korpo por komuniĝi. La preciza signifo de ĉiu signalo, sendita per la uzo de iu parto de la korpo, estas tute klara al aliaj katoj kaj ĝenerale al aliaj bestoj, sed ne nepre al *homoj*.

1.1.1. Korpaj pozicioj

Multajn malsamajn sentojn katoj povas komuniki per sia korpa pozicio. Inter la plej oftaj pozicioj estas:

- *senstreĉa pozicio* (la kato sidas aŭ kuŝas kun la malantaŭaj kruroj kurbigitaj aŭ etenditaj; la vosto estas tute libere envolvita) komunikas malstreĉiĝon kaj ĝojon;




Senstreĉa pozicio

- *oscedo*, kune aŭ sen la senstreĉa pozicio, komunikas malstreĉiĝon;
- *timema* pozicio, kiam la kato klopodas optike malgrandigi sin tiel, ke ĝi kaŭrigas siajn kruojn kaj ĝi mallevas siajn orelojn direkte flanken. Nur kiam ne plu estas eblo eviti malamikon aŭ eskapi, la kato batalos.
- *agresema pozicio*. Kiam katoj volas timigi aliajn katojn, ili levas la malantaŭan parton de la korpo, starigas la voston kaj movas ĝin tien kaj reen ambaŭflanken.

1.1.2. Vosto


La vosto estas ofte uzata por komunikiĝi kaj ĝi estas pli fidinda komunikilo por ni homoj ol la iom similaj korpaj pozicioj. Kiam la vosto staras, ĝi komunikas pozitivajn sentojn kaj memfidon. Tiun signon katoj uzas kun homoj kaj aliaj katoj en sia familio. Kiam katoj 'malmoligas' sian voston kaj movas ĝin horizontale, ili komunikas ke ili ĵus nervozigis aŭ eble baldaŭ koleriĝos. Timemaj katoj (kun aliaj bestoj aŭ kun malamikaj katoj) subite levas sian voston kaj hirtigas kaj larĝigas siajn vostoĥarojn.



Hirtigo kaj larĝigo de la vosto kaj ĥaroj

1.1.3. Okuloj

Estas du aŭ tri klare distingeblaj agoj, kiujn katoj povas fari per la okuloj. Rekta fiksrigardo komunikas superecon (inter katoj) aŭ estas uzata por marki teritorion aŭ dum ĉasado. La malo de tiu rekta fiksrigardo estas malrapida palpebrumo, kiun katoj uzas por montri amikiĝon kaj amon al siaj mastroj. Tiun oni kutime nomas '*la kata kiso*'. Ĉe hejmkatoj, ĝi okazas kun la mastroj sed ĝi okazas ankaŭ ĉe sovaĝaj katoj, kiuj volas montri sin amikaj kaj neminacaj.



La kata kiso



La kata kiso kaj senstreĉa pozicio

1.1.4. Oreloj

Katoj kapablas ŝanĝi la pozicion de la oreloj tre rapide. Se la oreloj estas rekte starantaj, ili komunikas malstreĉiĝon kaj kalmon. Inverse, kiam ili estas platigitaj sur la kapon ili montras defensivan aŭ agreseman senton.

1.2. Flarado

Katoj komunkiĝas flare per la odoroj, kiujn ili lasas en urino kaj fekaĵoj kaj per kemiaĵoj en glandoj, kiuj troviĝas apud la buŝo, frunto, vosto, piedoj ktp. Frotante siajn vangojn sur iu ajn objekto (kaj ankaŭ sur la kruroj de siaj mastroj), katoj montras sian teritorion al aliaj katoj. Urinado en naturo havas la saman celon.

1.3. Tuŝado

1.3.1. Nazo kaj buŝo

Katoj frotiĝas per la nazo, la buŝo kaj kelkfoje frunto por montri amikecon al homoj kaj al aliaj katoj. Se tion ili faras kontraŭ objekto (ekz. pordo aŭ alia hejma objekto) tion ili faras por montri sian teritorion. Kiam ili frotiĝas sur aliaj katoj, tio montras socian superecon de unu kato al la alia(j).



Frotiĝo

1.3.2. Knedado

Komenciĝinte tiun kutimon kiam katoj estas tre junaj, por stimuli lakto-produktadon fare de la patrino, katoj daŭrigas tiun ĉi komunik-sistemon en la plenkreskuleco, eĉ

kiam ili estas hejmbestoj, kun siaj mastroj. Sciencistoj opinias, ke tiu ago kontentigas kaj malstreĉigas katojn, simile al tio, kio okazas al homoj kiam ili sin streĉas.

1.3.3. Lekado

Katoj ofte lekas unu la alian, kaj kelkfoje ili lekas homojn. Tio probable helpas al plifortigo de la unio inter gepatroj kaj idoj aŭ aliaj membroj de la sama familio.

1.4. Voĉa komunikado

Fakuloj indikas de **dek ses** ĝis ĉirkaŭ **dudek** diversajn sonojn, kiujn katoj kapablas elbuŝigi (Arnold 2016; Schötz 2019). La preciza kvanto dependas iusence de la difino de ĉiuj apartaj sonoj. Tamen oni povas klasifiki kategoriojn.

La diversajn sistemojn de voĉa komunikado oni povas grupigi en tri kategoriojn: sonoj produktitaj per *fermita* buŝo; sonoj produktitaj per *konstante malfermita* buŝo; kaj sonoj produktitaj per *unue malfermita* buŝo, *kiu poste fermiĝas*.

1.4.1. Sonoj produktitaj per fermita buŝo

En tiu ĉi kategorio estas kelkaj son-sistemoj, sed sendube la plej ofta kaj plej konata estas *la ronronado*. Tio estas tipa sono de kato, kiun ĉiu katoposedanto tre ĝoje aŭdas, ĉar ronronado estas ĝenerale konsiderata kiel monstro de kata kontenteco plaĉe efikanta al homoj. Tamen, sciencaj esploroj (Stuart, 2012; Laliberte 2020) montris, ke la katoj ronronas ne nur kiam ili estas kontentaj, sed ankaŭ kiam ili estas vunditaj aŭ suferas pro doloro aŭ eĉ se ili estas malfortiĝintaj aŭ mortantaj.


La ronronado aperas jam ĉe etaj katidoj, kio verŝajne montras al la katino, ke la katidoj bonfartas. La patrino ree ronronas verŝajne por plialtigi la senton de sekureco de siaj katidoj. La katoj kapablas ronroni tre longe, sen ŝanĝo en laŭteco aŭ ritmo, kaj estas interese, ke katoj kapablas senĉese ronroni dum la en- kaj elspirado.

1.4.2. Sonoj produktitaj per konstante malfermita buŝo

Al tiu ĉi kategorio apartenas sonoj kiel graŭlado, siblado, katoblekado kaj aliaj maloftaj sonoj. Tiuj ĉi sonoj estas tre individuaj kaj ili estas ĉe ĉiuj katoj iom diferencaj. La akutajn sonojn la kato elbuŝigas per larĝe malfermita buŝo kaj unuopajn sonsignalojn ĝi modulas per ŝanĝo de formo de buŝa kavo. Tiel estiĝas diversaj akutaj sonoj, kiujn la katoj uzas precipe dum komunikado kun aliaj katoj kaj precipe en batalaj aŭ danĝeraj situacioj.

1.4.3. Sonoj produktitaj per unue malfermita buŝo, kiu poste fermiĝas

Kvankam aliaj maloftaj sonoj (kiel ekzemple *ululado*) apartenas al tiuj ĉi grupo, la ĉefa ano de tiu kategorio estas *la miaŭado*. Miaŭadon katoj produktas per malfermita buŝo, kiu malrapide fermiĝas. Kutime ĝi havas du silabojn kaj levitan tonalton. Dum fakaj esploroj kaj observado en la ĉiutaga vivo de hejmaj katoj (Stuart, 2010; Schötz 2019; Laliberte 2020) oni rimarkis malsamajn miaŭadojn (kiel ekzemple asertivecan, kortuŝan, amikan, aŭdacan, bonvenigantan, atento-petantan, postulant, plendant kaj eĉ senvoĉan miaŭadon). Tamen, en la naturo plenkreskaj katoj *maloŭtege* miaŭas unu al la alia. Tion kutime faras nur katidoj kaj kutime nur al la patrino, kiam ili malsatas. Estas do interese kompreni *kial* kaj *kiel* plenkreskaj katoj adoptis miaŭadon en sia komunikado al homoj.



Miaŭanta katido

2. Kial katoj miaŭas

Katoj miaŭas ĉefe por komuniĝi kun homoj. Ili ne bezonas (aŭ multe malpli bezonas) miaŭadan komunikadon inter katoj. La aliaj komunik-sistemoj, kiujn ni vidis supre, eĉ la aliaj *voĉaj* komunik-sistemoj kaj produktitaj sonoj sufiĉas en la plejmulto de okazoj kaj en la situacioj, kiun katoj renkontas plej ofte en naturo.

2.1. Voĉsistemoj uzataj en naturo

En naturo, depende de la situacio, la komunik-bezonojn de la katoj plene kaj bone kovras la tuta gamo da nevoĉaj kaj voĉaj komunik-sistemoj. Plej ofte katoj ne bezonas voĉan komunikadon kaj, kiam ili bezonas ĝin, la aliaj voĉsistemoj taŭgas por la situacio. Graŭlado, siblado (eĉ kraĉado) taŭgas en danĝeraj situacioj (ĉu ili rezultas en batalo kun alia kato aŭ ne). Ilia konduto kiam ili estas kun homoj ne estas tiel malsama ol la konduto kiam ili estas inter katoj (male, ekz. al hundoj).

2.2. Miaŭado en naturo

Miaŭado maloftege okazas en interagoj inter katoj en naturo; kutime ĝi povas esti uzata por marki teritorion aŭ por altiri kunulon por sekskuniĝo. Ĝin katidoj uzas dum ludado kaj antaŭ nutrado fare de la patrinaj. Tiu ĉi lasta uzo povas klarigi kial katoj komencis uzi ĝin ankaŭ kun homoj, por altiri ilian atenton cele al nutrado.

2.3. Ĉu kun homoj katoj uzas la samajn komunik-sistemojn kiel ili uzas en la naturo?

Por la plejmulto de la komunik-bezonoj, studoj montris, ke jes. Male al hundoj, katoj ne ŝanĝas sian konduton kiam ili estas kun homoj. Ĝenerale, do, ili uzas la saman komunik-sistemon kiel ili uzas kun aliaj katoj (ekz. ili uzas la *tuŝan* komunik-sistemon kun siaj patrinaj kaj kun la homaj kruroj por komuniki, ke tiu homo *apartenas* al ili aŭ por montri kiel ili fartas).

Sed iuj *komunik-bezonoj* aperis kiam katoj hejmbestiĝis, pli malpli antaŭ 9.500 jaroj. Por *plenumi* tiujn taskojn, katoj bezonas homojn. La lernita komunik-sistemo de katoj ne sufiĉas por atentigi la peranton (=la homon), do ili bezonis ion alian.

2.4. Do kio okazis? Kial ili bezonas miaŭadon?

Katoj ekbezonis ion alian, ion diversan de la aliaj (voĉaj *kaj* ne voĉaj) komunik-sistemoj. Sed kion? Ĉiuj aliaj antaŭ-ekzistantaj sistemoj (korpa, tuŝa, flara) kaj la aliaj voĉ-sistemoj (rononado, graŭlado ktp) jam havis sian rolon. Katoj do lernis, ke homoj komunikas *voĉe* inter si kaj, eĉ pli grave, ke ili komunikas voĉe kun siaj katoj.

Por altiri la atenton de homoj, katoj do ekuzis tiun 'novan' voĉ-sistemon (ne tiom bezonatan kun aliaj bestoj): miaŭadon.

Miaŭado estas tre utila al katoj por atentigi homojn pri gravaj aferoj: *mi malsatas, mi devas iri eksteren, la pordo estas fermita, mi trovis muson / donacon por vi, estas iu grava/danĝera, atentu!*

3. Ĉu ekzistas nur *unu* miaŭado aŭ *diversaj*?

Fakuloj indikas ĉirkaŭ **21 diversajn manierojn en kiuj katoj povas elbuŝigi sonojn** (Spelta 2015; Tavernier, Ahmed, Houpt & Yeon 2020). Inter ili estas miaŭado, kiu fariĝis kerna parto de la kata-homa komunikado. La demando, ĉu ekzistas kelkaj, eĉ *multaj* diversaj miaŭadoj, kiu respondas al diversaj komunik-celoj aŭ situacioj certe bezonas pli da esploroj kun multe pli da specimenoj studataj, eĉ en la studoj konsultitaj dum tiu ĉi esplorado. La studoj ĝis nun faritaj (Turner, Bateson & Bateson 2000; Schötz 2018, 2019) kaj la multaj anekdotaj observoj ŝajnas montri, ke katoj evoluigis diversajn

miaŭadojn por komuniki diversajn bezonojn. La kerna celo estas ĉiam atentigi iun (la patrinon kiam ili estas junaj kaj homojn kiam ili estas plenkreskuloj) pri la bezono de la kato. Estas klare, ke katoj evoluigis diversajn miaŭadojn (bonvenigan, amikecan, postuleman, plendan, aserteman, eĉ senvoĉan (kiam la kato malfermas sian buŝon, verŝajne por miaŭi, sed neniu sono elbuŝiĝas), sed diri ĉu ili efektive havas malsamajn signifojn krom nura atento-kapto de la homoj, estas pli malfacila paŝo. Pli da esploroj bezonatas, precipe en la kampo de la homa–kata interkomunikado, por malkovri, ĉu ili respondas malsame, depende de la maniero en kiu ni homoj parolas al ili kaj do ĉu katoj lernis uzi kelkajn malsamajn miaŭadojn por komuniki malsamajn sentojn.

4. Sume

Katoj verŝajne hejmbestiĝis antaŭ pli-malpli 9.500 jaroj (Driscoll, Menotti-Raymond, Roca, Hupe, Johnson, Geffen, Harley, Delibes, Pontier, Kitchener, Yamaguchi, O'Brien & Macdonald, 2007). Studoj kaj eksperimentoj montris, ke kelkaj ŝanĝoj evidentiĝas kiam oni komparas hejmkatojn kaj katojn, kiuj vivas en la arbaroj aŭ ĉiuokaze ne kun homoj (Jensen 2009). Katoj evoluis por efike komuniĝi kun homoj; ili nun uzas specifajn sonojn kaj son-sistemojn por komuniĝi kun homoj. Tion ili faris ĉar ili lernis de la diversaj homaj voĉigoj kaj diversaj reagoj homaj (pli da atento responde al miaŭado aŭ ne, precipe kiam temas pri nutrado, sed ne nur). Tial miaŭado alprenis *gravan, pli oftan kaj pli ampleksan* rolon (kiun ĝi ne havis en la naturo) por esprimi atento-bezonojn, malbonfarton, solecon kaj malsaton.

Miaŭado montriĝis kiel la plej efika maniero por altiri la homan atenton. Dum la jarcentoj kaj jarmiloj de la kata hejmbestiĝo, katoj kiuj estis pli lertaj en la miaŭado, estis pli sukcesaj en la provizado de daŭraj kaj ripetiĝantaj manĝoj. Ili pli bone kaj pli longe vivis kaj tiu eco enradikiĝis en hejmkatoj, generacion post generacio.

Kvankam kelkaj esploroj kaj multaj anekdotaj informoj ŝajnas montri, ke ekzistas diversaj miaŭadoj kiuj respondas al diversaj bezonoj distingeblaj unu de la aliaj, tiu demando certe bezonas pli da esploro por scienc-nivela kaj ne nur anekdota respondo. Intertempe, ni ĝuu nian vivon kun la katoj.

Bibliografio

- Arnold, Carrie, 2016: The science of meow: study to look at how cats talk. *National Geographic*. 28 March 2016. <https://www.nationalgeographic.com/animals/article/160328-cats-communication-animals-pets-science>
- 2015: Surprising things you never knew about your cat. *National Geographic* 3 December 2015. <https://www.nationalgeographic.com/animals/article/151203-cats-animals-science-communication-pets?loggedin=true>

- Dell'Amore, Christine 2014: What Do Cats think about us? You may be surprised. *National Geographic* 29 January 2014. <https://www.nationalgeographic.com/adventure/article/140127-cats-pets-animals-nation-dogs-people-science?loggedin=true>
- Stuart, Annie. "Why Cats Purr: History and Meaning of Purring." WebMD, WebMD, 21 Apr. 2012, pets.webmd.com/cats/features/why-cats-purr#2.
- Laliberte, Marissa. "Why Do Cats Purr? The Reasons Behind It." Reader's Digest, Reader's Digest, 22 Mar. 2020, www.rd.com/article/why-do-cats-purr/.
- LaFontaine, Dawn 2021: Why do cats miaow? *The cats in the box*. 11 May 2021. <https://thecatisinthebox.com/blogs/kitty-contemplations/why-do-cats-meow>
- Schötz, Susanne & van de Weijer, Joost & Eklund, Robert 2019: *Melody matters: An acoustic study of domestic cat meows in six contexts and four mental states*.
- 2019 Jun 10: Paralinguistic Information and Biological Codes in Intra- and Inter-specific Vocal Communication: A pilot study of Humans and Domestic Cats. In: *Proceedings from FONETIK 2019 Stockholm*, June 10–12, 2019. Heldner, M. (ed.).
- Jensen, P. (2009). The Ethology of Domestic Animals. "Modular Text" series. Wallingford, England: Centre for Agriculture and Bioscience International. ISBN 978-1-84593-536-8.
- Whitcomb, Isobel 2020: Why do cats miaow? It's a language just for humans. *Live Science*. 26 November 2020. <https://www.livescience.com/why-cats-meow.html>
- <https://www.tuttosuigatti.it/linguaggio-del-corpo-del-gatto.html> 'La korpa lingvaĵo de la katoj'
- <https://www.feeline.it/linguaggio-dei-gatti-e-comunicazione-felina> 'Kata lingvaĵo kaj kata komunikado'

Demandoj kaj diskuttemoj

- 1) Kiu estas la ĉefaj komunik-sistemoj de katoj?
- 2) Ĉu la uzado de la voĉo estas la ĉefa sistemo por inter-kata komunikado?
- 3) Kiun rolon havas la partoj de la korpo, kiel vosto, okuloj kaj oreloj en kata komunikado?
- 4) Laŭ la fakuloj, kiom da diversaj sonoj katoj kapablas elbuŝigi?
- 5) Listigu la kategoriojn de komunik-sistemoj en kata voĉa komunikado.
- 6) Listigu kelkajn katajn voĉsistemojn (krom miaŭado) uzatajn en naturo.
- 7) Kompare al hundoj, ĉu katoj ŝanĝas la komunik-sistemojn uzatajn kun aliaj katoj kiam ili interagas kun homoj?
- 8) Kial miaŭado estas uzata ĉefe kun homoj?
- 9) Kial estas bezonataj pli da esploroj por kompreni la rolon de la diversaj miaŭadoj?

Maurizio GIACOMETTO, kromnomo Rico (1968 –) ekonomia inĝeniero, bakalaŭriĝis en internaciaj komercaj aferoj kaj teknologio, magistriĝis pri internacia merkato kaj behaviorismo de la konsumantoj. Li aktivas plurmaniere en la Esperanto-movado en Britujo kaj internacie, en la kampoj de instruado, organizado kaj disvastigado de Esperanto: *uea.facila*, onklo en la programo *Ekparolu!* de Edukado.net, voĉaktoras en sonlibroj kaj aliaj eldonaĵoj. Studento de la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj de AMU (2021-24) en Poznano.
rico@esperanto.org

INTERNACIA KOMUNIKADO

Komunikaj rajtoj

Resumo

Estas malfacile difini, en kio konsistas homa rajto. Ĉu iel supernature donita, do donita de Dio, kiel ajn oni difinas tiun koncepton? Ĉu io natura, kvazaŭ apartenanta al ĉiu homa estaĵo? Ĉu fluanta el konstitucio aŭ sistemo de juro? Iuj rajtoj estas interagaj: ili dependas de la kunlaboro de aliaj. Kaj rajtojn ofte akompanas respondecoj. Foje, tiuj rajtoj estas ne individuaj sed kolektivaj, kaj foje ili karambolas inter si. Inter la homaj rajtoj estas lingvaj rajtoj, kiuj ricevis relative malmultan atenton en la formulado de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (1948) ĉar ili estas certagrade kolektivaj (la Deklaracio traktis ĉefe individuajn rajtojn). Posta evoluo de la debato pri homaj rajtoj kondukis al klopodoj formuli kolektivajn rajtojn, inkluzive rajton je komunikado – ne nur individua sed ankaŭ kolektiva. Leviĝis en tiu kunteksto la demando kiel lingvaj rajtoj rilatas al rajto je komunikado – demando levita interalie de esperantistoj. Kvankam hodiaŭ oni daŭre esploras la demandon pri komunikaj rajtoj, precipe en la hodiaŭa cifereca kunteksto, kie respondeca komunikado fariĝis tiel brula temo, la ideo de rajto je komunikado ricevas malpli da atento ol ĝi devus.

1. Kio estas rajto?

1.1. Naturaj rajtoj

Kiam ni asertas, ke ni “havas rajton” fari ion, aŭ ke oni “lezas niajn rajtojn”, aŭ, ke tiu aŭ alia principo konsistigas “homan rajton”, kion precize ni celas? La nocio de “rajtoj” montriĝas ege malfacile difinebla. Ĝi estas relative nova koncepto, kiu tamen havas siajn originojn en longa historio de pensado, ĉefe (sed ne ekskluzive) en la okcidenta filozofia tradicio. En la Meza Epoko, reĝoj pretendis regi pro rajtigo de Dio: ili ĝuis “dian rajton” al siaj regnoj. En pli modernaj epokoj, tiu antikva nocio, ke certaj homoj estas dotitaj de certaj rajtoj, laŭ sia pozicio en la socia hierarkio, kaj ke tiuj rajtoj estas iel di-donitaj, cedis al pli ĝenerala nocio, ke ĉiuj homoj, kiel kreitoj de Dio, estas dotitaj de tio, kion la usona Deklaracio de Sendependeco nomas (ne senrezerve, ĉar sklavoj je tiu stadio daŭre ekzistis) “certaj nefremdigeblaj rajtoj”. Mi skribas “kreitoj de Dio,” ĉar historie tiu tradicio de homaj rajtoj estas nedisigeble ligita al aspekto de la kristana tradicio – sed ĝi havas siajn paralelojn en simila nocio, ĉefe el la dekoka jarcento en Francio, ke homoj ĝuas tiujn rajtojn *laŭnature*, do simple pro tio, ke ili estas homoj, laŭ *natura juro*. Tiu sento formis la fonon de la Deklaracio pri la Rajtoj de la Homo aprobita de la Franca Nacia Asembleo en aŭgusto 1789, kiu

asertis, ke “homoj naskiĝas liberaj kaj restas egalaj laŭ siaj rajtoj.” Tiu unua artikolo de la deklaro aldonis, ke “sociaj distingoj devas fondiĝi nur surbaze de la ĝenerala bonfarto” – specifa aludo al la neakceptebla de la malnova principo, ke ĉiu homo havas siajn rajtojn (aŭ mankon de ili) surbaze de sia loko en la socia hierarkio.

1.2. Konstituciaj rajtoj

Ne ĉiuj modernaj filozofoj akceptus la nocion, ke rajtoj fiksiĝas al la homo pro iu kohera spirito de la naturo. Iuj verŝajne argumentus, ke la naturo estas neŭtrala – ke en si mem ĝi ne havas racion aŭ konscion, kaj sekve ĝi ne dotus la homojn per iaj aŭtomataj rajtoj. Tiuj filozofoj plej verŝajne dirus, ke, se rajtoj entute ekzistas, ili estas specife donataj al la homoj surbaze ekzemple de la konstitucioj de la diversaj landoj, kaj de certaj internaciaj juraj instrumentoj rekonataj de la diversaj registaroj: ili estas parto de tute specifa civila kontrakto. Multaj landaj konstitucioj specifigas la rajtojn de la civitanoj, al kiuj tiuj konstitucioj apartenas: necivitanoj ne nepre ĝuas samajn rajtojn. Tiuj rajtoj (la rajto partopreni en demokrataj elektoj, la rajto al libera parolo, la rajto al justa kortuma proceso, ktp.) estas garantiataj laŭ la konstitucia juro de la koncerna lando. Al ili ofte aldoniĝas specifaj leĝoj, kiuj preskribas pliajn rajtojn aŭ detaligas la konstituciajn rajtojn.

1.3. Homaj rajtoj

Surbaze de tiuj precedencoj iuj homoj eble plue asertus, ke hodiaŭ ekestis tiel ĝenerala interkonsento pri bazaj konstituciaj rajtoj kaj rajtoj priskribitaj en internaciaj interkonsentoj, ke la koncepto de rajtoj, kaj eĉ difinitaj bazaj rajtoj, nun konsistigas elementon en la internacia kutima juro, do ke la rajtoj, dank’al la norma homa konduto en la socio, fariĝis parto de la homeco mem. Jen la jura bazo de la iamaj Nurenbergaj Procesoj fine de la Dua Mondmilito, kaj sekve de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (1948).

Kiam oni parolas pri “nefremdigeblaj rajtoj”, tamen, oni esence asertas, ke la koncernaj rajtoj morale apartenas al ni kiel homaj estaĵoj, tute sendepende de la juraj sistemoj de la diversaj landoj aŭ eĉ de la internacia juro. Tiel oni atingas saman konkludon laŭ alia vojo.

Historie, oni jam de jaroj debatas pri la universaleco de rajtoj. Ĉu la koncepto de rajtoj troviĝas en ĉiuj kulturoj? Ĉu oni povas ĝeneraligi la nocion de rajtoj al ĉiuj homoj? La usona antropologia asocio, per fama decido post akceptiĝo de la Universala Deklaracio, malakceptis tiun universalecon. La konata usona filozofo Martha Nussbaum (1997:139-144) male sugestas, ke similaj principoj aperas jen kaj jen en plej diversaj socioj. Eble indus aldoni, ke en neniuj socioj la rajtoj en la Universala Deklaracio estas plene kaj komplete troveblaj.

(Pri la teorio de homaj rajtoj, vidu ekzemple Falk 1981; pri ilia internacia apliko vidu ekzemple Vasak 1978, Donnelly 2001. Simpla prezento de kelkaj dilemoj ĉirkaŭ la demando homaj rajtoj estas trovebla en Esperanto en Beetham & Boyle 2000.)

1.4. Interagaj homaj rajtoj

Iuj rajtoj estas aktivaj aŭ interagaj: ili postulas, ke alia persono respektu la koncernajn rajtojn de la rajtinto. Se mi havas rajton al posedaĵoj, al proprieto, evidente tiu rajto ne havas validon se aliaj ne respektas ĝin. Se mi havas rajton al egala jura traktado, tio validas nur se la kortumoj ĝin respektas. Aliaj rajtoj estas esence pasivaj: se mi havas rajton al libera parolo, tio ne signifas, ke aliaj homoj devas min aŭskulti; se mi havas liberecon de kredo, tio ne signifas, ke aliaj homoj devas kredi same kiel mi; se mi havas rajton peticii mian registaron, tio ne signifas, ke ĝi devas agi laŭ mia deziro (kvankam ĝi ja havas devon ricevi mian peticion). Fakte, rajtoj kutime portas kun si certajn devojn kaj devigojn. Iuj rajtoj estas esence negativaj rajtoj: se mi rajtas al egala traktado spite la koloron de mia haŭto aŭ mian sekson, tio signifas, ke aliaj homoj *ne* havas la rajton diskriminacii kontraŭ mi surbaze de tiuj karakterizaĵoj. Foje, unu rajto kolizias kun alia; la kortumoj kaj parlamentoj de multaj landoj dediĉas multan atenton al klopodoj malnodi tiujn kontraŭdirojn.

1.5. Kolektivaj homaj rajtoj

Kvankam la registaroj traktas siajn civitanojn diversmaniere, kaj foje ne donas multan atenton al konstituciaj garantioj (aŭ interpretas ilin tre malvaste), ne estas malfacile kompreni, kion tiuj diversaj garantioj celas. Pli malfacila demando, precipe en la hodiaŭa mondo, estas grupaj (aŭ “kolektivaj”) rajtoj. Ĉu rajtoj apartenas nur al individuoj, aŭ ĉu grupoj ankaŭ havas siajn rajtojn? Se jes, kio okazas kiam la rajtoj de unu grupo kolizias kun la rajtoj de alia grupo? Se, ekzemple, ĉiu infano havas rajton je edukado, kaj se ĉiu homo havas rajton je nediskriminacio surbaze de sekso aŭ lingvo, ĉu tio signifas, ke lernejoj devas esti sekse integritaj, aŭ ke lernejoj devas proponi instruadon en ĉiuj lingvoj parolataj en difinita regiono?

2. Lingvaj rajtoj

Se rajtoj ĝenerale havas relative mallongan historion, la historio de lingvaj rajtoj estas konsiderinde malpli longa (pri tiu historio, vidu Skutnabb-Kangas & Phillipson 1995). La supre menciita Deklaracio de 1789 silentas pri tiu temo, krom ke ĝi aludas al “la libera komunikado de ideoj kaj opinioj,” kio supozeble povus havi lingvan dimension. Fakuloj de nia epoko eltrovis ekzemplojn de enkodigo de lingvaj rajtoj el la deknaŭa jarcento, sed ili estas maloftaj.

2.1. La Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj

2.1.1. Nediskriminacio (Art. 2)

Eĉ la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj en 1948 havas tre malmulton por diri se temas pri lingvaj rajtoj. La dua Artikolo de la Deklaracio ja esprimas negativan lingvan rajton:

Ĉiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en tiu ĉi Deklaracio validas same por ĉiuj homoj, sen kia ajn diferencigo, ĉu laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato...

Do, la lingvo, kiun oni parolas, ne rajtas esti kialo por neapliko de la cititaj homaj rajtoj. La vortumo de tiu ĉi artikolo estas iom pli komplikita versio de la koncerna parto de la unua artikolo de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj (1945), kiu aludas al “respekto al homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj” sen distingo rilate al “raso, sekso, lingvo aŭ religio.” [Ĝenerala prezento de la historio de formulado de la Universala Deklaracio estas havebla ĉe Glendon 2001.]

2.1.2. Relativa manko de atento al lingvoj

Sed, post tiu enkondukita frazero, la Universala Deklaracio restas esence silenta pri la lingva dimensio. La aliaj faktoroj de nediskriminacio estas plejparte aludataj en pli precizaj kaj pozitivaj formuloj aliloke en la Deklaracio, sed ne la lingva faktoro. Ĝi troviĝas kvazaŭ orfa inter la priskriboj de rajtoj. La lingvo estas ja implicita plurloke, ekzemple en Artikolo 11 (pri rajto al justa proceso), Artikolo 19 (libereco de esprimo), Artikolo 21 (partopreno en la politika vivo) kaj Artikolo 26 (la rajto je edukado). Artikolo 27, paragrafo 1, pri kulturaj rajtoj, estus la plej oportuna loko por mencio de lingvoj, sed tiu paragrafo estas tute mallonga kaj tre ĝenerala: “Ĉiu rajtas libere partopreni la kulturen vivon de la komunumo, ĝui la artojn kaj partopreni scian progreson kaj ĝiajn fruktojn.”

2.1.3. La problemo de kolektivaj lingvaj rajtoj

Tiu manko de detaligita atento al lingvaj rajtoj rezultis el profunda manko de interkonsento inter la formulantoj de la Deklaracio. Ili ne povis interkonsenti inter si pri la demando ĉu trakti en la Deklaracio komunajn rajtojn aŭ limigi ĝin komplete al individuaj rajtoj. Kelkaj formulantoj dubis pri elstarigo de komunaj rajtoj pro la ĉeĥa kaj pola sperto: tiujn landojn la nazioj invadis sub la preteksto, ke ili protektas la rajtojn de germanevenaj minoritatoj en tiuj landoj. En la periodo tuj antaŭ 1948, la cikatroj de la milito estis tro novaj por permesi tian cedon: la demando pri kolektivaj rajtoj restis ekster la malneto de la Deklaracio kaj ne trovis lokon en la definitiva teksto.

Oni argumentis, ke pli bone oni traktu minoritatajn demandojn en la kunteksto de la tiam formulata Konvencio pri Genocido.

Tamen, tiu argumento fine venkis nur post iom granda retorika batalo inter la reprezentantoj de la diversaj ŝtatoj. Unuflanke, Sovetunio argumentis por protektado de minoritatoj; aliflanke, kelkaj landoj (inter ili Usono!) asertis, ke ili ne havas minoritatajn problemojn, kaj ke ĉiuokaze la demando ne havas lokon en la Deklaracio.

2.1.4. La rajto je kulturo (Art. 27)

Morsink (1999: 269), en sia analizo de la malnetigo de la Universala Deklaracio, atentigas, ke la uzo de la difinita artikolo en Artikolo 27 (*la kultura vivo; la komunumo*) ja ne rilatas nepre al minoritata statuso – eĉ male. Oni ne rajtas forŝlosi britojn (ni diru) el la ĝenerala kulturo de Britio – do el la kultura vivo de la komunumo de britoj. Necesus interpreti la vorton “komunumo” kiel rilatan al *loka* komunumo por entute rilatigi ĝin al minoritataj kulturoj kaj sociaj vivoj. Ne malfacilus argumenti, ke, se la brita registaro malhelpus al enmigrintoj aŭ al denaskaj parolantoj de la kimra lingvo aliron al la angla lingvo, tio estus malobservo de la Deklaracio – sed Artikolo 27 ne devigas la britan registaron subteni la aliron de la kimroj al la propra lingvo aŭ iamaniere ŝirmi tiun lingvon kontraŭ la angla aŭ entute kultivi ĝin.

2.1.5. La unikeco de lingvaj rajtoj

Se oni bezonus pruvon, ke la lingvo estas alia fenomeno ol, ekzemple, raso aŭ eĉ sekso, jen ĝi. Lingvo havas sian personan formon: la lingvo, kiun oni parolas, estas karakterizo de la unuopa homo; same la raso aŭ etno; same la sekso. Sed lingvo ankaŭ estas komunikilo: oni uzas ĝin por formi komunecon kun aliaj homoj. Ĝia ĉefa karakterizo estas tio, ke ĝi ligas la izolitajn homojn en komunumojn. La formulantojn de la Deklaracio ĉefe gvidis la rilato inter la individuo kaj la ŝtato: la ŝtato havas devon malfermi sin al ĉiuj civitanoj, kaj la civitanoj havas rajton plene kaj sendiskriminacie partopreni la politikan kaj socian vivon.

Kompreneble, ankaŭ aliaj trajtoj havas siajn kolektivajn implicojn: la Deklaracio traktas la rajton *ne* esti ekskluzivita pro raso, *ne* esti diskriminaciata pro sekso, *ne* esti ignorata pro lingvo; ĝi ne traktas la eventualan kolektivajn rajton de grupoj da homoj al komuna identeco surbaze de sekso, etno aŭ lingvo. Sed la lingvo estas aparte problema pro sia fundamente kolektiva kaj kolektiviga naturo.

2.2. Jura rekono de lingvaj rajtoj

Ne estas nia tasko ĉi tie prezenti la historion de la iompostioma rekono de lingvaj rajtoj en la kunteksto de minoritataj rajtoj. En la komenco de la postmilita periodo oni konsideris, ke, se oni adekvate protektos la individuajn rajtojn, protektado de kolektivoj apenaŭ bezonus la atenton de la internacia juro. Sed tiu sinteno baldaŭ ŝanĝiĝis. Internaciaj interkonsentoj pri ekonomiaj rajtoj kaj politikaj rajtoj, kiuj kvazaŭ detaligis kaj suplementis la Universalan Deklaracion, baldaŭ sekvis. La Internacia Interkonsento pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj (1966) deklaras, en sia artikolo 27, ke

En tiuj ŝtatoj kie ekzistas etnaj, religiaj aŭ lingvaj minoritatoj, anoj de tiaj minoritatoj ne estu rifuzitaj la rajton, komune kun aliaj anoj de sia grupo, ĝui la propran kulturon, konfesi kaj praktiki sian propran religion, aŭ uzi sian propran lingvon.

El tiu dokumento siavice sekvis la Deklaracio pri la Rajtoj de Personoj Apartenantaj al Naciaj, Etnaj, Religiaj kaj Lingvaj Minoritatoj (1992), kiu ne nur refortigis la principon de nediskriminacio kaj la rajton ĝui sian kulturon kaj kredosistemon kolektive, sed ankaŭ devigis la ŝtatojn protekti minoritatojn. Unu el la plej fundamentaj markiloj de tiaj minoritatoj estas kompreneble la lingvo – ne nur simbole, sed ankaŭ ĉar ĝi ofte formas la bazon de ilia interkomunikado kaj de ilia financa kaj kultura ekonomio.

2.3. Kiel difini minoritaton?

Temo por alia eseo estus, unue, la demando kiel difini minoritaton, kaj due, kiel solvi la fojan karambolon inter minoritataj rajtoj unuflanke kaj la ĝenerala bonfarto aliflanke. Tiu ĉi-lastata problemo estas aparte akuta ĉe lingvoj, ĉar la lingvo estas nia ĉefa komunikilo. Se, ekzemple, oni favoras unu minoritatan lingvon, ĉu tio do signifas, ke oni defendu ĉiujn minoritatajn lingvojn? Kiom da parolantoj de difinita lingvo, en kiu distribuo, konsistigas defendeblan kaj defendindan minoritaton (memoru, ke en pluraj ŝtatoj – ekzemple Niĝerio aŭ Hinda Unio – oni parolas dekojn aŭ centojn da enlandaj lingvoj)? Kaj ĉu, utiligante difinitan minoritatan lingvon en la lernejoj (ekzemple), oni kreas lernantojn, kiuj sekve fariĝas malpli kompetentaj en la ĉefa lingvo de la koncerna lando aŭ regiono? Ne sufiĉas defendi lingvojn: oni devas ankaŭ defendi la rajton de ĉiu individuo al plena partopreno en la socio. Alivorte: apud rajto al (majoritata) lingvo staras rajto al komunikado.

3. La rajto je komunikado: Historia skizo

3.1. Libereco de esprimo

Artikolo 19 de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, pri libereco de esprimo, tekstas jene: “Ĉiu havas la rajton je libereco de opinio kaj esprimado; ĉi tiu rajto

inkluzivas la liberecon havi opiniojn sen intervenoj de aliaj, kaj la rajton peti, ricevi kaj havigi informojn kaj ideojn per kiu ajn rimedo kaj senkonsidere pri la landlimoj.”

La unua parto de tiu ĉi formulo evidente rilatas al la individuo: oni (t.e. ĉi-kuntekste la ŝtato) ne rajtas malhelpi homojn opinii, nek esprimi siajn opiniojn. Tiu ĉi principo, pri la rajto “havi opiniojn sen intervenoj de aliaj”, havas longan historion: ĝi estas trovebla en antaŭaj formuladoj de homaj rajtoj kaj en la konstitucioj de multaj ŝtatoj. Laŭ la formulo en la Universala Deklaracio, ĝi etendiĝas al la rajto *esprimi* opiniojn – kio siavice ligiĝas al libereco de parolo kaj de publikigo.

La Konstitucio de Unesko (1946) jam prezentis paralelan ideon: “La Organizaĵo ... kunlaboros en laboro por antaŭenigi la reciprokan interkompreniĝon de la popoloj, per ĉiuj rimedoj de amaskomunikado, kaj tiucele rekomendos tiajn internaciajn interkonsentojn kiaj necesos por faciligi la liberan fluon de ideoj per vortoj kaj bildoj.” Jam de sia komenco, Unesko aparte interesiĝis pri la situacio de ĵurnalistoj – ĉefe ilia libereco raporti kaj publikigi sen cenzuro kaj sen endanĝerigo jura aŭ fizika. La “libera fluo de ideoj” kaj “la libera fluo de informoj” estis fundamentaj principoj de Unesko jam de la komenco.

En lastaj jaroj, la protektado de ĵurnalistoj, ekzemple en militaj zonoj, trovis paralelon en la defendo kaj protektado de t.n. “lingvaj laborantoj” – tio estas interpretistoj kaj tradukistoj, kiuj estas esencaj por la libera fluo de informoj, ne nur en la senco, ke en militaj situacioj vortoj preferindas ol perfortoj, sed ankaŭ ĉar ili ofte ligas lokulojn kun la nacia kaj internacia gazetaro.

3.2. Ricevi kaj havigi informojn

La fina parto de Artikolo 19 de la Universala Deklaracio, “la rajton peti, ricevi kaj havigi informojn kaj ideojn per kiu ajn rimedo kaj senkonsidere pri la landlimoj”, implicas aktivan elserĉon de informoj sen limigo ĉu enlande ĉu eksterlande. Implicita en la Artikolo 19 estas evidente la rajto *doni* informojn: rajto ricevi ne havas sencon se ĝin ne akompanas rajto doni. La libereco elserĉi kaj ricevi informojn supozeble inkluzivas aliron al ĉiuj haveblaj fontoj de informoj, inkluzive presitajn kaj elektronikajn fontojn – kaj la vortoj “senkonsidere pri la landlimoj” igas tiun principon universala, do ne limigita al individuaj ŝtatoj. Malpli klara estas la demando ĉu ĝi devigas registaron faciligi la aliron al tiuj fontoj – do ne malhelpi la enflon de informoj en la landon, kaj ne limigi aliron al informoj. Libereco *serĉi* informojn implicas liberecon ne esti persekutata, kaj ĝi implicas la ekziston de malferma socio, sed libereco *ricevi* informojn ŝajnas implici pli ol simple pasivan neintervenon flanke de la aŭtoritatoj de la ŝtato. Komplikas la situacion la kreso de reta komunikado. Ĝis kiu grado registaroj rajtas limigi aliron al la reto, se entute?

La formulo “libereco ... havigi informojn” estas traduko de tio, kio en la angla versio tekstas “freedom ... to *impart* information”, do transdoni informojn al aliaj – kaj tion fari “per kiu ajn rimedo”, “through any media”. Tio povus simple signifi liberecon diri kaj skribi kaj publikigi ĉion, kion oni volas diri kaj skribi kaj publikigi.

La rajto stari sur kesto kaj alparoli preterpasantojn neniel signifas, ke tiuj preterpasantoj devu aŭskulti; la rajto malfermi retejon kaj komenci blogon neniel implicas, ke oni legos kion oni skribis. Aliflanke, se oni havas sufiĉan kapitalon, oni povas pligrandigi la eblecon esti aŭskultata: eĉ se ĉiuj homoj rajtas paroli, tiuj, kiuj havas rimedojn, havas multe pli bonan ŝancon esti aŭskultataj. Kaj, cetere, ĝis kiu grado oni ne intence disvastigu falsaĵojn? Ĉu ekzistas rajto mensogi? Tiu demando fariĝis lastatempe pli aktuala pro tio, ke homoj kiuj *ne* havas financajn rimedojn tamen povas atingi milionojn da homoj per t.n. sociaj medioj.

Kaj ĝis kiu grado la posedantoj de tiuj sistemoj de sociaj rimedoj – Fejsbuko k.s. – havas rajton aŭ respondecon cenzuri la mesaĝojn? La posedantoj de ĵurnaloj ja decidas kion ili aperigos, kion ne. Sekve, la juraj sistemoj de la diversaj landoj konsideras ilin respondecaj pri tiu enhavo. Sed ĉu Facebook estas eldonejo aŭ telefono? Se via najbaro telefonus al vi per insultaj vortoj, vi ne akuzus la telefonan instancon pri kalumnio. Sed Facebook sidas ie inter la statuso de eldonejo kaj la statuso de publika servo. Kiu, do, respondecas pri ĝia enhavo?

3.3. Ekesto de t.n. “rajto je komunikado”

Kvankam la angla vorto “media” en 1948 ne portis la semantikan ŝarĝon, kiun ĝi havas hodiaŭ, pli malstrikta interpreto de Artikolo 19 de la Universala Deklaracio implicus, ke la publikaj komunikrimedoj – la gazetaro, la amaskomunikiloj – devus esti maksimume malfermaj al diverseco de opinioj, ĉar la publika komunikado estas fundamente malegala. En lastaj jaroj, la rapida antaŭeniĝo de elektronikaj rimedoj certagrade malfermis al la ordinara publiko vojojn por aŭskulti kaj esti aŭskultata, sed en la mondo de 1948 kaj postaj jaroj, ne estis tia la situacio.

Pro tio, iom post iom en la jaroj post 1948 – kaj ĉefe en la 1960aj kaj 1970aj jaroj – leviĝis voĉoj, kiuj celis plivastigi la ideojn esprimitajn en Artikolo 19 por starigi “rajton je komunikado” – rajton ne nur esprimi siajn opiniojn sed rekte engaĝi aliajn en interaga dialogo. Klare identigebla en la diversaj internaciaj homrajtaj dokumentoj estas kategorio de komunikaj rajtoj – sed ĉu el tiuj diversaj rajtoj oni povus konkludi, ke ekzistas klara kaj universala rajto al komunikado? Fundamenta problemo estis tio, ke la diversaj “komunikaj rajtoj” ne tute kongruas inter si. Ĉu do solveblus tiuj kontraŭdiroj per klara formulado de ĉionenhava rajto?

La termino “rajto je komunikado” estis unue kreita de Jean d’Arcy en debato en la Internacia Radio-elsenda Instituto, kaj prezentita al la Ĝenerala Konferenco de Unesko en 1974 en rezolucio proponita de sveda reprezentanto Bertil Zachrisson. La rezolucio deklaris, ke “En edukado, scienco kaj kulturo, la rajto je komunikado estas esenca. Tiu rajto estas nemalhavebla al ĉiu persono por praktiki demokratian regon kaj por ebligi al ĉiuj membroj de la socio partoprenon en ties evoluigo” (Tonkin 1983a:24-25).

Zachrisson emfazis la gravecon de dudirekta komunikado kaj demokratia partopreno. Pro novaj eltrovoj en teknologio, li asertis, la sola obstaklo al tia interaga,

dudirekta komunikado estas regado de kapitalo kaj politika potenco. En posta artikolo, Jean d'Arcy priskribis la rajton je komunikado kiel "koncepton por la estonteco", kiu entenas la nociojn de "aliro, partopreno, dudirekta informado – ĉiuj esencaj, laŭ nia nuna sento, al la harmonia evoluo de la homo kaj la homaro" (Fisher & Harms 1983: 215; la kompleta teksto troviĝas en Harms, Richstad & Kie 1977:1-9. Pri la ligo inter homaj rajtoj ĝenerale, precipe en la postmilita periodo, kaj la evoluo de rajto je komunikado, vidu mian artikolon Tonkin 1984).

3.4. La politika kaj historia kunteksto

La sveda elpaŝo en la Ĝenerala Konferenco tuj instigis polemikadon, ne pro la koncepto mem sed pro aliaj interesoj, kiuj kuŝis sub la surfaco. En la 1970aj jaroj la mondo estis firme dividita en du tendarojn: tiu de la okcidentaj, kapitalistaj landoj – Usono, Britio, Francio kaj aliaj – kaj tiu de la orienteŭropaj socialistaj landoj, sub la gvido de la Sovetunio. Tiu granda fendo inter sociaj sistemoj ekzistis jam delonge. Ĝi estis signifa faktoro en la debato ĉirkaŭ la Universala Deklaracio. Dum la okcidentaj potencoj deziris formaligi kaj universaligi civilajn kaj politikajn rajtojn jam ĉe ili longe ekzistantajn, la orientaj potencoj egale insistis pri ekonomiaj kaj sociaj rajtoj – la rajto al laboro, la rajto aliĝi al sindikato, la rajto al ripozo, la rajto al nutraĵoj, vestado, medicina prizorgo, k.s. En tio ili estis helpataj de tiuj eŭropaj landoj kie en la periodo tuj post la Dua Mondmilito oni klopodis starigi bazajn sociajn servojn malfermajn al ĉiuj. Dum la okcidentanoj ĉefe interesiĝis pri la t.n. "malnovaj rajtoj" civilaj kaj politikaj, kiuj datiĝis de pli fruaj epokoj, la orientanoj interesiĝis pri la t.n. "novaj rajtoj" kiuj ekestis ĉefe en la 19-a jarcento kaj vastiĝis en la 20-a (pri la distingo inter novaj kaj malnovaj rajtoj vidu Lapenna 1952 kaj Morsink 1999).

Ambaŭ flankoj povis pravigi sian akcepton de principoj, kiujn ili apenaŭ plene subtenis, per la fakto (kiel Lapenna, 1952:90, atentigis), ke temis ne pri "interkonsento" sed pri "deklaracio" de homaj rajtoj, do ne pri deviga traktato sed pri kolekto de grandaj esperoj, teorie sen jura forto (la posta historio montris tamen, ke la Universala Deklaracio ja influis la internacian juron kaj kondukis al diversaj jure validaj interkonsentoj).

Post la fino de la Malvarma Milito, do en la pasintaj tridek jaroj, la debato pri komunikaj rajtoj sekvis novajn direktojn. La situacio en la komenco de la 21a jarcento estas bone resumita en deklaro pri Artikolo 19 prezentita de la Tutmonda Kampanjo por Libera Esprimo (Global Campaign for Free Expression) de februaro 2003: <https://www.article19.org/data/files/pdfs/publications/right-to-communicate.pdf>.

3.5. Malkoloniigo kaj komunikado

Kvankam samtempe kun la diskutoj pri la Universala Deklaracio Hinda Unio (Barato) gajnis sian sendependecon (aŭgusto 1947), nur en postaj jaroj la voĉoj de la

t.n. Sudo aldoniĝis al tiuj de Oriento kaj Okcidento. La antaŭenmarŝo de malkoloniigo enlasis en membrecon de UN kaj Unesko amason da novaj nacioj kaj plifortigis la kontraŭimperiismajn voĉojn. Malgraŭ la insista emfazo de la formulantoj de la Universala Deklaracio, ke ili interesiĝas ne pri kolektivaj rajtoj sed pri individuaj, oni facile turnis la vortojn de la Deklaracio por pravigi ne nur eviton de ekspluatado de la individuo fare de la kolektivo, sed eviton de ekspluatado de malfortaj ŝtatoj fare de fortaj – alivorte dirite, la malakcepton de imperiismo en ĉiuj ties formoj.

La debato pri la rajto je komunikado do implikiĝis en tiu kontraŭimperiisma batalo. La landoj de la t.n. Tria Mondo, la Sudo, atentigis, ke la tielnomata libera fluo de informoj kaj komunikado estas esence unudirekta fluo – de la fortaj, okcidentaj, “eŭropaj” landoj al la subevoluintaj aŭ evoluantaj landoj. Ĉi-lastaj estis senpotencaj antaŭ la enfluo de kulturaj produktoj de la okcidento (popularaj libroj, televidaj programoj, filmoj, muziko), kiuj (laŭ la evolulandoj) subfosis tradiciajn kulturojn, fremdigis gejunulojn, kaj malstabiligis la socion. Ili estis ankaŭ esence senpovaj en la decidado pri internaciaj komunikaj praktikoj: decidoj pri disdono de radio-frekvencoj, ekzemple, estis esence decidita de la grandaj industriaj potencoj – kaj la fluo de novaĵoj iris precipe de la industriaj landoj al la evolulandoj: la kvar grandaj novaĵagentejoj (la brita Reuters, la franca Agence France Presse, kaj la usonaj Associated Press kaj United Press International) dominadis la disflon de informoj (Tonkin 1983a:27-28). La rajto je komunikado (ili argumentis) antaŭvidas *dudirektan* flon. Sekve, la okcidentaj landoj ne nur donu pli da helpo al la evolulandoj por aŭdigi iliajn voĉojn en la internacia informado, sed mem limigu la senliman flon de kulturaj produktoj. Krome, la evolulandoj havas rajton (laŭ si) limigi la enflon de tiaj produktoj en siajn landojn.

3.6. La historia evoluo de la debato

Dum akriĝis la debato pri komunikado, alia vorta batalo venis al relative sukcesa fino: la Fina Akto de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo estis subskribita en Helsinko en 1975, tiel malaltigante streĉitecojn inter Oriento kaj Okcidento. Tamen, la fakto, ke okazis tiu konferenco estis indiko pri la kreskanta internacia atento al homaj rajtoj ĝenerale kaj la kreskanta preteco de okcidentaj landoj insisti pri respekto de homaj rajtoj flanke de aliaj landoj (vidu Moyn 2010). La civilrajta movado en Usono en la 1960aj jaroj, la fondiĝo de Amnestio Internacia en 1961, la studentaj protestoj de la finaj 1960aj jaroj – ĉio ĉi montris novan epokon en la internacia dialogado. Eĉ la Esperanto-movado estis tuŝita: la Deklaracio de Tyresö (1969) anoncis la aliĝon de TEJO al la “intelekta kaj politika mobilizo de la junularo,” deklarante, ke la lingvo “estas realaĵo intime ligita al sociaj kaj politikaj fenomenoj. Tial ĉiuj ajn agadoj pri lingvaj problemoj estas samtempe sociaj agadoj” (vidu la kompletan tekston en Tonkin 2006:150).

La streĉiteco inter Nordo kaj Sudo ne mildiĝis. La Ĝenerala Konferenco de Unesko kunvenis en Najrobio en 1976 por debati dokumenton kies longa titolo estis en si mem

signo de manko de harmonio: evidente ĉiu partio insistis pri sia propraj preferoj. La debato pri la “Malneta Deklaracio pri Fundamentaj Principoj Koncerne la Kontribuon de la Amasmedioj al Fortigo de Paco kaj Internacia Interkompreniĝo, Disvastigo de Homaj Rajtoj, kaj Kontraŭstaro al Rasismo, Rasapartigo kaj Incitado al Milito” estigis tiom da polemikado, ke oni decidis nenion decidi, krom starigi enketon pri “la tuteco de la problemoj de komunikado en la moderna socio.” El tio fontis, en 1977, starigo de Internacia Komisiono por la Studo de Komunikadaj Problemoj, sub prezido de Sean MacBride, eksa ministro pri eksterlandaj aferoj de la Irlanda Respubliko.

3.7. La Komisiono MacBride

La 16-membra Komisiono MacBride, kiun oficiale nomis la Ĝenerala Direktoro de Unesko, Amadou-Mahtar M’Bow, konsistis parte el profesiaj diplomatoj, parte el specialistoj pri komunikado, el kiuj pluraj jam apogis la dudirektan komunikadon. Tute nature, la Komisiono fiksas sian tagordon unuavice en la kunteksto de la debato de 1976. La membroj do koncentris sian atenton je la amasmedioj. Mustapha Masmoudi, iama ministro pri informado de Tunizio, kaj unu el la ĉefaj formulantoj de la enhavo de la Raporto MacBride, kiun la komisiono fine produktis, argumentis favore al “Nova Monda Informa kaj Komunika Ordo,” analoga al la “Nova Monda Ekonomia Ordo” lanĉita de la triamondaj landoj kaj principe akceptita en la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj kelkajn jarojn pli frue.

3.8. Nova Monda Informa kaj Komunika Ordo (NOMIKO)

En dokumento verkita por la Komisiono en 1978, Masmoudi eksplicite ligis la Novan Mondan Informan kaj Komunan Ordon kaj ties pledon por komunika ekvilibro inter la ŝtatoj, al Artikolo 19 de la Universala Deklaracio: “Alvokante tiun novan mondan informan ordon, la evoluantaj landoj faras pli ol elvoki la rajtojn sole proklamitajn de la aktuala internacia komunumo en gravaj tekstoj kiel ekzemple Artikolo 19 de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj...” La rajto je komunikado, aldonis Masmoudi, “koncernas ne nur la individuon sed ankaŭ grupojn, naciojn kaj sociojn, kaj necesas doni al ili taŭgan esprimiĝon je la internacia nivelo, en rilatoj inter ŝtatoj, nacioj, socioj, kaj kulturoj” (citita en Tonkin 1983a:27).

Tiu kvazaŭa eskapo de kolektivaj rajtoj el la Universala Deklaracio (kiel bestoj el zoologia ĝardeno?) konsternis la okcidentajn potencojn. Dum ili interesigis pri demandoj (ekzemple) kiel la sekureco de ĵurnalistoj laborantaj eksterlande, la rajto de ĵurnalistoj skribi tion kion ili volas, kaj libera importo de presita materialo (perilaj kompreneble ankaŭ de opinioj) en la diversajn landojn, la evolulandoj, kie politika stabileco ofte ricevis pli da atento ol la funkciigo de demokratiaj institucioj, parolis pri siaj “rajtoj” sur la internacia scenejo, pri dudirekta komunikado, pri ekvilibro.

Kompreneble, ambaŭ flankoj havis siajn kaŝitajn tagordojn. La okcidentaj landoj volis vendi siajn produktojn kaj libere influi publikan opinion en la evoluantaj landoj – ne nur por antaŭenigi la proprajn ideojn sed ankaŭ por minimumigi la influon de Sovetunio inter la nove sendependaj landoj. Krome, la ideo de libereco de la gazetaro, garantiita en Usono en la unua amendo al la Konstitucio, fariĝis ideologia fundamento, kiun la usonanoj deziris internaciigi.

Kontraste, la evolulandoj, kiuj same esprimis siajn celojn per imponaj vortoj, laboris por konservi siajn ekzistantajn reĝimojn: stabileco kaj monopolo de potenco estas oftaj politikaj sinonimoj. Kaj, se la diversaj landoj, laŭ Masmoudi, havas siajn kolektivajn rajtojn, apogitajn de la Universala Deklaracio, ĉu oni ne povus simile argumenti pri Reuters aŭ AP aŭ Agence France Presse?

3.9. La Raporto MacBride

La Komisiono MacBride fine prezentis siajn konkludojn (MacBride 1980) kaj Unesko transiris al la venonta stadio – starigo de Internacia Programo por Evoluigo de Komunikado, kiu samtempe fortigu la kapablojn de la evolulandoj per trejnado de ĵurnalistoj k.s., faciligu la fluon de informoj el la evoluantaj landoj en la industriajn, kreskigu la teknologiajn kapablojn de la Tria Mondo, kaj frontu la demandon pri eksporto de kulturaj produktoj. La okcidentaj potencoj sukcesis eviti decidojn pri ekzemple limigo de la libereco de ĵurnalistoj raportantaj el la Tria Mondo, dum la evolulandoj sukcesis teni la atenton de la granda publiko ĉe la esenca maljusteco de la reganta komunika malekvilibro.

3.10. Monda Komunika Jaro

Intertempe, tamen, la debato plivastiĝis por tuŝi Unuiĝintajn Naciojn, kiu en 1978 starigis Komitaton pri la Informpolitiko kaj Informa Agado de UN; kaj ĝi ankaŭ ligiĝis al debatoj en la Internacia Telekomunika Unio pri la disdono de telekomunikaj frekvencoj. Fine, sed nur post sufiĉe streĉitaj debatoj, la Ĝenerala Asembleo de UN decidis deklari la jaron 1983 Monda Komunika Jaro. Rezulte de forta lobiado fare de la okcidentaj nacioj, tamen oni decidis, ke la kostoj de la Jaro estu financataj de nedevegaj kontribuoj.

3.11. La krizo ĉe Unesko

La maltrankvilo de la okcidentaj landoj tamen restis: Usono ne kontribuis al la kostoj de la Monda Komunika Jaro – nek ĝiaj aliancanoj tion faris. Tamen, la anonco de la Jaro stimulis la agadon de la triamondaj nacioj, kiuj entuziasme distrumpetis pri

la Nova Monda Informa kaj Komunika Ordo. Fine, en decembro 1984, Usono (nun sub prezido de Ronald Reagan) faris drastan paŝon: ĝi retiriĝis el Unesko. Kiel la plej granda kontribuanto al ĝia buĝeto, Usono faris bilancon kaj trovis, ke la avantaĝoj membri en Unesko ne egalas la malavantaĝojn. Ĝi uzis du argumentojn: la t.n. NOMIKO reprezentas “politikigon” de Unesko, kaj Unesko mem misuzas siajn rimedojn kaj malbone administras sin. “Tra la pasintaj kelkaj jaroj,” ĝi deklaris en sia anonco de retiriĝo, “ni esprimis nian maltrankvilon, ke la politika kaj ideologia emfazo de Unesko kaj ĝia buĝeta kaj mastruma evoluo damaĝas la efikecon de la organizaĵo. Ni devas diri, ke tia evoluo estas lokita multe for de la originaj principoj de ĝia Ĉarto. Ni sentas ankaŭ, ke la organizaĵo servas la politikajn celojn de la membroj-nacioj anstataŭ plenumi sian internacian mision.” Sekvis Usonon per sindistancigo de Unesko la brita registaro de Margaret Thatcher kaj la registaro de Singapuro. La rompo inter Unesko kaj Usono ankoraŭ daŭras, kvankam multaj homoj forgesis kial ĝi okazis (Usono ree aliĝis al Unesko en la jaro 2002, dum la prezidenteco de George W. Bush, por faciligi la kampanjon kontraŭ terorismo, sed denove ekŝiĝis en 2019 dum tiu de Donald Trump).

La atako kontraŭ la misuzo de rimedoj ĉe Unesko daŭris eĉ post la retiriĝo de Usono, ĉar Usono starigis revizoran komisionon pri Unesko, kiu klopodis identigi mispaŝojn financajn. La komisiono havis malpli da sukceso ol oni ŝajne antaŭvidis, sed la reputacio de Unesko estis sufiĉe makulita, kaj la neŭtralaj landoj estis sufiĉe timigitaj, ke la fajro malaperis el la kampanjo NOMIKO, kaj fine la diskolapso de Sovetunio en la lastaj 1980aj jaroj tiel ŝanĝis la internacian politikan pejzaĝon, ke la tuta debato perdis sian energion.

3.12. La posta historio

En la 1990aj jaroj, la fokuso iom ŝanĝiĝis. Oni relative vaste akceptis la ideon, ke jam ekzistas komunikaj rajtoj, ne nur pro Artikolo 19 sed ankaŭ pro pluraj aliaj internaciaj instrumentoj, kiuj traktis demandojn kiel la rajtojn de ĵurnalistoj, la liberecon de la gazetaro k.s. Oni ankaŭ agnoskis la problemon de lingva malegaleco, kiun oni en kelkaj kazoj ligis al la problemaro nordo-sudo (Phillipson 1992). Se temas specife pri la rajto je komunikado, teknologiaj evoluoj tiel ŝanĝis la kuntekston, ke la demando pri komunikaj rajtoj fariĝis aspekto de komunika sistemo, kiu jam tutmondiĝis: la kresko de Interreto, la diversiĝo de teknologiaj komunikrimedoj, la apero de la poŝtelefono, la redukto de ideologiaj streĉitecoj – ĉio ĉi igis la ŝtatojn nur unu aro da agantoj inter multaj, inkluzive de mondaj komercaj telefonaj retoj, internaciaj televidkanaloj, kaj la ĝeneraliĝo de elektronikaj libroj. La fluo kiu komenciĝis en la 1990aj jaroj nun fariĝis inundo. Oni certgrade revivigis la debaton pri rajto je komunikado, sed en iom alia formo. Eĉ en plej diktaturaj landoj, la ekonomia neceso ligiĝi al la tutmonda reto de scioj, kaj la ĝeneraliĝo de la kulturaj kaj sociaj moroj de la okcidento, ne eblas eviti kontakton kun ekstero: rajto je komunikado en certaj terenoj fariĝis superflua, dum en aliaj (rezisto al la forto de la internacia komunika industrio, ekzemple) ĝi fariĝis neatingebla.

4. Lingvo kaj la rajto je komunikado

4.1. Lingvo kaj la kultura produktado

Malfacilas elpensi pli profundan kaj kompletan ekzemplon de komunikado ol la lingvo (pri lingvo kaj komunikado vidu Tonkin 1983b). Ni emas konsideri la lingvon kiel naturan parton de la homeco – tiel naturan, ke ĝi apenaŭ bezonas atenton. Oni ne malpravus se oni rigardus la lingvon kiel biologian imperativon. Aliflanke, lingvoj estas simbolaj sistemoj kiuj samtempe kreas apartajn kulturojn kaj estas kreataj de tiuj kulturoj. Unuopaj lingvoj estas asociitaj kun difinitaj kulturoj.

La lingvo restas fundamenta elemento en la kulturaj produktoj de la diversaj landoj – iliaj libroj, filmoj, kantoj, televidaj programoj, novaĵoj. Sen troigo oni povas diri, ke la lingvo fundamentas la kulturalan interŝanĝon. En tiu senco ĝi povas inkluzivi (materialo en komuna lingvo facile cirkulas) kaj ekskluzivi (materialo en unu lingvo destinita al ricevantoj, kiuj parolas alian lingvon, ne funkcias sen specifa interveno por funkciigi ĝin). Komunikantoj, kiuj uzas grandan, tre disvastigitan lingvon, havas evidentan avantaĝon. Materialo en la angla lingvo povas facile cirkuli en anglalingvaj landoj, sed ankaŭ en landoj kie la angla estas bone scipovata kiel aldona lingvo (dua, tria, aŭ kvara, depende de la cirkonstancoj). Dume, materialo en, ni diru, la nederlanda aŭ la joruba multe malpli facile cirkulas, malgraŭ sia eventuala kvalito.

4.2. Lingvoj kaj kultura konkurenco

En la 1970aj jaroj, kiam la ideo de Monda Komunika Ordo unue aperis, la laŭtemeco de lingvaj demandoj estis memevidenta al tiuj, kiuj profunde pensis pri la internacia *lingva* ordo – la distribuo de lingvoj tra la mondo; la rilato inter fortaj kaj malfortaj lingvoj; la situacio de la evoluantaj landoj, kies lingva pejzaĝo ofte estis bunta, pro la arbitra desegnado de landlimoj fare de la koloniaj potencoj en la deknaŭa jarcento, kaj pro la esence loka, neevoluinta karaktero de la memmastrumaj ekonomioj de tiuj landoj (Tonkin 1979). Estas malfacile rezisti ne nur la lingvon sed ankaŭ la kulturajn valorojn de la iamaj koloniaj mastroj, kiam iliaj lingvoj konsistigas la vojon al internacia kunlaboro. Kelkaj intelektuloj de la Tria Mondo – Ali Mazrui kaj Ngugi wa Thiongo (Kenjo), ekzemple, aŭ Chinweizu Ibekwe (Niĝerio) – elokvente prezentas tiun problemon: la afrikaj lingvoj riskas perdi siajn kulturajn valorojn fronte al la forto de la (tamen okcidenta kaj koloniisma) angla lingvo. Modernigo ja alportas avantaĝojn, sed modernigo, kiu samtempe detruas la antikvajn valorojn de difinita popolo, riskas nur elradikigi kaj fremdigi tiun popolon.

Abram de Swaan, en sia studo de tio kion li nomas la monda lingva sistemo (de Swaan 2001), klare montras, ke oni kutimas fari elekton pri la akiro de aldonaj lingvoj surbaze de simpla kalkulo, en kiu oni investas laŭ la antaŭvidata frukto de tiu investo.

Tiu, kiu hodiaŭ lernas la anglan lingvon havas evidentajn avantaĝojn internacie kaj, ĉiam pli kaj pli, ankaŭ loke. Kaj ju pli tutmondiĝas nia socio, des pli valoras la angla lingvo.

4.3. Lingvo kiel varo

En tiu senco la angla lingvo (aŭ iu ajn alia granda lingvo) similas varon, kiu cirkulas internacie kaj kiu kreas neegalajn ligojn inter la homoj depende de ilia kapablo uzi tiun lingvon. Regas profunda egaleco inter la britoj kaj usonanoj unuflanke kaj (ni diru) la germanoj kaj italoj aliflanke: dum la britoj kaj usonanoj apenau devas doni atenton al klerigo de siaj lernejoj pri la angla lingvo (krom en la normala lingvokultiva senco), la germanoj kaj italoj estas devigataj investi grandajn sumojn je tuta sistemo por lernigi al siaj lernejoj la anglan lingvon. Kaj ilia investo estas proporcie multe malpli granda ol la investo postulata en landoj multlingvaj, kie jam la lernejoj devas instrui al siaj lernantoj pliajn enlandajn lingvojn aŭ pliajn regionajn – aldone al la neceso instrui la anglan. Ĝuste tiaj landoj estas landoj de la Tria Mondo, kies limigitaj rimedoj malegalas al la postuloj de ofte subfinancata lerneja sistemo. Tiel la malegalecoj inter la riĉaj kaj malriĉaj landoj estas daŭrigataj ankaŭ per la lingva malegaleco. Kvankam diversaj pensantoj (ekzemple Philippe Van Parijs 2011) proponis sistemon de kompenso inter la landoj pro tiu malegaleco, tiu ideo, evidente malavantaĝa al la riĉaj landoj, ne gajnis seriozajn politikajn adeptojn.

Apenaŭ necesas atentigi, ke tiaj neegalecoj estas ne nur lingvaj (eventuale eĉ ne ĉefe lingvaj) sed ankaŭ komunikaj. Rajto je komunikado, kiu ne traktas ankaŭ la lingvan malegalecon, estas laŭdifine limigita rajto.

5. Esperanto kaj komunikaj rajtoj

5.1. La rilatoj kun Unesko

Kiam en la 1970aj jaroj la ideo de rajto je komunikado komencis cirkuli, la esperantistoj, ĉefe pere de Universala Esperanto-Asocio, frue engaĝis sin en la debato. Jam en 1974-75 estis establita en Parizo tielnomata laborgrupo de reprezentantoj de UEA ĉe Unesko. Jam depost la rezolucio de la Ĝenerala Konferenco en Montevideo en 1954 kaj la samtempa akcepto de Universala Esperanto-Asocio kiel neregistara organizaĵo en kunlaboro kun Unesko, la Asocio havis sian reprezentanton en Parizo. Sed nun tuta teamo eklaboris. Baldaŭ, sub gvido de lerta emerito, Emmanuel Chicot, la laborgrupo ekaktiviĝis inter la neregistaraj organizaĵoj, kaj dum iom da tempo Chicot eĉ prezidis la estraron de NROj ĉe Unesko. La grupo uzis ĉiujn rimedojn je sia dispono, interalie serion de franclingvaj “Esperanto-dokumentoj” ekeldonataj de CED en la franca, angla kaj Esperanto.

La laborgrupo de UEA petis kaj ricevis pli ol unu privatitan renkontiĝon kun la Ĝenerala Direktoro M'Bow. Ĝi sentis sin libera peti tion interalie ĉar certagrade liberaliĝis la politiko de UEA rilate aliajn organizaĵojn. UEA anoncis sian pretecon utiligi “pozitivan neŭtralecon” en siaj rilatoj kun aliaj asocioj – do trovi komunan grundon kaj kune labori por atingi komunajn rezultojn. M'Bow tiel impresiĝis pri la laboro de UEA, ke li akceptis inviton de la Asocio alparoli la 62-an Universalan Kongreson de Esperanto en Rejkjaviko, kies kongresa temo ja estis “La rajto je komunikado”. Lia parolado, kiu pritraktis interalie la laboron de Unesko pri komunikado, laŭdis la Asocion pro ĝia laboro por internacia interkompreniĝo kaj pacaj rilatoj.

5.2. Lingvoj ĉe la Komisiono MacBride

Kiam stariĝis la Komisiono MacBride, UEA estis frua interesiĝanto pri ĝia laboro. Tamen, la argumento, ke la lingvo fundamentas la internacian komunikadon kaj sekve bezonas atenton en la laboro de la Komisiono ne renkontis signifan subtenon. Pro la debato pri NOMIKO en la Ĝenerala Konferenco, la atento de la Komisiono direktiĝis preskaŭ ekskluzive al la amaskomunikiloj kaj donis neniun atenton al lingvoj – kvazaŭ komunikado kaj lingvado estus du diversaj fenomenoj. Pro sistema atento al kelkaj plej influaj membroj de la Komisiono – ĉefe Mustapha Masmoudi, kun kiu reprezentantoj de UEA relative ofte interagis – UEA sukcesis enmetigi en la finan version de la raporto (ĝi mankis en la malneto) pli ampleksan aludon al la lingva dimensio de komunikado (kaj eĉ mencion de la ideo de universala lingvo: MacBride 1980:50), kaj rekomendo I.2 de la Komisiono estis direktita al lingvaj demandoj.

Oni povus diri, ke la insistado de UEA kaj ĝiaj reprezentantoj fine konvinkis la Komisionon MacBride agnoski la lingvan dimension. Se la ĉefa kialo de tiu preskaŭa preterrigardo estis la cirkonstancoj, kiuj starigis la Komisionon, alia kialo estis lokita pli profunde en la sciencoj: la sciencoj de lingvoj (la lingvistiko) kaj tiuj de komunikado evoluis en la dua duono de la dudeka jarcento laŭ paralelaj linioj, kiuj apenaŭ intertuŝis. (Unu el la esceptoj al tiu ĝeneraligo estis speciala numero de *Journal of Communication* de 1979, kiu traktis “la politikon de lingvoj”. Vidu mian kontribuon, pri lingva egaleco: Tonkin 1979. Similan temon mi traktis en Esperanto: Tonkin 2004.)

En la 1970aj jaroj (denove parte sub la influo de la esperantistoj – afero foje neglektata de la historiistoj: vidu Tonkin 1997) la disciplino de socilingvistiko estis ankoraŭ naskiĝanta, kaj la interrilato de lingva politiko kaj komunika politiko estis nur parte komprenata. La grandaj kontribuoj al tiu temo venis nur en la 1990aj jaroj, do multe pli poste.

Krome, la angla lingvo faras klaran distingon inter *communication* kaj *communications*. La unua rilatas al la ago komuniki dum la dua aludas al la rimedoj de komunikado. La jaro 1983 estis nomita World Communications Year, ne World Communication Year.

5.3. Pliaj intervenoj de UEA

Ĉiuokaze, UEA daŭrigis sian agitado. En marto 1979, sekve al la kongresa temo en Rejkjaviko, ĝi organizis kolokvon en Parizo por neregistaraj organizaĵoj pri la rajto je komunikado (Chicot 1983). Inter la kolokvaj konkludoj estis la konstato, ke, aldone al jura agnosko de tiu “nova rajto”, necesas agnoski “la gravecon de la lingvaj obstakloj al komunikado kaj la tiurilatan utilecon de neŭtrala internacia lingvo.” Rezulte de tiu kolokvo de 1979, la NROj ĉe Unesko en Parizo, laŭ propono de UEA en la konferenco de NROj fine de 1979, formis laborgrupon pri “problemoj de komunikado”, kiu siavice organizis plian kolokvon en novembro 1982, organizatan de grupo de NROj inkluzive de UEA, pri “kultura komunikado”. Unu el la ĉefparolantoj estis Claude Piron, psikologo kaj specialisto pri lingvaj demandoj, kiu samtempe estis konata esperantisto.

La postan monaton, en decembro 1982, la laborgrupo de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj organizis en Novjorko konferencon “Monda Komunikaj Jaro 1983: Lingvo kaj Lingvolernado” (Tonkin 1983a), kiun partoprenis specialistoj pri lingvoj, diplomatoj, kaj reprezentantoj de diversaj fakoj de UN. La celo evidente estis klopodi trovi lokon por la lingva dimensio en la problemo de modernaj komunikiloj – temo aparte taŭga en la usona kunteksto pro starigo fare de Prezidento Carter, tuj antaŭ sia malvenko en la prezidenta baloto, de Prezidenta Komisiono pri Lingvoj kaj Internaciaj Studoj.

El tiu komenco en Novjorko fine de 1982, kreskis serio de ĉiujaraj konferencoj kune organizataj de CED (t.e. la esplora fako de UEA) kaj la fako de UN pri konferencaj servoj. La serio daŭris regule ĝis en la 1990ajn jarojn. Plurajn jarojn poste ĝi reviviĝis en la formo de Studogrupo pri Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj, kiu ĉiujare organizas simpozion ĉe UN.

5.4. La Sofia rezolucio rekone al Esperanto

Ne estus troigo atribui la rezolucion de la Ĝenerala Konferenco de Unesko pri la centjariĝo de Esperanto, akceptita en la sesio en Sofio en 1985, al la sistema sinmontro de UEA en la aferoj de Unesko jam de la mezaj 1970aj jaroj. Ĉefe dank’ al la diligenta laboro de Tibor Sekelj kaj Barbara Despiney, tiu rezolucio atingis la tagordon kaj estis aprobita. La rezolucio rekonis la “konsiderindan progreson” de Esperanto “kiel ilo de kompreniĝo inter popoloj” kaj notis “la grandajn eblojn, kiujn Esperanto prezentas por la internacia kompreniĝo kaj la komunikado inter popoloj de malsamaj naciecoj.” Estas ankaŭ signife, ke Sekelj lobiis ĉefe inter la neŭtralaj kaj evoluantaj landoj, kie li trovis simpatian rekonon de la lingva dimensio en la internaciaj rilatoj. (La teksto de la rezolucio estas trovebla en la komencaj paĝoj de la Jarlibro de UEA kaj ankaŭ ĉe la retpaĝaro de UEA, uea.org.)

Sed la puto ĉe Unesko estis jam venenita: la ekŝigo de Usono kaj Britio kaj la malferma malamikeco direktita al la Ĝenerala Direktoro M’Bow fare de la okcidentaj

potencoj jam kondamnis al neglekto ĉiun diskuton pri la rajto je komunikado (por ne paroli pri la lingva dimensio de tiu rajto), ĉar la diversaj landoj ne volis perdi la amikecon de Usono, kiun ili bezonis pro aliaj, ofte komercaj kialoj. La profundaj ŝanĝoj en la monda politiko de tiu epoko ankaŭ ŝanĝis la scenejon ĉe Unesko: venis nova Ĝenerala Direktoro, kaj la iama disputo pri komunikiloj estis puŝata flanken. Tamen, UEA estis klare prezentinta sian vidpunkton: la lingva dimensio de la komunikado bezonas nian atenton je ĉiuj niveloj. Ĝenerale, ekzistas bonaj rilatoj inter UEA kaj la oficejo de la Ĝenerala Direktoro, dank' al efika surloka agado de la reprezentantoj de UEA.

6. Konkludo

En la 1990aj jaroj oni dediĉis malmultan atenton al la rajto je komunikado, kvankam komence de la nova jarcento la demando de komunikaj rajtoj leviĝis denove en iom alia formo. (Eta simptomo: la fakto, ke la tria Nitobe-Simpozio, kiu okazis en Tokio en 2004, havis kiel titolon *Al nova internacia lingva ordo*: Lee Chong-Yeong & Liu Haitao 2004.) Intertempe, la teknologia evoluo, kiel ni jam notis, refasonis la internacian scenejon: ĝi igis unuopulojn malpli facile silentigeblaj – kiel dolore konstatis pluraj diktaturaj landoj en lastaj jaroj – kaj ĝi parte puŝis la ŝtatojn el sia rega pozicio rilate al la grandaj internaciaj firmaoj. Eĉ la lingva demando ŝanĝis sian formon en mondo kie Google-translate estas ĉiam je la dispono de ordinaraj homoj, satelitaj bildoj de grandaj partoj de la konata mondo estas facile alireblaj, kaj tradiciaj ideoj de privateco aspektas ĉiam pli kaj pli kurioze eksmodaj. Ŝanĝiĝis la internaciaj agantoj: la ŝtatoj ne plu havas monopolon de la internaciaj rilatoj. Tamen, tio ne nepre signalis pli da libereco – nur, ke tiu libereco renkontis novajn limigojn el novaj rolantoj, kaj ke kreskis la nivelo de falsaĵoj en cirkulo en la novaj medioj. (Nuntempe svarmas gazetara komentario pri la problemo de tiel nomataj falsaj novaĵoj: vidu ekzemple ĉefartikolon “Who Controls the Conversation” en *The Economist*, 24-30 oktobro 2020, p. 11-12.)

Unu afero tamen klaras: eĉ se oni ne ĉiam tion rekonas, lingvaj demandoj kaj komunikaj demandoj estas proksime ligitaj. Ankoraŭ hodiaŭ la formulantoj de komunika politiko nesufiĉe interkonsiliĝas kun la formulantoj de lingva politiko, kaj la fakuloj pri teknikaj aspektoj de komunikado foje forgesas, ke simplaj homoj, kun siaj lingvaj kaj kulturaj lojalecoj kaj kapabloj, siaj kredoj kaj siaj ĉiutagaj bezonoj, sidas en la centro de la hodiaŭa komunika labirinto. Se nia celo estas egaligi la lingvojn kaj la komunikajn rimedojn, ni faras jen kaj jen progreson, sed la vojo restas tre longa.

Bibliografio

- Beetham, David & Kevin Boyle 2000: *Kio estas demokratio?* Rotterdam: UEA.
- Chicot, Emmanuel 1983: La novembra kolokvo ĉe Unesko. En: *Esperanto* 76/6: 111-112.
- Coupland, Nikolas 2013: *The Handbook of Language and Globalization*. Oxford: Blackwell.
- de Swaan, Abram 2001: *Words of the World*. Cambridge: Polity.
- Donnelly, Jack 2001: Ethics and international human rights. En: Jean-Marc Coicaud & Daniel Warner (red.): *Ethics and International Affairs*. Tokyo: United Nations University Press. 128-160.
- Falk, Richard A 1981: Theoretical foundation of human rights. *Human Rights and State Sovereignty*. New York: Holmes & Meyer. 33-62.
- Fisher, Desmond & L. S. Harms (red.) 1983: *The Right to Communicate: A New Human Right*. Dublin: Boole Press.
- Glendon, Mary Ann 2001: *A World Made New: Eleanor Roosevelt and the Universal Declaration of Human Rights*. New York: Random House.
- Lapenna, Ivo 1952: *Aktualaj problemoj de la nuntempa internacia vivo*. Roterdamo: La aŭtoro.
- Lee Chong-Yeong & Liu Haitao (red.) 2004: *Al nova internacia lingva ordo / Towards a New International Language Order*. Rotterdam: UEA.
- MacBride, Sean k.a. 1980: *Many Voices, One World: Communication and Society Today and Tomorrow*. Paris: Unesco.
- Morsink, Johannes 1999: *The Universal Declaration of Human Rights: Origins, Drafting, and Intent*. Philadelphia: University of Pennsylvania Press.
- Moyn, Samuel 2010: *The Last Utopia: Human Rights in History*. Cambridge MA: Harvard University Press.
- Nussbaum, Martha 1997: *Cultivating Humanity*. Cambridge, MA: Harvard University Press.
- Phillipson, Robert 1992: *Linguistic Imperialism*. Oxford: Oxford University Press.
- Skutnabb-Kangas, Tove & Robert Phillipson (red.) 1995: *Linguistic Human Rights: Overcoming Linguistic Discrimination*. Berlin & New York: Mouton de Gruyter.
- Spolsky, Bernard (red.) 2012: *The Cambridge Handbook of Language Policy*. Cambridge: Cambridge University Press.
- Tonkin, Humphrey 1979: Equalizing language. En: *Journal of Communication* 29/2: 124-133.
- 1983a: World Communications Year and the New World Information and Communication Order: Their significance for the teacher of foreign languages. En: *World Communications Year 1983: Language and Language Learning*. New York: Center for Research and Documentation on World Language Problems / Esperantic Studies Foundation. 11-40.
- 1983b: Language and International Communication. En: Desmond Fisher & L. S. Harms (red.): *The Right to Communicate: A New Human Right*. Dublin: Boole Press. 185-195.
- 1984: A right to international communication? En: George Gerbner & Marsha Siefert (red.): *World Communications: A Handbook*. New York & London: Longman. 69-79.
- 1997: Language as a social phenomenon: A perspective on the emergence of sociolinguistics. En: Christina Bratt Paulston & G. Richard Tucker (red.): *The Early Days of Sociolinguistics*. Dallas: Summer Institute of Linguistics. 247-252.
- 2004: Lingva egaleco en internaciaj rilatoj. En: Lee Chong-Yeong & Liu Haitao (red.) 2004: *Al nova internacia lingva ordo / Towards a New International Language Order*. Rotterdam: UEA. 31-39.

— 2006: *Lingvo kaj popolo: Aktualaj problemoj de la Esperanto-movado*. Rotterdam: UEA.
Van Parijs, Philippe 2011: *Linguistic Justice for Europe and for the World*. Oxford: Oxford
University Press.

Vasak, Karel 1978: *Les dimensions internationales des droits de l'homme*. Paris: UNESCO.

Demandoj kaj diskuttemoj

- 1) Kio estas la diferenco inter naturaj rajtoj kaj konstituciaj rajtoj?
- 2) Ĉu laŭ vi, rajtoj estas universalaj – do komunaj al ĉiuj homoj? Kiel vi defendus vian respondon al tiu demando?
- 3) Iuj rajtoj estas aktivaj kaj interagaj. Donu ekzemplon.
- 4) En kiuj cirkonstancoj kolektivaj rajtoj kaj individuaj rajtoj povus kolizii?
- 5) Kion la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj diras pri lingvoj kaj lingvaj rajtoj?
- 6) Kiel lingvaj rajtoj diferencas de aliaj individuaj rajtoj?
- 7) Kio estas la ligo inter lingvaj rajtoj kaj la rajtoj de minoritatoj? Kiel oni difnu minoritaton?
- 8) Kion la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj diras pri libereco de esprimo?
- 9) Kion ĝi diras pri la rajto ricevi kaj havigi informojn?
- 10) Kiel oni povas difini rajton je komunikado?
- 11) La debato pri rajto je komunikado ligiĝis al du politikaj realaĵoj: malkoloniigo kaj la politika divido inter “okcidento” kaj “oriento” – kun kiaj implico kaj rezultoj?
- 12) Kiun rolon Esperanto ludis en la debato pri rajto je komunikado?
- 13) Kiun estontecon, laŭ vi, havas la demando pri rajto je komunikado kaj pri komunikaj rajtoj ĝenerale?

Humphrey TONKIN

Inkludo kaj ekskludo en la lingvopolitiko

Resumo

Lingva politiko ne povas esti neŭtrala: ĝi ĉiam havas siajn celojn kaj rezultojn. Ofte estas videbla la procedo de “elita fermiĝo” en kiu elito favoras sin mem per ekskludo de lingvoj kaj ties uzantoj kiuj aliokaze havus potencon. Variantojn de tiu ideo oni povas observi en postkolonia Afriko, kie elitoj favoris certajn lingvojn por certaj celoj kaj ekskludas aliajn. En post-rasapartiga Sudafriko, la deziro de la registaro inkluzivi ĉiujn civitanojn rezultigis la rekonon de tiel granda nombro de lingvoj, ke ilia egala enkonduko superis la praktikan kapablon de la registaro kaj produktis hierarkion de favoro, en kiu dominas la angla. Similajn emojn oni vidas en tute alia strukturo – Unuiĝintaj Nacioj; kaj tio estas eĉ pli evidenta en la Eŭropa Unio, kie klopodo egale trakti 24 lingvojn neeviteble produktis en la praktiko similan hierarkion. Tiaj tendencoj ne estas novaj: ili ankaŭ observeblas tra la jarcentoj en la evoluo de presa kulturo en Eŭropo. Tiu ĉi ĉapitro estas parte bazita sur anglalingva artikolo, Tonkin 2007.

1. Enkonduko: elita fermiĝo

Fakuloj pri lingvopolitiko ofte emfazas la fakton, ke ne povas ekzisti “neŭtrala” lingvopolitiko. Ĉiu politiko havas sian politikan kaj ideologian celon, kaj eĉ manko de lingvopolitiko povas esti formo de politiko ĉar ĝi ebligas al la posedantoj de potenco en difinita situacio konservi tiun potencon ankaŭ en la sfero de la lingvo. Ĉe ĉiu politiko, kaj ĉiu lingva situacio ĝenerale, oni povas demandi al si: Kiu profitas el tiu ĉi situacio aŭ politiko kaj kiu ne profitas? Ĝis kiu grado ĝi ŝanĝas la potencajn rilatojn inter la homoj? Ĉu ĝiaj publikaj celoj estas fakte plenumataj, aŭ ĉu ili produktas aliajn problemojn?

En artikolo, kiu aperis antaŭ tridek jaroj kaj havis grandan efikon, la lingvisto Carol Myers-Scotton (1990) priskribis fenomenon, kiun ŝi nomis “elita fermiĝo” – formo de lingva konduto, en kiu elito konstruas baron inter si kaj la ĝenerala popolo per kreo de lingvaj politikoj, kiuj “instituciigas la lingvajn morojn de la elito, ĉu pere de oficiala politiko ĉu per neformale establitaj uzonormoj, cele al limigo de aliro al sociekonomika moviĝopovo kaj politika potenco fare de homoj, kiuj ne posedas la bezonatajn lingvajn morojn” (Myers-Scotton 1990). Se, en multlingva lando, oni oficialigas nur unu lingvon aŭ nur kelkajn lingvojn, tiuj, kiuj ne scipovas tiun lingvon aŭ tiujn lingvojn, riskas ne havi plenan aliron al la politika vivo nek al ŝtataj institucioj kaj instancoj. En multaj landoj, la kleriga sistemo uzas nur unu lingvon, kvankam la popolo havas plurajn denaskajn lingvojn. Ideale, la infanoj ricevas instruon per ĉiuj

tiuj lingvoj, sed foje tio ne eblas, ĉu ĉar politika elito tion ne deziras ĉu ĉar mankas la rimedoj (financoj, instruistoj) por ĝin atingi. En iuj landoj, oni specife laboras por superi la lingvan deficiton de tiuj, kiuj ne parolas la oficialan lingvon denaske (ofte kun malebenaj rezultoj, tamen), sed en aliaj landoj tiuj homoj estas esence ekskluzivitaj.

Rilatan fenomenon oni vidas en landoj kie prestiĝa formo de la oficiala lingvo, parolata nur de iuj el la parolantoj de tiu lingvo, estas tiel estimata, ke tiuj, kiuj ne uzas tiun prestiĝan formon, estas barataj el postenoj aŭ estas alimaniere mistraktataj de la elito. Siatempe en Britio, la tiel nomata anglalingva Norma Ricevita Elparolo – la parolmaniero de la ĉefaj universitatoj, la aristokrataro, kaj la privataj lernejoj – rolis kiel neformala baro al tiuj, kiuj parolis alimaniere, ĉefe per regionaj akĉentoj. Eĉ tiuj akĉentoj havis sian hierarkion: dum la skota parolmaniero estis akceptebla en multaj medioj, tiu de la nordo de Anglio, aŭ tiu de la sudokcidento, ne estis. Hodiaŭ tiu situacio ŝanĝiĝas, kvankam iom da antaŭjuĝoj ankoraŭ restas.

Ne estas malfacile imagi al si situaciojn en kiuj tia elita fermiĝo, ĉu per formalaj politikoj ĉu per neformalaj kutimoj, povus forŝlosi signifajn partojn de la popolo (Wright 2002). Se oni ne havas la rajton uzi sian lingvon, aŭ sian lingvan varion, oni ne emas egale prosperi kiel aliaj. Tamen, eĉ en cirkonstancoj kie ŝajne oni praktikas inkluzivon, la rezulto povas esti mala: mi volas en tiu ĉi eseo ekspliki kial tiu simpla principo de inkluzivo/ekskluzivo ne sufiĉas por klarigi ĉiujn ekzemplojn de tia diskriminaciado; aŭ, pli precize, mi volas priskribi aldonajn situaciojn en kiuj politiko de ŝajna inkluzivo povas havi tute malan efikon.

2. La kazo de Afriko

2.1. Elita fermiĝo postkolonia

Myers-Scotton verkis sian artikolon por priskribi konatan afrikan fenomenon: situacion, en kiu abundo de lingvoj ene de unu ŝtato kvazaŭ postulas ian decidon, kiujn lingvojn favori kaj kiujn lingvojn malfavori. Pro la imperia disdivido de tiu kontinento en la deknaŭa jarcento, en kiu etnoj estis fordividitaj, kaj vastaj teritorioj kun centoj da lokaj lingvoj estis kvazaŭ perforte kunmetitaj en vastajn koloniajn posedaĵojn, mankis lingvoj kiuj unuigis eĉ relative malgrandan parton de la loĝantaro. La imperiaj potencoj kompreneble utiligis la proprajn eŭropajn lingvojn (Bamgbose 2007 nomas ilin “importitaj” lingvoj), kiujn la afrikanoj estis devigataj lerni por eĉ minimume partopreni la regadon de tiuj artefaritaj landoj, aŭ almenaŭ komunikiĝi kun siaj superuloj. En certaj kazoj, post sendependiĝo for de siaj koloniaj mastroj, afrikaj ŝtatoj esence daŭrigis kiel antaŭe, uzante la anglan aŭ la francan (foje la hispanan aŭ portugalan) kiel la lingvon de la ŝtato. Kvankam la mastroj malaperis en siajn proprajn landojn, restis indiĝena elito klerigita de tiuj mastroj, kiu eĉ se ĝi celis inkluzivon, esence agis por teni la potencon en la propraj manoj. Temis do pri formo de imperiismo sen imperio, de koloniismo sen kolonioj, fakte klasika ekzemplo de elita fermiĝo. En

kelkaj landoj, ekzemple Tanzanio, oni klopodis kontraŭpesi tiun hegemonion de la ekskolonia potenco per evoluigo de iu loka lingvo – ĉi-ekzemple la svahila, kiun oni celis (ne plene sukcese) fari interlingvo por ĉiuj tanzanianoj.

2.2. Sudafriko: De fermiĝo jura al fermiĝo kutima

En Sudafriko, kie en la tempo de la verkiĝo de la artikolo de Myers-Scotton, ankoraŭ regis la doktrino de rasapartigo, la situacio estis pli komplika. La registaro uzis du oficialajn lingvojn – la anglan kaj la afrikansan – la denaskajn lingvojn de la blanka minoritato. La kresko de la afrikansa el sia pozicio de esenca malprestiĝo en la unua duono de la jarcento al pozicio de egaleco kun la angla lingvo ekde la 1970aj jaroj estas en si mem interesa fenomeno, sed ne necesas klarigi tiun evoluon ĉi tie, krom por atentigi, ke ĝia leviĝo donis avantaĝojn al la malriĉaj blankuloj kontraŭ la neblankuloj, samtempe demokratigante la *blankulan* socion kaj ekskluzivante la ni-grulan. (Hodiaŭ, tamen, la rolo de la afrikansa rapide malkreskas kompare al la angla. Vidu Alexander 2011; Krog, Morris & Tonkin 2010. Pri la sudafrika situacio ĝenerale, vidu du Plessis 2000, Reagan 2001, 2002 & 2019, Webb 2004. Utilan superrigardon de la tutafrika situacio donas Albaugh 2014.)

Fakte, la registaro ne tute neglektis la afrikajn lingvojn de la granda plimulto de la popolo, eĉ se ĝi draste limigis financojn por neblankula edukado ĝenerale. Ĝi eĉ kultivis kaj fortigis la afrikajn lingvojn, sed nur en la tielnomataj bantustanoj, la enklavoj kie oni setligis la afrikanojn por restigi ilin for de tiuj pli evoluintaj partoj de la lando, kiuj estis esence rezervitaj al la blankuloj. Do, ne temis pri politiko de kompleta neglekto de aliaj lingvoj, sed pri ilia uzo por ekskluzivi kaj forŝlosi la neblankulojn: varianto, do, de elita fermiĝo.

2.3. Sudafriko post rasapartigo

En la periodo 1990-1994 oni esence malmuntis *apartheid*, rasapartigon. Kiam en 1996 la post-rasapartiga registaro finis sian ellaboron de nova sudafrika konstitucio, la konstitucio enhavis ses “fondajn preskribojn” el kiuj tiu pri lingvoj estis la plej longa kaj plej detala. La konstitucio oficialigis (paragrafo 1.6.1) entute dekunu lingvojn – la anglan kaj afrikansan plus naŭ afrikajn lingvojn – kaj ĝi aldonis (1.6.2) la jenan rimarkon: “Rekonante la historie reduktitajn uzadon kaj statuson de la indiĝenaj lingvoj de nia popolo, la ŝtato devas fari praktikajn kaj pozitivajn paŝojn por levi la statuson kaj antaŭenigi la uzadon de tiuj lingvoj.” Pliaj detaligoj klarigas, ke la nacia registaro kaj la provincaj registaroj rajtas uzi iujn ajn el la oficialaj lingvoj, “prenante en konsideron la uzadon, praktikeblon, kostojn, regionajn cirkonstancojn kaj ekvilibron de la bezonoj kaj preferoj de la loĝantaro” (1.6.3a), sed ke ĉiu registaro devas uzi minimume du oficialajn lingvojn.

Malgraŭ la konstituciaj provizoj en Sudafriko, la realo estis kaj restas alia. La bravaj esperoj de la nova registaro, ke oni povas simple rekomenci denove de la komenco, kaj ke oni povas per unu bato forigi la heredaĵon de la pasinteco, bedaŭrinde montriĝis tro ambiciaj. Se la iama blankula registaro sukcesis konvinki sin mem pri la malsupereco de la afrikaj lingvoj, ĝi ankaŭ sukcesis konvinki la parolantojn de tiuj lingvoj: malgraŭ ĉio, oni daŭre identigis prosperon kaj progreson (kaj ĉefe prestiĝon) kun la blankulaj lingvoj, kaj precipe la angla – lingvo kiu ludis esencan rolon en la liberiĝo de la sudafrika popolo. Eĉ en plej bonaj cirkonstancoj, egala traktado de ĉiuj dekunu lingvoj postulus enorman investon en kaj korpusa kaj statusa planado. Pluraj tiuj lingvoj havis neniun aŭ minimuman historion de uziĝo kiel registaraj lingvoj, kaj sekve mankis terminoj por esprimi la burokrataĵojn de komplika ŝtato. La homoj en influaj pozicioj en la provincaj kaj tutlanda registaroj estis edukitaj en la angla aŭ la afrikansa (ĉefe la angla) sub la malnova reĝimo, kaj, eĉ se ilia unua lingvo estis, ni diru, la zulua, ili ne havis vortprovizion por plenumi siajn burokratajn kaj politikajn devojn en tiu lingvo, nek (ni libere konfesu) grandan emon.

(Ni notu parenteze, ke PaNSALB, la Tut-Sudafrika Lingva Komisiono, estas la ĉefa registara institucio repondeca pri evoluigo de la afrikaj lingvoj, sed mankas al ĝi mono, kaj ĝi ĉiuokaze havas reputacion pri korupto. Leĝo de 2012 pri la uzo de oficialaj lingvoj celis fortigi la uzon de afrikaj lingvoj en registaraj instancoj, sed la akto, kvankam ĝi negative efikis la uzon de la afrikansa, ne multe ŝanĝis la situacion en la praktiko.)

Kaj la manko de rimedoj estis akuta. La registaro, kiu antaŭe liveris servojn ĉefe al blankuloj kaj nur minimume al aliaj, nun devis zorgi pri pluroble tiom da civitanoj de ĉiuj rasoj. Sekve, mankis mono por lingva evoluigo (kvankam pluraj kuraĝaj iniciatoj estis faritaj), kaj ĉiuokaze la ĝenerala popolo, malgraŭ siaj denaskaj lingvoj, vidis, ke la eŭropaj lingvoj, kaj ĉefe la angla, malfermas por ili novajn ekonomiajn horizontojn nealireblajn pere de la afrikaj lingvoj. Sekve, la bela lingva politiko de la nova ŝtato, kvankam ĝi starigis certajn gravajn lingvaj rajtojn, kaj malfermis novajn eblecojn por la afrikaj lingvoj, estis pli simbola ol reala: en la praktiko ĝi ne povis, nek (ĝis nun) povas, liveri la deziratajn rezultojn.

2.4. Prestiĝo kaj lingvo

En la sudafrika kazo, la unua formo de elita fermiĝo, en kiu certaj lingvoj estas rajtigitaj kaj aliaj ne, ja ne estis la baza problemo. Tian fundamente juran problemon havis la neblankuloj en la epoko de rasapartigo fronte al la angla kaj afrikansa; sed la politiko de lingva akcepto en la nova konstitucio renversis tiun diskriminacion. Nun temis pri la pli subtila dua formo de elita fermiĝo, laŭ kiu la prestiĝo de certaj lingvoj superatutis tiun de la aliaj. Fakte, en tiu ĉi kazo, kaj sekvante la konstitucion, ĉie la angla lingvo estis akceptita kiel unu el la lingvoj de provinca administrado, dum la aliaj lingvoj havis pli varian sorton. Sekve, la angla fariĝis kaj daŭre fariĝas sudafrika

interlingvo transportanta la lingvan diversecon. Eĉ la afrikansa suferas en tiu ĉi nova lingva reĝimo: ĝi perdas iom post iom sian influon.

Se oni konsideras, ke la afrikansa estas la unua lingvo ne nur de la blankuloj sed ankaŭ de granda parto de la hinddevena aŭ miksrasa loĝantaro, okazis neta transiro de potenco al la homoj de ĉiuj rasoj, kiuj regas plej bone la anglan. Kvankam la bilanco ne estas pure negativa, oni povas baze resumi la situacion tiel, ke, anstataŭ iri de du lingvoj al dekunu, la lojaleco de la elito estas pli kaj pli koncentrita je la angla lingvo, kies prestiĝa situo asocias ĝin kun ekonomia prospero kaj kosmopolita kulturo. Neniu diktas al la sudafrikanoj, ke ili favoru la anglan: la anoncita lingva politiko eĉ diras malon. Sed manke de realigebla lingva politiko, okazas inversa evoluo: la lando transiras al speco de federala unulingvismo kaj for de la esperata multlingvismo.

Se en Sudafriko temus nur pri unu aŭ du afrikaj lingvoj aldone al la angla kaj afrikansa, eble la registaro trovus rimedojn por transformi kaj adapti tiujn lingvojn. Sed, frontante naŭ nove oficialajn lingvojn, la registaro apenaŭ povis komenci plenumi siajn konstituciajn devojn: nerealismaj atendoj cedis al la realismo (sed malegaleco) de liberaj lingvaj merkatoj.

3. La kazo de la Eŭropa Unio

3.1. EU post ekspansio

Elita fermiĝo okazas ne nur je la nacia nivelo sed ankaŭ je la internacia. Mi volas nun turni la atenton al la situacio de supernacia organizaĵo, la Eŭropa Unio, ĉar ĝi montras interesajn paralelojn kun la sudafrika situacio. Por fari tion, mi komencos per eta rakonto.

La Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) estis fondita antaŭ sepdeko da jaroj por esplori la mondan lingvan diversecon kaj la kondiĉojn por faciligi komunikadon. La Centro, kiu eldonas la revuon *Language Problems and Language Planning*, kaj de tempo al tempo organizas internaciajn konsultiĝojn, neniam havis kiel celon la eliminon de lingva diverseco, sed daŭre celas solvojn, kiuj ne estas diskriminaciaj kaj ne favoras unu etnan lingvon super ĉiuj aliaj. Ĝia baza koncepto, se bazan koncepton ĝi havas, estas tio, ke la lingva diverseco restu, sed ke ekzistu mekanismoj por komunikiĝi inter la diversaj lingvoj. CED uzas por sia laboro ne nur la etnajn lingvojn sed ankaŭ Esperanton. Tiel, ekzemple, ĝia revuo *LPLP* publikigas resumojn de ĉiuj tie aperantaj artikoloj ankaŭ en Esperanto.

Fine de julio 2005, internacia grupo de sciencistoj, parlamentanoj kaj registaraj funkciuloj renkontiĝis en Vilno, Litovio, en simpozio organizita de CED por pridiskuti la lingvopolitikajn implicojn de ekspansio de la Eŭropa Unio. Inter la ĉeestantoj estis pluraj figuroj, kies verkoj estas konataj al fakuloj pri lingvopolitiko kaj lingvoplanado – David Graddol, Robert Phillipson, Philippe Van Parijs, François Grin, Abram de Swaan, John Edwards, Paulin Djité, Ina Druviete, kaj aliaj. Jam unu el la lingve plej

komplikaj mondaj politikaj strukturoj (almenaŭ se temas pri formala lingvopolitiko), la Eŭropa Unio (EU), sidis tiam ĉe la rando de ensorbo de pliaj dek membroj en 2005 (Cipro, Ĉeĥio, Estonio, Hungario, Latvio, Litovio, Malto, Pollando, Slovakio, Slovenio) kaj ankoraŭ du (Rumanio, Bulgario) en 2007. En sia fina komuniko de 2005, la grupo resumis la situacion jene:

Inter la multaj demandoj levitaj de la plimultigo de la membraro de la Eŭropa Unio estas la demando pri lingvoj. Kvankam la Traktato de Romo antaŭvidis egalecon de statuso por la naciaj lingvoj en la institucioj de EU, konsiderinde altiĝis la baroj al efektivigo de tiu principo, en la nuna situacio de 25 ŝtatoj-membroj kun 21 oficialaj lingvoj, pli ol 25 regionaj kaj minoritataj lingvoj, kaj multaj iom grandaj enmigrintaj lingvokomunumoj, ĉiuj kun tre diversaj nombroj de parolantoj. Sen atenta, sistema, kaj bone financata aliro al mastrumo de la multlingva karaktero de EU, la lingvoj kaj kulturaj valoroj de iuj el la pli malgrandaj ŝtatoj kaj neŝtataj lingvogrupoj povus minaciĝi, kun sekva kompromito de la principo de egaleco inter EU-membroj kaj malfermiĝo al novaj specoj de konflikto kaj lukto en kaj inter nacioj.

Kiel ni jam notis per la ekzemplo de Sudafriko, la evoluo priskribita en tiu ĉi kunveno de fakuloj en Vilno neniel novas, sed ankaŭ ne en Eŭropo. La demando kiel rekoni diversecon kaj samtempe certigi efikan komunikadon jam antaŭe leviĝis en multaj kunteksto. La “principo de egaleco”, al kiu la fakuloj aludas, estas kerna politika principo, sed ĝin kontraŭpezas aro da ekonomiaj realaĵoj bazitaj je la neegala distribuo de rimedoj kaj potenco. Ekonomia kapitalo kaj lingva kapitalo emas sekvi saman vojon. La ĉefa tasko de demokrata registaro, fakte ĝia esenco, estas trovi ekvilibron inter ekonomia evoluigo unuflanke kaj politika inkluzivo aliflanke (Grin 2008 faras distingon inter “efikeco” kaj “justeco”). Similan taskon, kiel federacio de registaroj, havas la Eŭropa Unio.

3.2. Multlingvismo en EU

Se oni aplikas tiun principon al lingvaj demandoj, oni tuj trovas paradokson. La laŭstatuta lingva politiko de EU garantias al ĉiuj oficialaj lingvoj de la membraj ŝtatoj egalan pritrakton: dokumentoj estas tradukataj en ĉiujn tiujn lingvojn; interpretado, ekzemple en la Eŭropa Parlamento, estas liverata en ĉiuj lingvoj. En tiu senco, ĉiu lingvo de ĉiu EU-membro estas egala al ĉiu alia. Kiel lingvoj de regado de la registaroj de siaj landoj, ili estas pli-malpli plene evoluigitaj, plene kapablaj servi la interesojn de la koncernaj ŝtatoj kaj ties popoloj, kaj ili formas la bazon de la leĝaroj de la koncernaj landoj. En tiu rilato, la eŭropa situacio malsimilas kaj superas la malfacilan sudafrikan situacion, kie certaj lingvoj apenaŭ estis antaŭe uzataj kiel lingvoj de administracio. Tamen, en la senco, ke la lingva kapitalo de tiuj diversaj lingvoj estas malekvilibra, ĝi ja similas la sudafrikan situacion.

Kaj, cetere, ne envenas la demando pri minoritataj lingvoj ene de la diversaj ŝtatoj de EU, kies mastrumo, malgraŭ certaj minimumaj garantioj en la juro de EU, estas afero de la unuopaj ŝtatoj.

3.3. Formala lingva politiko kaj prestiĝa lingva praktiko

Malgraŭ la spirito de egaleco, en la ekstera mondo de EU kelkaj lingvoj havas pli grandan etendiĝon ol aliaj. Ekzemple, multaj homoj en meza Eŭropo konas la germanan lingvon; la franca lingvo estas vaste konata en Eŭropo pro sia iama centra rolo en la edukado, kaj uzata ĝis certa grado en reto de landoj tra la tuta mondo (heredaĵo de la kolonia epoko, sed ankaŭ de la periodo en kiu la franca estis la ĉefa kosmopolita lingvo de Eŭropo); la hispana lingvo estas potenca lingvo kun granda etendiĝo preter la Unio, precipe en Centra kaj Suda Ameriko. Sed ĉefe la prestiĝa angla lingvo malfermas vojon ne nur al Britio, Usono kaj la cetera anglalingva mondo, sed ankaŭ al larĝa reto de internaciaj kontaktoj, al la monda ekonomio, al la internacia mondo de scienco kaj teknologio, kaj al vasta aro da kulturaj produktoj. Ĝin scipovas multaj homoj ligitaj ĉu al la formalaj strukturoj de EU ĉu al la ekonomioj de la koncernaj landoj. Ne estas surprize, ke, tiam kiam parlamentanoj de EU renkontiĝas en koridoroj, ili ofte salutas unu la alian en la angla, kaj, spite la fakton, ke la ĉefsidejo troviĝas en la parte franclingva Bruselo, multaj renkontiĝoj inter funkciuloj okazas en la angla lingvo. Tia internacia salutado aŭ internacia renkontado apenaŭ okazus en la malta aŭ la estona, ĉar tiuj lingvoj havas ege limigitan internacian spuron kaj ne estas parolataj ekster Malto aŭ Estonio.

Nun, kiam Britio eksiĝas el EU kaj la angla restas la oficiala lingvo nur de Malto (kune kun la malta) kaj Irlando (kune kun la irlandano), iuj profetas certan retroiron de la influo de la angla. Aliaj argumentas, ke la Briteliro igas la anglan lingvon pli neŭtrala, pli esperanteca, inter la membroj de EU (vidu Mac Giolla Christ & Bonotti 2018). Verŝajne nur la tempo klarigos la aferon.

Malgraŭ tio, ke la lingva reĝimo de EU postulas, ke ĉiuj lingvoj estu traktataj egale, la neformala lingva intertrakto evidente okazas en la lingvo libere elektata de la intertraktantoj. Ofte tiu lingvo estas la angla ĉar la homoj konas ĝin, aŭ ĉar (se temas pri britoj kaj irlandanoj) ili ne konas aliajn lingvojn, aŭ ne konas ilin tiel bone (de Varennes 2012).

3.4. Formala lingva politiko kaj praktika neceso

Plian problemon prezentas la multeco de oficialaj lingvoj en EU. Kiel ni jam rimarkis en la kazo de Sudafriko, se temas pri limigita nombro da lingvoj, estus pli facile adaptiĝi – sed la simpla multeco de oficialaj lingvoj ene de EU igas la situacion, el la vidpunkto de lingva egaleco, nemastrumebla (vidu Ammon 2003, Phillipson 2004; La verko de Phillipson estas inter la plej detalaj pritraktoj, kaj, feliĉe, ĝi ekzistas en Esperanto-traduko. Pri Eŭropo vidu ankaŭ Arzoz 2008, de Swaan 2003, Nic Shuibhne 2002 & 2008, Van Parijs 2004a, 2004b, Tonkin 2007, Pool 1996, Grin 2018, Gazzola k.a. 2018. Vidu ankaŭ la raporton de parlamentano Jill Evans: https://www.europarl.europa.eu/doceo/document/CULT-PR-618224_EN.pdf?redirect).

La laboro de la stabo de EU okazas en unu el kelkaj ĉefaj lingvoj, normale la angla, franca aŭ germana. Eĉ en la Eŭropa Parlamento, kaj kun la plej granda lingva stabo de kiu ajn organizaĵo de la mondo, la EU kun siaj 24 oficialaj (kaj teorie egalaj) lingvoj ne povas trakti ĉiun lingvon egale – almenaŭ preter iu simpla kaj baza nivelo. Unue, ĝi ne havas sufiĉajn rimedojn kaj do ne povas liveri plenajn lingvajn servojn al ĉiu renkontiĝo, kaj, due, en la praktiko la granda plimulto de la agantoj en EU estas plurlingva – kaj nenio devigas (ni diru) estonon paroli estone, precipe se tiu estono volas konvinki la kvin aliajn homojn en malgranda kunsido fari ion, kion ili hezitas fari. Nature, tiu estono, se li kapablas, turnas sin al lingva rimedo pli vaste konata – la angla aŭ la franca aŭ la germana. La protekto de la propra lingvo funkcias se oni estas forta, sed je iu punkto insisto pri uzo de la propra lingvo devas cedi antaŭ la praktikaj realoj de persvadado kaj politika marĉandado (jen la situacio de la franca en lastaj jaroj: iam la francoj insistis uzi ĝin ankaŭ en sciencaj rondoj, sed la bezonoj de komunikado intertempe triumfis super la simbola egaleco, kaj la franca perdas grundon favore al la angla). Kaj se la principo de plena egaleco ne funkcias en la praktiko, la oficiala lingva politiko cedas al situacio de nenia formala lingvopolitiko – kie regas la plej potencaj kaj la malfortaj cedas.

Do, oni havas paradokson: la ekzisto de (nerealisma) lingvopolitiko malfermas terenon kie mankas formala politiko. Iasence, la ekzisto de tia lingvopolitiko bremsas la lingvan ordigon en la praktiko.

3.5. Konkludo: Iluzioj de inkluzivo

Evidente, do, lingvoj povas esti uzataj por inkludi aŭ ekskludi; difinita lingvoelekto kutime faras ambaŭ movojn – per tio, ke ĝi inkludas certajn homojn kaj ekskludas aliajn. Ideale, lingvoelekto tenos ekvilibron inter politika inkludo kaj ekonomiaj nepraĵoj, ebligante unuflanke la generadon de riĉeco kaj aliflanke ĝian distribuon – sen troa kompromito de individua identeco kaj individua libereco. Sed per niaj spertoj en la politika medio, ni scias, ke foje (eĉ, oni diru, ofte), elitoj proponas iluzion de inkluzivo dum ili formas fermitan rondon por konservi profitdonajn kondiĉojn. Tio ja ofte okazas en la funkciado de registaroj, kaj ĝi estas evidenta ankaŭ en ties lingvopolitikaj aspektoj.

4. Kazo el la historio: Eŭropo kaj la alveno de presa kulturo

4.1. La unua komunika revolucio

4.1.1. Papero

La problemo rekoni diversecon kaj samtempe ebligi elitajn komunikadon fariĝas akuta en epokoj kiam nova teknologio malfermas okazojn por nova akumulado de riĉaĵoj, precipe kiam la teknologio enkondukas novajn formojn de komunikado.

Tiun problemon ni vidas tre klare en la periodo de la mezepoko kaj tuj postaj jaroj en Eŭropo.

La unua komunika revolucio eŭropa okazis per dustadia procedo tra kelkaj jarcentoj. La unua stadio estis transiro de pergameno al papero. Kvankam papero ne estis bagatele malaltkosta, kompare kun pergameno ĝi estis nepre pli malmultekosta, interalie ĉar amase produktebla. Braudel memorigas (1981: 397), ke ĝis la apero de presado, 150-paĝa manuskripto postulis la buĉadon de dekduo da ŝafoj.... Papero aperis unue en Hispanio, kaj komerce establiĝis en Italio nur unu jarcenton kaj duonon antaŭ la apero de presarto en Eŭropo (vidu ankaŭ Febvre & Martin 1990/1958: 17-18).

Tiu transiro de pergameno al papero signalis ankaŭ esencan ŝoviĝon de buŝa kulturo al skriba. Skribitaj tekstoj povas transporti mesaĝojn senŝanĝe trans grandaj distancoj (kaj, parenteze, ankaŭ trans tempoj) – necesa elemento en kreskigo de burokratio kaj la starigo de centrigita teritoria regado.

4.1.2. La presarto

La dua stadio estis transiro de manskribado al presado – kio plirapidigis la transiron de buŝo al mano. Unu el la konsekvencoj de tiu ŝanĝo estis la stabiligo de tekstoj: mana kopiado de tekstoj estis ne nur multekosta sed ankaŭ malferma al eraroj, kaj foje intencaj redaktoj: du ekzempleroj de la sama verko malofte komplete samis. Reprodukado de tekstoj estis nestabila kaj nepreciza praktiko, en kiu alproprigo (modifado de tekstoj por akordigi ilin kun la preferoj de difinitaj legantaroj, parafrazo kaj mallongigo, plibonigo) ofte pligravis ol reprodukto. Tiamaniere, tekstoj ŝanĝiĝis, foje tute radikale, per la procedo de transigo, ĉu pro intenco ĉu pro hazardo.

La presarto ebligis multoblan produkton de precize samaj tekstoj – afero, kiu ne nur simpligis la transdonon de informoj, sed ankaŭ ebligis la fidelan disvastigon de tekstoj de oficialaj dokumentoj. Alivorte dirite, la presado ebligis la ekeston (aŭ pludifinon) de la koncepto de normigo: la kreon de pruveble normaj tekstoj, komunan scion kaj diskutadon de tiaj normigitaj tekstoj (de la Biblio, ekzemple), la disvastigon de mapoj, la aperon de aŭtoritataj kaj dissemblaj registroj de leĝoj kaj dekretoj (kaj sekve la starigon de tekste bazitaj juraj sistemoj) (Eisenstein 1979: 80-88). Parenteze mi aldonu, ke la aranĝo de listoj laŭ alfabeto ordo, kvankam jam konata antaŭ la alveno de la presarto, fariĝis pli ofta (kaj sekve konsultolibroj estis pli facile alireblaj).

Indus tamen noti, ke la procedo ne estis centprocente fidinda, precipe en fruaj presitaj tekstoj, pro diversaj alĝustigoj dum presado kaj foje la neceso dufoje komposti por kompletigi faskojn de paĝoj, aŭ pro posta rearanĝo de kajoroj.

La nuna elektronika revolucio, tra kiu ni nun pasas, faris kaj kopiadon kaj alproprigon ankoraŭ pli facilaj, tiel ke tekstoj antaŭe autonomaj povas esti facile ligitaj al aliaj tekstoj en intertekstaj rilatoj, kiuj redefinas ĉion ekde la libro ĝis nocioj de teksta stabileco. Ĉi tiu revolucio portas signifajn implicojn rilate lingvojn kaj lingvoelekton.

(Pri la evoluo kaj influo de la presarto, vidu Braudel 1981, Eisenstein 1979, Febvre & Martin 1990, Steinberg 1961, Taylor 2002. Goldin & Kutarna 2016 proponas provokan komparon inter, unuflanke, la alveno de presarto kaj rilata disvastigo de ideoj kaj, aliflanke, la alveno de cifereca kulturo kaj ties iom simila disvastigo.)

4.1.3. Presarto kaj lingvonormigo

La alveno de presado al Eŭropo en la dekkvina jarcento malaltigis la koston de tekstoj je proksimume la sama tempo kiam kresko de urbiĝo malaltigis la koston de distribuado. Tiel ekestis novaj vulgarlingvaj merkatoj por kulturaj produktoj (libroj, pamfletoj k.s.), en stabilaj tekstoj, kiuj siavice helpis normiĝon de la lingvoj. Tiu evoluo ebligis partoprenon en la loka ekonomio fare de tiuj homoj, kiuj pretis lerni legi kaj skribi, kaj kiuj povis uzi la propran lingvon por tiu celo. Tiel la elito, ligante sin al la nova teknologio de skribitaj tekstoj, vaste malfermis sin al nova publiko – sed samtempe apartigis sin for de la loĝantoj en la provincoj kaj la analfabeteco, kiu tie regis. La lingvoj de la urboj estis plenpotencaj; tiuj de la provincoj estis forŝlositaj. Krome, la disdivido de okcidenta Eŭropo en apartajn nacilingvajn kulturojn komplikis la internacian fluon de homoj kaj ideoj kaj fortigis la enlandajn potencohavantojn.

La normigo de vulgaraj lingvoj pere de presitaj tekstoj, kiu akompanis tiujn evoluojn, estis unu elemento en la apero de normoj kaj reprodukteblo kiel komunaj konceptoj en la civila vivo – konceptoj disvastigitaj de la centro al la periferio (Rugie 1998: 15). Ĝi estis ligita ankaŭ al kreskanta kapitala investo en ĉiam pli preciza reprodukteblo pro teknologia progreso.

4.1.4. Presarto kaj kapitalo

La presado estis malmultekosta kompare kun skribista kopiado – kaj ĝi estis praktikebla pro alveno de papero al la okcidenta mondo. Sed, spite la relativan malmultekostecon de papero, la presado postulis konsiderindan investon en paperaj staploj kaj en presmaŝinaro – kio metis la potencon en la manojn de kapitalistaj presistoj, kiuj financis mastrajn presistojn (vidu ekzemple la diskuto de Febvre kaj Martin pri la familio Buyer: Febvre & Martin 1990/1958: 118-120) kiuj, siavice, interesiĝis maksimumigi siajn profitojn kaj redukti siajn kostojn. Eldonistoj (plejparte sekularaj, kapitalistaj, kaj regantaj la politikon de urbaj ekonomioj) kaj presistoj havis investitan intereson en alfabeteco en vulgaraj lingvoj ĉar ĝi fortigis ilian potencon kaj iliajn profitojn – kaj la tekstoj tiel produktataj fortigis reprodukteblon en tiuj lingvoj kaj sekve normigon (Wright 2004: 28-29). Ili volis atingi kiel eble plej grandan publikon kaj sekve elektis la plej vaste parolatajn lingvojn en la propraj regionoj, en ties plej vaste uzataj formoj.

4.1.5. Kresko de naciaj lingvoj

Tiu investo en presitaj tekstoj (kaj do en la kapablo legi kaj skribi) iom post iom etendiĝis ankaŭ al filantropiaj institucioj: lernejoj, kolegioj, bibliotekoj – do tiuj institucioj, kiuj siavice produktis la alfabetkapablan eliton bezonatan ne nur por subteni la normigitan lingvon kaj ties akompanan presan teknologion, sed ankaŭ (kaj pli grave) por formi la burokratojn, advokatojn kaj investistojn esencajn al la evoluigo de la nacia ŝtato. En tiu procedo, la malnovaj transskribejoj kaj la religiaj fondaĵoj, kiuj subtenis ilin, fariĝis ĉiam pli marĝenaj, kaj evoluanta sekularigita socio aperis por reorganizi siajn religiajn establaĵojn je nacia bazo kongrua kun la disdivido en ŝtatojn, laŭ la principo *cuius regio, eius religio*: “kies regno, ties religio” (t.e. “tiu kiu posedas la regnon diktas ankaŭ la religion”). Fakte sekularigo jam delonge komenciĝis se temas pri la transskribejoj (t.e. la fabrikoj, en kiuj oni mane kopiis tekstojn), kiuj pli kaj pli transiris el pastrara al universitata egido (Febvre & Martin 1958/1990: 19, 23; pri starigo de naciecoj, vidu Hastings 1997). Iom post iom okazis simila procedo se temas pri lingvoj: la lingvo de la princo fariĝis la lingvo de la kortego, kaj la lingvo de la kortego fariĝis la negoca lingvo de la lando: *cuius regio, eius lingua*.

Neparolantoj de la elektita lingvo, aŭ de nenormigitaj formoj de tiu lingvo, estis ekskluzivitaj. Ekskluzivitaj estis ankaŭ tiuj, kiuj ne sciis legi kaj skribi, ĉar la elito fermiĝis ĉirkaŭ sia norma lingvo kaj siaj tekstoj. Provincaj lingvoj kaj lingvouzoj ne subtenataj de normigitaj ekonomioj kaj institucioj (inkluzive de preskulturo) velkis kaj malfortiĝis. En sia analizo de tiu ĉi evoluo, la franca sociologo Bourdieu utiligas la koncepton de lingva merkato en kiu individuoj konkurencas por regi komunikan kapitalon: “Reduktitaj al la statuso de kuriozaj aŭ popolaj ĵargonoj, ambaŭkaze netaŭgaj por formalaj okazoj, popularaj uzoj de la oficiala lingvo submetiĝas al sistema senvalorigo” (Bourdieu 1991: 54). De Swaan (1993, 2001) priskribas rilatojn en kiuj la unuo ne estas la homo sed la lingvo, sed la baza nocio estas sama: kelkaj lingvoj havas pli grandan sferon de influo ol aliaj, kaj tiuj, kiuj havas grandan sferon de influo fariĝas dezirataj de tiuj, kiuj ne posedas ilin, tiel gajnante plian valorigon. La malgrandaj lingvoj, malpli negoceblaj, perdas valoron kompare kun la grandaj.

Ni notu krome, ke la novaj naciaj lingvoj havis sian simbolan gravecon: kapablo bone uzi ilin estis signo de kulturiteco, kaj ekzisto de riĉa literaturo en difinita lingvo estis signo de ĝia digno.

4.1.6. Preskulturo kaj skriba tradicio

Facile oni povas konkludi, ke la procedo priskribita ĉe de Swaan estas manifestiĝo de iu natura leĝo, ne influebla de homa interveno (fakte, tion de Swaan emas impliki). Tamen, la ekonomiaj kaj politikaj fortoj, kiuj produktas tiun “naturan” evoluon, estas farataj de la homoj (Hamel 2006). Steinberg (1961: 120-126) citas la kazojn de la baltaj

lingvoj kaj la finna, kaj de la ĉeĥa, eŭska kaj kornvala. La kornvala ne ĝuis la avantaĝojn de presado (kaj normigo) kaj sekve mortis; la aliaj restis apenaŭ vivaj kaj apenaŭ normigitaj sed ja havis sian tre limigitan presan kulturon. Kiam en la 19-a jarcento naciismaj movadoj ekestis ĉirkaŭ kelkaj tiuj lingvoj, ili tamen releviĝis, kaj ilin poste revivigis tre specifaj lingvorilataj politikoj. La finna, ĉeĥa kaj baltaj lingvoj refortiĝis en dua ondo de naciŝtatismo, ebligita parte de la skriba tradicio establita de la presarto.

4.2. Konkludo

Oni vidas en tiu ĉi eta historia skizo, ke la kresko de normigitaj lingvoj estas zig-zaga alterna procedo de elita malfermiĝo kaj elita refermiĝo – de inkluzivo por poste ekskluzivi. La dua granda komunika revolucio – tiu, tra kiu ni nun pasas – havas siajn similecojn kun tiu antaŭa. Same kiel la antaŭa, ĝi evoluas tra pli ol unu jarcento: unue revolucio en transporto (la homoj de la deknaŭa kaj dudeka jarcentoj trovis novajn metodojn por movi homojn de loko al loko, rezulte de eltrovo de novaj fontoj de povo, vapora, elektra, petrola), kaj due revolucio en la transigo de informoj elektronike, kiu komenciĝis per telegrafio en la deknaŭa jarcento kaj akcelis en la dudeka jarcento, kiam ĝi fine kunfandiĝis kun novaj metodoj por prilabori tiujn informojn, nome la invento de komputiloj. Nova komuniĝo produktis novajn politikajn formaciojn; la lingvo estis ŝlosila elemento en la mastrumado kaj faciligo de tiu komunikado kaj sekve de politikaj procezoj.

5. Lingva unueco kaj simbola diverseco

5.1. Anglio: lingva unueco kaj regionismo

En Anglio kaj ĝiaj okcidentaj teritorioj, ekspansio de nacia lingvo estis plejparte konsekvenco de ekonomiaj oportunaĵoj kaj politika kaj milita neceso: scio de la angla, la lingvo de la kortego, estis ĉiam pli necesa por simpla pluvivo. Sed tiun emfazon je la centreco de la angla akompanis simbolaj agnoskoj de regionismo. La unua ano de la dinastio Tudor, Henriko Sepa (reganta de 1485 ĝis 1507), emfaxis sian kimran devenon. Kiam Ŝekspiro verkis la dramon *Henriko Kvina*, fine de la deksesaj jarcento, li plenigis la scenejon per reprezentantoj de regiona identeco, kiuj estis samtempe absurdaj kaj amindaj, samtempe provincaj kaj lojalaj. En pli posta epoko, en la deknaŭa jarcento, la Reĝino Viktoria sin identigis kun Skotlando – identeco, kiun la reĝa familio ankoraŭ kultivas se temas pri la regionoj: tradicie, la kronprinco heredas la dukecon de Kornvalo kaj post difinita tempo estas rekonata kiel Princo de Kimrio. La celo de tiu ĉi zorge ekvilibrigita sistemo de regionaj identecoj estas krei senton de unueco en diverseco (senton pli kaj pli pridemandata en la nuna politika situacio). Per pretendo al identeco kun siaj foraj teritorioj, la reĝa familio liveras al la registaro

pretekston, kiu ebligas daŭran centrigon de la maŝinaro de ekonomio kaj politiko. Oni valorigas regionan identecon, sed sukceso kondukas al la metropolo: idento iras unu direkton, praktiko alian.

En la brita kazo, gestoj al regionismo tra la jarcentoj estis nur gestoj: cedo bezonataj por atingi la celon de ekonomia kaj politika unueco (Hechter 1975). Tiu regionismo en lastaj jaroj inkluzivas limigitan lingvan diversecon – sed diversecon en kiu ne regas dubo pri la supera statuso de la angla. Foje, tamen difinita ŝtato (Hispanio, ekzemple: vidu Arzoz 2008) permesas multe pli grandan nivelon de multlingvismo ĉar lingva diverseco necesigas ĝin. Foje, la registaro tamen neglektas la multlingvisman politikon. Ebligo aŭ eĉ kultivado de regionaj lingvoj povus, paradokse, esti la prezo pagenda por teni certan nivelon de lingva unueco (May 2001). Fakte, ju pli diversaj estas la lingvoj, des pli facile estas konservi difinitan lingvon kiel la ekonomian interlingvon. Jen la jam notita kazo de Sudafriko (Reagan 2019, Wright 2002, Webb 2004).

Mi uzas la terminon “interlingvo” (*lingua franca*) tre konscie: je tutmonda skalo oni kutime rigardas la anglan lingvon ne kiel subpremanton, sed kiel lingvon de novaj eblecoj, lingvon de liberigo (vidu ekzemple du Plessis 2000: 103-104), interalie ĉar oni emas ignori la rolon de denaskaj parolantoj aŭ preferas aliĝi al ili, malgraŭ la bezonata investo.

5.2. Tolerado

Evidente, sen tre truda, kaj sekve tre multekosta, lingvopolitiko, kiu engaĝas ĉiujn formojn de lingvoplanado (korpusa, statusa, akira: Cooper 1989) kaj pretas fiksi limojn je utiligo de certaj lingvoj por povi kultivi aliajn, la hierarkiigo de oficialaj lingvoj estas preskaŭ neevitebla. Mia emfazo je la praktika bezono de pli truda politiko pri multlingvismo en Sudafriko, ekzemple, eĥas distingon, kiun faras Tove Skutnabb-Kangas (2000; vidu ankaŭ Skutnabb-Kangas & Cummins 1988) kaj precipe Stephen May (2001), nome la distingon inter tolerobazaj kaj kultivobazaj politikoj. La unua permesas la uzon de difinita lingvo sed ne aktive subtenas ĝin; la dua subtenas kaj kultivas. En la praktiko, tamen, estas ofte malfacile distingi inter la du, ĉar ofte la apogo de lingvaj rajtoj estas plenumata per politikoj, kiuj ne frontas la fundamentajn demandojn – kaj sekve la supozata kultivado estas tamen esence nur tolero, aŭ eventuale iu formo de transira dulingvismo, kontraste al stabila dulingvismo.

Kiel Hamel atentigas (Hamel 2006) rilate al tutmondiĝo, la supozata “natura” procedo de tutmondiĝo estas helpata de malkaŝaj naciaj kaj internaciaj politikoj, kun agentoj pli-malpli klare distingeblaj, kies interesoj diktas, ke ili prezentu la procedon kvazaŭ ĝi estas tute natura. Similaj impulsoj ofte maskas lingvopolitikon: lingva ŝoviĝo neniam estas pure natura, sed rezulto de komplikaj home direktitaj fortoj kaj premoj. Ni faru distingon tiurilate inter malmola politiko (malkaŝa, formulita politiko) kaj mola politiko (malpli evidenta, malpli esprimata politiko) – sed *manko* de politiko estas iluzio, same kiel paroli lingvon sen akĉento estas iluzia nocio.

5.3. Lingva kultivado

En Eŭropo, nur en lastaj jaroj okazis sistemaj klopodoj por inversigi la procedojn de lingva malkresko je loka nivelo, per starigo de programoj de lingva revivigo kaj lingva konservado (Fishman 1991, 2001; Grenoble & Whaley 2005). La plej ofte esprimata pravigo de tiaj klopodoj estas la nocio de kultura identeco, ligita al la kredo, ke planata multlingvismo estas pli preferinda ol lingva hegemonio, kaj ke, *en si mem*, lingvoj meritas konserviĝon (ekvilibranta sed kritikan ekzamenadon de tiuj konceptoj oni trovas ĉe Patten & Kymlicka 2003; kaj vidu Ammon 2003). Ofte neesprimita restas la motivoj de politika potenco: lingvaj minoritatoj eble formas potencialajn blokojn de balotantoj, aŭ konsistigas minacon plej bone neŭtraligeblan per cedoj kaj trankviligoj.

Tamen, sen investo, aŭ sen prema politika aŭ socia motivo, lingva revivigo malofte sukcesas. Ĝin ofte fundamentas iu nocio de atingebla perfekteco, nome stabila dulingvismo – tre rara situacio. Sen tia dulingvismo, la *inkluzivo* de la lingvo inter la konstelacio de lingvoj en la koncerna lando kiujn oni antaŭenigas per pozitivaj lingvaj politikoj povus nur konduki al la ekonomia *ekskluzivo* de la koncernaj homoj, ekzemple per kreo de lingva defcito.

6. Simbola diverseco en transnaciaj medioj: la kazo de Unuiĝintaj Nacioj

6.1. Enkonduko: interŝtata lingvopolitiko

Tio kio validas ene de naciaj ŝtatoj validas ankaŭ trans naciaj ŝtatoj. La Eŭropa Unio agnoskas, almenaŭ teorie, la egalecon de ĉiuj lingvoj rekonataj kiel lingvoj de la koncernaj registaroj (pri *provincaj* registaroj la situacio estas iom pli komplika: vidu Nic Shuibhne 2002, 2008). Ĝi tion faras pro komplikaj juraj kialoj, kiuj, almenaŭ laŭ la nuna pritakso, estas konsiderataj necesaj. Tamen, en la praktiko, abundaj politikoj, formalaj kaj neformalaj, tiel efikas, ke ili fortigas lingvojn de pli vasta komunikado, kiel ekzemple la francan kaj la anglan, en la debataj forumoj kaj burokratio (Ammon 2004: 402).

Minoritataj lingvoj ene de la membraj ŝtatoj restas plejparte ekster la ludo. Dum restas *formalaj* politikoj de inkludo, tiuj formalaj politikoj estas nepraktikaj kaj sekve rolas kiel ŝirmilo por ebligi ekskluzivajn procedojn uzatajn en la nomo de praktikeco: “Se ni scius kiel apliki la formalajn politikojn, ni tion farus; sed ili estas tro komplikaj kaj tro kostaj, kaj do en la praktiko ni devas ion alian fari.” Estas ĉiam pli malfacile ŝanĝi praktikojn ol ŝanĝi formalajn politikojn. Sekve, ju pli granda fariĝas EU kaj ju pli multaj la lingvoj, des pli pravigeblaj (pro simpla praktikeblo) estas ekskludaj kaj diskriminaciaj politikoj.

6.2. Lingvoj en UN

Tiaj praktikoj jam delonge observeblas en alia, lingve malpli komplika transnacia organizaĵo, Unuiĝintaj Nacioj (Tonkin 1996). Dudek jarojn antaŭ la kunveno en Vilno menciita en la komenco de tiu ĉi ĉapitro, iom simila renkontiĝo, ĉi-foje ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko, diskutis ne la formalajn lingvajn politikojn de UN sed la neformalajn praktikojn (Tonkin & Edwards 1984). Jam de la komenco, la lingva politiko de UN rilatis nur parte al lingva kompreniĝo: la oficialaj lingvoj de la organizaĵo pli-malpli respegulis la rezulton de la Dua Mondmilito, same kiel tiuj de la Unua Mondmilito respegulis ties rezulton – sed kun aldono de lingva teknologio: aldoniĝis simultana interpretado, dank’ al la elektronike faciligita interpreta sistemo de IBM, provita en la Internacia Labora Organizaĵo en la jaroj antaŭ la Dua Mondmilito, kaj unue plene aplikata en la Nurenbergaj Procesoj kaj poste en UN (Gaiba 1998).

Hodiaŭ, kompreneble, aldoniĝis pliaj teknikaj progresoj, interalie sendrataj sistemoj – kaj la regado de la tuto ebligita de komputiloj, kiu permesis pli vastan simolan rekonon de certaj naciaj lingvoj (registaraj lingvoj) plejparte por kreskigi ilian prestiĝon (Tonkin 1996).

La Novjorka renkontiĝo notis la kreskantan uzon de la angla en neformalaj interrilatoj inter anoj de la Sekretariato kaj la malkreskantan utilon de la franca (la franca kaj la angla restas la du laborlingvoj de la Sekretariato, dum en la Ĝenerala Asembleo estas seso da oficialaj/laboraj lingvoj). Pli kaj pli, neformalaj politikoj sin trudis al la formalaj, kaj la kresko de laboraj lingvoj en la Ĝenerala Asembleo (la araba aldoniĝis en 1973 al la jamaj kvin lingvoj: angla, ĉina, franca, hispana, rusa), kune kun severaj buĝetaj limigoj, forsuĉis rimedojn, kiujn alikaze oni povus uzi por konservi dulingvismon anglan-francan en la Sekretariato. Tiumaniere, manke de adekvata subteno de formalaj lingvaj politikoj, neformalaj praktikoj subfosadis formalajn atendojn – kaj ju pli ofte tio okazis, des pli ofte falis la utilo de la franca. Tio siavice fariĝis memrealiga procedo: se oni ne insistis ĉiam pri utiligo de la franca, oni tiel reduktis kostojn por lingvaj servoj en tiuj fakoj, certe je la plezuro de la administrantoj de la buĝeto. Rezulte, malgraŭ lingvaj politikoj, eĉ en organizaĵo tiel strikte burokratigita kiel la Sekretariato de UN, la stabila dulingvismo antaŭvidita de la fondintoj cedis al klasika ekzemplo de lingva ŝoviĝo laŭ la direkto de la angla, la ĉiam pli domina lingvo (de Varennes 2012).

Oni povus argumenti, ke, se oni lokas la ĉefsidejon de UN en Novjorko, oni povas atendi, ke ĝiaj stabanoj preferos uzi la anglan; sed similaj evoluoj estas rimarkeblaj ankaŭ en la oficejo de UN en Ĝenevo, en la sidejo de Unesko en Parizo, kaj en aliaj instancoj de UN. Ilin ofte akceligas la simpla manko de financaj rimedoj.

7. Ree al la Eŭropa Unio: simbola diverseco

7.1. La mito de lingva egaleco

Klare, tio kio aplikiĝas al UN aplikiĝas al la konsiderinde pli komplikaj strukturoj de la Eŭropa Unio. Eĉ antaŭ la akcepto de novaj membroj en la pasinta dudeko da jaroj, EU jam delonge ne sukcesas apogi *en praktiko* tion kion la fondaj dokumentoj postulis *teorie* – egaleco inter ĉiuj registaraj lingvoj de la membraj ŝtatoj (de Varennes 2012).

Unu ekzemplo sufiĉos por klarigi la situacion. La lingva politiko de EU estas bazita sur la tielnomata Regulo 1/58 (Konsilia Regulo 1/58/EEC de 6 oktobro 1958), kiu metas ĉiujn laborajn lingvojn kaj oficialajn lingvojn sur egalan bazon, t.e. aplikante al la operacioj de tiu, kiu tiam nomiĝis EEK (Eŭropa Ekonomia Komunumo), ĉiujn registarajn lingvojn de la membraj ŝtatoj. Komence, tio tuŝis nur kvar lingvojn: la francan, germanan, italan kaj nederlandan. Nun tiu nombro kreskis intertempe al 24, sen materia ŝanĝo de la baza politika principo. En la praktiko, konsiderinda kvanto de EU-juro nun rekonas la juran akcepteblon de pli limigitaj lingvaj praktikoj, precipe en malgrandaj agentejoj. Antaŭ kelkaj jaroj, ekzemple, en la tielnomata kazo Kik, la lingvaj reguloj de la Oficejo por Harmoniigo de la Interna Merkato (kiu traktas komercajn simbolojn) estis kortume aprobitaj malgraŭ tio, ke la koncerna oficejo funkcias nur en la angla, franca, germana, hispana kaj itala. La decido de la kortumo faris distingon inter la “institucioj” de la Eŭropa Komunumo (nun EU) kaj ties “agentejoj”, argumentante, ke la ĉionenhava lingva politiko aplikiĝas nur al la unuaj, ne al la duaj. Tiel, esence nefunkcipova lingva politiko iom post iom subfosiĝas pro la urĝetoj de la momento kaj la deziro eltrovi principojn por ilin pravigi.

Egaleco, unu el la motoraj mitoj de lingvopolitiko, malofte realas sub iu ajn lingva reĝimo: ni povas fari nian eblon instituciigi lingvan egalecon, sed fakte ni tion faras nur kun kunlaboro de la homoj. Lingvoj ne estas agantoj, sed iloj. Homoj fundamente diferencas de la abstraktaĵoj, kiujn ni nomas lingvoj: ili estas engaĝitaj en konstanta retorika lukto por komunika avantaĝo. En tiu lukto, ili ofte parolas pli ol unu lingvon de la koncerna medio, kaj foje eĉ kelkajn; kaj ili serĉas la plej konvenan manieron plenumi sian laboron *por si*, kio malofte konformiĝas kun la atendoj de la formala lingvopolitiko. Se ni atendus iun alian rezulton, ni miskomprenus la homan naturon. Kiel Ammon (2003: 393) memorigas nin, estas tro facile objektivigi lingvojn kaj “trakti ilin kiel biologiajn organismojn anstataŭ kiel sistemojn de socia konduto aŭ sociaj normoj” – eraro iom ofta inter lingvoplanistoj.

7.2. La efikoj de improvizo

Resume, do, ni emas evoluigi formojn de lingvopolitiko, kiuj erare antaŭsupozas socian multlingvismon, ignorante individuan multlingvismon. Alivorte dirite, precipe inter nelingvistoj oni ofte supozas, ke homoj parolas nur unu lingvon kaj ne uzas alian. Do, starigante lingvan politikon en organizaĵo, oni supozas, ke (ekzemple) la britoj parolos sian anglan kaj la francoj sian francan, dum la interpretistoj kaj tradukistoj mesaĝos inter la du. En la realo, tamen, la homoj libere moviĝas ene de multlingva ekosistemo kies naturon fiksas la pritakso de la individuo pri la komunika potencialo de unuopaj lingvoj, kaj kies ĉefa karakterizo estas improvizo. Povus esti, ke, spite formalajn lingvajn politikojn, la francoj utiligos la anglan lingvon por oficejaj konversacioj – dum la britoj ne uzas la francan. Rezulte, iom post iom, preskaŭ neperceptebla, la lingva ekologio de la koncerna oficejo ŝanĝiĝas – kaj se, post tiu metamorfozo, oni dungas franclingvan oficiston, kiu ne emas uzi la anglan, la aliaj oficistoj pritaksos la novulon negative, ĉar “nekonlaborema,” “silentema” aŭ “supereca”. Tiel, en mikra skalo, oni vidas ekzemplon de “elita fermiĝo”. Kaj tiu procedo okazas grandskale en internaciaj organizaĵoj – interalie ĉar ofte tiuj organizaĵoj intence (kaj pro tute defendeblaj kialoj) klopodas malhelpi formiĝon de klikoj de anoj de difinita lando en unu oficejo. Krome, oni selektas homojn kun multlingva kapablo (precipe anglalingva kapablo) por fari internacian laboron – kaj ili utiligas tiun kapablon, fieras pri ĝi, kaj emas forpuŝi tiujn kiuj ne posedas ĝin.

De Swaan, pruntante la terminologion de kemio, nomas tiun ĉi emon preferi unu lingvon super alia pro ĝia komunika potencialo la “kuo-valoru” (Q-value). La alta kuo-valoru de la angla lingvo rezultigas, inter multaj denaskaj parolantoj, emon al anglalingva unulingvismo, dum ĉe parolantoj de aliaj lingvoj ĝi naskas la deziron paroli la anglan lingvon. Van Parijs (2011) montras al rilata fenomeno – tio, kion li nomas “maksimuma komunikado”, en kiu anoj de difinita grupo sin adaptas al la partoprenanto kun la plej malalta lingva kompetento, ĉar adaptiĝo al tiu homo maksimumigas komunikadon, sed surbaze de la minimumeco de la komunika kapablo de la koncerna lingve plej malforta persono. Rezultas, en plej multaj kazoj, malekvilibro favora al parolantoj de la angla.

7.3. Teoria multlingvismo, reala unulingvismo

Fakte, se ni konceptas la Eŭropan Union kiel iasence unu grandan superŝtaton, ni povus bone demandi nin ĉu la konservado de laŭjura multlingvismo (surbaze de nediskriminacio – do de toleremo) verdire faciligas laŭfaktan unulingvismon, dum la plej forta lingvo – la angla – puŝas aliajn lingvojn en hierarkion de ekskluzivo (en kiu la irlanda fieras, ke ĝi ne troviĝas malantaŭ la malta, kaj la portugala same fieras rilate la hispanan, dum la parolantoj de la grandaj lingvoj ignoras egale la irlandan kaj la

maltan, kaj apenaŭ agnoskas la italan kaj hispanan). Tio estas la vidpunkto ekzemple de Phillipson 2003 kaj aliaj, kaj certagrade ankaŭ Ammon 2004.

Tiu hierarkio de ekskluzivo minacas eĉ la mezgrandajn lingvojn, kiel Ammon (2001) sugestas. Ĉu EU moviĝas iom post iom al situacio en kiu la angla dominas, kaj aliaj lingvoj estas puŝataj laŭ variaj intensoj al la periferio (de Varennes 2011)? Kaj ĉu la malfacilecoj de EU rilate la lingvan demandon estas nur simptomo de pli vasta homogeniĝo ligita al tutmondiĝo (vidu Maurais & Morris 2003; Tonkin 2003, Tonkin & Reagan 2003)?

8. Alternativaj aliroj en EU

8.1. Kompensoj kaj distribua justeco

Iuj, kiel de Swaan, argumentas, ke, malgraŭ la negativaj aspektoj de tiu ĉi homogeniĝa fenomeno, ĝi estas neevitebla, kaj sekve estus plej bone simple plibonigi la scion de la angla lingvo inter neanglalingvaj popoloj. Aliaj sugestas, ke plej bone oni transigu iom de la rezulta neegala ŝarĝo al la angleparolantoj, per limigo de uzo de la angla en certaj cirkonstancoj (Van Parijs 2004a, ekzemple – sed vidu François Grin 2004), aŭ eĉ utiligo de iu imposta sistemo, kiu devigus la anglalingvanojn kompensi la neanglalingvanojn pro tio, ke ili devas akiri la anglan lingvon por funkcii internacie (iasence io simila jam okazas en landoj, kiuj subvencias la konservon kaj akiron de regionaj lingvoj). Pluraj fakuloj (Pool 1996, Van Parijs 2003 & 2011, Kymlicka & Patten 2003, ekzemple) aludis al principoj de distribua justeco por fortigi siajn argumentojn: parolantoj de la domina lingvo havas devon helpi la aliajn akiri tiun lingvon kaj tiel dividi kun la malavantaĝaj neparolantoj la avantaĝojn, kiujn ili ĝuas pro la simpla hazardo, ke ili parolas la dominan lingvon. Bedaŭrinde la nuna situacio funkcias precize male: ju pli malgranda la denaska lingvo, kaj sekve ju pli granda la komunika defecito, des pli multe la parolantoj de tiu lingvo devas elspezi (ekzemple per fremdlingva instruado en la lernejoj) por gajni aliron al la domina internacikomunika reto. Tamen, se oni rigardas la anglan lingvon kiel esence interlingvon kiu neŭtrale funkcias por malfermi la komunikan reton al ĉiu, oni povas malatenti ĝian hegemonian rolon – kaj tio estas despli facila pro la prestiĝo kaj statuso ligita al la angla kiel la lingvo de la aktuala ideologio de tutmondiĝo.

Pool kaj Fettes (1998; kaj vidu Pool 1996, Fettes 2003a & 2003b, kaj Patten & Kymlicka 2003) sugestas, ke ekzistas pluraj malsamaj aliroj al mastrumado de translingva komunikado, alternative al dominado fare de unu etna lingvo (lingvolernado cele al plurlingvismo, tradukado, helpa lingvo kiel Esperanto, aŭ diversaj aliroj pere de teknologio), kaj ke oni esploru ĉiujn alternativojn antaŭ ol decidi pri racia lingva politiko. Sed, kiel multaj fakuloj atentigis (ekzemple Wright 2004, Spolsky 2004), malofte la decidoj pri lingvaj demandoj estas racie farataj. Kion, do, malgrandaj ŝtatoj faru por ŝirmi siajn lingvojn kontraŭ lingvoŝoviĝo dum samtempe ili subtenas egalecon de komunikado, kaj sekve maksimuman inkluzivon, en EU kiel tuto?

8.2. La nuna situacio en EU

Subteno de egala lingva komunikado kaj konservado de lingva kaj kultura diverseco estis la kernaj demandoj frontataj de la partoprenantoj en la jam menciita renkontiĝo en Vilno (vidu Nitobe Symposium 2005). Alvokante al “streboj disvolvi justan, demokratian kaj altkvalitan komunikadon inter ĉiuj eŭropanoj,” tiuj fakuloj altiris apartan atenton al certaj “problemaj evoluoj” kiuj “ŝajnas larĝe disvastigitaj” en la Eŭropa Unio:

- Neglekto de lingvaj demandoj en la politika decidofarado sur terenoj kiel ekzemple supera edukado, sciencaj esploroj, kaj amaskomunikiloj, kun negativa efiko je la valoroj kaj bezonoj de malgrandaj naciaj kaj nenaciaj lingvokomunumoj;
- Tolerado aŭ kultivo de normoj de lingva praktiko, kiuj kontraŭas la principojn de multlingvismo kaj lingva egaleco, ofte estigante situaciojn en kiuj homoj kun limigita aŭ nenia rego de la angla lingvo ne povas partopreni egalece en la politika decidoprocezo en EU;
- Troa dependo je ekzistantaj lingvorilataj institucioj kaj ideoj, kiujn oni ne evoluigis por alfronti demandojn en eŭropa aŭ tutmonda kunteksto — tendenco kiu refortigas persistan mankon de lingva konscio kaj faka kono en registaroj je ĉiuj niveloj.
- Rimarkinda redukto de la instruado de lingvoj aliaj ol la angla, malpliigante la ŝancojn ke eŭropanoj akiros profundajn komprenon kaj estimon de la kulturoj de najbaraj landoj, kaj refortigante eksterproportcian ĉeeston de britaj kaj usonaj kulturaj produktoj tra EU;
- Evito de malferma publika diskutado de lingvopolitiko, kaj precipe de realecaj alternativoj al la nuna situacio de oficiala sed dubkvalita multlingvismo ligita al la nereguligita kaj neegaleca disvastiĝo de la angla.

Dum la partoprenantoj en la renkontiĝo sin dediĉis al “justa, demokrata kaj altkvalita komunikado inter ĉiuj eŭropanoj,” verŝajne neniu estis tiel naiva kredi, ke lingvo parolata de kelkaj miloj da homoj sur mediteranea insulo (la malta) tenos pozicion de strikta egaleco kun la angla lingvo parolata en pli-malpli ĉiu angulo de la mondo. Sed malantaŭ tiu ĉi politika fikcio de egaleco estas antaŭsupozo (egale ĥimera) pri sincera klopodo flanke de ĉiuj homoj por atingi tiun egalecon. Tamen, malantaŭ tiu plia fikcio (fikcio konstruita tamen sur la starigajn principojn de la Unio) estas politika fikcio, kiun ni verŝajne pli serioze traktos, nome ke ĉiuj civitanoj de EU havas la rajton, tiel kiel eblas, al egala traktiĝo. Sed la fikcio de lingva egaleco, ĉar oni akordas al ĝi nur limigitan rekonon eĉ en la formalaj agadoj de EU, restas neobservata ekster tiuj formalaj strukturoj kaj ricevas rapidan ignoron.

8.3. Malekvilibro en rilataj kampoj

Tamen, la abstrakta principo de lingva egaleco estas ofte ligita al problemoj pli facile rekonataj de la funkciuloj de EU – problemoj, kiuj en si mem ne estas “nur” lingvaj problemoj, sed foje rekte kontraŭas la nocion de lingva egaleco.

Ekzemple, la forteco de la angla lingvo kiel lingvo de edukado kaj scienca esploro donas enormajn avantaĝojn al anglalingvaj universitatoj, kiuj povas facile allogi eksterlandajn studentojn (kun la rezultaj enspezoj) kaj integri ilin en sian normalan kursaron. Por almenaŭ parte nuligi tiun avantaĝon, neanglalingvaj universitatoj jam de kelkaj jardekoj enkondukas kursojn instruatajn en la angla lingvo, komence iom malrapide kaj zorge, sed nun lavange – precipe je la magistra nivelo (vidu ekzemple Hultgren k.a. 2014; Vila & Bretxa 2015). Unu el la nerektaj rezultoj de tiu tordo de la norma lingva politiko de tiuj universitatoj estas redukto de la kapablo de la koncernaj landaj lingvoj esprimi la ideojn transdonitajn: mankas terminologio, aŭ almenaŭ tiu terminologio estas ĉiam malpli konata de la profesoroj kaj studentoj. La verkoj legataj en tiuj kursoj ne estas tiuj de enlandaj verkantoj, sed de verkantoj el anglalingvaj landoj. Rezulte, ekestas lingva fendo inter, ekzemple, la kemio, kiun oni lernas en mezlernejoj, kaj la (alilingva) kemio, kiun oni lernas en universitatoj. Tiel, per iompostioma rampado, la angla lingvo sin trudas en la studprogramojn kaj sekve la sciojn de la koncerna disciplino, kaj tutaj lingvaj domenoj transiras de la denaska lingvo al la t.n. “tutmondiga” lingvo.

8.4. La estonteco: agaddirektoj al pli kompleta lingva politiko en EU

8.4.1. Komuna kadro

La partoprenantoj en Vilno atingis interkonsenton pri kvin “ĉefaj agaddirektoj”. Unue ili interkonsentis pri “komuna kadro”:

Oni bezonas konstrueman, realisman lingvopolitikan kadron por la Eŭropa Unio de 25 landoj, kiu ekvilibrigu protektadon kaj aprezadon de lingva diverseco kun la bezono de efika, altkvalita komunikado inter ĉiuj civitanoj de EU.

Tia komuna kadro povus ŝajni nur esprimo de evidenta realo, sed la manko de politika volo insisti pri multlingva debato, ekzemple, aŭ uzi la plenan rimedaron de tradukado kaj interpretado, signifas, ke la glorigado de diverseco en EU estas daŭre pli simbola ol funkcia – interalie ĉar la formala politiko de multlingvismo estas perceptata kiel ridinde komplika kaj peza. La konservado de politiko kiu memevidente ne estas funkcipova donas avantaĝon al la pli potencaj lingvoj ĉar ĝi helpas lingvan ŝoviĝon laŭ ilia direkto – kaj ĉefe (almenaŭ ĝis nun) en la direkto de la angla.

8.4.2. Vigla publika debato

Pro tio, la partoprenantoj en Vilno faris sian duan “sindevigon” – al vigla publika kaj politika debato pri la eŭropa lingvopolitiko:

Por estigi la bezonatan politikan volon subtene al tia komuna kadro, necesas multe pli da klopodoj altigi la nivelon kaj intensecon de la prilingvaj debatoj publikaj kaj politikaj. La malavantaĝoj de la nuna sistemo, la investitaj interesoj kiuj subtenas ĝin, kaj aro da pozitivaj politikaj alternativoj bezonas vortumadon en manieroj kiuj ebligas diskutadon inter ordinaraj homoj, raportadon fare de ĵurnalistoj, kaj konkretajn elpaŝojn flanke de elektitaj deputitoj. Gravus disvolvi longdaŭrajn politikajn interesgrupojn kaj koaliciojn por alstrebi lingvan egalecon, diversecon, kaj vivipovon.

La temo estas aparte grava por tiuj nacioj, kies rego super la propraj naciaj lingvoj datiĝas en multaj kazoj nur de la mezo de la deknaŭa jarcento, kaj la disvastiĝo de tiuj lingvoj estas preskaŭ tute limigita al la propraj teritorioj. Tiuj lingvoj, al kiuj mankas internacia negocebulo, estas severe minacataj de la entrudo de aliaj, pli potencaj lingvoj, precipe la angla – kiu samtempe proponas al ili ekonomiajn, sciencajn kaj, iasence, eĉ kulturajn avantaĝojn ne atingeblajn per la propraj lingvoj. Resume, la ĝemelaj idealoj de la Eŭropa Unio – konservado de kultura diverseco kaj samtempa ekonomia integriĝo – tiel konfliktas, ke la dua venkos kontraŭ la unua se tiun unuan oni ne zorge reguligos kaj konservos.

8.4.3. Komuna lingvopolitika kadro

Sed tio eventuale signifas, ke la elserĉo de ĝenerala eŭropa lingva solvo devos transiri tradiciajn kaj simpligitajn paŝojn. La tria “sindevigo” listigis kvin terenojn kie la “komuna lingvopolitika kadro” devus aplikiĝi, emfazante, ke “ĉiu povus postuli malsaman kombinon de solvoj kaj iom malsaman politikan strategion” interalie ĉar ĉiu estas reguligata de diversaj instancoj de EU aŭ de la unuopaj landoj. Oni proponis:

- internan kaj profesionan komunikadon de EU-institucioj, kio intime ligiĝas al la profesia kulturo kaj la memregado de la institucioj mem;
- oficialan komunikadon de EU-institucioj kun civitanoj kaj registaroj, kion reguligas la politikoprocedo de EU inkluzive de ŝtatoj-membroj, la Konsilio de Ministroj, kaj Eŭropa Komisiono, ktp.;
- mastrumon de la lingva situacio de la ŝtatoj-membroj de EU, kio estas sub jurisdikcio de naciaj parlamentoj kaj fine respondas al la demokrata procedo;
- mastrumon de komunikado kaj kulturaj rilatoj, interne de EU, flanke de grandega gamo de publikaj, profesiaj, komercaj, neregistaraj kaj privataj organizaĵoj kaj institucioj, kies lingvopolitikoj estas plejparte memstaraj sed ofte forte limigitaj de ekonomiaj kaj politikaj faktoroj;
- eksteran komunikadon de EU-institucioj kaj ŝtatoj-membroj kun ne-eŭropaj ŝtatoj kaj internaciaj organizaĵoj, kio estas influata de kunteksto same tutmondaj kiel lokaj, kaj siavice povas havi implicojn por politikaj decidoj ene de EU mem.

8.4.4. Konkurencaj vizioj

La priskribo de la kvara “sindevigo” sugestis, ke publika debato emfazu “konkurencajn viziojn de la lingva estonteco” de EU. La pasintaj du-tri jardekoj produktis novajn manierojn koncepti lingvopolitikon en komplikaj situacioj, ekzemple fare de politikaj ekonomiistoj, precipe en Kanado (Grin & Vaillancourt 1997), per apliko de ludoteorio al lingvoelekto (Selten & Pool 1991, 1995), per la apliko de konceptoj de distribua justeco al lingvoplanado (Kymlicka 1989, Wright 2004, Ammon 2004), pro teknologia progreso (inkluzive la teknologion kaj metodologion de lingvolernado) kaj ankaŭ pro multe pli detala kaj realisma pensado pri radikalaj solvoj kiel ekzemple planlingvoj (Grin 2005, Phillipson 2003). La partoprenantoj sugestis la jenajn “viziojn”:

- Vizioj, kiuj tiras konkludojn el diversaj modeloj de multilingvismo tra la mondo por pli bone kompreni la dinamikon kaj potencialajn fortojn kaj malfortojn de la EU-lingvosistemo, kaj ĝia loko ene de tutmonda lingvosistemo;
- Vizioj, kiuj difinas kaj defendas la statuson kaj bezonojn de malgrandaj naciaj kaj ne-naciaj lingvokomunumoj, kaj indiĝenaj kaj enmigraj, ene de EU;
- Vizioj, kiuj disvolvas politikajn rimedojn por certigi ke iu ajn vaste uzata interlingvo ne subfosu la pluvivipovon de la naciaj lingvoj, la egalecan traktadon de ties parolantoj en EU-institucioj, kaj la konservadon de kultura diverseco;
- Vizioj, kiuj esploras la potencialan rolon de Esperanto ene de komuna lingvokadro de EU, precipe en rilato al ĝiaj ekonomiaj avantaĝoj kiel pivota lingvo en tradukado kaj interpretado, ĝia efikeco kiel enkonduko al lingvolernado, kaj ĝiaj meritoj sur la kampo de interkultura komunikado;
- Vizioj, kiuj projekcias la estontan disvolviĝon de lingva kaj komunika teknologio, kaj de novaj sistemoj de fremdlingva edukado, kaj iliajn potencialajn sekvojn en lingvo-lernado kaj –uzado ene de EU.

8.4.5. Specifaj paŝoj

Fine, la partoprenantoj sindevigis labori por specifaj agoj, kiel ekzemple starigo de lingvopolitika konferenco de la plimalgrandaj anoj de EU, evoluigo de “reto por sciencaj esploroj, kiu kunligas esploristojn pri la ekonomiko, sociologio, politiko, kaj planado de lingvoj ... kiu kapablas provizi rapidajn kaj bone dokumentitajn informojn al decidofarantoj kaj al ĵurnalistoj” kaj komunikan reton por “engaĝi kreskantan nombron de ŝlosilaj individuoj en la akademias, burokrataj kaj politikaj medioj de la EU-ŝtatoj, por la evoluigo de komunaj solvoj al komunaj lingvaj problemoj.”

8.5. Konkludo

Aferoj nun tiel status, ke la interna maŝinaro de la burokratio de EU celas politikon de laŭjura multlingvismo, kiu, pro malbona kalibrigo, nerealismaj antaŭvidoj kaj boprintenca neglekto flanke de la gvidantaro, kondukas al laŭfakta unulingvismo. Dum la parolantoj de la grandaj lingvoj kiel la franca, germana, hispana kaj itala, klopodas teni sian egalecan statuson, verdire ĉiu grupo sekvas politikan militon kun sia apudulo en la lingva hierarkio, en medio en kiu la manko de komuna starpunkto cedas povon al la plej forta lingvo aŭ plej fortaj lingvoj. La farantoj de la politiko mem enamiĝas al sia kapablo elnegoci sian vojon pere de la angla lingvo, ilia monda interlingvo. Sed tiu interna burokratia konflikto estas nur antaŭulo de ankoraŭ pli malagrabra situacio, en kiu la iompostioman integriĝon de ekonomiaj kaj politikaj sektoroj akompanos rampa aneksado de paralelaj lingvaj terenoj kaj kondukos al ankoraŭ pli severa striktigo de la rolo kaj celo de pli malgrandaj lingvoj kaj iliaj kulturoj.

Kaj dume, la estontaj politikaj direktoj de EU igas la lingvan situacion despli konfuza. Kian lingvan efikon havos la retiriĝo de Britio, la daŭra streĉiteco inter kelkaj mezeŭropaj landoj (ekzemple Hungario kaj Pollando) kaj la cetera membraro, kaj signifaj ŝanĝoj en la politiko de ĉirkaŭaj landoj?

La vojo celita devus esti formo de stabila multlingvismo subtenata de raciaj kaj justaj politikoj – celo egale neatingebla kiel surtera paco kaj justeco, sed inda je niaj fortaj streboj.

Bibliografio

- Albaugh, Ericka A 2014: *State-Building and Multilingual Education in Africa*. Cambridge: Cambridge University Press.
- Alexander, N. 2011: Afrikaans: Success or Failure? En: Joshua A. Fishman & Ofelia García, red. *Handbook of Language and Ethnic Identity, Vol. 2: The Success-Failure Continuum in Language and Ethnic Identity Efforts*. Oxford: Oxford University Press. 11-22.
- Ammon, Ulrich 2001: *The Dominance of English as a Language of Science: Effects on other languages and language communities*. Berlin & New York: de Gruyter.
- 2003: Present and future language conflicts as a consequence of the integration and expansion of the European Union. En A. Valentini, P. Molinelli, P. Cuzzolin, & G. Bernini, red. *Ecologia linguistica: Atti del XXXVI Congresso Internazionale della Società di Linguistica Italiana*. Roma: Bulzoni. 393-405.
- 2004: Some problems of EU language policy and discussion of possible solutions. En: G. Banti, A. Marra, A. & V. Vineis, red. *Atti del 4. congresso di studi dell'Associazione Italiana di Linguistica Applicata*. Perugia: Guerra Edizioni. 193-207.
- Arzo, Xabier, red. 2008: *Respecting Linguistic Diversity in the European Union*. Amsterdam: Benjamins.

- Bamgbose, Ayo 2007: Multilingualism and exclusion: policy, practice and prospects. En: Pol Cuvelier, Theodorus du Plessis, Michael Meeuwis, Lut Teck, red. *Multilingualism and Exclusion: Policy, Practice and Prospects*. Pretoria: Van Schaik. 1-12.
- Bourdieu, Pierre 1991: *Language and Symbolic Power*. Trad. G. Raymond & M. Adamson. Cambridge, MA: Harvard University Press. (Traduko de *Ce que parler veut dire : L'économie des échanges linguistiques*. Paris: Fayard, 1982)
- Braudel, Fernand 1981: *The Structures of Everyday Life: The Limits of the Possible*. Trad. Siân Reynolds. New York: Harper and Row. (Traduko de *Les structures du quotidien: Le possible et l'impossible*. Paris: Armand Colin, 1979)
- Cooper, R. L. 1989: *Language Planning and Social Change*. Cambridge: Cambridge University Press.
- de Swaan, A. 1993: The evolving European language system: A theory of communication potential and language competition. En: *International Political Science Review* 14/3: 241-255.
- 2001: *Words of the World*. Cambridge: Polity.
- de Varennes, Fernand 2012: Language policy at the supranational level. En: Bernard Spolsky, red. *The Cambridge Handbook of Language Policy*. Cambridge & New York: Cambridge University Press. 149-173.
- du Plessis, Theodorus 2000: Multilingualism and government in South Africa. En: K. Deprez & T. du Plessis, red. *Multilingualism and Government*. Pretoria: Van Schaik.
- Eisenstein, E. L. 1979: *The Printing Press as an Agent of Change*. Cambridge: Cambridge University Press.
- Febvre, Lucien & Henri-Jean Martin 1990: *The Coming of the Book: The Impact of Printing 1450-1800*. Trad. David Gerard. London & New York: Verso. (Traduko de *L'Apparition du livre*. Paris: Albin Michel, 1958)
- Fettes, Mark 2003a: The geostrategies of interlingualism. En: Jacques Maurais & Michael Morris, red. *Languages in a Globalising World*. Cambridge: Cambridge University Press. 37-46.
- 2003b: Interlingualism: A world-centric approach to language policy and planning. En: Humphrey Tonkin & Timothy Reagan, red. *Language in the 21st Century*. Amsterdam: Benjamins. 47-58.
- Fishman, Joshua 1991: *Reversing Language Shift*. Clevedon: Multilingual Matters.
- 2001: *Can Threatened Languages be Saved?* Clevedon: Multilingual Matters.
- Gaiba, F. 1998. *The Origins of Simultaneous Interpretation: The Nuremberg Trial*. Ottawa: University of Ottawa Press.
- Gazzola, Michele, Torsten Templin & Bengt-Arne Wickström, red. 2018: *Language Policy and Linguistic Justice*. Cham, Switzerland: Springer.
- Goldin, Ian & Chris Kutarna 2016: *Age of Discovery*. New York: St. Martins Press.
- Grenoble, L. A. & Whaley, L.J. 2005: *Saving Languages: An Introduction to Language Revitalization*. Cambridge & New York: Cambridge University Press.
- Grin, François 2004: L'Anglais comme lingua franca: Questions de coût et d'équité, commentaire sur Philippe Van Parijs. *Économie publique* 15(2).
- 2005: *L'enseignement des langues étrangères comme politique publique*. Rapport du Haut conseil de l'évaluation de l'école, 19. Paris: Haut conseil de l'évaluation de l'école.
- 2008: Principles of policy evaluation and their application to multilingualism in the European Union. En: Xabier Arzoz, red. *Respecting Linguistic Diversity in the European Union*. Amsterdam: Benjamins. 73-84.
- 2018: *Mobility and Inclusion in Multilingual Europe*. Geneva: MIME Project.

- Grin, François & François Vaillancourt 1997: The economics of multilingualism. *Annual Review of Applied Linguistics* 17. 43-65.
- Hamel, R. E. 2006: The development of language empires. En: Ulrich Ammon, N. Dittmar, K.J. Mattheier & P. Trudgill, red. *Sociolinguistics – Soziolinguistik. An International Handbook of the Science of Language and Society. Ein internationales Handbuch zur Wissenschaft von Sprache und Gesellschaft*, dua eld. Vol. 3. Berlin & New York: Walter de Gruyter.
- Hastings, Adrian 1997: *The Construction of Nationhood: Ethnicity, Religion and Nationalism*. Cambridge: Cambridge University Press.
- Hechter, Michael 1975: *Internal Colonialism*. London: Routledge and Kegan Paul.
- Hultgren, Anna Kristina, Frans Gregersen & Jacob Thøgersen. 2014. *English in Nordic Universities*. Amsterdam: Benjamins.
- Krog, Antjie, Rosalind C. Morris & Humphrey Tonkin 2010: Translation as reconciliation: A conversation about politics, translation, and multilingualism in South Africa. En: Humphrey Tonkin & Maria Esposito Frank, red. *The Translator as Mediator of Cultures*. Amsterdam: Benjamins. 17-35.
- Kymlicka, Will 1989: *Liberalism, Community and Culture*. Oxford: Clarendon Press.
- Kymlicka, Will & Alan Patten, red. 2003: *Language Rights and Political Theory*. Oxford & New York: Oxford University Press.
- Mac Giolla Christ, Diarmait & Matteo Bonotti. 2018: *Brexit, Language Policy and Linguistic Diversity*. London: Palgrave Macmillan.
- Maurais, Jacques & Michael Morris, red. 2003: *Languages in a Globalising World*. Cambridge: Cambridge University Press. (Traduko de *Géostratégies des langues*. Québec: Les publications de Québec, 2001)
- May, Stephen 2001: *Language and Minority Rights: Ethnicity, Nationalism and the Politics of Language*. Harlow, Essex: Longman.
- Myers-Scotton, Carol. 1990: Elite closure as boundary maintenance: The case of Africa. En: Brian Weinstein, red., *Language Policy and Political Development*. Norwood, NJ: Ablex. 25-42.
- Nic Shuibhne, N. 2002: *EC Law and Minority Language Policy: Culture, Citizenship and Fundamental Rights*. Den Haag & London: Kluwer Law International.
- 2008: EC law and minority language policy: Some recent developments. En: Xabier Arzoz, red. *Respecting Linguistic Diversity in the European Union*. Amsterdam: Benjamins. 123-143.
- Nitobe Symposium. 2005: Language policy implications of the expansion of the European Union: Concluding document. 4th Nitobe Symposium, Vilnius, Litovio.
- Patten, Alan & Will Kymlicka 2003: Introduction: Language rights and political theory: Context, issues and approaches. En: Will Kymlicka & Alan Patten, red. 2003. *Language Rights and Political Theory*. Oxford & New York: Oxford University Press. 1-51.
- Phillipson, Robert 2004: Ĉu nur-angla Eŭropo? Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Pool, Jonathan 1991. The official language problem. En: *American Political Science Review* 85/2: 495-514.
- 1996: Optimal language regimes for the European Union. En: *International Journal of the Sociology of Language* 121: 159-179.
- Pool, Jonathan & Mark Fettes 1998: The challenge of interlingualism: A research invitation. En: *Esperantic Studies*, 10: 1-3.

- Reagan, Timothy 2001: The promotion of linguistic diversity in multilingual settings: Policy and reality in post-apartheid South Africa. En: *Language Problems & Language Planning* 25: 51-72.
- 2002: Language planning and language policy: Past, present and future. En: Raj Mesthrie, red. *Language in South Africa*. Cambridge: Cambridge University Press. 419-433.
- 2019: *Linguistic Legitimacy and Social Justice*. New York & London: Palgrave Macmillan.
- Ruggie, J.G. 1998: *Constructing the World Polity*. London & New York: Routledge.
- Selten, Reinhard & Jonathan Pool 1991. The distribution of foreign language skills as a game equilibrium. En: Reinhard Selten, red. *Game equilibrium models*. Vol. 4. Berlin: Springer. 64-87.
- Selten, Reinhard & Jonathan Pool 1995: *Enkonduko en la teorion de lingvaj ludoj / Einführung in die Theorie sprachlicher Spiele*. Berlin & Paderborn: Akademia Libroservo.
- Skutnabb-Kangas, Tove 2000: *Linguistic Genocide in Education, or World Diversity and Human Rights*. Mahwah, NJ: Erlbaum.
- Skutnabb-Kangas, Tove & Jim Cummins. 1988: *Minority Education: From Shame to Struggle*. Clevedon: Multilingual Matters.
- Spolsky, Bernard. 2004: *Language Policy*. Cambridge: Cambridge University Press.
- Steinberg, S.H. 1961: *Five Hundred years of Printing*. Baltimore: Penguin.
- Taylor, B., red. 2002: *Foreign-language Printing in London 1500-1900*. Boston Spa & London: The British Library.
- Tonkin, Humphrey. 1996: Language hierarchy at the United Nations. En: Sylvie Léger, red. *Towards a Language Agenda: Futurist Outlook on the United Nations*. Ottawa: Canadian Center for Linguistic Rights, University of Ottawa. 3-28.
- 2003: The search for a global linguistic strategy. En: Jacques Maurais & Michael Morris, red. *Languages in a Globalising World*. Cambridge: Cambridge University Press. 319-333.
- Tonkin, Humphrey & Jane Edwards, (red.) 1984: *Language Behavior in International Organizations*. Report of the Second Annual Conference of the Center for Research and Documentation on World Language Problems. New York: Center for Research and Documentation.
- 2007: Exclusion and inclusion in Europe: The search for a European language policy. En: Pol Cuvelier, Theodorus du Plessis, Michael Meeuwis & Lut Teck, red. *Multilingualism and Exclusion: Policy, Practice and Prospects*. Pretoria: Van Schaik. 207-223.
- Tonkin, Humphrey & Timothy Reagan, red. 2003: *Language in the 21st Century*. Amsterdam: Benjamins.
- Van Parijs, Philippe 2003: Linguistic justice. En: Will Kymlicka & Alan Patten, red. 2003. *Language Rights and Political Theory*. Oxford & New York: Oxford University Press. 153-168.
- 2004a: L'Anglais lingua franca de l'Union européenne: impératif de solidarité, source d'injustice, facteur de déclin? *Économie Publique* 15/2.
- 2004b: Europe's linguistic challenge. *European Journal of Sociology* 45/1: 113-154.
- 2011: *Linguistic Justice for Europe and the World*. Oxford: Oxford University Press.
- Vila, F. Xavier & Vanessa Bretxa 2014: *Language Policy in Higher Education: The Case of Medium-Sized Languages*. Bristol: Multilingual Matters.
- Webb, Vic 2004: African languages as media of instruction in South Africa. *Language Problems & Language Planning* 28: 147-173.
- Wright, L. 2002: Why English dominates the central economy: An economic perspective on 'elite closure' and South African language policy. *Language Problems & Language Planning* 26: 159-177.

Wright, Sue 2004: *Language Policy and Language Planning*. Basingstoke & New York: Palgrave Macmillan.

Demandoj kaj diskuttemoj

- 1) Kio estas elita fermiĝo?
- 2) Kiel elita fermiĝo manifestiĝas en postkoloniaj situacioj? Kaj en situacioj kie ekzistas norma lingvo inter diversaj lingvaj formoj?
- 3) Kiel la fino de rasapartigo influis la sudafrican lingvopolitikon? Kun kia rezulto?
- 4) Kio estas la oficiala lingva politiko de la Eŭropa Unio?
- 5) Kiun lingvan efikon havis la ekspansio de la membronombro de EU.
- 6) Ĝis kiu grado regas lingva egaleco en EU? En kiu senco mankas tiu egaleco?
- 7) Ĉu la stabanoj povas plene apliki la lingvan politikon de EU? Kiajn kompromisojn ili devas fari?
- 8) Kian efikon havis la enkonduko de papero kaj presado en Eŭropo, rilate al alfabetigo? edukado? normigo de lingvoj?
- 9) Priskribu la teorion de de Swaan rilate la interrilaton de lingvoj.
- 10) Kiel en Anglio oni tradicie tenis lingvaj kaj regionajn demandojn en ekvilibro?
- 11) Priskribu la diferencon inter tolerobazaj kaj kultivobazaj lingvaj politikoj. Kiajn efikojn ili kutime havas?
- 12) En kiu senco la lingva reĝimo en Unuiĝintaj Nacioj similas tiun de EU?
- 13) Kiel funkcias la “hierarkio de ekskluzivo” en EU?
- 14) Kiujn “problemajn evoluojn” oni povas identigi en la nuna lingva situacio en EU.
- 15) Kiun efikon havas la vasta uzo de la angla lingvo kiel lingvo de universitata instruado en neanglalingvaj landoj?
- 16) Kiujn rekomendojn faris la konferenco de CED en Vilno pri la estonteco de la lingva politiko de EU?

Humphrey TONKIN

Esperanto, la esperanta lingvokomunumo kaj lingvopolitiko¹

Enkonduke

Ne malofte en esperantistaj tekstoj, revuoj kaj paroladoj aperas la nocioj *lingvo-politiko* kun siaj derivaĵoj. Pri kio temas? Ni ja scias, ke oni parolas pri lingvo-politiko de unuopaj ŝtatoj, lingvo-politiko de organizaĵoj, ekz. de Unuiĝintaj Nacioj, de Eŭropa Unio. Kio do estas lingvopolitiko? Kiel la vorto sugestas, temas pri difinita politiko (konscia influado kaj antaŭenigo de difintaj celoj, ideoj, proponoj) pri difinitaj lingvoj, do pri la konscie realigata publika influado al la statuso, utiligo kaj disvastigo de la lingvoj.

Se ni aplikas la nocion al la specifajoj de la medioj de esperantistoj, por nia celo provizore sufiĉas jena difino: *Lingvopolitiko en la medio de esperantistoj* estas la konscie realigata publika klopodado disvastigi kaj akceptigi la lingvon Esperanto, utiligi ĝin, influadi al ties statuso kaj al ties ecoj.

Ĉar la lingvo kaj la menciitaj klopodadoj troviĝas en konkreta historia kaj socia kunteksto, ligiĝas al ĉio ĉi la problemaro pri lingva justeco, lingvaj rajtoj, protekto de lingvoj kaj lingva diskriminacio. La klopodadoj povas esti realigataj flanke de organizaĵoj, ekz. UEA, TEJO ktp. kaj aliaj instancoj per difinitaj instrumentoj (statutoj, regularoj, decidoj, rezolucioj, publikaĵoj, deklaroj, proponoj, intervenoj en aranĝoj ktp.).

Surbaze de tiu provizora difino ni demandos nin, ĉu Esperanto havas difinitan lingvo-politikon. Estas klare, ke lingvo en si mem ne povas havi iun ajn politikon. Ĝi povas esti kreita surbaze de lingvopolitikaj ideoj kaj servi al ties realigoj. Ideojn kaj celojn havas la homo, la homa socio. Sekve la *esperanta lingvo-komunumo* povas havi lingvopolitikajn celojn kaj ideojn. Ili tamen ne estas unuecaj, kiel ni vidos. La nocio ‘lingvo-komunumo’ povas sugesti, ke temas pri relative unueca socia unuo. Por eviti tiun miskomprenon, oni foje uzas la pli neŭtralan nocion ‘parolantaro de Esperanto’. Kun tiu relativigo mi tamen plu uzos la esprimon ‘komunumo’.

Por povi enkadrigi Esperanton en la spektron de diversaj lingvo-kreaĵoj motivoj de aŭtoroj de planlingvoj, mi unue klopodos doni superrigardon pri tiuj motivoj. Post tio mi montros diversajn lingvopolitikajn ideojn, celojn, vidpunktojn kaj aktivadojn de la nuntempa lingvo-komunumo de Esperanto.

¹ La sekva teksto esence baziĝas je ampleksa germana ĉapitro, publikigita en lingvopolitika libro. Pro spaclimigo mi draste koncizigis la tekston, aldonis iujn aliajn elementojn. Al interesiĝantoj kun germanlingvaj konoj mi rekomendas la menciitan titolon (Blanke 2009c).

1. Ĉefaj motivoj de planlingvaj aŭtoroj

Malantaŭ la kreado de internaciaj planlingvoj (universalaj lingvoj, [artefaritaj] helplingvoj) troviĝas difinitaj ideoj, idealoj, vidpunktoj. La aŭtoroj havis difinitajn motivojn por ellabori siajn projektojn kaj varbi por ilia disvastigo. Mi klopodos sistemigi la ĉefajn sed atentigas, ke ili nenie aperas tute puraj. Inter ili ekzistas transiroj, foje kelkaj motivoj ekzistas samtempe.

1.1. Lingvofilozofiaj motivoj: la lingvo influas la pensadon²

Aparte dum la 17-a kaj 18-a jarcentoj la proponantoj de la t.n. *filozofiaj lingvoj*, projektoj, kiuj ĉefe baziĝas sur la siatempa scio pri la mondo kaj ties klasifikado, esperis, ke per logika lingvo, kiu baziĝu sur la “ĝusta” filozofio, oni povus plifaciligi kaj pliĝustigi la pensadon kaj per iu “algebro de ideoj” (laŭ *Descartes* 1629) oni povus veni al ĝustaj pensoj, kvazaŭ laŭ matematika vojo, eventuale eĉ malkovri antaŭe nepensitajn aferojn. Konatiĝis aparte la projektoj de *Dalgarno* kaj *Wilkins* (kp. Maat 1999).

Alia lingvofilozofia aliro gravis dum la 20-a jarcento: la lingva relativismo aŭ la t.n. *Sapir³-Whorf⁴-Hipotezo*, laŭ kiu la lingvo decide influas la manieron de la perceptado kaj ekkonado de la mondo. Laŭ tiu hipotezo la eŭropa pensado baziĝas je iu meza eŭropa lingvaĵo (*Standard Average European, SAE*). *Alexander Gode* (1906-1970), surbaze de la antaŭaj laboroj de *International Auxiliary Language Association* (IALA) per la projekto *Interlingua* klopodis modeli tiun SAE-lingvaĵon.

Logikistoj kaj komputilistoj aparte interesiĝas pri la projekto *Loglan* de *James Cook Brown* (1960), kies celo estas ne nur servi kiel internacia lingvo sed testi, kiom logika lingvo povas influi la pensadon. *Loglan* estis pluevoluigita al *Lojban⁵*.

La menciitaj aŭtoroj prave vidis la intiman ligan inter lingvo kaj pensado, kvankam ili komprenis tiujn rilatojn en tro strikta senco.

1.2. Pragmataj motivoj: facila lingvo por pli facila komunikado

La pragmataj motivoj ludas gravan rolon ĉe la plej multaj aŭtoroj de internaciaj planlingvoj. Laŭ ili internacia lingvo, sendepende de la aliaj menciitaj celoj, devus esti se eble pli facile lernebla ol la komplikaj “naturaj” lingvoj, por plifaciligi la alpropriigon kaj uzadon de la lingvo. Tiujn celojn ni trovas i.a. ĉe la aŭtoroj de *Volapük*

² Pri la menciitaj projektoj kaj planlingvaj sistemoj kp. i.a. *Blanke* 1985, *Duliĉenko* 1990 kaj *Sakaguchi* 1998 kaj la tie menciitan literaturon. Se en kelkaj kazoj necese, mi mencias apartajn fontojn.

³ *Edward Sapir* (1884-1939), usona etnologo kaj lingvisto.

⁴ *Benjamin Lee Whorf* (1897-1941), usona inĝeniero kaj lingvisto.

⁵ Vd. <http://en.wikipedia.org/wiki/Lojban> (ĉiujn retadresojn mi lastfoje rigardis 3.1.2012-DB).

(*Johann Martin Schleyer*, 1831-1912), de *Ido* (*Louis Couturat* 1868-1914) kaj ne laste ankaŭ ĉe *Esperanto* (*Ludoviko Lazaro Zamenhof*, 1859-1917)

1.3. Politikaj motivoj: ŝanĝi la socion

Politikajn motivojn oni jam trovas en la 17-a jarcento, tamen aparte en la 19-a kaj 20-a jarcentoj. Jen kelkaj kategorioj:

- a) **Pacifismajn motivojn** oni ekz. trovas ĉe *Jan Amos Komenský* (1592-1670). En siaj verkoj, aparte en *Panglottia* (1662), li argumentas, ke la lingva diverseco estas la ĉefa kialo por interpopolaj konfliktoj, kiujn oni povus forigi per universala lingvo, kiu devus esti “perfekta” (De Mott 1955). Ankaŭ ĉe *Zamenhof* kaj *Schleyer* tiu motivo estis fakte la ĉefa. Plej klare kaj seke sin esprimis *Karl Pompiati* (1918, I), la aŭtoro de la projekto *Nov latin*: “Se la homoj komprenos unu la alian, ne plu okazos militoj”.
- b) Proksimaj al la pacifismaj, sed parte ankaŭ al naciismaj estas la **popolgrupo-interligaj motivoj**, kiujn ekzemple havis la kroato *Jura Križanić* (1618-1683), kiu per slava universala lingvo (*Ruski jezik*, 1666) volis alproksimigi la slavajn popolojn kaj redukti iliajn interesajn konfliktojn (Sakaguchi 1998: 51-53). Simile pensis *Ignaz Hošek* (1852-1919) kun sia *Neuslavische Sprache*, kiu devintis unuigi la slavajn popolojn de la aŭstria danuba monarkio (Petioky 1997).
- c) Ni ankaŭ trovas aŭtorojn de planlingvaj projektoj kun klare **naciismaj** resp. **ŝovinismaj motivoj**. La aŭtoro de *Wede* (Weltdialekt, resp. Weltdeutsch), *Adalbert Baumann* supozis, ke la germanoj venkos dum la Unua Mondmilito kaj ke necesos tutmondigi la germanan regadon, la germanan kulturon kaj lingvon. Por tiu celo Baumann klopodis simpligi la germanan lingvon, por ke ĝi dominu en la mondo (Baumann 1915).

Ankaŭ *Basic English*, publikigita de *Charles K. Ogden* (1889-1957) ĉirkaŭ 1932 volis servi al la disvastigo de la angla. Tion la angla politikisto *Winston Churchill* bone komprenis, kiam en 1943 li proponis al la Brita Parlamento aĉeti la projekton.

- d) Proksimaj al naciismaj estas la **elitisme eŭrocentrismaj motivoj**, troveblaj ĉe adeptoj de la t.n. naturalismaj planlingvoj kiel *Occidental-Interlingue* de *Edgar de Wahl* (1867-1948) kaj *Interlingua* (*Alexander Gode/IALA*)

Ili argumentas, ke la romanaj planlingvoj, kiuj baziĝas je eŭropa leksiko, estas destinitaj por kleraj homoj tra la mondo, ĉar tiuj ja supozeble konas eŭropajn lingvojn. Krom tio, laŭ tiuj propagandistoj la moderna pensado baziĝas je la eŭropaj lingvoj. La avantaĝo de tiuj sistemo laŭ ili konsistas en tio, ke klera homo komprenas ilin unuarigarde, do ne bezonas aparte lerni ilin. Ni ne diskutos ĉi tie la iluziecon de tiu ĉi supozo.

2. Projekto aŭ lingvo?

Ofte farita eraro de neinformitaj homoj estas, ne distingi inter

- a) pli ol 1000 *projektoj* de universalaj lingvoj (planlingvoj) sur unu flanko kaj
- b) la malmultaj sistemoj, kiuj parte aŭ komplete *realiĝis en la praktiko*. Realigo en la praktiko signifas, ke tiuj sistemoj estis lernataj, aplikataj kaj fine kreis lingvo-komunumon, kiu povus havi lingvopolitikajn celojn kaj agadojn.

La evolugrado de la lingvo-komunumo influas la eblojn de lingvopolitika agado. La adeptoj de *Volapuko*, *Ido*, *Interlingue* kaj *Interlingua* havis resp. havas i.a. la celon plifaciligi la internacian komunikadon. La malmultaj adeptoj de Volapuko nuntempe ne plu revas pri ĝenerala enkonduko en la tutmondan komunikan sistemon. Por ili unuavice temas pri cerba gimnastiko. Sed ĉe idistoj, adeptoj de Interlingue kaj Interlingua ja ekzistas la espero, ke iliaj lingvoj havu internacian funkcion, ekz. en Eŭropa Unio.

De ĉiuj menciitaj sistemoj nur *Esperanto* fariĝis certagrade interesa el lingvopolitika vidpunkto. Se ekz. temas pri la eŭropa lingvoproblemo kaj modeloj, kiel solvi aŭ plijustigi ĝin, tiam, se entute, kiel planlingvon oni nur mencias Esperanton (vidu sube kaj Blanke 2011). Sekve la tema limigo al Esperanto estas tute motivita.

Ligita al la ensociiĝo de lingvo estas la demando, ĉu lingvo havas kulturon. Aliloke mi argumentis (Blanke 2005), ke la disvastigita esprimo, ke lingvo “havas” kulturon, estas ĝusta nur en metafora senco. Envere neniu lingvo “havas” kulturon. Lingvoj estas partoj de la homa kulturo. La difinitan kulturon havas la homoj, kiuj konstituigas la lingvan komunumon. La kulturaĵoj de la komunumo reflektiĝas kaj fiksiĝas en la difinitaj lingvoj (ekz. aparte en la leksiko) kaj iliaj tekstoj. Tiel ili povas esti konservataj tra la epokoj, utiligataj de la samtempuloj kaj pludonataj al la estontaj generacioj.

3. Lingvo-politikaj sintenoj en la esperanta lingvo-komunumo

La ĉefa lingvopolitika ago lige al Esperanto kompreneble venas de Zamenhof mem, kiu per la publikigo de sia lingvo-projekto faris, konscie aŭ ne, fundamentan lingvopolitikan paŝon. Ĝis sia forpaso Zamenhof havis lingvopolitikan influon al la lingvo (ekz. rilate al la pluevoluigo) kaj al la lingvokomunumo (li kreis la bazon de lingvokomunumo ekz. per publikigado de adresoj en revuo “La Esperantisto” 1889-1895).

Laŭ lingvopolitikaj vidpunktoj en la esperanta lingvo-komunumo oni trovas almenaŭ 4 diversajn grupojn. Inter tiuj grupoj ne ĉiam estas klaraj limoj. Ankaŭ eblas, ke iuj personoj sentas ligiĝon al pli ol unu grupo. Ne malofte dum sia vivo la personoj ŝanĝas sian preferon por tiu aŭ alia grupo.

3.1. Por paco kaj pli bona interkompreniĝo inter la popoloj

Grand parto de la parolantoj estas proksimaj al la idealoj de *Zamenhof*. Ili – almenaŭ teorie – pretas engaĝi sin por la ideo de pli justa internacia komunikado per facile lernebla, politike neŭtrala lingvo, kiu helpu kontraŭi prolingvan diskriminacion kaj tiel plifirmigu la pacon inter la popoloj. Tiun ĉefan ideon de Zamenhof ni trovas multloke en liaj verkoj. Ni menciuj parton el la “Deklaracio pri la esenco de la esperantismo”:

[...]

1. La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu – ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn – donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo [...].⁶

3.2. Por sennacieca socio tutmonda

Parto de laboristaj esperantistoj, organizitaj en *Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT)*, fondita en 1921 de la franca anarkiisto *Eugène Lanti* (pseŭdonimo de Eugène Adam, 1879-1947), sekvis ties ideojn, ke nacioj kaj naciaj lingvoj estas la ĉefa kialo de la interpopolaj (internaciaj) konfliktoj. Pro tio ili vidas en Esperanto la neŭtralan pacigilon en sennacieca socio. En jarlibroj de SAT oni ekz. ignoras landlimojn kaj indikas la loĝlokojn de la membroj laŭ horzonoj.

3.3. Proletoj ĉiulandaj unuiĝu per Esperanto

Unu el la ĉefaj motivoj de la internacia laborista Esperanto-movado, kiu estis aparte forta dum la dudekaj jaroj de la 20-a jarcento, estis utiligi Esperanton por politikaj celoj, do kontraŭ kapitalismo, faŝismo kaj milito kaj por konstruado de alternativa socio (nomata socialismo aŭ komunismo).⁷

3.4. La Esperanta Civito: mikronacio sen teritorio

Ekzistas grupo, kiu en Esperanto kun sia kulturo vidas apartan identigilon. Ĝi vidas sin kvazaŭ “memelektita lingva minoritato”, kiu vivas en diasporo. Anoj de tiu grupo ne aparte agadas por la lingvopolitikaj celoj de pli justa internacia komunikado. Ili ne

⁶ Zamenhof 1963, p. 33. La ĉefajn humanismajn ideojn de Zamenhof oni trovas en Zamenhof 2006.

⁷ Pri la laborista Esperanto-movado, kiu estis aparte forta i.a. en Germanio, vidu Noltenius 1993, Kolbe 1996.

aparte klopodas disvastigi la lingvon aŭ argumenti ĉe UN, UNESCO aŭ Eŭropa Unio por samrajteco de lingvoj. En 2001 en la itala urbeto Sabloneto fondiĝis la t.n. *Esperanta Civito*. Temas pri esperantista komunaĵo kun gvidstrukturo (senato kun politikaj frakcioj sub gvido de konsulo, kun konstitucio, kortumo, leĝoj, banko ktp.), sed sen reala teritorio. La Civito do similas al multaj mikronacioj, kiuj ĉefe vivas en la reto⁸.

4. La lingvopolitika rolo de Zamenhof

La relativa sukceso de Esperanto estas klarigebla per kelkaj faktoroj (vd. Blanke 2009a, 2009b). Apartan signifon havas la lingvopolitika intuicio de L.L. Zamenhof. Liaj ĉi-rilataj kontribuoj, sendube nekomplete, resumeblas jene:

- Zamenhof ne prezentis pretan, detale ellaboritan projekton, sed *plukonstrueblan lingvoskizon*
- Li ligis al sia lingvo *humanisman idealon*, kiu allogis multajn homojn.
- Li komprenis, ke lingvo *estas socia fenomeno*, kiu ne apartenu al unu persono, sed al la socio, kiu pluevoluigos ĝin.
- Li antaŭvidis *universalan aplikon* de la lingvo, ekz. por beletro same kiel por scienco ktp.
- Kiel demokrato li antaŭvidis la rolon de la lingvo *por ĉiuj sociaj tavoloj*, ne nur por intelektuloj, sed ekz. ankaŭ por laboristoj.
- Li antaŭvidis, ke lia lingvo ne forpuŝu naciajn lingvojn, sed kontraŭe ke ĝia ĝenerala enkonduko povus helpi *protekti etnajn lingvojn*.
- Li kontribuis al la stabiligo de la lingvo per kreado de *modeltekstoj*, i.a. per tradukoj el la monda literaturo. Li krome bonege komprenis la stabiligan rolon de *baza normverko* kaj iniciatis la kodigon de la “Fundamento”
- Li tre lerte rilatis al la multaj lingvoreformaj deziroj kaj ebligis *demokratitan decidon pri reformoj* en la revuo “La Esperantisto”.

5. Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj ĝiaj lingvopolitikaj streboj kaj aktivaĵoj

Ekzistas multaj esperantistaj organizaĵoj, kiuj de tempo al tempo diversmaniere traktis lingvopolitikajn problemojn aŭ sin engaĝis por ili. Tio ne nur validas por UEA sed ankaŭ por TEJO (aparte dum la 1960-a kaj 1970-aj jaroj). Aparte aktiva pri lingvopolitikaj temoj ekz. estas ekde 1978 la *Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj* (IKEL). La nomo de la organizaĵo indikas pri la programo.⁹

⁸ Kp. <http://en.wikipedia.org/wiki/Micronation>. Pri la Esperanta Civito aparte vidu <http://www.esperantio.net/>, krome la satiraĵon de Blanke 2001.

⁹ <http://ikel.stel.net/>.

Krom tio aperis artikoloj en diversaj revuoj (ekz. en “Monato”), libroj, studoj ktp. Ne eblas ĉion trakti. Pro tio mi limigas min al kelkaj ekzemploj el la medio de Universala Esperanto-Asocio (UEA), la ĉefa esperantista monda organizaĵo.

Ekzistas multaj dokumentoj de UEA, en kiuj aperas lingvopolitikaj deklaroj, rezolucioj, alvokoj kaj diskutoj. Krom tio UEA kunlaboras kun interregistaraj kaj neregistaraj organizaĵoj, diskutas lingvopolitikajn problemojn dum siaj universalaj kongresoj kaj alimaniere agadas. Ĝi foje eldonas lingvopolitikajn materialojn (vd. ekz. Corsetti 1984; Bañeres/Strubell 2001).

5.1. Dokumentoj kun celdifinoj kaj deklaroj

Gravaj dokumentoj, kiuj difinas la lingvopolitikan engaĝiĝon de UEA kaj grandparte de la esperanta lingvo-komunumo i.a. estas la Statuto de UEA kaj la Manifesto de Prago.

5.1.1. En la Statuto de UEA oni i.a. legas:

La celoj de UEA estas:

- (a) disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto;
- (b) agadi por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj faciligi la internacian komunikadon;
- (c) plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, malgraŭ diferencoj de nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo;
- (ĉ) kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj (Jarlibro 2011,12).

5.1.2. La Manifesto de Prago

De aparta graveco estas la “Manifesto de Prago de la movado por la internacia lingvo Esperanto”, ellaborita kaj subskribita de multaj personoj dum la 81-a Universala Kongreso de Esperanto, 1996 en Prago.

Kvankam ĝi ne estas oficiala dokumento de UEA, ĝi tamen formulas i.a. lingvopolitikajn konvinkojn kaj celojn de multaj UEA-membroj. En la dokumento oni i.a. legas:

[...]

1. Demokratio.

Komunika sistemo kiu tutvive privilegias iujn homojn sed postulas de aliaj ke ili investu jarojn da penoj por atingi malpli altan gradon de kapablo, estas fundamente maldemokratia. Kvankam, kiel ĉiu lingvo, Esperanto ne estas perfekta, ĝi ege superas ĉiun rivalon en la sfero de egaleca tutmonda komunikado.

Ni asertas ke lingva malegaleco sekvigas komunikan malegalecon je ĉiuj niveloj, inkluzive de la internacia nivelo. Ni estas movado por demokratia komunikado.

2. *Transnacia edukado.*

Ĉiu etna lingvo estas ligita al difinita kulturo kaj naci(ar)o. Ekzemple, la lerneĵano kiu studas la anglan lernas pri la kulturo, geografio kaj politiko de la anglalingvaj landoj, precipe Usono kaj Britio. La lerneĵano kiu studas Esperanton lernas pri mondo sen limoj, en kiu ĉiu lando prezentiĝas kiel hejmo.

Ni asertas ke la edukado per iu ajn etna lingvo estas ligita al difinita perspektivo pri la mondo. Ni estas movado por transnacia edukado.

[...]

5. *Lingvaj rajtoj.*

La malegala disdivido de potenco inter la lingvoj estas recepto por konstanta lingva malsekureco, aŭ rekta lingva subpremado, ĉe granda parto de la monda loĝantaro. En la Esperanto-komunumo, la anoj de lingvoj grandaj kaj malgrandaj, oficialaj kaj neoficialaj, kunvenas sur neŭtrala tereno, dank^e al la reciproka volo kompromisi. Tia ekvilibro inter lingvaj rajtoj kaj respondecoj liveras precedencon por evoluigi kaj pritaksi aliajn solvojn al la lingva malegaleco kaj lingvaj konfliktoj.

Ni asertas ke la vastaj potencodiferencoj inter la lingvoj subfosas la garantiojn, esprimitajn en tiom da internaciaj dokumentoj, de egaleca traktado sendistinge pri la lingvo. Ni estas movado por lingvaj rajtoj.

6. *Lingva diverseco.*

La naciaj registaroj emas konsideri la grandan diversecon de lingvoj en la mondo kiel baron al komunikado kaj evoluigo. Por la Esperanto-komunumo, tamen, la lingva diverseco estas konstanta kaj nemalhavebla fonto de riĉeco. Sekve, ĉiu lingvo, kiel ĉiu vivaĵospecio, estas valora jam pro si mem kaj inda je protektado kaj subtenado.

Ni asertas ke la politiko de komunikado kaj evoluigo, se ĝi ne estas bazita sur respekto al kaj subteno de ĉiuj lingvoj, kondamnas al formorto la plimulton de la lingvoj de la mondo. Ni estas movado por lingva diverseco.

7. *Homa emancipiĝo.*

Ĉiu lingvo liberigas kaj malliberigas siajn anojn, donante al ili la povon komuniki inter si, barante la komunikadon kun aliaj. Planita kiel universala komunikilo, Esperanto estas unu el la grandaj funkciantaj projektoj de la homa emancipiĝo aŭ projekto por ebligi al ĉiu homo partopreni kiel individuo en la homara komunumo, kun firmaj radikoj ĉe sia loka kultura kaj lingva identeco, sed ne limigite de ili.

Ni asertas ke la ekskluziva uzado de naciaj lingvoj neeviteble starigas barojn al la liberecoj de sinesprimado, komunikado kaj asociiĝo. Ni estas movado por la homa emancipiĝo.¹⁰

¹⁰ Vidu la kompletan tekston sub http://uea.org/informado/pragm/pm_eo.

5.2. Rilatoj de UEA al UNESCO kaj UN¹¹

La persekutoj de la Esperanto-movado sub Hitler kaj Stalin (vd. Lins 1988) grave malfortigis la lingvo-komunumon. Pro tio estis gravaj la klopodoj starigi kontakton kun la interŝtataj organizaĵoj fonditaj post la fino de la milito. UNESCO, la speciala organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj (UN) por edukado, scienco kaj kulturo, en 1954 akceptis gravan rezolucion, en kiu ĝi konatiĝis kun la rezultoj de Esperanto kaj i.a. rekomendis ties instruadon en la lernejoj. Ekde tiu rezolucio UEA havas konsultajn rilatojn kun la organizaĵo (vd. Lapenna 1974, 774). Plua grava rezolucio en 1985 sekvis.¹²

UEA daŭre flegadas la rilatojn kun UNESCO, partoprenas en ties programoj resp. subtenas ĝiajn agadojn. Ne malofte reprezentantoj de UNESCO salutas Universalajn Kongresojn aŭ sendas mesaĝojn. Certa lingvopolitika influo de UEA konstateblas rilate al la Monda Komunika Jaro en 1983. La raporto, ellaborita de *MacBride* entenas formulojn pri samrajteco de lingvoj kaj la dezirinda de universala lingvo, kiuj estas rezulto de influo de UEA (kp. MacBride 1982, 77.78).

Oni trovas multajn ekzemplojn de la engaĝiĝo de UEA por lingvopolitikaj temoj en la abunda listo de gazetaraj komunikoj¹³. Jen kelkaj ekzemploj:

Reprezentantoj de UEA partoprenis simpozion pri lingvaj rajtoj ĉe UN (1998), aktivadis en la konferenco de Ne-Registaraj Organizaĵoj kun Konsultaj Rilatoj kun UN (1998), kunagadis en la UNESCO-komisionoj “Homaj rajtoj kaj toleremo” kaj “Komunikado kaj novaj teknologioj (2000). En 2005 delegacio partoprenis la 61-an Sesion de la Komisiono pri Homaj Rajtoj de UN en Ĝenevo. En 2010 UEA aktive intervenis en la 3-a sesio de la Forumo pri Minoritatoj de Unuiĝintaj Nacioj, en Ĝenevo. En 2011 reprezentantoj de UEA partoprenis Konferencon de Neregistaraj Organizaĵoj, kiun la Departemento pri Publika Informado (DPI) de Unuiĝintaj Nacioj okazigis en Bonn (Germanio), kaj tie influis la rezolucion pri lingvaj rajtoj.

5.3. Lingvopolitikaj temoj diskutataj en Universalaj Kongresoj

Dum la Universalaj Kongresoj ne malofte estas diskutataj lingvopolitikaj temoj, ĉu en prelegoj kaj seminarioj kiel kongresaj temoj aŭ kiel sciencaj aranĝoj. La oficialaj kongrestemoj ofte estis ligitaj al kampanjoj de UN kaj de UNESCO. La kongresaj debatoj ofte trovas reflektan en la rezolucioj de la kongresoj.

Jen malgranda elekto de kongrestemoj, kies diskutoj evidente ne povis ignori lingvopolitikajn aspektojn:

74-a UK, 1989 (Brighton): *Lingvo kaj egaleco en internacia komunikado.*
77-a UK, 1992 (Wien): *Kiam falas muroj de miljaroj: komuna eŭropa domo.*

¹¹ En ĉi-tiu ĉapitro mi ĉefe sekvas Tonkin (2006, 68-88).

¹² Vd. la esperantlingvajn versiojn de ambaŭ rezolucioj en la Jarlibro de UEA, 2011, p. 8-9.

¹³ <http://www.uea.org/dokumentoj/komunikoj/index.html>.

78-a UK, 1993 (Valencia):	<i>Klerigo por la 21-a jarcento.</i>
81-a UK, 1996 (Praha):	<i>Kulturo: valoro aŭ varo?</i>
82-a UK, 1997 (Adelaide):	<i>Toleremo kaj justeco en multkultura socio.</i>
84-a UK; 1999 (Berlin):	<i>Tutmondiĝo – ŝancoj por paco?</i>
85-a UK, 2000 (Tel-Aviv):	<i>Lingvo kaj kulturo de paco.</i>
86-a UK, 2001 (Zagreb):	<i>Kulturo de dialogo – dialogo de kulturo.</i>
88-a UK, 2003 (Göteborg):	<i>Lingvaj rajtoj kaj respondecoj.</i>

Ekz. en la kongresrezolucio de la 88-a UK 2003 en Gotenburgo oni trovas jenajn esprimojn kun klare lingvopolitikaj signifoj: *lingva pluralismo, lingva demokratio, lingva diverseco kiel riĉaĵo, lingvaj rajtoj, demokratia komunikado, egaleca kaj klara lingvo-politiko*¹⁴.

89-a UK, 2004 (Beijing):	<i>Lingva egaleco en internaciaj rilatoj.</i>
91-a UK, 2006 (Florenz):	<i>Lingvoj, kulturoj kaj edukado al daŭrigebla evoluo.</i>
93-a UK, 2008 (Rotterdam):	<i>Lingvoj: trezoro de la homaro.</i>
94-a UK, 2009 (Białystok):	<i>“Krei pacan ponton inter la popoloj: Zamenhof hodiaŭ”,</i>
96-a UK, 2011 (København):	<i>Dialogo kaj interkompreno.</i>

La lingvopolitikajn aspektojn en la kunlaboro de UEA kun UNESCO kaj aliaj organizaĵoj ankaŭ bone reflektas la rezolucio de *la 91-a UK en Florenco (2006)*. Tie oni i.a. substrekas

- ke la Jardeko de Edukado por Daŭropova Evoluigo 2005–2014 estas grava kadro por iniciatoj cele al evoluo kiu estu socie dezirinda, ekonomie vivkapabla, kulture taŭga kaj ekologie daŭrigebla;
- ke nuntempe ekzistas gravaj minacoj kaj al biodiverseco kaj al kultura kaj lingva diversecoj, pro la reciproka dependeco inter la homo kaj la naturmedio;
- ke la nuna superrego je monda skalo de unu lingvo havas maltrankviligajn ekonomiajn, sociajn, kaj edukajn efikojn koncerne daŭropovecon, lingvan ekologion kaj la rajton je komunikado;
- ke la strebado de la Esperanto-movado al lingva demokratio kongruas kun la valoroj de transnacia edukado celanta informitajn, aktivajn civitanojn, kiuj estu kapablaj kritike kompreni sin mem kaj la ĉirkaŭan mondon por partopreni la evoluprocedon responde kaj solidare.

(La Kongreso)

Alvokas la Esperanto-komunumon aktive engaĝiĝi en la agadoj kiuj, sur diversaj niveloj, strebas antaŭenigi praktikojn koherajn kun la principoj de la bezonata ŝanĝoprocezo, kaj utiligi siajn lingvon kaj retojn serve al tiuj klopodoj.[...]

Konfirmas la pretecon de la Esperanto-komunumo kunlabori kun Unesco kaj aliaj organizaĵoj cele al tutviva edukado por paco, socia justeco kaj kultura diverseco, kaj atentigas ilin pri la lingva aspekto de daŭropova evoluigo.”¹⁵

¹⁴ <http://www.uea.org/dokumentoj/uk2003/rezolucio.html>.

¹⁵ La kompleta teksto aperis en *Esperanto* (Rotterdam), Nr. 9 (1195), p. 175.

5.4. Eŭropa integriĝo ankaŭ lingve? Klopodoj de esperantistoj

Ekzistas multaj komplikaj problemoj kun gravaj lingvopolitikaj implikiĝoj en 27-membra Eŭropa Unio. Ili devenas el la kontraŭdiro inter la jure garantiita samrajteco de 23 lingvoj kaj la teknika neceso komuniki kiom eble efike, ekonomie kaj glate. Tiun komunikadon oni ĉefe (kvankam ne nur) realigas per la angla. La dominado de tiu lingvo favoris diversaj faktoroj, i.a. manko de lingvopolitika konscio ĉe multaj membro-ŝtatoj.

Ekde la 70-aj jaroj de la 20-a jarcentoj diversaj grupoj en kaj ekster UEA okupiĝis pri la lingva problemoj de EU kaj ties antaŭulo (Eŭropa Komunumo) kaj pledis por Esperanto. En 1965 en Vieno okazis la unua Eŭropa Esperanto-Konferenco, la unua Eŭropa Esperanto-Kongreso okazis en 1976 en Eindhoven (NL). Tra la jardekoj oni fondis komisionojn, klubojn, organizaĵojn kaj instituciojn, kiuj okupiĝis pri eŭropaj temoj kaj klopodis lobii por Esperanto. Sen detaloj¹⁶ menciindas i.a.:

- Eŭropa Komisiono de UEA
- Eŭropa Klubo (1974) kun la bulteno “Eŭropa Dokumentaro”
- Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS, kun multaj studoj pri la lingva aspekto de la eŭropa integriĝo, eŭrologio)
- Working Group on the language problem in the European Union (Laborgrupo pri la lingva problemoj en Eŭropa Unio, ĉefe kun Hans Erasmus kaj Michael Cwik)
- Asocio por Eŭropa Konscio
- Eŭropa Esperanto-Unio (EEU)
- La itala Radikala Partio klopodis agadi pere de sia “espERAnto radikala asocio”.

Lastatempe fondiĝis la kvazaŭpolitika partio *Eŭropo Demokratio Esperanto* (EDE), kiu dum la balotoj por la Eŭropa Parlamento en 2009 en Germanio ricevis sume 11.859 voĉojn kaj en Francio 29.263¹⁷.

Necesus aparta analizo, ĉi-tie ne farebla, por prezenti la multajn aktivizaĵojn de la menciitaj organizaĵoj (i.a. aranĝoj, publicaĵoj, ekspozicioj, kontaktoj kun EU-institucioj ktp.). La unuopaj organizaĵoj aktivadis dum malsamaj tempoj kaj ne ĉiam kunordigite. Komisiitoj de UEA kaj/aŭ de EEU agadas en eŭroptemaj landaj aranĝoj kaj tie levas lingvopolitikajn demandojn, ekz. kadre de la *Ekonomiaj Forumoj* en la pola urbo Krynica aŭ en aranĝoj de la *Unio de Eŭropaj Federistoj* kaj respektivaj landaj organizaĵoj.

Lingvopolitikajn demandojn EEU kaj UEA levas, ofte kune kun aliaj organizaĵoj kadre de apartaj konferencoj (ekz. 2006 en Bratislavo pri perspektivoj de lingvopolitiko kaj lingvaj rajtoj en Eŭropa Unio¹⁸). Post diversaj antaŭŝtupoj (ekz. *Eŭropa Esperanto-Centro*) en 1977 fondiĝis la jam supre menciita *Eŭropa Esperanto-Unio*

¹⁶ Pri la historio de la klopodoj vidu <http://www.europo.eu/eo/historio>.

¹⁷ http://www.u-matthias.de/verein/ede_de.htm.

¹⁸ Tiu konferenco estis verŝajne la unua konferenco financata de EU Membroŝtato (Slovakio), kiu havis Esperanton kiel unu el siaj 4 laborlingvoj.

(EEU), kunlabora kupola organizaĵo de la eŭropaj landaj asocioj de UEA. Ĝi aktivas en esperantistaj kaj neesperantistaj medioj, inter alie en EU. Pri la abunda agado informas la retejo de EEU¹⁹

EEU okazigas aranĝojn kadre de Universalaj Kongresoj, organizas specialajn kongresojn (foje kune kun landaj asocioj), klopodas kunlabori kun EU-instancoj, kunagadas en nacilingvaj eŭroptemaj aranĝoj kaj konferencoj kaj eldonas retan publikaĵon, la “Eŭropan Bultenon” (EB), kiu sisteme informas pri la agado de la organizaĵo. La aktualan laboron grave helpas i.a. la pola parlamentano *Margareta Handzlik* kaj la profesiaj diplomatoj *Seán Ó Riain* (Irlando, (prezidanto de EEU) kaj *Jozef Reinart* (Slovakio), ĉiuj spertaj esperantistoj.

Menciindas nur kelkaj malmultaj ekzemploj el la agado de EEU:

- ekspozicio (31.1.2008) en la Europa Parlamentejo, Bruselo, “Junularo en Interkultura Dialogo: kion povas kontribui Esperanto?”
- Informoj pri la UK en Roterdamo 2008 al ĉiuj EU-parlamentanoj (732 personoj)
- Informoj al la parlamentanoj pri la lingvo-politika ekonomika raporto de *François Grin* (septembro 2009).
- Okaze de la 150-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof *Margareta Handzlik* aranĝis (13.1.2010), ke delegacio de EEU renkontis la prezidanton de Eŭropa Parlamento *Jerzy Buzek*, eksĉefministron de Pollando (1997-2001).
- Informoj al ĉiuj EU-parlamentanoj (nun 751 personoj, post la efektivigo de la Traktato de Lisbono), pri la rekomendoj de la “Civitanosocia platformo por promocio multlingvismon” kaj pri la ebleco uzi la novan EU-civitanan iniciaton, kiam ĝi ekfunkcios en aprilo 2012, por ke EU konsideru oficialigi la kantadon de la Eŭropa Himno en Esperanto (majo 2011).

EEU ankaŭ lerte partoprenas diversajn EU-projektojn, EU-programojn, kaj aliajn iniciatojn, parte eĉ kun financa subvencio. Jen kelkaj:

- EU-Programo: “Civitanosocia platformo por promocio multlingvismon” (tre sukcesa kunlaboro de EEU; en la fina raporto Esperanto estas kelkfoje pozitive menciita)²⁰
- EU-programo: “Eŭropo por Civitanoj” (laborgrupo “Aktiva Eŭropa Civitaneco”, vd. EB 75)
- EU-programo: “Alieco kiel valoro” (konferenco kaj publikaĵo: vd. Maja Tišljar 2008)
- EU-Projekto: “Grundtvig” (edukado/instruado de plenkreskuloj (55+)²¹
- EU- “Enketo por civitanoj pri ekonomia kaj socia estonteco de EU” (EB 80)
- EU-Projekto: “Publika Konsultado pri la strategio de EU ĝis 2020” (EB 90)
- EU-Programo: “Eŭropaj simboloj kaj valoroj” (propono: Eŭropa Himno en Esperanto)²²

¹⁹ <http://www.europo.eu/eo/chefpagho> .

²⁰ http://ec.europa.eu/education/languages/pdf/doc5088_en.pdf.

²¹ http://ec.europa.eu/education/lifelong-learning-programme/doc86_en.htm, (ankaŭ vd. EB 86-87).

²² <http://www.europo.eu/ge/europaische-hymne> .

Kelkfoje EEU prezentas proprajn projektojn, kiujn EU financas, ekz. la projekton “Kiel aspektus Eŭropo se EU ne ekzistus?” (Konferenco: 9-a ĝis la 11-a de majo 2012 en Triesto). Foje EEU aranĝas pritemajn konferencojn kune kun landa asocio (ekz. 25.-26.8.2008 kun Itala Esperanto-Federacio en Grosetto “Estonteco de la ideo de Eŭropa Identeco”; 10.12.2008 en Bruselo “Dulingva kaj multlingva edukado”).

Reprezentantoj de EEU sole en 2008 partoprenis en pli ol 30 aranĝoj de EU aŭ prelegis pri eŭroprilataj temoj. Entute la priagadaj jarraportoj de EEU montras mirindan kaj multflankan aktivecon.²³ Kelkfoje la aktivuloj de EEU sukcesis akiri financajn subtenojn flanke de EU por difinitaj aranĝoj, aŭ, kvankam nur partatempe, eĉ por oficejo (gvidas *Maja Tišljari*).

La eŭropa agado havis kelkajn lingvopolitike gravajn atingojn.

Internen direktitaj atingoj:

Kreiĝis kaj stabiligis organiza strukturo por agadi kaj lobiadi en EU por Esperanto. Kolektiĝis ne malmultaj spertoj ĉi-rilate. La organizoj kaj konkretaj agadoj kondukis al certa konsciiĝo en la lingvo-komunumo de Esperanto pri gravaj lingvo-politikaj aspektoj de la eŭropa procezo kaj jen kaj jen stimulis ties membrojn iom pli sisteme okupiĝi pri la temaro.

Eksteren direktitaj atingoj:

Per la konkretaj agadoj en la institucioj de EU eblis certagrade montri, ke Esperanto ekzistas kaj funkcias.

Ĉar pli kaj pli ofte leviĝis proponoj lige al Esperanto, kelkaj fakuloj kaj lingvo-politikistoj en siaj publikaĵoj sentis sin devigitaj reflekti pri Esperanto, foje pozitive, sed ofte negative. Tio ankaŭ validas por ĵurnalistoj. Se oni rigardas la ĉi-rilatan evoluon, eblas konstati milde pozitivan tendencon.

La esperantista agado (ĉefe flanke de EEU) subtene al oficialaj EU-programoj, kiu trovis certan aprobon, foje eĉ financan subvencion, estas fakte nereakta akcepto, ke Esperanto funkcias. En la neesperantista fakula medio oni sukcesis trovi kelkajn alianculojn, kiuj – kvankam malsamaspekte kaj malsamgrade – atentigis pri la neceso serioze okupiĝi pri Esperanto (ekz. vidu *Robert Phillipson* 1992, 2004 kaj *François Grin* 2005).

6. Sciencaj aspektoj: De la monda lingvo-problemo al lingvaj problemoj de la mondo

Post la Dua Mondmilito kaj nelaste lige al la UNESCO-Rezolucio de 1954 fariĝis klare, ke la klopodoj antaŭenigi Esperanton bezonas scian bazon, aparte per kunlaboro de interlingvistoj, esperantologoj kaj socilingvistoj. Gravis meti la problemon en internacian lingvo-komunikan kadron.

Ĉi-rilate oni povas distingi du periodojn:

²³ <http://www.europeco.eu/documentloader.php?id=59&filename=raporto-pri-la-agado-de-eeu-en-2008.pdf>.

Ĝis meze de la 1970aj jaroj en la fokuso de la sciencaj analizoj troviĝis la monda lingvo-komunika problemo. Poste oni komprenis, ke la monda lingvo-komunika problemo ne estas rigardebla kaj komprenebla senlige al *aliaj* lingvaj problemoj de la mondo.

Tiun evoluon i.a. spegulas CED.

6.1. CED kaj la revuo “La Monda Lingvo-Problemo” (LMLP)

La siatempa ĝenerala sekretario kaj posta prezidanto de UEA (1964-1974), la kroato *Ivo Lapenna* (1909-1987) en la jaro 1952 fondis centron, kiu kolektu dokumentojn por sciencaj celo. Li nomis ĝin *Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo* (CED). En la centro de la esploroj staris, kiel diras la nomo, la monda lingvo-komunika problemo. CED eldonis kelkajn dokumentojn kaj librojn.

Aparte grava estis la revuo *La Monda Lingvo-Problemo* (LMLP), eldonita de la prestiĝa lingvistika eldonejo Mouton (Den Haag). De 1969-1977 aperis 18 kajeroj (redaktoroj: *Victor Sadler*, *Richard Wood*). En la eldonkomitato troviĝis gravaj lingvistoj kun internacia renomo, i.a. *Paul Ariste* (Tartu), *Géza Bárczi* (Budapest), *Evgenij A. Bokarev* (Moskau), *Vladimir Georgiev* (Sofia), *Zenon Klemensiewicz* (Kraków), *Bruno Migliorini* (Florenz), *Mario Pei* (New York) kaj la esperantologo kaj fondinto de la terminologoscienco *Eugen Wüster* (Wien).

La esperanta titolo de la revuo havis, kvazaŭ subtitole, la adjektivojn *socia*, *lingvistika*, *politika*, *jura*, *psikologia*, *ekonomika*. Tio montris la interdisciplinan aliron de la revuo al la „monda lingvo-problemo“. Jam en la kajero 1/1969 de la revuo oni trovis i.a. jenajn kontribuojn:

Ivo Lapenna: *La situation juridique des „langues officielles“ avant la fondation des Nations Unies*

Arthur Capell: *The limits of second language learning*

Jaroslav B. Rudnyskyj: *Linguizid. Ein Beitrag zur Soziolinguistik*

Maurits van Haegendoren: *The origins of the language shift in Flanders*

Theodore Gutmans: *L'Interprète de conférence dans le monde moderne*

Ralph L. Harry: *The language problem in diplomacy*

6.2. CED kaj „Language Problems & Language Planning“ (LPLP)

Alia prezidanto de UEA (1974-1980, 1986-1989), la brito *Humphrey Tonkin* (1939-), ŝanĝis la nomon de la institucio CED al *Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvo-Problemoj*. Gravas la pluralo, kiu ankaŭ reflektiĝis en la titolo de la revuo, la sekvanto de LMLP, kiu fariĝis *Language Problems & Language Planning* (LPLP). Ĉefredaktoroj estis *Richard Wood* (USA) ĝis 1984, post tio *Humphrey Tonkin/USA* [ekde 1984-]; ekde 1990 aldoniĝis *Probal Dasgupta* (Barato).

Ekde 2011 Tonkin estas la sola ĉefredaktoro. Ankaŭ tiu ĉi revuo estas eldonata de prestiĝaj eldonejoj (Mouton/Den Haag, University of Texas Press/Austin, ekde 1990 Benjamins/ Amsterdam). Kiel LMLP ankaŭ LPLP publikigas diverslingvajn lingvopolitikajn studojn, ĉiam kun diverslingvaj resumoj, inter ili devige en Esperanto. La enhava temspektro de la revuo fariĝis ankoraŭ pli larĝa, kion montras kelkaj ekzemploj en la jarvolumo 34 (2010):

LPLP 1/2010

Nkonko M. Kamwangamalu: *Vernacularization, globalization, and language economics in non-English-speaking countries in Africa*

A. Majid Hayati and Amir Mashhadi: *Language planning and language-in-education policy in Iran*

Maarja Siiner: *Hangovers of globalization: A case study of laissez-faire language policy in Denmark*

Mikael Parkvall: *How European is Esperanto? A typological study*

LPLP 2/2010

Chris Allen Thomas and Brett Lee: *Language liaisons: Language planning leadership in health care*

Andreas Papapavlou: *Language planning in action: Searching for a viable bidialectal program*

Máiréad Moriarty: *The effects of language planning initiatives on the language attitudes and language practices of university students: A comparative study of Irish and Basque*

Francis M. Hult: *Swedish television as a mechanism for language planning and policy*

Esther Schor: *L. L. Zamenhof and the shadow people*

LPLP 3/2010

Sabine Fiedler: *The English-as-a-lingua-franca approach: Linguistic fair play?*

Heather McCallum-Bayliss and Carolyn Temple Adger *Variability in naming: Database challenges in multicultural and multilingual settings*

Shouhui Zhao and Yongbing Liu: *Chinese education in Singapore: Constraints of bilingual policy from the perspectives of status and prestige planning*

Probal Dasgupta: *Recontextualizing Lakshmiswar Sinha*

Krom tio ĉiu kajero enhavas recenzojn de lingvopolitikaj verkoj, foje ankaŭ de inter-lingvistikaj. La resumojn de ĉiuj kontribuoj el ĉiuj kajeroj de LPLP, kiuj ekde 1977 aperis ĉe Benjamins, oni trovas ĉe http://www.benjamins.com/cgi-bin/t_seriesview.cgi?series=lplp . Tie ankaŭ eblas serĉi laŭ aŭtoroj.

6.3. La Nitobe-simpozioj²⁴

De granda lingvopolitika signifo estas la t.n. *Nitobe-simpozioj*. Temas pri kelklingvaj lingvopolitikaj simpozioj, organizataj de CED kaj UEA kaj subtenataj de diversaj

²⁴ Vd. <http://eo.nitobe.info/ar/arangxoj/nitobe-simpozioj.php> .

instancoj, i.a. per *Esperantic Studies Fondation (ESF)*²⁵, usona fondaĵo, kiu subvencias lingvopolitikajn aranĝojn, publikaĵojn kaj aliajn aktivaĵojn. La simpozioj okazas lige al Universalaj Kongresoj.

Laŭ enhavo la simpozioj proksimas al la intencoj de CED, kiel ili i.a. reflektiĝas en LPLP. La simpozioj portas la nomon de la japana intelektulo kaj politikisto *Nitobe Inazō* (1882-1933)²⁶, kiu estis vicĝenerala sekretario de Ligo de Nacioj. Li estis komisiita partopreni la 13-an Universalan Kongreson 1921 en Prago kaj ellaboris raporton pri Esperanto. Lia raporto²⁷ estis pozitiva. Nitobe i.a. pledis por la enkonduko de Esperanto en la lernejojn. Kvankam la raporto ne havis rektajn politikajn sekvojn, ĝi tamen multe helpis al la internacia diskonigo de Esperanto kaj la plialtigo de ties prestiĝo.

Okazis ĝis nun kvar Nitobe-simpozioj:

La unua Nitobe-simpozio okazis de 20a-22a julio 1996 en Prago/ĈSR

Temo: Al lingva demokratio. Ekzistas konkluda dokumento²⁸ kaj libroforma aktaro (Fettes/Bolduc 1998)

La dua Nitobe-simpozio okazis de 2a-3a de aŭgusto julio 1999 en Berlino/Germanio.

Temo: Tutmondiĝo kaj lingva diverseco

La tria Nitobe-simpozio okazis de 25a-26a julio 2004 en Pekino/Ĉinio

Temo: Al nova internacia lingva ordo. Ekzistas konkluda dokumento²⁹ kaj libroforma aktaro (Lee/Liu 2004).

La kvara Nitobe-simpozio okazis de 30a de julio – 1a de aŭgusto 2005 en Vilno/Litovio

Temo: Lingvopolitikaj aspektoj de la larĝiĝo de la Eŭropa Unio. Ekzistas konkluda dokumento³⁰

7. Finaj rimarkoj

Kiel montras ĉi-tiu nekompleta superrigardo multaj esperantistoj havas lingvopolitikajn interesojn. De Zamenhof mem ĝis UEA oni povas spuri lingvopolitikajn vidpunktojn kaj agadojn. Por kompetente argumenti por la ideo de internacia lingvo ĝenerale kaj aparte por Esperanto, necesas interdisciplinaj scioj, aparte lingvopolitikaj. Jam ekzistas certa faka literaturo utiligebla. Krom tio de tempo al tempo eblas trovi utilajn informojn en “Informilo por Interlingvistoj” (IpI), eldonata de CED. Ĝi estas havebla ĉe la Centra Oficejo de UEA.

²⁵ <http://esperantic.org/en/>.

²⁶ Pri Nitobe vd. Kobayashi (1998, 60) kaj http://en.wikipedia.org/wiki/Nitobe_Inaz%C5%8D.

²⁷ Vd. ‘Esperanto als internationale Hilfssprache’ (1923) kaj Nitobe (1998, p. 62-78).

²⁸ <http://eo.nitobe.info/ld/dokumentujo/dokumentoj.php?id=35>.

²⁹ <http://eo.nitobe.info/ld/dokumentujo/dokumentoj.php?id=34>.

³⁰ <http://eo.nitobe.info/ld/dokumentujo/dokumentoj.php?id=33>.

Mallongigoj

- CED Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (poste Centro...pri Mondaj Lingvaj Problemoj)
- EB Eŭropa Bulteno
- IALA International Auxiliary Language Association
- IKEL Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj
- LMLP La Monda Lingvo-Problemo
- LPLP Language Problems & Language Planning
- SAT Sennacieca Asocio Tutmonda
- TEJO Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
- UEA Universala Esperanto-Asocio

Bibliografio

- BAÑERES, Jordi & STRUBELL, Miquel 2002: *Diskutlibro pri malpli uzataj lingvoj*. Esperantigis Edmund Grimley Evans. Rotterdam: UEA.
- BAUMANN, Adalbert 1915: *Wede, die Verständigungssprache der Zentralmächte und ihrer Freunde, die neue Welt-Hilfs-Sprache*. Diessen: Huber.
- BLANKE, Detlev 1985: *Internationale Plansprachen. Eine Einführung*. Berlin: Akademie-Verlag.
- 2001: Kiu bezonas civiton? En: *Esperanto* 94/5 (1136): 82-85.
- 2005: Ĉu Esperanto havas kulturon? Jes kaj ne! En: *Informilo por Interlingvistoj* 14, n-ro 54 (3/05): 11-16.
- 2009a: Causes of the relative success of Esperanto. En: *Language Problems & Language Planning* 33(2009)/3: 251-266.
- 2009b: Pri la kialoj de la relativa sukceso de Esperanto. En: Melnikov, Aleksandr S. (red.): *Aktual'nye voprosy lingvistiki, filologii i metodiki prepodavanija inostrannyh jazykov v nejaszykovom vuze. Materialy meždunarodnoj zaočnoj naučno-metodičeskoj konferencii g. Rostov-na-Donu, 27-18 nojabrja 2009 g.* Rostov-na-Donu: Rostovskaja-na-Donu gosudarstvennaja akademija sel'skochozjajstvennogo mašinostroenija. 81-92.
- 2009c: Sprachenpolitische Aspekte internationaler Plansprachen – Unter besonderer Berücksichtigung des Esperanto. En: Detlev BLANKE & Jürgen SCHARNHORST (red.) 2009: *Sprachenpolitik und Sprachkultur*. Frankfurt/Main: Peter Lang, 205-253.
- 2011: Zur Plansprachenfrage im Europäischen Raum. En: Ines-Andrea BUSCH-LAUER & Sabine FIEDLER (red.) 2011: *Sprachraum Europa – Alles Englisch oder...? Berlin: Frank & Timme*. 161-177.
- CORSETTI, Renato (red.) 1984: *Diskriminacio*. Rotterdam: UEA.
- DE MOTT, Benjamin 1955: Comenius and the Real Character in England. En: *PMLA* (Menasha, Wisconsin), Vol. 70: 1068-1081.
- DULIČENKO, Aleksandr D. 1990: *Meždunarodnye vspomogatel'nye jazyki*. Tallin: Valgus.
- ESPERANTO ALS INTERNATIONALE HILFSSPRACHE. Bericht des Generalsekretariats des Völkerbundes, angenommen von der 3. Vollversammlung des Völkerbundes. Leipzig: Hirt & Sohn.

- FETTES, Mark & BOLDUC, Suzanne (red.) 1998: *Al lingva demokratio. Towards Linguistic Democracy. Vers la démocratie linguistique*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- GRIN, François 2005: *L'enseignement des langues étrangères comme politique publique*. Rapport établi à la demande du Haut Conseil de l'Évaluation de l'École. No 19 (Septembre 2005). En : www.unige.ch/eti/elf (sekvu: Publications ->Rapports de recherche).
- JARLIBRO 2011= Universala Esperanto-Asocio. *Jarlibro* 2011. Rotterdam: UEA.
- KOBAYASHI, Tsukasa 1998: Kulturperanta samurajo. En: FETTES/BOLDUC 1998: 60.
- KOLBE, Ino 1996: Zur Geschichte des Deutschen Arbeiter-Esperanto-Bundes in Leipzig (Westsachsen). Teil I und II. Von den Anfängen bis zum Verbot 1933. Teil I: Von den Anfängen bis zum „Völkerspiegel“ (1924); Teil II: 1925 bis zum Verbot (1933). Eine kommentierte Dokumentation. Herausgegeben, kommentiert und bearbeitet von Detlev Blanke. Leipzig: Sächsischer Esperanto-Bund.
- LAPENNA, Ivo 1974: La demando de komuna lingvo antaŭ internaciaj institucioj. En: LAPENNA, Ivo & LINS, Ulrich & CARLEVARO, Tazio (red.) 1974: *Esperanto en perspektivo. Faktoj kaj analizoj pri la Internacia Lingvo*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio. 748-792.
- LEE, Chong-Yeong & LIU, Haitao (red.) 2004: *Al nova internacia lingva ordo. Aktoj de la 3-a Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj pri Lingvaj Problemoj en Internaciaj Rilatoj 25-26 julio 2004, Pekino, Ĉinio. Towards a New International Language Order. Proceedings of the Third Nitobe Symposium of International Organisations on Language Problems in International Relations, 25-26 July 2004, Beijing, China*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- LINS, Ulrich 1988: Die gefährliche Sprache. Die Verfolgung der Esperantisten unter Hitler und Stalin. Gerlingen: Bleicher.
- MAAT, Jacob 1999: *Philosophical Languages in the Seventeenth Century: Dalgarno, Wilkins, Leibniz*. Amsterdam: Universiteit van Amsterdam.
- MACBRIDE, Sean 1981: *Viele Stimmen – eine Welt. Kommunikation und Gesellschaft heute und morgen*. Bericht der Internationalen Kommission zum Studium der Kommunikationsprobleme unter dem Vorsitz von Sean MacBride an die UNESCO. Konstanz: Universitätsverlag.
- NITOBÉ, Inazô 1998: Esperanto and the Language Question at the League of Nations. En: FETTES/ BOLDUC, 62-78.
- NOLTENIUS, Rainer (red.) 1993: Den Arbeitern aller Länder eine Sprache! Illustrierte Geschichte der Arbeiter-Esperanto-Bewegung. Al la laboristoj en ĉiuj landoj unu lingvon! Ilustrita historio de la Laborista Esperanto-Movado. Informationen 37/93. Katalog zur Ausstellung des Fritz-Hüser-Instituts Dortmund. Dortmund: Fritz-Hüser-Institut für deutsche und ausländische Arbeiter-Literatur (tekstoj en la germana kaj Esperanto).
- PETIOKY, Viktor 1997: Begegnung mit „Neuslawisch“ – Zum Versuch der Konstruktion einer gemeinsamen Sprache für die Slawen der Habsburgermonarchie. En: EICHNER, Heiner & ERNST, Peter & KATSIKAS, Sergios (red.) 1997: *Sprachnormung und Sprachplanung. Festschrift für Otto Back zum 70. Geburtstag*. Wien: Edition Praesens (2-a eldono), p. 373-384.
- PHILLIPSON, Robert 1992: *Linguistic Imperialism*. Oxford: Oxford University Press.
— 2004: *Ĉu nur-angla Eŭropo?* (El la angla esperantigis István Ertl). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- POMPIATI, Karl 1918: *Die neue Weltsprache Nov Latin loqui*. Wien: Selbstverlag.

- SAKAGUCHI, Alicja 1998: *Interlinguistik. Gegenstand, Ziele, Aufgaben, Methoden*. Frankfurt/M.: Peter Lang.
- TIŠLJAR, Maja (red.) 2008: *Interkultura dialogo kaj komunikado*. Referaĵkolekto de eŭropa konferenco (Maribor 29.-31.07.2007). Maribor: Eŭropa Esperanto-Unio.
- TONKIN, Humphrey 2006: *Lingvo kaj popolo. Aktualaj problemoj de la Esperanto-movado*. Rotterdam: UEA.
- ZAMENHOF, L[udwig] L[azar] 1963: *Fundamento de Esperanto*. Naŭa eldono kun enkondukoj, notoj kaj lingvaj rimarkoj de D-ro A. Albault. Marmande: Esperantaj Francaj Eldonoj. — 2006: *Mi estas homo*. Originalaj verkoj de d-ro L.L. Zamenhof. Redaktis, kompilis, komentis Aleksander Korĵenkov. (Serio Scio, 6). Kaliningrado: Sezonoj.

Demandoj kaj diskuttemoj

- 1) Kiel oni povus difini lingvopolitikon en la esperanta medio?
- 2) Menciu kelkajn planlingvojn resp. planlingvajn projektojn, kiuj baziĝas je lingvofilozofiaj motivoj!
- 3) Klarigu, kiun rolon ludis pacifismaj motivoj en la konstruado de planlingvoj!
- 4) Kiun ĉefan motivaĵon havis Alexander Gode por Interlingua?
- 5) Kio estas popol-grupon interliga motivo? Bv. mencii projekton!
- 6) Je kiu motivo baziĝas Wede de Baumann?
- 7) Klarigu la diferencon inter projekto kaj lingvo!
- 8) Ĉu lingvo “havas” kulturon?
- 9) Kiun ĉefan lingvopolitikan motivaĵon havis Zamenhof?
- 10) Kio estas „sennaciismo“ de Lanti?
- 11) Por kiuj celoj laboristaj esperantistoj klopodis uzi Esperanton?
- 12) Klarigu la aparte gravan lingvopolitikan rolon, kiun ludis Zamenhof por la kreo kaj stabiligo de Esperanto!
- 13) Menciu la ĉefajn statute fiksitajn celojn de UEA!
- 14) En la Manifesto de Prago rolas i.a. jenaj nocioj: demokratio, transnacia edukado, lingvaj rajtoj kaj lingva diverseco. Kiel esperantistoj rilatas al tiuj nocioj?
- 15) Kion vi scias pri la rilatoj inter UEA kaj UNESCO?
- 16) Menciu kelkajn temojn de la Universalaj Kongresoj de UEA, almenaŭ laŭesence!
- 17) Kiel esperantistoj klopodas lobii por Esperanto kadre de Eŭropa Unio?
- 18) Menciu kelkajn ekzemplojn el la agado de Eŭropa Esperanto-Unio!
- 19) Kio estas CED?
- 20) Klarigi pri la diferencoj inter la revuoj “La Monda Lingvo-Problemo” kaj “Language Problems & Language Planning”
- 21) Kion celas la Nitobe-simpozioj? Bv. karakterizi tiun serion da aranĝoj.

Detlev BLANKE (1941-2016) germana interlingvisto, okupiĝis pri diversaj aspektoj de planlingvoj, speciale pri Esperanto, publikigis multaj fakajn artikolojn kaj librojn pri ili, inkluzive la lingvopolitikan kaj terminologian rolojn. Instruis interlingvistikon en la Humboldt-Universitato, Berlino, fondis la germanan Interlingvistikan societeton, estis ĝia prezidanto kaj organizis ĝiajn jarajn konferencojn.

La kontribuo de Esperanto al la debato pri komunikado en multlingva mond-ordo

Resumo

Ekde la apero de la *Unua Libro* (1887), Esperanto proponas sin kiel solvon por internacia komunikado. Tamen, post pli ol unu jarcento, nuntempe estas la angla kiu ludas la rolon delonge esperatan de la plej idealistaj samideanoj por Esperanto. Per tiu ĉi kontribuo, mi celas reviziti kaj aktualigi la diskuton pri la adopto de iu komuna lingvo por internacia komunikado tutmondskale. Inter alie, mi revenas al la multflanka problemo koncerne la simplan adopton de iu etna lingvo – kiel la angla – por tiu rolo, kaj reliefigas la ekziston de multlingva mond-ordo aktuale, kiu anstataŭ malavantaĝo, povas reprezenti gravan oportunon por la antaŭenigo de Esperanto kiel unu el kelkaj faktaj internaciaj lingvoj nuntempe. Tiel, per la kunagado kun aliaj kulturaj kaj lingvaj institucioj havantaj komunajn celojn kaj valorojn kun Esperanto – tiuj de lingvodemokratio, lingvodiverseco k.a. – la oficialaj esperantaj institucioj devas eniri la debaton pri alternativa multlingva modelo, celante kontraŭpezi la dominon de la unulingva solvo surbaze de la angla.

Enkonduko

Aperinta en 1996, en Barcelono, la „Universala Deklaracio pri la lingvaj rajtoj” (Unesko 1996) havis jam sian 25-jaran jubileon. Malgraŭ tio, facile konstateblas, ke la rajtoj tie unuafoje certigitaj apenaŭ realiĝis en internacia skalo, eĉ ne en la politikaj kontekstoj kie la lingva problemo nuntempe elstaras, kie ekzemple pluraj lingvoj eventuale disputas politikan spacon, minacas lingvajn minoritatojn, malhelpas senkonfliktan kaj egalecan interkomunikadon aŭ reprezentas konsiderindajn financajn ŝargojn al landoj. Tiaj problemoj, troviĝantaj aparte en Eŭropo, jam estis bone trafitaj de pluraj specialistoj (Piron 1994; Koutny 2005; Blanke 2017). Blanke (2017: 52) montris, ke la idealoj de multlingveco, samrajteco, lingva ekonomio, ne diskriminacieca kaj efika komunikado kaj, fine, sed ne malplej grave, lingva demokratio, konsistigas laŭleĝe la lingvo-politikon kaj lingvo-filozofion de eŭropaj dokumentoj, sed estas apenaŭ realigeblaj praktike. Koutny (2005) listigis la plej gravajn lingvojn uzatajn en Eŭropo, laŭ nombro de parolantoj kaj ekonomia potenco de ties lingvo-komunumoj¹, kaj elmontris, ke, kontraŭ la

¹ Mi preferas la vorton „lingvo-komunumo”, ĉar parolantoj de iu sama lingvo tre ofte devenas de pli ol unu lando en Eŭropo: franclingvanoj, ekzemple, troviĝas en Francio, Belgio, Svislando, Luksemburgio. Tamen, mi komprenas ke, kulture iu sama lingvo-komunumo povas enhavi plurajn aliajn kultur-komunumojn (tiusence, ekzemple, eble franclingvanoj el Belgio kaj Francio apartenas al malsamaj kultur-komunumoj).

idealo de multlingveco, Eŭropa Unio (EU) praktike tendencas al la unulingveca modelo por interkultura komunikado, kun la angla plenumanta la ĉefan rolon, malgraŭ tio, ke tiu lingvo nek estas la plej vaste parolata en EU, nek reprezentas la plej gravan ekonomian potencon en tiu kontinento. Tio eĉ pli validas post la Briteliro.

Kadre de tiuj diskutoj, mi celas per tiu eseo tuŝi la problemon de la nuntempa internacia komunikado, demandante, ĉu la plej bona elpaŝo tiucele estas pledi por aŭ kontraŭ la adopto de iu specifa komuna lingvo – kiel la angla aŭ Esperanto –, aŭ ĉu estas aliaj elpaŝoj farendaj vidalvide la aktualan multlingvan kaj diversecan mond-ordon. Unue, mi analizas la faktan rolon de la angla lingvo kiel internacia komunikilo aktuale, sekve mi prikomentas kelkajn alternativajn lingvopolitikajn iniciatojn; fine, mi taksas la potencialon de Esperanto kune kun aliaj internaciaj institucioj celantaj la konstruadon de alternativo al iu pli demokratia, egaleca kaj diversa lingvo mond-ordo.

1. La angla kiel „tutmonda” lingvo

Uzata vastskale kiel *lingvafrankao* por scienco, teknologio, aviado, turismo, kinarto, muziko, diplomatio kaj politikaj aferoj, inter pluraj aliaj, la angla ŝajnas esti neevitebla lingvo en iu ajn diskuto pri internacia komunikado. Parolata de inter 360 kaj 400 milionoj da individuoj kiel denaska lingvo, de aliaj 750 milionoj kiel dua lingvo kaj de alia 600-700 milionoj da individuoj kiel fremda lingvo², la angla estas nuntempe la plej vaste parolata lingvo en la mondo por interkultura kaj internacia komunikado, kaj ŝajnas ludi senprecedencan rolon en historio. Ĝi estas la plej uzata lingvo en la reto, reprezentante, ĝis 2009, 68,4% da retpaĝoj, sekvata de la japana (5,9% da retpaĝoj), la germana (5,8%), la ĉina (3,9%), la franca (3%), la hispana (2,4%), la portugala (1,9%), la rusa (1,4%) kaj la araba (0,04%) (Breton 2009, laŭ Ludivynn 2012). David Crystal (2003: 69) taksas, ke ne-denaskaj parolantoj nun plimultas ol denaskaj parolantoj je la proporcio de 3 al 1, kio pravigas la ekziston de tio kion li nomas *tutmonda angla* (*Global English*)³.

Kelkaj esploristoj ŝajnas rekoni la kvazaŭan finan kaj definitivan venkon de la angla lingvo en la tutmonda lingva pejzaĝo (Crystal, 2003; Kushner, 2003 kaj aliaj). Agnoskinte, ke la uzado de la angla kiel internacia lingvo okazas kiel konsekvenco de pluraj historiaj demarŝoj, kaj ke aliaj lingvoj, kiel la franca estis plenumintaj similan rolon, Kushner (2003) taksas la internacian anglalingvan uzadon kiel la plenumon de tiu „homarana revo” pri komuna lingvo. Laŭ ŝi:

² Ne estas eble nombri ekzakte la parolantojn aŭ uzantojn de iu lingvo – nek por anglolingvanoj, nek por esperant-lingvanoj, pro tio, ke pluraj faktoroj konsiderendas, kiel la kompetentnivelo, la pasiva aŭ aktiva kapablo, la instruado ktp. Tiuj nombroj troviĝas ĉe la angla versio de Vikipedio: https://en.wikipedia.org/wiki/English_language

³ Menciindas ankaŭ la ekzisto de projektoj celantaj konscie simpligi la anglan por internacia komunikado, ekzemple, kadre de Eŭropa Unio, kiel la projekto „Sayspel” (Blanke 2017: 66). Nuntempe, oni pli ofte parolas pri ELF – „English as *Lingua Franca*”.

estas certe pozitiva flanko de la fenomeno: ni memoru la humanisman revon, kiun mi menciis dekomence, tiun de komuna lingvo, kiu unuigus la homaron, kaj kiu povus esti artefarita lingvo, aŭ natura lingvo alia ol la angla. Kial ne la angla, se ĉiuj historiaj fortoj, kiujn mi menciis, proponas ĝin al ni kiel lingvon de komunikado? Foje la historio kunportas la plenumon de plibonigoj, kiuj antaŭe ŝajnis nepenseblaj⁴ (Kushner, 2003: 19).

Per la supra citaĵo, estas evidente, ke la ĉeĥ-devena lingvisto pretervidas la politikajn, ekonomiajn kaj sociajn flankojn de la uzado de la angla kiel internacia komunikilo. Ŝia rezonado implicas la ideon kvazaŭ historio jam estus atinginta sian finon kaj alia alternativo ekster la elekto de la angla ne plu eblus. Esperanton ŝi supraĵe (kaj iom malestime) mencias kiel ekzemplon de malsukceso kaj de la malfacileco krei kaj enkonduki artefaritan lingvon.⁵

Tamen, plurajn problemojn naskas la elekto de etna lingvo en unulingveca modelo por internacia komunikado. Kelkaj inter ili jam estis menciitaj de L.L. Zamenhof en lia parolado en Parizo okaze de la kongreso de la Asocio por Antaŭenigo de Sciencoj en 1900: per etna vivanta aŭ mortinta lingvo, internacia komunikado postulas multe pli longan kaj penan lingvo-lernadon kaj ne estas neŭtraleca laŭ naciaj valoroj (Zamenhof 1954 [1900]: 270). Krom tio, la elekto de etna lingvo por internacia kaj interkultura komunikado estas malpli efika, ĉar en interkultura komunikado eĥoj de nacia kultura enhavo pere de la lingvo adoptita povas malhelpi interkompreniĝon kaj malebligi egalecan dialogon inter denaskuloj kaj nenedaskuloj. Tre klare evidentigas tiun problemon la faktoj, ke nuntempe distingiĝas tri-nivelaj uzoj de la angla – la tiel nomataj „cirkloj” (Kachru 1992, vidu bildon sube) – kaj ke oni agnoskas plurajn „anglajn lingvojn” (*Englishes*) krom la *tutmonda angla* (Meierkord 2006).

⁴ Elangligita de mi, ankaŭ aliajn tradukojn mi plenumis.

⁵ Kushner (2003: 18): *Nur pensu pri Esperanto, malsukceso, kiu instruis nin tiom pri la malfacileco artefarite krei lingvan unuecon.*




Fig. 1.: Tri-nivelaj cirkloj pri la angla, laŭ Kachru (1992)

Krom tio, Koutny (2005) asertas, ke:

La angla estas portanto de **sia pli ol jarmila kulturo**, la strukturo de la lingvo, la frazeologiaĵoj atestas tion, speciala pensmaniero estas kodita en ĝi. Oni povas ignori la artajn verkojn kaj aludojn al ili (*To be or not to be?*), la anglajn aŭ usonajn realaĵojn (tamen ne ĉiuj same faros tion!), sed ne eblas tute sterilizi la vortojn de sia kultura ŝargo kaj forigi kulturdependajn esprimojn. La angla ne estas sufiĉe fleksebla lingvo por esprimi iun alian pensmanieron; tio eblas nur per specialaj klarigoj. La simpligita internacia angla distanciĝos de la angla de denaskuloj, samtempe ĝi ne servos kiel identigilo por alilingvanoj.

David Crystal (2003) pli amplekse analizis la rolon de la angla kiel *tutmonda lingvo* kaj traktis la eblajn negativajn sinsekojn de unuopa lingvo iĝanta tutmonda. Laŭ li, inter la riskoj troviĝas la kreiĝo de elita lingvo kiu endanĝerigus la ekziston de aliaj (ĉefaj minoritataj) lingvoj. Laŭ la irlanda lingvisto, denaskuloj estus nature parto de tiu elito, kaj nur pro tio havus la privilegion pli facile pensi kaj labori per tiu lingvo. Ne bezonante ĝin akiri per lernado, ili povus je sia avantaĝo manipuli ĝin, tiel kreante, pligrandigante aŭ konservante malegalecojn inter riĉuloj kaj malriĉuloj, inter disvolviĝintaj kaj disvolviĝantaj landoj. Fakte, ankaŭ Tonkin (2003: 36) klarigas tion:

La avantaĝoj ĝuataj de tiuj landoj [kie la angla estas denaska lingvo] ne estas nur tio, ke ili ne devu elspezi tiom da mono por lernado de fremdaj lingvoj: pro tio, ke ilia lingvo estas vaste uzata, ili ĝuas avantaĝojn multflankajn. Eksterlandaj studentoj are amasiĝas en iliaj universitatoj, portante kun si monon kaj intelektan kapablon; turistoj venas al iliaj urboj; ili havas fortan eldonan industrion; ili eksportas kulturajn produktojn diversajn, kaj iliaj kulturaj normoj pli kaj pli dominas la internacian medion.


Ankaŭ Phillipson (1992) montris la riskon krei iun „lingvan imperiismon” per la adopto de etna lingvo por internaciaj aferoj, ĉefe de lingvo kies kulturo havas koloniisman kaj imperiisman historion, kiel la angla.

2. Multlingva mond-ordo: lingvopolitikaj alternativoj

Malgraŭ la nekontestebla superregado de la angla, eĉ la plej optimismaj defendantoj de ĝia uzado agnoskas la fakton, ke oni ankoraŭ ne atingis unuanimecon pri la uzado de tiu lingvo por internacia aŭ interkultura komunikado. Dum plu restas viva debato pri kiu varianto de la angla elekteblas kaj pri la pezo de la denaska normiga faktoro (Sewell 2012), aliaj etnaj lingvoj daŭre ludas gravajn rolojn en interkulturaj interrilatoj. La sociolingvisto J. Calvet (2007), en artikolo kie li pridiskutas la estontecon de la franca lingvo, referencas al la „gravita modelo”, laŭ kio:

lingvoj estas ligitaj unu al la alia per dulingvanoj kaj ke la dulingva sistemo, ilia nivelado, ebligas al ni prezenti iliajn rilatojn en gravitaj terminoj kaj iom ordigi la grandan babelan malordon, kiu ŝajnas karakterizi la mondon (preskaŭ 7 000 lingvoj). (Calvet 2007: 153).

Laŭ tiu modelo, la rilato inter lingvoj uzataj kiel komunikiloj por interkulturaj kaj internaciaj rilatoj kaj minoritataj lingvoj estas multe pli kompleksa ol la imago kion oni kutime havas de iu superreganta lingvo (kiu kvazaŭ „venkis” la lingvan batalon super ĉiuj aliaj mondolingvoj). Fakte, ne estas nur unu sola lingvo por interkultura komunikado uzata nuntempe, sed pluraj, kiuj tamen havas malsamajn gravecojn laŭ sia pozicio pli aŭ malpli centra rilate la lingvoekologion. Laŭ Calvet (2007, vidu la bildon sube), ĉirkaŭ la *hipercentra lingvo* (la angla) orbitas aliaj pli aŭ malpli centraj lingvoj, la tiel nomataj *supercentraj lingvoj* (la franca, la hispana, la araba, la ĉina, la hinda, la malaja, la portugala, la suahila kaj la rusa), ĉirkaŭ kiuj gravitas aliaj 100 ĝis 200 lingvoj, kiuj siavice estas pivotoj de gravito por aliaj 4 ĝis 5 mil *periferiaj lingvoj*. Dum la etnaj parolantoj de la „hipercentra lingvo” havas fortan emon al unulingveco pro la komforta pozicio de sia lingvo, la plejmulto da parolantoj de aliaj lingvoj devas akiri aldonan duan aŭ trian lingvon krom la denaska por interkultura komunikado.



- Hipercentra lingvo: la angla
- Supercentraj lingvoj: la hispana, la franca, la ĉina, la rusa, la portugala k.a.
- Centraj lingvoj: ĉ. 100-200 lingvoj: la germana, la japana, la gvarania, k.a.
- Periferiaj lingvoj: ĉ. 4-5 mil lingvoj

Fig. 2.: Gravita modelo, laŭ Calvet (2007)

Tiel, pro tio, ke dulingveco kaj trilingveco ne estas malofta fenomeno, ene de la monda lingvoekologio ŝajnas esti ankoraŭ spaco por aliaj lingvoj kiuj disputas kontraŭ la angla la hegemonion kiel interkomunikilo. La graveco de aliaj supercentraj lingvoj ne estas preterlasebla, kaj evidentigas ne stabilan modelon, sed konfliktan, kun lingvopolitikaj disputoj inter la plej centraj lingvoj kaj kulturoj. La supercentraj lingvoj ofte konsistigas la unuecigan elementon de tre vastaj geopolitikaj kaj kulturaj grupoj. La franca, ekzemple, estas la unuiga elemento de la tiel nomata „frankofonio” (‘francilingvulo’, *francophonie*), kies oficiala organizo, la *Internacia Organizo de la Frankofonio*⁶ (laŭ la francilingva mallongigo OIF) efektivas multflankan kunlaboron kune kun 88 ŝtatoj kaj registaroj en pluraj fakoj: lingvopolitiko, paco-agado, ekologio, defendo de homaj rajtoj ktp.

Tiel kiel por la francilingvanoj, aliaj organizoj ĉirkaŭ kelkaj supercentraj lingvoj stariĝis por politika, ekonomia kaj lingva agado mondscale en la lastaj jardekoj. La *Komunumo de la Portugallingvaj Landoj*⁷ (CPLP, laŭ la portugallingva mallongigo) estas alia ekzemplo de lingvopolitika organizo kiu pledas ne nur por la ekonomia, kultura kaj socia disvolvigo de ties membroj, sed ankaŭ por la disvastigo de la portugala

⁶ *L’Organisation internationale de la Francophonie* (OIF): <https://www.francophonie.org/>. Nuntempe tiu organizo havas 63 aktivajn membro-ŝtatojn, kaj aliaj 27 observant-ŝtatojn. Oni estimas, ke la franca estas parolata de 300 milionoj da homoj, dise en la 5 kontinentoj, kaj estas la dua lingvo plej lernata kiel fremda lingvo en la mondo.

⁷ *Comunidade dos Países de Língua Portuguesa* (CPLP): <https://www.cplp.org/>. Konsistigas tiun organizon 9 ŝtatoj, kie la portugala estas uzata kiel unua aŭ dua lingvo, por ĉirkaŭ 260 milionoj da parolantoj en la mondo.

lingvo por internacia komunikado en la mondo, kiel alternativo kontraŭ la unulingva angla hegemonio, kaj pro la defendo de la tagordaj valoroj de paco, demokratio, homaj rajtoj kaj socia justico.

Tiuj du supranaciaj organizoj reprezentas samtempe kulturalan, lingvan, kaj politikajn instituciojn, kaj fariĝas internaciaj agantoj pli kaj pli gravaj en la monda debato, kune kun aliaj supranaciaj organizoj – UN, UNESKO ktp. Aparte, ili celas kontraŭbalanci la unulingvan hegemonion de la angla kiel sola interkultura komunikilo⁸. Ili reprezentas do alternativojn por interkultura agado, kaj streĉas la debaton pri la negativaj kromefikoj de tutmondiĝo surbaze de iu sama lingvo, kio malriĉigas la mondan kulturalan diversecon, altrudas la samajn valorojn al ĉiuj landoj kaj marĝenigas la valorojn de aliaj lingvoj (Walter 2011: 77). Tiuj ĉi kulturaj kaj lingvopolitikaj organizoj helpas la konservadon de la kultura kaj lingva diverseco fronte al la „anglofonigo” de la mondo (Hagège 2011: 26). Tiel, ili substrekas la principojn de pluraj dokumentoj proponitaj kaj aprobitaj de UNESKO koncerne la defendon de lingva kaj kultura diverseco, kiel la jam menciita *Universala Deklaracio de Lingvaj Rajtoj* (Unesko 1996) kaj la *Konvencio pri la Protekto kaj Antaŭenigo de la Diverseco de Kulturaj Esprimoj* (Unesko 2005).

3. Kial do Esperanto?

Ĝis nun, ni apenaŭ menciis Esperanton kaj la esperantlingvan komunumon, kiuj kompreneble jam de jarcento ludas rolon en la debato pri internacia komunikado. Inter pluraj projektoj celante krei planlingvon por interkulturaj lingvaj interŝanĝoj, oni agnoskas ke Esperanto estas la plej sukcesinta, pro la fakto, ke ĝi multflanke elprovis sian taŭgecon al fakta intergenta komunikado kaj kreis konsiderindan lingvo-komunumon kaj kulturon (Rónai 1970; Eco 1994; Piron 1994; Passini 1995; Blanke 2017).

La celo de Esperanto kiel pontolingvo por interkultura, interetna kaj internacia komunikado troviĝas jam en la inaŭguraj dokumentoj de tiu lingvo – inter aliaj, ekzemple, en la enkonduko al *Unua libro de Esperanto* (1887) kaj en la artikolo „*Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia*” (1900), de Zamenhof. Tiuj gravaj programaj tekstoj reliefigas la ideojn ke Esperanto, ĝi:

- (i) reprezentas egalrajtan proprajon de la tuta mondo;
- (ii) ŝparas la tempon kaj la forton necesajn por lerni plurajn fremdajn lingvojn (pro la fakto ke E-o havas relative simplan gramatikan kaj vortfaran regularon);
- (iii) plifortigas komunan tutmondan edukadon kaj kreadon de paca kaj interfrata idealo. Tiuj valoroj reprezentas la kernon de la propagando de Esperanto kiel

⁸ Krom tiuj du organizoj, menciindas ankaŭ la Nederlanda Lingva Unio (*Nederlandse Taalunie*). Origine, tiu ĉi organizo, fondita la 9-an de septembro 1980 en Bruselo, inkluzivis la Flandran regiono de Belgio kaj Nederlandon, kaj celis la kunlaboron inter la du landoj en la kampoj de nederlanda lingvo kaj literaturo. En 2005, Surinamo iĝis membro de tiu lingva unio. Menciindas ankaŭ la klopodoj disvastigi la ĉinan lingvon kaj kulturon fare de Konfucea Instituto (<https://www.cief.org.cn/kzxy>).

potenciala solvo al lingvaj kaj komunikaj problemoj de la mondo, kaj konsistigas signifan parton de la esperanto-kulturo. Tio evidentiĝas en la poemo „La espero” de Zamenhof (1891), kion oni konsideras kiel la himnon de Esperantio.

Tamen, estas vere, ke malgraŭ la sukcesa historio de Esperanto kiel lingvo, nur la idealisma sinteno favore al Esperanto ne ŝajnis sufiĉe konvinka por enkonduki ĝian uzadon en internaciajn aferojn, nek havis eksterordinaran influon tutmondskale. Kiel asertas Tonkin (2004: 32):

Pedagogoj donis al ĝi malmultan atenton, registaroj ne interesiĝis pri ĝia disvastigo, doktaj akademianoj ne proponis ĝian tujan aplikon: la fakto, ke ĝi estis bazita sur principoj de lingva egaleco, malmulton diris por ekzemple persvadi la registarojn ĝin utiligi.

Do, kiel konstatas ankaŭ Blanke (2017: 69), *ne sufiĉas propagandi Esperanton kiel la solvon de la eŭropa lingvo-problemo*. Anstataŭe, nuntempe regas la ideo, ke internacia kaj interkultura komunikado estas multflanka problemoj kiu postulas ne nur la elekton de komuna interlingvo, sed ankaŭ aktivajn politikajn kaj ekonomiajn agojn. Do, malgraŭ la sendube eksterordinaraj ecoj de Esperanto – ĝia neŭtraleco, ĝia propedeŭtika valoro, ĝia relative facila lernebleco – serioza konsidero de Esperanto kiel parto de la solvo de la lingvoproblemo en la mondo postulas, ke oni agnosku la lingvopolitikan flankon de tiu propono, kaj ankaŭ aliajn defiojn ligitajn al Esperanto kiel, inter aliaj, ekzemple, la sufiĉan kaj bonkvalitan informadon kaj instruadon de tiu lingvo amase.

Ŝajnas al mi, ke antaŭ ol pledi por la rajto igi Esperanton la komuna lingvo por internaciaj rilatoj tutmondskale, la „dua lingvo de ĉiuj” laŭ la modelo proponita de la idealismaj esperantistoj, la oficialaj esperantaj institucioj devus eniri la debaton pri alternativa multlingva modelo, celante kontraŭpezi la dominon de la unulingva solvo surbaze de la angla. Tiusence, lingvaj kaj politikaj instancoj de Esperantio – kiel UEA, kun ĝia rilato kun UNESKO, Akademio de Esperanto, ILEI kaj aliaj fakaj asocioj – devus aldoni siajn fortojn al tiuj de aliaj lingvopolitikaj iniciatoj jam aktivaj (kiel ekzemple la iniciatoj fare de OIF kaj CPLP por tiuj etnaj lingvokomunumoj). Tiuj iniciatoj ja ŝajnas kundividi kun la E-movado la samajn celojn, nome kontraŭstari la faktan hegemonion de la angla. En la sama direkto, konkludas Tonkin en sia artikolo (kvankam li sintenas iom skeptike antaŭ multlingveco):

Necesas klara internacia lingva politiko, en kiu la uzantoj de la grandaj internaciaj lingvoj – tiuj de UN, ekzemple, escepte de la angla – unueciĝu kontraŭ la kreskanta influo de la angla, ne en spirito de detruo, sed por kontraŭpezi tiun influon per komunaj elpaŝoj (Tonkin, 2004: 37).

Parto de tiu konscia entrepreno estus do la E-movado, kun ĝiaj lingvaj, kulturaj kaj komunumaj valoroj. Krom la efiko kontraŭstari la hegemonion de la angla, kaj la tutmondiĝon surbaze de iu sama maniero koncepti la mondon, la strategia alianco de

Esperantaj oficialaj kaj neoficialaj instancoj kun aliaj internaciaj lingvopolitikaj organizoj helpas substreki la neprajn principojn de lingva kaj kultura diverseco, samkiel – eble – aliajn valorojn kunigantajn tiujn iniciatojn, kiel la defendon de paco (cetere kerna afero por esperantistoj), de homaj rajtoj, de demokratio, de aliro al edukado, de daŭripova disvolviĝo, de nutraĵa sekureco, de egaleco inter seksoj, inter aliaj. Temas, do, pri lingva kaj kultura agado kun pluraj nelingvaj, sed politikaj efikoj, kio plividebligas Esperantan movadon kiel gravan aganton sur la tutmonda scenejo. Alia avantaĝo estus do la plifortiĝo de la informado pri interkultura agado, kaj la interŝanĝoj de spertoj pri lingvoinstruado kaj edukado en pluraj malsamaj mondkunteksto.

4. Konklude

Kiam L.L. Zamenhof proponis la ideon pri la „internacia lingvo”, li celis per tiu lingvo proponi al la mondo neŭtralan komunikilon por interkultura agado. Regis la ideo ke Esperanto fariĝos la sola internacia lingvo ĉefe pro ties elstaraj lingvaj kaj idealaj ecoj, kaj helpas konsekvence la konstruadon de paca kaj frata interrilato inter homoj el pluraj kulturoj. Signon de tiu optimisma sinteno oni trovas en la parolado de Zamenhof de 1905, okaze de la realigo de la Unua Kongreso de Esperanto, en Bulonjo-ĉe-Maró:

La unuan fojon en la homa historio ni, membroj de la plej malsamaj popoloj, staras unu apud la alia ne kiel fremduloj, ne kiel konkurantoj, sed kiel fratoj, kiuj, ne altrudante unu al alia sian lingvon, komprenas sin reciproke, ne suspektas unu la alian pro mallumo ilin dividanta, amas sin reciproke kaj premas al si reciproke la manojn ne hipokrite, kiel alinaciano al alinaciano, sed sincere, kiel homo al homo. Ni konsciu bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Maró kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj. (Zamenhof 1929 [1905]: 362)

Tamen, post pli ol jarcento, pluraj historiaj, ekonomiaj kaj politikaj faktoroj montras, ke lingvoj postulante aŭ okupante la honoran pozicion de lingvo por internaciaj rilatoj – kiel la angla nuntempe – ne bonvole emas forlasi siajn postenojn favore al aliaj lingvoj, ne eĉ kiam tiuj alternativaj lingvoj elpruvas sian logikan superecon, laŭ la valoroj de neŭtraleco, egaleco kaj efika interkultura komunikado, kiel estas Esperanto (Koutny 2005). Do, iu ajn agado kontraŭ la *status quo* postulas, ke Esperanto ne nur prezentiĝu kiel *la lingva solvo*, sed ankaŭ eniru en la arenon de la nuntempa lingvopolitika debato. Reliefigante la unikajn avantaĝojn kaj valorojn de la Esperanta lingvo kaj kulturo kiel aktivojn de la jarcenta esperanto-movado al la nuntempa lingvopolitika debato, oni povus prezenti Esperanton kiel gravan pivoton por la monda debato ĉirkaŭ inter aliaj la temoj de lingva kaj kultura diverseco, egaleco, demokratio, homaj rajtoj, daŭripova disvolviĝo ktp.

Sur tiu tereno, la lingvo-politika agado de la Esperanto-movado kongruas kun la agado de aliaj lingvopolitikaj institucioj – kiel OIF kaj CPLP – kiuj, krom la komunajn valorojn, ankaŭ havas la celon malgrandigi la influon de la unukultura kaj unulingva hegemonio surbaze de la angla, kiu krom stabli maljustajn avantaĝojn al certaj landoj kaj individuoj, malriĉigas la internacian vivon, ĉar unuecigas la vidpunktojn pri la mondo, pri kulturo, pri la homaro. Kontraŭ tiuj riskoj, elstaras aliaj kulturaj, politikaj kaj lingvaj movadoj, inter kiuj ankaŭ Esperanto gravas.

Bibliografio

- Blanke, Detlev 2017: Komunikado en Eŭropo – kelkaj lingvaj-politikaj aspektoj. En: *Język. Komunikacja. Informacja 'Lingvo. Komunikado. Informado'* 12: 50-73.
- Calvet, Jean 2004: La diversité linguistique: enjeux pour la francophonie. 'Lingva diverseco: defioj por la frankofonio'. En: *Hermès* 2004 (40): 287-293. <https://www.cairn.info/revue-hermes-la-revue-2004-3-page-287.htm?ref=doi>
- 2007: Approche sociolinguistique de l'avenir du français dans le monde. 'Sociolingvistika aliro al la estonteco de la franca lingvo en la mondo' En: *Hérodote* 2007/3 (126): 153-160. <https://www.cairn.info/revue-herodote-2007-3-page-153.htm>
- 2016: Quels fondements pour une écologie des langues? 'Kiuj fundamentoj por lingvo-ekologio?' En: *Ecolinguística: Revista Brasileira de Ecologia e Linguagem*, v. 2, (2): 19-35. <https://periodicos.unb.br/index.php/erbel/article/view/9687/8554>
- Crystal, David 2003: *English as a Global Language* 'La angla kiel tutmonda lingvo'. Cambridge: Cambridge University Press.
- Eco, Umberto 1994: *La recherche de la langue parfaite dans la culture européenne*. 'La serĉo pri la perfekta lingvo en la Eŭropa kulturo'. Paris: Éditions du Seuil.
- Hagège, Claude 2011: Qu'est-ce que les mondialisations? Définition. En: Christian Grataloup & Delphine Papin (red.): *L'atlas des mondialisations* 'La atlaso de tutmondigo'. Paris: Le Monde/La Vie, Hors-Série. 26-27.
- Kachru, Braj 1992: *The Other Tongue: English across cultures*. University of Illinois Press.
- Koutny, Ilona 2005: Interkultura komunikado en Eŭropo: la angla kaj esperanto kiel alternativaj komunikiloj. En: Christer Kiselman (red.): *Symposium on Communication Across Cultural Boundaries / Simpozio pri Interkultura Komunikado*. Dobřichovice: Kava-Pech. 115-132.
- Kushner, Eva 2003: English as a Global Language: Problems, Dangers, Opportunities. 'La angla kiel tutmonda lingvo: problemoj, danĝeroj, oportunoj'. En: *Diogenes* 50 (2). 17-23. <https://journals.sagepub.com/doi/abs/10.1177/0392192103050002002>
- Ludivynn, Munoz 2012: Une mondialisation culturelle et linguistique? Les cas des organismes de promotion culturelle et linguistique. En: *Études caribéennes* 2/2012. <https://journals.openedition.org/etudescaribeennes/5840>
- Meierkord, Christiane 2006: Lingua Francas as Second Languages 'Lingvafrankaoj kiel duaj lingvoj'. En: *Encyclopedia of Language and Linguistics*.
- Passini, José 1995: *Bilingüismo: utopia ou antibabel?* 'Dulingvismo: ĉu utopio aŭ kontraŭ-Babelo?' Campinas: Pontes Editores.
- Phillipson, Robert 1992: *Linguistic Imperialism* 'Lingva imperiismo'. Oxford: Oxford University Press.

- Piron, Claude 1994: *Le défi des langues*. ‘La lingva defio’. Paris: L’Harmattan.
- Rónai, Paulo 1970: *Babel & antibabel* ‘Babelo kaj Kontraŭ-Babelo’. São Paulo: Perspectiva.
- Sewell, Andrew 2012: English as a lingua franca: ontology and ideology ‘La angla kiel lingvafranko: ontologio kaj ideologio’. En: *ELT Journal* 67 (1): 3-10. <https://academic.oup.com/eltj/article/67/1/3/437038>
- Tonkin, Humprey 2004: Lingva egaleco en internaciaj rilatoj. En: *Al nova internacia lingva ordo*. Aktoj de la 3-a Nitobe-Simpozio de Internaciaj organizaĵoj. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio. 31-39.
- Unesko 2001 [1996]: *Universala Deklaracio pri la lingvaj rajtoj*. Chaux-de-Fonds: Esperanta PEN-Centro.
- Unesko 2005: *Convention sur la protection et la promotion de la diversité des expressions culturelles* ‘Konvencio pri la protekto kaj la subteno de la diverseco de kulturaj esprimoj’. https://unesdoc.unesco.org/ark:/48223/pf0000142919_fre
- Walter, Henriette 2011: L’anglais domine et réhabilite le latin. En: Christian Grataloup; Delphine Papin (red.): *L’atlas des mondialisations* ‘La atlaso de tutmondiĝo’. Paris: Le Monde/La Vie, Hors-Série. 76-77.
- Zamenhof, Ludoviko Lazaro 1903 [1969]: *Fundamenta Krestomatio*. Rickmansworth: The Esperanto Publishing Company.
- 1905 [1924]: *Originala verkaro*. Leipzig: Breitkopf & Härtel.

Demandoj kaj diskuttemoj

- 1) Kiel evidentiĝas nuntempe la superregado de la angla kiel internacia lingvo?
- 2) Kiujn malavantaĝojn naskas la elekto de etna lingvo – kiel la angla – kiel internacia komunikilo?
- 3) Kiujn argumentojn jam starigis L.L. Zamenhof por la adopto de Esperanto por internacia komunikado?
- 4) Kiuj defioj estas ankoraŭ nepre konsiderendaj por la eventuala tutmondiĝo de Esperanto kiel internacia lingvo?
- 5) Kio estas la “gravita modelo” de J. Calvet kaj kiel la plej gravaj lingvoj interrilatiĝas inter si laŭ tiu modelo?
- 6) Kion defendas la kulturlingvaj institucioj kiel la “Internacia Organizo de la Frankofonio” (OIF) kaj la “Komunumo de Portugallingvaj Landoj” (CPLP)? Kiel ilia agado povas helpi la Esperantan?

Fabio FORTES (nask. 1983), itala-brazila esperantisto ekde 1999. Profesoro pri filozofio kaj klasikaj lingvoj ĉe la Federacia Universitato de Juiz de Fora-Brazilo. Doktorigis pri filozofio kaj pri lingvistiko. Kunlaboras en la brazila esperanto-movado kaj partoprenas (2021-24) en la Interlingvistikaj Studoj ĉe Adam Mickiewicz Universitato en Poznano kun stipendio de ESF.
fabio.fortes@ufjf.br

La internacia angla: demandoj pri egaleco kaj normoj

Resumo

La angla jam atingis la nediskuteblan statuson de la ĉefa internacia lingvo en la mondo. Disvastigo de la angla nun estas eble la ununura komuna celo de lingvopolitiko en diversaj partoj de la mondo. Malgraŭ la akcepto de la angla en granda parto de la mondo ankoraŭ ekzistas multaj nesolvitaj problemoj pri ĝia funkciado. Inter ili estas: la divido inter denaskaj kaj nedenskaj parolantoj, neegalaj rilatoj inter ili; diferencoj inter malsamaj naciaj normoj de la lingvo kaj demandoj pri la rajto fari juĝojn pri ĝusteco. Aldone, ligoj inter lingva kaj politika potenco plimalbonigas la neegalecon de internacia komunikado en la angla. Iuj metodoj por krei pli “neŭtralan” version de la angla por internacia uzo estos priskribitaj. Fine okazas komparo pri la alia internacia lingvo Esperanto.

Enkonduko

En la nuna mondo, la angla antigis la nediskuteblan statuson de la ĉefa internacia lingvo. Ĝi havas leĝan oficialan statuson en pli ol 50 landoj, kvankam en pli ol duono de ili ĝi ne estas la ĉefa parola lingvo (CIA). Ironie, ĝi ne havas oficialan statuson en kvar landoj kie ĝi estas la ĉefa lingvo – Aŭstralio, Britio, Novzelandoj kaj Usono. La angla estas nun ankaŭ la ĉefa laborlingvo de multaj internaciaj organizaĵoj kiel la Unuiĝintaj Nacioj, la Eŭropa Unio, la Asocio de Sud-Orient-Aziaj Nacioj kaj la Azia-Pacifika Ekonomia Kunlaborado, la internacia defenda alianco la Nord-Atlantika Traktat-Organizo kaj internaciaj financaj institucioj kiel la Monda Banka Grupo kaj la Internacia Mona Funduso inter multaj aliaj. Ĝi ankaŭ iĝis la plej ofte uzata lingvo en scienco; pli ol 80 procentoj de publikaĵoj pri la homaj sciencoj kaj 90 procentoj de publikaĵoj pri la natursciencoj aperas en la angla.

Tiu disvastiĝo ne okazas sen helpo de naciaj registaroj. Se ekzistas nun iu ajn komuna celo de lingvopolitiko en diversaj mondopartoj kaj malsamaj landoj ĝi estas la disvastiĝo de la angla por internacia (kaj ofte ennacia) uzo. Tion spegulas ĝia nuna preskaŭ ĉiea ĉeesto en lernejoj. Studo pri ĉeesto de la angla en lernejoj (en University of Winnipeg) trovis, ke en 142 landoj (kie loĝas 83.44 % de la monda populacio) la angla estas deviga studobjekto en lernejoj. Tio ne inkluzivas 6 landojn kie la angla estas la ĉefa lingvo ekster la lernejo (Aŭstralio, Britio, Kanado, Irlando, Novzelandoj kaj Usono). En preskaŭ ĉiuj aliaj landoj ĝi estas almenaŭ elektelebla studobjekto en lernejoj. Certasence ŝajnus, ke okazas finvenko de la angla, kiu pli kaj pli iĝas preskaŭ universala unua aŭ dua lingvo. Sed tiu finvenko iel ne ŝajnas tiel, kiel la imagata

finvenko de Esperanto. La ĝisnuna venko de la angla okazas, ne surbaze de idealoj pri egaleco kaj lingvaj rajtoj, sed surbaze ke komerca, ekonomia kaj arma potenco kaj neegaleco inter lingvoj.

Oni vaste parolas kaj skribas pri la avantaĝoj de la statuso de la angla en la moderna mondo. Sed, laŭ malnova usona diro: *There ain't no such thing as a free lunch* 'Ne ekzistas senpaga tagmanĝo'. Tio signifas, ke ne ekzistas politika elekto aŭ solvo, kiu ne havas iujn neatenditajn kaj/aŭ malbonajn konsekvencojn. Tial, la fokuso de ĉi tiu ĉapitro estos necertecoj kaj la malavantaĝoj, kiujn oni kutime bagateligas aŭ pri kiuj oni simple ne parolas.

1. Ĝeneralaj nekonataĵoj

Kvankam la disvastiĝo de la angla estas la temo de multaj verkoj, ekzistas duboj pri bazaj faktoj pri la lingvo, eĉ ekzistas necertecoj pri la nombro de parolantoj. Taksadoj estas similaj se temas pri denaskaj parolantoj, sed komplete nestabilaj pri nedenskaj parolantoj. Tiel Ethnologue (retejo pri la lingvoj de la mondo) iam taksis proksimume 355,5 milionojn da denaskaj uzantoj kaj proksimume 505 milionojn da nedenskaj uzantoj (Crystal 2003). Nun Ethnologue ne distingas inter denaskaj kaj nedenskaj parolantoj kaj taksis la nombron de anglalingvanoj simple pli ol miliardo. Neeley (2012) tamen nombras preskaŭ 385 milionojn da denaskaj parolantoj kaj 1 365 000 000 da kiuj povas paroli la anglan "je utila nivelo". Ideon pri la malprecizeco de taksadoj oni povas trovi ĉe Graddol (2014b: 68), en kiu li asertas, ke neniu vere scias kiom da homoj parolas la anglan je kiu nivelo en Barato kun diversaj taksadoj de 55 ĝis 350 milionoj.

2. Kiu estas denaska parolanto?

Ne ekzistas universale akceptita difino de la termino 'denaska parolanto'. Tradicie, ĝi temas pri iu, kiu akiris lingvon kiel infano (unue for de lernejo). Sed akiro kiel infano ne estas garantio ke parolanto regas vastan gamon de lingvouzo kiel plenkreskulo. Se temas pri plenkreskulo la tradicia modelo supozas, ke denaska parolanto ricevis edukadon kaj poste dungadon en la sama lingvo, kiun tiu akiris hejme. En multaj landoj, tamen, speciale en estintaj kolonioj, la hejmlingvo ne estas la lingvo de edukado aŭ laborloko; oni parolas kaj infanoj akiras lokan lingvon hejme, sed la ĉefa rolo de lernejo estas unue instrui la lingvon de la koloniistoj kaj poste instrui en ĝi. En iuj estintaj kolonioj de Britio kaj en la estinta usona kolonio, Filipinoj, estas multaj homoj kiuj lernas la anglan nur en lernejo, sed kiel plenkreskuloj pli bone funkcias en edukado aŭ laboro en la angla ol en siaj 'denaskaj' lingvoj. Tio signifas, ke kvankam ili havas la tutan gamon de lingvokapabloj, ili estas dividitaj inter du lingvoj (aŭ pli).

Tiu situacio kondukis al aliaj aliroj por paroli ne pri denaskeco, sed pri lingva kompetento. Unu ekzemplo estas la studo de *World Englishes* 'Mondaj Anglaj Lin-

gvoj' (Kachru 1990). Tiu specialiĝo koncentriĝas al lokaj lingvovariantoj, precipe, kvankam ne ekskluzive, al estintaj kolonioj en evolulandoj. Li dividas landojn en:

- **interna cirklo:** kie la angla estas uzata en ĉiuj vivkampoj far granda plimulto de la loĝantaro,
- **ekstera cirklo:** kie la angla plejparte ne estas hejma lingvo, sed servas instituciajn celoj, cetere,
- **vastiĝanta cirklo:** kie la angla ne havas historian aŭ registaran rolon, sed estas vaste instruata kiel fremda lingvo, precipe por uzo en internaciaj kontaktoj.

Alivorte, en la interna cirklo la angla estas la unua lingvo, en la ekstera cirklo la angla estas dua lingvo aŭ lingvafrankao kaj en la vastiĝanta cirklo la angla estas fremda lingvo.

Ĝenerale la ideo mezuri la scion de la angla de denaskaj parolantoj ne estas serioze traktata. Mezurado de la lingva nivelo de parolantoj el la ekstera cirklo estas tikla demando en la landoj de la interna cirklo, pli politika aŭ lingva. Ankaŭ ne ekzistas ĝenerala rimedo por mezuri la lingvan kompetenton de parolantoj de la vastiĝanta cirklo. Eĉ la plej gravaj internaciaj testoj pri kompetento ne nepre estas fidinda. Rezultoj de ĝeneralaj testoj kiel Cambridge Proficiency, IELTS (internacia lingvotesta sistemo) aŭ TOEFL (testo de la angla kiel fremda lingvo) estas iugrade hazardaj kaj la sama persono povas akiri malsamajn rezultojn depende de la enhavo de la testo. Aldone, la rezultoj parte dependas de la formato de la testo. Memraportado aŭ enketo estas ambigua kaj nefidinda, ĉar multaj homoj supertaksas aŭ subtaksas sian scion.

3. Kiun “anglan lingvon” lerni?

Fakto pri la angla, kiu kutime ne estas sufiĉe pritraktata en internacia kunteksto, estas ĝia plurcentreco. Tio signifas, ke ne ekzistas iu ajn universale akceptita norma lingvo. Preskaŭ ĉiu lando de la interna cirklo kaj multaj en la ekstera cirklo havas propran normon. La tekstoredaktilo Microsoft Word, ekzemple, nun enhavas 18 versiojn de la angla por kontroli tekstojn. Tiuj normoj malsamas pli ol diversaj akĉentoj, ili ankaŭ tuŝas vortprovizon kaj gramatikon. Formoj kiuj estas ĝustaj en unu normo estas malĝustaj en aliaj.

La diversaj normoj ĝenerale koncentriĝas en du grandaj polusoj. La unua estas la **Nordamerika** (ekzemple Usono, Kanada, apartaj, sed sufiĉe similaj) kiun uzas la plimulto da denaskaj parolantoj. La dua estas la **Brita** uzata ĉie alie, sed kun gravaj internaj diferencoj.

Laŭ Kachru, landoj de la interna cirklo donas normojn, tiuj de la ekstera cirklo evoluigas proprajn normojn aŭ defias la normojn de la interna cirklo kaj la landoj de la vastiĝanta cirklo dependas de la normoj de la interna cirklo. Problemo eble okazos, se eĉ landoj en la vastiĝanta cirklo volos starigi proprajn normojn. Oni povas imagi estontecon en kiu ekzistas dekoj (aŭ pli) da normoj.

Unu aspekto, kiun ofte ne rimarkas parolantoj de unucentraj lingvoj estas, ke ene de plurcentra lingvo, parolantoj kultivas kaj daŭrigas naciajn diferencojn. Estas precize tiuj naciaj variantoj (aŭstralia, kanada, usona ktp), kiuj funkcias kiel markiloj de identeco kaj ne ĝenerala nocio de ‘la angla’. Internacia uzo de la lingvo ne ŝanĝas tion. Tio signifas, ke internacia uzo ne liberigas la anglan de ĝia rolo de markilo de nacia identeco. Unu konsekvenco de tiu situacio estas ke denaskaj uzantoj de unu normo nevolonte akceptus la alian kiel internacian normon.

4. La problemo de ĝusteco

Sufiĉe tikla demando pri la internacia angla estas kiuj formoj (literumado, prononco, morfologio, kolokaĵoj ktp) estas ĝustaj kaj kiuj estas neĝustaj. Por establi tion, tamen, oni devas decidi kiu rajtas prijuĝi la lingvouzon de nedenaskaj kaj denaskaj parolantoj.

Denaskaj parolantoj: Eĉ lasante flanken la demandon “Kiu estas aŭ ne estas denaska parolanto?” aŭ “Denaska parolanto de kiu varianto?” tuj ekestas aliaj demandoj: “Kion scias denaskaj parolantoj?” kaj “Ĉu ĉiuj denaskaj parolantoj egalas pri lingvoscio?”

Reguliga institucio: Ekzistas institucioj, kiuj reguligas la formalan norman version de iuj lingvoj, ekz. la francan reguligas la Académie Française (Franca akademio) en Francio kaj Office québécois de la langue française (Oficejo kebeka de la franca lingvo) in Kebekio. La hispanan reguligas multaj naciaj organizoj kiuj kuniĝas en la Asociación de Academias de la Lengua Española (Asocio de akademioj de la hispana lingvo).

Neniu simila organizaĵo ekzistas por la angla. La plej similaj ekvivalentoj se temas pri lingva aŭtoritato pri la angla estas vortaroj kiel Merriam-Webster en Usono aŭ Oxford pli grandskale. Sed vortaroj estas aŭtoritatoj nur pri literumado kaj/aŭ signifo kaj ne helpas pri demandoj pri kolokaĵoj aŭ fraza strukturo.

Iuj sugestis ke nedenaskuloj kiel absoluta plimulto de la parolantaro de la angla devus starigi siajn proprajn normojn, kiujn denaskuloj devus respekti. La mekanismoj por ke tio okazu, tamen, nuntempe ne ekzistas krom kelkaj aferoj de prononco ĉar ‘denaska’ prononco jam ne estas la celo de instruado (Jenkins 1998, vidu la problemon ankaŭ en Koutny en tiu ĉi libro).

Ĉi tio kondukas al la interna kontraŭdiro de la angla kiel internacia:

Ju pli da normoj estas kreitaj de denaskaj parolantoj, des malpli taŭgas la angla por (justa) internacia komunikado.

kaj inverse:

Ju pli tiu distingebla nedenaska lingvouzo estas akceptata, des malpli la angla povas funkcii kiel lingvo de nacia identeco.

Kvankam reala, tiu problemo estas ĝenerale ĝis nun ne agnoskita, do neniu povas trovi solvon por tio. La kaŭzo estas la fakto, ke la deziroj kaj bezonoj de denaskaj kaj nedenaskaj parolantoj pri la lingvo baze konfliktas. Nedenaskaj lernantoj volas lingvon utilan, stabilan (neŝangiĝantan), kiu ne minacas sian identecon. Denaskaj parolantoj,

tamen, volas dinamikan kaj ŝanĝiĝantan lingvon, kiu esprimas sian nacian aŭ lokan identecon. Tiu konflikto ankaŭ estas reala, sed kutime ne traktata, do neniu eĉ serĉas solvon por ekvilibrigi la du flankojn de ĉi tiu konflikto.

5. Kial lerni la anglan?

La vidpunkto, kiu devas esti la plej grava en pridiskuto pri la angla aŭ alia internacia lingvo devas esti nek tiu de lingva studento aŭ lingva entuziasmulo, nek de elitanoj kiel membroj de la Eŭropa Parlamento, kiuj havas la rimedojn por certigi, ke ili ne spertu la efikojn de malbona aŭ nejusta politiko. La vidpunkto, kiu devas plej gravidi diskutoj pri internacia lingvo estas tiu de la kutima lingvolernanto, kiu ne tiom interesiĝas pri lingvo(j), sed interesiĝas pri la ĉiutaga vivo kaj nelingva kariero. Estas precize por ili, ke demandoj pri lernebleco kaj utileco estas plej gravaj, sed en la nuna disvastigo iliaj bezonoj ne estas speciale konsiderataj.

Kiel skizite de Graddol (2014a) la internacia disvastigo de la angla estas preskaŭ tute bazita sur ununura kondiĉo, ke scio de la angla alportos ekonomiajn avantaĝojn al lernantoj. Interese, ne ekzistas objektiva pruvo, preter anekdotoj, ke tio efektive estas la kazo. Provoj montri tian korelacian en la nivelo de lando estas mankhavaj. Simpla alternativa klarigo estas, ke pli riĉaj landoj povas pli multe investi en edukadon, inkluzive de fremdlingva edukado. Krome, anekdotaj pruvoj priskribas individuajn sukcesojn, sed ne enkalkulas la tutecon de lingvolernantoj. Se unu persono trovas dungadon, ĉar tiu bone konas la anglan, sed naŭ aliaj ne trovas dungadon malgraŭ ilia scio de la lingvo la kalkulo ŝanĝiĝas.

Multaj kutime simple akceptas la statuson de la angla kiel ion, kio nature okazis, tamen laŭ Phillipson (1992) ĝi estas, almenaŭ parte, la produkto de longtempa, konscia politika agado de la registaroj de la ĝemelaj lingvaj superpotencoj Britio kaj Usono. Tra la mondo, la produkto konata kiel la *angla kiel fremdlingvo* aŭ la *angla kiel dua lingvo* estis tre sukcese surmerkatigita. La surmerkatigado de ĉi tiu produkto estis tiel sukcesa ke granda plimulto de ĝiaj konsumantoj ne rimarkas, ke ĝi estas produkto eĉ kiam ili pagas, ofte kare, por ĝi. Unu rezulto estas, ke por multaj nedenskaj parolantoj alta nivelo de kompetento en la angla estas parto de internacia moderna identeco. Tiamaniere, la angla fariĝis konsumata produkto ne male al Koka-kolao aŭ saĝtelefonoj.

Aliflanke, ĉar la disvastigo de la angla estas ofta celo de lingvopolitiko, la angla iĝis, kiel pli frue menciita, deviga studobjekto en lernejoj. Fakte la granda plimulto de tiuj, kiuj lernas la anglan ne elektis la lingvon mem. Aŭ registraro, aŭ lernejo aŭ gepatroj elektis por ili. Tio signifas, ke multaj nedenskaj parolantoj troviĝas en deviga serĉado de pli kaj pli alta nivelo de la lingvo. En neanglalingvaj landoj scio de la angla mem ne estas valora. Valoro venas de pli granda ol averaĝa scio. Tial ju pli da homoj scipovas la anglan, des malpli valoras averaĝa scionivelo. Simile ju pli alta estas la nivelo de la angla en lando tiam des pli alta estas la bezonata nivelo por igi la anglan valoran kapablon. Tial neniam sufiĉas nedenska nivelo de la anglo por iuj taskoj.

Por helpi en tiu lingva konkurado ekestis multaj tipoj de kursoj pri la angla kiel studobjekto por nedenskaj parolantoj. Iuj estas:

- **EFL** – English as a Foreign Language (la angla kiel fremda lingvo). En tiu tipo de kurso, la angla ne nepre estos grava lingvo en la vivo de la lernanto. La kursmaterialoj asocias la lingvon ĉefe kun Britio kaj/aŭ Usono. Tia kurso ofte troviĝas en lernejoj.
- **ESL** – English as a Second Language (la angla kiel dua lingvo). La celo de lernado estas kompletigo aŭ anstataŭigo de la gepatra lingvo. La angla gravas tie, kie la lernantoj vivas aŭ ĉar ĝi estas la lingvo de la plimulto aŭ havas ian oficialan statuson. Tiu tipo de kurso estas ĉefe celita al enmigrantoj, kiuj bezonas la anglan por partopreni en la socio.
- **ELF** – English as a Lingua Franca (la angla kiel lingvafrankao. La lingvo ne nepre estos grava en la vivo, sed verŝajne estos iam uzata. La kursmaterialoj asocias la anglan kun ĉiuj landoj. Ofte tiu tipo de kurso troviĝas en universitatoj. En Eŭropo la plej uzataj britaj lernolibroj en pli altaj niveloj havas tian fokuson.
- **EIL** – English as an International Language (la angla kiel internacia lingvo). Simila al ELF, sed kutime lernado okazas por partopreni en profesia aŭ politika vivo. Oni asocias la anglan ne tiom kun iuj landoj, sed kun politika, edukada aŭ profesia vivo. Tia estas la enhavo de multaj specialaj kursoj (kiel la angla en komerco aŭ la angla en medicino).

Nuntempe ekzistas neniu ĝenerale interkonsentita akceptebla nivelo de nedenska uzado, kaj la fina se preskaŭ neniam tute realigita celo de angla instruado estas imiti la uzon de denaskaj parolantoj, precipe de Usono kaj Britio. Tial ekzistas dungada antaŭjuĝo kontraŭ nedenskaj parolantoj kiel instruistoj ekster siaj propraj lingvaj medioj. Post la jaro 2000 tio kaŭzis la kreadon de la nedenska instruista movado (Braine 2013) kaj en 2014 Marek Kiczowski fondis TEFL Equity Advocates ‘Advokatoj pri Justeco por Instruistoj de la Angla kiel Fremda Lingvo’, kiu pledas por egala traktado pri dungado por nedenskaj instruistoj de la angla (Bonino 2020). Sed ĝis nun estas ankoraŭ malfacile por nedenska instruisto trovi dungadon ekster sia propra lando. Rilata problemo estas la dungado de nedenskaj parolantoj kiel instruistoj de aliaj studobjektoj en universitatoj. Iam studentoj en anglalingvaj landoj plendas pli “nekomprenebleco” de nedenskaj instruistoj, speciale doktoriĝantoj (Subtirelu 2015).

6. Ĉu oni povas lerni nur lingvon?

Demandoj pri ligoj inter lingvo kaj kulturo estas ofte esplorataj, sed alia demando estas ĉu lingvo povas disvastiĝi sen la kulturo de la originala parolantaro. Ĉi tie ekestas du apartaj demandoj. La unua temas pri la rolo de lingvaj variantoj ene de anglalingvaj socioj. En la plimulto, la diverseco de akĉento laŭ regiono, socio, klaso

aŭ etna origino ankaŭ servas por krei lingvan hierarkion. Simila procezo okazas en internacia kunteksto, en kiu iuj nedenskaj akĉentoj estas pli alte taksataj ol aliaj.

La dua demando temas pri politika neŭtraleco. Iuj asertas, ke scio de la lingvo mem estas politike neŭtrala, sed anglalingvanoj, speciale usonanoj, ofte supozas, ke disvastiĝo de la angla signifas akcepton kaj aprobon de la usona politika kaj socia sistemoj. Disvastiĝo de la angla estas perceptata kiel disvastiĝo de usonaj valoroj pri moderneco aŭ progreso:

La angla ne nur estas ĉiam pli la lingvafrankao de scienco, diplomatio kaj internacia komerco, sed la usona universitata sistemo estas potenca mekanismo por ensociigi eksterlandajn elitojn. Studentoj en Usono familiariĝas kun naciaj moroj kaj samtempe absorbas la ĉefajn usonajn vidpunktojn pri politiko kaj ekonomiko (Walt 2005).

Unu komprenema komento pri la nuna stato de la angla estis farita de nelingva kolumnisto, Parag Khanna (2011), skribante pri usona diplomatio:

Memoru, ke disvastigi la anglan estas same grava kiel disvastigi demokration aŭ la dolaron; eĉ kiam eksterlandaj valutoj kaj regadmodeloj konkuras kun Ameriko, la angla restas la rezerva lingvo de la mondo.

Frapanta estas la paralelo inter la statuso de la dolaro kaj la angla. Kiel monda rezerva valuto, la dolaro donas al Usono grandajn ekonomiajn avantaĝojn. Simile, kontrolo de normoj per la angla donas al Usono kaj Britio grandajn lingvaj kaj sociajn avantaĝojn. La plej evidenta, kompreneble, estas, ke ili ne devas speciale investi en la rimedojn de internacia diplomatio aŭ komerco. Proksime rilata al tio estas la prioritato donita al usonaj kaj britaj ideoj simple, ĉar ili estas formulitaj en la angla. En multaj lingvoj estas esprimoj kiel *scio estas potenco* (hispane *saber es poder*, germane *Wis-sen ist Macht* aŭ angle *knowledge is power*). Sed la malo ankaŭ estas vera, potenco estas scio; tio signifas ke potenco donas eblecon decidi kiu scio gravas kaj kiu scio ne gravas. Kiam, ekzemple, la verko de profesoro de historio (nedenska parolanto de la angla) devas esti legata far “denaska parolanto” kiu ne nepre havas studojn post liceo la lingva potenco de la parolanto de la angla superas la scion de la profesoro.

7. Eblaj solvoj pri problemoj de neegaleco

Ekzistas diversaj eblaj solvoj al la problemoj de la internacia angla pri lernebleco kaj neegaleco. Multaj deziras ian “neŭtralan” internacian anglan (je eŭropa aŭ eĉ tutmonda nivelo). La ideo de “neŭtrala” povas havi diversajn signifojn, sed ofte la praktika celo estas malpligrandigo de la vortprovizo bezonata por komuniki en plej multaj situacioj.

La unua tia projekto estis Basic English (baza angla), de Charles Kay Ogden (1930). Interese, inter liaj celoj estis ne nur disvastigo de iu formo da la angla, sed ankaŭ plimalgrandigo de nombro da lingvoj en la mondo. Citaĵo de la unua libro pri baza angla estis: “Kion la Mondo plej bezonas estas ĉirkaŭ 1 000 pli mortintaj lingvoj – kaj unu pli vivanta.”

Se temas pri strukturo, kvankam Ogden iomete provis reguligi vortoderivadon la ĉefa trajto de baza angla estis radikala plimalgrandigo de la vortprovizo (unue 850 vortoj kun postaj aldonaĵoj). Ne estas klare ĉu tiu projekto estis celita kiel fino en si mem aŭ enkonduko al la ĝenerala brita angla.

Estis kritiko pri la projekto, ĉar la elekto de vortoj ŝajnis esti arbitra aŭ idiosinkrazia kaj la aldono de vortoj al la baza stoko ne sekvis regulojn. La plimalgrandigo de la vortprovizo faris la lingvon senkolora por denaskaj parolantoj; la derivaj procezoj en la angla estas malfortaj kaj esprima riĉeco kaj nuancoj de signifo kutime ne venas de modifo de vortoj, sed de apartaj vortoj. Tio estas malavantaĝo por nedenskaj lernantoj, sed denaskaj parolantoj ne emas limigi sin al malgranda vortprovizo. “Ĝi ne estas baza, kaj ĝi ne estas angla.” estis verdikto de Rudolf Flesch, kunkreinto de testoj pri legebleco de tekstoj en la angla (Flesch 1944).

Malgraŭ ĝia ĝenerala malsukceso, baza angla helpis konduki al rekono de la graveco de vortfrekvenco en lingvolernado kaj kvazaŭ inspiris aliajn projektojn por helpi lernantojn de la angla. Eble la plej fama el ili estas la speciala angla (Special English) de la voĉo de usono (VOA – Voice of America) dissendada servo. Tiu versio, nun konfuzo renomita *Learning English* ‘lernanta angla’ uzas pli malpli 1500 bazajn vortojn (Voice of America) kaj evitas diversajn tipojn de komplekseco, ekzemple idiomaĵojn kaj iujn tipojn de kompleksaj frazoj. En dissendadoj ĝi estas parolata unu trionon pli malrapide ol kutima parolrapideco.

Simile, vikipedio havas version en ‘simpla angla’ (Simple English Wikipedia) skribita en kombinaĵo de baza angla kaj lernanta angla. La celgrupo de tiu ĉi versio estas ne nur lernantoj de la angla, sed ankaŭ tiuj kiuj havas lernhandikapon.

En iuj profesioj ekzistas artefarite limigitaj versioj de la angla kiel aviada angla (Aviation English) en civila aviado. Eĉ denaskaj parolantoj bezonas trejnadon en ĝia uzado (Clark 2017). Simile marparolo (Seaspeak) estas uzata en mara komerco. En ambaŭ sistemoj ne nur la vortprovizo estas limigita, sed ankaŭ ekzistas ellaboritaj eksplicitaj komunikaj protokoloj por faciligi kaj klarigi komunikadon (International Maritime Organization 2001). Ekzemple en marparolo multaj frazoj komenciĝas kun anonco de la fraztipo, ekzemple *Question* ‘demando’ aŭ *Answer* ‘respondo’. Tiuj modifoj de la kutima lingva komunikado havas la celon redukti miskomprenojn, kiujn kaŭzas diferencoj de lingvosocio inter denaskaj kaj nedenskaj (kaj iam inter nedenskaj) parolantoj.

En la unua jardeko de la 21-a jarcento, ekestis nova lingvoprojekto simile al baza angla. Ĝi estis globa “Globish” ideo de franca komercisto, Jean-Paul Nerrière (2009), kiu uzis la anglan en komerco dum multaj jaroj. Li rimarkis ke ofte denaskaj parolantoj havas komunikan malavantaĝon kiam ili partoprenas en renkontiĝoj, kie la granda plimulto konsistas el nedenskaj parolantoj kaj li komencis krei subaron de la lingvo kiun homoj povus facile lerni por dualingva komunikado. Li plurfoje asertis

ke li havis neniujn aspirojn ke Globish iĝu literatura lingvo aŭ literatura normo kaj komunika prefere ol denaska kompetento estas la ununura celo.

Bedaŭrinde, kiel en la kazo de Basic English, la ellaborado de Globish komenciĝas kaj finiĝas per radikalaj limigoj de vortoprovizo inkluzive de multaj “internaciaj” vortoj kiel *piano*, kiu iĝas “instrumento kun nigraj kaj blankaj klavoj”. Ekzistis iu amaskomunikila intereso en la projekto, kiu ŝajnas esti jam neaktuala, sed la plej granda komerca intereso estis la enkonduko al pli konvencia denask-centrigita angla kaj ne kiel alternativo al tradicia instruado por tiuj, kiuj nur volas uzi la anglan kiel duan lingvon por specifaj, plejparte komercaj, celoj.

La ĉefa problemoj pri tiaj projektoj restas kiel gajni la agnoskon kaj respekton de denaskaj parolantoj? Anglalingvanoj ofte havas kvazaŭ religiajn kredojn pri la lingvo kaj ĝia supozata riĉeco kaj esprimpovo, kvankam nek unu nek la alia speciale gravas en la plimulto da internacia komunikado. “Limigoj” de la vortprovizo estas por ili kvazaŭ blasfemio.

Projektoj kiel lernanta angla aŭ globa montras, ke estas konscio pri problemoj en la nuna stato de internacia uzo de la angla. La ideo, ke nedenskaj parolantoj povas aŭ eĉ devas krei proprajn normojn, kiujn denaskaj parolantoj devas respekti estas jam sufiĉe konata, sed neniuj ĝis nun sukcesis realigi ĝin. Ekzistas vortoj kaj esprimoj ofte uzataj eĉ inter kleraj nedenskaj parolantoj, kiujn denaskaj parolantoj aŭ ne akceptas aŭ simple ne konas. Ekzemplo de vortoj uzataj ĉefe de nedenskaj uzantoj estas *mobbing* ‘grupĉikanado’, sed *harassment* aŭ *bullying* en denaska uzo. Kreita far aŭstria etologo kaj popularigita far sveda psikologo ĝi eniris en multajn eŭropajn lingvojn kiel ‘angla’ vorto, sed nur margene eniris en la angla mem.

Frazaj ekzemploj povas esti *They are discriminated* ‘Ili estas diskriminaciitaj’, kiu en la denaska uzo estas *They are discriminated against*. aŭ *I don't know what are they doing* ‘Mi ne scias, kion ili faras’ anstataŭ *I don't know what they're doing*. Laŭ la tradicia gramatika aliro, tiuj formoj estas eraroj, sed ili sufiĉe ofte okazas en spontana nedenska uzo, ke ili certe iĝus parto de internacia norma lingvo. Certasence alia, aparta internacia angla komenciĝas formiĝi, sed la procezo estas ekstreme malrapida.

Unu metodo, kiu havus iun ŝancon de sukceso kiel solvo estus internacia akademio simila al tiuj de la franca aŭ la hispana, sed sen denaskaj parolantoj en gravaj pozicioj. Membroj povus ellabori referencan gramatikon surbaze de edukita nedenska uzo de diversaj mondpartoj. La fokuso estus facileco de interkompreno anstataŭ natura denaska lingvouzado. Ĉiu uzo, kiu konformus al tio estus akceptata kiel ĝusta. Sekvos tion kreado de internaciaj testoj en neanglalingvaj landoj. Denove, akcepto de denaskaj parolantoj estus nur malfacile atingebla. Iuj ne volus rezigni pri sia povo por krei kaj juĝi normojn. Sed tiu tipo de sendependa normo eble povus akiri uzantojn kaj agnoskon inter nedenskaj parolantoj.

8. Komparo kun Esperanto

Alia lingvo kun vasta, sed malprofunda internacia atingo estas Esperanto. Tute male al la angla, Esperanto estis promociata de neniu registaro kaj ne estas deviga lernobjekto en iu ajn nacia instruplano. Ĉi tio signifas, ke male al la angla preskaŭ ĉiuj parolantoj faris konscian elekton lerni la lingvon. Same kiel por la angla, ne ekzistas precizaj, fidindaj datumoj pri la nombro da parolantoj. Ene de la lastjardecaj taksoj, uzante malsamajn modelojn, ĝi varias de proksimume 60 000 (Nielsen 2016) ĝis pli ol 2 000 000 (Wandel 2014). Ekzistas ankaŭ tre malgranda nombro da denaskaj parolantoj, ĝenerale taksitaj je proksimume 1 000 (Lindstedt 2006: 47). Sed kvankam denaskaj parolantoj ekzistas, ili ne ludas rolon en la starigo aŭ konservado de normoj bazitaj sur sia propra lingvouzo aŭ intuicioj kio eble kontribuas al pli granda memfido kaj kreemo inter parolantoj ol okazas en la angla, en kiu la korektiga naturo de denaskaj normoj emas limigi kreemon inter nedenskaj parolantoj (Fiedler 2011: 91).

Esperanto estas unucentra lingvo. La normo estas sufiĉe bone difinita kvankam ekzistas iuj demandoj pri lingvouzo submetataj al debato. Tio ne signifas, ke ĉiu interago en Esperanto iras glate. La manko de promocio de registaroj aŭ edukadistemoj signifas, ke kursoj kaj lernmaterialoj malabundas. Tial, lernantoj ofte komencas uzi la lingvon kun aliaj uzantoj (pli aŭ malpli spertaj) post nur malmulte da lernado, kio eblas danke al la regula kaj fleksebla gramatiko. En tiu medio de nedenskaj parolantoj Fiedler kaj Bosch (2020) esploris strategiojn por solvi kaj antaŭmalhelpi interparolajn miskomprenojn kaj trovis, ke parolantoj subtenas unu la alian uzante diversajn rimedojn, ĉefe riparojn.

Ĉar lernado de Esperanto ĝenerale ne alportas monan avantaĝon, la allogo de la lingvo (kaj ĝia modelo de interlingva komunikado) kuŝas aliloke. Multaj Esperantistoj imagas, ke la ĉefaj avantaĝoj de Esperanto estas la fleksebla gramatiko kaj la egalecaj rilatoj inter parolantoj de diversaj lingvaj, naciaj kaj kulturaj fonoj. Sed laŭ Kimura (2020) la ĉefaj avantaĝoj de Esperanto kompare kun la aliaj rimedoj de interlingva komunikado estas alia: “intima kaj densa renkontejo de diversspecaj homoj” (p. 38). Certe necesas pli da esplorado por pli bone kompreni la relativajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn de Esperanto rilate al aliaj solvoj pri interlingva komunikado.

9. Konkludoj

Kvankam ekzistas multaj problemoj pri la nuna statuso de la angla kiel la ĉefa internacia lingvo ne ekzistas granda ŝanco ke ili trovos solvojn. La internacia komunika mondo en kiu regas la angla spegulas la anglalingvajn landojn de la interna cirklo de Kachru en kiu neegaleco de lingvaj variantoj estas la regulo. Neegaleco ne estas bedaŭrinda kromefiko, sed unu el la ĉefaj organizaj principoj de la internacia angla. La nuna situacio ne ĝenas tiujn, kiuj havas la potencon provi ŝanĝi ĝin kaj tiuj, kiuj

plej suferas en la nuna sistemo ne havas potencon defii ĝin. Eblaj solvoj ekzistas, sed politika kaj socia volo mankas.

Bibliografio

- Bonino, Bryn 2020: Marek Kiczowski of TEFL Equity Advocates takes on native speakerism. <https://bridge.edu/tefl/blog/marek-kiczowski-tefl-equity-advocates-takes-on-native-speakerism/>
- Braine, G. 2013: The nonnative speaker (NNS) movement and its implications for ELT in Asia. En: Zacharias T. kaj Manara, C. (red): 12-25.
- CIA (sen jaro): The World Factbook: Field Listing – Languages. <https://www.cia.gov/the-world-factbook/field/languages/>
- Clark, Barbara 2017: *Aviation English Research Project: Data analysis and best practice recommendations*. West Sussex: Civil Aviation Authority.
- Crystal, David 2003: *The Cambridge Encyclopedia of the English Language* (dua ed.). Kembriĝo: Cambridge University Press.
- Ethnologue (sen jaro): “English”. <https://www.ethnologue.com/language/eng/>
- Fiedler, Sabine 2011: English as a lingua franca – a native-culture-free code? Language of communication vs. language of identification. En: Apples – Journal of Applied Language Studies 5(3): 79-97.
- Fiedler, Sabine & Cyril Robert Brosch 2020: Interkultura komunikado per Esperanto: kelkaj ĉefaj trajtoj. En: Koutny & Stria & Farris (red): 121-136.
- Flesch, Rudolf F. 1944: “How Basic is Basic English?” *Harper’s Magazine*, Marto 1944. 339-343.
- Graddol, David 2014a: English and Economic Development: Myth or Reality? Plenary speech. The 48th Annual International IATEFL Conference & Exhibition. <https://www.teachingenglish.org.uk/news-and-events/iatefl-online/2014/plenary-session-david-graddol>
- 2014b: *English next India*. British Council.
- International Maritime Organization 2001: IMO “Standard marine communication phrases.” Resolution A.918(22).
- Jenkins, J. 1998: Which pronunciation norms and models for English as an international language? En: *ELT Journal* 52/2: 119–26.
- Kachru, Braj 1990: *The alchemy of English: the spread, functions, and models of non-native Englishes*. Champaign, Usono: University of Illinois Press.
- Khanna, Parag 2011: America Needs a Diplomatic-Industrial Complex. http://www.huffingtonpost.com/parag-khanna/america-needs-a-diplomati_b_803646.html
- Kimura, Goro Christoph 2020: Komunikado per Esperanto en interlingva compare. En: Koutny & Stria & Farris (red): 31-40.
- Koutny, Ilona & Ida Stria & Michael Farris (red) 2020: *The Role of Languages in Intercultural communication / Rolo de lingvoj en interkultura komunikado*. Poznań: Rys.
- Linstedt, Jouko 2006: Native Esperanto as a test case for natural language. En: Souminen, Michael et al. (red). 2006: A Man of Measure: Festschrift in honour of Fred Karlsson on his 60th birthday. Turku: The linguistic association of Finland. 47-55.
- Neely, Tsedal 2012: Global business speaks English. En: *Harvard Business Review*, Majo 2012.
- Nerrière, Jean-Paul & David Hon 2009: *Globish the World Over*. Globish International Institute.

- Nielsen, Svend 2016: Frekvencoj de Esperantistoj en ĉiuj landoj. En: Kalkulinda: Visualizations and probabilities. <https://svendvnielsen.wordpress.com/2016/12/18/la-frekvenco-de-esperantistoj-en-ciuj-landoj/>
- Ogden, Charles Kay 1930: *Basic English: A General Introduction with Rules and Grammar*. Londono: Paul Treber
- Phillipson, Robert 1992: *Linguistic imperialism*. Oxford: Oxford University Press.
- Simple English (sen jaro): https://en.wikipedia.org/wiki/Simple_English_Wikipedia
- Subtirelu, N. 2015: “She does have an accent but...”: Race and language ideology in students’ evaluations of mathematics instructors on RateMyProfessors.com. En: *Language in Society*, Vol. 44(1): 35-62.
- University of Winnipeg. Sen jaro: “Global English Education Policy”. <https://www.uwinnipeg.ca/global-english-education/index.html>
- VOA Learning English (sen jaro): <https://learningenglish.voanews.com/>
- Voice of America (sen jaro): *A – Z VOA Learning English Word Book*. Washington: Voice of America.
- Walt, Stephen M. 2005: In the National Interest: A grand new strategy for American foreign policy. *Boston Review*. <https://www.bostonreview.net/forum/walt-national-interest/>
- Wandel, Amri. 2014: How many people speak Esperanto? or: Esperanto on the web. En: *Interdisciplinary Description of Complex Systems* 13(2): 318-321.
- Zacharias N. & Manara, C. 2013: *Contextualizing the pedagogy of English as an international language: Issues and tensions*. Newcastle-upon-Tyne: Cambridge Scholars.
- Aliro al interretaj paĝoj 11 Aŭgusto 2023.

Demandoj kaj diskuttemoj

- 1) Ĉu oni povus krei neŭtralan internacian version de la angla?
- 2) Ĉu denaskaj parolantoj devas decidi mem pri demandoj de ĝusteco?
- 3) Se vi estas denaska parolanto de la angla, ĉu vi preferas interparoli kun denaskaj aŭ nedenaskaj parolantoj? Kial?
- 4) Se vi estas denaska parolanto de la angla, kiom facile estas kompreni parolantojn de alia normon?
- 5) Ĉu la plurcentreco de la angla havas eŝkon pri ĝia utileco kiel internacia lingvo?
- 6) Se vi lernis aŭ lernas la anglan, ĉu vi decidis pri tio? Se ne vi, do kiu decidis?
- 7) Ĉu simpligita versio de la angla povus gajni akcepton?
- 8) Ĉu akademio pri la internacia angla estus bona ideo?
- 9) Ĉu komunika neegaleco, laŭ vi, estas kromefiko aŭ kaŭzo pri la internacia disvastigo de la angla.
- 10) Kiom gravaj estas denaskaj normoj en la internacia angla.
- 11) Ĉu vi povas elpensi alian metodon por redukti la malegalecom kiu akompanas la internacian anglan?
- 12) Ĉu, laŭ vi, lastatempaj evoluoj en maŝintradukado povus kontribui al pli granda egaleco en internacia komunikado?

Michael FARRIS, lingvisto, lingvoinstruisto, naskiĝis en Usono en 1957 kaj vivas en Pollando de pli ol 25 jaroj. Li estas preleganto en la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano, kie li instruas aŭ instruis la anglan lingvon, tradukadon, usonan kulturon, lingvistikon de signolingvoj kaj kontribuas al la lingvistika programo de la postiplomaj kaj magistrasaj studoj pri interlingvistiko.

INTERKULTURA KOMUNIKADO

Interkultura komunikado kaj Esperanto

Resumo

Post la prezento de larĝa aliro al kulturo (eksteraj kaj internaj elementoj) specifecoj de la esperanta kulturo estas menciataj. Interkultura komunikado (IK) okazas inter homoj el malsamaj kulturoj, plej ofte kun malsamaj lingvoj por kiu necesas interkultura kompetento. Tiu envolas i.a. la konscion pri la propra kulturo kaj pri tiu de la partnero kaj malfermitecon por la alieco. Studoj pri interkultura komunikado ofte koncentriĝas al kulturaj diferencoj kiuj povas kaŭzi problemojn, sed la lingva aspekto de IK estas same grava, nome kiel la uzata lingvo povas kontribui al la (ne)sukcesa komunikado. Diversaj situacioj estas analizataj el lingvistika, kultura, psikologia kaj sociologia aspektoj: 1) denaska parolanto interkomunikas kun nedenska parolanto de tiu lingvo; 2) la rolon de komununa nedenska lingvo plenumas la angla kiel lingvafrankao (ELF). Fine, la alternativa lingvo, kreita por interkultura komunikado, Esperanto estas prezentata en la rolo de komuna lingvo, kiel ĝiaj ecoj – neŭtraleco, fleksebleco, travidebleco, kultura inkluziveco – helpas la egalrajtan komunikadon. Esperanto kaj ELF estas komparataj. La artikolo baziĝas sur la la angla teksto de Koutny 2020.

Enkonduko

Interkultura komunikado estas pli kaj pli populara kaj grava temo, ĉar ni havas rektajn kaj nerektajn kontaktojn kun reprezentantoj de diversaj kulturoj pro tutmondiĝo, kaj ĉi tiun procezon helpas la nova teknologio. Ĉi tio signifas novajn defiojn en la interligita mondo. Kvankam la kulturaj kaj lingvaj diferencoj estas evidentaj, ĉefe la problemoj kiel venki la kulturajn diferencojn estas esplorata. Mia nuna celo estas esplori antaŭ ĉio la lingvajn aspektojn de interkultura kaj internacia komunikado, la kontribuon de la uzata lingvo al la komunika efikeco, krome analizi la internacian lingvon Esperanto kreitan por la celo de internaca kaj interkultura komunikado, kaj kompari ĝian funkciadon kun tiu de ELF.

1. Kulturo en vasta senco

Kulturo estas baza nocio de la homa civilizo. Ekzistas multaj difinoj por ĝi, mi konsideras kulturon ĉi tie tre vaste, do apartenas al ĝi ĉio kion homoj kreis, uzas kaj kio ĉirkaŭas ilin, eĉ tio kion ili imagas (Koutny 2022).


Eblas dividi la kulturon en du partojn: la artoj (la tradiciaj kulturaj valoraĵoj) kaj la ĉiutaga kulturo. Estas kutimo distingi ilin per **K + k**. **Artoj** (**K**) inkludas arkitekturon,

skulpturon, pentroarton, aplikatajn artojn, literaturon, teatroarton, filmarton, muzikon, kantadon kaj dancadon por menciĝi la ĉefajn terenojn. La **ĉiutaga kulturo** (k) havas **eksterajn, videblajn** kaj internajn, nevideblajn partojn. La unuajn eblas vidi, sperti kaj lerni. Al ili apartenas:

- *realaĵoj* (manĝaĵoj, plantoj, vestaĵoj, lokoj, monumentoj ktp.),
- kulturaj, ekonomiaj, politikaj, edukaj kaj religiaj institucioj,
- *eventoj* (historiaj kaj nuntempaj okazaĵoj, festivaloj ktp.),
- *kutimoj* (ekz. ĉe geedziĝo, funebro, religiaj kaj festaj ceremonioj)
- formo de komunikado (alparoloj, metakomunikado ĉe salutoj),
- *personoj* konataj, vivintaj, vivantaj kaj fikciaj.

La *pensmaniero* (ekz. rekta rifuzo, modesteco – memcerteco, individualismo – kolektivismo), *valoroj* kaj *kredoj* (kio estas bona, akceptebla aŭ malbona en iu socio, ekz. pritakso de poligamio aŭ memmortigo) apartenas al la **nevidebla flanko de la kulturo**, pri kiu oni ofte ne konscias, ili tamen profunde determinas niajn decidojn, agadojn, do vivon.

La cepomodelo de Hofstede (1991) trafe prezentas la elementojn de la kulturo kiel tavolojn de cepo (fig. 1).



Figuro 1: Cepomodelo de kulturo far Hofstede

Hofstede konsideras kulturon kiel *kolektivan mensan programadon*, li emfazas ke ĝi estas komuna por la komunumo (Hofstede 2011). Ĝuste la kulturspecifaj elementoj – konataj ene de la komunumo, disigas la kulturojn kaj kulturanojn, kaŭzas problemojn en la komunikado inter malsamkulturanaj kaj en la tradukado inter diversaj lingvoj.

Hofstede enkondukis ankaŭ kulturajn dimensiojn kaj esploris ilin en diversaj landoj. Tiuj estas:

- Potenco-distanco (granda – malgranda): montras distancon inter la homoj en diversaj niveloj de hierarkio
- Individuismo – kolektivismo: kiomgrade gravas la aparteno al kolektivo kaj ĝiaj interesoj aŭ koncentriĝo al la propraj celoj
- Vireco – virineco: kiuj valoroj estas pli gravaj
- Evito de nesekureco (alta – malalta): kiomgrade homoj sentas malcertajn situaciojn danĝeraj
- Long- aŭ mallongdistanca orientiĝo: ĉu konservi la nunan staton aŭ celi futuron

Laŭ ili estas diferencoj inter diversaj kulturoj kiujn necesas konsideri ĉe interkultura komunikado. Eblas kompari la landojn (<https://geerthofstede.com/country-comparison-graphs/>). Estus interese esplori, ĉu estas io karakteriza por esperantistoj aŭ ilin karakterizas ilia origina kulturo.

La **lingvo** ludas specialan rolon, ja ĝi spegulas la kulturon kaj samtempe estas ĝia parto, ĉiu kulturero havas nomon, esprimoj kaj proverboj koncize entenas la pensmanieron de la kulturkomunumo. La pensmaniero kaj valoroj havas fundamentan influon al nia konduto kaj komunikadstrategioj, tiel al la interkultura komunikado.

La gepatra lingvo havas bazan rolon ankaŭ en la alproprigo de kulturaj elementoj kaj normoj dum la ensociiga procezo de la infano. Ili lernas samtempe la lingvon kaj koni la mondon. Per alia lingvo ni aliras al alia kulturo, ni ne simple anstataŭigas la vortojn kaj strukturojn, sed aplikas alian lingvan bildon.

Eŭropo havas komunan kulturan heredaĵon influitan per Kristanismo, la antikvaj greka kaj Latina kulturoj, simila klimato, bestaro kaj plantaro. Tio speguliĝas ankaŭ en la lingvaj esprimoj, proverboj: *sizifa laboro*; *bela kiel Venuso*; *Troja ĉevalo*; *Neniu estas profeto en sia urbeto*. *Unu hirundo printempon ne anoncas*. Aziaj kaj afrikaj landoj havas malsamajn kulturajn, religiajn kaj naturajn fonojn. Ili speguliĝas en la koncernaj lingvoj.

Ĉu Esperanto havas ankaŭ sian kulturon kaj alian aliron al la mondo? – leviĝas la demando. Eĉ se ĝi baziĝas sur la fontolingvaj kaj internaciaj kulturoj, ĝi elformis sian propran kulturon kiu akceptas influojn de aliaj, ĝi havas inkluzivan kulturon kiel Auld (1986) nomis tion. La ĉiutaga kulturo en Esperantio estas pli limigita pro manko de propra lando kun institucioj (vd Koutny 1998). La artaĵoj same malplimultas krom literaturo (vd la skizan prezenton en Koutny 2022), pro tio ke Esperantio organiziĝas ĉirkaŭ la lingvo.

Ni serĉu la specifecon en la lingvo mem! Esperanto havas sian specialan produktivan algluan strukturon kiu esprimas la rilatojn morfologie inter la semantike parencaj vortoj kaj tiel montras la rilatojn inter la nocioj pli klare – eble tio donas sian specifan lingvan bildon de la mondo (Koutny 2010/22).

Ĉu la lingva bildo de homoj ŝanĝiĝas alpropriginte Esperanton? Eble jam certaj valoroj, kiel interesiĝo kaj malfermiteco por alieco, egalrajta komunikado, paco pre-

destinas iun esti esperantisto... Iuj komunaj elementoj de esperantistoj vidiĝas el la esploroj (Koutny 2010 kaj Stria 2015 kaj 2022).

2. Interkultura komunikado

Ni vivas nun en la **epoko de tutmondiĝo**, kiam nova teknologio (amaskomunikado, interreto, saĝtelefonoj) ebligas kontakton inter homoj el fremdaj kulturoj. Homoj vojaĝas por plezuro (turismo estas floranta branĉo), kaj laboro, tial moviĝebla pliiĝis. Aldone, migrado konsistigas specialan defion por la nuna epoko. Kiel rezulto, malsamaj kulturoj renkontas unu la alian. Ili povas konflikti unu kun la alia, kaj plifortigi siajn proprajn valorojn ambaŭflanke, aŭ ili povas trovi komunan denominatoron, sed ili ankaŭ povas miksiĝi aŭ integriĝi (ekz. en internacia laborejo).

Interkultura komunikado (IK) povas esti konceptita kiel komunikado de individuoj aŭ grupoj de malsamaj kulturoj. En la nuna aliro, la fokuso estos metita sur komunikado kiam la partneroj havas ankaŭ malsamajn gepatrajn lingvojn (L1), tial problemoj pro ne nur kulturaj, sed ankaŭ lingvaj diferencoj devas esti venkitaj.

La ekstera flanko de la kulturo, ankaŭ reflektita en la lingvo, estas iagrade vidata kaj lernebla, sed la aludoj al objektoj (realaĵoj), eventoj, personoj de la alia kulturo estas maltrafitaj, kaj ŝercoj estas malfacile kompreneblaj pro malsamaj edukaj kaj kulturaj fonoj de la komunikantoj. La diferencoj en neparola komunikado ankaŭ povas malhelpi la reciprokan komprenon de komunikaj celoj. Ĉi tiuj aŭtomataj konduteroj de parolado estas malfacile alproprigeblaj.

Aliaj pensmanieroj, malsamaj valoroj (ekz. pri la rolo de virinoj, rilato al la aliaj, propra valoro ktp.) ofte ne estas konsciaj, sed ili determinas la homan sintenon al la mondo, al la aliaj. Estas malfacile kompreni ilin, adaptiĝi al ili, se necese; krome, iuj valoroj, opinioj eble ne estas akcepteblaj por aliaj. Kultura ŝoko povas okazi dum restado pli longe en alia lando, kaj estas malfacile venki ĉi tiujn problemojn. Oni ĝenerale akceptas, ke necesas konscio pri diferencoj, malfermiteco kaj toleremo por la alieco kaj empatio, same kiel serĉi similecojn por kunlabori. Entute necesas pli eksplicite komuniki interkulture.

La koncepto de **interkultura kompetento** estis enkondukita. Ĉi tio signifas kognajn/ekkonajn, afekciajn kaj kondutajn kapablojn (Asaratnam 2005). Estas multaj modeloj kiuj entenas scion, konscion, kapablojn, sintenon (vidu ekz. Fantini 2009, Deardoff 2009), pli precize:


- **Scioj**: kultura memkonscio kaj scio pri aliaj kulturoj;
- **Sintenoj**: scivolemo kaj malfermiteco por aliaj kulturoj, respekto kaj toleremo de aliaj opinioj, valoroj;
- **Kapabloj**: aŭskulti, observi, analizi, rigardi la mondon el alies perspektivo.

Fantini (2018) mencias ankaŭ lingvan kompetenton kiel kapablon, sed ĝenerale, lingvo estas malpli pritraktata kvankam la komunikado plej ofte efektiviĝas parole, do ĝi estas decida en komunikado. Tiu ĉi antropologia aliro al IK validas ĉefe en Usono pro la hejma situacio kun indiĝenoj kaj enmigrintoj, sed bezonatas modelo kun konsidero de diversaj lingvoj. Mi ŝatus prilumigi la lingvan flankon de komunikado.

3. Kulturo kaj lingvo

Lingvo kaj kulturo estas **intime interligitaj**. Lingvo estas parto de kulturo (ĝi karakterizas parolkomunumon kaj kontribuas al ĝia identeco) kaj estas portanto de kulturo (esprimas ĉiujn elementojn de kulturo). Lingvo uzata en homa komunikado kaj kulturo ne estas apartigeblaj. Ni lernas kaj konas la mondon kaj kulturon en granda mezuro per lingvo. En malsamaj lingvoj aperas malsamaj interpretoj de la mondo – laŭ la spertoj de la homoj parolantaj en la donita lingvo, tio estas la kampo de lingva mondbildo/mondkoncepto (vidu esplorojn de Bartminski en Głaz & Danaher & Łozowski 2013).

Ni komencu per la **segmentado de la mondo** per lingvaj etiketoj uzante simplan ekzemplon. En hind-eŭropaj lingvoj *arbo* kaj *ligno* estas du kategorioj (germane: Baum – Holz, france: arbre – bois), sed en la hungara tio estas nur unu kategorio/vorto *fa* kiel estas la japana vorto *ki*. En multaj lingvoj, vivuloj estas dividitaj al li aŭ ŝi, sed en la hungara ekzistas nur unu pronomo *ő* (tio povas kontribui al suspenso en romano, kaj kaŭzas malpli da problemoj por seksisma lingvouzo, sed pli da problemoj por tradukisto al lingvo kie la distingo ne estas evitebla).



La **kolokaĵoj kaj frazeologiaĵoj** estas evidente lingvospecifaj, ili donas informojn pri la kultura fono de la donita lingvo (ekz. Bartmiński 2020). Eĉ la specialaĵoj de la gramatika sistemo povas kontribui al la lingva mondkoncepto (ekz. gramatikaj genroj).

Se la komunikado koncernas individuojn aŭ grupojn implikante lingvajn kaj kulturajn sciojn, temas pri la kampo de *interkultura komunikado*. Se la komunikado okazas sur internacia nivelo dum renkontiĝoj de organizaĵoj, inter politikaj, komercaj aŭ sciencaj partneroj, kie (oficiala(j)) lingvo(j) estas elektita(j), kaj la temoj estas determinitaj, ne ĉiutaga vivo, tio estas la kampo de *internacia komunikado*. Internaciaj organizoj kiel UN, Unesko havas siajn oficialajn lingvojn. IK estas interbranĉa tereno, esploras ĝin lingvistiko, kulturologio, antropologio, psikologio, sociologio.

3. Lingvistikaj aspektoj de interkultura komunikado

Traktante la lingvajn aspektojn de interkultura komunikado, leviĝas la demando kiun lingvon uzi kaj kiun influon tio havas por la (mal)sukceso de la komunikado. Koncerne la unuan demandon, du esence malsamaj situacioj devas esti distingitaj:

- a) la *gepatra lingvo de unu el la partneroj* estas uzata por komunikado, ekz. studento, turisto aŭ migranto alvenas en landon (Usono, Germanio aŭ alia), ili lernu la lingvon kaj la kulturon de la lando por sukcese komuniki en la ĉiutaga vivo kun la lokaj homoj; sed tiu ĉi agordo povas okazi ankaŭ aliloke, ekz. dum konferenco, negoco.
- b) alia *komuna lingvo* – la L1 de neniu el la interparolantoj – uzeblas por komunikado (ekz. usonano kaj japano parolas la germanan); tio povas okazi en individuaj kontaktoj aŭ en internaciaj konferencoj.

3.1. Komunikado en la gepatra lingvo de unu el la partneroj

Tia situacio povas okazi en diversaj kondiĉoj: dum konferencoj, dum politikaj kaj komercaj negocoj aŭ post enmigro en iu lando. Se iu ekloĝas en alia lando, la lernado de la loka lingvo helpas en la integriĝo al la loka socio (Grin 2017), tio signifas por la enmigrinto la uzon de la gepatra lingvo de la aliaj kaj adaptiĝon al ilia kulturo. Tiuj situacioj gvidas al *malegaleco* en la komunikado. Temas ne nur pri lingva kaj kultura aspektoj, sed ankaŭ *psikologia*.

La denaska parolanto regas la lingvon (vortprovizon, frazeologiaĵojn, elvokaĵojn, kulture ŝarĝitajn elementojn) kaj povas flue vortigi sian opinion. La alia partnero spertas *lingvan handikapon*: ne komprenas iujn elementojn, foje eĉ ne konscias ke ne komprenas ion. Se la manko de kompreno ne estas konscia, tiam la pli profunda signifo de la mesaĝo estas maltrafita, kaj miskompreno povas okazi. Aliflanke, ĉi tiu persono ne havas la kapablon por nuanca/subtila sinesprimo. Ĉio ĉi povas konduki al situacio, kie li/ŝi povas ŝajni malpli ĝentila, aŭ malpli klera ol ili estas. Ili povas netaŭge klarigi siajn proponojn, opiniojn aŭ silenti, kio povas rezultigi ekskludon de diskutoj el la socia vivo, kaj tial havi malpli da kontribuo al decidoj, kiuj koncernas

ilin (kp Gazzola 2014). Sur la socia nivelo, tiu maljusta traktado de la gastiga socio povas rezulti *socian malavantaĝon* por la fremdulo (grupoj). Sur la individua nivelo tio povas rezulti en malsupereca komplekso aŭ prolingva stresoj.

3.2. Komuna internacia lingvo

La angla, la hispana aŭ aliaj lingvoj povas funkcii kiel lingvafrankaoj en interkultura komunikado, ekz. se brazilano aŭ germano komunikas angle aŭ hispane kun franco aŭ hungaro. La lingvafrankao estas fremda lingvo por ambaŭ partneroj, kio signifas, ke ekzistas ia egaleco, sed povas okazi malsamaj niveloj kaj mankoj en scio (malsamaj problemoj de prononco por hungaroj kaj brazilanoj aŭ ĉinoj kaj same validas por gramatiko, kaj vortoprovizo).

La rolo de la **angla kiel internacia lingvo** (EIL: English as an International Language) aŭ la angla kiel lingvafrankao (ELF) estas nekontestebla. Ĉi tio estas speco de simpla angla, kiu permesas komuniki por homoj kun malsamaj gepatraj lingvoj. Eĉ la opinio disvastiĝis ke „la angla estas la posedaĵo de ĉiu individuo kaj komunumo kiu deziras uzi ĝin, kie ajn ili estas en la mondo” (McArthurs en Phillipson 2003: 163). Estas movado por ĝi, ja nedenskaj parolantoj de la angla plimultas ol la denaskuloj, tial ili devas direkti ĝian evoluon laŭ Jenkins (2000). Denaskaj anglalingvanoj ne vere volas kunlabori en tio (Farris 2014).

Kiaj normoj validas por ELF? Ĝi ŝajnas esti rezulto de intertraktado de ĝiaj parolantoj en konkreta komunika situacio (ekz. Erasmus-studentoj en universitato), kie la ĉefa celo estas interkompreniĝo, ne la ĝusta kaj rafinita uzo de la angla lingvo. Estas multaj internaciaj kompanioj, studentoj uzante ian ELF. La *Lingua Franca Core* ‘Kerna lingvafrankao’ de Jenkins (2000) estas provo disponigi la minimume necesajn regulojn en fonetiko, decidaj por komprenebleco, sed ekzistas pli grandaj problemoj en semantiko, ja la angla havas multajn multsignifajn vortojn, verbajn esprimojn kaj frazeologiaĵojn, krome ambiguajn sintaksajn strukturojn.

La konata **modelo de Kachru** (1985) prezentas la anglan en tri samcentraj cirkloj: – *interna cirklo* kiu estas normproviza (denaskaj parolantoj en Usono, UK, ĉirkaŭ 370 mln); – *ekstera cirklo* rilatas al landoj, kie la angla estas oficiala L2 (kiel en Barato aŭ Niĝerio, sume ĉirkaŭ 350–450 mln); – *vastiĝanta cirklo* (parolantoj, lernantoj de la angla, ĉ. 750 mln). Estas diversaj problemoj pri la angla: malsama nombro da parolantoj en diversaj fontoj; estas vere, ke la angla estas senkompare la plej studita fremda lingvo en la mondo (Graddol 2006), sed kie estas la limo inter parolantoj kaj lernantoj? En Eŭropo, la angla estis parolata far 13 % da loĝantoj kiel L1 kaj far 38% kiel aldona lingvo (Eŭrobarometro 2012 kiu montras memtaksadon), kiu post la briteliro ŝanĝiĝis.

En ĉiu kazo tamen, la usona kaj brita anglaj lingvoj restas la modeloj, ili estas instruataj plej ofte en lernejoj. EIL/ELF povas esti difinita nur rilate al la modelo. La lingvouzo de denaska parolanto de la usona kaj brita angla estas kulture ŝargita, temas

pri diversaj esprimoj, frazeologiaĵoj kaj aparta mondkoncepto estas esprimita en la lingvo el kiuj multe restas en la limigitaj versioj de la angla. Tial eĉ en internacia uzo, la angla manifestas la anglofonan kulturon. La angla uzata en akademias publikajoj altrudas ankaŭ anglosaksan pensmanieron kaj argumentadon (vd Fiedler 2014), kio kondukas al kultura limigo.

Ĉiu alia lingvo uzata kiel lingvafrankao konservas parton de la origina kultura ŝarĝo, kaj ĝia uzo en interkultura rolo kontribuas al la disvastigo de tiu lingvo kaj kulturo malantaŭ ĝi. Tio kondukas al *lingva imperiismo* (Phillipson 2003) aŭ interna koloniigo laŭ Manzano-Arrondo (2020) malgraŭ la provo prezenti ELF kiel senkulturan lingvouzon.

4. Internacia lingvo kreita por internacia kaj interkultura komunikado: Esperanto

Ni rigardu *alternativan internacian lingvon*, kiu estis kreita por la komunikado de popoloj el diversaj nacioj kaj kulturoj. Esperanto bazita sur pluraj lingvoj estas neŭtrala lingvo, celita kiel dua lingvo por la homaro, kiel helplingvo en internacia kaj interkultura komunikado. Estas nur malmultaj denaskuloj kaj ili ne donas normon inter la L2-parolantoj de Esperanto (kp Fiedler 2012), tial ĝi donas egalajn ŝancojn en komunikado sen psikologiaj kaj sociaj malavantaĝoj. Ĝia travidebla, fleksebla kaj regula strukturo servas ĉi tiun celon, kaj faciligas ĝian lernadon, postulas malpli da tempo, energio kaj financa investo en akiro ol faras la franca, rusa aŭ aliaj historiaj lingvoj. Ĉi tio provizas sperton de sukceso al siaj lernantoj.

Esperanto povas esti konsiderata kiel *ekologia lingvo* ankaŭ en la senco, ke ĝi ne endanĝerigas aliajn lingvojn, Esperanto proponas internacian komunikilon krom la gepatraj lingvoj de siaj parolantoj. Ĝi ankaŭ subtenas lingvan diversecon kaj la uzon de minoritataj lingvoj (Montagut 2004). Laŭ la ekologia vidpunkto de lingvoj, lingva daŭripovo, ĉiu lingvo povas trovi sian funkciajn niĉon por sia konservado (Bastardas-Boada 2007). Por la momento Esperanto estas ilo por amikaj rilatoj en multaj landoj de la mondo kvankam povus esti uzata en aliaj terenoj.

4.1. Lingva fleksebleco

Esperanto havas regulan kaj klaran vortfaradon. La psikologo Piron (1987) argumentas, ke tiu ĉi strukturo subtenas la lingvan kreivon de infanoj, krome li asertas, ke Esperanto sekvas la spontanee kreadon de vortoj (Piron 1989). La reguloj de la Esperanta gramatiko estas ĝeneraligitaj, la morfologiaj eblecoj estas limigitaj nur per semantiko. Ekzemple la vorto *ganto* povas esti anstataŭigita per vorto derivita de mano: *maningo*, *manujo*, *manvesto* (enketo en Koutny 2010). Ĉi tiu fleksebleco

ebligas la facilan esprimon de pensoj en malsamaj manieroj, la parolantoj povas pli bone esprimi sian propran kulturon.

Semantike proksimaj konceptoj regule fariĝas vortoj en morfologie rilataj formoj (kompare kun la angla), ekz.

vendi ‘to sell’ → **vendejo** ‘shop’, **vendisto** ‘salesman’, **vendistino** ‘saleswoman’, **vendaĵo** ‘merchandise’, **vendebla** ‘easy to sell’ ktp. aŭ

lerni ‘to learn’ → **lernejo** ‘school’, **lernanto** ‘pupil’, **lernantino** ‘female pupil’ **lernaĵo** ‘material to be learned’, **lernebla** ‘learnable’, **lernema** ‘diligent’, **lernigi** ‘make learn’, **memlernanto** ‘autodidact’ etc.

La neambiguaj kaj ĝeneraligitaj reguloj de Esperanto rezultas en pli facila transmeto de informoj, kaj en la flanko de ricevanto – eĉ kaze de foraj kulturoj – en suffiĉe konvena dekodado. La diversaj variantoj – laŭ la gepatraj lingvoj de la parolantoj, ebligas pli komfortan kaj sekuran sinesprimon, ekz.:

Eniri/preni trajnon ‘enter/take a train’ (france: prendre le train) aŭ la esence esperanta versio entrajniĝi ‘in-train-get-in’

Sidiĝi al la tablo ‘sit down to the table’ aŭ altabliĝi ‘to-table-sitting-become’

La baza vortprovizo de Esperanto devenas el la eŭropaj lingvoj, sed la vortformado eliras el tiu ĉi kadro, nome *tablo* ‘table’ estas eŭropa, sed *surtabliĝi* aŭ *altabliĝi* jam superas la eŭropajn kadrojn kaj kompreneblas ankaŭ al alilingvanoj. Ankaŭ la vortordo estas fleksebla (tipologia analizo de Esperanto en diversaj niveloj troveblas en Koutny 2015, 2018). La unuecon en la vario certigas la respekto de la *Fundamento de Esperanto*, deklarita netuŝebla en 1905.

4.2. Kulturaj influoj

Kiel planlingvo, Esperanto estas malpli ŝargita kulture, sed ne sterila: ĝi enhavas elementojn de internacia kulturo, influojn de la fontolingvaj kulturoj, kaj ĝia propra kulturo estiĝis dum siaj pli ol 135 jaroj da ekzistado (Koutny 2018).

Esperanto kiel lingvo kun parolantoj en multaj landoj de la mondo, manifestas ian **internacian kulturon**: universalaj kulturaj elementoj kaj ankaŭ amaskulturo simila en multaj landoj pro la tutmondiĝo, ĉeestas. La suno leviĝas ankaŭ en Esperanto! Jen ekzemplo por la uzo de moderna vortprovizo en Esperanto:

Junaj homoj portas ĵinsojn kaj t-ĉemizojn, ili trinkas kolaon kaj manĝas hamburgeron, aŭskultas hiphop-muzikon aŭ mem repas, ili kontaktiĝas per interreto kaj sociaj medioj.

La vortprovizo evoluas laŭ la evoluo de la mondo, novaj aĵoj kaj konceptoj devas havi nomon. La lingvokomunumo uzas du metodojn: prunton el aliaj lingvoj,

nuntempe ĉefe el la angla kaj la internan derivadon. Tiel la popularaj novaj vortoj aperas ankaŭ en Esperanto: *saĝtelefono* ‘smartphone’, *interreto* ‘internet’, *retumi* ‘to surf in the internet’, *retumilo* ‘browser’, *babilejo* ‘chatroom’, *blog* ‘blog’, *virtuala realeco* ‘virtual reality’.

La bazaj vortoj de Esperanto devenas de la **indo-eŭropaj lingvoj** (latinidaj, ĝermanaj kaj slavaj), ili tiel kunportis ilian segmentadon de la mondo (vd nomon de koloroj, familiaj rilatoj, ekzemploj en Koutny 2015, 2018) kaj ankaŭ kulturon speguliĝantan en la lingvo.

Esperanta kulturo akceptas influojn el aliaj kulturoj. Temas pri baze *inkluziva kulturo* – kiel Auld (1986) nomis ĝin: “ĉar ĝi ne celas esprimi la apartaĵojn de iu grupo, sed ĉion, kio estas komuna al ĉiuj homoj en ĉiuj mondpartoj ... Ĉar per elementoj el siaj kulturoj naciaj kaj rasaj la esperantistoj ankaŭ kontribuas inkluzivige al la kulturo sennacia”. Sekve Esperanto disvastigas sciojn pri diversaj lingvoj kaj kulturoj. Esperanto povas esti ponto inter lingvoj kaj kulturoj, tion atestas la tradukoj tra Esperanto, ekz. la konata hungara verko *Johano la brava* en la ĉinan aŭ *Waitapu* el la kroata en la bengalan.

Speciala **Esperanta kulturo** ekestis dum sia 135 jaroj da funkciado: organizoj (UEA, SAT, AdE ktp.), kongresoj (UK, IJK), renkontiĝoj, Esperantistaj familioj kaj abunda literaturo – spegulitaj en la lingvo (vd Fiedler 2002, 2022, Koutny 2022, Melnikov 2001, 2022). Esperantismoj estas ofte travideblaj kaj kompreneblaj: *altabliĝi*, *ellitiĝi*, *desupri* oŭ *rompi al si la kapon*, *labori kiel formiko*, *kongresa edzino*.

5. Interkultura komunikado tra Esperanto

Esperanto funkcias kaj disvolviĝas en internacia parolkomunumo, kie Esperanto estas L2 aŭ eĉ L3 de siaj parolantoj. Ilia bazo estas la kultura dulingveco. La Esperanta parolkomunumo distingiĝas de aliaj parolkomunumoj, ĉar ĝi estas *libervola*, *neetna*, *neteritoria parolkomunumo* (Wood 1979), ĝi estas tiel interne baze internacia kaj interkultura. Aparteno al la sama grupo donas ankaŭ *identecon* al la parolantoj.

Esperantistoj kutime interesiĝas pri aliaj kulturoj, volas ekkoni ilin, kaj estas malfermitaj al aliaj kutimoj. La komuna lingvo donas al ili bazon por kunlabori por celoj kiel egalrajta komunikado, paca mondo kaj en multaj diversaj kampoj (Universala Esperanto-Asocio havas multajn profesiajn asociojn, i.a. por instruistoj, kuracistoj, komputistoj ktp.). La interkultura komunikado en Esperanto havas longan tradicion kaj bonan rezulton, tio certigas ĝian pluvivon malgraŭ militoj kaj persekutoj (dum naziismo kaj stalinismo). La principo “esti en la sama grupo”, esti *samideano* formas solidarecon inter la membroj de la komunumo, donas sekurecon, multe pli ol por aliaj homoj kunvenantaj kaj parolantaj komunan lingvon.

Komunikado estas faciligata per la regula lingvo, pro ĝia malalta ambigueco estas malpli da miskomprenoj, tamen la miskomprenoj ne povas esti tute evititaj pro kulturaj

diferencoj (Koutny 2022b), kaj tio rezultas en pli efika komunikado ol en la angla (vd komparon inter la lingvoj angla kaj Esperanto en Koutny 2005). Altnivela metalingva konscio estas karakteriza por la Esperanto-parolantoj, ili havas strategiojn por solvi miskomprenojn, por korekti sin kaj unu la alian, ĉar ne nur interkomunikado, sed ankaŭ ĝusta lingvouzo gravas por ili (kp Fiedler & Brosch 2020). Kapabloj kiel aŭskulti, observi kaj rigardi la mondon el alies perspektivo estas naturaj por esperantistoj. Tiu estas ĝuste la elementoj de interkultura kompetento.

Laŭ mia sperto, ne la parolanto devas adaptiĝi al la lingvo kiel en la kazo de historiaj fremdaj lingvoj, kie elformiĝis striktaj normoj, sed prefere la lingvo adaptiĝas al la parolanto pro sia fleksebleco. Esperanto – kiel nenies lingvo kaj kulturo – estas ĉies lingvo kaj kulturo (ekz. Lindstedt 2010), sed ne estas hazardaj ŝanĝoj en malsamaj medioj kiel kaze de ELF, ja Esperanto havas aŭtonoman sistemon. Eĉ la Lingvafranka Kerno de Jenkins ne ŝanĝas la situacion, ke ELF estas hazarda rezulto de la komunikaj situacioj kaj partneroj. Do ELF ne povas forigi la originalan lingvon kaj kulturon, kaj la diversajn ŝanĝojn en malsamaj medioj. Pri pragmata uzo de Esperanto vidu ankaŭ Koutny 2022b).

Konkludoj

Interkultura komunikado estas kompleksa fenomeno kun kulturaj, lingvaj, psikologiaj, sociologiaj kaj pedagogiaj aspektoj. Konscio kaj scio pri diferencoj, malfermiteco, scivolemo kaj empatio por alieco estas bezonataj kune kun kapabloj por observi, kompreni. Serĉante komunajn trajtojn, universalajn homajn kaj komunajn interesiĝojn por kunlabori kaj senti solidarecon, speciala interkultura kompetento devas esti evoluigita.

Efikeco en IK dependas ankaŭ de la komuna lingvo de la partneroj. Komunikado sur egala bazo envolvigas la partnerojn pli, estas pli justa, kaj pli bone certigas la sukcesan plenumon de la komunikaj celoj. ELF estas tre vaste uzata en internaciaj kuntekstoj, sed ĝiaj normoj ne estas klaraj, kaj la kulture ŝargita fono de la normon provizanta angla lingvo ne povas esti tute ekskludita. Same ne eblas paroli pri lingvokomunumo de ELF, male al la esperantista lingvokomunumo kiu havas komunajn konvinkojn, strebojn kaj tiel solidarecon inter siaj membroj.

Alternativa modelo por interkultura kaj internacia komunikado estas Esperanto. Ĝi – kun sia travidebla kaj fleksebla strukturo kaj malpli granda kultura bagaĝo – precipe oportunas kiel interkultura lingvo en amikaj rilatoj kaj por transponti kulturojn. Kompare kun ELF, Esperanto havas solidan strukturon bazitan sur sia Fundamento kaj regule evoluantan vortprovizon kun produktiva vortfarado, kiuj garantias efikan kaj malpli ambiguan komunikadon sur egala bazo. Tamen la lingvo en si mem ne sufiĉas, necesas ankaŭ la interkultura kompetento ankaŭ por esperantistoj. Do interkultura kompetento kaj konvena lingvo kune certigas la sukcesan interkulturan komunikadon.

Bibliografio

- Arasaratnam, Lily A.: Intercultural competence. En: *Oxford Research Encyclopedia* <http://oxfordre.com/communication/view/10.1093/acrefore/9780190228613.001.0001/acrefore-9780190228613-e-68>
- Auld, William 1986: *Kulturo kaj internacia lingvo. Chapeco: Fonto*
- Bartmiński, Jerzy 2020: Frazeologia a językowy obraz świata. En: *Słowiańska frazeologia gwarowa II*. Kraków: UJ
- Bastardas-Boada, Albert 2007: Linguistic sustainability for a multilingual humanity. En: *Sustainable Multilingualism* 2014: 134–163.
- Deardorff, D. K. 2009: Intercultural competence. En: *The SAGE Handbook of Intercultural Competence*. London: Sage Publications. 12–14.
- Fantini, Alvino 2009: Assessing intercultural competence: Issues and Tools. En: DK Deardorff (ed.): *The SAGE handbook of intercultural competence*. Thousand Oaks, CA: Sage. 456–476.
- 2018: *Intercultural Communicative Competence in Educational Exchange: A Multinational Perspective*. Routledge
- Farris, Michael 2014: The psychological economy of the English language industry. En: *Język Komunikacja Informacja* 9: 27–37. <http://jki.amu.edu.pl>
- Fiedler, Sabine 2002: *Esperanta Frazeologio*. Rotterdam: UEA
- 2010: Approaches to fair linguistic communication. En: *European Journal of Language Policy*, 2.1: 1–22.
- 2012: The Esperanto denaskulo: The status of the native speaker of Esperanto within and beyond the planned language community. En: *Language Problems & Language Planning*, 36(1): 69–84.
- 2014: Scientific communication in a lingua franca. En: *JKI* 9: 48–57.
- 2020: La frazeologio de Esperanto kiel spegulo de kulturo. En: Koutny I. (red.): *Esperanta kulturo*. Poznań: Rys, 67–81.
- Fiedler, Sabine & Brosch, Cyril Robert 2018: Esperanto – a lingua franca in use: A case study on an educational NGO. En: *Language Problems & Language Planning* 42: 194–219.
- Fiedler, Sabine & Brosch, Cyril Robert 2020: Interkultura komunikado per Esperanto: kelkaj ĉefaj trajtoj. En: Ilona Koutny & Ida Stria & Michael Farris (red) 2020: *The Role of Languages in Intercultural Communication / Rolo de lingvoj en interkultura komunikado*. Poznań: Rys, 121–136.
- Gazzola, Michel 2014: *Lingva justeco: kiel taksi ĝin? La ekzemplo de Eŭropa Unio*. En: *ELF Working Papers* 14. <https://www.unige.ch/fti/elf/files/9614/5865/9202/elfwp14.pdf>
- Głaz, A. & DANAHÉ, D., & Łozowski, P. (eds) 2013: *The Linguistic Worldview: Ethnolinguistics, Cognition, and Culture*. London: Versita. eBook version: De Gruyter Open: <http://www.degruyter.com/view/product/246955>
- Graddol, David 2006: *English next*. British Council. <https://www.teachingenglish.org.uk/article/english-next>
- Grin, François & Fürst, Guillaume 2017: Quels sont les facteurs qui renforcent l'exigence d'apprentissage par les migrants de la langue du pays d'accueil? En: Beacco, J-C. & Krumm, H-J. (red.): *The Linguistic Integration of Adult Migrants / L'intégration linguistique des migrants adultes*. Berlin: De Gruyter. <https://library.oapen.org/handle/20.500.12657/27427>

- Hofstede, Geert 1991: *Cultures and Organizations: Software of the Mind*. London & New York: McGraw-Hill
- Jenkins, Jennifer 2000: *The phonology of English as an international language*. Oxford: Oxford University Press
- Kachru, Braj B. 1985: *Standards, Codification and Sociolinguistic Realism: The English Language in the Outer Circle*. En: Randolph Quirk & H. G. Widdowson (eds.) *English in the World: Teaching and Learning the Languages and Literatures*, Cambridge: Cambridge University Press. 11–30.
- Koutny Ilona 2005: Interkultura komunikado en Eŭropo: la angla kaj esperanto kiel alternativaj komunikiloj. En: *Symposium on Communication Across Cultural Boundaries*. Ch. Kiselman (ed.). Dobrichovice: Kava-Pech. 115–132.
- 2010: Esperantlingva bildo de la mondo. En: Detlev Blanke & Ulrich Lins (red.): *La arto labori kune. Festlibro por Humphrey Tonkin*. Rotterdam: UEA. 190–305. <http://interl.amu.edu.pl/>
- 2015: A typological description of Esperanto as a natural language. En: *JKI* 10: 43–62. <http://jki.amu.edu.pl/>; Esperanta versio en: Ch. Kiselman 2018: *Aliroj al Esperanto*. Dobrichovice: Kava-Pech 129–146. <http://interl.mu.edu.pl/>;
- 2018: Can language create culture? A case study of the planned language Esperanto. In: Anna Biedrzyńska & Monika Zięba-Plebankiewicz & Grzegorz A. Ziętałi: *Język i jego wyzwania: język w kulturze, kultura w język. Tom I. Językoznawstwo*. Nowy Sącz: Państwowa Wyższa Szkoła Zawodowa w Nowym Sączu. 69–75.
- 2020: The role of languages in intercultural Communication. En: Ilona Koutny & Ida Stria & Michael Farris (red.) 2020: *The Role of Languages in Intercultural Communication / Rolo de lingvoj en interkultura komunikado / Rola języków w komunikacji międzykulturowej*. Poznań: Rys. 19–30.
- 2022: Enkonduko al Esperanta kulturo. En: Koutny, Ilona (red.) 2022: *Esperanta kulturo*. Poznań: Rys. 9–30.
- Lindstedt, Jouko 2010: Lingvo – rimedo aŭ resurso? En: Detlev Blanke & Ulrich Lins (eds): *La arto labori kune. Festlibro por Humphrey Tonkin*. Rotterdam: UEA. 51–62
- Manzano-Arrondo, Vicente 2020: Ĉu komunikado bezonas internacian lingvon aŭ interkulturan? En: Ilona Koutny & Ida Stria & Michael Farris (red.) 2020: *The Role of Languages in Intercultural Communication / Rolo de lingvoj en interkultura komunikado / Rola języków w komunikacji międzykulturowej*. Poznań: Rys. 137–147.
- Melnikov, Aleksandr 2001: Elementoj de originala esperanto-kulturo kaj ilia lingva reflektiĝo. En: Blanke, Detlev (red.): *Esperanto kaj kulturo – sociaj kaj lingvaj aspektoj. Aktoj de la 19-a Esperantologia Konferenco, 81-a UK, Prago, 1996*. Roterdamo: UEA
- 2022: Esperantonimoj kiel enlingv(aj)a speguliĝo de la specifa Esperanto-kulturo. En: Koutny, Ilona (red.) 2022: *Esperanta kulturo*. Poznań: Rys. 83–105.
- Montagut, Abel 2004: The Contribution of the International Language Esperanto towards Linguistic Diversity. https://uea.org/vikio/Artikolo_De_Abel_Montagut
- Piron, Claude 1987: Créativité et expression linguistique. En: Duc Goninaz (red.): *Studoj pri la internacia lingvo. Etudes sur la langue internationale. Studies on International language*. Gent: AIMAV. 145–153.
- 1989: *Esperanto el la vidpunkto de verkisto*. Vieno: Pro Esperanto

Phillipson, Robert 2003: *English-only Europe? Challenging of language policy*. Resumo: <https://epdf.tips/english-only-europe-challenging-language-policy.html>

Wood, R.E. 1979: *A voluntary, non-ethnic, non-territorial speech community*. In: W.F. Mackay, J. Omstein (eds): *Sociolinguistic studies in language contact*. The Hague: Mouton de Gruyter

Demandoj kaj diskuttemoj

- 1) Kiuj estas la elementoj de kulturo?
- 2) Pripensu la kulturajn dimensiojn laŭ Hofstede en via kulturo/lando!
- 3) Ĉu ekzistas internacia kulturo?
- 4) Kiam ni parolas pri interkultura komunikado?
- 5) Kiuj trajtoj necesas por efika interkultura komunikado?
- 6) Pruvu per ekzemploj el iu lingvo la intiman rilaton inter lingvo kaj kulturo!
- 7) Ĉu vi travivis malagrablan situacion interparolante kun denaskalingvano uzante lian/ŝian lingvon?
- 8) Ĉu lingvokono helpas progresi en profesio, en la socia hierarkio?
- 9) Kiel vi povus karakterizi la internacian anglan?
- 10) Ĉu vi konsentas ke la ELF-parolantoj devus decidi pri la evoluo de la angla lingvo?
- 11) Provu kompari la lernadon de la angla kaj esperanto laŭ diversaj kriterioj!
- 12) Kion signifas la fleksebla strukturo de Esperanto?
- 13) Diskutu, ĉu Esperanto estas ekologia lingvo!
- 14) Cxu la lingvo Esperanto en si mem povus solvi la problemon de interkultura komunikado?

KOUTNY Ilona

Komparoj en la parola kaj korpolingva komunikado inter ĉinoj kaj eŭropanoj

Resumo

Interhoma komunikado inkluzivas vortan komunikadon kaj nevortan komunikadon, tio montriĝas, ke homoj povas komuniki ne nur pere de lingvo (parola aŭ skriba), sed ankaŭ pere de gestoj, movoj, rigardoj, uzado de aĵoj, kiel vestoj, koloroj ktp. Interkultura komunikado inter individuoj el malsamaj kulturoj povas okazi miskomprenoj pro malsamaj interpretoj de esprim- kaj agmanieroj kiel laŭteco, intonacio, gestoj, grado de ĝentileco kaj grado de afableco. Diferencoj en la historio, geografia medio, vivmaniero, humanisma kaj socia medio de Ĉinio kaj Okcidentaj landoj kaj malsamaj kulturoj ĉefe kaŭzis diferencojn en parola kaj neparola komunikado. Ĉi tiu studo celas montri diferencojn en la parola kaj korpolingva komunikado inter Ĉinio kaj Okcidento.

1. Komunikado

Laŭ Vikipedio, Komunikado signifas interŝanĝon de informoj inter personoj aŭ maŝinoj, bestoj, plantoj, mikroorganismoj, ktp. Interkultura komunikado estas komunikado inter partoprenantoj el malsamaj kulturoj kaj samtempe la nomo de la disciplino, kiu studas tiun. Interhoma komunikado inkluzivas vortan komunikadon kaj nevortan komunikadon. Homoj povas komuniki ne nur pere de lingvo (parola aŭ skriba), sed ankaŭ pere de gestoj, movoj, rigardoj, uzado de aĵoj, kiel vestoj, koloroj ktp. Tre gravas aliaj komunikeblecoj, kiuj plifortigas, kompletigas la lingvan komunikadon, sed ili povas eĉ anstataŭi tion (la pantomimo tion eluzas arte), aŭ ŝanĝi ties bazan signifon aŭ malfidindigi tion (Koutny 1998). Korpa lingvo estas grava nevorta komunikmetodo.

Kulturaj diferencoj kaŭzas diferencojn en la komunikado. Aparta eco de la interkultura komunikado estas ke povas okazi miskomprenoj pro malsamaj interpretoj de esprim- kaj agmanieroj kiel laŭteco, intonacio, gestoj, grado de ĝentileco kaj grado de afableco (vikipedio: interkultura komunikado).

2. Diferencoj en parola komunikado

2.1. Salutvortoj

Diversaj kulturaj fonoj kreis malsamajn manierojn saluti. Ĉinoj ŝatas demandi unu de la alia nomon, aĝon, unuon kaj enspezon kiam ili renkontas unu la alian. Okcidentanoj malŝatas esti demandataj pri privataj aferoj kiel aĝo kaj enspezo.

Renkontante konatojn survoje, ĉinoj ofte interŝanĝas tiajn demandojn:

Ĉu vi jam manĝis?


Kien vi iras?

Ĉu vi estas okupata?

Vi iras al la laborejo, ĉu? aŭ

Mi jam longe ne vidis vin, vi denove peziĝis. ktp.

Laŭ la ĉinaj tradicioj *Kien vi iras?* Ĉu vi manĝis? estas nur diri saluton unu al la alia pro ĝentileco, ne vere dezirante scii kien vi volas iri aŭ ĉu vi jam manĝis. Sed okcidentanoj eble pensus, ke vi volas inviti ilin al vespermanĝo aŭ enmiksiĝi en iliajn privatajn aferojn, tio kaŭzus miskomprenojn.



La ĉina salutmaniero estas tre komplika, sed la okcidenta salutmaniero kaj komenco de interparolo estas iom pli simpla. Kiam okcidentanoj renkontiĝas, ili kutime salutas laŭ la tempo: *Bonan matenon, Bonan tagon, Bonan vesperon!* aŭ laŭ la situacio demandas *Kiel vi fartas!* aŭ pri la vetero: *Bela tago, ĉu ne?* aŭ simple diras *Saluton!*

Post la reformado kaj malfermo, influite de eksterlandaj kulturoj, kiam homoj renkontiĝas, pli kaj pli da ĉinoj, aparte junaj ne plu demandas, ĉu vi jam manĝis aŭ kien vi iras, sed ofte salutas simple kiel *Matenon! Saluton!* Diferencoj en parolmanieroj kuŝas en tio, ke en Ĉinio, montri zorgon pri la sano de aliaj estas signo de kulturo kaj ĝentileco. Kiam ĉinoj renkontas konatojn survoje, ili ofte diras sen ia skrupulo:

Ha, pli aĝa frato, vi lastatempe plipeziĝas!

Aŭ per komplezema tono:


Ho, pli aĝa frato, vi denove maldikas, atentu vian korpon!

Aŭ kun granda zorgemo:

Vi aspektas pala. Kio okazas al vi? Vi devus iri al kuracisto.

Sed kiel sentas sin la okcidentanoj, aŭdinte tion: *Vi estas dika. Vi estas tiel maldika? Vi devus iri al kuracisto...?* Eĉ se ili estas konatoj, ili povas senti sin embarasaj kaj malfacile respondas.

Ankaŭ malsamas la faroj ĉe salutoj inter Ĉinio kaj Okcidento. En Okcidento troviĝas salutmanieroj kiel manpremo, kiso, mankiso, brakumo kaj antaŭe viroj deprenis ĉapelon. Sed Ĉinio antaŭe estis feŭda reĝimo, intima kontakto publike kiel kiso inter malsamaj seksoj estis rigardata kiel nedeca. Laŭ konfuceanaj etiketreguloj, eĉ donante aŭ ricevante ion, ne decas ke la viro kaj virino tuŝu unu la alian. Antaŭe ĉinoj renkontante riverencis reciproke, t.e. faris respektan ĝentilan movon de la korpo, konsistanta en klino de la busto aŭ flekso de la genuoj. Kun la progreso de la socio kaj la influo de fremdaj kulturoj, krom riverenco en formalaj okazoj, la plej multaj homoj salutas unu la alian per manpremoj aŭ brakumoj, sed la lasta okazas nur inter samaj seksoj, virinoj nur etendas sian manon por manpremo. Budhisma salutmaniero okazas en Orienta Azio kaj Suda Azio. Riverenco estas tradicia etiketo en Ĉinio. Ĝi estas ofte uzata en antikvaj kaj modernaj tempoj, plejparte uzata por gratuloj, novjaraj salutoj kaj aliaj festaj okazoj.



riverence saluti (maldekstre: antaŭe; dekstre: nuntempe)



maldekstre: tradicia etiketo de la ĉina nacio dekstre: Budhisma saluto

2.2. Adiaŭaj vortoj

Estas multaj diversaj adiaŭaj vortoj en la ĉina kaj okcidentaj lingvoj. *Adiaŭ! Ĝis la revido! Ĝis la venonta fojo!* estas la plej komunaj adiaŭaj vortoj. Tamen en Ĉinio estas iom pli komplikaj adiaŭaj vortoj kaj manieroj. Ekzemple, kiam ĉinoj forsendas gaston, la gastiganto (aŭ kun familio) ofte akompanas la forirantan gaston ĝis la pordo, eĉ malsupra pordego, dirante simile kiel *Marŝu malrapide! Atentu! Ne tuj iru! Venu denove venontfoje! Adiaŭ, iru bone! Bone gardu vian sanon!* La foriranta gastu ĝentile petas: *Ne faru al vi la penon min akompani. Vi eniru! Bonvolu resti!* ktp. Okcidentanoj ĉe disiĝo ridete diras nur: *Adiaŭ! Ĝis la revido! Ĝis la venonta fojo! Bonan nokton!*

Kiam oni adiaŭas pacienton en hospitalo aŭ en hejmo, ĉinoj ofte diras kiel: *Trinku pli da akvo! Surhavu pli da vestaĵoj! Ripozu frue!* ktp. por montri zorgon pri la paciento. Sed okcidentanoj ne parolas tiamaniere, ili diras *Bone zorgu pri vi mem!* aŭ *Mi deziras al vi rapidan resaniĝon.* ktp.

Kiam oni deziras foriri, ĉinoj ofte diras: *Mi nun foriras.* aŭ *Estas malfrue, mi devas foriri.* Irante al la pordo, ili diras: *Mi bedaŭras, ke mi perdis vian tempon.* aŭ *Mi bedaŭras, ke mi okupis tiom da tempo.* Okcidentanoj ŝatas diri: *Nu, estas agrable revidi vin, sed mi nepre iros baldaŭ. Mi esperas, ke ni povos renkontiĝi baldaŭ denove.*

2.3. Alparoloj

Alparolo estas nemalhavebla parto de lingvo, kaj ĝi estas nomo uzata por esprimi la rilaton inter homoj. Ĝi havas gravan socian funkcion. Ĝi estas la rekono de la identeco, statuso, rolo kaj reciproka rilato de la alparolato fare de la alvokanto, kaj ĝi ludas

rolon en konservado kaj plifortigo de diversaj interhomaj rilatoj. Ĉiu lingvo havas siajn unikajn nomsistemon kaj uznormojn. Sendube gravas plene kompreni la diferencojn en la specoj de nomoj en malsamaj lingvoj kaj socioj inter la Oriento kaj la Okcidento, por antaŭenigi lingvan komunikadon kaj plibonigi la kvaliton de komunikado.

Hall (1966) dividis la distancon en 4 kategoriojn. Koutny (1998) aplikas ankaŭ al alparoloj: publika, socia, persona kaj intima rilatoj. La alparoloj apartenas al la lingva ĝentileco, dependas de sociologiaj faktoroj kaj efektive startigas aŭ pluigas la interparolon. La aziaj ĝentilecformoj estas sufiĉe komplikaj.

2.3.1. Diferencoj en familiaj rilatoj

Plejparto de la alparoloj inter parencoj povas esprimi la identecon, generacion, proksiman rilaton en Ĉinio, ekz. kuzo ĉu patrinflanka aŭ patroflanka estas klara en la ĉina lingvo, sed en Okcidento, la enhavo ne estas tiel komplika kiel ĉinaj alparoloj, kaj estas malfacile vidi la specifan rilaton inter parencoj en la alparolo. Ekz. en Esperanto la vorto “frato” povus rilati al kaj pli juna frato kaj pli aĝa frato. Sed en Ĉinio pli aĝa frato kaj pli juna frato havas malsamajn alparolojn,

Ĉinoj ŝatas uzi parencon alparolon al konato eĉ al nekonato, ekz. al pli aĝa vira konato: Fraĉjo Zhang, Onjo Zhang; al nekonato: Fraĉjo, Franjo, Oĉjo, Onjo.... Se la maljunulo estas en la sama generacio kiel lia/ŝia avo kaj avino, ili alparolas lin/ŝin per «familia nomo + avo/avino» (ekz. Avĉjo Zhang). Tiaj alparoloj kiel *avo/avino*, *onklo/onklino* ktp., inter neparencoj estas ofte aŭdataj en Ĉinio.

2.3.2. Reflekti la diferencojn en identeco kaj statusa rilato

Vortojn kiel *sinjor(in)o*, *fraŭl(in)o*, *doktor(in)o*, *profesor(in)o* k.s. oni ofte uzas antaŭ propra nomo de persono en Okcidento, sed en Ĉinio, tute male, ĉiam kiel “familia nomo + titolo aŭ socia rango”. Ĉar en Ĉinio alparoloj ofte reflektas la diferencon en aĝo kaj statuso, montrante la identecon kaj titolon de la alparolata persono.

Kiam junuloj vidas maljunulojn, ne decas nomi ilin rekte per iliaj nomoj, sed respekte nomas ilin *respektataj sinjoroj* aŭ per aliaj honoraj titoloj. Same, ne decas ke subuloj rekte voku sian superulon per la nomo, sed ili devas komenci per titolo aŭ ofico, Ĉi tio estas neeviteble ligita al ĉinaj tradicioj de miloj da jaroj. Tamen en okcidentaj landoj, krom en iuj specialaj okazoj, ĉiuj povas nomi unu la alian per la propraj nomoj, eĉ inter parencoj kaj aliaj plenkreskuloj.

En Okcidento, ne ekzistas respondaj alparoloj kiel la ĉinaj, ĝenerale per la antaŭnomo; en kelkaj kazoj, ili rigardas la socian statuson de la alia partio, kiel “titolo + familia nomo”, ekz. *Sinjoro Lang*, *Profesoro (John) Wells*. Eble, la kerno de okcidentaj kulturoj estas emfazi la penadon de individua libereco kaj la egalecon de viroj kaj virinoj.

Sed la tradiciaj hierarkioj de Ĉinio estas vastaj, laŭ la pensmaniero de Han-nacieco, ĉiuj havas relativan identecon kaj statuson, kiu ofte estas enkorpigita per titoloj, kiuj inkluzivas okupojn. Tial en la ĉina, vortoj kiel “instruisto”, “kuracisto”, “direktoro” ktp. povas esti uzataj kiel titoloj, ekz. oni nomas min “Instruisto GONG” (laŭ ĉina vortordo: GONG instruisto aŭ GONG profesoro/doktoro). Ŝifu (‘majstro’) estas la plej populara formo de alparolo inter la laboristoj. “Sinjoro” estas titolo de ĝentileco uzata por la viroj. Nuntempe “Sinjoro” estas pli kaj pli populara inter junaj generacioj.

2.4. Laŭdoj

Kiam ĉinoj ricevas laŭdojn, kutime ili ŝatas montri tian ĉinan modestecon:

- Via Esperanto estas tre bona.
 - Ne, ne, mia Esperanto estas tre malbona.
- Vi faris tre bonan laboron.
 - Ne, mi ne pensas tiel. Ĝi estas la rezulto de komunaj klopodoj.
- La rakonto kiun vi verkis estas tiel interesa.
 - Ne, ne, nur tiel iel.

Estas multe da ĉinaj modestaj vortoj. Laŭdate de aliaj, eĉ en la koro estas feliĉa, ĉinoj estas humilaj, kutime esprimas modestecon, kaj havas aron da modestaj vortoj kiel 惭愧[cán kuì] ‘honte’, 哪里[nǎ li] ‘supraĵe’: kie, fakte ĝi estas uzata kiel ĝentila respondo al komplimento, 寒舍[hán shè] ‘mia modesta domo/hejmo’, 拙文[zhuō wén] ‘mia fuŝa/modesta verko/artikolo/skribaĵo’ ktp. Tiuspeca modesteco, en la okuloj de okcidentanoj, ne nur neas la memon, sed ankaŭ neas la aprezon de la laŭdanto.



Dume en Okcidento, kiam oni ricevis laŭdojn, kiel: *Vi aspektas tiel bela. Vi flue parolas Esperanton.* Oni tre simple respondas *Dankon!* Okcidentanoj adoras perso-

nan lukton, kaj estas precipe fieraj pri siaj atingoj. Ili neniam kaŝas sian memfidon, honorsenton kaj ĝojegon post kiam ili atingis sukceson.

Kontraste, la ĉina kulturo ne rekomendas montri personan honoron, sed prefere konsilas modestecon. Ĉinoj kontraŭas la melonstilan fanfaronadon de Avino Wang¹.

2.5. Dankvortoj

Ĉinoj uzas la vorton *dankon* malpli ofte ol okcidentanoj, precipe malofte inter tre proksimaj amikoj kaj familianoj. Oni opinias, ke familianoj aŭ parencoj kaj amikoj devus helpi unu la alian, Do se vi faras aferojn por aliaj kaj aliaj faras aferojn por vi, Vi ne bezonas diri “dankon”. Laŭ nia opinio, la vorto “dankon” estas ĝentila vorto, se ĝi estas multfoje dirata, oni havus la senton esti traktata kiel fremdulo. Troa formo de ĝentileco estas embarasa. La okcidentanoj estas dankemaj, ĉiam volonte respondas “dankon” por montri komprenon, eĉ inter parencoj, amikoj kaj familianoj.

Same, ĉinoj malofte elbuŝigas frazon kiel *Mi amas vin*. Sed oni povas senti amon el jenaj paroloj inter filino kaj patrino. Ĉina knabino telefonas al sia patrino: *Panjo, prizorgu vin mem! Malvarmiĝis, do surmetu pli da vestoj. Cetere, mi ĵus aĉetis por vi paron da lanaj gantoj...* Usonanoj, rekte: *Panjo, mi amas vin*.

3. Korpolingvaj diferencoj en komunikado

3.1. Vizaĝesprimoj

Homa vizaĝo estas la plej esprimplena korpoparto. Vizaĝesprimoj estas ne nur emocia esprimo, sed ankaŭ tre grava komunikilo. Eĉ tre malgranda brovsulko, rideto kaj palpebrumo povas transdoni niajn sentojn unu al la alia. Tamen la sama vizaĝesprimoj multe diferencas en diversaj kulturoj.

Kiam ni asocias emociojn kun mimiko, kulturo ludas tre gravan rolon. Iuj ligoj inter emocioj kaj mimikoj estas universalaj. Iuj diferencas pro diversaj kulturoj. Ekzemple ĉinoj kutime uzas rideton aŭ ridon por kaŝi siajn negativajn emociojn, krom se ili montras siajn verajn emociojn antaŭ intimaj homoj. Tamen homoj en Okcidento estas instruitaj de frua aĝo montri verajn emociojn. Tial, la diferencoj inter malsamaj kulturoj povas facile kaŭzi miskomprenojn inter la du partioj. Respekti kaj kompreni ĉi tiun kulturalan diferencon estas la plej bona maniero solvi konfliktojn.

¹ 【王婆卖瓜，自卖自夸】 [wáng pó mài guā, zì mài zì kuā] Avino Wang vendas melonojn kaj mem troigas la kvaliton de siaj varoj — fari laŭdon al si mem [al sia farajo]; kanti laŭdojn al si mem; sin glori. Ĉiu vulpo sian voston laŭdas².

3.1.1. Okula kontakto

La uzo de okuloj en komunikado inkluzivas: okulan kontakton, eviton de okula kontakto kaj aliajn okulajn movadojn, kiel turni la okulojn al aliaj homoj, levi brovojn, serĉi informojn de aliaj homoj, ktp. Okula kontakto plenumas multajn funkciojn en ĉiutaga vivo. Ekzemple: regi konversacion, regi intimecon, komuniki temojn interesajn aŭ malinteresajn, akiri reagojn, esprimi emociojn kaj influi unu la alian.

Ling (1997) atentigas, ke homoj en iuj landoj mallevos siajn okulojn rigardante unu la alian por montri respekton unu al la alia. En iuj kulturoj, ĉi tio estas konsiderata kiel insulto. Okula kontakto signifas respekton en unu kulturo, kaj malrespekton en alia. Se vi rigardadas fikse kaj rekte al via ĉina interparolanto, tiu lasta sentos sin malkomforta. La edukado, kiun ĉinoj ricevis de multaj jaroj, estas trakti gastojn kun ĝentileco. Ne rigardu en la okulojn de la alia persono parolante, aŭskultu pli kaj parolu malpli, alie ili estos konsiderataj neĝentilaj. En Ĉinio kaj aliaj aziaj landoj, kiam homoj komunikas inter si, ili ĝenerale evitas longe rigardi rekte aŭ fikse al la interparolanto.

Homoj en anglalingvaj landoj havas longan kaj pli oftan okulan kontakton parolante, kaj opinias, ke manko de okula kontakto signifas mankon de sincereco, malhonestecon aŭ evitadon, kaj eble ankaŭ timemon. Okcidentanoj indignus kaj miskomprenus, se ĉinoj evitas okulan kontakton, kredante, ke ĉinoj havas timemajn vizaĝesprimojn kaj evitemajn okulojn, kaj ne estas sufiĉe honestaj kaj sinceraj. Tamen la ĉinoj sentas, ke okcidentanoj ĉiam rigardas homojn en konversacio, kaj opinias, ke tio estas malĝentila.

Parolante al aliaj aŭ publike, multaj ĉinoj ofte hontas fari okulan kontakton kun la publiko. Ĉi tiu aliro estas fakte malĝentila en la okuloj de okcidentanoj. Kiam okcidentanoj komunikas kun homoj, ili antaŭĝojas pri okula kontakto. Precipe parolante publike, okcidentanoj havas multajn movadojn dum la parolado, ili de tempo al tempo marŝas antaŭ la spektantaron, esprimas eksciton kaj svingas siajn brakojn por plifortigi la infektan povon. Iliaj okuloj ankaŭ skanas la ejon, kaj la spektantaro renkontiĝas per siaj okuloj, indikante ke ili atente aŭskultas.

3.1.2. Ridetoj kaj ridoj

Ridetoj kaj ridoj kutime transdonas amikecon, proksimecon, kontenton, feliĉon, ĝojon kaj plezuron. Ĉi tio ĝenerale aplikeblas en Ĉinio kaj aliaj landoj. Sed Ĉina rideto povas havi multajn signifojn. Ĝi povas signifi akcepti la bonkorecon de la alia, esprimi aprezon, konsenton, malkapablon paroli, embarason kaj eviton.

Azianoj (Ĉinoj) estas pli konservemaj, kutimas kaŝi sin per vizaĝa emocio, ol elmontri sentojn. Ĉinio estas, kiel aliaj partoj de Orienta Azio, ofte karakterizata kiel kulturo de «emocia sindeteno». Ĉinoj kutime uzas rideton aŭ ridon por kaŝi siajn negativajn emociojn – por eviti ĉagreni aliajn, kaj interrompi socian harmonion, krom se ili montras siajn verajn emociojn antaŭ proksimaj homoj.

Multaj ĉinoj havas la koncepton «harmonio estas la plej valora», ili atentigas harmonion. Unue ili bonvenigas unu la alian kun rideto, kaj poste diskutas la aferon. Okcidentanoj pensas linie, iliaj vortoj kaj faroj kongruas kun siaj psikologiaj agadoj, iliaj sentoj estas elmontritaj, tre rektaj (vd. Gong XF 2021; LIU Yang 2015).

Menciinde estas, ke ĉinoj kelkfoje ridetas por forigi embarason, sed okcidentanoj havas ion nekompreneblan pri tio. Okazis tia afero en ĉina kafejo: fremdulo senatente renversis la teleron, sentante sin tre embarasita. La ĉinoj rigardantaj ridis kaj tio eĉ pli kolerigis lin. Fakte la ĉinaj homoj rigardantaj ne ridas pro li aŭ lia malfeliĉo. Ĉi tio nur transdonas serion da mesaĝoj: Ne prenu tion tro serioze, ĉi tia afero ne estas granda afero; Estas bone nur ridegi, ne gravas, tia afero ofte okazas al iu ajn, ktp. Tamen. Por tiuj, kiuj ne konscias pri ĉi tiu sinteno, rido vekos ilian malkontenton kaj pligravigos ilian koleron (Deng Yanchang 1989).

Ĉinoj kutime ne montras ridantan vizaĝon al nekonatoj, nur kiam ili petas helpon, ekzemple kiam ili petas direktojn. Ĉinoj kutime ne ridetas renkontante nekonatojn en sociaj situacioj. Tio ankaŭ okazas inter nekonataj instruistoj kaj studentoj. Se oni senkaŭze ridetas al ĉino, kiu ja sentos tion nekomprenebla. Do, ili agas kvazaŭ, ĉinoj malpli ridus!

3.1.3. Brovsulkado kaj levado de brovoj

En la ĉiutaga vivo, oni povas trovi, ke ĉinoj kutimas sulki la brovojn, dum okcidentanoj ŝatas levi brovojn. La ĉina brovsulkado havas iom da memprotekto, ĝi okazas kiam iu estas konfuzita, invadita aŭ timigata. Ĉinoj ankaŭ brovsulkos, kaj nuntempe ili premos siajn vangojn por protekti sin. Ĉi tio plue konfirmas la implican kaj introvertitan karakteron de la ĉinoj.

Okcidentanoj kutimas levi ambaŭ brovojn, esprimi grandan ĝojon aŭ ekstreman surprizon. Se levi nur unu brovon signifas, ke oni ne komprenas aŭ havas demandojn. Kompare kun orientanoj, okcidentanoj havas fortan personecon: sendependecon, honestecon kaj sincerecon.

Por alia ekzemplo, kiam oni esprimas la signifon de nescio, embaraso aŭ rezignacio, la ĉina kutimo estas skui sian kapon aŭ svingi siajn manojn aŭ rideti amare; okcidentanoj levas la ŝultrojn kaj etendas la manojn.

3.2. Gestlingvo

La gestlingvo de diversaj landoj, nacioj kaj regionoj havas sian identecon kaj sian apartecon. Mi prenis kelkajn ekzemplojn por iom prezenti la diferencojn.


3.2.1 Etendi la montran fingron supren

En Ĉinio, oni kutime etendas la montran fingron supre por indiki la nombron, kiu povas rilati la entjerojn kiel unu, cent, mil ktp. En Japanio, Koreio, Filipinoj, Indonezio, k.a., nur signifas unu aŭ unufoje. En Singapuro, dum konversacio, etendi la montrofingro indikas ke tio, kio estas diskutata, estas la plej grava afero.

En Usono: peti iun atendi. En Aŭstralio, en trinkejo, restoracio, ĝi signifas: “glason da biero mi petas.” En Francio, Birmo kaj aliaj landoj, ĝi signifas “peto” kaj “bonvolu”. En Francio, kiam studento volas respondi la demandon en la klaso, li etendas sian montrofingron supren al la instruisto.

3.2.2. Alvoki iun

Por esprimi “Venu ĉi tien”, en Ĉinio malsamas por voki infanojn kaj plenkreskulojn. Kutime por voki plenkreskulojn, oni faras la geston kun mankavo malsupren, same en Japanio; sed voki bestojn aŭ infanojn estas male kun mankavo supren.



Tamen estas tute male en Okcidento: en Usono, fari geston per mankavo malsupren estas gesto por alvoki hundon. En multaj eŭropaj landoj, alvoki homojn: manplatoj supren, fingroj svingiĝantaj tien kaj reen (tio ja estas gesto por voki hundon en Azio).

3.2.3. Grati al si la kapon

Kiam homoj unue renkontas pli formalan scenon aŭ aperas antaŭ iuj homoj sen mensa preparo, ili ofte estas iom superfortitaj kaj vole nevole gratas al si la kapon, tia subkonscia gesto, reflektas la embarasan psikologion. En Ĉinio, tio signifas embarason, en Japanio ĝi signifas koleron. En la plej multaj okcidentaj landoj, tio signifas ke ili ne komprenas aŭ ne povas sekvi ies pensojn, kaj ili signalas al la alia partio por peti klarigon refoje.



Alia ekzemplo, kiam oni esprimas nescion, embarason aŭ rezignacion, ĉinoj kutime skuas sian kapon aŭ svingas siajn manojn aŭ ridetas amare; okcidentanoj levigas la ŝultrojn kaj etendas la manojn.

4. Konklude

- 1) Rilate komunikadon, estas grandaj diferencoj inter Ĉinio kaj Okcidento. Kompreni kulturajn diferencojn povas helpi nin eviti problemojn aŭ konfliktojn en transkultura komunikado.
- 2) Diferencoj en la historio, geografia medio, vivmaniero, humanisma kaj socia medio de Ĉinio kaj Okcidentaj landoj kaj malsamaj kulturoj kaŭzis diferencojn en parola komunikado, sed ankaŭ la korpa lingvo / metakomunikado de diversaj landoj, nacioj kaj regionoj havas sian identecon kaj apartecon.
- 3) Ni devas studi kaj studi la diversajn manifestiĝojn de ĉinaj kaj okcidentaj kulturaj diferencoj en komunikado, por pli bone kaj pli ĝuste komuniki ankaŭ en Esperantio.

Bibliografio

Deng Yanchang & Liu Runqing 1989: *Lingvo kaj Kulturo*. Pekino: Fremdlingva Instruado kaj Esplora eldonejo. Ĉine

Gong Xiaofeng 2021: Diferencoj inter orientaj kaj okcidentaj kulturoj en Esperanta Instruado. En: Ilona Koutny & Ida Stria & Michael Farris (red.): *Interkultura rolo de Esperanto*. Poznań: Rys. 93-102.

Hall, Edward T. 1966: *The Hidden Dimension*, Doubleday

Interkultura komunikado: https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Interkultura_komunikado&oldid=7248493

Komunikado, <https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Komunikado&oldid=7368317>

Koutny Ilona 1998: Interkultura komunikado. En: Wandel, Amri (red.): *Internacia Kongresa Universitato*. Rotterdam: UEA.

Ling, Chu-Wen 1997: Crossing cultural boundaries. *Nursing*, 72(3): -34

Liu Yang 2015: *East meets West*. Köln: Taschen

GONG Xiaofeng (1962-), Esperante Arko, universitata Profesoro pri media scienco kaj inĝenierado ĉe Nanchang-Universitato, Ĉinio; doktoro pri Nutra Kemio and Nutrado, vizitanta profesoro en Cardiff Universitato, Britio (2006-2007). Esperantistiĝis en 1980, instruis Esperanton multjare ĉe la Universitato de Nanchang. Honora membro de ILEI, vicprezidanto de ILEI (2013-2018), prezidanto de Ĉina Ligo de Esperantistaj Instruistoj (2009-2018), sekciestro de ILEI-CN (2009-2018). Studento de Interlingvistikaj Studoj de AMU, en Poznano 2021-2024.

Ĝentileco en internacia kunteksto per la uzo de Esperanto

Resumo

Lingva ĝentileco – grava faktoro en sukcesa komunikado – elformiĝis en diversaj kulturoj. Kiaj normoj funkcias sur internacia nivelo? – Ĉi tiu problemo aperas uzante i.a. la anglan kiel lingvafrankaon kaj Esperanton. La aŭtoro klopodas konstati la normojn por la internacia Esperanta parolkomunumo surbaze de enketo (partoprenantoj el 30 landoj el 4 kontinentoj). Ŝi esploras la salutojn, formojn de alparoloj, petojn kaj iliajn rifuzojn.

La demandoj rilatas ankaŭ al miskomprenoj – kiuj povas okazi pro kulturaj diferencoj malgraŭ la travidebla strukturo de Esperanto – kaj al korektoj kiuj okazas pro la alta lingva konscio de Esperanto-parolantoj. Ankaŭ konversaciaj tabuoj estas esploritaj. La analizo venas al la konkludo ke komunikado kaj la uzataj lingvaj formoj estas pli senperaj en Esperantio pro aparteno al la memelektita parolkomunumo kaj la simpla, malambigua lingva strukturo. La studo baziĝas sur la la angla teksto de Koutny 2022.

1. Enkonduko

Lingva ĝentileco en iu kulturo supozas ĝentilecon inter denaskaj parolantoj de la donita lingvo kun la fono de la komuna denaska kulturo kaj bona konduto. La ĝentileco de la denaska parolanto validas ankaŭ en interagoj inter fremda parolanto kaj denaska parolanto en la ĉirkaŭaĵo de la denaska parolanto. La adaptiĝo okazas ankaŭ en ELF-komunikado: nedenaskaj parolantoj de la angla provas adaptiĝi al la denaskaj normoj por esti pli bone komprenataj (Jenkins 2022). Ĝentileco estas integra parto de pragmata kompetento.

Nuntempe, pli kaj pli da homoj kun diversaj kulturaj devenoj kaj gepatraj lingvoj komunikas je internacia nivelo, kie komuna lingvo – ne denaska lingvo por iu ajn el la interparolantoj – estas uzata. Temas plej ofte pri EIL (English as an international language ‘angla kiel internacia lingvo’) alivorte ELF (English as a lingua franca ‘angla kiel lingvafranka), kiu ofte regas en internaciaj kontaktoj. Estiĝas la demando, kiaj ĝentilecaj normoj validas en tia komunikado, ĉu la ĝentilecaj normoj de Britio aŭ de Usono validas aŭ la hejmaj/denaskaj normoj de la interparolantoj? Sed ĉi tiuj estas malsamaj! Praktike, la malsama lingvouzo, konfrontiĝo de malsamaj kondukt- kaj dirmanieroj povas rezultigi miskomprenojn, problemojn kaj ofendojn (ekz. Pawlas & Paradowski 2020).

Ĉu eblas entute paroli pri **internacia kulturo kaj internaciaj normoj de ĝentileco** en la lingva konduto rilata al ĝi? Ĉu eblas trovi universalan profundan strukturon

en ĝentilaj esprimoj? Pri la fakto saluti konatojn, danki pro la helpo – certe, sed la konkretaj lingvaj formoj estas malsamaj kutime. Ĉu la amaskulturo kaj la amaskomunikado disvastigas iujn unuecajn komunikajn normojn, kaj tiel ĝentilec-normojn? Estas multaj demandoj kaj problemoj solvindaj en ĉi tiu kampo.

Estas multaj studoj pri transkultura pragmatiko, pri akiro de normoj de lingva ĝentileco por difinita kulturo (Brown & Levinson 1992, Leech 1983, Sachiko Ide 1986, Culpeper 2011, ktp.), sed malpli pri la normoj de ĝentileco en lingvafranka komunikado (vidu la lastatempan volumon de Walkinshaw 2022), la lingvaj aspektoj de interkultura komunikado estas eĉ malpli esploritaj ol la intrakulturaj aspektoj. Interkultura (mal)ĝentileco estas ne sufiĉe studata tereno, kvankam internaciaj kontaktoj estas pli kaj pli oftaj pro la plurlingvaj socioj, tutmondiĝo kaj migrado (kp Haugh & Kádár 2017). La modelo de ĝentileco de Brown kaj Levinson estas neadekvata por kompreni socipragmatajn diferencojn en ĝentilecsistemoj trans kulturoj (kp Haugh & Chang 2015) kaj la agordojn de internacia komunikado. Ĉi lasta interaga aliro emfazas la komprenon de la partoprenantoj pri ĝentileco por levi soci-pragmatan konscion pri ĝentileco trans lingvoj kaj kulturoj. Walkinshaw (2022:4) atentigas pri la fakto ke paroladoj en interkulturaj kuntekstoj estas konceptitaj prefere kiel tujaj, intertraktaj kaj kunkonstruitaj ol antaŭestablitaj. Interagaj normoj por ELF-uzantoj celas simplan kaj kompreneblan komunikadon. Sed tio rezultas en malsamaj solvoj pro malsamaj situacioj, en diversaj landoj.

La **lingvo** uzata por la komunikado ankaŭ havas gravan rolon, kun sia strukturo kaj enkonstruita kultura ŝarĝo, kiel ĝi povas servi al la memesprimo de la parolantoj kaj la adekvata transdono de informoj, per ĝia travidebleco, ne-ambigeo (Koutny 2020). En la sekvoj estos analizataj la komunikadstrategioj en la internacia lingvo Esperanto, ĉefe la konversaci-komencaj esprimoj de esperantistoj, kaj iliaj opinioj pri konversaciaj temoj estos prezentataj surbaze de enketo.

2. Internacia komunikado en internacia lingvo

La angla iĝis nekontesteble internacia lingvo aŭ lingvafrankao en la lastaj jardekoj pro la kreskanta politika kaj ekonomia potenco de Usono kun Granda Britio. Kvankam ĝiaj denaskaj parolantoj estas malpli ol tiuj de la ĉina aŭ la hispana, ĝi estas parolata en multaj landoj tra la mondo (vidu Crystal 2003) kiel oficiala lingvo (ekz. Barato, Sudafriko) aŭ kiel fremda lingvo, tiel ke nedenaskuloj plimultas ol la denaskaj parolantoj nuntempe. La angla prononco kaj frazeologio restas defio por la eksterlandaj parolantoj kaj lernantoj, tial la aktuala signifo de komunikaĵo estas intertraktata dum la interago en ELF-komunikado inter la interparolantoj, kaj ĝi ŝanĝiĝas de situacio al situacio. ELF ne havas tutmonde validan normon, ĝi povas esti determinita nur per la devio de la oficialaj anglaj lingvoj. La malsamaj uzantoj povas havi malsamajn problemojn, ankaŭ la komunikaj normoj kaj la efikeco povas esti malsamaj en ĉi tiuj situacioj.

Interkultura komunikado devas venki kulturajn diferencojn, kaj la lingvo uzata por komunikado povas fari komunikadon pli facila aŭ malpli facila. Estas alternativa lingvo kreita por internacia komunikado kaj funkcianta en tiu ĉi rolo ekde 1887, tio estas **Esperanto**. Ĝi supozeble pli bone subtenas la praktikan interkulturan komunikadon pro sia travidebla kaj regula strukturo, malpli ambigua kaj kompona semantika sistemo kaj malpli granda kultura ŝarĝo (vidu kelkajn komparojn inter la angla kaj Esperanto en Koutny 2005 kaj 2020). Estas interese kiel la kulturaj diferencoj povas esti venkitaj, kaj kiel la komunikadstrategioj estas similaj aŭ malsamaj por Esperanto kaj ELF (pri Esperanto kiel lingvafrankao vidu ankaŭ Fiedler & Brosch 2022).


Kaur (2022) mencias kelkajn strategiojn por ELF kiel: interkonsento de signifo: komprenkontroloj, klarigpetoj, ripetoj kun alĝustigita prononco, parafrazo, pli simpla reformulado; eksplicitigaj strategioj: mem-revortumo, mem-riparo, interaga riparo, klarigkonfirmpetoj, diskursrefleksiveco; kaj ankaŭ kodŝanĝo kaj eksterlingvaj rimedoj. Memkorektado kaj korektado fare de la interparolantoj estas kutima afero dum komunikado en Esperanto (vidu malsamajn strategiojn en Fiedler & Brosch 2020), eĉ la kontrolo en la ampleksa vortaro PIV (disponebla en la interreto), pro la altaj lingvaj interesiĝo kaj konscio de Esperanto-parolantoj. La Esperanto-lingva komunumo interesiĝas kutime pri lingvaj problemoj, ĉar la organiza forto de la komunumo estas la lingvo mem. Ili estas scivolemaj pri kultura alieco kaj toleremaj por nekonvenciaj kondutoj kiuj estas la bazoj de interkultura kompetento. Esperanto funkcias en interkultura komunikado jam de 135 jaroj, do elformiĝis kelkaj neskribitaj komunikaj formoj. Koncerne la komunikadon inter la membroj de memelektita (lingva) komunumo plej ofte regas neformalaj formoj.

3. Enketo pri kelkaj bazaj parolagoj en Esperanto

3.1. Partoprenantoj

122 respondantoj el 30 landoj el 4 kontinentoj (Eŭropo: 16, Azio: 7, Ameriko: 6 kaj Aŭstralio: 1) plenigis la retan enketilon pri kelkaj bazaj elementoj de lingva ĝentileco en Esperantlingva komunikado. Tio donas bonan samplon pri la diversnaceco de esperantistoj:

Argentinio (3), Belgio (2), Brazilo (14), Bulgario (1), Ĉinio (2), Ĉeĥio (3), Francio (13), Germanio (10), Granda Britio (5), Hungario (1), Indonezio (1), Irano (3), Japanio (6), Suda Koreio (10), Kroatio (1), Meksiko (1), Nederlando (1), Norvegio (1), Nov-Zelando (1), Peruo (1), Pollando (10), Rusio (5), Svedio (5), Svislando (1), Hispanio (11), Turkio (1), Urugvajo (2), Ukrainio (1), Usono (5) kaj Vjetnamio (1).




Figuro 1: Nombro de respondantoj / landoj


Koncerne la nombron de respondantoj, la sekvaj landoj estas plej bone reprezentataj: Brazilo (14), Francio (13), Hispanio (11), Germanio (10), Koreio (10), Pollando (10). En tiuj landoj – inter ili ekstereŭropaj – la Esperanto-movado estas sufiĉe vigla. 59,8 % de la respondantoj vivas en grandaj urboj, plia 31,1% en malgrandaj urboj kaj nur 9% en vilaĝoj.

3.2. Aĝo

La aĝo-distribuo montras la pli altan aĝon de esperantistoj: 32 + 13,1 = 45,1% havas pli ol 60 jarojn kaj 30,3% estas inter 46-60 jaroj. Se aldoni al tio la kategorion de 32-45 jaruloj, 48,3% estas mezaĝa. La juna generacio estas multe malpli reprezentata: 6,6% inter 21-30 jaroj. Pli junaj tute ne aperas. Esperanto estas malofte gepatra lingvo, sed ekzistas, eĉ en la nuna enketo. Tiu ĉi aĝo-distribuo karakterizas Esperantion.



Figuro 2: Aĝo-distribuo




Figuro 3: Edukiteco

3.3. Edukiteco

Plejmulto de la respondantoj havas superan edukadon: 63,1%, aldone 32,8% eĉ doktoran gradon, nur 4,1% ne havas superan edukitecon. Tiun ĉi distribuon klarigas la fakto ke miaj konatoj kaj iliaj konatoj devenas ĉefe el tiu medio.

3.4. Gepatraj lingvoj

La gepatraj lingvoj de la respondantoj montras la saman diversecon kiel la landoj. La plej multaj gepatralingvanoj estas: hispana 13,9%, franca 11,5%, portugala 9,8%, pola kaj korea 9%, anglalingvanoj nur 4,9%, germanlingvanoj 4,1%, rusa kaj sveda 3,3%, ĉeĥa kaj japana 2,5% ktp. Entute 43 lingvoj kolektiĝis, 5-foje aperis 2 gepatraj lingvoj, 3 kun esperanto (2 foje germana-esperanta kaj 1 sveda-esperanta).



Figuro 4: Gepatra lingvo de la respondantoj

3.5. Lingvokono

El la enketo rezultas, ke esperantistoj parolas plurajn lingvojn, do ilia lingva konscio baziĝas ankaŭ sur sia lingvoscio. Unue estas la angla (93,4%), 49 personoj parolas ĝin je alta nivelo, kaj nur 8 personoj (6,6%) el 122 ne parolas la anglan, do ankaŭ esperantistoj spertas la mondan tendencon (tio estas ne surprize inter multaj respondantoj kun supera edukado). La franca (71%) estas sur la dua loko, poste la

hispana (65%), la germana (27%). Multaj aliaj lingvoj estas menciitaj sur malsamaj niveloj inkluzive de la indianaj lingvoj keĉua kaj ajmara, la minoritataj lingvoj eŭska kaj bretona, la antikvaj lingvoj sanskrito kaj latino, la kreola papiamento, la artefarita tokipona kaj gestlingvo.

3.6. Frekvenco de la uzo de Esperanto

Dekomence, spertaj parolantoj de Esperanto estis petataj respondi la demandojn, ĉar nur ili povas doni fidindajn respondojn koncerne la lingvan ĝentilecon. Tiel ne estas surprizo ke 57.4% uzas la lingvon – parole aŭ skribe – preskaŭ ĉiutage, 20.5% eĉ en la familio, 23% ĉiusemajne kaj nur 20,5% uzas ĝin laŭokaze.

4. Salutoj

Saluto estas baza elemento de homa komunikado, *enkondukante kaj ebligante la pluan komunikadon de la partneroj*. Normale ĝi estas determinita per la *socia distanco kaj intimeco de la komunikantoj, per aĝo, sekso kaj iliaj diferencoj, aparteno al la sama pli malgranda komunumo*. Kutime, la renkontiĝo aŭ la foriro, kaj la horo de la tago ankaŭ kondukas al malsamaj formoj. En kelkaj lingvoj tiuj povas esti sufiĉe kompleksaj, sed en internacia lingvo kiel Esperanto, tiuj estas sufiĉe simplaj. Krom la evidenta klarigo, ke ne nur la lingva strukturo, sed ankaŭ la lingvouzo estu simpla en internacia lingvo, menciindas, ke aparteno al la sama – memelektita – parolkomunumo rezultas en pli simplaj kaj neformalaj komunikadstrategioj, inkluzive salutojn.

Lingvo	formala renkontiĝo	formala foriro	neformala renkontiĝo	neformala foriro
Eo	Bonan matenon / tagon / vesperon	Ĝis revido	Saluton	Ĝis
En	Good morning / — / evening	Good Bye	Hi, Hey	Bye
Pl	— / Dzień dobry / Dobry wieczór	Do widzenia	Cześć, Witaj	Cześć; Na razie

La salutoj sub la formala kategorio ne estas vere formalaj en Esperanto, prefere neŭtralaj, ili povas esti uzataj ankaŭ en neformalaj situacioj kiel la polaj formoj. Prefere la uzo de neformalaj formoj estas limigita al ilia kategorio – simile al la pola uzo. Sed Saluton estas pli kaj pli uzata ĉe iu ajn renkonto. 65,6% deklaris ĝin kiel kutima formo eĉ kun nekonataj personoj aŭ pli foraj konatoj. Ĉi tio povus esti klarigita ankaŭ per tio, ke esperantistoj loĝas en malsamaj landoj, do skribante unu

al la alia aŭ interrete interparolante ili havas malsamajn horzonojn: por unu partnero mateno kaj por la alia vespero. Mi aŭdis la inĝenian solvon: *Bonan tageron!* Tiel, ĉi tiuj formoj estas normale uzataj ne vere depende de la formaleco de la rilato inter la interparolantoj. Inter la junularo disvastiĝas la mallonga formo Sal[?]. La tempo rilataj salutoj (*Bonan matenon / tagon / vesperon*) ankaŭ estas uzataj kun iu ajn. La uzo de Bonan vesperon/nokton! povas esti malsama.

Foje la diferencigo en la gepatra lingvo de la parolanto aŭ tre oficiala situacio kiu estas sufiĉe malofta, povas rezultigi malsamajn formojn. Estis demando en la enketo pri aĝdiferencigoj por salutoj. 82% ne diferencigas la uzatajn formojn laŭ aĝo, tiuj kiuj diferencigas inkluzivas pozojn, japanojn, koreojn, vjetnamojn kiuj havas diferencon ankaŭ en sia gepatra lingvo. Entute 77,9% ne diferencigas la uzatajn formojn laŭ la socia pozicio (al instruisto, gvidanto).

La **metakomunikado** akompananta saluton estas malsama en la mondo: riverenco, manpremado, brakumoj aŭ kisoj. En internacia renkontiĝo se iu formo superregas, tio estus la manpremo. La kisoj estas normalaj en proksima rilato en Eŭropo, sed ne en Azio. Ĝi povas okazi dum Esperanto-kongresoj, eĉ inter eŭropaj kaj aziaj partoprenantoj, kiam oni renkontas iun post longa tempo. Tio atestas la adaptiĝon al la eŭropaj kaj amerikaj normoj. Aziaj esperantistoj povas uzi kliniĝon/riverencon inter si.


5. Alparolformoj

Komence de kaj dum la konversacio, alparolformoj estas uzataj plurfoje por *altiri la atenton de la interparolanto kaj establi aŭ konfirmi la rilaton inter la partneroj*. Ili dependas – simile al la salutoj – de la rilato inter la partneroj, kaj ankaŭ de aĝo kaj socia statuso. Por la hungara kaj la pola mi distingas 4 kategoriojn depende de la proksimeco de la rilatoj de la interparolantoj, sed por Esperanto sufiĉas la du bazaj kategorioj formala/neformala (aŭ V/T), eĉ ili estas interplektitaj, ĉar la plej multaj el la situacioj estas neformalaj. Socia pozicio kaj sekso ne havas multe da influo al la uzataj formoj.

Entute 85,2% de la respondintoj komencas leterojn per *kara* (+ persona nomo) en la kazo de amikoj kaj bonaj konatoj, foje simple Saluton. Okaze de nekonataj personoj, 41 % alparolas la alian per estimata *sinjor(in)o*, pliaj 21 % uzas *kara sinjor(in)o*, foje aldoniĝas la familia nomo. Estas speciala Esperanta formo samideano, uzata kun *estimata* aŭ *kara* de 18%. *Saluton* ankaŭ aperas foje en sufiĉe formalaj situacioj (4%). Vjetnamino klarigas la komfortan situacion en Esperantio kie permesatas uzi simple *kara* + persona nomo, sed ĉe aziaj esperantistoj ŝi uzas prefere *kara sinjor(in)o*.

Pri la alparolformoj en konversacio kun amikoj kaj konatoj, preskaŭ ĉiufoje estas elektataj la personaj nomoj aŭ iliaj (Esperantaj) kromnomoj. Kvar personoj menciis la familian nomon en tiu ĉi kunteksto, unu kun klarigo, tio por japanaj esperantistoj. Ĉe nekonataj personoj aŭ ne proksimaj konatoj oni pli ofte uzas *sinjor(in)o* + familia nomo

(37,7%), oni povus aldoni ĉi tie la simplan *sinjor(in)o* (9,8%) kaj la simplan familian nomon (8,2%), kune ĉirkaŭ 56%. La sekva plej populara formo estas la persona nomo (19,7%). Ĉeestas ankaŭ la *sinjor(in)o* + persona nomo (10,7%), kio estas prefere neformala maniero alparoli iun en la pola. Inter ili estas nur 3 poloj el 10, 2 hispanoj, 2 brazilanoj kaj unu ukraino, franco, indoneziano. *Samideano* estas uzata de 5%, tio ne estas multe uzata nuntempe. *Sinjor(in)o* + funkcio okazas ankaŭ en 4% de la respondoj.



Figuro 5: Alparolformoj

Ĉi tiuj rezultoj estas pli proksimaj al la usonaj kaj eŭropaj formoj de adreso. Tio signifas, ke aziaj esperantistoj adaptiĝas al tiu pli neformala lingvouzo, sed estante en azia kunteksto, ili uzas pli formalajn formojn. Estis kontroldemando: Ĉu estas diferenco alparolante esperantistojn en Esperanto kaj via nacia lingvo? Entute 43,4% respondis ke jes. Tio signifas la ŝanĝon de alparolformoj por pli neformalaj en Esperanta kunteksto, kio estas la kazo de aziaj parolantoj.

Esperanto havas nur unu pronomon en la dua persono, kaj por singularo kaj pluralo vi sen distingo de formaleco. Ĉi tio helpas la komunikadon inter homoj de malsamaj niveloj de statuso, aĝo aŭ intimeco sur egala nivelo. La manko de diferencigo inter Sg- kaj Pl-formoj estus bonvena.

6. Peti ion

Petoj povas havi diversajn fomojn ekde simplaj senperaj ĝis kaŝitaj petoj kiuj dependas de la rilato inter la partneroj, de la valoro de la petita aĵo aŭ servo kaj ankaŭ de la donita kulturo. Anglaj paroladoj estas pli senperaj (*sit down* ‘sidiĝu’, *give your name* ‘diru vian nomon’), sed aziaj pli komplikaj, implicitaj.

La respondoj por *Kiel vi petas proksiman konatulon prunti skribilon?* estis (de senperaj petoj ĝis pli ĝentilaj):

Donu al mi skribilon!

Vian skribilon mi petas.

Ĉu vi pruntus al mi skribilon?

Bonvolu (prunte)doni al mi skribilon.

Pruntedonu vian skribilon, mi petas.

Ĉu vi povas pruntedoni al mi vian skribilon?

Ĉu vi bonvolas/ bonvolus doni al mi skribilon?

Bonvole, pruntedonu!

Ĉu mi povas uzi/prunti vian skribilon?

Ĉu mi rajtas pruntepreni vian skribilon?

Ĉu mi povus uzi/prunti vian skribilon?

Bonvole, ĉu vi povas doni al mi tiun skribilon?

Bonvolu pruntedoni skribilon, mi petas.

Ĉu vi afable povus pruntedoni al mi skribilon, bonvolu?

Mi bezonas skribilon.

Ĉu vi havas skribilon?

La unuaj du petoj estas senperaj parolagoj (*donu; mi petas*). La sekvaj 9 entenas iujn ĝentilajn elementojn (*bonvolu* + verbo; verbo + *mi petas; ĉu vi pruntus; ĉu vi povas pruntedoni...*; *Ĉu mi povas/povus/rajtas uzi/prunti*), krome estis 3 komplikaj ĝentilaj formoj (uzo de de almenaŭ du ĝentilaj elementoj: *bonvolu ... mi petas*). La senpera parolago por peto *vian skribilon mi petas* uzas “mi petas” kiel parton de la frazo, dume la ĝentila formulo “mi petas” kutime aperas aldone. La lastaj du frazoj estas peraj parolagoj, t.e. aludoj (*mi bezonas... Ĉu vi havas..*).

La sama peto por neproksimulo entenas similajn solvojn, sed sen la du unuaj senperaj petoj. Tie aperas ankaŭ pli ĝentilaj formuloj kiel *pardonu/pardonon/mi pardonpetas* (enkondukante la peton pli ol 20 foje:

Ĉu mi povas peti vin puntodoni vian skribilon?

Bonvolu pruntedoni al mi vian skribilon, mi petas.

Ĉu mi rajtas uzi vian skribilon?

Pardonu min, ĉu mi povus pruntepreni vian skribilon? La mia estas *kialo*

Mi pardonpetas, sed mi bezonas skribilon. Ĉu vi bonvolus pruntedoni al mi dum malmulta tempo vian?

Pardonu, sinjor(in)o! Ĉu vi eble povus pruntedoni skribilon?

Pardonon, ĉu vi pruntas al mi skribilon?

Ĉu vi havas iun liberan skribilon por doni min?

(kara) Sinjor(in)o + familia nomo, ĉu vi bonvolus pruntedoni al mi skribilon?

Kelkfoje, ĉefe en pli formalaj kazoj, la peto komenciĝas per alparolo. La formuloj *Ĉu mi povas/rajtas...? Mi petas..., Bonvolu ...!* estas pli oftaj. La proporcio de im-


perativaj kaj demandaj frazoj pli-malpli egalas en neformalaj kazoj, sed en formalaj kazoj la demandaj frazoj plimultas. Estas nur unu deklara frazo kun aludo (*Mi bezonas skribilon*) kio estas normala en komunikado, sed implicitaj formoj (deklaraj frazoj aŭ demandoj kiel Ĉu vi havas skribilon?) evitindas en internacia parolkomunumo, ĉar ili povas esti nekomprenataj.

La kutima peto en Esperanto estas *bonvolu* + infinitivo, sed kelkfoje aperas *bonvole* + imperativa verbo kaj ankaŭ *Ĉu vi povas bonvole prunti...* uzatas, ĉefe far azianoj.

Ĝentilaj petoj ofte havas **3-paŝan strategion**: (1) komenca klarigo kial oni petas; (2) la peto mem kaj (3) promeso de ia posta kompenso (vd Szili 2004). Nur unu persono skribis ke li/ŝi donus kaŭzon por peti skribilon. Kaze de pli grava peto la motivigo necesus, same la kompenso. Pensu pri prunto de mono! Nepra necesas indiki kiam oni redonos.

7. Rifuzo de peto kaj esprimo negativa opinio

Estas konate, ke japanoj evitas rifuzi peton, sed usonanoj tion faras rekte. Kia estas la aliro de la multkultura Esperanto-parolkomunumo al tiu ĉi demando? Entute 33,6% de la respondintoj rifuzas rekte petojn. Multe pli alta procento, tio estas 52,5%, provas komuniki la rifuzon nerekte kaj nur 7,4% ne rifuzas petojn. Ses personoj respondis, ke tio dependas de la situacio kaj persono.



Figuro 6: Rifuzo



Figuro 7: Negativa opinio

En la kazo de negativa opinio, 42,6% diras sian opinion rekte kaj simila nombro, 44,3% evitas tion en eksplicita formo, sed 13,1% tute ne diras tion. Do, en ambaŭ kazoj la rekta kaj malrekta esprimoj de rifuzo aŭ negativa opinion estas normalaj strategioj en la esperantista lingvokomunumo.

8. Miskomprenoj kaj korektoj

Inter homoj povas okazi miskomprenoj, sed en internacia parolkomunumo tio okazas pli ofte pro malsamaj kulturaj fonoj. Ankaŭ la lingvo uzata por komunikado povas kontribui al tio. Uzante lingvon kun multaj ambiguecoj kiel la angla, tio pli verŝajne okazas (ekzemploj en Pawlas & Paradowski 2020). Havante malpli ambiguan lingvon kiel Esperanto, oni atendus ke miskomprenoj estu minimumigitaj. Sed ni vidu la respondojn! El la respondintoj 16 respondis, ke ili ne havis miskomprenojn aŭ ili ne memoras miskomprenojn en komunikado en Esperanto. Pliaj ses, ke ili malofte okazas, entute 18%. La aliaj respondoj akceptas miskomprenojn kaj la plej multaj el ili donas kaŭzon aŭ sian propran sperton. Ĉi tiuj inkluzivas:

- kulturajn diferencojn (18%): 17 + 4 mencias miskomprenojn en komunikado kun azianoj
- nesufiĉan lingvokonon (12%): 13 + 2 influon de la gepatra lingvo.

Kvar personoj mencias miskomprenojn pro malsamaj politikaj aŭ religiaj konvinkoj, kaj aliaj kvar simple pro personaj diferencoj, sekvaj kvar respondantoj deklaras, ke miskomprenoj ne dependas de la lingvo uzata, entute tio okupas 12 aŭ 10% de la enketitoj. Laŭ tiuj rezultoj, esperantistoj konscias, ke la komuna lingvo ne povas tute solvi la problemojn de internacia komunikado, ĉar kulturaj diferencoj povas rezultigi miskomprenojn. Kelkaj el ili konsideras, ke miskomprenoj estas normala parto de komunikado pro malsamaj opinioj en diversaj kampoj de la vivo, ĉefe en politiko kaj religio. Kvankam Esperanto faciligas komunikadon pro sia regula strukturo kaj malpli ambigua vortprovizo, povas esti diferencoj inter la lingvokono de siaj parolantoj, kaj tio povas rezultigi miskomprenojn (neĝusta uzo de vorto, falsaj amikoj, influo de la gepatra lingvo – kiel indikite).

La **korekto** de aliaj estas delikata afero en komunikado, tio povas ofendi la interparolanton, do ĝi povus esti malĝentila, sed kiel jam dirite komence, tio estas normala en Esperanta konversacio. El la enketo rezultas, ke nur 8,2% ĝeniĝas, se ili estas korektataj, sed granda plimulto (65,6%) ne. Aliaj donas kelkajn klarigojn:

Mi ĝojas, ĉar tiel mi povas liberiĝi de miaj eraroj; mi eĉ petas la interparolanton fari tion;

Tio estas bonvena, se tio estas farita en ĝentila formo;

Korektoj bonvenas, sed mi kontrolas ilin;

Tio dependas kiu korektas min kaj kiel, en kiu situacio;

Ne estas problemo, se sperta persono aŭ amiko faras tion;

En diskuto tio povas ĝeni, rompi la parolfluan;

Aspektas tiam ke la alia ne interesiĝas pri la enhavo, sed volas simple montri la erarojn;

Tio ne estas agrabla, sed en ordo;

Tio devas esti farita tolereme kaj pedagogie; helpeme, ne riproĉante.

Iuj homoj ne korektas aliajn (32%), iuj aliaj faras (13,1%). Tio dependas de la situacio, de la persono. Estis diversaj klarigoj en aliaj respondoj: ofte oni proponas korektojn nur se la alia petas esti korektata. Pedagogia kaj sufiĉe ĝentila maniero atentigi pri la eraro estas ripeti la frazon en ĝusta maniero – kiel multaj faras tion. Kiel instruisto, ili faras tiel, aŭ se la alia estas komencanto. Grandaj eraroj estas prefere korektataj aŭ kiam la eraro rezultigus miskomprenon.

9. Konversaciaj temoj kaj tabuoj

La Esperanto-parolkomunumo estiĝis el la adeptoj de la komuna lingvo Esperanto, do ne estas mirinde, ke la **du ĉefaj konversaciaj temoj** rilatas al la *lingvo* (al ĝiaj strukturo kaj vortoprovizo): 29,5% kaj al *kongresoj aŭ pli malgrandaj renkontiĝoj*: 31,1%. La tria plej grava temo estas hobiaj: 10,7%, poste venas komunikado sur egala bazo – la baza principo de la Esperanto-movado. Pluraj respondoj deklaras: pri ĉio; ĉiutaga vivo; realaj eventoj. Iuj respondoj donas: dependas de la interparolanto kaj situacio. La aliaj menciitaj temoj aperas 1-2 fojojn: familio, hejmlando, kulturo, turismo, vivo, Zamenhof, klaĉo kaj politiko.

Tiu ĉi superrigardo montras, ke esperantistoj fokusiĝas al sia lingvo, renkontiĝoj, siaj ŝatokupoj, ĉiutaga vivo kaj malpli al aktualaj problemoj de la mondo aŭ politiko. Tio atestas neŭtralan politikan sintenon, kiu estas deklarita principo de la Esperanto-movado, kaj helpas la komunikadon sen konfliktoj.

Negranda plimulto opinias, ke nenio estas **tabuo por konversacio**, sed pli malgranda duono de la respondintoj mencias kelkajn tabuajn temojn: politiko (21), sekso (15), religio (13), mono (7), persona intimeco (4), vakcinado, pandemio (3), neŭtralaj pronomoj por homoj (2), virinaj aĝoj (1) kaj 10 personoj respondis, ke tio dependas de la interparolanto. Tiuj ĉi respondoj konfirmas la *politike neŭtralan sintenon de esperantistoj*, almenaŭ evitante diskutojn pri politikaj demandoj kun aliaj esperantistoj. Eviti diskutojn pri seksrilataj demandoj kaj religia konvinko estas ofta tabuo en sociaj rilatoj, ne nur en la kunteksto de esperantistoj. Mono kaj salajroj ankaŭ povas aparteni al tabuoj. Persona intimeco kaj nuntempe, vakcinado povas esti konsiderataj tabuo. Interese, ke ankaŭ la lingva problemo de seksneŭtrala pronomo¹ por homoj estas ankaŭ menciita. Kelkaj respondantoj respondis, ke la tabuaj temoj dependas de la interparolantoj.

Pri la demando *Ĉu Esperanto helpas diskuti delikatajn problemojn?* (ekz. malsamaj politikaj opinioj, traktado de minoritatoj) 60,7% respondis jes, 21,3% ne, kaj la aliaj donis kelkajn klarigojn. Iu skribis, ke Esperanto povas kaŝi la diferencojn, sed ne venki ilin. Esperanto helpas havi rigardon al aliaj aliroj en aliaj kulturoj, interne de la sama kulturo oni prefere evitas politikajn diskutojn. Ofte delikataj problemoj estas evitataj.

¹ Ekzistas tri pronomoj en Sg3 en Esperanto: *li*, *ŝi* kaj *ĝi*. *Ri* estis proponata kiel neŭtrala pronomo por homo ĝenerale. *Ĝi* estas uzata ĉefe far junuloj.

10. Interkultura komunikado per Esperanto

Al la rekta demando, ĉu Esperanto povus per si mem solvi la problemojn de interkultura komunikado, 36,1% donis pozitivan respondon, 49,2% opinias ke ĝi parte povas kaj nur 14,8% donis negativan respondon. Tio signifas, ke 85,3% (36,1+49,2) de la respondintoj opinias, ke *Esperanto povas esti bona ilo por internacia komunikado*, eĉ se iuj demandoj povus kaŭzi problemojn kaj estas evitataj. 64% (49,2+14,8) vidas, ke *lingvo ne sufiĉas por solvi problemojn*, por diskuti delikatajn problemojn, kulturaj kaj personaj diferencoj devas esti konsiderataj.

Estis demando, ĉu estas *diferenco en la komunikado uzante Esperanton aŭ la anglan*. 13,3% sentas nenian diferencon, sed dek respondantoj, tio estas 8%, havas la anglan kiel gepatran lingvon (!), kaj 26,5% sentas diferencon. La aliaj donis kelkajn diferencojn:

Estas baza harmonio kun alia esperantisto;
 Ni estas en la sama grupo kun similaj moralaj kaj psikologiaj trajtoj;
 Esperanto donas ian familiarecon kun la partnero; kreas ligan inter la partneroj;
 Ni elektis Esperanton por esti proksimaj al aliaj;
 Esperanto estas mia lingvo, ne fremda lingvo kiel la angla;
 Mi ne sentas egalecon parolante la anglan; En la angla mi ofte alfrontas la limojn de mia kapablo esprimi min, sed ne en Esperanto;
 Estas pli komforte/facile/libera paroli Esperanton, esprimi min;
 Esperanto estas pli fleksebla; vortoj povas esti faritaj, sed en la angla ne;
 Estas malfacile esprimi nuancojn en la angla;
 Ne ekzistas fiksjaj reguloj pri ĝentileco por Esperanto, tial oni povas paroli pli libere.

Parolante la anglan iuj respondantoj havas malsupereco-komplekson pro sia lingvosocio, fari erarojn aŭ miskompreni la alian, ĉefe parolante kun denaskaj parolantoj de la angla; iu mencias ke ekzistas aliaj antaŭsupozoj pri valoroj en la angla. El ĉi tiuj respondoj, rezultas ke:

- 1) la trajtoj de **la lingvo influas la facilecon de komunikado**; la fleksebleco trovita je diversaj niveloj de Esperanto donas senton de libereco en sinesprimo. Aliflanke, la angla kaŭzas senton de erara lingvouzo kaj eblaj miskomprenoj.
- 2) La alia diferenco venas el tio, ke la esperantistoj havas **parolkomunumon** kiel la naturaj lingvoj havas, eĉ pli intiman komunumon, ĉar ili elektis aparteni al ĝi, do estas **familiareco** inter interparolantoj, kaj simileco en **iuj bazaj valoroj**, kiuj faciligas komunikadon kaj donas bazan senton de egaleco. Aliflanke, la angla kiel lingvafrankao ne havas parolkomunumon, tial ĝi ne kreas bazan pozitivan etoson. Ĝi estas nur ilo.

11. Konkludoj

Esperanto uzata ĉefe en internaciaj kunteksto havas alian pozicion ol la angla kiel internacia lingvo, kaj tio ankaŭ videblas en la ĝentilecaj formoj. Esperanto-parolantoj sentas sin aparteni al memelektita parolkomunumo kiu havas kelkajn komunajn valorojn kiel egaleco en komunikado kaj paco (vidu ankaŭ Galor & Pietiläinen 2015, Stria 2017), kaj havas komunan kulturon kune kun siaj denaskaj kulturoj. ELF-parolantoj havas nenium komunan kulturon kaj komunajn komunajn valorojn, ili devas negoci siajn komunikajn formojn laŭ la donita situacio kaj medio.

Esperantistoj havas ian antaŭestablitajn normojn kaj nur parto devas esti intertraktata dum la komunika procezo. Ĉar ili apartenas al la sama komunumo, la esperantistoj uzas la neformalajn formojn de komunikado – kiel provas la enketo – koncerne la salutojn kaj alparolojn. Ne estas multe da diferencoj parolante kun proksima aŭ malproksima konato, kun amiko aŭ gvidanto. Tiuj ĉi formoj venas el la eŭropaj kaj usonaj kutimoj, do aziaj esperantistoj adaptiĝas al tiuj formoj. Tion helpas ankaŭ la uzo de esperanta nomo, ofte traduko de ilia origina nomo.

La nereakta rifuzo de petoj kaj malemo diri negativajn opiniojn estas influataj de la denaskaj kulturo kaj ĝentila konduto provanta eviti konfliktojn. La kulturaj diferencoj, kiuj ekzistas ene de internacia lingvokomunumo, ne povas esti nuligitaj aŭ ignorataj, tial miskompreno povas okazi, ankaŭ pro nesufiĉa lingvoscio. La plimulto de Esperanto-parolantoj konscias pri la diferencoj kaj alieco de la partneroj. Korektoj aŭ memkorektoj okazas kutime dum konversacioj, iuj eĉ petas sian interparolanton pri korektoj.

Lingvaj interesiĝo kaj konscio estas karakterizaj por esperantistoj. La konversacio restas ofte en ĝentilaj kadroj, ĉar esperantistoj provas eviti delikatajn temojn kiel politikon, religion aŭ seksajn aferojn, kie iliaj opinioj povus ofendi aliajn. Ili koncentriĝas pri la lingvo mem, Esperanto-renkontiĝoj kaj movado, ŝatokupoj kaj ĉiutaga vivo en alia lando. Kvankam preskaŭ duono de la respondintoj opinias, ke ne estas tabuoj en Esperantaj konversacioj, kaj granda plimulto opinias, ke Esperanto faciligas diskutojn pri delikataj/tabuaj temoj.

Grava fina esplorkampo rilatas al la demando: ĉu Esperanto pli faciligas la komunikadon ol la angla. La plimulto donis pozitivan respondon atentigante la trajtojn de la lingvo kaj la familiarecon de la parolkomunumo. Do, ĝi povus pli bone plenumi la rolon de interkomunikilo ol la angla – kiel homoj parolantaj ambaŭ lingvojn konfirmas. Sed eble estas antaŭkondiĉo por esti esperantisto: esti malfermita al la alieco, egaleco kaj kunlaboro...

Bibliografio


- Brown, Penelope & Levinson, Stephen 1987: *Politeness. Some Universals in Language Usage*. Cambridge: Cambridge University Press.
Crystal, David 2003: *English as a global language*. Cambridge: Cambridge University Press

- Culpeper, Jonathan 2011: Politeness and impoliteness. En: Karin Aijmer and Gisle Andersen (red.): *Pragmatics of Society*. Berlin: Mouton de Gruyter: 393–438.
- Fiedler, Sabine & Brosch, Cyrill 2020: Interkultura komunikado per Esperanto: ĉefaj trajtoj. En: Koutny & Stria & Farris: 121–136.
- Fiedler, Sabine & Brosch, Cyrill 2022: *Esperanto – lingua franca and language community*. John Benjamins
- Galor, Zbigniew & Pietiläinen, Jukka 2015: *UEA en konscio de esperantistoj*. Dobrichovice: Kava-Pech
- Haugh, Michael & Kádár, Dániel Z. 2017: Intercultural (Im)politeness. En: Culpeper, Jonathan & Haugh, Michael & Kádár, Dániel Z. 2017: *The Palgrave Handbook of Linguistic (Im) politeness*. Palgrave MacMillan. 601–632.
- Haugh, Michael & Chang, Wei-Lin Melody 2015: Understanding im/politeness across cultures: an interactional approach to raising sociopragmatic awareness. En: *IRAL International Review of Applied Linguistics*
- Jenkins, Jennifer 2022: Accommodation in ELF: Where from? Where now? Where Next? En: Walkinshaw: 17–34.
- Kaur, Jagdish 2022: Pragmatic strategies in ELF communications: Key findings and a way forward. En: Walkinshaw: 35–54.
- Koutny, Ilona 2005: Interkultura komunikado en Eŭropo: la angla kaj esperanto kiel alternativaj komunikiloj. En: Ch. Kiselman (red.) 2005: *Symposium on Communication Across Cultural Boundaries*. Dobrichovice: Kava-Pech. 115–132. <http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/interkulturakomunikadoeu.html>
- 2020: The role of languages in intercultural Communication. En: Koutny & Stria & Farris: 19–30.
- 2022: Politeness in an international context through the use of Esperanto. En: Koutny I. & Wolarska-Sobocińska (red.) 2022: Politeness in different languages and cultures. Rys
- Koutny, Ilona & Stria, Ida & Farris, Michael (red.) 2020: *The Role of Languages in Intercultural Communication / Rolo de lingvoj en interkultura komunikado / Rola języków w komunikacji międzykulturowej*. Poznań: Rys.
- Pawlas, Elżbieta & Paradowski, Michał B. 2020: Misunderstandings in communicating in English as a Lingua franca: Casuses, prevention, and remediation strategies. En: Koutny & Stria & Farris: 99–120.
- PIV: *Plena Ilustrita Vortaro* 2020. <http://vortaro.net>
- Stria, Ida 2017: Language attitudes among Esperanto speakers. En: *Język. Komunikacja. Informacja* 12: 146–158.
- Szili, Katalin 2004: *Tetté vált szavak 'Words which became acts'*. Budapest: Tinta könyvkiadó
- Walkinshaw, Ian (red.) 2022: *Pragmatics in English as a Lingua Franca: Findings and Developments*. Boston/Berlin: Walter de Gruyter

KOUTNY Ilona




Interlingvistiko, origine scienco stariganta normojn por helplingvoj, plivastigis sian esplor-kaj studobjekton dum cent jaroj da sia ekzisto. Ĝi iĝis interdisciplina sciencobranĉo, kiu kovras ne nur historion, teorion kaj praktikan esploron de planlingvoj, sed krome lingvoplanandon, lingvonormigon, multtingvecon, lingvopolitikon kaj aliajn aspektojn de komunikado, inklude de internacia uzado de etnaj lingvoj. Larĝe difnata kompreno kaj malfermas al interlingvistiko novajn horizontojn kaj ebligas pli profundan specialiĝon en unuopaj aspektoj. La lernolibro de Věra Barandovská-Frank estas rezulto de dudekjaraj spertoj de studado kaj instruado en kunlaboro de la instruistino kaj la studentoj. La prezentata materialo respegulas iliajn preferojn kaj dezirojn pri enhavo de la enkonduka interlingvistika kurso.



Ĉu ekzistas Esperanta kulturo? – sonas la dubanta demando de ne-esperantistoj. Al tiu demando donas abundan – sed ne elĉerpan – respondon la nuna libro. Esperanta kulturo elformiĝis dank'al ĝia lingvokomunumo, dismetita en la mondo. Ĝi riĉiĝas daŭre el la kulturoj de siaj parolantoj, do temas pri inkluziva kulturo. La 15 ĉapitroj de 13 aŭtoroj el 10 landoj prezentas Esperantan kulturon ekde arto tra la ĉiutaga kulturo ĝis la pensmaniero de esperantistoj.

La unuaj du volumoj de la serio *Interlingvistikaj Studoj* estas elŝuteblaj el la retejo de la Interlingvistikaj Studoj de la Adam-Mickiewicz-Universitato (AMU): <http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/eldonaĵoj.html>; ĝi povas esti bona fonto por ĉiuj interesiĝantoj pri planlingvoj kaj internaciaj lingvoj.



Interkultura komunikado estas ĉiutaga afero en nia tutmondiĝinta epoko, ja homoj moviĝas de unu lando al alia por laboro, por pli bona vivo aŭ turismado, kaj la tekniko ebligas jam virtualajn renkontiĝojn el diversaj landoj. La uzata lingvo havas sian rolon en la (mal)sukceso de la komunikado, ĉu en interpersona, ĉu en internacia kunteksto. Kian rolon havas la internaciaj lingvoj kiel la angla, hispana kaj la internaciaj planlingvoj kiel esperanto en la komunikado – estas la temo de la unua volumo de la eldonserio “Cross-linguistic and Cross-cultural Studies” de la Etnolingvistika Instituto de AMU. La temo estas prezentata el teoriaj kaj praktikaj vidpunktoj, tra lingvopolitikaj kaj edukaj aspektoj, ankaŭ en la tereno de gestolingvoj dank’al la kontribuo de 20 fakuloj el 7 landoj.



Interkulturaj studoj iĝis gravaj en nia tutteriĝanta mondo por helpi la reciprokan komprenon kaj kunlaboron mondscale. La dua volumo de la eldonserio “Cross-linguistic and Cross-cultural Studies” de la Etnolingvistika Instituto de AMU prezentas la rolon de la internacia planlingvo Esperanto en la multkultura mondo: kiel la lingvo kreita por internacia komunikado peras inter lingvoj, literaturoj kaj kulturoj; kiujn defiojn ĝi alfrontas en diverskultura internacia parolkomunumo – dank’al 16 aŭtoroj el 11 landoj.

[lingvistiko/magistraj_apr22.html](https://wydawnictworys.com/)

La du unuaj volumoj de la nova serio *Cross-linguistic and Cross-cultural Studies* de la Etnolingvistika Instituto de AMU ekestis el la prilaboritaj prelegoj de la *5-a Interlingvistika Simpozio* en septembro 2020, organizita far la Interlingvistikaj Studoj. Ili enhavas artikolojn esperantajn, anglajn kaj polajn kun iliaj alilingvaj resumo. Ili estas elŝuteblaj el la retejo de la Eldonejo Rys (<https://wydawnictworys.com/>).



La 3-a volumo de la serio: *Linguistic politeness ‘Lingva ĝentileco’* aperis en 2022 kun polaj kaj anglaj artikoloj pri la lingva esprimo de ĝentileco en la lingvoj hispana, hungara, japana, kmera, korea, persa, svahila, tunezia araba kaj esperanto.

**Interlingvistika specialiĝo kadre de la studdirekto lingvistiko
kaj informmastrumado
magistraj studoj ekde 2022/23 en la Adam Mickiewicz Universitato, Poznano, Pl**

Surbaze de la 25 jaraj bonaj spertoj de la *postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj* en AMU, startis surlokaj magistraj studoj pri interlingvistiko en Esperanto, kombinitaj kun informmastrumado en la angla.

Ni bonvenigas studentojn kiuj volas akiri scion kaj spertojn pri internacia kaj interkultura komunikado, perfektigi sian scion de Esperanto kaj la angla, akiri tradukpraktikon, kaj sperti la vivon en Pollando dum du jaroj. Bona bazo por posta laboro en internacia entrepreno.

Informoj:

<https://kml.amu.edu.pl/en/interlinguistics/> kaj

http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/magistraj_maj23_alvoko.html

Aliĝo:

<https://rekrutacja.amu.edu.pl/en/studies-cataloge/linguistics-and-information-management-specialty-interlinguistics,562>

Varbfilmeto:

<https://www.youtube.com/watch?v=m-MpZxrNdwk&t=4s>

Komunikado – interŝanĝo de informoj – iĝis baza afero en la 20-a jarcento kiun la tekniko pli kaj pli subtenas. Homoj komunikas parole, skribe kaj ankaŭ bilde; persone, telefone aŭ rete, sed ankaŭ per sia konduto kaj aspekto. Komunikado povas okazi unudirekte kiu ĉefe karakterizas la amaskomunikadon aŭ plurdirekte. La internacia kaj interkultura komunikado iĝis ĉiutaga realeco pro la tutmondiĝo, tiel povas okazi konfliktoj pro la kulturaj kaj lingvaj malsamecoj. La libro donas superrigardon pri la vasta temo kaj analizas la eblecojn kaj kontribuon de Esperanto en kelkaj terenoj, en tri partoj: *Komunikado el diversaj aspektoj*, *Internacia komunikado* kaj *Interkultura komunikado*.

Komunikado kaj Esperanto estas la tria volumo de la universitataj lernolibroj de la *Interlingvistikaj Studoj de AMU* kiu ĉerpas el la 25-jaraj spertoj. La kontribuantoj estas instruistoj kaj studentoj de la Studoj: 13 aŭtoroj el 11 landoj (inter ili Humprey TONKIN, Detlev BLANKE, Bengt-Arne WICKSTRÖM). Tio certigas la internacian aliron al la problemoj.

La verko celas ne nur la studentojn de la postdiplomaj kaj la novaj magistras studoj pri interlingvistiko, sed ĉiujn kiuj interesiĝas pri la baza kaj grava temo de nia epoko, komunikado kaj la rolo de Esperanto en tio.

ISBN 978-83-67287-90-6

DOI 10.48226/978-83-67287-90-6